NOVA ESPERANTA KRESTOMATIO

UEA

NOVA
ESPERANTA
KRESTOMATIO

Jubilea Kolekto
Jarcento de Esperanto
numero 5

Jubilea Kolekto *Jarcento de Esperanto*, eldonata de Universala Esperanto-Asocio, konsistas el verkoj, kiuj formas kulturan fundamenton de la internacia lingvo. La aliaj libroj aperintaj en la Kolekto estas: *Esperanta antologio – Poemoj 1887–1981* (Auld), *Plena analiza gramatiko* (Kalocsay/Waringhien), *Lingvo kaj vivo* (Waringhien), *Trezoro – La Esperanta novelarto 1887–1986* (Rossetti/Vatré). Aperontaj: *Fundamenta krestomatio* (nova eldono kun notoj de Waringhien), nova eldono de *Enciklopedio de Esperanto*.

NOVA ESPERANTA KRESTOMATIO

REDAKTIS

WILLIAM AULD

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Rotterdam 1991

© Universala Esperanto-Asocio, 1991

Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
Nederlando

ISBN 92 9017 043 3

Presita en Nederlando
Kompostita en la Centra Oficejo de UEA
Kovrilo de Franko Luin

ENHAVO

1 ANTAŬPAROLO
William Auld 1

2 EKZERCOJ
L. L. Zamenhof (1859-1917) 5

3 RAKONTOJ 17
Józef Waśniewski (1859-1897): *En la brikejo* 19
Karl Magnus Nordensvan (1850-1903): *La kristnaska bulko* 26
Ivan Ŝirjaev (Malfeliĉulo, 1877-1933): *Ankoraŭ unu malagrablaĵo* 30
Albert E. Styler (1865-1928): *En la Dolomitoj* 36
Julio (Gyula) Baghy (1891-1967): *Kiel Miĥok instruis angle* 40
Leonard N. M. Newell (1902-1968): *La svatanto* 48
Reto Rossetti (1909): *La krutaĵo* 56
Ferenc Szilágyi (1895-1967): *La perdita velo* 59
Jean Ribillard (1904-1962): *Preĝo de M'Saud* 66
Johan Hammond Rosbach (1921): *La japana tetasaro* 71
John Francis (1924): *Ĉermoj en rikolto* 74
Marjorie Boulton (1924): *Tiel, kiel ĝi ne okazis* 81
William Auld (1924): *Familia rondo* 85
Rajna Konstantinova (1919-1983): *Sonoj el fora juneco* 88
Louis Beaucaire (1925-1983): *La bona feino Amenta kaj sinjoro Akuku* ... 94
Julian Modest (ps. de Georgi Mihalkov, 1952): *La bonmora edzo* 97
Vladimir Glazunov (1910): *La ĉarmo de ĉielmontaro* 101
Liven Dek (ps., 1950): *La bleko de l' ŝargú* 111

4 MONDLITERATURO 115
La Biblio: *La predikanto.* El la hebrea trad. L. L. Zamenhof 117
Miguel de Cervantes Saavedra (1547-1616): *La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha.* El la hispana trad. Fernando de Diego 118
Luis de Camões (1524-1580): *La luzidoj.* El la portugala trad. Leopoldo H. Knoedt 122
William Shakespeare (1564-1616): *Otelo.* El la angla trad. Reto Rossetti 128
Voltaire (1694-1778): *Kandid.* El la franca trad. E. Lanti 134
Kalevala. El la finna trad. Joh. Edv. Leppäkoski 138

Nikolaj V. Gogol (1809-1852): *La revizoro.*
El la rusa trad. L. L. Zamenhof 144
Henryk Sienkiewicz (1846-1916): *Quo vadis?*
El la pola trad. Lidja Zamenhof 149
Ivan Vazov (1850-1921): *Sub la jugo.* El la bulgara trad. diversaj; redaktis Simeon Simeonov kaj Asen Simeonov 156
Selma Lagerlöf (1858-1940): *Gösta Berling.*
El la sveda trad. Stellan Engholm 160
Lusin (1881-1936): *Post la morto.*
El la ĉina trad. S. J. Zee 172
Arisima Takeo (1878-1923): *Al miaj etuloj.*
El la japana trad. Isobe Yukiko 175
Jaroslav Hašek (1883-1923): *Ŝvejk soldatiĝas.*
El la ĉeĥa trad. Oldřich Kníchal 184
Ŝukumar Ray (1887-1923): *Ho ĝo bo ro lo.*
El la bengala trad. Badal Sircar kaj Probal Daŝgupto 189

5 EL VIVO KAJ SCIENCOJ 203
Ĉen Baŭhe: *Grandioza sporta manifestacio en Azio* 205
Alberto Fernández (1930): *Deksepa dialogo: La natura selekto* 209
Petar Giunio (1894-1968): *Zorgoplena patro.*
Reverkita de Marinko Gjivoje 216
Marinko Gjivoje (aŭ Ĝivoje, 1919-1982):
Pompejo – urbo perdita sed retrovita 218
Edward L. Johnson (1918): *Internaciaj geedziĝoj kaj privata internacia juro* 223
László Ferenc (1922): *La ŝirmado de nia medio estas komuna afero de la homaro.* Trad. Tibor Újlaky-Nagy 230
Seeiĉi Kato (1910-1987): *Pri oftalmologio* 234
Paul Neergaard (1907-1987): *Flugantaj semoj* 237
Juan Régulo Pérez (1914): *De la Hesperidinaj ĝis la Kanariaj Insuloj* 241
Leander Tell (1895-1980): *Pri la kvaternara epoko kaj la glaciegaj periodoj* 247
Yrjö Väisälä (1891-1971): *Pri simplaj astronomiaj objektivoj* 251

6 PRILINGVAJ ARTIKOLOJ 255
William Auld: *Mitoj kaj faktoj pri Esperanto* 257
Werner Bormann (1931): *Situacio kaj ebloj de la Esperanto-movado* 268
Stanley R. Dalton (1926): *Recenzo pri la angla lingvo* 279
Stellan Engholm (1899-1960): *Esperanto kaj lingva sento* 281
Eŭgeno Lanti (ps. de Eugène Adam, 1870-1947): *Vivantigi Esperanton* 285
Eŭgeno Lanti: *Ĉu kreo aŭ nur iniciato?* 287

Ivo Lapenna (1909-1987): *Kelkaj aspektoj de la lingva problemo en internacia publika juro kaj kompara juro* 289
Ivo Lapenna: *La lingva problemo en la internaciaj rilatoj* 301
Gaston Waringhien (1901): *Sociaj problemoj* 317
Claude Piron (1931): *Psikologiaj reagoj al Esperanto* 326
L. L. Zamenhof. *Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia* ... 336

7 LA ESPERANTA MUZO 367

Majstro 369
Ho, mia kor'. L. L. Zamenhof 369
Mia penso. L. L. Zamenhof 369
Zamenhofa balado. Kálmán (Kolomano) Kalocsay (1861-1976) 370
La Majstro mortis. Julio Baghy 371
Ni laŭdu lin . . . Kálmán Kalocsay 372
Zamenhof. Ferenc Szilágyi 373
Zamenhof. Hilda Dresen (1896-1981) 374
La okulisto. Marjorie Boulton 376
15.12.1959. Poul Thorsen (1915) 378
Okulisto. Geraldo Mattos (1931) 379
Miozotoj. Eli Urbanová (1922) 380

Lingvo 381
Perlas per la belo stelo-stilo Eŭgeno Miĥalski (1897-1937?) 381
el *La arto poetika.* Kálmán Kalocsay 381
Kiom longe atendi? Brian Price-Heywood (1910-1942) 383
Esperanto. Kálmán Kalocsay 385
Esperanto. Lajos Tárkony (1902-1978) 386
E.pistoloj al la niceano: La unua. G.E. Maura (ps. de G.Waringhien) ... 388
Preseraroj. Marjorie Boulton 391
Nia lingvo. Nikolaj Hohlov (1891-1953) 391
Plendo. Nikolaj Hohlov 392
Kokino kaj inkubatoro. Boris Mirski (?-1920) 393
La tunelo de S-ta Gotardo. Reto Rossetti 394
De l' lingvaj aroj estis hom' kreinto. Franjo Homar (1905-1933) 395
Omaĝe. Marjorie Boulton 396
el *La infana raso: XVIII.* William Auld 397
Pri la estonteco de miaj poemoj. Edwin de Kock (1930) 399
Letero okaze de la 90-jara jubileo de Esperanto. William Auld 399

Interna Ideo 405
La espero. L. L. Zamenhof 405
La vojo. L. L. Zamenhof 406

Preĝo sub la verda standardo. L. L. Zamenhof 407
La tagiĝo. Antoni Grabowski (1857-1921) 408
La bona Oĉjo Bion. Imre (ps. Emba) Baranyai (1902-1961) 409
Kanto de l' sklavo. Stanislav Schulhof (1864-1919) 412
En amara horo. Kálmán Kalocsay 413
Estas jam tempo. Julio Baghy 415
Popol' ni estas. Imre Baranyai 416
Amara pens'... Josip Velebit (1911) 417
Por kongresa malfermo. Julio Baghy 417
Al esperantistoj de Brazilo. Aleksandr Porfirjevič Logvin (1903-1980) .. 418
Eklogo pri la Sankta Afero. William Auld 419
el *La jubilea eposo.* Reto Rossetti 422
Idolfalo. Imre Baranyai 422
Absurdaĵo. Rejna de Jong (1922) 423
Japana kongreso en pluvego. Masayuki Kuroda (1909) 423
La plenumo. William Auld 426

Aliflanke 427
Guto. Ŝtefo Urban (ps. Steur Panban, 1913-1974) 427
La misvojo. Fernando Redondo Ituarte (1882-1949) 427
Estas mi esperantisto. Julio Baghy 428
Desperanto. Stanislav Schulhof 429
Nia plimulto. Henrik Adamson (1891-1946) 430
Propagando. Misu Beraru (1903-1938) 430
En nia lando. Misu Beraru 432
Nova kolonio. Misu Beraru 433
Verdaj plendoj. Hilda Dresen 434
Esperantisto, ekesto kaj malapero. Raymond Schwartz (1894-1973) 435
Esperanta eliksiro. Raymond Schwartz 437
Bonan matenon, Majstro. William Auld 438

8 INTERNACIA LIRIKO 439
La danco de la pluvo. Eugène Nielen Marais (1871-1936); el la afrikansa trad. Edwin de Kock 441
La kanto de Pal Golemi. El la albana trad. Miloš Lukáš 442
Vintra nokto. Gottfried Keller (1819-1890); el la alemana trad. Hilda Dresen 443
La tigro. William Blake (1757-1827); el la angla trad. William Auld ... 443
Epigramo. Ibn Durajd (837-933); el la araba trad. J. Kohen-Cedek 444
La lito de l' paŝtisto. El la armena trad. Francisco Valdomiro Lorenz ... 445
La regno de la mortintoj. Ko Nimo (1934); el la asanta trad. Albert Goodheir 445

Dialogo. El la babilona trad. Kálmán Kalocsay 446
Kvinminuta kunveno de vesper' ĝis mateno. Mihas Harnak (1929);
el la belorusa trad. Romano Grinŝpan 447
Karinjo, ĉu decas tiel. Robindronath Tagor (1861-1941);
el la bengala trad. Probal Daŝgupto 448
Publikulino. Hristo Smirnenski (1898-1923);
el la bulgara trad. Simeon M. Simeonov 449
La fraŭlino el la kvara etaĝo. Jaroslav Seifert (1901-1986);
el la ĉeĥa trad. Jiří Kořínek 450
Longa disiĝo. Li Bai (701-762); el la ĉina trad. S. J. Zee 452
Morttrafite. Jeppe Aakjaer (1866-1930);
el la dana trad. Christian Heilskov 452
Vi diras: I. Marie Under (1883-1980); el la estona trad. Hilda Dresen . 453
Atlantis. J. H. O. Djurhuus (1881-1948); el la feroa trad. Povl Skårup . 454
Nokta strato. Veikko Antero Koskenniemi (1885-1962);
el la finna trad. Joh. Edv. Leppäkoski 455
Majtago. Guido Gezelle (1830-1899);
el la flandra trad. Hector Vermuyten 455
Ekzota parfumo. Charles Baudelaire (1821-1867);
el la franca trad. Gaston Waringhien 456
Marista kanto. Eeltsje Halbertsma (1797-1858);
el la frisa trad. Albert Goodheir 457
Virin' gaela. Somhairle Mac Ghill-Eathain (1911); el la gaela
trad. William Auld 458
Lorelej'. Heinrich Heine (1797-1856);
el la germana trad. Kálmán Kalocsay 459
Leteo. Lorenzo Mavilis (1860-1912);
el la greka trad. Despina Patrinu 460
Al la patrino. José Asunción Acuna;
el la gvarania trad. F. Valdomiro Lorenz 460
Madrigalo al edzino. Zeev Ĵabotinski (Vladimir Jabotinsky,
1880-1940); el la hebrea trad. J. Kohen-Cedek 461
Amkonfeso. Sapfo (ĉ. 600 a.K.); el la helena trad. Kálmán Kalocsay 462
La malfidela edzino. Federico García Lorca (1899-1936);
el la hispana trad. Fernando de Diego 462
Soneto. Ernő Szép (1884-1953); el la hungara trad.
Kálmán Kalocsay 464
Sindefendo de junulino. Brian Merriman (1757-1805);
el la irlanda trad. Albert Goodheir 464
Vilaĝo en la sabenaj montoj. Snorri Hjartarson (1906);
el la islanda trad. Baldur Ragnarsson 466

La apero de Beatrice. Dante Alighieri (1265-1321);
el la itala trad. E. Dondi 467
La luno super la ruino de kastelo. Tutii Bansui (ps. de Doi Rinkiti, 1871-1952); el la japana trad. Miyamoto Masao 469
Kvin poemoj. L. L. Zamenhof (1859-1917);
el la jida trad. N. Z. Maimon kaj William Auld 470
Karmensito. Tician Tabidze (1895-1937);
el la kartvela trad. N. Danovskij 471
Via rido kanta. Josep Maria López-Picó (1886-1959);
el la kataluna trad. Jaume Grau Casas 472
Balado el la dramo "Ollantaj".
El la keĉua trad. Francisco Valdomiro Lorenz 472
La vulpo. Robert Williams Parry (1884-1956);
el la kimra trad. Reto Rossetti 473
La volo de blua ĉielo. Li Unsang (1903-1982);
el la korea trad. Gim Taekeng 473
Preaŭtuna tago. Dobriša Cesarić (1902-1980);
el la kroata trad. Božidar Vančik 474
Dio Afrikon benu. El la ksosa trad. Phyllis Goodheir 475
Al Leŭkonoe (Odo I, ii). Horacio (65-8 a.K.);
el la latina trad. Albert Goodheir 475
Rompitaj pinarboj. Jānis Rainis (ps. de J. Pliekšāns, 1865-1929);
el la latva trad. Milda Jakubcova 476
Noktpaŝtado. Antanas Rimydis (1905); el la litova trad. P. Lapienė 477
La patrino. Kārli (Kōrli) Stalte; el la livona trad. Hilda Dresen 477
Pavino. Slavko Janevski; el la makedona trad. Zora Heide 478
el *La pralampo en la muzeo.* Dun Karm (1871-1961);
el la malta trad. Carmel Mallia 479
La sinjorino sur mia kamenbreto. Edgar du Perron (1899-1940);
el la nederlanda trad. Jan Holtzer 480
La driado. Olaf Bull (1883-1933);
el la norvega trad. Johan Hammond Rosbach 480
Lamento. Sordello (Sordel, ĉ. 1200-1269);
el la okcitana trad. Kálmán Kalocsay 481
Robaioj. Omar Kajam (ĉ. 1045-ĉ. 1122);
el la persa trad. Gaston Waringhien 483
La sepa anĝelo. Zbigniev Herbert (1924); el la pola trad. Kris Long 484
Jozefo. Carlos Drummond de Andrade (1902);
el la portugala trad. Sylla Chaves 486
Admono de skribisto al sia filo.
El la praegipta trad. Kálmán Kalocsay 488

Duran-Dal. Frédéric Mistral (1830-1914);
el la provenca trad. R. Laval 492
La vilaĝo en la silento. Peider Lansel (1863-1943);
el la romanĉa trad. Marcel Jaccard 492
Sed tamen... Eugeniu Sperantia (1888-1972);
el la rumana trad. Constantin Dominte 493
Lulkantas vintro bona. Sergej Jesenin (1895-1925);
el la rusa trad. S. Rublov 494
Perforta edzinigo (el *Aŝma*). El la sania trad. Li Shijun 495
Himno (el *Rig-Veda*). El la sanskrita trad. Kálmán Kalocsay 496
Vespero ĉe l' insuleto. Aleksa Ŝantiĉ; el la serba trad. Ivo Rotkviĉ 497
el *La kanto pri la perlo.* El la siria trad. Donald Broadribb 498
La iamo longe for. Robert Burns (1759-1796);
el la skota trad. Reto Rossetti 499
La vivo. Ivan Krasko (1876-1958);
el la slovaka trad. Oldřich Kníchal 500
Cipreso. Anton Medved; el la slovena trad. Josip Velebit 500
el *La inferiro de Iŝtar.* El la sumera trad. Kálmán Kalocsay 501
Antaŭspegula kanto de Libidela (el *Aniaro*). Harry Martinson
(1904-1978); el la sveda trad. Bertil Nilsson kaj William Auld 503
La dornofrukto. Giuseppe Zoppi (1896-1952);
el la tiĉina trad. Kálmán Kalocsay 504
Amkanto de amazonaj indianinoj.
El la tupia trad. Francisco Valdomiro Lorenz 505
La ventoj de Lados. Nazim Hikmet (1902-1963);
el la turka trad. Aldo de'Giorgi 505
Preludoj de steloj. Mikola Vingranovskij (1936);
el la ukraina trad. Daniel Kolker 506
Ĉe la bordo de Balta Maro. Ĥamid Alimĝan (1909-1944);
el la uzbeka trad. Petro Poliŝĉuk 507
Vespero en vilaĝo. Alice de Chambrier (1861-1882);
el la velŝa trad. Mad Mevo (ps. de Rinaldo Orengo) 507
Barkarolo de Parfuma Rivero. To Huu (1920);
el la vjetnama trad. Dao Ank Kha 508

1
ANTAŬPAROLO

En aprilo 1903 Zamenhof eldonis la unuan eldonon de la *Fundamenta krestomatio*, kolekto de diversaj kaj diversspecaj rakontoj, artikoloj kaj poemoj, kies celo estis "servi al ĉiuj kiel modelo de esperanta stilo kaj gardi la lingvon de pereiga disfalo je diversaj dialektoj". Oni povas nur miri, ke, malpli ol 16 jarojn post apero de la Unua Libro, eblis aperigi jam tiel ampleksan, varian kaj diversaŭtoran antologion en Esperanto.

Dume forpasis 88 pliaj jaroj de tiam, dum kiuj Esperanto estas ĉiutage uzita kaj disvastiĝis tra la tuta mondo, kaj disfalo je diversaj dialektoj ankoraŭ ne okazis. Malgraŭ tio, la novaj esperantistoj daŭre bezonas taŭgajn modelojn de bona kaj viva lingvostilo. Kvankam Zamenhof asertis, ke "la *Fundamenta krestomatio* por ĉiam gardos [la lernanton] de blinda kaj senkritika alproprigo de stilo *erara*", tamen ni devas agnoski almenaŭ du konstatojn modifajn: intertempe Esperanto, kiel vivanta lingvo, multe evoluis – ĉiam surbaze de tiuj klasikaj modeloj – kaj la *enhavo* de la *Fundamenta krestomatio* plejparte tiel eksmodiĝis, ke ĝi ne plu ŝajnas aktuala al la legantoj kaj malmulte allogas lernantojn per sia materialo.

Pro tio, al UEA venis la ideo eldoni novan krestomation, kiu staru kiel modelo al la modernaj lernantoj. Ili petis min redakti tian volumon, kaj jen la rezulto. La strukturon de la krestomatio mi bazis sur tiun de la *Fundamenta krestomatio*, kaj mi starigis al mi tri ĉefajn celojn: (a) prezenti tekstojn lingve modelajn, (b) prezenti tekstojn aktuale interesajn sed ankaŭ el tiu aŭ alia vidpunkto daŭre valorajn, (c) prezenti modestan superrigardon de la reala kulturo de la internacia lingvo, por ke la lernanto plivastigu sian komprenon pri la dimensioj de tiu kulturo.

Al la Esperanto-movado neniam mankis pedantuloj, harfendemuloj kaj erumantoj, kiuj preferas disputi pri ekzemple *kiel/kiom* aŭ la kazo post *po* ol portatiĝi sur la flugiloj de la viva lingvo. Al ili bonan apetiton. Mi mem preferas supozi, ke tiu, kiu skribas *kiel*, intencas diri *kiel*, kaj tiu, kiu skribas *kiom*, intencas diri *kiom*, kaj ke tiu, kiu metas nominativon post *po* same scias, kion li faras, kiel tiu, kiu akuzativas, kaj ke "korekta" lingvaĵo estas tiu, kiu plej trafe esprimas la koncepton de la koncerna aŭtoro. Almenaŭ tion ĉi mi diras al la leganto: kiam vi scipovos uzadi tiel vigle kaj esprimive Esperanton kiel iu ajn el niaj diversaj aŭtoroj, vi rajtos esti kontenta pri via posedo de la lingvo.

Ne miru, se vi trovos tiom da "stiloj" kiom da aŭtoroj. Vi tion trovos ankaŭ en viaj nacilingvaj krestomatioj, ĉar talenta aŭtoro ĉiam metas propran stampon sur sia lingvaĵo. La stilo estas la homo. Sed bona aŭtoro neniam perfidas sian lingvaĵon: li ĝin respektas kaj traktas ame. En tiu ĉi libro vi trovos nur verkojn en imitinda Esperanto – negrave, kion trovos niaj erumantoj por priĉikani.

Mi klopodis konigi al niaj lernantoj iom pri nia originala literaturo kaj pri nia tradukita literaturo, pri nia fakliteraturo kaj pri la lingva fono de nia movado. Mi samtempe esperas, ke ili siavice rekonos kaj frandos tiun miraklon, kiu estas la sola vivanta internacia lingvo.

William Auld
Dollar, Skotlando

2
EKZERCOJ

1. (Ekzercaro 5)

Patro kaj frato. — Leono estas besto. — Rozo estas floro, kaj kolombo estas birdo. — La rozo apartenas al Teodoro. — La suno brilas. — La patro estas sana. — La patro estas tajloro.

2. (Ekzercaro 6)

Infano ne estas matura homo. — La infano jam ne ploras. — La ĉielo estas blua. — Kie estas la libro kaj la krajono? — La libro estas sur la tablo kaj la krajono kuŝas sur la fenestro. — Sur la fenestro kuŝas krajono kaj plumo. — Jen estas pomo. — Jen estas la pomo, kiun mi trovis. — Sur la tero kuŝas ŝtono.

3. (Ekzercaro 7)

Leono estas forta. — La dentoj de leono estas akraj. — Al leono ne donu la manon. — Mi vidas leonon. — Resti kun leono estas danĝere. — Kiu kuraĝas rajdi sur leono? — Mi parolas pri leono.

4. (Ekzercaro 8)

La patro estas bona. — Jen kuŝas la ĉapelo de la patro. — Diru al la patro, ke mi estas diligenta. — Mi amas la patron. — Venu kuṅe kun la patro. — La filo staras apud la patro. — La mano de Johano estas pura. — Mi konas Johanon. — Ludoviko, donu al mi panon. — Mi manĝas per la buŝo kaj flaras per la nazo. — Antaŭ la domo staras arbo. — La patro estas en la ĉambro.

5. (Ekzercaro 9)

La birdoj flugas. — La kanto de la birdoj estas agrabla. — Donu al la birdoj akvon, ĉar ili volas trinki. — La knabo forpelis la birdojn. — Ni vidas per la okuloj kaj aŭdas per la oreloj. — Bonaj infanoj lernas diligente. — Aleksandro ne volas lerni, kaj tial mi batas Aleksandron. — De la patro mi ricevis libron, kaj de la frato mi ricevis plumon. — Mi venas de la avo, kaj mi iras nun al la onklo. — Mi legas libron. — La patro ne legas libron, sed li skribas leteron.

6. (Ekzercaro 10)

Papero estas blanka. — Blanka papero kuŝas sur la tablo. — La blanka papero jam ne kuŝas sur la tablo. — Jen estas la kajero de la juna fraŭlino. — La patro donis al mi dolĉan pomon. — Rakontu al mia juna amiko belan historion. — Mi ne amas obstinajn homojn. — Mi deziras al vi bonan tagon, sinjoro! — Bonan matenon! — Ĝojan feston! (mi deziras al vi). — Kia ĝoja festo! (estas hodiaŭ). — Sur la ĉielo staras la bela suno. — En la tago ni vidas la helan sunon, kaj en la nokto ni vidas la palan lunon kaj la belajn stelojn. — La papero estas tre blanka, sed la neĝo estas pli blanka. — Lakto estas pli nutra, ol vino. — Mi havas pli freŝan panon, ol vi. — Ne, vi eraras, sinjoro: via pano estas malpli freŝa, ol mia. — El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna. — Mi estas tiel forta, kiel vi. — El ĉiuj siaj fratoj Antono estas la malplej saĝa.

7. (Ekzercaro 12)

Du homoj povas pli multe fari ol unu. — Mi havas nur unu buŝon, sed mi havas du orelojn. — Li promenas kun tri hundoj. — Li faris ĉion per la dek fingroj de siaj manoj. — El ŝiaj multaj infanoj unuj estas bonaj kaj aliaj estas malbonaj. — Kvin kaj sep faras dek du. — Dek kaj dek faras dudek. — Kvar kaj dek ok faras dudek du. — Tridek kaj kvardek kvin faras sepdek kvin. — Mil okcent naŭdek tri. — Li havas dek unu infanojn. — Sesdek minutoj faras unu horon, kaj unu minuto konsistas el sesdek sekundoj. — Januaro estas la unua monato de la jaro, Aprilo estas la kvara, Novembro estas la dek-unua, Decembro estas la dek-dua. — La dudeka (tago) de Februaro estas la kvindek-unua tago de la jaro. — La sepan tagon de la semajno Dio elektis, ke ĝi estu pli sankta, ol la ses unuaj tagoj. — Kion Dio kreis en la sesa tago? — Kiun daton ni havas hodiaŭ? — Hodiaŭ estas la dudek sepa (tago) de Marto. — Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua.

8. (Ekzercaro 14)

Mi havas cent pomojn. — Mi havas centon da pomoj. — Tiu ĉi urbo havas milionon da loĝantoj. — Mi aĉetis dekduon (aŭ dek-duon) da kuleroj kaj du dekduojn da forkoj. — Mil jaroj (aŭ milo da jaroj) faras miljaron. — Unue mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi: due mi dankas vin por la prunto; trie mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonos monon. — Por ĉiu tago mi ricevas kvin frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon, t. e. (= tio estas) dek frankojn. — Kvinoble sep estas tridek kvin. — Tri estas duono de ses. — Ok estas kvar kvinonoj de dek. — Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn; tial du metroj kostas kvar kaj duonon frankojn (aŭ da frankoj). — Unu tago estas tricent-sesdek-kvinono aŭ tricent-sesdek-sesono de jaro. — Tiuj ĉi du amikoj promenas ĉiam duope. — Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn. — Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj. — Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj.

9. (Ekzercaro 16)

Mi legas. — Ci skribas (anstataŭ "ci" oni uzas ordinare "vi"). — Li estas knabo, kaj ŝi estas knabino. — La tranĉilo tranĉas bone, ĉar ĝi estas akra. — Ni estas homoj. — Vi estas infanoj. — Ili estas rusoj. — Kie estas la knaboj? — Ili estas en la ĝardeno. — Kie estas la knabinoj? — Ili ankaŭ estas en la ĝardeno. — Kie estas la tranĉiloj? — Ili kuŝas sur la tablo. — Mi vokas la knabon, kaj li venas. — Mi vokas la knabinon, kaj ŝi venas. — La infano ploras, ĉar ĝi volas manĝi. — La infanoj ploras, ĉar ili volas manĝi..— Knabo, vi estas neĝentila. — Sinjoro, vi estas neĝentila. — Sinjoroj, vi estas neĝentilaj. — Mia hundo, vi estas tre fidela. — Oni diras, ke la vero ĉiam venkas. — En la vintro oni hejtas la fornojn. — Kiam oni estas riĉa (aŭ riĉaj), oni havas multajn amikojn.

10. (Ekzercaro 18)

Li amas min, sed mi lin ne amas. — Mi volis lin bati, sed li forkuris de mi. — Diru al mi vian nomon. — Ne skribu al mi tiajn longajn leterojn. — Venu al mi hodiaŭ vespere. — Mi rakontos al vi historion. — Ĉu vi diros al mi la veron? — La domo apartenas al li. — Li estas mia onklo, ĉar mia patro estas lia frato. — Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn; mi ankaŭ tre amas iliajn (infanojn). — Montru al ili vian novan veston. — Mi amas min mem, vi amas vin mem, li amas sin mem, kaj ĉiu homo amas sin mem. — Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem. — Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem; sed ŝi mem tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas. — Miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn; post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo. — Mi jam havas mian ĉapelon; nun serĉu vi vian. — Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en sia ĉambro. — La infano serĉis sian pupon; mi montris al la infano, kie kuŝas ĝia pupo. — Oni ne forgesas facile sian unuan amon.

11. (Ekzercaro 20)

Nun mi legas, vi legas kaj li legas; ni ĉiuj legas. — Vi skribas, kaj la infanoj skribas; ili ĉiuj sidas silente kaj skribas. — Hieraŭ mi renkontis vian filon, kaj li ĝentile salutis min. — Hodiaŭ estas sabato, kaj morgaŭ estos dimanĉo. — Hieraŭ estis vendredo, kaj post-morgaŭ estos lundo. — Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito faris al li plezuron. — Ĉu vi jam trovis vian horloĝon? — Mi ĝin ankoraŭ ne serĉis; kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi ĝin jam ne trovos. — Kiam mi venis al li, li dormis; sed mi lin vekis. — Se mi estus sana, mi estus feliĉa. — Se li scius, ke mi estas tie ĉi, li tuj venus al mi. — Se la lernanto scius bone sian lecionon, la instruanto lin ne punus. — Kial vi ne respondas al mi? Ĉu vi estas surda aŭ muta? — Iru for! — Infano, ne tuŝu la spegulon! — Karaj infanoj, estu ĉiam honestaj! — Li venu, kaj mi pardonos al li. — Ordonu al li, ke li ne babilu. — Petu ŝin, ke ŝi sendu al mi kandelon. — Ni estu gajaj, ni uzu bone la vivon, ĉar la vivo ne estas longa. — Ŝi volas danci. — Morti pro la patrujo estas agrable. — La infano ne ĉesas petoli.

12. (Ekzercaro 22)

Fluanta akvo estas pli pura, ol akvo, staranta senmove. — Promenante sur la strato, mi falis. — Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato. — Al homo, pekinta senintence, Dio facile pardonas. — Trovinte pomon, mi ĝin manĝis. — La falinta homo ne povis sin levi. — Ne riproĉu vian amikon, ĉar vi mem pli multe meritas riproĉon; li estas nur unufoja mensoginto, dum vi estas ankoraŭ ĉiam mensoganto. — La tempo pasinta jam neniam revenos; la tempon venontan neniu ankoraŭ konas. — Venu, ni atendas vin, Savonto de la mondo. — En la lingvo "Esperanto" ni vidas la estontan lingvon helpantan de la tuta mondo. — Aŭgusto estas mia plej amata filo. — Mono havata estas pli grava ol havita. — Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota. — La soldatoj kondukis la arestitojn tra la stratoj. — Li venis al mi tute ne atendite. — Homo, kiun oni devas juĝi, estas juĝoto.

13. (Ekzercaro 24)

Nun li diras al mi la veron. — Hieraŭ li diris al mi la veron. — Li ĉiam diradis al mi la veron. — Kiam vi vidis nin en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron (aŭ li estis dirinta al mi la veron). — Li diros al mi la veron. — Kiam vi venos al mi, li jam antaŭe diros al mi la veron (aŭ li estos dirinta al mi la veron; aŭ antaŭ ol vi venos al mi, li diros al mi la veron). — Se mi petus lin, li dirus al mi la veron. — Mi ne farus la eraron, se li antaŭe dirus al mi la veron (aŭ se li estus dirinta al mi la veron). — Kiam mi venos, diru al mi la veron. — Kiam mia patro venos, diru al mi antaŭe la veron (aŭ estu dirinta al mi la veron). — Mi volas diri al vi la veron. — Mi volas, ke tio, kion mi diris, estu vera (aŭ mi volas esti dirinta la veron).

14. (Ekzercaro 25)

Mi estas amata. Mi estis amata. Mi estos amata. Mi estus amata. Estu amata. Esti amata. — Vi estas lavita. Vi estis lavita. Vi estos lavita. Vi estus lavita. Estu lavita. Esti lavita. — Li estas invitota. Li estis invitota. Li estos invitota. Li estus invitota. Estu invitota. Esti invitota. — Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de mi. — La surtuto estas aĉetita de mi, sekve ĝi apartenas al mi. — Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita. — Mi sciigas, ke de nun la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi. — Estu trankvila, mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ. — Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi. — Laŭ la projekto de la inĝenieroj tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj; sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn. — Honesta homo agas honeste. — La pastro, kiu mortis antaŭ nelonge (aŭ antaŭ nelonga tempo), loĝis longe en nia urbo. — Ĉu hodiaŭ estas varme aŭ malvarme? — Sur la kameno inter du potoj staras fera kaldrono; el la kaldrono, en kiu sin trovas bolanta akvo, eliras vaporo; tra la fenestro, kiu sin trovas apud la pordo, la vaporo iras sur la korton.

15. (Ekzercaro 26)

Kie vi estas? — Mi estas en la ĝardeno. — Kien vi iras? — Mi iras en la ĝardenon. — La birdo flugas en la ĉambro (= ĝi estas en la ĉambro kaj flugas en ĝi). — La birdo flugas en la ĉambron (= ĝi estas ekster la ĉambro kaj flugas nun en ĝin). — Mi vojaĝas en Hispanujo. — Mi vojaĝas en Hispanujon. — Mi sidas sur seĝo kaj tenas la piedojn sur benketo. — Mi metis la manon sur la tablon. — El sub la kanapo la muso kuris sub la liton, kaj nun ĝi kuras sub la lito. — Super la tero sin trovas aero. — Anstataŭ kafo li donis al mi teon kun sukero, sed sen kremo. — Mi staras ekster la domo, kaj li estas interne. — En la salono estis neniu krom li kaj lia fianĉino. — La hirundo flugis trans la riveron, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj. — Mi restas tie ĉi laŭ la ordono de mia estro. — Kiam li estis ĉe mi, li staris tutan horon apud la fenestro. — Li diras, ke mi estas atenta. — Li petas, ke mi estu atenta. — Kvankam vi estas riĉa, mi dubas, ĉu vi estas feliĉa. — Se vi scius, kiu li estas, vi lin pli estimus. — Se li jam venis, petu lin al mi. — Ho, Dio! kion vi faras! — Ha, kiel bele! — For de tie ĉi! — Fi, kiel abomene! — Nu, iru pli rapide!

16. (Ekzercaro 27)

La artikolo "la" estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj. Ĝia uzado estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj. La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekzemple rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna, sed ne necesa. Anstataŭ "la" oni povas ankaŭ diri "l'" (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo). — Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo. Ekzemploj: skribtablo aŭ skribotablo (= tablo, sur kiu oni skribas); internacia (= kiu estas inter diversaj nacioj); tutmonda (= de la tuta mondo); unutaga (= kiu daŭras unu tagon); unuataga (= kiu estas en la unua tago); vaporŝipo (= ŝipo, kiu sin movas per vaporo); matenmanĝi, tagmanĝi, vespermanĝi; abonpago (= pago por la abono).

17. (Ekzercaro 28)

Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas ĉiam nur la nominativon. Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj. Ekzemple: por esprimi direkton, ni aldonas al la vorto la finon "n"; sekve: tie (= en tiu loko), tien (= al tiu loko); tiel same ni ankaŭ diras: "la birdo flugas en la ĝardenon, sur la tablon", kaj la vortoj "ĝardenon", "tablon" staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj "en" kaj "sur" tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, t. e. montri, ke la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno aŭ sur la tablo kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, al la tablo (ni volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado); en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon "n" tute egale, ĉu ia prepozicio starus aŭ ne. — Morgaŭ mi veturos Parizon (aŭ en Parizon). — Mi restos hodiaŭ dome. — Jam estas tempo iri domen. — Ni disiĝis kaj iris en diversajn flankojn: mi iris dekstren, kaj li iris maldekstren. — Flanken, sinjoro! Mi konas neniun en tiu ĉi urbo. — Mi neniel povas kompreni, kion vi parolas. — Mi renkontis nek lin, nek lian fraton (aŭ mi ne renkontis lin, nek lian fraton).

18. (Ekzercaro 29) (*je*)

Se ni bezonas uzi prepozicion, kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion "je". Sed estas bone uzadi la vorton "je" kiel eble pli malofte. Anstataŭ la vorto "je" ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio. — Mi ridas je lia naiveco (aŭ mi ridas pro lia naiveco, aŭ: mi ridas lian naivecon). — Je la lasta fojo mi vidis lin ĉe vi (aŭ: la lastan fojon). — Mi veturis du tagojn kaj unu nokton. — Mi sopiras je mia perdita feliĉo (aŭ: mian perditan feliĉon). — El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon. Ekzemple, ni povas diri "obei al la patro" kaj "obei la patron"

(anstataŭ "obei je la patro"). Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas; ekzemple: ni povas diri "pardoni al la malamiko" kaj "pardoni la malamikon", sed ni devas diri ĉiam "pardoni al la malamiko lian kulpon".

19. (Ekzercaro 30)

Ia, ial, iam, ie, iel, ies, io, iom, iu. — La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ĉar el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj. Se ni aldonas al ili la literon "k", ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: kia, kial, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiu. Se ni aldonas la literon "t", ni ricevas vortojn montrajn: tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu. Aldonante la literon "ĉ", ni ricevas vortojn komunajn: ĉia, ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉies, ĉio, ĉiom, ĉiu. Aldonante la prefikson "nen", ni ricevas vortojn neajn: nenia, nenial, neniam, nenie, neniel, nenies, nenio, neniom, neniu. Aldonante al la vortoj montraj la vorton "ĉi", ni ricevas montron pli proksiman; ekzemple: tiu (pli malproksima), tiu ĉi (aŭ ĉi tiu) (pli proksima); tie (malproksime), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksime). Aldonante al la vortoj demandaj la vorton "ajn", ni ricevas vortojn sendiferencajn: kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn, kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiu ajn. Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi-tiea, tieulo, tiamulo k. t. p. (= kaj tiel plu).

20. (Ekzercaro 31)

Lia kolero longe daŭris. — Li estas hodiaŭ en kolera humoro. — Li koleras kaj insultas. — Li fermis kolere la pordon. — Lia filo mortis kaj estas nun malviva. — La korpo estas morta, la animo estas senmorta. — Li estas morte malsana, li ne vivos pli, ol unu tagon. — Li parolas, kaj lia parolo fluas dolĉe kaj agrable. — Ni faris la kontrakton ne skribe, sed parole. — Li estas bona parolanto. — Starante ekstere, li povis vidi nur la eksteran flankon de nia domo. — Li loĝas ekster la urbo. — La ekstero de tiu ĉi homo estas pli bona, ol lia interno. — Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo de mia deziro. — Kia granda brulo! kio brulas? — Ligno estas bona brula materialo. — La fera bastono, kiu kuŝis en la forno, estas nun brule varmega. — Ĉu li donis al vi jesan respondon, aŭ nean? Li eliris el la dormoĉambro kaj eniris en la manĝoĉambron. — La birdo ne forflugis: ĝi nur deflugis de la arbo, alflugis al la domo kaj surflugis sur la tegmenton. — Por ĉiu aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero. — Lernolibron oni devas ne tralegi, sed tralerni. — Li portas rozokoloran superveston kaj teleroforman ĉapelon. — En mia skribotablo sin trovas kvar tirkestoj. — Liaj lipharoj estas pli grizaj, ol liaj vangharoj.

21. (Ekzercaro 32) (*ist*, *da*)

Teatramanto ofte vizitas la teatron kaj ricevas baldaŭ teatrajn manierojn. — Kiu okupas sin je meĥaniko, estas meĥanikisto, kaj kiu okupas sin je ĥemio, estas ĥemiisto. — Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem. — La fotografisto fotografis min, kaj mi sendis mian fotografaĵon al mia patro. —

Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino; glaso da vino estas glaso plena je vino. — Alportu al mi metron da nigra drapo (Metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo). — Mi aĉetis dekon da ovoj. — Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo. — Sur la bordo de la maro staris amaso da homoj. — Multaj birdoj flugas en la aŭtuno en pli varmajn landojn. — Sur la arbo sin trovis multe (aŭ multo) da birdoj. — Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj. — En la ĉambro sidis nur kelke da homoj. — "Da" post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro.

22. (Ekzercaro 33) (*mal, in*)

Mia frato ne estas granda, sed li ne estas ankaŭ malgranda: li estas de meza kresko. — Li estas tiel dika, ke li ne povas trairi tra nia mallarĝa pordo. — Haro estas tre maldika. — La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo. — Tiu ĉi malfreŝa pano estas malmola, kiel ŝtono. — Malbonaj infanoj amas turmenti bestojn. — Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita. — Mi forte malestimas tiun ĉi malnoblan homon. — La fenestro longe estis nefermita; mi ĝin fermis, sed mia frato tuj ĝin denove malfermis. — Rekta vojo estas pli mallonga, ol kurba. — La tablo staras malrekte kaj kredeble baldaŭ renversiĝos. — Li staras supre sur la monto kaj rigardas malsupren sur la kampon. — Malamiko venis en nian landon. — Oni tiel malhelpis al mi, ke mi malbonigis mian tutan laboron. — La edzino de mia patro estas mia patrino kaj la avino de miaj infanoj. — Sur la korto staras koko kun tri kokinoj. — Mia fratino estas tre bela knabino. — Mia onklino estas bona virino. — Mi vidis vian avinon kun ŝiaj kvar nepinoj kaj kun mia nevino. — Lia duonpatrino estas mia bofratino. — Mi havas bovon kaj bovinon. — La juna vidvino fariĝis denove fianĉino.

23. (Ekzercaro 34) (*il, ar*)

La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranĉi per ĝi la viandon kaj mi devis uzi mian poŝan tranĉilon. — Ĉu vi havas korktirilon, por malŝtopi la botelon? — Mi volis ŝlosi la pordon, sed mi perdis la ŝlosilon. — Ŝi kombas al si la harojn per arĝenta kombilo. — En somero ni veturas per diversaj veturiloj, kaj en vintro ni veturas per glitveturilo. — Hodiaŭ estas bela frosta vetero, tial mi prenos miajn glitilojn kaj iros gliti. — Per hakilo ni hakas, per segilo ni segas, per fosilo ni fosas, per kudrilo ni kudras, per tondilo ni tondas, per sonorilo ni sonoras, per fajfilo ni fajfas. — Mia skribilaro konsistas el inkujo, sablujo, kelke da plumoj, krajono kaj inksorbilo. — Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo. — En varmega tago mi amas promeni en arbaro. — Nia lando venkos, ĉar nia militistaro estas granda kaj brava. — Sur kruta ŝtuparo li levis sin al la tegmento de la domo. — Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron. — Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj, precipe aroj da bellanaj ŝafoj.

24. (Ekzercaro 35) (*aĵ*, *ec*)

Vi parolas sensencaĵon, mia amiko. — Mi trinkis teon kun kuko kaj konfitaĵo. — Akvo estas fluidaĵo. — Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan malklaraĵon. — Sur la tablo staris diversaj sukeraĵoj. — En tiuj ĉi boteletoj sin trovas diversaj acidoj: vinagro, sulfuracido, azotacido kaj aliaj. — Via vino estas nur ia abomena acidaĵo. — La acideco de tiu ĉi vinagro estas tre malforta. — Mi manĝis bongustan ovaĵon. — Tiu ĉi granda altaĵo ne estas natura monto. — La alteco de tiu monto ne estas tre granda. — Kiam mi ien veturas, mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵo. — Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo. — Glaciaĵo estas dolĉa glaciigita frandaĵo. — La riĉeco de tiu ĉi homo estas granda, sed lia malsaĝeco estas ankoraŭ pli granda. — Li amas tiun ĉi knabinon pro ŝia beleco kaj boneco. — Lia heroeco tre plaĉis al mi. — La tuta supraĵo de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj kaj diversaj aliaj kreskaĵoj. — Mi vivas kun li en granda amikeco.

25. (Ekzercaro 36) (*ge*, *bo*, *id*)

Patro kaj patrino kune estas nomataj gepatroj. — Petro, Anno kaj Elizabeto estas miaj gefratoj. — Gesinjoroj N. hodiaŭ vespere venos al ni. — Mi gratulis telegrafe la junajn geedzojn. — La gefianĉoj staris apud la altaro. — La patro de mia edzino estas mia bopatro, mi estas lia bofilo, kaj mia patro estas la bopatro de mia edzino. — Ĉiuj parencoj de mia edzino estas miaj boparencoj, sekve ŝia frato estas mia bofrato, ŝia fratino estas mia bofratino; mia frato kaj fratino (gefratoj) estas la bogefratoj de mia edzino. — La edzino de mia nevo kaj la nevino de mia edzino estas miaj bonevinoj. — Virino, kiu kuracas, estas kuracistino; edzino de kuracisto estas kuracistedzino. — La doktoredzino A. vizitis hodiaŭ la gedoktorojn P. — Li ne estas lavisto, li estas lavistinedzo. — La filoj, nepoj kaj pranepoj de reĝo estas reĝidoj. — La hebreoj estas Izraelidoj, ĉar ili devenas de Izraelo. — Ĉevalido estas nematura ĉevalo, kokido – nematura koko, bovido – nematura bovo, birdido – nematura birdo.

26. (Ekzercaro 37) (*an*, *estr*, *ist*, *ul*)

La ŝipanoj devas obei la ŝipestron. — Ĉiuj loĝantoj de regno estas regnanoj. — Urbanoj estas ordinare pli ruzaj, ol vilaĝanoj. — La regnestro de nia lando estas bona kaj saĝa reĝo. — La Parizanoj estas gajaj homoj. — Nia provincestro estas severa, sed justa. — Nia urbo havas bonajn policanojn, sed ne sufiĉe energian policestron. — Luteranoj kaj Kalvinanoj estas kristanoj. — Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj. — Li estas nelerta kaj naiva provincano. — La loĝantoj de unu regno estas samregnanoj, la loĝantoj de unu urbo estas samurbanoj, la konfesantoj de unu religio estas samreligianoj. — Nia regimentestro estas por siaj soldatoj kiel bona patro. — La botisto faras botojn kaj ŝuojn. — La lignisto vendas lignon, kaj la lignaĵisto faras tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn. — Ŝteliston neniu lasas en sian domon. — La kuraĝa maristo dronis en la maro. — Verkisto verkas librojn, kaj skribisto simple transskribas paperojn. — Ni havas diversajn servantojn:

kuiriston, ĉambristinon, infanistinon kaj veturigiston. — La riĉulo havas multe da mono. — Malsaĝulon ĉiu batas. — Timulo timas eĉ sian propran ombron. — Li estas mensogisto kaj malnoblulo. — Preĝu al la Sankta Virgulino.

27. (Ekzercaro 38) (*et*, *eg*, *ĉj*, *nj*)

Mi aĉetis por la infanoj tableton kaj kelke da seĝetoj. — En nia lando sin ne trovas montoj, sed nur montetoj. — Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma. — En somero ni trovas malvarmeton en densaj arbaroj. — Li sidas apud la tablo kaj dormetas. — Mallarĝa vojeto kondukas tra tiu ĉi kampo al nia domo. — Sur lia vizaĝo mi vidis ĝojan rideton. — Kun bruo oni malfermis la pordegon, kaj la kaleŝo enveturis en la korton. — Tio ĉi estas jam ne simpla pluvo, sed pluvego. — Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, kaj mi de teruro ne sciis, kion fari. — Antaŭ nia militistaro staris granda serio da pafilegoj. — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Erneĉjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilheĉjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo).

28. (Ekzercaro 39) (*ig*, *iĝ*)

En la kota vetero mia vesto forte malpuriĝis; tial mi prenis broson kaj purigis la veston. — Li paliĝis de timo kaj poste li ruĝiĝis de honto. — Li fianĉiĝis kun fraŭlino Berto; post tri monatoj estos la edziĝo; la edziĝa soleno estos en la nova preĝejo, kaj la edziĝa festo estos en la domo de liaj estontaj bogepatroj. — Tiu ĉi maljunulo tute malsaĝiĝis kaj infaniĝis. — Post infekta malsano oni ofte bruligas la vestojn de la malsanulo. — Forigu vian fraton, ĉar li malhelpas al ni. — Ŝi edziniĝis kun sia kuzo, kvankam ŝiaj gepatroj volis ŝin edzinigi kun alia persono. — En la printempo la glacio kaj la neĝo fluidiĝas. — Venigu la kuraciston, ĉar mi estas malsana. — Li venigis al si el Berlino multajn librojn. — Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu; unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis. — Mi ne pendigis mian ĉapon sur tiu ĉi arbeto; sed la vento forblovis de mia kapo la ĉapon, kaj ĝi, flugante, pendiĝis sur la branĉoj de la arbeto. — Sidigu vin (aŭ sidiĝu), sinjoro! — La junulo aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj.

29. (Ekzercaro 40) (*ad*, *ej*, *uj*, *ing*)

En la daŭro de kelke da minutoj mi aŭdis du pafojn. — La pafado daŭris tre longe. — Mi eksaltis de surprizo. — Mi saltas tre lerte. — Mi saltadis la tutan tagon de loko al loko. — Lia hieraŭa parolo estis tre bela, sed la tro multa parolado lacigas lin. — Kiam vi ekparolis, ni atendis aŭdi ion novan, sed baldaŭ ni vidis, ke ni trompiĝis. — Li kantas tre belan kanton. — La kantado estas agrabla okupo. — La diamanto havas belan brilon. — Du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo. — La domo, en kiu oni lernas, estas lernejo, kaj la domo, en kiu oni preĝas, estas preĝejo. — La kuiristo sidas en la kuirejo. —

La kuracisto konsilis al mi iri en ŝvitbanejon. — Magazeno, en kiu oni vendas cigarojn, aŭ ĉambro, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarejo; skatoleto aŭ alia objekto, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarujo; tubeto, en kiun oni metas cigaron, kiam oni ĝin fumas, estas cigaringo. — Skatolo, en kiu oni tenas plumojn, estas plumujo, kaj bastoneto, sur kiu oni tenas plumon por skribado, estas plumingo. — En la kandelingo sidis brulanta kandelo. — En la poŝo de mia pantalono mi portas monujon, kaj en la poŝo de mia surtuto mi portas paperujon; pli grandan paperujon mi portas sub la brako. — La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo.

30. (Ekzercaro 41) (*ebl*, *ind*, *em*, *er*)

Ŝtalo estas fleksebla, sed fero ne estas fleksebla. — Vitro estas rompebla kaj travidebla. — Ne ĉiu kreskaĵo estas manĝebla. — Via parolo estas tute nekomprenebla, kaj viaj leteroj estas ĉiam skribitaj tute nelegeble. — Rakontu al mi vian malfeliĉon, ĉar eble mi povos helpi al vi. — Li rakontis al mi historion tute ne kredeblan. — Ĉu vi amas vian patron? — Kia demando! kompreneble, ke mi lin amas. — Mi kredeble ne povos veni al vi hodiaŭ, ĉar mi pensas, ke mi mem havos hodiaŭ gastojn. — Li estas homo ne kredinda. — Via ago estas tre laŭdinda. — Tiu ĉi grava tago restos por mi ĉiam memorinda. — Lia edzino estas tre laborema kaj ŝparema, sed ŝi estas ankaŭ tre babilema kaj kriema. — Li estas tre ekkolerema kaj ekscitiĝas ofte ĉe la plej malgranda bagatelo; tamen li estas tre pardonema, li ne portas longe la koleron kaj li tute ne estas venĝema. — Li estas tre kredema: eĉ la plej nekredeblajn aferojn, kiujn rakontas al li la plej nekredindaj homoj, li tuj kredas. — Centimo, pfenigo kaj kopeko estas moneroj. — Sablero enfalis en mian okulon. — Li estas tre purema, kaj eĉ unu polveron vi ne trovos sur lia vesto. — Unu fajrero estas sufiĉa, por eksplodigi pulvon.

31. (Ekzercaro 42) (*dis*, *re*, *moŝt*, *um*)

Ni ĉiuj kunvenis, por priparoli tre gravan aferon; sed ni ne povis atingi ian rezultaton, kaj ni disiris. — Malfeliĉo ofte kunigas la homojn, kaj feliĉo ofte disigas ilin. — Mi disŝiris la leteron kaj disĵetis ĝiajn pecetojn en ĉiujn angulojn de la ĉambro. — Li donis al mi monon, sed mi ĝin tuj redonis al li. — Mi foriras, sed atendu min, ĉar mi baldaŭ revenos. — La suno rebrilas en la klara akvo de la rivero. — Mi diris al la reĝo: via reĝa moŝto, pardonu min! — El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; la dua: al Lia Grafa Moŝto, Sinjoro P.; la tria: al Lia Moŝto, Sinjoro D. — La sufikso "um" ne havas difinitan signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun "um" oni devas lerni, kiel simplajn vortojn. Ekzemple: plenumi, kolumo, manumo. — Mi volonte plenumis lian deziron. — En malbona vetero oni povas facile malvarmumi. — Sano, sana, sane, sani, sanu, saniga, saneco, sanilo, sanigi, saniĝi, sanejo, sanisto, sanulo, malsano, malsana, malsane, malsani, malsanulo, malsaniga, malsaniĝi, malsaneta, malsanema, malsanulejo, malsanulisto, malsanero, malsaneraro, sanigebla, sanigisto, sanigilo, resanigi, resaniĝanto, sanigilejo, sanigejo, malsanemulo, sanilaro, malsanaro, malsanulido, nesana, malsanado, sanilaĵo, malsaneco, malsanemeco, saniginda, sanilujo, sanigilujo, remalsano, remalsaniĝo, malsanulino, sanigista, sanigilista, sanilista, malsanulista k. t. p.

3

RAKONTOJ

briko: ortangula paralelepipedo el bakita argilo, uzata por konstruado. = adobo
pino: 소나무 betulo: 자작나무
krono: kompletaĵo el floroj kaj folioj, formanta cirklon
ŝpinaĵo: la reto, ŝpinita de insekto
argilo

Józef Waśniewski

EN LA BRIKEJO

Bruas la pintoj de l'graciaj pinoj kaj de l'verdaj belvestitaj betuloj, ĉar la vento hodiaŭ blovas supre kaj ne povas ŝanceli la tutan arbaron. Por tio ĉi estas bezona ventego, ventego larĝa, por ke ĝi povu atingi la kampeton, ekskuigi ĉiun apartan betulon, ekbruegi en la krono de ĉia aparta pino. Tamen tio ĉi ordinare havas lokon dum finiĝanta aŭtuno, pluvema, petola, dum aŭtuno riĉa je malvarmaj kaj fortaj ventoj. Nun, somere, nek la bruna pineto tiel povas brui, nek la longaj branĉligetoj de betuloj povas ricevi la kareson de vento. La branĉoj, ornamitaj de malgrandaj folioj, mallevas sin direkte al la tero, kvazaŭ senmove, simile je radioj de disblovita ŝpinaĵo, aŭ je harligoj de koketema knabino. . . . Ili mallevas sin longaj, maldikaj, belaj kaj ploras ĉiumatene juliajn rosojn, ĵetante sur la teron ombron kaj malvarmeton, tiom multe serĉatan de homoj dum la somero, precipe, se la somero estas tiel varmega, kiel ĝi estis hodiaŭ en la meztago.

Kaj ĝi efektive estis varmega.

En la mezo de l'kampeto, tie, malproksime, en la brikejo la homoj preskaŭ ne povis labori. Ili laciĝadis, malfacile spiradis kaj preskaŭ falis pro laciĝo. La suno verŝadis el la ĉielo efektivan fajron sur la teron.

La taglaboristoj per la manoj, malpurigitaj de argilo, viŝadis la ŝviton de siaj bruligitaj fruntoj, ili kovradis siajn brulumitajn kapojn per larĝaj pajlaj ĉapeloj aŭ per felto, malmoliĝinta sub la pluvo. Kelkaj laboristoj ombradis la ĉapelon, la kapon kaj la vizaĝon, bruniĝintan de la suno, per folioj kaj malgrandaj branĉetoj, por ke la varmego ne trabruligu ilian cerbon, por ne malsaniĝi, ne fali, ne morti.

Tio ĉi estis terura! . . . La dudekoka milo de l' brikoj devis esti enmetata en la fornegon kaj tio ĉi estis preskaŭ superhoma laboro.

La suno brulis hodiaŭ pli, ol ĉiam, eble tial, ke en la fornego jam la dua klafto da rezinaj lignegoj brulis sub la dekkvara milo da krudaj brikoj kaj la forno estis tiel varmega, ke ne permesis proksimiĝi al ĝi! Kvar feraj pordetoj, preskaŭ blankaj pro fajro, elĵetas malgrandetajn fajreretojn, kaj interne estas vera kratero, en kiu brulas maro da flamo, kvazaŭ en la infero.

La kurbinta laboristo ĉiumomente kaŝas en la poŝon sian mallongan pipeton, viŝas per sia kalikota ĉemizo la ŝviton de l'frunto, alĵetas en tiun ĉi inferon rezinajn lignegojn kaj per longa fera hoko movas la brulantajn pecegojn, vekante miliardojn da fajreroj kaj krakon de flamantaj ligneregoj.

Kaj supre, tra la fendoj de l'fumita tegmento, la fumo estas puŝata kvazaŭ mallarĝaj riveretoj kaj elfluganta en la mondon, kiel densa, nigra nubego, malrapide ondanta pro la propra inercio kaj malforte levata de l'kratera varmego.

Postmorgaŭ la dua fornego estos jam preta por povi esti hejtata. Tri taglaboristoj tre akurate enmetas tien krudajn brikojn, konstruante por pli oportuna fajrigado malgrandajn krutajn koridorojn kaj fumtirtubojn, kaj kvar buboj kuradas tien kaj returnen sur tabuloj, kvazaŭ sur mallarĝaj vojetoj, kaj movas puŝveturilon, plenan da brikoj, ŝanceliĝante sub la pezo de la ŝarĝo.

La homoj parolas inter si nek unu vorton, ĉar ili ne havas pri kio paroli; ili kuras silente, ĉiu okupita de sia laboro, kiu bolas, malkara laŭ sia takso, malfacila laŭ sia plenumo. La bruo de l'mondo ne alkuras tien ĉi, longaj mejloj da interspaco apartigas tiun ĉi ermitejon de la bruado kaj de la moviĝo de l'civilizacio. Senpense, en simpleco de l'animo, fizike mizerigita, la homo penegas tie ĉi kaj laboras l'argilon, ĉar morgaŭ li ree devas manĝi, ne atentante, ĉu tie, post la brikejo, post la montoj de l'novesurŝutita argilo, post la betula arbaro, estas ankoraŭ ia mondo, kiu ankaŭ devas manĝi morgaŭ kaj kiu ankaŭ ne atentas la sorton de siaj proksimuloj en la brikejo.

Ankaŭ la majstroj de la brikejo, ili ankaŭ parolas nenion, kvankam ili pensas kiom da griza argilo ili povos elfari en la brikojn antaŭ la sunmalleviĝo, ĉar ĉia milo da ili alportas al ili preskaŭ "tri paperetojn"*; tial ili rapidas, kvazaŭ tiu ĉi sekvonta milo signifas la finon de ilia laborego kaj kvazaŭ tiuj ĉi "tri paperetoj" malfermas la pordon al feliĉo kaj bonstato.

Ili veturigas kaj veturigas argilon el la kavernoj, bruetante per la krakantaj radetoj de la puŝveturiloj sur la tabuloj, kondukantaj ĝis la larĝaj tabloj, sur kiuj aliaj laboristoj, ĉiumomente trempante la manojn en siteloj kun malpura akvo, kunpremas l'argilon per la manplatoj ŝprucante ĝin ĉirkaŭe, kaj energie dislokante ĝin; poste ili enpremas l'argilon en kvarangulan formon, ebenigas ĝin per ebenilo kaj, kaptinte la krucigitan flankon de tiu ĉi sama ligna formo, ili lerte laŭ vico elĵetas ĝian enhavon sur ebenan plataĵon.

Kaj tio ĉi estas unu briko pli inter la miloj, el kiuj la mondo konstruas domojn kaj palacojn.

Bruas la pintoj de l'graciaj pinoj kaj de l'belkreskaj betuloj. En la brikejo, malgraŭ tiu ĉi estas preskaŭ ne aŭdebla brueto. La suno jam foriras posten la arbaro, ĵetante siajn lastajn rozetajn radiojn. Antaŭ la dometo duonnudaj infanoj sidas sub la ombro de l'altekreskintaj loloj, kardoj kaj urtikoj; ili ludas pecetojn de seka argilo, kiujn ili ĵetadas senpense antaŭ si. Hundo kun flava palinta malpurigita lano enmetas tien sian nazon, kuŝas fermure suben, kuntirinte sian korpon kaj dormetante, kaj de tempo al tempo rigardas per siaj sangruĝaj okulegoj la herbojn, la infanojn, la brikejon. Sur la sojlo de l'dometo sidas virino, volvita de ĉifonaĵo, kaj per rompita tranĉilo senŝeligas por la vespermanĝo terpomojn, ĵetante ilin en la pladon kun akvo.

La dike teksita ĉemizo, kaviĝinta sur la enfleksita brusto, malkovras ŝian sekan sulkitan haŭton bruligitan de someraj varmegoj; la manikoj, rulitaj post la

* t. e. paperan monon.

kubuto, montras lacintajn manojn, sulkitajn de dikaj kaj sekaj vejnoj. Ŝia vizaĝo estas senpensa kaj tiel elturmentita pro zorgoj por ĉiutaga pano, ke nenia medito kuraĝas reviviĝi en ŝia cerbo kaj montriĝi sur la vizaĝo por esprimi doloron aŭ kontenton.

Eĉ la amasoj de trabruligitaj brikoj, kuŝantaj kiel sanga makulo en la brikejo kaj atendantaj la plenumon de sia grava funkcio en la mondo, eĉ tiuj ĉi senvivaj amasoj verŝas en la homan animon pli da ĝojo, ol tiu figuro de la viva virino.

Per tiuj ĉi amasoj da briko la homoj levas konstruaĵojn, grandajn konstruaĵojn.

Tiu ĉi senviva figuro de l'virino estas ankaŭ angula briko en la konstruaĵo de familioj de la brikistoj. Ŝi senŝeligas terpomojn, ŝi muelas sur ŝtonoj sekalon, ŝi tranĉas per tondilego dikan tolon kaj per granda kudrilo kudras ĝin.

La malfacila vivo instruis ŝin je multaj ŝarĝaj, maldelikataj laboroj, je tiom multe, ke kelkaj el ŝiaj plifruaj delikataj deziroj kaj sentoj perdiĝis por ĉiam, kaj ŝi fariĝis tiel same kruda kaj maldelikata, kiel ŝia nuna vivo, kiel la elfosata argilo.

Ŝi ne zorgas, ke tiuj ĉi nudpiedaj malgranduloj, kurantaj sur la krutaj montoj de l'argilo, pro petolo, povas ruliĝi de ili kune kun pecoj de l'tero, kun la malsekaj trunkoj de l'kreskaĵoj kaj kun la restaĵoj de l'brikoj tien, malsupren, ĝis la bordo de la silenta, verdeta akvo, kie estas kaŝita la morto, tien, sur la fundon de l'nemezurebla profundaĵo; ŝi ne zorgas, ke inter la arbaraj kreskaĵoj inter la loloj, en la rubo de la brikejo ŝia infano eble iras per siaj nudaj piedetoj sur nestoj de kolubroj kaj de viperoj; ŝi ne pensas laŭ kia vojo tiu ĉi infano iros poste tra la mondo kaj kie ĝi haltiĝos en tiu ĉi vojaĝo de l'plendorna vivo.

Ĉe la tombejo, en la tombo . . . diras ŝi.

Tie ĉi la homa vivo fluas nur laŭ tiu ĉi vojo de l'penso, ebene, senbrue, trankvile, kiel vento tra bruantaj pintoj de l'arbaro. Unu tago estas simila je la alia, kiel unu produndaĵo de argilaj kavernoj je la dua, kiel brikoj kaj tegment-brikoj el unu sama formo kiel vestoĉifonoj, traigitaj de argilo, sur la dorsoj de taglaboristoj.

La infanoj, libere petolantaj ĉiutage, timas sole fremdulon kaj kiam ili vidas lin, ili kaŝas sin en la faldoj de l'malpura patrina jupo aŭ krie forkuras post la gepatran dometon kaj malaperas tie inter florantaj papavoj en la ĝardeneto aŭ inter la loloj de l'intermontoj. Iafoje ili elŝovas sin pli malsupren ĝis la laborita argilo, ili sidiĝas sur plenajn puŝveturilojn kaj, per la forto de l'imago transportiĝante en ian misteran mondon, fantazias veturi, kuraĝigante per krio la imagatajn ventpiedajn Pegasojn, kiujn ili rapidigas per branĉoj de filikoj aŭ per seka trunko de lapo. Aŭ ree ili provas levi la puŝveturilon kaj movi ĝin, sed la fortoj de l'malgrandaj manoj ankoraŭ unu fojon trompas ilin.

Tie ĉi, en la brikejo, estas aŭdata nur tia krio:

— La akcipitro forportis kokidon!

Aŭ ankaŭ alia voĉo, ripetata de ĉiuj:

— Lia moŝto sinjoro heredulo venis!

Tiam la infanoj, faletante sur la pecetojn de argilo kaj de brikoj, vundigantaj la nudajn piedojn per urtiko aŭ per pikiloj de kardo, forkuras en la intermontojn aŭ en la dometojn, kaj ploras, kiam ili falas dum la kurado.

La sinjoro heredulo tre malofte venas tien ĉi, ĉar li havas multnombran servantaron, kiu anstataŭas lin por tiu ĉi afero. Tamen la pejzaĝo de l'arbaro, la verdaĵo de l'betuloj, l'aromato de l'herboj kaj de arbaraj kreskaĵoj, la fantaziaj konturoj de l'intermontoj, prezentantaj originalan pentraĵon, faras la lokon agrabla eĉ por la sinjoro heredulo kiu amas tie ĉi promenadi en eleganta malkovrita kaleŝo, tirata de altkreskaj blanke-grizaj ĉevaloj. Tiam la ĉefa brikisto kaj deko de aliaj laboristoj kun esprimo de timego kaj de senlima respekto malalte klinas siajn malkovritajn kapojn, preskaŭ tuŝante per la manoj la teron, sur kiu la piedoj de lia moŝto volis pro bonkoreco haltiĝi. Li mem iras tie ĉi rapide, demandas pri la nombro de l'elfaritaj brikoj, duonlaŭte kalkulas la enspezojn de l'brikejo, ekzamenas ĝian staton, tuŝetas per sia blanka fingro la malsekan argilon, prenas el la kradoj krudan brikon, sekiĝintan en la aero, pesas ĝin sur la mano, rimarkas la kvaroncolan etiĝon de ĝi post la trabruligo, kaj provas per sia pugna ekbato la sonoron de l'preta tegmentbriko.

Sed li faras tion ĉi tre rapide, pro manko de libera tempo.

Dume la infanoj, poste la kreskaĵaj trunkoj de loloj, elŝovas sin malkuraĝe, kun ravo rigardante la brilan kaleŝon, kies odoro de gudro, de oleo kaj de l'ledo agrable pikas ilian flaron. Ili rigardas per ravitaj okuloj la ĉevalojn, frapantajn la teron per la hufoj, la jungaĵon, sonantan per brilantaj radetoj, la livreon de l'veturigisto, la molajn kusenojn de la kaleŝo, la vipon. . . . Precipe atente kaj dezirege la knaboj rigardas la vipon de l'veturigisto.

Ha, se oni povus havi tian vipon, nenion pli en la mondo! Tian vipon svingadi, ludante ĉevalojn! per tia vipo forhakadi la rozkolorajn kapetojn de l'kardo! per tia vipo vergadi la abomenajn bufojn en la intermontoj! Per tia vipo eĉ ne estus ĉagrene ricevi vergadon sur la propran dorson, aŭ ekbaton sur la nudajn piedojn . . .

La vipo estas la idealo de l'infanoj el la brikejo, objekto de interparolado, de revoj. En la imago de la petoluloj el la brikejo, la vipo fariĝas io granda, potenca, universa, kiu profunde eniĝas iliajn animojn, efikas ilin tage kaj nokte kaj dum la sonĝado aperas al ili kvazaŭ aŭreolo, tiranta al si la infanojn, kiuj daŭre la dormado celegas al ĝi, perdas larmetojn, ekkrias kaj vekiĝas.

La sekvantan tagon ili ligas al branĉo ŝnureton, aŭ ĉifonon el malnova jupo de iliaj patrinoj kaj batas per ĝi florojn, herbon, bufojn kaj papiliojn. Ho ve! tiu ĉi improvizita vipo ne forhakas, ne forpuŝas eĉ la penikojn de floretoj, sen paroli pri la plidikaj kapoj de kardo aŭ de lapo.

Kaj ĉe la vespermanĝo ili fine demandas la patron, humilaj kaj naivaj:

"Patreto . . . ni volas vipon, tian vipon, per kia la veturigisto de lia moŝto batas la ĉevalojn . . . patreto . . ."

Kaj la patreto malfacile spiras, duonfermas la okulojn, mallevas la kapon kun

nigretaj pensoj sur lacintajn kaj malpurigitajn de argilo manojn poste turnas la okulojn al la edzino, levas iom la frunton kaj diras kvazaŭ al si mem:

"Li estis . . . iradis, kaj kalkulis . . . kalkulis . . . Ĉien ĵetis la rigardojn. . . . Poste li ensaltis en la kaleŝon, kaj forflugis, kiel vento, al la kampo."

Kaj la infano kun atentaj okuloj aŭskultas timeme, ne kuraĝante eĉ ekspiri per sia malgranda brusto.

Nur de tempo al tempo el la mallumaj anguloj de l'ĉambro flugas tra la aero mallaŭta malkuraĝa diro de l'infano:

"Estis la sinjoro heredulo."

Dume li tie, en sia palaco, ne alirebla por simplaj homoj, tute ne scias, ke tie ĉi, en la senbrua brikejo, li estas objekto de parolado de estimo kaj de revoj. Li ne scias, ke por la animo de infano de l'brikejo, li aperas kiel supertera, fantazia, grandega fortulo, kiel majesta kaj rava meteoro, kiel brilo por la malriĉa imago, kiel aŭreolo de beleco kaj de sorĉo.

Kaj la sorĉo, elflugante de lia granda persono, fluas inter la grizaj sonĝoj de l'homo, por kiu la brikejo estas la tuta universo, la bruo de l'arbaro – ĉiama muziko, la intermontoj – mirindaj vidaĵoj, la suno – la sola lumo kaj la varmeco, amata de tiu ĉi eterna aŭtuno de la brikeja vivo.

Ĉar kio alia tie ĉi povas esti? La taglaboristoj, jungitaj per la severa postulemeco de l'sorto, al la puŝveturilo kun la argilo kaj la sinjoro heredulo, veturanta en kaleŝo sur molaj kusenoj – jen kio plenigas la tutan ĉi-tiean vivon.

* * *

Pli malsupre, en la arbaro, estas altaj formikejoj kun moviĝanta amaso de laborantaj insektoj; en la intermontoj loĝas bufoj kaj ranoj, varmigataj de la suno post ilia franda manĝego, la sola okupo de amfibioj.

Tio ĉi estas tuta mondo, ĉie kaj ĉiam egala. Jen en la rempareto, konsistanta el malgrandaj trunketoj, el pikiloj de abio kaj el sekaj herboj, la vivo bolas ne pli malrapide, ol en la brikejo inter la homoj.

Ekstere de l'formikejo centoj da malgrandaj laboristoj kuradas sur malrekta vojo, kvazaŭ sencele; sed estas sufiĉe observi unu formikon por vidi kiel ĝi kuradas sole sur unu sama spaceto sur kiu ĝi plenumas sian devon, forŝovante trunketojn kaj pajletojn, kolektante ilin en alian lokon, bonigante ilian pozicion kaj daŭrigante pluen sian vojon, aŭ haltiĝante; ĝi movas siajn kornetojn, aŭ kurante devigas aliajn kuri laŭ la ĝusta vojo. Kaj tiel ĉiu plenumas harmonie sian devon, ne deirante de l'difina vojo, ne malhelpante unu al la alia.

Sed jen falas folio de betulo, alportita de la vento. La insektoj tuj kuras al ĝi, flaras ĝin, palpas per la kornetoj, iradas ĉirkaŭ ĝi. La folio falis ekster la formikejo kaj tial la insektoj ne tuŝas ĝin, kvazaŭ domaĝante la tempon por transporti la folion tra la limo de l'rempareto, kaj ĉiuj revenas al siaj okupoj. Sed se ia branĉeto barus l'eniron de la formikejo, la malhelpo tuj estus forigita per komunaj fortoj kaj laŭ bona ordo.

Kiam sciama homo mallevas sian vizaĝon pli proksimen al la formikejo, tiam la insektoj por unu momento haltiĝas, kvazaŭ enpensiĝe, sed baldaŭ sekvas pli rapida kurado kaj normala movado. Tamen, se komencas gutadi pluvo, sur la ekstero de l'formikejoj la movado plifortiĝas kaj apud la enirejoj en la koridorojn oni povas rimarki tumulton. Nur tiam la formikoj malaltiĝas ĝis la homaj moroj; ili ne atendas laŭvican ordon, ne kaŝas sin unu post la alia, sed ĉiu, atentanta sian propran danĝeron, celas kaŝi sin pli frue ol aliaj.

Tamen estas formikoj, al kiuj la pluvo faras nenian impreson. Tiuj ĉi per larĝaj vojetoj kaj tuneloj malproksimiĝas de la formikejo por kolektadi dolĉajn kreskaĵajn sukojn, fruktojn, aŭ restaĵojn da afizoj* aŭ l'afizojn mem, kiuj, portitaj en la malliberecon, estas kondukataj en la formikejon. Ia formiko, malproksime de sia domo kaptita de l'vento kaj rapide reĵetita sur la formikejon, staras kvazaŭ mirante, ke ĝi tiel subite revenis hejmen, ne plenuminte sian devon: ĝi ŝancelas la kornetojn, enpensiĝas kaj ree laŭ tia sama direkto, laŭ la antaŭa vojo kuras aŭ pelas siajn kolegojn. La tuta mondo post la formikejo, la mondo granda, vasta neniel interesas ilin. Ĉiu faras sian propran laboron, kun la sola celo subteni sian vivon, sian genton, sian formikejon.

Kiel en la brikejo . . . inter la homoj.

Tute alie vivas la bufoj kaj la ranoj. Glutante insektojn, sataj kaj multpezaj, ili sidas sur la bordo de postargilaj lagetoj kaj ektimigitaj, saltas en la malfreŝan putran verdan akvon por post unu momento dismeti la postajn piedojn, reaperi tuj el sub la fluidaĵo, elmeti la kapon, enspiri la aeron kaj per freneza salto aliĝi al la bordo, elrampi, kaj sidiĝi tie senmove, kvazaŭ malpurigita ŝtono. En la pli grandaj kaj ĉirkaŭlignitaj kavoj la bufoj kroĉas lignajn flankojn aŭ naĝantan duonputran pecon de arbo, aŭ sidante sur peceto de glita tabulo, naĝas kvazaŭ sur floso, movanta sur la supraĵo de l'akvo per malfortiĝanta inercio, kaŭzita de la eksalto de l'amfibioj. Iliaj streĉitaj okuloj, senmove kaj senpense direktitaj en unu punkton, ilia haŭto mirinde bela en siaj detaloj kaj abomena en la tuteco, ilia larĝa buŝego, de tempo al tempo avide malfermata, deturnigas observiston de tiu ĉi viva ekzistaĵo, kiu tamen ankaŭ havas rajton vivi tiel same kiel homoj, kies sola eksteraĵo ofendas nian estetikan senton.

La ĵetita peceto de argilo ne timigas ilin. Ili maldiligentaj, nenion farantaj, akceptas la baton pli malpli indiferente, iafoje nur movante la piedojn, aŭ renversiĝante malrapide flanken. Pli granda peceto de tero, ĵetita sur ilian korpon faras surdan resonon, kvazaŭ de ekbatita malplena haŭta tego; eĉ bato pli dolora elvokas nur mallaŭtan ĝemeton kaj tamen neniam movas de la oportuna loko la multpezan amfibion. Oni devas stariĝi antaŭ ili per sia tuta alta figuro, etendi al ili la bastonon, eĉ sen malbonaj intencoj, je kelka grado montrante koleron, kaj nur tiam la bufoj saltas en la akvon unu post la alia.

Kiel en la urboj . . . inter la homoj . . .

---

*Latine *aphis* (nuntempe: afido).

Bruas la pintoj de l'graciaj pinoj kaj de l'verdaj belvestitaj betuloj. La suno jam klinis post la arbaron sian helan kapon, en la arbetaro voĉas griloj kaj la botaŭroj; sur la herbetoj krakas raloj. En la malproksimo estas aŭdata brueto de l'babilanta muelejo, diretoj de kanoj kaj bruetoj de l'akvo en la riverotoj. El la marĉo elflugas surda ĝemo de ranoj, kaj la nokto malrapide volvas sian krepon ĉirkaŭ tiuj ĉi herboj kaj arbareto kaj la kanoj de l'rivero kaj la arĝenta malrekta rubando de l'fluida strio.

Super la horizonto jam ekpendis pala duonluno, la steloj unu post la alia komencis palpebri al la tero, super la herbo ondas malseka nebulo, kvazaŭ granda majesta baldakeno, sub kiu brilas la rosoj sur la herboj kaj flugas koraj sopiroj de homoj. . . .

En la brikejo regas silento, kiel ankaŭ en la homa dormetanta animo, kaj en la pensojn eniĝas mirinda trankvileco . . .

Biblioteko de la Lingvo Internacia Esperanto, n-ro 116. Nürnberg 1898.

Magnus Nordensvan

LA KRISTNASKA BULKO

Ĉe mia najbaro, la bakisto, oni festis gajegan Kristnaskon.

Jen estas la kaŭzo.

Multaj jaroj jam estis foriĝintaj de tiu tempo, kiam Ville Rojni pasigis Kristnaskan feston en sia gepatra hejmo, aŭ havis la okazon viziti ĝin.

Ĉiam ia malhelpo estis okazinta: unue la longa, malfacila veturo el la universitata urbo kaj la devo prepari la ekzamenojn; due, dum la unuaj oficaj jaroj, la neceso ĉeesti por okazo de ebla plialtiĝo; kaj fine la edziĝo je la riĉa, dorlotita Elli Blum', kies grandan fotografaĵon li estis sendinta al siaj gepatroj anstataŭe, ĉar ili ne povis vidi ŝin mem.

La tagoj de tiu tempo estis sekvintaj unu post la alia, ĝis ili formis longan ĉenon da konsumantaj amuzoj, nomataj devoj, kaj fine da turmenta maltrankvileco.

La patro de Elli estis mortinta, lasinta kontraŭsupoze post si preskaŭ nenian havon; kaj la junaj geedzoj estis restintaj kun siaj multekostaj kutimoj kaj la ŝuldoj, amasigitaj, dum ili atendis la supozitan grandan heredon.

De tiu tempo Ville ĉiam pli forte estis rememoriĝinta, ke lia propra patro ankoraŭ vivas kaj laŭ ĉiuj supozoj estas iom riĉa viro, al kiu li, jam tro longe malŝatinte, nun devus alproksimiĝi.

Post la unua letero, plena nur je personaj informoj kun senkulpiga klarigo pri la kaŭzoj de la longa silentado, kiun oni tamen ne devus kompreni kiel malvarmon, – sekvis dua, plena je aludoj pri ĉagrenoj, – kaj tria, kun kortuŝanta peto pri helpo baldaŭa pro malfacilaĵoj minacantaj.

La respondo ne estis tuj ricevita, kaj la enhavo tute ne estis kontentiganta la esperojn.

La majstro-bakisto Rojni estis montrinta sin tre fiera pri sia unuenaskito, pli ol pri ĉio alia, kaj estis peneginta, por akiri al li tion, kion li mem ne estis ricevinta – bonan edukadon.

Ju pli li devos senti sin danka al mi, des pli li amos min, li opiniis, kliniĝante super la ŝveliĝantan paston aŭ formante ĝin je apetitdonaj panoj kaj bulkoj, aŭ ordigante ilin sur la bretojn de l'vendejo.

Okazis tamen tute alie.

Komencinte per kelkaj sakoj da faruno, aĉetitaj kredite, li nun konsumis milojn da ĝi. Vaporo kaj maŝinoj helpis lin, kaj nun li ne bezonis plu klopodi, sed nur kontroli la rezultatojn.

La malfacilajn pasintajn jarojn, kiuj estis kvazaŭ longa senhalta labortago, li tamen neniam estis forgesinta; kontraŭe ili aperis pli klare, nun kiam la faciliĝo de la laboro lasis al li tempon por pripensadi –, kaj kion li do pripensadus, krom

tio nur, kiel li estis peneginta pro la filo, por rikolti nenion escepte sendankecon.
"Vivinte tiel longe unu sen la alia, ni povos daŭrigi tiel same" li estis skribinta kun maldolĉeco, kvankam li sentis kvazaŭ plezuron, malkovrante sian doloron.
La filo, leginte la leteron skribitan per grandaj malspertaj literoj, kaj trovinte en ĝi nenian pacigan aŭ kuraĝigan vorton, estis kaptita de malespero.
"Nu! mia sorto estas fiksita. La ruiniĝo fariĝas neevitebla . . . Poste – tro malfrue – la patro pentos. Tio ĉi estas tamen konsolo." – Sed la edzino? la infano nun atendata, post multjara edzeco?
Li tordis siajn manojn, promenante tie ĉi kaj tie en la ĉambro. Poste li rimarkis kaj levis papereton falintan sur la tapiŝon. Ĵus intencante forĵeti ĝin en la paperkorbon, li ekvidis la vortojn "via amanta patrino". Li ektremis per la tuta korpo kaj, proksimiĝinte al la lampo, li legis: "Paĉjo ne scias, ke mi enmetis tiun ĉi peceton en lian leteron. Se li estas skribinta ion malagrablan, ne tro maltrankviliĝu pro ĝi! Estas ja nenio tiel fatala, kiel ŝajnas. – Plej bone estos, se vi alveturos tien ĉi, por mem paroli kun li; tion ĉi kredeble li deziras. La Kristnasko proksimiĝas kaj . . ."
Kristnasko! Kristnasko! Li relegis la vorton kvazaŭ li vidus ĝin je l'unua fojo aŭ bezonus komprenigi al si ĝian sencon.
Kio do estis por li la Kristnasko dum la lastaj pasintaj jaroj krom epoko, en kiu oni manĝas, trinkas duoble, kaj elspezas pli da mono ol ordinare.
Amaso da malnovaj rememoroj ĉirkaŭvagis lin kvazaŭ varmaj, brilaj flugiloj, sed li volis, nek rimarki ilin nek sekvi la allogon.
Ho! patrino! Estus ja agrablege ankoraŭ esti karesata per ŝiaj manoj . . . Sed la humiliĝo! Ĉar ili ne veturis tien pli frue, kiel ili nun kuraĝus, tion ĉi fari? Kiel oni ankaŭ akceptus la edzinon? Ĉu ŝi volus?
Restis nur kelke da tagoj ĝis la festo, sed la malgrandega sopira semo, enmetita en lian koron, tamen pligrandiĝis tiel, ke ĝi subpremis ĉion alian. Tiamaniere ili estis veturintaj en la lasta momento, ne sciiginte pri sia alveno.

* * *

La gepatra urbo estis grandiĝinta, tiel ke li apenaŭ povis ĝin rekoni.
Tion ĉi li rimarkis kvazaŭ en sonĝo, dum ili veturis de la stacidomo. Li estis lacigita kaj malvarmigita de la sendorma nokto en la vagonaro. Lia edzino kontraŭe, plene vigla kaj je l'unua fojo vidante la vivplenan movadon sur la stratoj kaj bazaroj dum la mateno antaŭ la Kristnaska vespero, ŝajnis pli gaja ol de longa tempo.
Estis ja vere io rigardinda, kiel viroj, virinoj kaj infanoj, eĉ la plej malriĉaj, portis abiojn, ornamitajn kandelingojn, verdaĵojn, provizojn kaj ĉiuspecajn pakojn. – Ha! kian gajegan mienon ĉiuj havis! kvazaŭ tute ne ekzistus ĉagrenoj! Larmoj senvole aperis en ŝiajn okulojn.
La renkontiĝo de l'gepatroj kun la infanoj estis pli ĝentila ol kora.

Oni havis multege da aferoj por rakonti; tamen ĉiuj serĉis la vortojn, timante ne trovi la ĝustajn esprimojn aŭ eĉ diri ion malkonvenan.

La patrino akompanis la junulojn en la gastoĉambron, kie la lito kun baldakeno estis kovrita per littukoj ornamitaj de puntaĵo kaj fajraĵo afable krakadis.

"Mi iomete suspektis, ke vi estis venontaj" ŝi diris embarase, gladante per la mano la verdfloran silkan litkovrilon. Poste ŝi malaperis, por zorgi pri la matenmanĝo, kaj dume ŝi ridetis je siaj propraj pensoj.

La patro, kies malvarma, severa mieno ankoraŭ pli senkuraĝigis la filon, foriĝis por viziti la bakejon. Tien irante, li per sia naztuko viŝis sian vizaĝon, ĝin viŝis ree kaj ankoraŭ ree, ĝis li fine supozis, ke ĝi estas trankvila kiel ordinare.

Tio ĉi tamen ne prosperis al li; eĉ la plej juna baklernanto rimarkis, ke la okuloj estis plenaj je larmoj, dum la vizaĝo brilis pro feliĉego. Estis ja Kristnasko; tial la fakto prezentis nenion mirindan. Ĉu tiu, en kies vendejon la aĉetantoj amase aperis kaj malaperis laŭ senĉesaj vicoj, kiu dum tiu vespero povis satigi centojn kaj milojn da malsatuloj, kaj konsciis, ke li neniam malgrandigis la panon eĉ se la faruno fariĝis pli multekosta, povus vidiĝi alia?

"Al mi ŝajnas, ke vi donacas malpli ol ordinare", li diris, ĉirkaŭirante por ekzameni la grandajn korbojn kun panoj pretaj, por esti disdonataj al la mizeruloj de l'urbo. "Aldonu ankoraŭ multe, pli multe".

En la sama tempo la filo staris ĉe la fenestro de l'salono, rigardante trans la korto la grandan konstruaĵon ŝtonan, kun ĝiaj multenombraj fenestroj kaj altaj kamentuboj, anstataŭ la estinta ligna, kiun li memoris. Kiom li do ĝojus je tio, se nur la amika, gaja patro ne estus ankoraŭ pli aliiĝinta!

* * *

Venis la vespero, kaj en la bakejo, tra kies fenestroj la lumo ordinare vidiĝis dum la tutaj noktoj, nun estis mallume.

En la subetaĝo la servantaro vespermanĝis, kaj supre, en la manĝoĉambro, la tablo estis aranĝita kun kandelabroj antaŭ ĉia manĝilaro. Meze de la tablo, inter ŝinko, porkokapo kaj amaso da Kristnaskaj bulkoj, ŝaŭmis biero en ŝtonaj bierujoj.

Ville, nerimarkate, pasis de ĉambro en ĉambron, renovigante sian memoron pri la mebloj kaj ornamaĵoj.

Ho kiel mirinde ĉio rememorigis lin pri la pasintaj tagoj!

Ĉio estis tiel simpla, komforta kaj aminda!

Kiam oni estis sidiĝinta ĉirkaŭ la tablon, ĉiuj kandeloj de l'abio estis ekbruligitaj.

La patrino sidis apud la filo kaj la patro kontraŭe, kun Elli, videble plene kontenta je sia loko.

La interparolado fervoriĝis kaj la gajeco kreskis, dum Ville manĝis, parolis kaj respondis kvazaŭ en sonĝo. Dume liaj rigardoj vagadis inter la patro, patrino, fratino kaj frato, kiujn li preskaŭ estis forgesinta.

Kiel saĝa, forta kaj konfidema ŝajnis lia patrino! Kaj la gefratoj, kiel sanaj kaj gajaj! Li sentis piketon de doloro kaj envio . . . Ili do certe fariĝos tute aliaj, pli bonaj homoj ol li mem.

La patron li observadis nur kaŝate. Tamen ju pli li rigardis lin, des pli al li ŝajnis klare, ke la severa mieno de l'mateno estis nur masko, ĉe li tute ne konvena; ĉar estis neniel supozeble, ke tiu grizulo kun sia ruĝeta vizaĝo amika, ŝercante kun lia edzino kaj igante ŝin ridi pli kore, ol ŝi iam estis ridinta, povus esti tiel timiga.

Sed! . . . eble li intencas montri, ke li estas kolera nur kontraŭ la filo. Sole por tiu ĉi li havis nenian amikan vorton.

Jen ekrenkontiĝis iliaj rigardoj, kaj ambaŭ mallevis la okulojn.

La patro faris ankaŭ siajn observojn kaj ĝojis je tio, ke la bofilino havas ne nur ĉarman kaj belan eksteraĵon, sed ankaŭ estas saĝa en sia interparolo, unuvorte boninklina, kio certe malvolviĝos, kiam ŝi baldaŭ fariĝos patrino.

Sur lian vizaĝon aperis petola esprimo, kiam li, duone rigardante trans la tablo, rimarkis la filon ekzamenantan la Kristnaskajn bulkojn antaŭ si.

Unue la konservado de tiu ĉi antikva kutimo, konvena por infanoj, sed neniel por plenkreskuloj, ŝajnis al la filo tute ridinda; sed poste, varmiĝinta per malnovaj rememoroj kaj sentoj, li vidis ke, sen tiu ĉi bulkaro kun ĝiaj porketoj kaj kringoj per sekaj korintaj vinberoj ornamitaj, tute similaj je tiuj de lia infaneco – efektiva Kristnaska festo ne estus eĉ ebla.

Ĝuste en tia bulko li estis ricevinta sian unuan poŝ-horloĝon. Nun li rememoriĝis eĉ pri tiu ĉi okazintaĵo.

Senvole li turnis la antaŭ lin metitan bulkon, kaj jen! ankaŭ ĝi estis provizita per kovrilo, sub kiu estis kaveto el kiu aperis papereto . . . Li estis tute pala, kiam li malkovris ĝin kaj eltiris kambion ĝuste de tiu sumo, kiu estis al li necesega, por esti savita kaj denove komenci lian vivon kun pli bonaj esperoj.

La patro kaj la filo stariĝis, rigide rigardante unu la alian per malcertaj demandantaj rigardoj. Fariĝis silento en la ĉambro, kvazaŭ aliaj ne ekzistus tie – kaj ili troviĝis ĉirkaŭprenantaj unu la alian.

"Ho paĉjo! estas tro multe: pli ol mi meritas! Dankon! koregan dankon!"

"Ne danku min, danku al mia laborado, al mia metio, kiun vi trovis tro malnobla." Tio ĉi estis la lasta resto de maldolĉeco, kiun li lasis aperi. – Nun li ridis kaj ploris samtempe.

"Estas bonege, ke vi alveturis; alie mi estus devinta telegrafi tiun ĉi Kristnaskan saluton: ĉar skribi ne estas mia afero; tion mi lasas al vi kaj al la instruituloj . . . Vi ja, mi supozas, bruligis mian sensencan leteron?"

"Ne! ĝi igis min pripensadi pli ol io alia – krom la Kristnaska bulko! . . . Kaj nun, paĉjo, mi sentas, ke io multe pli potenca ol la parenceco por ĉiam ligas nin unu al la alia."

El Esperantaj prozaĵoj. Kolekto aprobita de d-ro Zamenhof.
Hachette, Parizo 1906, p. 85-91.

Ivan Širjaev

ANKORAŬ UNU MALAGRABLAĴO

Fine mi atingis la celon de mia longa veturado en glitveturilo. La ĉevaloj lacaj, malfacile spirante, altrenis mian veturilon al la perono de granda duetaĝa lernejkonstruaĵo vilaĝa, kies tri flankoj rigardis malafablan tombejon kun nigraj lignaj krucoj kaj nur la kvara estis turnita al la vojo. La vilaĝo estis tre malgranda; sur la strato estis vidata neniu. Kun koro premata de doloro mi rigardis la vilaĝon: rekte antaŭ mi staris preĝejo malgranda; dekstre, tri-kvar dometoj malnovaj kun malgrandaj kaj malpuraj fenestroj; maldekstre, grandega konstruaĵo grizkolora, pli simila al malliberejo ol al lernejo, kaj post ĝi longa, senfina vico da tombkrucoj...

– Kia abomena loko, diris mia veturigisto, alligante la ĉevalojn al ĉirkaŭbaraĵo. Mi kompatas vin, sinjoro...

Mia koro ekdoloris pli forte, ĉar mi jam antaŭvidis enuan unutonan vivadon, kiu atendas min meze de tombkrucoj.

Sur la lerneja sojlo aperis alta figuro de lernejservisto; en sia mano li tenis lanternon kun enmetita resto da sebkandelo, kiu verŝas ĉirkaŭe lumon malfortan. Dum mi kun granda peno liberigis miajn piedojn el multepeza kovrilo ĉirkaŭŝutita de neĝflokoj, li longe rigardis min per siaj okuloj maljunaj, kaj, videble, vidis min malbone. Fine, li, kvazaŭ ion konsiderinte, starigis lanternon teren kaj ekkuris al mi.

– Ĉu vi estas la instruisto? – li demandis, veninte. Kaj ankoraŭ ne ricevinte mian respondon, li daŭrigis: – Permesu al mi... jen mi helpos vin, sinjoro!... Ne klopodu, mi deportos viajn valizojn en la lernejon... mi ĉion ordigos...

– Ĉu vi, maljunulo, atendis min?... Vi estas, videble, lernejservisto?

– Jes, jes, sinjoro... Mi jam pensis, ke nia lernejo restos sen instruisto... Dudek jarojn mi servas jam ĉi tie; mi servis al dek du instruistoj... Volu iri post mi... jen ĉi tien, sinjoro!

Mi eniris longan mallarĝan koridoron, en kies anguloj kaj plafono pendis araneaĵoj, blankiĝintaj pro la neĝo kaj brilantaj per milo da steletoj diamantaj. La planko malpura estis kovrita per dika glacitegaĵo kaj oni devis havi multe da lerteco por ne ekgliti kaj ne fali. En fino de la koridoro estis vidata pordo. La maljunulo, haltinte antaŭ ĝi, longe sonoris per granda ŝlosilaro, ne povante trovi la ŝlosilon bezonatan. Kiam ĝi, fine, estis trovita, li uzis tutan sian lertecon kaj energion, sed, kiel intence, liaj manoj tremis kaj la ŝlosilo ne povis enmetiĝi en la fendon. Tamen, post longa peno, la pordo estis malfermita kaj mi, simile al animo peka, post longa vico da malfacilaĵoj, fine prosperis atingi la paradizon, – instruistloĝejon... Bedaŭrinde ĝia forno ne estis hejtita; feliĉe, la klopodema

servisto trankviligis min, parolante, ke post kvarono de horo li povas fari la loĝejon pli varma eĉ ol infero. Mi decidis pacience atendi, min amuzante per ĉi tiu espero.

Dum estis enportataj miaj sakoj kaj hejtata la forno, mi ĉirkaŭrigardis mian estontan "malliberejon". Ĝi estis malgranda kaj malpura; tri malaltaj fenestroj, turnitaj al la tombejo, estis prujnigitaj. Unu tablo kun piedo rompita; du seĝoj kun tiom dikaj piedoj, kvazaŭ oni supozis sidigi sur ilin ne instruiston, kiu preskaŭ ĉie kaj ĉiam estas ial maldika kaj malpeza, sed ian grandegulon; lito kaj super ĝi granda pentraĵo en kadro antikva, prezentanta ian belulinon duonnudigitan kun vangoj similaj al grandaj maturaj pomoj ruĝaj – jen estis la ornamaro de la modesta loĝejo.

Mia koro ekbatis pli malsaneme, kiam mi ekpensis, ke en tiu ĉi ĉambro mi devos pasigadi, eble dum longa tempo, la horojn enuajn de ripozo vintrovespera... Por distri la pensojn melankoliajn mi ree ekrigardis en unu fenestron; sed, malfeliĉe, mi forgesis, ke ili ĉiuj estas kovritaj de prujntavolo kaj tra ĝi oni povas vidi nenion. Tiam mian atenton altiris la du aliaj fenestroj. Iliaj kadroj estis tute kovritaj per iaj surskriboj kaj pentraĵoj malsagacaj, skribitaj krajone. Simile al arkeologo, trovinta skribaĵon sur muro ruinigita de idolsanktejo antikva, mi eklegis ilin kun scivoleco.

Super ĉio estis pentrita tombo kun kruco super ĝi; ĉirkaŭ tiu ĉi pentraĵo estis skribita: "La vojo neevitebla". Pli malsupre estis vidata pentraĵo de ĉerko; sur kies supro mi tralegis: "Mia loĝejo estonta"... En alia loko mi legis: *Memento mori!*. "La morto estas plej granda bono", "Vivi aŭ morti?..., ĉu mi vivas?" kaj similaj.

Sur la muro apud fenestro, per mano malsama ia optimisto pli lerte pentris du glasetojn kaj botelon, sur kiu estis skribita mallonga sed saĝa sentenco: "La konsolo en la vivmalĝojo".

Mian okupon interrompis la servisto, portanta temaŝinon.

– Ha, vi legas... – li parolis ridetante. Viaj antaŭuloj makuligis ĉiujn fenestrojn; sed vi ne maltrankviliĝu: printempe oni koloros la fenestrojn...

Mi respondis nenion. Ne gajaj pensoj amasiĝis en mia cerbo: mi bedaŭris mian ĵus lasitan lernejon kun pura ĉambreto bele tapetita, kun altaj fenestroj rigardantaj belan ĝardeneton.

Ektrinkinte unu glason da teo, mi kuŝiĝis en la liton, aŭskultante interparolon de mia veturigisto, kun la servanto.

– Tie ja estas la tombejo? – parolis la veturigisto, montrante per kapmovo la fenestrojn. Ĉu vi kutimis al najbaroj tie loĝantaj?

– Mi kutimis... Oni parolas, ke iafoje la mortintoj aperas super siaj tomboj; sed tio ĉi okazas malofte... Ili ja estas kvietaj; pli kvietaj ol la vivantoj.

– Nu, mi ne loĝus tie ĉi eĉ unu tagon. Malfeliĉaj instruistoj!... Por salajro malgranda ili devas loĝi sur tombejo, ĉiutage rigardi krucojn kaj nove elfositajn tombojn! Ĉu oni ne povus elekti alian, pli konvenan lokon por la lernejo?

– He, vi, stranguloj! ĉiuj mallaŭdas nian lernejon; ĉiuj timas la tombejon, tamen neniu ja evitos ĝin... Kompreneble, niaj instruistoj estas homoj junaj, ili amas amuzaĵojn... sed... plej ofte ili ankaŭ estas homoj kuraĝaj. Mi konas unu sinjoron; li estis ankaŭ ĉi-tiea instruisto... Nu! Dum li estis sobra li timis nenion; sed vespere, ĵus li revenis hejmen, ebria, li kriis al mi: "Onklo Dementi, mi timas! Iru, pasigu la nokton apud mi..." Li estis homo mirinda... bona. Sed unufoje vizitis lin unu mortinto... kaj post tiam li forlasis la instruistoficon kaj forveturis. Li loĝis ĉi tie ne pli longe ol duonjaron.

– Ĉu memafere la mortinto vizitis tiun ĉi instruiston? – mi demandis la maljunulon, viŝante malgrandajn gutojn de ŝvito malvarma tuj aperintajn sur mia frunto. – Ĝi estas tre interesa. Volu rakonti! Ĉu vi mem iam vidis *ilin*...

Mi leviĝis de la lito kaj sidiĝis apud li. La maljunulo ekrigardis min atente kaj, videble, traleginte en miaj okuloj la timon, kiu ĉirkaŭkaptis min, ruze ekridetis, iom klinis sian preskaŭ tute senharan kapon kaj diris:

– Ne! Sinjoro, mi vidis ilin neniam. La virinoj senlaboraj babilas multon, sed ĉu iu kredas ilin?...

Mi rimarkis, ke la maljunulo ruzas. Kredeble, mia malkuraĝeco hontinda ne forglitis de lia akra rigardo; tamen tiu ĉi demando ekinteresis min, mi decidis agi decideme.

– Ne timu, aminda! Mi ja estas kuraĝulo: mi timas nenion.

– Mi kredas. Tamen nun estas noktmezo... Similaj rakontoj estas senutilaj... hm... hm...

Li ektusis, enverŝis teon en mian glason kaj komencis:

– Antaŭ ses jaroj tie ĉi loĝis ankaŭ juna instruisto... hm... mi tute perdis la memoron. Mi forgesis lian nomon... nu, tamen mi diros ĝin al vi poste. Tiu ĉi instruisto estis bonanima, kora homo... Nu... Li ne timis la tombejon; kontraŭe, li amis nian lokon trankvilan. Dum horoj liberaj li amis promeni laŭ nia tombejo. Mi ankaŭ iafoje partoprenis en tiu ĉi promeno. Tiam mi ankaŭ ekamis tiun ĉi lokon pacan... La herbeto mola gaje rigardas ĉielon, kovratan de maldikaj nubetoj blukoloraj. Laŭ la arbetoj saltas birdetoj... belaj, malgrandaj birdetoj... Ie murmuras fonto ne vidata kaj de supre akompanas ĝin la kanto de alaŭdo... "Ĉu bone ĉi tie, maljunuleto?" – li parolis ofte al mi. Mi nenion respondis, nur ekbalancis per kapo anstataŭ respondo. Mi ja estas malklera, neinstruita vilaĝano... Mi ne povas interparoli kun sinjoro instruita... – Rigardu, – li parolis, – ĉirkaŭe ĉi tiujn monumentojn malĝojajn kaj naturon kiu ĉirkaŭas ilin. Tie malsupre estas morto kaj tie ĉi – la vivo... Kie aliloke oni povas lerni la lingvon, la naturon?..." Ho, li estis stranga, saĝa junulo... – daŭrigis la servisto post mallonge. – Mi estas maljunulo malsaĝa, perdinta memoron, prudenton... Nu, bonaj homoj, vi volu pardoni min, se, eble, mi ion forgesis, aŭ rakontis malsame, ol mia sinjoro mortinta...

– Ĉu li jam mortis?... – mi demandis.

– Li mortis... Li parolis: "La morto estas transiro de ĉi-tiea vivo malfeliĉa kaj

mallonga al vivo eterna senmalĝoja..." Ses jaroj jam pasis de tiam... jam unu kruco super lia tombo putriĝis... antaŭ hieraŭ mia nepo faris alian... Li estas ekslernanto lia. Nu, oni scias, ke infanoj estas kapablaj longe memori la bonon: liaj lernantoj estintaj – nun ili jam estas junuloj – eĉ ĝis nun ne povas ekrememori pri li sen larmoj...

Per la pugno maldika li elviŝis larmon sur sia vango.

– Mi, babilulo maljuna, eble, malhelpas al vi, sinjoro? – li demandis min. – Vi laciĝis pro la vojo... volu kuŝiĝi. Adiaŭ! Ĉu vi pasigos la nokton en mia ĉambreto? – li demandis la veturigiston.

Sed mi ne volis lasi la maljunulon, kiu prosperis akiri mian simpation de la unua renkonto kaj petis lin resti ankoraŭ ĉe mi. Sincere dirante, la nekutima proksimeco de tombejo ankaŭ multe timigis min. Sed mi ne volis montri min malkuraĝa kaj, malgraŭ la nokto, diris al la maljunulo jam konsoliĝinta:

– Maljunulo! – vi ruzas... Vi promesis rakonti al mi pri la mortinto vizitinta instruiston...

La maljunulo faris plej senkulpan vizaĝon kaj ekbalancis per kapo.

– Kara sinjoro!... ho, kara mia, pro Dio, ne kredu... Ĉu oni povas kredi al ĉia rakonto?... krom tio, li estis tiam ebria...

– Kiu estis ebria, ĉu la mortinto?... – demandis la veturigisto, kaj laŭte ekridis. La rido infektis min kaj poste la maljunulon. Baldaŭ la ĉambrarkaĵoj altaj estis skuataj de nia unuvoĉa ridego...

... – Li ĉiam estis enuanta dum vesperoj, – la maljunulo ekparolis post paŭzo longa. Li amis nek legadon, nek aliajn amuzaĵojn bonajn... Post vespermanĝo li ordinare aŭ kuŝis sur la lito, laŭtege kantante iajn kantojn gajajn, aŭ dormis... Li posedis voĉon bonegan... fortan... Mi aŭdis nenie voĉon similan... Nu! ĉar li estis homo saĝa... instruita – li bezonis homan societon. Oni scias, ke tie ĉi tute forestas homoj instruitaj... feliĉe, li ne estis fiera, li ne malestimis nin, vilaĝanojn malsaĝajn... Baldaŭ li prosperis konatiĝi kun ili. Tuj li iris ian vilaĝeton, ekzemple Koperje'on, aŭ Borok'on. Sendube vi rimarkis, ke vilaĝoj ĉirkaŭaj kuŝas proksime unu de alia... Niaj vilaĝanoj estas gastamaj! Ili ne lasas gaston malsata... ili kune kun la instruisto iom drinkadis brandon. Malfrue vespere, aŭ eĉ nokte li revenadis hejmen ebria. – He, maljunulo, donu la temaŝinon! – li kriadis, sidiĝante apud mi kaj rakontante siajn aventurojn, timante eniri sian ĉambron... Unufoje, tiam ja estis ia festo... ŝajne, dimanĉo... li, laŭ sia kutimo, foriris ien promeni, kaj mi hakis lignon. Mi estas malriĉa... Mi devas perlabori kopekon provizan por bezonoj neantaŭvideblaj... Tiam mi hakis la lignon de la pastro... lia dometo staras kontraŭ la preĝejo; eble, vi rimarkis ĝin... Tiam estis printempo. Ĉirkaŭ sesa horo vespere mi vidas: mia sinjoro revenas balanciĝanta... mi forĵetis la hakilon. Ĉu oni povas labori ekster la domo, se la sinjoro venas hejmen? Eble li volas trinki aŭ manĝi, mi devas prepari ĉion... – He, vi, pekulo, – li diris, – ĉu oni povas labori dum festo?... Preparu la temaŝinon! Estis ankoraŭ sufiĉe lume, kvankam la krepusko nerimarkeble malleviĝis de supre, kiam mi enportis la

temaŝinon... Post tio pasis ne pli ol duonhoro. Subite mi ekaŭdis laŭtan ekfrapon, sonoron de vitroj disbatataj kaj krion teruran. Dio indulgu nin!... Kio okazis?... Mi enkuris ĉi tien kaj... kaj vidas: l'instruisto palvizaĝa staras en mezo de l'ĉambro... sur la planko kuŝas amase disbatitaj vitroj kaj rompaĵoj de jen tiu ĉi fenestrokadro... Li ekvidis min kaj ekkriis tiom severe, ke mi eĉ timis... tiel li neniam kriis kaj insultis min. "Fripono, ĉu vi estas lernejgardanto?... Ĉu vi dormas, besto maljuna?... Se oni mortigos min, do vi ankaŭ senmove sidos en via nesto malbenita..." Mi provis trankviligi lin, sed, malgraŭ miaj vortoj, li longe daŭrigis insultadon. Nur post longe mi komprenis el liaj vortoj, ke li vidis... mortinton intencintan eniri lian ĉambron tra fenestro. Kiam li ebria trinkis teon, li ekvidis subite ian ombron blankan ekglitintan apud la fenestro malfermita. Post iom da tempo ĝi ree ekglitis kaj la instruisto mirinta ekvidis klare la mortinton en kitelo blanka intencantan eniri la ĉambron. L'instruisto minacis, sed vane: la mortinto persiste sin movis tra la fenestro. Tiam la instruisto uzis lastan rimedon por forpeli la arogantulon: li ekkaptis plenan glason da bolaĵo kaj ĵetis ĝin en la vizaĝon mem de la mortinto. Kompreneble, li ne sukcesis vundi la mortinton, ĉar li estis nur imagita, sed disbatis la fenestrokadron kaj ĝiajn vitrojn... He, sinjoro mia, ŝajne, vi tute ne dormos hodiaŭ! – li diris rimarkinte mian ekscitecon. – Mia rakonto malsaĝa nur dis...

Subita ekfrapo je la sama fenestro trarompis lian parolon.

Mi ektremis, la sango metiĝis en la kapon; la rakontinto paliĝis kaj la veturigisto forsaltis de sia loko kaj, murmuretante la preĝon por forigo de malbonspirito, almetiĝis al mi.

Kredeble la fenestron ekfrapis nebulo aŭ vento ekŝancelis la vitron, tamen tiu ĉi ekfrapo subita kaŭzis grandan konfuzaĵon. La maljunulo rifuziĝis fini sian rakonton, – ni ne estis kapablaj aŭskulti ĝin. Ni triope faris konsiliĝon rilate al pasigo de l'nokto kaj unuanime decidis pasigi ĝin kune en sama ĉambro.

Post kvaronhoro la lampo jam estis estingita kaj mi, kuŝante en la lito, klare aŭdis raŭkan ronkadon de la maljunulo. Li estis feliĉa, sed la veturigisto longe turniĝadis de unu flanko alian, murmuretante preĝojn, – kaj mi ĝis mateno mem kuŝis sendorme. Kelkfoje mi ekdormetis, sed tuj antaŭ miaj okuloj aperadis jen alta, bluokula instruisto kun pala vizaĝo, promenanta inter tomboj, jen l'aventurulo ebria, jen figuro de la mortinto mem.

Pasis du semajnoj – dek kvar enuaj vintraj vesperoj. Plu mi ne povis loĝi en tiu ĉi "malliberejo". Mi, fine, komprenis, ke ĉiu homo, loĝanta en tiu ĉi loĝejo, havas antaŭ si nur du vojojn: aŭ freneziĝi kaj, senĉese pensante pri la morto, iradi laŭ la tombejo, kalkulante la krucojn supertombajn kaj rigardante tombojn freŝe fositajn, – aŭ superverŝi l'enuon en izoleco per brando... Sed tiuj ĉi vojoj ambaŭ povas kuniĝi, ĉar ili ambaŭ kondukas al sama celo...

Longe konsiderinte ĉion, mi lasis la lernejon. Estis frosta mateno. El ĉiuj forntuboj estis leviĝanta nigra fumo densa, ne disfluiĝanta en l'aero frosta. Apud la perono de la lernejo ree staris paro da ĉevaloj jungita al glitveturilo. Ĉiuj miaj

kestoj jam kuŝis en ĝi. Ekpreminte la manon de la maljuna servisto, mi rapide sidiĝis, fermis okulojn kaj ordonis peli la ĉevalojn. Al miaj oreloj alflugis la sonorado de la ŝlosilaro en manoj de la servisto. Rerigardante, mi ekvidis lin plorantan.

– Nu, maljunulo, vi estas malfeliĉa... Atendu nun novan dekkvaran instruiston!" parolis mi pense, kaŝante vizaĝon en la kolumon felan de la vojpelto.

*El **Sep rakontoj**. Kolekto de "Lingvo Internacia". Presa Esperantista Societo, Parizo 1906, p. 1-10.*

A. E. Styler

EN LA DOLOMITOJ

Alte, super lanugaj nubetoj kaj malluma pinaro, la pintaj suproj de la Dolomitoj lumis kvazaŭ hejtitaj ĝis ruĝe per interna fajrego... De kiom da jarmiloj la suno jam ruĝigas vespere tiun palacon de la Plej Alta? Kiom da fojoj la ombraj montriloj solene ĉirkaŭglitas sur tiu monta sunhorloĝo?... Fumante cigaredon, mi dronis en revoj, fikse rigardante la montojn. Malsupre, sur la placo de la vilaĝo, aŭstria militista muzikistaro ludis dolĉajn ariojn. Jam, la ruĝaj pintoj iom post iom paliĝis kaj fine estingiĝis. Malvarma krepuska venteto ekblovis, forpelante mian revon.

Subite, mi sentis min "sen patrujo, sen amikoj, melankolia kaj korpremata." Eble, ĉiu soleca migranto konas iafoje tian malgajan senton.

Mi subiris en la vilaĝon, por regajigi min inter miaj samuloj. Ĉirkaŭ la muzikistoj sin trovas granda aŭdantaro, plejmulte Germanoj kaj Italoj. Bosnianoj, kiuj similas al sovaĝaj Turkoj, vagadas en la amaso, vendante montajn bastonojn, pipojn kaj aliajn bagatelojn.

Soldatoj, malaltkreskaj kaj brunvizaĝaj, staras en senmova grupo; elegantaj oficiroj, kun senmakula helgriza pantalono, promenas serioze kaj indece. Ilia kasko similas tiun de niaj anglaj militistoj de antaŭ jarcento, kiam ni bataladis kontraŭ Napoleono.

Sur la hotelteraso babiladas blondaj Germaninoj kaj brunaj Italinoj. Pentrindaj Tirolanoj flegme fumas longajn pipojn. Mi scivoleme observas la flirtantajn ĉapelplumojn, helverdan ŝelkon, mallongan pantaloneton, nudajn genuojn, fortikajn krurojn kaj grandegajn botojn de la montaranoj. Kiom da bonaj momentoj mi jam pasigis inter la honestaj bravaj Tirolanoj! Biciklistoj, kun kruda kaj lacigita mieno, memorigas al mi la vagadantan Hebreon; eluzite kaj ĉifite, ili ja ŝajnas vojaĝadi de jarcentoj.

La postan tagon, mi faris grandan ekskurson, kiu eble, sen iom da bonŝanco, estus fininta mian vivon... Tiam mi ne konis tre bone la montojn. Mi estis malsperta kaj tro memfida; eĉ mi ne komprenis, ke subita veterŝanĝo povas aliformigi facilan monton je manĝega monstro.

Tiun tagon, mi kunportis nek manĝaĵon, nek trinkaĵon, nek mantelon, ĉar mi tro fidis al la belega vetero.

Kiel ĉio ridetis en la pura matena aero! En vilaĝeto, sonoriloj pacige kantis el turo de beleta preĝejo alte sur ŝtonego sidanta; kaprinoj malrapide suriris la herbejojn; sonoriletoj ĥore tintis, kaj petolaj kapridoj forlasis la longan vicon por manĝeti ian montan floron. Tia estas la botaniko de la kapridoj.

La tegmentaj ŝindoj de la dometoj malseke rebrilis, kiel fiŝaj skvamoj. Ŝercante kun infanoj, paroladante kun plenaĝuloj, mi provis la lingvan diversecon de la aŭstria lando. Sed preskaŭ ĉiuj, ĉu Germanoj, ĉu italesimilaj Ladinoj, ĉu Slavoj parolis plimalpli la germanan lingvon.

Mi tagmanĝis en arbara hoteleto kune kun afabla sinjoro kaj liaj du filoj, belaj inteligentaj gimnazianoj. Dum la manĝado mi diris ŝerce: "Kiom da hebreaj nazoj ĉe tiuj ĉi tabloj!"

"Jes, kompreneble," respondis seke la sinjoro, "ĉar estas tie ĉi multe da Hebreoj." Poste, li multe demandis pri la stato de la hebrea vivo en Anglujo, kaj lia scivolo estis tute natura, ĉar li estis mem Hebreo! Oni devas paroli tre singarde en tiu ĉi diversgenta lando.

Pli supre, en la arbaro, mi ripozadis sub la pinoj kaj ekbabiladis kun aro da germanaj vojaĝantoj. La neevitebla diskuto pri politikaj demandoj kontraŭ mia volo enŝoviĝis; kaj baldaŭ komenciĝis komika vortbatalo pri la karaktero de niaj regnestroj kaj ŝtatistoj.

Sed la sinjorinoj, pli saĝaj ol ni, ne multe ŝatis la dornajn politikajn disputojn. Bela diketa blondulino demandis al mi scivoleme: "Sed, diru al mi, kiel la Anglinoj faras por esti ĉiam tiel maldikaj."

Bedaŭrinde, mi ne povis sciigi ŝin pri la beligaj procedoj de miaj karaj samlandaninoj.

Baldaŭ mi atingis mirindan lagon, ĉirkaŭatan de altegaj, turformaj suproj. Mi ne kuraĝas priskribi la diversajn nuancojn kaj multeforman belecon de tiu pejzaĝo.

Mi restadis la tutan posttagmezon sur la laga bordo, fumante, trinketante kafon kaj babilante kun Germanoj. Iu tedulo volis nepre ekscii ĉu la angla Reĝino (ne la nuna) trinkas viskion! Grava internacia demando!

Poste, tre malfrue, mi ekmarŝis returnen. Malsaĝa projekto ekprenis min. Mi volis eltrovi novan vojon, kiu ŝajnis al mi facilega, sed montriĝis tre danĝera. Eble mi malbone komprenis la sciigojn, kiujn fortega arbara knabino donis al mi pri la vojo. Eble mi estis entuziasmigata per la stranga silenta pinarbaro. Ĉiuokaze, ruĝmarkitaj ŝtonegoj ŝajnis klare difini la vojon kaj delogis min ĉiam pli alten en la plej sanktan sanktejon de la montoj. Nenia domo, nenia homo!... Ie, malsupre, malproksime, hakilo batis je regulaj intertempoj, sed mallaŭte, delikate, kiel hakileto de malgrandega gnomo.

Nun la lasta ruĝa signilo kondukis min al mistera pordeto en ligna krado. Barilo kaj pordo estis rompitaj, disfalintaj, ŝimiĝintaj. Apud la pordo, inter muskaj ŝtonegoj, altiĝis granda ligna kruco kun statueto de la Krucumito. Ĉio ŝajnis treege antikva, ĉio estis diverse kolorita per likenoj, grizaj, verdaj, ruĝaj kaj flavaj. La malnova kruco klinis sin kvazaŭ lacigita.

Mi malfermis la pordeton kaj eniris en ŝtonan dezerton. Supre, inter blankaj nubetoj, mi ekvidis la malaltaĵon inter du turformaj suproj, la celon de mia malprudenta suprenirado.

Jen mi rampis inter rokoj kaj fluegoj. Ne estis plu vojo, kaj la krutaĵo fariĝis ĉiam pli malfacila. Iafoje mi devis min levi per helpo de malgranda pino aŭ monta arbeto...

Jen la rekompenco de ĉiuj penoj kaj klopodoj. La nekredebla miriga Dolomitomondo etendas sin antaŭ mi... Pentristo, metu tion en bildon, kaj oni diros: "Nenaturaj nuancoj, nevera imagaĵo!"... Verkisto, priskribu tion, kaj la kritikisto diros malŝate: "Vortoj, vortoj, nur vortoj!"

Mi flugas spirite de turo al turo, de kastelo al kastelo. Jes, tio ne estas montoj, sed pliĝuste turoj, kasteloj, magiaj palacoj de gigantoj; kaj la ĉiakolora lago, je kelkmiloj da metroj malsupre, estas la kastelfoso.

Mi forgesas pri ĉiuj riskoj, mi vidas nur la ĉiumomente ŝanĝiĝantan pejzaĝon. Nun la helaj koloroj mallumiĝas, la gloraj oraj palacoj aliformiĝas en fortikejon de demonoj, kaj efektive, diablaj voĉoj ekkriegas en la vento. Pezaj gutoj frapadas mian vizaĝon; jen fulmotondro diskrevas.

Feliĉe, mi trovis malgrandan kavernon, apenaŭ sufiĉe ampleksan por ŝirmi min kontraŭ la pluvego. Kuŝante, mi elrigardis el la ŝtona faŭko, fumante sennombrajn cigaredojn por pasigi la tempon. Ĉiu tondrobato, kiel martelego, tremigis la murojn de mia stranga rifuĝejo. La montoj sulkigis la brovojn, kaj surmetis plej mallumajn, terurajn vestojn. Grizaj nuboj ĉirkaŭvolvis min, kaj fajraj serpentoj kuregis ĉien.

Ĉu mi timis? Tute ne. Mi nur rigardegis, ensorĉite kaj ekscitite... Poste, jes, mi multe pripensis mian riskemon, multe meditis pri vojaĝantoj perditaj en la montoj, sen ia postsigno.

Se migranto falas en monta dezerto kaj nur elartikigas la piedon, li nepre mortos. Li nur povos sin treni malespere, ĝis kiam la malsato kaj malvarmo mortigos lin.

Fine, malgraŭ la pluvego, mi penis daŭrigi la vojaĝon. Post nelonge, miaj malsekaj vestoj algluiĝis al la membroj, kaj multe malhelpis min. La ŝtonegoj, malfortikaj pro la tero tramalsekigita, rulfalis sub mia piedo, kiel malgranda lavango.

Alveninte al la supro, mi nur vidis antaŭ mi – glitigan, preskaŭ vertikalan krutaĵon. Malafabla, soleca, timiga pejzaĝo! Malsupre, la unuaj pinoj estis tiel malproksime en la profundaĵo, ke ili ŝajnis nur ludiloj. Mi vidis nenian signon de homa vivo, nenian loĝejon. Nur ruĝa suno malleviĝis okcidenten, nuboj rampadis inter senfundaĵoj, kaj ŝaŭmantaj fluegoj sin ĵetis kun murmurego de roko al roko.

Kion fari? Mi ne volis akcepti malvenkon. Mi komencis malsupreniri, singarde rampante de unu breteto al alia. Sed, ĉirkaŭ dudek metrojn sube, mi trovis min kvazaŭ en la aero, sur nazego de la krutaĵo.

Mi tute komprenis, ke la morto estas tutproksima al mi, kaj ke mi devas kolekti ĉiujn fortojn por reveni al la supro. Sed, mi estis tiel malsata, malvarma, kaj enpenetrita de la pluvego... Kiel mi reatingis la supron, ne ekglitinte unu

fojon? Mi ne scias. Mi nur scias, ke unu malfirma paŝo min estus ĵetinta en la faŭkon de l' Morto, kiu min pacience atendis malsupre.

Mi reatingis la supron. Mi ree trairis la vojon tra la stranga ŝtondezerto; mi ekglitis kelkafoje kaj rompis la pinton de mia bastonego; la ujo de mia lorneto estis malseka kaj mola kiel kaĉo; miaj vestoj estis disŝiritaj, kaj mia korpo ellacigita.

Jen la mistera pordo, la ŝimiĝinta kruco, la kruda, antikva, kortuŝanta figuro de l' Krucumito... Mi sidiĝis sur ŝtono kaj rigardis lin... Kiam oni venis tien ĉi la lastan fojon? Ĉu la kruco kaj barilo difinas la limon de l' arbaro? Kaj malpermesas eniron en la malbenitan ŝtondezerton, kiu kondukas al danĝero kaj morto? Ĉu la griza kruco markas la lokon, kie, antaŭ multe, multe da jaroj, iu malfeliĉulo trovis la morton? Ĉu la putrinta verda tabulo iam entenis surskribon: Preĝu por ripozo de l' animo de... ?

Lace, penseme, mi eniris la arbaron, perdis la vojeton en krepusko, kaj post kelkaj minutoj mi troviĝis en nokta mallumo. "Haltu! alie vi rulfalos en profundaĵon."

Pasigi la nokton en arbaro... tio ne estas tiel agrabla, kiel en komforta hotelo. Tamen, mi kuŝiĝis sub grandega pino, kaj malgraŭ ĉio mi dormis sufiĉe bone ĝis tagiĝo, escepte de mallonga vekiĝo meze de la nokto, dum kiu mi varmigis min per gimnastiko.

Tuj kiam la taglumo ĝin ebligis, mi levis min kaj esploris la senvojan labirinton. Post longa erarvagado, mi trovis min en rava natura parko, kie mi povis paŝi sendanĝere sur delikata musko kaj herbo. La belaj floroj multe plaĉis al mi post la severa melankolia dezerto; kaj la magia matenlumo post la nokta arbaro!

En kruda monta vilaĝeto, bona maljunulino proponis al mi por matenmanĝo nigran panon, kaprinan lakton kaj sukeron. Tio estis pli bongusta ol multekosta festeno.

Survoje, kelkaj fulmotondroj kun pluvego persekutis min, kvazaŭ la montaj spiritoj volus ankoraŭ puni mian invadon de sia sanktejo.

Alveninte al mia hotelo, mi alivestis min en noktaj vestoj, donis al la afabla Rezi miajn difektitajn vestojn kaj malsekan tolaĵon; manĝegis duan matenmanĝon, kaj fine, eltrinkis fortan glason (ne glaseton) da stranga hungara likvoro, kiu preskaŭ haltigis mian spirmekanismon. Rezi forgesis sian kutiman konvenecon, kaj laŭte ridegis. Poste, mi enlitiĝis, ekdormis; kaj, mirinde, mi vekiĝis post mi ne scias kiom da horoj, sen malvarmumo. Estas ja specialaj dioj por infanoj, drinkuloj, kaj – maltimuloj.

*El **En la montoj**. British Esperanto Association, Londono 1913, p. 7-12.*

Julio Baghy

KIEL MIHOK INSTRUIS ANGLE

Leŭtenanto Petroff singarde, iom post iom, ŝovis la kapon el sub la lana kovrilo, ĉirkaŭrigardis. Hela taglumo en la ĉambro. Ekstere sennuba ĉielo. Verŝajne frosto. Li rigardis la termometron. La enĉambra temperaturo estis dekkvin gradoj super la nulo.

– Brrr! Nur dekkvin gradoj... Ekstere estas certe minus dudek kvin...

Aperis antaŭ li la ekzercejo. Liaj dentoj ekklaketis. Li ĵetis rigardon al la senfajra forno, alian rigardon al la poŝhorloĝo, vigle tiktakanta sur la apudlita ŝranketo kaj poste, kovrante sin per la lantukego li kuntiriĝis kiel piktuŝita raŭpo sub brasikfolio.

– Ankoraŭ tro frue... estus bone dormeti iom! – kaj por provi tion li forte fermis la okulojn.

Senbrue, kiel la ombro, ŝtelis sin en la ĉambron lia servisto Miĥaelo Mihok, pala stangostatura militkaptito. Sub la dekstra brako li premis al si faskon da ligno, sub la maldekstra – pajlaĵon en malnova gazeto, kaj en la manoj li tenis grandan samovaron. Li penadis paŝadi laŭeble senbrue kaj piedpinte. Ĉe ĉiu paŝknaro, glastinto, kulerfalo, seĝrenverso li time kaj respektplene palpebrumis al la lito, kie sub la kovrilo, kvazaŭ minace, montetiĝis la grasa kaj nenomebla parto de la sinjoro leŭtenanto.

Miĥaelo Mihok jam laŭnature estis timema, servema kaj ĝentila. La servemon kaj ĝentilecon li bone profitigis en sia civila profesio. Li estis tajlorlaboristo en provinca urbeto. Sed li ankaŭ estis timema. Precipe li timis leŭtenanton Petroff, kiun li konis nur de tri tagoj. Ho, kiaj tri tagoj! Vera malfeliĉo, ke oni komandis lin ĉi tien! Escepte kelkajn frazojn li ne komprenis la rusan lingvon. Bonvole li klopodis plenumi la dezirojn, sed la timo ofte paralizis liajn kapablojn. Ne mirinde, ĉar leŭtenanto Petroff estis fortika, grasa, bizonstatura kaj havis leonvoĉon. Certe li devas esti kruela tigro – pensis Mihok.

Ĉiumatene kaj ĉiuvespere ili havis konversacion. Tiaj eĉ pli firmigis lian opinion. Petroff klarigis ĉion per man- kaj piedgestoj, per mimiko kaj diversaj akrobataĵoj por komprenigi sin kaj dume aŭdigis leonvoĉon. Mihok streĉis sian atenton, igis ekfunkcii sian etan fantazion por diveni la signifojn de tiuj misteraj manovroj, kiujn faris kun plena energio kaj fervoro la leŭtenanta moŝto. Tamen sinsekvaj miskomprenoj maldolĉigis lian vivon. Nu kaj tiuj turmentaj kapdoloroj, kiuj sekvis la atentostreĉon!? Ankaŭ tio estis iom pli ol nenio.

Sed kial ne lernis Mihok la rusan lingvon? Pro du kaŭzoj. Unue, ĝis nun li *nur vidis* la rusojn, sed *ne vivis* inter ili; due, ĉar li vere ne havis lingvistan talenton.

Krom tiuj du estis ankoraŭ tria. Li estis revemulo. Tiu ĉi revemo instigis lin lerni Esperanton. Oni instruis tion en la militkaptitejo. Li do komencis kaj finlernis ĝin. Oni ne povu diri hejme, ke dum longa foresto li ne profitis ion pli utilan ol tiu malbenita nazkataro, kiun li nepetite ricevis en la subteraj barakoj de Tockeo. Tiu ĉi lingvoscio estis triumfo por li, ĉar malgraŭ penoj kaj elspezoj li ne kapablis lerni fremdan lingvon. La mono ĉiam formigris kaj lia cerbo nur nigris. Sed nun eĉ lia revemo havis freŝan nutraĵon. Li posedas lingvon, kiu egalvaloras ĉiujn, ĉar ĝi estas parolata ĉie, kvankam ne de ĉiu. Sed tio estas pretera bagatelaĵo. Li sentis sin grava persono, pioniro de kulturmovado kaj en sia revo li jam fondis la "In-Tu-As-Es-Ta-He"-n (Internacia Tutmonda Asocio de Esperantistaj Tajlorhelpantoj) kun speciala insigno: verda stelo, trapikita per pinglo kaj kudrilo. Li estos la prezidanto kaj tiam li provos sendanĝere svati la manojn de Rozinjo. Ho Rozinjo, Rozinjo, belega modpupforma filino de kruela majstro, kiu ofte mezuris la ulnon al lia dorso dum la lernojaroj, se vi konjektus la dolĉan sekreton de Mihok, tiam vi certe ne turmentus la patran koron per ĉiutaga "neniu edzinigas min... mi devas fariĝi maljuna fraŭlino kun papago kaj kun dekduo da katetoj". Pri la kruela majstro, kaj precipe pri la ulno subite venis ideo, kiun Mihok dorlote vartis en si. Li konsideris sin martiro de tiu ĉi movado. Ĉu ne estis martireco suferi vangofrapojn de kolonelo pro la kvinpinta stelo? Certe jes. La vangofrapoj koncernis verŝajne la *kvinpinton* kaj ne la *koloron*, sed tiaj bagateloj ne gravas. Martiro estos la edzo de la belega modpupforma Rozinjo... Tia vireto estis Miĥaelo Mihok.

Sed nun la neforpelebla realeco devigis lin servi ĉe tiu ĉi bizonstatura leonvoĉa leŭtenanto, kiu ĉiutage torturas lin per misteraj gestoj, grimacoj, nekompreneblaj akrobataĵoj. Hja, tia estas la sorto!

Li faris fajron en la forno, starigis la samovaron antaŭ ĝin, alĝustigis tubeton, kies finon li metis en la aperturon de la forno. Tie estis forta aertiro. Poste li pretigis ĉion por la sinlavado de la leŭtenanta moŝto; malplenan sitelon, sapon kaj glason da akvo.

Dume leŭtenanto Petroff transdonis sin al la kutima frumatena meditado pri la vivo, pri variado de ŝancoj. Antaŭ unu jaro en Petrograd li fiere paradis en sia nova uniformo sub fenestroj de bela vidvino de riĉa komercisto. Li havis esperon kaj imponajn pagonojn, sed venis la revolucio kaj la vidvinon kune kun la kapitalo edzinigis prudenta komisaro. Liaj esperoj kaj pagonoj falis en la koton kaj la sinsekvaj bataloj pelis lin ĝis la ekstrema oriento. La pagonojn li denove havis, sed kia vivo?! Brrr! Li estas ja pacema kiel... kiel tajloreto kaj tamen ĉi tie... en la "inĝeniera bataliono..." Ĉe tiu vorto li ekmiris. Kial oni nomas ĝin "inĝeniera"? Eĉ unu inĝeniero ne troviĝas inter la oficiroj. Profesie li estas ja simpla dentisto, eĉ ne doktoro... la kapitano estas notario, la... Eble la kolonelo? Ne! Tute ne! Li havas kolbasfabrikon en Udinsk... Kial "bataliono"? Tridek ses oficiroj, kunpelitaj de revoluciaj ventegoj, jam estas bataliono? La soldataro konsistas el kvin dungitaj ĥinoj. Ili flegas ok mizerajn ĉevalojn en la staloj kaj

ĉiumatene tiras du kanonojn sur la ekzercejon. Krome estas pli ol kvardek komanditaj militkaptitoj por servi ilin kaj kuiri nemanĝeblaĵojn por la oficiraj stomakoj... Bah, kia vivo? Pli profite estus eltiradi la dentojn de pacemaj veantoj en Petrograd ol ĉi tie tremadi por la propra vivo kaj ĉiutage prepariĝi por subitaj atakoj de bolŝevikoj... Kion fari? Jes, rifuĝi, sed kiel kaj kien?... Kaj ĉi tiuj dungitaj ĥinoj kaj komanditaj militkaptitoj eble...

Mihok plenumis sian taskon. Ĉio estis en ordo. Li paŝis al la lito, delikate tuŝis la leŭtenantan moŝton. Delikate, sed ne en feliĉa momento. La vigla fantazio de Petroff ĵus skizis teruran situacion, en kiu la ruzaj ĥinoj kun la militkaptitoj konspiris kontraŭ la oficiroj. Kiam Mihok ektuŝis lin, ĝuste en tiu momento li vidis sin trapikita de sia servisto. La tuŝon li sentis kaj por sin defendi kaptante la revolveron el sub la kusenoj li salte leviĝis kun domskua krio. La malfeliĉa Mihok pro teruro faligis la tason da teo, mortpale humile palpebrumis jen al la danĝera ilo, tenata kontraŭ lia brusto, jen al la terurtaŭzita mieno de la leŭtenanto.

Longminuta paŭzo. Petroff vidante la tremantan kapon de Mihok tuj embarasiĝis. Li sentis honton kaj, por kaŝi ĝin, laŭte ekridis. Mihok pensante, ke ridi estas devo, kiam la mastro ridas, ankaŭ li altrudis mucidan rideton je siaj kurbiĝintaj lipoj. Lia mieno similis al tiu de citron-glutanto, kiu volas ŝajnigi, ke la citrono estas mieldolĉa. Petroff nun plengorĝe kaj sincere ridegis, ĵetis la revolveron sur la liton, rigardis la termometron. Ĝi montris dudek kvin gradojn.

– *Haroŝo!* (Bone!) – li diris kaj enlitiĝis.

Mihok kun tremantaj manoj kolektis la rompitaĵojn, zorge forbalais la splitojn, por ke ili ne vundu la piedojn de la leŭtenanta moŝto, pretigis teon en la glason kaj el respektinda distanco proponis ĝin.

– *Gospodin... eto ĉaj... ĉaj... pitj!* (Sinjoro, jen, teo, tetrinku!).

– *Nu, haroŝo... blagodarju vas...* (Nu, bone, mi dankas).

Petroff trinkis, Mihok staris ĉe la forno. Kun premegita koro li pripensis la ĵus forpasintan teruraĵon. Lia timemo vestis la estontecon en nigran funebron, ĉar li estis nun tute konvinkita, ke la sinjoro leŭtenanto estas tigro.

Dum la tetrinko Petroff projektis kelkajn planojn por la rifuĝo. Malagrable estus kuŝi traborite per kuglo, tiradi dentojn estus pli prudente. El la planoj taŭgis neniu. Hazarde lia rigardo trafis Mihok-on, dancanta je unu piedo al la alia kaj hundokule observante liajn movojn, kaj nova ideo venis, facile efektivigebla. Onidire la militkaptitoj baldaŭ hejmeniros. Estus bone vojaĝi kun ili en Eŭropon. Bedaŭrinde krom la rusa li ne konas alian lingvon. Nu li devas lerni! Sed de kiu? Memkompreneble de Mihok. Li estas eŭropano, aspektas inteligenta, li *nepre* devas scii kelkajn lingvojn. Tiu ĉi *nepre* tuj fariĝis lia fiksa ideo.

– *Herr Mihok... govoritje pa germanski?* (Sinjoro Mihok, ĉu vi parolas germane?) – li komencis leonvoĉe.

Mihok ektremis. Li komprenis nenion krom la vorto "germanski". Verŝajne la leŭtenanta moŝto bonvolis interesiĝi *ĉu li vidis jam germanon?* Li vidis ja.

Kion fari? Eble ne estas kulpo vidi germanon kaj humiltone li informis la tigronaturan sinjoron.

– *Da!* (Jes!)

– *Nu haroŝo... i pa francuski?* (Nu bone kaj france?)

Mihok iom pripensis la demandon, esploris en siaj memoroj. Kie li vidis francon? Ah, jes! En la modgazetoj ĉe lia majstro. Certe tiuj bildoj figuris francojn, ĉar la gazeto venis el Parizo.

– *Da, da!* – li respondis post ioma konsidero.

– *I toĵe pa angliski?* (Kaj ankaŭ angle?)

Mihok embarasiĝis. Nun jam li tute ne komprenis la leŭtenantan moŝton, sed por daŭra pripensado li ne havis tempon, ĉar okuloj kvazaŭ trapikis lin. Li rapidis do respondi.

– *Dadada!*

– *Ĉto dadada?* (Kio jesjesjes?)

– *Niĉevo!* (Nenio!)

– *Ĉto niĉevo?*

– *Niĉevo dadadada njet!* (Nenio jesjesjesjes ne!)

La sensenca respondo pruvis, ke Mihok miskomprenis lin, sed tamen Petroff pensis, ke eŭropano *nepre* devas paroli tiujn lingvojn. Mihok aspektas inteligenta, estas eŭropano, li do parolas tiujn lingvojn. Petroff provis alimaniere komprenigi sin. Li montradis al diversaj objektoj de la ĉambro kaj leonvoĉe demandis, pensante, ke la tono plialtigita helpas en la interpretado.

– *Pa germanski... pa francuski... pa angliski?*

Mihok iom post iom ekkomprenis pri kio temas kaj tiam elbalbutis la lastan frazon de sia rusa lingvoprovizo.

– *Ja nje znaju!* (Mi ne scias!)

Leŭtenanto Petroff ne volis kredi je siaj oreloj, eble li malbone aŭdis. La konsterniĝo kvazaŭ tondris en lia voĉo.

– *Ĉto vi nje znajtje?* (Kion vi ne scias?)

Pizograndaj ŝvitgutoj aperis ĉe la tempioj de Mihok. Li pensis, ke tiu ĉi terura homo certe mortpafos lin, se li ne scias ĉion, kio estas postulata. La malesperiga situacio donis al li genian ideon, kiu savos lian vivon almenaŭ por la momento. Kiam Petroff persistis plu en montrado kaj demandado, volante scii germane la vorton *seĝo* tiam li senhezite respondis.

– Das seĝungen.

– *Pa francuski?*

– Le seĵ.

– *I pa angliski?*

– The siĝ.

Petroff estis kontenta, sed por tute konvinkiĝi li komencis novan provon montrante tra la fenestro al tureto, kiu staris sur la ekzercejo de la urba fajrobrigado.

– *Nu, Herr Mihok, pa germanski?*
– Der turung.
– *Pa francuski?*
– La Eiffel.
– *Pa angliski?*
– Krevu tuj, se mi scias! – eliĝis la amareco el Mihok.
– Krevutuj... *Da, da, da... oĉĉĉen interesni* (tre interese!)... Krevutuj...

La apetito de Petroff ĉiumomente pliiĝis por la fremdaj lingvoj. Li decidis formanĝi ilin. Per gestoj, grimacoj kaj akrobataĵoj li tuj klarigis al Mihok, ke li devos ĉe ĉiu sunleviĝo preni libron kaj instrui lin, kaj Mihok komprenis, ke li devas la sunon forŝteli de la ĉielo, meti ĝin en la Biblion kaj per la Sankta Libro li devos kelkfoje bati la kapon de la leŭtenanta moŝto. Sed kiel li kuraĝus fari tion? Bati la kapon de la sinjoro leŭtenanto?!

Petroff ellitiĝis, lavis sin per plenbuŝo da akvo kaj post la finvestado li amike frapetadis la ŝultrojn de Mihok, kiu preskaŭ terenfalis pro tiu ĉi intimaĵo. Kiam Petroff estis ekster la domo, li surgenue, kiel bona katoliko, promesis dekduon da kandeloj al Sankta Antonio, se li forkondukos lin sana kaj nekripligita el la manoj de tiu ĉi tigronatura sinjoro.

La tagoj pasis. Ĉiu mateno alportis sian kvarlingvan torturon. Petroff demandis, Mihok respondis kaj ĉe la fino li promesis ĉiam unu dekduon da kandeloj.

Iun tagon Petroff surprizis lin, ke li decidis lerni nur la anglan lingvon kaj li jam aĉetis kajeron, krajonon por noti ĉion necesan. Mihok sentis batadi la koron en sia gorĝo. Kion fari? Ĝis nun estis facile, ĉar la leŭtenanta moŝto nenion notis kaj forgesis ĉion ĝis la alia mateno. La kajero kaj krajono malebligas la devigatan trompon. Li decidis konfesi, ke lia angla scio egalas la nulon, sed en la lasta momento rigardante la bizonstaturan leŭtenanton li rememoris pri la revolvero kaj rezignis. Venu, kio devas veni! Ankoraŭ kelkaj funtoj da kandeloj pli aŭ malpli al Sankta Antonio ne multon diferencos kaj li sisteme komencis instrui *Esperanton* nomante ĝin *angla* lingvo.

Petroff montriĝis entuziasma anglofilo. Li diligente lernis ĉie: en la kazerno, sur la ekzercejo, en la oficira manĝejo, en la intima ĉambreto de... sed tio ne apartenas al tiu ĉi historio.

Foje dum promeno li rimarkis ilustritan revuon, kuŝantan sur la trotuaro. Kelkaj ĉifitaj folioj de la malnova "The London News". La titolo frapis lian atenton.

– Londono estas metropolo en Anglujo – li komencis konkludadi – tio estas certa. Nun ĉar la titolo diras "London", pli ol verŝajne la gazeto venis el London kaj se ĝi venis el London, sekve ĝi estas angla gazeto. Nu, ni kontrolu nin!

Li levis la foliojn, singarde glatigis ilin kaj provis legi kelkajn liniojn. Li ne komprenis. Iom ekscitite li rigardis ĉiujn paĝojn kun la espero, ke li trovos almenaŭ unu kompreneblan frazeton. Ne, ne kaj ne! Pro diablo, kiel povas okazi, ke eĉ vorteton li ne komprenis.

Konsternite li rapidis hejmen. Certe Mihok povos klarigi la kialon. Mihok estis puriganta liajn botojn kaj silente malbenadis la ciron, kiu bezonas tiom da kraĉoj. En Eŭropo oni purigas botojn per lakkremo kaj ne devas elsputadi la pulmon por fari la botojn spegulbrilaj. Petroff ekhaltis antaŭ li, iom hezitis kaj fine metis la foliojn antaŭ la nazon de Mihok.

– Kijo estas tijo ĉi?

Mihok iom indiferente rigardis la foliojn.

– Verŝajne gazeto.

Petroff eksplodis.

– Nje verŝajnje, sed tutje certje... Sed kija, dijru Mihok, kija gazeto?

Mihok eklevis la ŝultrojn, gapis al la folioj, kiujn Petroff minace svingis antaŭ lia nazo.

– Mi ne scias, – konfesis sincere Mihok.

– Vi nje scijas, Mihok, nje scijas? – kriis Petroff kaj kunfrapis la manojn. – Angla gazeto, Mihok, angla gazeto... Nun vi scijas.

Sub la haŭto de Mihok la frostotremo komencis kaŝludon.

– Ne diru, sinjoro leŭtenanto... ĉu vere?

– Sed jes, mi djiras... angla gazeto... Legu! The-London-nje-vs... Mi ne komprenjis eĉ vorton... Legu!

Mihok transprenis la foliojn, rigardis ilin kun terurstreĉitaj okuloj, sed post momento maŝinrapide fluis vortotorento el lia buŝo.

– Enlamondonvenisnovasento... tralamondoirasfortavoko... perflugiloj-defacilavento...

Ĉe Petroff admiro sekvis la koleron kaj dubon.

– Vi scijas legi. Tutje bonje vi scijas legi! Kijel, ke mi nje scijas?

– Vi forgesis verŝajne, sinjoro leŭtenanto, ke la angloj ne tiel skribas, kiel ili parolas. Ekzemple, ili diras: "Bonan matenon, sinjoro" kaj ili skribas "The Szentantalkám, segits meg!" (hungare: Sanktantonĉjo helpu min!) Ĉu vi komprenas? – kaj por konvinki la miregantan leŭtenanton pri sia pravo li serĉis inter la ilustraĵoj unu, kiu figuris ekzotikan tribestron kaj anstataŭ la subbilda teksto li komencis legi la *Historion de Homaro* el lernolibro de E. Privat. Tion li sciis parkere kaj la teksto, se iom lame, tamen taŭgis: "Kiam la maljuna reĝo de Persujo mortis, lia filo, la juna princo Zemir eksidis sur la tronon..."

Petroff kontentigite foriris. De tiu tago Mihok skrupule atentis la horizonton, ĉu ia anglo ne aperos por renversi ĉion? Tiuokaze la leŭtenanta moŝto certe ekspedos lin afrankite al la alia mondo... eble sen kapo. Ĉiutage li promesis novan dekduon da kandeloj kaj pasis longaj monatoj sen notinda okazintaĵo.

Petroff jam bonege parolis la *anglan* lingvon kaj ankaŭ Mihok rekonis en sia leŭtenanto la ĝeneralan bonkorecon de la rusoj kaj flameman entuziasmon por belo kaj bono. Li decidis konfesi sian kulpon, se venos bona okazo.

Okazo venis, sed ne bona, ĉar homo projektas, Dio direktas. Ĵus kiam li ne estis preparita por eventualaĵoj, venis hejmen Petroff kun fremda rusa oficiro.

La malfeliĉa Mihok sentis sian kuraĝon paralizita kiel en la unuaj tagoj.

– Mihok, parolu kun tiu ĉi sinjoro, sed tuj! – komencis Petroff kaj lia voĉo tremis pro la retenitaj kolero kaj indigno. Li asertas, ke li parolas angle... Parolu kun li angle... *Tiun* anglan lingvon mi ne komprenas.

La haroj stariĝis sur la kapo de Mihok. Nu Sankta Antonĉjo nun helpu – li komencis preĝi en si, – kvintalon da kandeloj mi bruligos por vi post hejmreveno. Li klare vidis, ke nun la pentvoĉa konfeso neniel utilos. Se li komencis ĉi tiun altruditan tragikomedion, li devas finludi ĝin. Nur la impertinenteco povas helpi kaj Antonĉjo. Riskante ĉion je unu kubĵeto li ŝajnigis trankvilon.

– Kie kaj de kiu lernis la sinjoro tiun ĉi anglan lingvon?

– Ĉi tie, de soldato el la amerika armeo.

– Ah, jes! – Mihok plenblovis sin. La timo, kiel multajn, faris lin aŭdaca en la minutoj de danĝero. Li mem ne konjektis, ke tiom da kuraĝo nestas en li. Kun rideto li daŭrigis. – La sinjoro lernis la *amerikan dialekton* de la angla lingvo, dum ni parolas la *klasikan lingvon* de la *londona aristokrataro*. Jen la diferenco... Je mia Dio, mi tre ŝatus paroli ankaŭ tiun lingvon, sed mi pensis, oni devas scii unue la klasikan, la aristokratan, kaj poste la popolan... ĉu ne, leŭtenanta moŝto?

La kolero de Petroff vaporiĝis, forflugis kaj eĉ aprobe li balancis la kapon. Tre imponis al li la aludo pri aristokratoj. Li interpretis la vortojn de Mihok, sed la fremda oficiro dube ridetis kaj faris demandon. Petroff tradukis.

– Kie oni povas uzi ĉi tiun lingvon ekster la aristokrataj kvartaloj de London, se la popolo parolas alian lingvon?

En Mihok vekiĝis la propagandisto.

– Ĉie! En ĉiu lando de la mondo! Eĉ en tiu ĉi urbo!! Ĉu vi ne volas kredi? Mi pruvos tion. Bonvolu veni kun mi dimanĉe en la urbon kaj konvinkiĝu, kiu valoras pli: via amerika dialekto aŭ nia klasika angla lingvo?

Petroff denove interpretis kaj ili decidis, ke dimanĉe triope vizitos la urbon.

Mihok sincere ĝojis, sentis sin pli facila, ĉar li estis sur la plej bona vojo malkaŝi ĉion sen fiasko. En la urbo estis granda societo, kie ĉiudimanĉe amase kunvenis babiladi la esperantistoj. Vera internacia societo: germanoj, bulgaroj, turkoj, hungaroj, japanoj el la diverslandaj armeoj; ĉarmaj virinoj, agrablaj viroj el la urbo mem.

Mihok zorge preparis sin por la publika konfeso. Ĉe la pordego de la domo ankoraŭ unu funto da kandeloj kaj Mihok kondukis sian leŭtenanton kaj la fremdan oficiron en la societon. Ilin surprizis la diversnacieco kaj tiu amika intimeco, kiu kvazaŭ sklavigis la vizitantojn. Mihok prezentis ilin al ĉiu ĉeestanto aparte.

Jen turko, alparolu lin! Jen polo, alparolu ŝin! Jen ĥino, alparolu lin! Jen japano, alparolu lin!

Petroff havis kapturnon pro feliĉo, ke li komprenis ĉiujn kaj estis komprenata de ĉiuj. Male lia akompanato, ĉar escepte du amerikanajn soldatojn neniu

komprenis lian “dialekton”. Li estis devigata rekoni, ke la “aristokrata” angla lingvo superas la popolan.

Kaj Mihok en solena silento publike konfesis sian kulpon, petis indulgon de leŭtenanto Petroff, kiu pro ia neklarigebla sento forgesis pri ĉio ĉirkaŭ si kaj kun vera rusa flamemo li ĉirkaŭprenis sian serviston, kisis trifoje lian buŝon por sigeli la fratecon... Tiel instruis Mihok la anglan lingvon kaj tiel fariĝis Petroff entuziasma samideano.

Tamen la fino de ĉi tiu historio ne estas tre kontentiga. Mihok, kiel bona katoliko, du jarojn laboris por la kandeloj, promesitaj al Sankta Antonio kaj dum tiu tempo la belegan modpupforman Rozinjon edzinigis lia kolego. Tiam li riproĉis iomete Sanktan Antonĉjon, sed kiu scias, ĉu ne la sanktulo savis lin el tiu infero, en kiun la alia falis. Ni scias nur, ke Mihok restis sola kun la revo “fondi la In-Tu-As-Es-Ta-He”-n kun speciala insigno: verda stelo, trapikita per pinglo kaj kudrilo.

*El **Dancu, marionetoj!** Eldono de la aŭtoro, Budapeŝto 1927, p. 97-111.*

L. N. M. Newell

LA SVATANTO

En Eŭropo oni plej nature kaj facile amikiĝas al fraŭlino se oni estas fraŭlo; la honestaj knabinoj ne kutimas altiri la atenton de la edzoj. Kontraŭe, en Egiptujo, mi konatiĝis kun Nigma ĝuste tial, ke mi ne estis fraŭlo, sed respektinda kaj sendanĝera edzo. Se oni vidus ŝin parolanta al mi (diskrete, kompreneble, sen troa ridado), tamen ne povus esti skandalo; se oni estus vidinta ŝin babilanta kun juna senedzina viro, ŝia reputacio estus ruinigita por ĉiam, kun, por egiptino, teruraj sekvoj.

Iam mi instruis en knabina lernejo, kaj tie, en la porinfana fako, instruis ankaŭ Nigma Jusef. Mi tuj rimarkis ŝin, ĉar inter siaj taskoj, ŝi devis ankaŭ prizorgi la tabelon de la lecionoj por la duagradaj klasoj, kaj mi devis aranĝi mian laboron konsulte kun ŝi.

Ŝi tiam havis proksimume dudek-kvin jarojn, kaj estis mezalta, kun korpo svelta kaj tre gracila; kaj kiam ŝi forgesis, ke ŝi devas imiti la eŭropajn sinjorinojn, ŝi sin movis sufiĉe bele. Kion plu? Tre nigraj haroj – longaj, kompreneble; grandaj nigraj okuloj, blankegaj dentoj, lipoj iomete tro larĝaj, haŭto malpale bruna. Ŝi ofte ridis, kaj ŝia esprimo estas afable mokema. La voĉo estis iom raŭka, sed ne malagrabla; ŝi estis helpema, kaj ŝajnis bonkora.

Kun mi ŝi evidente volis amikiĝi, pro du kialoj: unue, ŝi ŝatis ĉion eŭropan, kaj kompense malŝatis preskaŭ ĉion egiptan; due, mi flue parolis la francan lingvon, kaj ŝi tute ne parolis la anglan lingvon. Simile al tre multaj egiptinoj el la "respektindaj" familioj, ĉu mahometanaj, ĉu kristanaj, ŝi estis edukita en franca lernejo – ĉu laika, ĉu religia, mi ne plu memoras. Kredeble religia, ĉar Nigma estas koptino, kaj la koptoj preferas la kristanajn lernejojn.

Ĉe nia unua intervjuo, la franca lingvo tuj faris ligon inter ni; mi ĝojis, ĉar mi povis paroli al ŝi senpene, anstataŭ paroli malrapide kun iu, kiu apenaŭ komprenas la anglan lingvon; ŝi ĝojis, ĉar ŝi povis rilati kun eŭropano.

Tamen, la unua interparolado ne estis sen danĝero. Kiam ŝi estis aranĝinta la horojn de miaj lecionoj, ŝi diris al mi, kun la surfaca rideto de tiu, kiu estas preta ofendiĝi: "Vi ne ŝatas akcepti ordonojn de virino, ĉu? Kaj precipe de brunulino kia mi?"

Evidente komplimento estis necesa, kaj mi faris mian eblon.

"Kontraŭe," mi respondis, "ĝi faras nuran laboron efektiva plezuro. Kaj, se vi scius kiom mi suferis por brunigi mian haŭton! Ĝi estas la koloro, kiun mi plej admiras."

Cetere, en tiu komplimento troviĝis apenaŭ mensogeto. Ŝi nomis min flatemulo, sed ridetis kontente; kaj mi rimarkis, ke mi ne estas farinta al mi mal-

amikon. Ŝi diris jam de la komenco la familiarajn *tu* kaj *toi*, kiel tre multaj egiptoj france parolantaj.

Tio estis mia unua percepto pri ŝia preskaŭ malsana sento pri la propra senindeco, ŝia timo pri malrespekto aŭ malestimo; ŝi deziregis esti eŭropanino, kaj dolore konsciis, ke ŝi estas "nur" (la vorto estas ŝia, ne mia), nur egiptino brunhaŭta. Ŝi mem proponis, ke mi malestimu ŝin, ĉar ŝi bezonis aŭdi mian aserton, ke mi tute ne malestimas ŝin.

Poste, ŝi tre ofte kaptis la okazon alparoli min, kiam mi eliris klasejon post leciono; ŝi kvazaŭ embuskis min, kaj alpafis al mi torenton da francaj frazoj. Tamen, mi ne tro lasis mian viran memestimon fieriĝi; mi sciis, ke ŝi ne persekutas min, ĉar mi estas mi, Noel Mansell; eĉ ne tial, ke mi estas virseksulo; sed nur tial, ke mi estas tre blonda membro de la angla raso; kaj ĉar tio estis honoro, kiun mi partoprenis kun kvindek milionoj da aliaj homoj, mi ne tro vantis mian allogon.

Ŝi parolis pri diversaj aferoj, ne tre interesaj: pri la klimato, pri la lernejaj ferioj, pri la karaktero de miaj instruatinoj kaj similaĵoj. Tamen, nia rilato progresis ĝis la punkto, kiam mi povis inviti ŝin tetrinki kun mia edzino kaj mi en nia hejmo. Ŝi levis la kapon kun rapida rideto, kiam mi diris tion; konfirmante mian suspekton, ke ŝi estas esperinta tiun inviton jam de longe. Tamen, ŝi devis antaŭeviti repuŝon al ŝia fervoro, kaj diris: "Vi estas tre afabla. Sed kial via edzino interesiĝas pri egipta instruistino? Ŝi ne vere deziras renkonti min."

Mi estis alkutimiĝinta al ŝi, kaj havis mian respondon preta. "Sed, fraŭlino, mi multe parolis al ŝi pri vi, kaj ŝi senpacience atendas la okazon vin vidi. Ĉu proksiman ĵaŭdon?"

"Mi ne scias, ĉu mi povos. Petu, ke ŝi sendu al mi invitleteron, kaj tiam mi sciigos vin pri la afero."

Tion mi ne estis atendinta; sed post momento mi divenis la veron, kiun ŝi ne volis konfesi. Respektinda egipta fraŭlino ne povas viziti amikojn sen la permeso de siaj gepatroj; kaj Nigma bezonis la leteron por montri al ili kaj por havi la permeson.

Nu, ni sendis la leteron, kaj ŝi respondis, ke ŝi volonte venos, se ŝi povos kunvenigi sian fraton, "ĉar ŝi timas trairi la urbon sola." Kio signifas, ke ŝi ne estas permesata viziti amikojn sen dueno, ĉu patro, patrino aŭ frato.

Ili alvenis; Nigma estis sin vestinta honore al la okazo. Ŝi portis helan robon, tre modan laŭ la gusto de Egiptujo, kiu estas sufiĉe simila al la gusto de Parizo: altajn kalkanumojn, kiuj iom malbonigis ŝian belan marŝon, ĉar ŝi ne tute kutimis al ili; kaj en tiu varmega klimato, ŝi portis longajn ĝiskubutajn gantojn. Kaj – kompatindulino! – por impresi mian edzinon, ŝi estis teginta sian vizaĝon per blanka pudro. Tion ŝi faris por kaŝi sian brunecon, sed ĝi nur donis malsanecan aspekton al ŝia velura haŭto. Mi suspektis, ke ŝi portis la gantojn samkiale.

Post la salutoj, ŝi sidis silente, singardeme rigardante mian edzinon por vidi,

ĉu necesas sin prepari kontraŭ rikanoj. Iom post iom ŝi trankviliĝis, kaj komencis babili, laŭ la kutimo de virinoj en ĉiu lando, pri roboj kaj modoj kaj similaj virinaj aferoj. Dume, mi konversis kun la frato, junulo dudekjara, kiu estis provonta la *Bachot*, kaj estis edukata en franca religia kolegio. Mi miris, kiom la francoj sukcesas stampi la egiptojn per franca aspekto; li parolis kaj gestis kiel franca junulo, kiu kombinas necertecon pri sia valoro kaj pri sia impreso ĉe aliaj, kun la opinio, ke li ĉion scias pri la mondo. Ni parolis pri la literaturo. "Jes," li informis min, "en la angla literaturo estas bonaĵoj, sed entute ĝi ne multe valoras kompare kun la franca. Mankas al la angloj formo, stilo; ili havas geniulojn, sed barbarajn geniulojn." Li rigardis min por vidi, kian impreson li faras; mi faris la taŭgan respondon.

"Sed Shakespeare, Milton? Ĉu estas poezio pli bela, ol ilia?"

Kaj tiel plu: la kutima konkurado kiam franco renkontas anglon.

Nin ne aŭskultis Nigma; ŝi havis praktikan menson, kiu ne malŝparas tempon pri la literaturo. Ŝi estis tiam parolanta pri filmoj kaj la beleco de la aktorinoj.

"Ĉu vi iam vidis Greta Garbo? Mi pensas, ke ŝi estas bela. Kia blanka haŭto! Ne kia mi, brunulino! Kion mi farus, se nur mi povus esti blonda, kiel ŝi!"

"Sed kial, fraŭlino? Vi sinjorinoj ja estas amuzaj: jen en Eŭropo preskaŭ ĉiuj virinoj volas esti brunaj, kaj sidadas multajn horojn sub la suno por bakiĝi. Ili eĉ pagas grandajn sumojn por kosmetikoj brunigaj. Kaj jen vi kaj aliaj egiptinoj, kiuj volas la kontraŭon! Laŭ mia opinio, la bruna haŭto estas pli bela, ofte, ol la blanka."

"Ah, sed ne estas la sama afero," ŝi diris. "Ili estas eŭropaninoj, do ili bone povas brunigi sin, mi estas egiptino."

Frazo certe neklara, tamen mi ĝin komprenis, ĉar mi estis jam renkontinta la egiptan snobismon pri haŭtkoloro. Ekzistas multaj egiptoj blankaj aŭ preskaŭ blankaj; ili estas la plej feliĉaj kaj malestimas ĉiujn aliajn. Poste, estas tiuj, kies haŭto havas la koloron de kafolakto; ilin ridigas la brunuloj de meza kaj suda Egiptujo. Ĉi tiuj siavice povas moki nur la nubianojn kaj sudananojn nigrajn. Kiujn la sudananoj malestimas, tion mi ankoraŭ ne eltrovis, sed certe iujn. Mi ne surpriziĝus, konstatante, ke tiu ĉena malestimo trairas tutan Afrikon ĝis Cape Town.

Mi ankaŭ sciis, ke tiu snobismo estas pli forta ĉe la virinoj, ol ĉe la viroj: egipto konsentus edzinigi virinon pli brunan, ol li, sed egiptino ne volas edziniĝi al viro pli bruna, ol ŝi; ŝi tro sentas sian superecon.

"Nu," mi diris al Nigma, "aranĝu kun kuracisto, ke li donu al ni vian haŭton, kaj al vi nian, kaj ĉiu estos kontenta!"

Tiu ideo amuzis ŝin, kaj ŝi komencis paroli ankoraŭ pli hejmece. Ŝi naive interesiĝis pri la mebloj, bildoj kaj drapoj de angla hejmo, kaj volis rigardi ankaŭ la subvestojn de mia edzino. La du virinoj foriris en la litĉambron, kaj mi aŭdis viglan konversadon kaj ridojn. La plimulton ŝi admiris, sed ne povis kompreni la simplecon, senornamecon de kovriloj, vestoj kaj similaj aferoj. Ŝi ĉion rigardis,

admiris, sed ŝi ne notis por poste imiti; spite ŝian ŝaton pri ĉio eŭropa, mankis al ŝi la risorto, kiu instigus al ŝi eŭropanigi sin.

Entute, la vizito estis sukcesa; Nigma tiom sentis sin senembarasa, ke ni eĉ persvadis al ŝi instrui al ni araban kanton de la felahoj. La penso, ke ni volas lerni kamparanan kanton, longe ridigis ŝin: vere komika ideo; sed fine ŝi ekkantis, iom ruĝiĝante, ĉar ŝi kantas laŭ la maniero de la neinstruitaj kamparanoj, anstataŭ laŭ la maniero de Badia' Mesabni, la plej moda kantistino en Egiptujo.

Post tio, ŝi pli ofte parolis al mi en la lernejo, sed zorgis ne paroli pri la vizito, se alia instruisto troviĝis en aŭdodistanco. Baldaŭ temis pri revizito, ĉar necesis prezenti siajn eŭropajn amikojn al la familio. Estis aranĝite, ke je unu el la festotagoj ni iru al la domo de ŝia patro.

La egiptoj estas gregemaj homoj, kaj plej feliĉe laboras multope, kune babilante kaj ridante. Ili ŝatas la kunpremon de siaj kunuloj; ekzemple, unu taksio aŭ fiakro ofte devas enteni dek aŭ dek-du homojn samtempe. Same pri la hejmo; la familianoj ŝatas kune vivi, kaj ĉar la egiptaj familioj estas grandaj, ili kunloĝigas nekredeblan nombron da homoj en unu malgranda apartamento.

Tial, kiam oni eniras egiptan hejmon, oni estas prezentata al tiom da familianoj, ke estas neeble memori ĉiujn. Mi do havas nur malklaran memoron pri la personoj, kiujn ni renkontis dum nia unua vizito en la familio de Nigma Jusef, krom pri Nigma mem, ŝia frato, kiun ni jam konis, kaj – plej granda surprizo – angla soldato, serĝento en la regimento tiam deĵoranta en la urbo. La anglaj soldatoj en Egiptujo estas la plej solecaj homoj en la mondo, kaj mi tre miris pri la ĉeesto de ĉi tiu.

Komence la konversado estis malfacila, kiel ĉiam ĉe tiaj internaciaj kunsidoj. La soldato parolis la francan lingvon kun aĉa akcento, sed sufiĉe flue; tamen, ni devis atenti, ke li, mia edzino kaj mi ne komencu privatan konversadon en la angla lingvo pro facileco. La virinoj baldaŭ trovis temon por si: fanfaronado kaŝita pri siaj kudraĵoj, brodaĵoj, trikaĵoj. Mi rigardis longan serion da vestoj, kovriloj, tablotukoj kaj similaĵoj, paciencege broditaj kaj ornamitaj de Nigma kaj ŝia fratino, kaj zorge konservataj en ŝranko, por ke ili ne difektiĝu per la uzado. Mi rimarkis, ke la prudeco de la egiptinoj tamen permesas, ke ili montru tiel siajn kalsonojn kaj similajn intimaĵojn.

Poste, mi sukcesis ne malĝentile paroli kun la soldato. Li estis juna kaj tre blonda, proksimume dudekokjara, kun brosaj lipharoj; unu el tiuj angloj, kiuj aspektas ĉiam, kvazaŭ ili ĵus sin banis. Liaj grizaj okuloj estis seriozaj kaj malkaŝaj, kaj mi baldaŭ rimarkis, ke ili sekvas la formon de Nigma pli ofte, ol la aliajn.

"Jes," li diris, responde al demando mia, "mi konas la familion jam de sep-ok monatoj. La plej aĝa frato estas kontlibristo en la kantino, kiun mi estras, kaj iam li invitis min. Mi estis sufiĉe kontenta akcepti, ĉar ni ne konatiĝas kun multaj homoj en tiu ĉi lando... La franca lingvo? Nu, mi iomete lernis en la duagrada lernejo en Anglujo; kaj mi studis el libro tie ĉi; mi pensis, ke se mi vizitas la

familion, mi devus almenaŭ iom paroli kun ili, kaj nur la plej aĝa parolas la anglan lingvon." Mi suspektis, ke precipe kun Nigma li volis paroli; li estis tiom fremda en tiu medio, ke nur tia kialo igus lin lerni la francan lingvon kaj vizitadi la familion.

Tiam Nigma interrompis nian interparoladon, proponante, ke ni rigardu la familian foto-albumon. Tiu rito estas plenumata de ĉiu gasto ankaŭ en Egiptujo; kaj same kiel en Eŭropo, ĝi tre utilas por ŝtopi truon en la konversado. Tiun celon ĝi trafis, kvankam estis unu momenta embaraso. En la albumo staris foto de egipta oficiro, kun agla vizaĝo preskaŭ nigra; li aspektis tre vireca, efektive bela tipo. Ni tion diris: "Kia bela viro!"

Nigma rigardis nin momente, tute senkomprene. Ni rimarkis, ke ni faris eraron. Sed feliĉe nia eraro amuzis ŝin, kaj ŝi ridegis. "Sed... sed," ŝi balbutis, "li estas *nigra*! Aŭskultu, patro, ili opinias la nigrulon bela!" Kaj sub la ŝirmo de ŝia ridado, ni ekparolis pri io alia. Ni petis, ke ŝi ludu iun muzikaĵon per la piano, kiu staris en la sidĉambro.

"Ne, vi ne deziras aŭdi min ludi, ĉu? Kiel egipta muziko povas interesi vin?"

Ni sciis la respondon al tia demando, kaj baldaŭ ŝi ekludis. Ŝi prezentis al ni la plej lastan ĵazaĵon, por montri, ke ŝi scias ion alian, ol la mizera popolkanto, pri kiu ni estis petintaj dum ŝia vizito al ni. Ni aplaŭdis, kaj ne kuraĝis peti, laŭ nia prefero, pluajn felahajn kantojn.

Post longa vespermanĝo, kaj babilado pri la klimato, pri la lernejaj ferioj, pri la karaktero de ŝiaj kaj miaj instruatinoj, ni foriris samtempe kun la soldato, kiu nomiĝis Felton. Kun li mia edzino kaj mi marŝis al la centro de la urbo, por trafi aŭtobusojn. Kaj dum ni zigzagis tra la mallumaj stratoj, evitante koton kaj azenrajdantojn, ni ĉiuj havis tiun jukon en la animo, kiun oni havas, kiam kunveno ne marŝis bone, kiam la intima fluo de la parolado mankis, kiam oni montris sin malsprita.

Mi singardeme parolis al Felton pri Nigma. "Eksterordinare agrabla junulino, tiu Nigma. Ŝi havas grandan kuraĝon, ĉar ŝi sukcesis venki la antaŭjuĝojn de la familio, kaj laboras ekstere. Maloftaĵo, tio."

"Je-es," li parolis malrapide, "ŝi estas alloga knabino. Jes, mi tre ŝatas ŝin. Efektive, – " li haltis, kaj rigardis min serĉe por recertiĝi, ke mi estas tia homo, al kia oni povas paroli sen timi mokon. La anglo ĉiam timas mokon pri siaj amaferoj.

"Efektive," li daŭrigis, post momento, "mi kelkfoje pensis, ke mi ŝatus promeni kun ŝi." Li uzis la anglan popolan esprimon por la antaŭfianĉeca interkoniĝo, kunpromenado, reciproka provado. "Ŝi estas honesta knabino, kaj serioza." Subite li konsciis, pri kia temo li parolas, kaj ruĝiĝis; kaj marŝis kelkajn minutojn senparole.

"Nu," li daŭrigis, kun tiu bezono pri malkaŝa parolado, kiun ĉiu el ni kelkfoje sentas ĉe nekonatoj, "mi ne scias, kion pensus mia familio. Ŝi ja ne estas blonda, tion vi vidis. Tamen, kiel gravas la koloro? Se ŝi estus bona edzino?"

Mi kapklinis konsente; efektive, mi pensis, ke spite la diferencojn pri raso, vivspertoj, medioj, tia edziĝo povus ruliĝadi trankvile. La afero tre interesis min, ĉar edziĝo inter anglo kaj egiptino estas tre malofta; precipe tial, ke ili neniam havas okazon renkontiĝi. Felton kaj Nigma ŝajnis reciproke taŭgaj, ĉar ŝi estis inteligenta kaj pli bone edukita, ol la plimulto el la egiptinoj; kaj li evidente ne havis antaŭjuĝojn pri raso, koloro aŭ lingvo; ili faris, efektive, tre interesan kompromison inter la ideoj, pensmanieroj kaj kutimoj de la du rasoj. Estis videble, ke li ŝatas, preskaŭ amas ŝin, pli ol li vorte konfesis. Mi ne sciis, ĉu ŝi amas lin, sed ŝi tiom admiris ĉion eŭropan, kaj tiom deziris eskapi el ĉio egipta, ke ŝi nepre farus sian eblon por feliĉigi lin.

"Tamen, mi ne deziras nun paroli al ŝi pri la ideo," Felton daŭrigis; "mi ankoraŭ ne sufiĉe konas ŝin. Mi neniam havas okazon paroli al ŝi sola. Ĉiam estas kun ni aŭ fratino aŭ frato, aŭ alia familiano. Ŝi ŝajne ne komprenas, ke mi deziras paroli al ŝi sola kelkfoje. Mi plurfoje invitis ŝin iri kun mi al kino; ŝi akceptis nur unufoje, kaj tiam venis ankaŭ la patro kaj patrino."

Nun mi komprenis la malfacilaĵon: spite sian restadon en Egiptujo. Felton ankoraŭ sciis tre malmulte pri la moroj de la egiptoj. Fraŭlino neniam povas esti sola kun viro, eĉ en sia hejmo, ĝis kiam li estas jam petinta pri ŝia mano al ŝia patro, kaj paginta al ĉi tiu la doton. Tiam, kelkfoje, li estas permesata pasigi duonhoron sola kun sia fianĉino en la sidĉambro, sed eĉ tiam li ne povas promeni kun ŝi sola, aŭ iri al kino. Mi demandis al mi, ĉu tion mi devus klarigi al Felton; farante tion, mi riskus tute senkuraĝigi lin; ne farante tion, mi lasus lin en senbaza espero, kaj kaŭzus al li eventuale pli grandan elreviĝon. Nu, mi nenion diris; dum mi estis ankoraŭ pesanta la aferon, ni atingis la haltejon de la aŭtobusoj, kaj disiĝis.

Nu, post tiu tago, Nigma kaj mi havis tute novan temon por konversado, kiam ni renkontiĝis en la lernejo. Pli ĝuste, ni havis nur unu. Ŝi konstante parolis pri Felton, pri lia honesta karaktero, lia blondeco, lia vasta scio kaj kompreno pri la mondo, liaj grandaj kapablaj manoj, lia fortikeco. Mi rimarkis, ke interesas ŝin ne nur la anglo, sed ankaŭ la viro; mi kredas, ke ŝi estis enamiĝinta al li. Ankaŭ ŝia karaktero ŝajnis ŝanĝiĝi; ŝi ne perdis la iom mallarĝan elrigardon de la egiptino, sed tamen ŝi estis pli komprenema, pli vivoplena, pli virineca, malpli knabineca; kaj super ĉio, ŝia memfido multe kreskis; ŝi ne plu antaŭvidis rikanojn.

Tiel daŭris du monatojn; tiam finiĝis la lerneja jaro; mi foriris kun la edzino al Aleksandrio por unumonata libertempo, kaj ne renkontis Nigma dum tri monatoj. Kaj kiam mi vidis ŝin en la lernejo, ŝi estis tiom okupita pri la reorganizo de la klasoj, ke tute ne estis tempo por konversado.

Baldaŭ ni invitis, ke ŝi tetrinku kun ni, kaj sendis la kutiman invitleteron. Ĉi tiun fojon venis kun ŝi ŝia edziniĝinta onklino, bela virino, pli juna ol Nigma.

Post la salutoj kaj demandoj pri libertempo, ni komencis paroli pri pasintaj aventuroj, ridi pri komunaj memoroj. Nigma parolis al ni sufiĉe facile, senembarase, sed ŝi ridis malpli ofte, ol antaŭe. Ŝi diris sarkasmajn frazojn de tempo

al tempo; tion mi neniam aŭdis ĉe ŝi antaŭe. Mi rimarkis en ŝia voĉo amaran tonon. Kaj al frazoj pri la varmeco, la belaj ĝardenoj kaj promenejoj de Aleksandrio, la novaj lernantinoj en la lernejo, kaj tiel plu, ŝi respondis sen sia kutima entuziasmo.

Fine, mia edzino turnis la konversadon al temoj pli intimaj. "Kiel do," ŝi diris al Nigma, "ĉu vi ankoraŭ ne estas edziniĝinta?"

"Kiu volus edzinigi min?" ŝi respondis, kun stranga rideto, kiu ŝajnis al mi kolereta. "La viroj preferas la blankajn virinojn; oni ne deziras negrinon, kia mi."

Denove tiu obsedo pri la koloro; ĝi estus jam tedinta min, se mi ne estus diveninta suban tragedion. Evidente la aferoj iris malbone.

En Egiptujo ne estas maldelikate demandi pri la aferoj, eĉ la amaferoj, de aliaj; ni do kuraĝigis ŝin, ke ŝi rakontu al ni, kio okazis.

"Sed tiu anglo – ni ja vidis, ke li interesiĝas pri vi?"

"Ĉu mi scias? Li sendube edziĝis al iu angla fraŭlino, kiu estas pli bela, ol mi. Sed kiel tio gravas al mi?" Ŝi provis rideti, kaj altigis sian belforman nazon kvazaŭ malestime. "Mi estas instruistino, dank' al Dio, kaj tiel mi restos libera ĝis la morto. Mi ne estos la sklavino de iu ajn viro."

"Sed ĉu vi ne renkontadas lin – ĉu li ne plu venas al via domo?"

"Ne, li ne plu venas; li ĉesigis siajn vizitojn jam antaŭ tri monatoj." Pro sia manko de memfido, Nigma vidis en tio tediĝon pri ŝi; la anglo trovis ŝin neinteresa, "tro indiĝena", tro nigra. En la tonoj de ŝia voĉo mi aŭdis doloron kaŝitan, la doloron de virino, kiu senespere deziras viron, kaj maltrafis sian okazon. Kompatinda Nigma; ŝi volis, pli ol iam antaŭe, esti eŭropana, esti edzino, kaj pli ol iam antaŭe, ŝi malesperis pri eskapo el sia teda familia vivo.

Ni provis klarigi al ŝi, ke ne pro malestimo Felton ĉesigis siajn vizitojn, sed pro tute aliaj kaŭzoj.

"Li ja ŝatis vin, Nigma. Sed li deziris koni vin pli bone, lasi, ke vi konu lin pli bone, antaŭ ol proponi la edziĝon. Kaj malfeliĉe tio estis neebla."

"Sed kiel neebla? Li ja venis al ni ĉiusemajne, ni ofte vidis unu la alian, ni ofte babilis kune. Li estus povinta paroli pri la afero al mia patro – li ne estus postulinta tre altan doton."

Certe Nigma estis leginta francajn romanojn; certe ŝi sciis, ke eŭropanoj admiras la romantikan amon, volas edziĝon de animoj – kio postulas longan konadon sen la ĉeesto de aliaj. Eble ŝi pensis, ke tio estas nur en romanoj.

"Ne estas eble koni unu la alian profunde, se ĉiam ĉeestas la gepatroj," mi diris. "Li volis promeni kun vi sola, iri kun vi al kino, paroli libere sen la embaraso de la ĉeesto de aliaj. Kaj supozeble, kiam li trovis tion neebla, li opiniis, ke estas nur unu afero farebla: ne plu vidi vin."

Surprizis min, ke Nigma ne divenis tion antaŭe, ĉar estas ankaŭ egiptaj junuloj, kiuj rifuzas edziĝi samkiale; sed ŝia menso estis irinta en alian direkton. Kiam ŝi aŭdis nian opinion, ŝia vizaĝo esprimis unue nekredemon; poste ĝi aspektis

kolera, kaj ŝi ruĝiĝis. Mi supozis, ke ŝi riproĉos al Felton, ke li tion ne diris malkaŝe; sed ne.

"Ĉu tiel? Ĉu tiel?" ŝi fine diris. Miksita kun ŝia kolero estis ankaŭ ia sento pri malŝarĝo; rekuraĝiĝis ŝia memestimo. "Estas ĉiam same ĉe ni. Ni egiptinoj aŭ devas edziniĝi al viroj, kiujn ni apenaŭ konas, aŭ ni tute ne edziniĝas, ĉar la viroj ne volas edzinigi virinon, kiun ili ne konas. Tiuj malmodernaj egiptoj! Kial ni ne povas esti liberaj, kiel la eŭropaninoj?"

"Sed, Nigma, kial vi ne insistis iom liberiĝi? Kial vi ne reinvitas lin nun? Vi povus poste fari tion, kion li petus. Vi ja laboras, vi subtenas vin mem, vi rajtas fari tion, kio plaĉas al vi. Diru al la frato, ke li reinvitu Felton, kaj tiam promenu kaj vin amuzu sola kun li, spite la gepatrojn."

"Tio estas neebla."

"Sed kial neebla?"

"Ĉar – ĉar ĝi estas neebla. Ili ne permesus. Kaj kion dirus la najbaroj? Oni dirus terurajn aferojn pri mi, kaj en la tuta vivo neniu viro volus edzinigi min."

Mi komprenis, ke la ribelemo de Nigma eluziĝis; ŝi estis tiom luktinta por labori ekster la hejmo, ke ne plu restis morala forto por la nun necesa batalo. Cetere, se ŝi ja ribelus, kaj spitus la opinion de la familianoj kaj najbaroj, ŝi eĉ ne povus plu okupi sian postenon: en knabina lernejo oni ne volas fraŭlinojn kun malbona reputacio.

"Kion mi povus fari?" ŝi diris malespere. "Mi ne povas akcepti egipton, kiun mi vidis nur dum interparoloj kun la gepatroj, kaj anglo same ne volos akcepti min."

Ni provis ŝin gajigi, dirante, ke eble Felton revenos, ke estas tre multaj viroj, kiuj volonte edziĝus al ŝi: ni parolis laŭ la hipokrita maniero de la homoj en tiaj okazoj – ni ja sciis, ke apenaŭ estas espero por kompatinda Nigma...

Ŝi ankoraŭ estas en mia lernejo. Preskaŭ ĉiutage ni konversas kaj ŝercas pri la lernejaninoj, la ferioj, kaj similaj temoj. De tempo al tempo ŝi vizitas nin, aŭ ni ŝin; kaj ni tiom intimiĝis, ke ni povas ŝerce nomi ŝin la nigrulino, sudanino, kaj tiel plu. Sed ni ne plu aŭdas pri svatantoj; viroj ne venas serĉi ŝin. Nigma antaŭvidas plurajn jarojn da laboro en la lernejo, ĝis kiam ŝi tediĝos pri tia sencela laboro; kaj tiam ŝi reiros al la stato el kiu ŝi luktis: ŝi estos denove perfekte honesta kaj respektinda fraŭlino, kiu tute dependas de sia familio kaj ne havas fantaziajn ideojn pri la moderna virino, amo kaj edziĝo, kaj promenoj sola kun viro.

*El **Bakŝiŝ: Skizoj el la vivo de egiptoj**. Literatura Mondo, Budapeŝto 1938, p. 66-80.*

Reto Rossetti

LA KRUTAĴO

De supre sur la deklivo venis la voĉo de la arbotrenisto.

"Hot, hot, mia bela! Ekla! Jaj, mia brava! Tiru, do! Vidu, la vireto bezonas ja lignon!"

Barto ridetis al mi. "Dan instigas sian ĉevalon" li diris.

Subite la voĉo de Dan ŝanĝiĝis.

"Haj, vi straba bovido! Kion vi faraĉas, somnambulo! Atentu do vian ĉevalon! For, for de la krutaĵo!

Se la arbo misglitos, tiam kun la ĉevalo... Pigra porko vi! Ĉu tion vi nomas trenaĵo?? Mi vidis ja korvon traflugi kun pli ol tiom en la ungoj por neston fari! Vi kota kapo – al pli stulta la Dio ne enblovis ankoraŭ la vivon! Kristo krevigu vin!"

Barto ekridis. "Nun li krias al sia filo. Kia voĉo! Kaj kiel suke li sakras! Tamen tute bonkora li estas".

Ni ambaŭ ripozigis la du-ansan segilon, per kiu ni dissegis la altrenitajn arbojn je oportunaj longoj por la segejo. Nun la hufbatado proksimiĝis, ni aŭdis jam la ronkadon de la peneganta ĉevalo kaj la grincadon de la dekkvinmetra lariko, kiun ĝi trenis. Baldaŭ Dan alvenis, trotante fortike apud la ĉevalino. En la mano, anstataŭ vipo, li havis branĉeton preskaŭ junke maldikan – ridinda timigilo!

"Haj, Dan" salutis Barto, kiam la arbo aldoniĝis al nia staplo kaj la jungilo estis malkroĉita. "Vi estas en vigla humoro hodiaŭ".

Dan transrigardis al sia bubo, kiu kun alia trenĉevalo priservis duan paron da dissegantoj. "Tiu muka miskreito volas pereigi al mi ĉevalon" li murmuris. "Jam ok ĉevalojn mi perdis en ĉi tiu laboro. Ĝi estas kruela deklivo. Kaj plej danĝera estas tiu krutaĵo. Tie mi perdis belan stalonon antaŭ du monatoj. La arbo ruliĝis flanken kaj hop! ĝi saltis en la abismon kaj la stalono ĉi kune. Sed la pli multajn ĉ'alojn eluzas la laborado".

"Tamen vi ne mistraktas ilin" mi rimarkis.

"Povraj bestoj" diris Dan medite, kaj lia voĉo sonis jam karese. "Ne mi, sed la deklivo finas ilin. Mi aĉetas ilin grasajn kiel bovoj, mi rotigas ilin, ripozigas laŭvice po du semajnoj en la stalo. Mi nutras ilin plejeble bone – nenio helpas. Post ses monatoj, se ne akcidento mortigis ilin, ili fariĝas magraj kiel stativo, jam elĉerpitaj. Ĉu vi aŭdis tiun ĉ'alinon, kiel ŝi stertoras? Tion faris ne la ŝarĝotreno, sed la suprenirado. Kruela deklivo ĝi estas". Li ekprenis la bridon. "Nu, ek denove! Ĉu vi havas ŝarĝon por la boĝio? Mi opinias aŭdi la traktoron".

Ni aŭskultis. Mallaŭte, de fore, ni kvazaŭ aŭdis la put-putadon de benzin-motoro. Ni kliniĝis denove super la segilo kaj Dan reiris sur la deklivon.

La traktoro alvenis sur la vojo, trenante la malplenan boĝion. Ni ĝin ŝarĝis, rulante la longajn ŝtipojn sur lignaj reloj. Poste Fergo, la traktoristo, diris al sia helpanto: "Rolfo, ĉu vi volas resti ĉe la segado kun Barto?" Kaj al mi: "Vi povos veni kun mi ĉi fojon, Toĉjo, se vi deziras".

Tre volonte mi akceptis. Tiu kuniro ja estos ripoza ekskurso. Temis nur helpi malŝarĝi ĉe la segejo, kaj ĝis tiam pasos duonhoro da agrable malrapida veturado kun la traktoro. Ni ekvojis. Kaj Fergo konfidis al mi, per tiu sama, mole ĝentila voĉo: "Mi prefere vin havas kun mi, Toĉjo, ĉar tiu Rolfo tro impetas kaj ĵetas tro impulse sian finon de la ŝtipo dum la malŝarĝo. Sciu, tio povas danĝeri al la kunulo. Lastan fojon li ĵetis tiele dum mi ankoraŭ portis la ŝtipon. Mi tuj ekĵetis mian finon, sed pro la nesamtempa ellaso la ŝtipo resaltis alte ĉe mia flanko kaj preskaŭ forportis mian kapon".

"Li paradas per sia forto" mi diris. "Li amas spektakli. Tre kruda li estas".

"Jes, li estas bona junulo, sed iom tro fervora. Li ne komprenas" rediris Fergo indulge.

Mi ridetis, imagante la diferencon inter la piroteknika insultado de Dan la trenisto kaj la milda parolo de Fergo la traktoristo. Ni alvenis la supron de deklivo, kaj Fergo haltigis la traktoron dum mi desaltis kaj aplikis la bremson de la boĝio por la descenda vojo.

"Mi admiras la senpasion de viaj paroloj" mi diris. "Se iu mian kapon estus danĝerinta per sia mallerto, mi ja trovus pli fortan vorton ol 'fervora' por priskribi lin! Natura ĝentilhomo vi estas, Fergo! Kaj grandan estimon pro tio vi havas ĉe la laboristoj".

Nu vidu, per tiu rimarko mi mem vidigis tian nazoŝovadon, pri kiu efektiva laborkamarado ne estus kulpa. Tiuj ne okupas sin je personaĵoj: ili senparole sed naturtakte akceptas la homon tia, kia li estas. Sed mi, intelektulo provizore provanta la korplaboron, arogis al mi juĝi kaj komenti rekte en la vizaĝon de la homo! Tamen eĉ ne per okulharo Fergo donis signon pri mia impertinento. Li duonturnis sin al mi kaj diris:

"Ĉu vi scias, ke iam mi havis tre flamiĝeman temperamenton? Tio estis antaŭ longe, kiam mi estis ankoraŭ junulo..."

Li paŭzis kaj enpensiĝe rigardis al la krutaĵo, jam trans la valo, kies blanka faco elstaris kiel pitoreska trajto en la monta pejzaĝo.

"Mia frato Adamo kaj mi estis atletaj, sportamaj knaboj. Ni grimpis la montojn, ni kuris, saltis, boksis. Unu vesperon ni vestis la boksgantojn por amika skermo. Ni ambaŭ estis lertaj kaj vigle vetemaj. Kaj ni konis kaj fervore praktikis la boks-teknikon; ni manovris, evitis, ekbatis: piŝtobato, arkobato kaj tiel plu. Meze de la skermo Adamo fintis per la dekstra kaj per la mala trafis en mian makzelon. Mi ekflamis kiel rezina ligno kaj blinde-kolere rebatis, draŝante dupugne kaj vanigante lian arton per la furiozo de mia atako. Adamo rezigne faligis la manojn. Mi, malatentante lian batalhalton, piŝtis en lian vizaĝon. Sur lia vangosto aperis malhela kontuzo. La okuloj de Adamo flagris kaj kun kolera

malestimo li sin forturnis de mi, deŝiris de siaj manoj la boksgantojn kaj foriris.

La tutan vesperon ni ne kunparolis. Same malpace ni iris dormi.

Matene Adamo leviĝis frue kaj eliris por fari grimpadon sur la roko de tiu krutaĵo. Dek futojn de la supro li falis – kiakaŭze mi ne scias. Lian frakasitan korpon trovis paŝtisto, kiu alarmis nin. Mi iris kun mia patro al la loko. Tie kuŝis Adamo, kaj tie sur lia morta vango ankoraŭ sidis la kontuzo, kiun mi donis al li la antaŭan vesperon".

Fergo turnis al mi milde malĝojan rigardon kaj diris reve, kun sincer-naiva tono:

"Ĉu vi scias, Toĉjo? La vido de tiu makulo tiel skuis min, ke de tiu tago mi neniam plu ekkoleris".

Subite mi sentis, ke mia bela poŝpleno da vortoj traglitas inter miaj fingroj kiel sablo. Silente mi enrampis en la traktoron.

Fergo funkciigis la maŝinon kaj la traktoro ekiris malsupren.

El ***El la maniko****. Belliteratura eldonserio, n-ro 3.*
J. Régulo (Stafeto), La Laguna 1955, p. 87-93.

Ferenc Szilágyi

LA PERDITA VELO

Karlo estis iom pli aĝa ol Ester, sed li mem ne estis ankoraŭ tute dekokjara. Li estis blankvizaĝa junulo, ĉi-momente kun papavoj de la pasio sur la vangoj. Karlo kaj Ester hieraŭ gustumis la unuan kison. Tio estis vespere, sed nun estis brila sunlumo kaj la knabino forigis lin:

– Ne-e, ne stultu, Karlo. Iu povus vidi nin. Cetere, kiel vi povas esti nun ĉi tie?

Karlo vane provis iniciati. Li perdis sian viran certecon. Li eksidis kaj turnadis la ĉapon en la mano. Poste li metis ĝin sub la seĝon. Per sia maniko li forviŝis la ŝviton de la frunto. Li ŝvitis tre facile, eĉ kiam li havis nur problemojn.

– Mi nur enkuris. Mi devas enmanigi leteron al la prokuroro. La telefono malfunkcias, kiel kutime. Mi... volis vidi vin por momento.

La knabino rimarkis ombron de ĉagreno sur lia vizaĝo.

– Ka-arlo: Kiam vi finos ĉi-vespere?

– Pli frue ol kutime. Jam je la sesa. Kial?

Liaj bluaj okuloj reekbrilis. La bruna katidino karese, murmure ekludis:

– Mi demandas nur. Eble mi povus eliri ien... ĉe la kverkoj?

– Jes, tuj post la sepa. Ĉu mi nun rajtas vin...?

– Kiel dirite, ĉe la kverkoj, diris kun promesa koketeco la knabino.

– Ĉe la kverkoj do, kolombeto.

Karlo jam devis kuri rapide, feliĉe. Ester kantetis bonhumore. De malproksime muĝis fora tondro – la postsonoj de la ĵusa milito, kies maltrankvilo de tempo al tempo reekflamadis ĉe la limoj.

* * *

Karlo kalkulis la minutojn. La ĉefkelnero estis kelkfoje malmola kaj krudmana. Li devis lerte ŝteli la minutojn. Karlo preterkuris la blankmuran, antikvan preĝejon, la etan boskon ĉe la rokfunda, rapida rivereto. El la proksimaj deklivoj de la duflankaj montoj la vento, kiel vualrubando de melankoliaj tonoj, ŝvebigis la malgajan blekadon de sin paŝtantaj bovoj. Li preterkuris dometojn. La eta urbo estis premata en malvasta valo. La domoj de la longa Granda Strato havis profundajn, mallarĝajn kortojn, komunajn kun la plej proksima dometo. La kortoj gvidis ĝis la bordo de la rivereto, tiel ke en la interna parto de ĉiu longa, mallarĝa korto estis duflanke ankoraŭ po du pluaj dometoj. La domo rigardanta al la strato estis belaspekta, la dua dometo tre modesta, la tria estis nur kabanaĉo jam preskaŭ ĉe la bordo de la rivereto en la proksimo de la porkejo, malpuraĵoj kaj forĵetaĵoj. La elito de la urbo loĝis en la strataj domoj, la ministoj kun siaj

multinfanaj familioj kunpremis sin en la dua vico de la domoj, kaj en la kabanaĉoj de la tria linio, inter kadukaj argilaj muroj, havis sian lokon la mizeruloj, la periferianoj de la urbeta socio, vidvinoj de ministoj, ciganmuzikistoj kaj similaj, kiujn la vivo selektis por la tria vico. Tamen plej ofte loĝis vidvinoj en tiuj kadukaj kabanoj, ĉar la viroj ne vivis longe en la minurbeto.

Karlo hezitis momenton. Li ankoraŭ havas kvin disponeblajn minutojn. Li enkuros al panjo. Precize nur por kvin minutoj.

La patrino de Karlo estas vidvino. Ili loĝas en kortofina domaĉo. La ekonomiaj zorgoj forigas Karlon el la tonon donanta junularo. La urbeto estas trilingva kaj la ŝovinisma propagando floras, kunigas kaj disigas. Sed Karlo estas ekster la rondoj. Li ŝvebas en la maltrankvila mondo, en la kabanaĉo, kvazaŭ en la atmosfero de la printempo. Jam ĉio estos bona. Panjo resaniĝos el sia longdaŭra brustmalsano, kiel oni nomas tie la tuberkulozon. Frateto plenkreskos. Frateto estas lia nevo. Lia fratino malaperis eksterlande, la knabo, "naskita en honto", restis ĉe ili. Karlo iĝas babilema nur, kiam li estas kun la knabo. La kromnomo de Karlo estas "Sanktulo" kun moka akcento. Hieraŭ li kisis knabinon la unuan fojon. Karlo estas pura floro kreskanta ĉe la domofino, proksime al la rubamaso.

* * *

– Ne timu, Panjo. Nenio malbona okazis. Mi nur enkuris survoje. Ĉu nenio mankas al vi?

– Nenio. Kiel vi ŝvitas, Karlo. Vi devas gardi vin bone. Vi kreskas subite.

Ŝi tusetis. Karlo rapide helpis al ŝi. Li faris fajron, kaj jen li jam estis kuranta.

– Vi eĉ ne adiaŭas min, plendis la patrino.

– Mi devas kuregi, kaj mi forte ŝvitas, rekriis Karlo. Vi ricevos duoblan porcion da kisoj vespere.

Je la 11-a li jam estis transdoninta la leteron al la prokuroro. Tiu tralegis ĝin kun marmora mieno kaj rigardante super la knabon li proklamis en la spacon:

– Diru al sinjoro Majoro, ke mi venos baldaŭ.

Survoje al la hotelo, ĉe la parko li vidis Frateton. Karlo devis halti:

– Kio estas, Frateto? Kial vi ploras?

Montriĝis, ke la masto de la velboato, kiun Karlo mem faris al Frateto, rompiĝis.

– Donu al mi la boaton rapide. Mi riparos ĝin poste.

– Nu-un! – ploretis la knabo. Larmoj faris purvojojn sur la malpura vizaĝeto.

– Nun mi devas kuri al la hotelo, diris Karlo senpacience.

* * *

La ĉefkelnero jam atendis lin kun plenblovitaj vangoj:

– Sentaŭgulo, kie vi ŝtelas la tempon? Tuj al la majoro! Li jam demandis!

Dum la raporto de Karlo venis tute nova gasto al la tablo de la majoro – fremda pastro kun militranga distingo sur la kolumo. Karlo fervoris ĉirkaŭ li kun profesia komplezemo. Li servis al li glason da biero:

– Bonvolu pastra moŝto!

La pastro murmuris ion danksimilan kaj per unu gluto eltrinkis la enhavon de la glaso. Li ŝajne ne intencis longe sidi en la restoracio. Li apenaŭ rigardis al Karlo.

Nun proksimiĝis la vera manĝotempo kaj en la vasta, drinkodora manĝejo la gastoj jam kolektiĝis. Karlo ne plu havis tempon pensi pri la diversaj sensacioj de la vivo, ĉefe ne pri la dolĉaj. Por momento li vidis la alvenantan prokuroron, kiu tuj poste malaperis kun la majoro kaj la pastro. En la manĝejo vaporis la forte spicitaj supoj, bulbsukaj viandaĵoj, tintis la glasoj, fumo kaj parolŝiraĵoj miksiĝis kun la odoro de vino, biero kaj brando. Estis manĝotempo kaj la tuta urbo estis kvazaŭ granda moviĝanta, maĉanta makzelo.

* * *

La majoro kaj lia societo prokrastis la manĝon. Li raportis pri gravaj okazaĵoj. La partizanoj nun verŝajne kaŭzis gravan malfacilaĵon. Ili transpaŝis la limon; estis nove deciditaj limoj en la plurnacia regiono, kaj regis konstanta maltrankvilo kaj incidentoj ĉe la novaj limstacioj. La majoro atingis la plej gravan frazon en sia raporto kaj lia akra voĉo nun altiĝis en falseton. Estis kvazaŭ li estus plilongiginta la armilon de sia parolo per iaspeca frazbajoneto:

– La partizanoj atingis nun la najbaran urbon; ĝi estas la unua urbo malantaŭ la limo – li aldonis pro la pastro, pri kies geografiaj konoj li sciis nenion. La distanco de tiu urbo al ni estas ne pli ol 30 kilometroj. Estas grave, ke la publiko ankoraŭ ne eksciu pri la afero. Ni devas eviti panikon kaj eventualan enmiksiĝon de la sabotantoj. La difekto de la telefono estas tre bonvena. Oni devas agi rapide.

* * *

Ĝis nun la urbo vivis indiferente, preskaŭ indiferente, nun, post la unua mondmilito. Ĝuste tiu tago komence ŝajnis pasi tre malrapide. Sed nun, tagmeze, ĉirkaŭ la 1-a horo, en la urbo subite ekkuregis la tempo.

Antaŭ la 1-a horo junaj konspirantoj el la urbo, tie, kie ili kutime kaŝe kunvenis, aŭskultis tre optimisman raporton de ĵus alveninta heroldo. La scenejo de la kunveno estis forlasita ŝakto, bone kaŝita inter la montoj. La najbara urbo falis!

– "Nia" armeo estas marŝopreta malantaŭ la partizanoj – anoncis la heroldo.

La heroldo ne estis tute sobra, li jam trinkis ie kelkajn glasojn je la ĝojo kaj triumfo, kaj nun ĉiuj kuntintigis la glasojn. La kaŝejo estis bone provizita. En la

deko de la ĉeestantoj, reprezentiĝis ĉiuj variantoj de junaj viroj: idealistoj, spekulaciemuloj, strebuloj kaj aliĝemuloj. Ankaŭ ĉi-loke okazis rapida decido: surpriz-atako en la urbeto, forigo de la oficantoj, gvardiŝanĝo, arestadoj kaj liberigoj laŭ politika koloro kaj hontprocesioj de viroj kaj precipe virinoj, kiuj "amikiĝis". Ĉio devas okazi absolute tuj, por ke la Armeo trovu la novan situacion preta kiam ĝi triumfe ekmarŝos. Post tiu ĉi decido ili forlasis la groton kaj kun grandaj esperoj kaj kun iom da angoro ili grimpis malsupren al la ŝoseo. Ĉiuj havis armilojn, plejparte revolverojn. Kiam ili atingis la kaŝlokon de la bicikloj, iom super la ŝoseo, vento kirliĝis kaj el la facila polvo de la altmonta aero elvolviĝis aŭto, singarde spiralante sur la malfacila vojo.

La heroldo metis sian binoklon al la okuloj:

– Rigardu, li kriis. La majoro! Ni venos aŭte urben. Diable bone!

Eĉ por momenta pripenso ne estis tempo. La aŭto jam estis proksime kaj ĝi haltis por momento, aŭ almenaŭ malrapidigis sian movon, ĉar la veturantoj rimarkis ilin. La heroldo, kies vinvaporan cerbon nenio obstaklis, celis per sia pistolo kaj la majoro kolapsis kun ruĝa strio sur la maldekstra vango. La pastro, kiu akompanis la majoron, subite ĵetis sin sur la fundon de la aŭto. Por momento iĝis silento, sed tuj poste la konsternitaj junuloj ekkriegis, kaj kuregis al la aŭto, kaj inter krioj de sensencaĵoj ili kuraĝiĝis. Ili ekprenis la kadavron kaj enŝovis ĝin en la pakaĵujon. Unu el ili tiris la malmolan ĉapelon de la pastro malsupren ĝis lia nazo kaj kriis:

– Nu, sinjoro Arkimandrito, aŭ kiel oni honorigu vin, vi revenos elegante en la urbon.

La stranga procesio de aŭto kaj bicikloj laŭte ekveturis. Ĝi ankoraŭ ne atingis la loĝatajn partojn; nur sciuroj kaj arbaraj birdoj estis iliaj atestantoj. La krutaj, malhelaj montdeklivoj serioze silentis. Homo, krom ili, ne estis videbla. Sed kelkajn kilometrojn antaŭ la urbo, la ŝoseo tribranĉiĝis kaj tie ili ekvidis grandan militistan kolonon, kaj preskaŭ samtempe ankaŭ trajnon, plenŝtopitan per soldatoj. La trajno veturis al la urbo. Estis la armeo de la ŝtato, al kiu la junuloj apartenis nun laŭ la packontrakto. La atendita "nia armeo" estis nenie. Ili estis jam preskaŭ ĉe la fervoja gardodomo, antaŭ ol la trajno alvenis tien. Temis preskaŭ nur pri metroj kaj ili simple troviĝus en muskaptilo. La sola ebleco estis tuj eskapi kaj malaperi en la montaro. Tie oni povas atendi, kaj, se necese, fuĝi iun nokton al la najbara lando.

Tiu renkonto kaj eskapo okazis je la tria horo posttagmeze.

* * *

Je la tria horo posttagmeze Karlo pensis pri la divido de la vespero inter Ester, Frateto kaj Panjo. En la urbo komenciĝis ia nervozeco. Sed neniu sciis ion precizan.

Duonon post la tria la regula soldataro de la lando jam ĉie repremis la

ribelulojn. Samtempe realvenis la korpo de la majoro kun la tremanta, ekscitita, ŝvitoplena pastro. Li estis ruĝa kaj proksima al apopleksio. La junularo de la urbo, kiu plejparte sentis komunecon al la atakintoj, eksentis danĝeron, kaj amaso da junaj viroj malaperis de siaj hejmoj. Ankoraŭ la milito ĉeestis.

Je la kvara kaj duono la militkomitato finis la intertraktojn. La pastro ne povis precize diri, kiomope estis la atencintoj: ili verŝajne estis 30-35 junaj viroj. En la dramaj momentoj liaj okuloj pliobligis la nombron de la grupo.

– Tiom da friponoj ne povas malaperi el la urbo – diris la komandanto.

Je la kvina revenis la elsenditaj patroloj, kiuj trude kolektis la restintan junularon sur la kampoj ĉe la norda montdeklivo. Pli ol cent junuloj staris tie, en la malfrusomera posttagmezo, rigide, time, scivole, senvorte. Inter ili staris Karlo.

* * *

Kvaronon antaŭ la sesa oni ordonis ilin en du vicojn. La oficiroj kaj la pastro alvenis.

– Bonvolu, sinjoro pastro. Se vi rekonas iun, diru afable.

Antaŭ la pastro estis amaso da rigidaj vizaĝoj. Li protestis en si mem, kiel pli frue li protestis jam laŭte. Sed la komandanto havis fortan volon. Malrapide li preteriris la unuan linion. Vizaĝoj, vizaĝoj, vizaĝoj! Kiu povus rekoni iun. En la dua grupo staris Karlo. Kiam la pastro atingis lin, la bluaj okuloj de la knabo ne povis kaŝi iun eklumiĝon, iaspecan komencon de profesia saluto fare de kelnero. La pastro senintence haltis... Li venis en la urbon hodiaŭ. Li konas neniun ĉi tie. Sed tiun ĉi vizaĝon li konas. La komandanto akre observis. Li ne lasis tempon por pensado.

– Vi rekonas lin, ĉu ne?

La pastro balbutis ion protestsimilan. La komandanto kriis:

– Forportu tuj tiun ĉi junulon!

La pastro havis gravajn dubojn, sed la komandanto resumis la situacion: Estas esceptaj leĝoj. Oni devas radike fortranĉi la ribelemon. La knabo estas certe kulpa, kiel preskaŭ ĉiu junulo en la urbo, eĉ se li mem ne faris la atencon. Kaj cetere kiel vi povus rekoni lin, sinjoro pastro?

* * *

Post tio Karlo havis nur minutojn el sia vivo. En la komenco li komprenis nenion kaj dum oni forkondukis lin, li haltis por reordigi sian malnodiĝintan ŝulaĉon. Oni puŝis lin antaŭen. Dum la du lastaj minutoj li estis duonsvena. La bildoj de la vivo kunkuris, vaste kaj tumulte ondadis antaŭ li en kapturna rapido. Lia rigardo apenaŭ perceptis la vastan kampon, la amason, la komandovortojn, lian propran pastron, kies protestvortojn oni krude rifuzis, liajn vortojn al li, la

levitan krucon. Kiam li staris ankoraŭ kun nekovritaj okuloj antaŭ la soldatgrupo, li ekskuis la kapon. Poste li provis liberigi sin de la inkubo per senartikula kriego. Poste estis nenio.

La tempo haltis.

* * *

La fremda pastro fartis malbone. Tuj post la intertraktoj kun la komandanto li veturis al la hotelo, mendis glason da biero por forigi la sekecon de la gorĝo. La ĉefkelnero servis lin. La restoracio estis silenta kiel kripto.

– Mi petas pardonon, pastra moŝto – senkulpigis sin la ĉefkelnero. Mi estas sola. Nia trinkservanto estas arestita.

– Ĉu... ? – la pastro demandis sen intereso.

– Laŭdire li konspiris. Sed mi kredas, ke li estas senkulpa.

La pastro subite eksaltis. Nun, nun li komprenis, kie li estis vidinta la knabon. Sed oni ne kutimas atenti pri la vizaĝo de kelnero. La ĉefkelnero senkomprene rigardis la kurantan pastron. Mekanike li kriis post lin:

– Bonvenon alifoje, pastra moŝto!

* * *

Tuj post la morto de Karlo, okazis io surpriza. Lia korpo ankoraŭ estis varma, la pafinta trupo ankoraŭ ne formarŝis. Tiam tute subite kaj mistere aperis eta figuro ĉe la mortinta korpo; iom pli ol trijara knabeto, kiu ŝovis sin antaŭen inter la hompiedoj kaj antaŭ ol oni povis rimarki tion, li estis jam ĉe la kadavro. El la poŝo de Karlo pendis la angula parto de la velo. Frateto kaj la boato ricevis sangmakulojn.

La komandanto plengorĝe kriegis:

– Forigu de tie la bubaĉon! Kia ordo estas ĉi tie?

Oni forpugnis Frateton kaj forŝiris la sangan velon el liaj manetoj. Kiam du soldatoj portis la knabeton eksteren al la barilpordo de la kampo, ĝuste tiam haltis la aŭto de la pastro tie.

* * *

La tempo haltis kaj staris silenta. Ĝi rigardis la etan, rigidan urbon. Morgaŭ la vivo rekomenciĝos, ĉio reelastiĝos.

* * *

La pastro baraktis dum la tuta nokto, serĉadis, dubis, ribelis. Matene li konsoliĝis: ni estas rimedoj en la mano de ne-elkalkulebla, granda Volo. Li estas humila servisto de tiu Volo.

Jam dum la tago li forlasis la urbeton kaj retrovis siajn labortagojn.

* * *

Sur la lipoj de Ester dum longa tempo brulis la kiso, kiun ŝi rifuzis. La tempo haltis por ŝi. Sed ĝi ekmarŝis denove. Tre longe ĝi ne estis senmova. Post semajnoj la hazardo aperigis al ŝi junan viron, amindan. Eble li iomete similis Karlon. La vera memoro de Karlo restis por la festotagoj.

* * *

Ankaŭ por la patrino la tempo haltis. Sed poste ŝia doloro transiris en pian plezuron. Ŝi estis malsana, kredanta kaj baldaŭ mortonta. Ŝi atendis la renkonton kun sia filo. La tempo ne estis senmova eĉ por ŝi.

* * *

Frateto estis tro malgranda por senti la halton de la tempo. La tempo reekfluis tuj kiel rapida rivereto. Li baldaŭ tute orfiĝis, kaj la jardekoj, en kiuj li vivis, estis tre sovaĝaj. Li iĝis stranga, sin-izola junulo. Li estis lernanto en frizejo, poste dungita barbiro en la urba frizejo. Li estis modesta, afabla kaj obeema.

Sed dum varmega somera tago, tuj antaŭ la sesa posttagmeze, kiam li estis sola kun nekonata, fortvoĉa oficiro, li ekscitiĝis. Li ne sciis kial. Li foriris por momento kaj akrigis la razilon. Reveninte, li diris ne alrigardante la oficiron:

– Kie estas mia velboato? – Kaj li ekdirektis la razilon al la gorĝo de la oficiro.

La nebulo, atingante lian cerbon, hezitigis la manon. Li vundis nur supraĵe la oficiron. Ne estis tre penige bridi lin. Li sekvis trankvile la flegistojn al la frenezulejo, sed kun difuza rigardo li serĉis sian velboaton, kiun la subite vekitaj internaj ondoj komencis senĉese ĵeti tien-reen, kiel malplenan nuksoŝelon sur la surfaco de la malsana animo.

El Koko krias jam! Belliteratura eldonserio, n-ro 4.
J. Régulo (Stafeto), La Laguna 1955, p. 49-62.

Jean Ribillard

PREĜO DE M'SAUD

Dio bona, kiel fervore tiu bastono draŝas mian skeletan spinon! De la opala tagiĝo ĝi superŝutas min per obstina timpanado. Ĉu ĝi prenus mian pelvon por ne rompebla gongo?

Mi ja agnoskas, ke mi estas nur malnova azenaĉo, kiu urĝe bezonas riparon, sed kiu tamen meritus pli da estimo pro longedaŭra servuto. Ĉi matene mi aŭdis viron flustranta pri mizerulo: "Li spertas hundan vivon". Se tiu kreteno scius, kio estas vivo de azeno! Sed venĝemi ne mieligos mian faton. Amiko, samvoju kun mi ĝis la bazaro, kie mia kruela mastro vendos siajn fabetojn... se mi ĝin atingos. Babilante mi forgesos mian nigran sorton. Antaŭ longlonge, dek jaroj eble, mi naskiĝis en la palmaro de Colomb-Bechar, iun koralan aŭroron, inter florplena oleandro kaj bedo el hirtaj kardoj. En tiu vergilia lulilo kaŝesidis duobla aŭguro, kiu sigelis mian destinon.

Mi estis rava hufuleto, la ĝojo de la ĝardeno, la trezoro de mia panjo. Mi rapide admirigis la tutan najbararon, kun fidebla piedo, perlgriza nazo kaj la plej ĉarmaj oreloj, kiujn oni iam vidis. "Vera rozkapeto", asertis la kompetentuloj. Pro tio oni baptnomis min M'saud* . Mi floradis en gracio kaj belo, kiam mortis mia kara patrino, foruzita de malmoderaj traktoj. Tiam ĉesis miaj senzorgaj infanjaroj, kaj mi devis perlabori mian vivofojnon. Ŝarĝite per du vastegaj junkokorboj mi trotetis al la oficira klubo, kie mia mastro ĉiutage liveris siajn frumaturajn legomojn. La edzino de Lia Kolonela Moŝto min vidis. Al ŝi mi plaĉis. Post nur formala marĉando ŝi aĉetis min por rajdigi sian sepjaran filon. Tiel mi eniris en la afrikan armeon.

Dio komplezema, liberigu min de tiu furioza svingilo, kiu sonorile muzikas per miaj senkarnaj koksoj! Ne tiel ofte festu Paskon! Vi senpripense sufloras, ke mi jam suferis pli gravajn turmentojn, ke ĉiuj azenoj en la mondo submetiĝas al la komuna leĝo, ke cetere la determinismo postulas... jes, vi eble pravas; sed mi rebatas, ke mi neniam aprobis tian metodon de edukado. Aliflanke mi petas helpon, ne oracion.

Ne sen nostalgio mi memoras la bonŝancan tempon, kiun mi pasigis kiel rajdazeno. Oni kovris mian lanugan dorson per dika ŝafpelto, kiu ricevis riĉe orbroditan selon el ruĝa felo, surmetis mian kapon per brido kun bantoj kaj kvastoj. Tiel dande ornamita, mi belis, mi lumis, mi gemis... malmulte mankis, ke mi krevu pro orgojlo. Oni konfidis min al giganta kavaleriano araba, same nigra kiel postaĵo de marmito, kiu akompanadis la fileton de la kolonelo dum lia

* Araba nomo, kiu signifas: feliĉa.

ĉiumatena kavalkado. Antaŭ ol eliri el mia stalo mi kutime lunĉis per blonda aveno, freŝa herbo kaj karotoj el Alĝerio.

Ho! tiuj karotoj, karmezinaj, molaj, sukeraj, kies dolĉa suko gutadis el mia festa buŝo, kiujn mi longe maĉadis kaj frandis ĝis krakrompo de mia subventra rimeno! Ili donis al mi tiun brilrufan hararon, tiun fajran rigardon, tiun altfieran mienon, kiuj senprudentigis tiom da junaj azeninoj. Ne stulte strabaĉu, kvazaŭ mi ŝercus. Mi malgaje konfesas, ke mi nun pli taŭge similas al birdtimigilo ol al donĵuano: mia dekstra orelo ĉifone balanciĝas super miaj mukecaj nazkavoj, la alia estas punte tinetrua; hieraŭ mi sputis mian lastan molaron, kaj mi malrekte funkcias pro reŭmatismo. Sed tion ne dubu, amiko, en tiu epoko mi furoris kaj nenombris miajn amsukcesojn.

Kun la infano surdorse, sekvate de la fidela kavaleriano en blanka turbano kaj ruĝa burnuso, mi agrable vagadis tra la palmaro, tra la stratoj, por gajni favorojn kaj karotojn. Ni kune vizitis la amikojn de mia eta princo, kiuj min manflatis, dorlotis, eĉ kisis sur la fruntalo. "Sed kie kuŝas la pasintjaraj neĝoj", kiel susuris la kolonelo karesante sian kalvan verton. Ni iafoje ĝisiris la oficiran klubon, kie la ridhumoraj leŭtenantoj honoris min per bongustaj petolaĵoj. Mi devas aldoni, ke ili pliĝuste ludis per mi ol kun mi.

Iun tagon elektante momentan foreston de la intendanto, pacema majoro, ili enŝteligis min en lian teretaĝan oficejon kaj sidigis min – malfacile verdire – en lian propran brakseĝon. Ili strebe aranĝis miajn antaŭajn krurojn sur lia skribotablo, kaj survestis mian kranion per lia kvargalona kepo. Ŝajnas, ke mi vereme samaspektis kiel iu ajn intendanto. Amuze, ĉu ne? Kiam la bonulo reeniris la ĉambron kaj min ekvidis ĉe sia tablo, surkape portantan lian kepon, li ŝtoniĝis pro surprizo kaj konsterno. Mi naive ridetis. Tuj poste li subite iĝis tute sovaĝa. Li uragane kaptis ĉion, kio trafis en liajn manojn: la paperkorbon, la marokan tabureton, unu paron da botoj ĵuse replandumitaj, unu kvinkilograman vortaregon... kiujn li malice alpafis al mia vizaĝo. Antaŭ ol mi povis eskapi tiun torentan lavangon, mi jam ricevis la duvoluman Napoleon-kodon kaj la gipsan buston de Marŝalo Bugeaud. Renversinte la tablon, la fotelon kaj du-tri etaĝerojn superplenajn de ŝimaj dosieroj, mi saltegis tra la malfermita fenestro, kvazaŭ fuzaĵo el bazuko. Mi rekte impetis al mia hejmeca azilo, kiam tondro ekskuis la atmosferon: estis fluganta skabelo, kiu frakasis la fenestran vitraron. Pri tio mi ankoraŭ rikanas.

Alian fojon, kiam la leŭtenantoj kunsidis en la klubĝardeno por celebri la altigon de unu el ili al la kapitana rango, mi alvenis post promeno kun mia juna rajdanto, kiu elseliĝis kaj domeniris. Mi surloke restis, dum mia gardanto felise moviĝis en la direkto al la bierejo. Enblovis en la spiriton de gajulo min inviti por tosti. Delikata afablaĵo, kiun mi digne prikonsentis. Li plenigis sitelon je ĉampanvino kaj ceremonie enŝovis mian nazon internen. Tio estis bona, malvarmeta, tio tikletis la uvulon. La suno flamis, mi soifis, mi drinkis. Mi elsekigis la sitelon. Mi minute anhelis, kaj tuj flagris oraj steletoj el miaj okuloj.

Oni ovaciis min. Mi deziris riverenci por kvitanci la noblan societon, kaj neatendite min trovis surtere sidantan. Mi restariĝis kaj iom stumblante komencis mazurki ĉirkaŭ la tablo. Oni jam komplimentis min, kiam ĉe dancfiguro alte plaĉa, tamen tre kompleksa, mi ne scias kiel miaj kruroj interplektiĝis, sed mi dervIŝe kirliĝis kaj abrupte falruliĝis sur la gruzon. Ĝustatempe Lia Kolonela Moŝto aperis. Silentis la voĉoj, klakis la kalkanumoj, dum mi singultadis pro ĝojo kaj vigle baraktis por kunordigi miajn ribelajn gambojn.

Doninte, ho Dio bonkora, vi reprenas. Kio do restos al mi, via amanta kreitaĵo? Nur krustopecoj, dornaj herbaĉoj kaj vergoj. Ĉu vi forgesis, ke unu el miaj praavoj kolportis vian filon al Egiptujo? Mi nete imagas la scenon, kvazaŭ mi mem ĝin ĉeestus: sur mia estiminda praulo rajdas Jusef en beduena burnuso, kun flavaj babuŝoj balaantaj la varman sablon, tenante en siaj brakoj Aisa'n la Dian bebon; malantaŭe Mirjam piede laŭiras la spurojn de mia glora parenco, kun sur siaj ŝultroj tornistro da grio, unu kuirpoto kaj la suĉboteleto. Ne miru, fremdula amiko, tiamaniere de la antikvaj tempoj vojaĝas la semidaj familioj. Estas saĝa kutimo. Survoje al la bazaro vi certe renkontos similajn kvaropojn. Sed ni revenu al nia afero.

El la bierejo elŝprucis la kavaleriano. Li min vertikale rektigis, energie elkraĉis eksteren kaj brute forsendis per ardaj piedbatoj sur la gluteojn. Persekutate de tiu rabia pendigindulo, mi ŝtorme travelis la placon ĝis mia akceptema rifuĝejo, kien mi komate disfalis. Mi vekiĝis nur la postmorgaŭon. Mi denove daŭrigis mian oficon, sed neniam plu vizitis la oficiran klubon. Poste la kolonelo forlasis Colomb-Bechar. Sudana negocisto min aĉetis kaj kondukis al Beni-Abbès kun sia dromedara karavano. Mi preskaŭ perdis la vivon dum tiu danteska ekskurso, tiom pro la ekscesa varmo, kiu ŝancelis bestojn kaj homojn, kiom pro pezega ŝarĝo el kontrabandaĵoj, kiu mueladis mian ŝvelmolan lumbon. Oni lokis min inter du malfrivolaj dromedaroj. Per ĉirkaŭkolo oni ligis min al la antaŭa, kiu tirane haŭlis min, dum la malantaŭa, pro senila monomanio, pasie provadis sin paŝti el la haroj de mia postaĵo. Sufokate per la streĉita ŝnuro, kiu draste segadis miajn vertebrojn, ĝisfele tondate per senbreĉa dentaro, ne povante halti eĉ por pisi, mi travivis hororan terursonĝon. Mi tiele inaŭguris mizeran ekziston, kiun de tiam mi senespere trenas.

Mi ne rakontos al vi, kiom da profesioj mi poste plenumis: plugisto en Beni-Abbès, migranta komercisto en la Saŭravalo, akvoportisto en Ksabi... kiom da turmentoj mi ĉie eltenis: bastonadoj, malsato, skabio, sunfrapoj, tabanoj... la plej bonajn mi preferas prisilenti. Mi, kiu estis ĉiumatene striglita, brosita, polurita, kun jasmenfloro ĉe la brido kaj kombita vosto – vidu tiun necesejan balaileton, kiun mi nun publike montras – mi rapide velkiĝis pro hontinda neglekto.

Kio vi fariĝis, Rozkapeto?

Plie tre ĉagrenas min tiuj kalumniaj klaĉoj, kiuj tralande kuras pri miaj mensaj kapabloj. Kiam malklera lernanto ne scias solvi matematikan problemon, la

instruisto nomas lin azeno kaj kapvestas per paperĉapo kun du longaj konusoj. Kiam malĝentila homo ne plu povas argumenti al idioto, li azenumas lin. Ĉar li malŝatis la liron de Apolono, tiu ŝtipula Reĝo Midaso estis kronita per azenoreloj kaj lia barbiro lin perfidis. Meritite! Por kompenso, memoru, ke Ŝimŝon senpene buĉis mil filistrojn per ununura makzelo de azeno. Oni opinias malharmonia mian blekon. Ne tia mi ĝin taksas. Unu monduman vesperon ĉe la kolonelo mi aŭdis virinon, brunan kaj vastakorpan, plengorĝe kanti plurajn melodiojn. Mi asertas al vi, amiko mia, ke ŝi teruris la tutan kvartalon, kaj ke, se mi estus ne firme piedligita al solida krado, mi panike forgalopus ĝis Arabio. Al mi la knaboj ĵetas ŝtonojn, al ŝi la kolonelo oferis florojn kaj ĉokoladon. Mi blekas ne pro plezuro, sed iafoje, dum la plenlunaj noktoj por amvoki pin-up-inon gracitalian kaj velurhaŭtan; ankaŭ plejofte por prikrii al la siroko la mizeron kaj malesperon, kiuj torturas mian genton de kiam ŝipkapitano Noa ĝin forregalis el sia arkeo. "Ofte kantas la buŝo, kiam ploras la koro", skribis via profeto Zamenhof. Ĉar mi denaske estas pacema kaj sendefenda, tial ĉiu disverŝas sur min sian koleron, sian malsaĝon, sian malicon. Dio justa, kiu dormetas sur via reakcinubo, estingu, mi petas, tiun ofendan fifamon, kiu venenas miajn siestojn.

Promesite? Dankon.

La lastan jaron mi servis en la franca administracio malgraŭ tiu aĉa intendanto, kiun vi jam konas. Jes, mi estis oficiala kuriero. Ĉiun duan semajnon de Beni-Abbès al la militista posteno de Timudi mi alportis leterojn, gazetojn, pakaĵojn rekomenditajn aŭ ne. Mia nova estro estis kadukulo preskaŭ tiel ŝrumpinta kaj pigra kiel mi. Bela paro! Ni kune lante vojiris sub la senkompata suno, ĉi tie gapante al timida gazelo, tie paŭzante ĉe seka gumarbo. Kial hasti? Ni estis du ŝtatfunkciistoj. Ĉiam kore akceptis nin la soldatoj, same kiel atendatajn gastojn. Ekde la alveno li vizitis la kuirejon, el kie flirtis apetitvoka odoro de frikasaĵo. Miaflanke mi festenis per hordeo, pankrustoj, terpomaj ŝelaĵoj, eĉ sukerpecoj. Post beata ripozo ni ekreiris al Beni-Abbès ĉe karbunkola krepusko, kiu gradete nin sorbadis en sian ametistan apoteozon.

Antaŭ du monatoj la soldatoj transloĝiĝis en Adrar. Mi nuntempe ŝvitas profite al krudaĉa kampisto de Guerzim, kiu pli volonte pagas per branĉo el tamariko ol per plado de sabelikoj. Aliparte la tiea klimato ne konvenas al mia senmedola ostaro. La oazo estas tro varma. Oni konfidencis al mi, ke de la bovino de la kaido oni eltiras ne lakton, sed jahurton. Tion ne ripetu. Tio sabotus miajn rilatojn kun la kaido, kiu estas ne tre sprita, kaj kiun mi bezonas por propono al pensio. Ve, ŝajnas, ke la afero ne brulas!

De la vivo mi nenion plu atendas, krom la tutmonda pereo, nome mia propra morto, kiu nepre baldaŭ okazos, se mi prokrastas dietsezonon en Vichy. Nur trio da ŝakaloj povos semajnfine pikniki per mia fibroza viando, kaj per mia felo jam delonge batata oni faros bonkvalitan tamtamon, kiu tra la dunoj rulsonos dum la ramadanaj vesperoj. Amen!

Dio ĉiopova, indulgu vian lacan sklavon. Kompatu al lia vundita nuko, al liaj ŝiritaj hufoj, al tiu trivita hararo, kiu iam pekigis la virgulinetojn. Helpu al li sendolore enŝoviĝi en vian zoologian edenon. Tie en la ombro de foliriĉa figarbo, inter karotĝardeno kaj luzernkampo, tuj apud fontano de ĉampanvino, li poreterne laŭdos vin. Nur permesu, ke fojfoje li retrovu tiun ĉarman koketulinon, kiu tiel plaĉis al li en la palmaro, la tagon de la nacia festo, kaj M'saud plene ĝuos vian ĉielon.

Sed filozofi ne satigas stomakon. Jen la bazaro, kie mi forskuos tiun malbenitan sakon da fabetoj. Nu kara amiko, ĝis morgaŭ.

Alportu verdan skarolon!

El Vagado sub palmoj. Universala Esperanto-Asocio, Roterdamo 1956, p. 38-44.

Johan Hammond Rosbach

LA JAPANA TETASARO

Avinjo komencis fariĝi tre maljuna. Ŝi estis vidvino jam pli ol kvardek jarojn, kaj post la morto de sia edzo restis loĝanta en la domo ĉe sia plej aĝa filo kaj ties familio. Tie estis ŝia hejmo. Kaj ŝi ne povis imagi alian hejmon.

Ŝi apartenis al la familio. Ŝi manĝis kun la familio. Sed ŝi havis ĉambron, kiu estis ŝia kaj nur ŝia. Kelkfoje ŝi kondukis siajn genepojn en sian ĉambron kaj montris al ili malnovajn objektojn, kiuj estis ege valoraj por ŝi, kaj en la fantazio de la infanoj estis eĉ pli valoraj. Tial ankaŭ ofte okazas, ke la infanoj frapas ŝian pordon. Sed avinjo ne ĉiam malfermas. Ne estas ĉiam konvene.

La infanoj ŝategis veni en ŝian ĉambron. Kvankam gajaj kaj bruemaj – kiel ĉiuj sanaj infanoj – ili eksilentis sur la sojlo al ŝia ĉambro, sentante la solenon, kiu elradiis el la malnovaj objektoj kaj la malmodernaj pluŝmebloj. Sur la lito estis kroĉtrikita kovrilo kun artaj floroj en la desegnaĵo, ĉar avinjo apartenis al la epoko, kiam la virinoj ankoraŭ havis tempon eĉ por kroĉtrikado. En neniu alia dormoĉambro la infanoj vidis similan litkovrilon. Kaj super la lito pendis en kadro tuko kun la vortoj "Dio estas amo". Avinjo estis mem brodinta tion per flava silkfadeno!

Sed la plej alloga objekto en la ĉambro estis la ŝranko de avinjo, tiu malnova meblo kun du malgrandegaj kaj du pli grandaj pordetoj kaj du tirkestoj, kaj kun pintigita lignoskulptaĵo sur la plejsupro, tiel ke la supra etaĝo de la meblo donis piramidsimilan impreson. En tiu ŝrankmeblo avinjo konservis siajn trezorojn, sian arĝentan manĝilaron, siajn silkotukojn, siajn bildojn, strangajn malnovajn fotografaĵojn, flavebrunajn, kaj sur dika kartono, bildojn de virinoj kaj viroj en strangaj vestaĵoj. Kelkaj el la bildoj montris avinjon kiel junan knabinon, sed la infanoj povis neniel imagi, ke la persono sur la bildoj estas juna knabino, ĉar ŝi aspektis minimume kvindekjara en tiuj malpraktikaj vestaĵoj. Sur unu bildo ŝi aperis en vasta jupo kaj solida bluzo – kaj avinjo diris, ke tio estis ŝia naĝkostumo, sed la infanoj nur demandis ĉu ŝi ne senvestigis sin antaŭ ol sin bani.

Iam avinjo montris al la infanoj sian tetasaron. Ĝi estis donaco, kiun ŝi ricevis por sia konfirmacio – antaŭ sepdek jaroj! Ŝia patro, kiu estis ŝipestro, mem aĉetis ĝin en Yokohama. Kaj la okuloj de avinjo ne rigardis la infanojn, nek la tasojn, nek ion en la ĉambro, kiam ŝi rakontis pri la tasaro. Estis kvazaŭ ŝi rigardus tra la muron kaj tra ĉion.

Post tio la infanoj pli ofte frapis ŝian pordon, kaj ĉiam ili nur volis vidi la tetasaron. La litkovrilo kaj la enkadrigitaj bibliaj paroloj ne plu interesis, nek la silkotukoj kun surpentritaj fazanoj multkoloraj. Nur la tetasaron ili volis vidi.

Kaj avinjo ĉiam, aŭ preskaŭ ĉiam, pacience iris al la ŝrankmeblo kaj metis singarde la maldikegajn tasojn kaj subtasojn sur la tablon. Brile blankaj la tasoj estis interne, sed ekstere ili havis belegajn kolorojn, ĉe la supra rando larĝetan flavecan bordon, sub kiu prezentiĝis diversaj figuroj en helaj sed okulfrapaj koloroj, figuroj, kiujn admiris multaj homoj dum sepdek jaroj, figuroj, kiuj jen aktivigis ankaŭ la fantazion de la infanoj.

Tre singarde avinjo metis la tintetantajn tasojn sur la tablon. La infanoj rigardis la tasojn kaj rigardis sian maljunan avinon, kiu pacience tien kaj reen iris, portante siajn trezorojn de la ŝranko al la tablo por ĝojigi la genepojn. Brilokule ili admiris la belegajn tasojn.

"Rakontu pri la tasoj, avinjo!"

Kaj avinjo rakontis, rakontis. La okuloj de la infanoj glitis de la tasoj al la maljunulino, kies okuloj fariĝis tiel strange senesprimaj, malproksimaj, revantaj. La infanoj kun miro rigardis sian avinon, kiun ili preskaŭ ne povis rekoni, tiom ŝanĝiĝis ŝia vizaĝesprimo. Tio estis vera aventuro al la infanoj: la valoregaj tasoj, la interesaj rakontoj, la strangiĝanta avinjo!

Tra la duonfermita pordo la patrino de la infanoj rigardis la scenon, rigardis la bopatrinon, kiu retravivis malnovajn tempojn, rigardis siajn infanojn, kiuj ŝajnis aŭskulti per oreloj, okuloj kaj buŝo. La tuta sceno amuzetis ŝin, komence ŝi estis feliĉa pro ĝi, sed ĉar ĝi pli kaj pli ofte ripetiĝis, ĝi komencis iomete inciti ŝin, kaj ŝia rideto jam ne estis rideto pro amuza feliĉo, sed pro indulgeca ironio kaj incito.

La maljunulino ĉesigis la rakontadon, kaj la infanoj silente eliris el ŝia ĉambro. Transirinte la sojlon ili tuj refariĝis bruaj, vivplenaj infanoj, jam forgesinte pri la soleno de la trezorejo.

Sed avinjo ne aŭdis ilin. Ŝi restis sidanta ĉe sia tablo. La tetasaro estis same sendifekta kiel la tagon de ŝia konfirmacio, kiam ĝi vekis ĉies atenton kaj admiron pro sia eksterordinara beleco, kaj pro tio, ke neniu havis ion similan. Eĉ ne malgranda peceto derompiĝis, kvankam la tasoj estis tre ofte uzitaj...

Kaj avinjo prenis unu el la tasoj en la manon, kvazaŭ ĝuante ĝian preskaŭan mankon de pezo. Preskaŭ diafanaj estis la tasoj, tiom ili estis maldikaj.

Ŝi memoris, kiel amikoj enviis ŝin pro la belega tetasaro; ŝi memorigis al si la unuan fojon, kiam la juna leŭtenanto venis en ilian hejmon.

"Ĉu vere japana arto?" li demandis. Kaj ĉiuj rigardis lin, la belan altstaturan junan oficiron. Kun fiero ŝi povis tiam aserti al li, ke la tasaro vere estas japana artaĵo, kaj ke ŝia patro aĉetis ĝin speciale por ŝi en Yokohama. Kaj la okuloj de la leŭtenanto leviĝis de la taso al ŝiaj okuloj, kaj dum ono da sekundo multo okazis inter la du okulparoj. La leŭtenanto fariĝis ŝia edzo, kaj ilia hejmo estis kvazaŭ birdeta nesto pro feliĉego. La tetasaro estis tiam ofte uzata. Multaj geamikoj vizitis la feliĉan hejmon.

Avinjo povis kvazaŭ vidi la geamikojn, kvazaŭ aŭdi la gajan ridon, kvazaŭ rekoni voĉojn de homoj jam longe mortintaj. Ŝiaj okuloj vidis tra la muron, tra

ĉion. Tiujn tasojn tuŝis tiom da karaj manoj, el tiuj tasoj trinkis la lipoj de ŝia edzo, kiu lasis ŝin tro juna vidvino.

Ŝi ne sciis mem, kiel longe ŝi tiel sidis, ne rimarkinte la foriron de la infanoj. Ilian bruon ŝi ne estis aŭdinta, nek la konversacion inter ilia patrino kaj ilia patro, kiu estis hejmen veninta. Sed mallaŭte diritaj vortoj ŝiris la pasintecon, mallaŭtaj vortoj, kiujn diris ŝia bofilino al ŝia filo.

"Avinjo ŝajnas ne plu esti tute prudenta."

Malgraŭ la mallaŭteco ŝi aŭdis. Disfalis la feliĉa pasinteco, malaperis la edzo, la gajaj amikoj. Kvazaŭ frapita avinjo ankoraŭ kelkajn minutojn senmove sidis ĉe sia tablo. Poste ŝi singarde remetis la tasojn en la ŝrankon, kaj senvorte iris por tagmanĝi kun la familio kiel kutime.

La postan tagon la feliĉa infanaro ree frapis ŝian pordon.

Neniu respondis.

El Homoj kaj riveroj. Eldonejo Koko, Kopenhago 1957, p. 59-62.

John Francis

ĜERMOJ EN RIKOLTO

Estis tri homoj en la parcelo. La viro ruĝvizaĝa sub la plensomera suno falĉadis fojnon kun la ritma malrapido de spertulo, dum la du knaboj, kiuj havis po ok ĝis dek jaroj, ludis en la stoplo, kaj de tempo al tempo faris demandojn pri greno, fiŝkaptado, ŝtormoj kaj insulaj legendoj. Al ĉiu demando venis respondo bonhumora kaj nepra, kiel konvenas de homo, kiu scias ĉion, kiel ankaŭ de homo, kiu ne tro ĝenas sin pri pedanta pravo en ĉiu detalo.

"Onklo Niĉjo, ĉu estas vere pri marvirinoj?", demandis la pli malgranda el la knaboj. "Onklino minacis, ke se ni naĝos ĉe la Kiljasa Sablo, la marvirinoj kaptos nin. Ĉu vere?" Lia mieno estis naive scivola; sed lia kunulo subridis kun malestima gesteto.

"Ta, ŝi celas fortimigi nin de naĝo", li diris mallaŭte por ke la onklo ne aŭdu. Dume tiu respondis:

"Jes, jes, Kol, la marvirinoj estas veraj. Ho jes! Sciu: en la Ruĝa Maro ili svarmas, kaj ĉe Kiljasa Sablo – nu, jes, en mia junaĝo multaj knaboj malaperis tie. Jes, pluraj". Lia parolo forte kontrastis kun la monotona urba tirprononco de la knaboj; ĝi estis la melodia parolo de la okcidenta gaelo: eble la sola homo, kiu garnas la anglan eĉ pli muzike ol lia irlanda kuzo.

"Sed la maristoj diras, ke ili estas belaj", protestis la pli granda knabo kun singarda kritikemo, ĉar li jam primokis la miton, kaj ne volis lasi sin pruvi tute malprava antaŭ sia pli juna kunulo nur pro ĝentilo al la onklo.

"Nu jes, belaj ili ja estas".

"Kaj nur sidas sur rokoj kombante la harojn", daŭrigis la juna skeptikulo jam pli memfide.

"Jes, ili havas tre longajn harojn, longegajn harojn, kaj sidas sur rokoj kombante ilin per konkaj kombiloj".

"Sed onklino diras, ke ili venas el la ondoj ĉi tiel", diris Kol levante la manojn unge kun timiga esprimo.

"Ĝuste", aldonis lia kunulo rapide, "kaj formanĝas infanojn. Ĉu la belaj marvirinoj tiel kondutus?", li demandis kun triumfa rigardo al Kol.

"Ho, jes, ankaŭ tiel ili kondutas", respondis la onklo kun seninterrompa sereno. "Vidu, knaboj: ekzistas marvirinoj diversspecaj. Cetere, ilia belo estas belo fatala". Li aldonis la pli kontentigan solvon, kvazaŭ ĝi estus natura komplemento de la antaŭa, ne ĵusa inspiro.

"Jano diras, ke tute ne ekzistas marvirinoj, kaj ke onklino nur provas timigi nin, kaj ke estas sensencaĵo pri marvirinoj", malkaŝis Kol spitante la avertajn grimacojn de la perfidito.

"Nu, nu. Ĉu vere? Jes, jes. Ĉu?"

Jano mallevis la okulojn sercante eliron el sia embaraso ĉe fojnero, kies tigon li senpense tiris inter la maldekstrajn poleksan ungon kaj kurbigitan montrofingron, tiel forŝire kolektante la spikojn en faskon, kiu momente ŝajnis kreski el lia fingro antaŭ ol ŝutiĝi teren.

"Onklo Niĉjo, se mi semus tiun ĉi spikon, ĉu ĝi kreskus en fojnon venontjare?", li demandis.

"Nu, nu, Jano, estus iom frue semi; sed tio ja estas la semo: el tio la fojno finfine kreskus. Sekve, knaboj, ni rajtas diri, ke en tiu ĉi rikolto ni kolektas ankaŭ la semojn de la venontjara; ke en ĉiu rikolto kuŝas la ĝermoj de la venonta. Jes, jes, efektive!" Kiel ĉiuj gaeloj Nialo amis filozofumi, ĉiam preferante sonoran senenhavon al nuda kerneco, sed en la nuna kazo li sentis, ke li trafis ion pli profundan ol belan parolturnon, kaj li ripetis la frazon kun ioma fiero, ĝue provante sonojn kaj efekton, kaj eblojn de plua polurado. "Jes, en ĉiu rikolto kuŝas la ĝermoj de la venonta; ĉiu rikolto tenas ankaŭ ĝermojn".

Dum iom da tempo regadis silento. Nialo mense dorlotadis sian penson per aldonoj, polurado kaj rearanĝo por kiel eble plej ekspluati ĝin; Kol jam okupis sin per nova distro, ĉaspikante strangan insekton inter la stoplo per fojnero, dum Jano estis kontenta pri tio, ke li sukcesis fortiri la komunan atenton for de siaj herezaj onklin-mokantaj asertoj pri marvirinoj. Poste la demandoj rekomenciĝis, kaj Nialo respondadis kun antaŭaj senhezito kaj bonhumoro, senĝene flikante sciomankojn per riĉa fantazio kaj kelta blago, dume falĉante kun aŭtomata persisto.

Subite: "Jen rano!" ekkriis Kol, kaj ambaŭ knaboj kuris al la parcelorando, kie bufo ĵus elsaltis la fojnon, ŝajne por eskapi la proksimiĝantan falĉilon, kaj jam saltetis al la preskaŭ senakva foseto, kiu borderis la kampon.

Atinginte la malbelan besteton, ili staris antaŭ ĝi iom necerte, kaj komence kontentis malhelpi ĝian fuĝon en la foseton per prezento de rastil-tenilo, ĉar ili hezitis tuŝi la molaĉan haŭton; sed fine Jano tuŝetis unu flankon per montrofingro, kaj poste la alian per polekso, ĝis li kutimiĝis al la kontakto, kaj eklevis la kaptiton. La vibrado de la malseka ventro kontraŭ lia polmo naŭzis lin, sed ankaŭ al tio li kutimiĝis, kaj kun fiera aplombo ekkaresis la verukan dorson dume proponante la novan kamaradon al Kol kun komplezaj kuraĝigoj kaj konsiloj pri ekteno.

Kol etendis dubeman fingron, sed tuŝinte la beston rezignis plian intimiĝon, kaj por eviti la nun insistajn kaj mokajn invitojn de sia pli kuraĝa kunulo, ekdemandis la onklon pri ranoj.

Notante, ke temas pri simpatia sinteno, la viro volonte priskribis la virtan vivon de la rano, aldonante ke li kiel knabo ĉiam havis ranon anstataŭ, kiel nun, hundon. La knaboj ja sciis pri liaj hundoj: Fido, Karlo, Nobelo, Fido – eterna serio en kiu la nuna Karlo estas nura ero – kaj facile kredis lian pretendon, kiu bone akordiĝis kun ŝatataj rakontoj en kiuj knaboj ĉiam portas en la poŝo ranon kun aliaj trezoroj. Tamen –

"Ĝi estas iom bruna, kaj ja portas verukojn. Ĉu rano ne devus esti verda kaj glata? Eble ĝi estas bufo", sugestis Jano dubeme.

"Ne!", diris Kol, kiu ne ŝatis bufojn.

"Ne", ripetis la onklo. "Ho ne, Jano. Ne, ne. La haŭto estas iom seka. Nur tial".

"Nu, ĝi ja saltetis; kaj bufoj nur krablas, ĉu ne?" Jano jam ekcedis.

"Jes, jes, nur krablas kompreneble. La bufo nur krablas, knaboj, ĉar ĝi estas tiel ventra, tiel pufa, kun venena skvama haŭto, kiu eterne ŝlimas. Cetere ĝi estas danĝera, ĉar ĝi elkraĉas fajrolangon", li aldonis kuraĝigite de la mirplenaj esprimoj de la knaboj. "Jes, kaj venenas la akvon kontraŭ la bovoj".

"Ĉu ĝi mordas?", demandis Kol.

"Jes, jes, ĝi mordas. Ĝi ne nur mordas, Kol, sed ankaŭ enkraĉas fajron en la vundon. Ho, la rano estas nobla besto kompare kun la bufo, knaboj, kaj tre inteligenta, tre inteligenta".

Sekvis rakontoj ilustraj pri la inteligento kaj dreseblo de la rano, kiuj distris la knabojn ĝis la falĉado finiĝis. Tiam:

"Nu, knaboj, mi estas soifega, kaj devos iri al la hotelo por trinketo; ĉar estas tre strange: nur la biero povas satigi soifon tian, kian mi nun suferas. Tion mi trovis; tion mi trovis. Do, iru vi al la marbordo, ĉar mi ne volas, ke vi ludu apud la falĉilo. Jen Dol Rua kaj la aliaj iras al la bordo nun".

Efektive, kvar el la vilaĝaj knaboj samaĝaj kiel Kol kaj Jano iris laŭ la vojo, kiu preteris la parcelon malsupren al la marbordo, kaj jam mansvingis al la du urbeganoj, ke ili venu akompane. Do ĝisinte la onklon, la du kuzoj alkuris la grupon, kiu nun staris atendante.

"Kie vi kaŝis vin, Kol? Ni ne vidis vin dum la lasta semajno", salutis la plej granda el la knaboj, kiu nomiĝis Dol Rua (Ruĝa Donĉjo) malgraŭ la flavaj haroj, ĉar la kromnomo vere priskribis lian nun mortan patron, kaj aplikiĝis al li nur kiel mallongigo de "filo de Dol Rua". "Nu, Jano, hejmen denove?", li bonvenis Janon laŭ la insulana formulo por ĉiuj feriantoj, kiuj iel devenis de la insulo.

"Jes", respondis Jano retireme, ĉar la kvieta ĝentilo de la iom pli aĝa knabo ĉiam imponis lin. "Mi alvenis hieraŭ, kaj restos monaton".

"Jes, jes, kompreneble. Bone, bone! Kaj kion vi portas tie, Jano?" Li emfazis la propran nomon laŭ la maniero de gaelo parolanta la anglan.

"Ĝi estas rano. Mi ŝatas ranojn; ranoj estas bonaj", respondis Jano rapide, ĉar li konis la morojn de la vilaĝaj knaboj rilate kaptitajn bestojn.

"Rano, kompreneble! Kie – – ", komencis Dol Rua.

"Rano, bastardo", siblis gnomaspekta knabo kun nigraj brovoj. "Mortigu ĝin!"

"Ne!", protestis Jano.

"Ne", konfirmis Dol Rua. "Lasu tion, Erĉi! La rano apartenas al Jano. Lasu ĝin trankvila".

Dum la grupo plueniris al marbordo Jano klarigis pri la utilo kaj virtoj de la *Rana temporaria* al Dol Rua, parte citante la malpli fantaziajn pretendojn de sia onklo, parte relative fidindajn fontojn; ĉar li ne atendis daŭran toleremon de la knaboj, kaj deziris, ke la potenca protekto de Dol Rua fontu el konvinko pozitiva. Kol promenis antaŭe kun la aliaj knaboj, al kiuj li emis paroli gaele, ĉar kvankam li estis urbegano, tamen li restis en gaela etoso grandan parton el la jaro, kaj fieris pri sia lingvokono precipe antaŭ sia kuzo Jano. La aliaj knaboj volonte respondis lin per la por ili natura lingvo, sed Dol Rua interrompis ĉiun ekprovon per rilata diro anglalingva kompleze al la filistra Jano, kaj la aliaj fine akceptis la averton nediritan.

Ili jam proksimiĝis al la marbordaj rokegoj, kiam Alan, plej juna el la vilaĝanoj, ekkriis: "Jen Wili Pek!", kaj ili rimarkis, ke alkuras ilin knabo, kies hirtaj flavaj haretoj kontrastas kun la ruĝo de rikananta vizaĝo. Erĉi, Alan kaj la kvara vilaĝano, Rori, tuj eklevis ŝtonojn kaj ekĵetis kontraŭ la alvenanto por malpersvadi pluan proksimiĝon. Wili Pek haltis kaj grimacante demandis, kial li ne venu kun ili, kien ili iras, k. t. p., interdemande insultante pro la apudo de la ĵetitaj ŝtonoj, ĝis fine unu el tiuj trafis rekte en lian vizaĝon, kaj li falis surdorsen ŝirkriante.

Momenta ektimo silentigis la knabojn, sed rimarkante, ke la trafito estas nek morta, nek senkonscia, ili ekgratulis la celtrafinton, Erĉi, kaj ridegis pro la komika aspekto, kiun nun havis la vizaĝo de Wili Pek pro larmostrioj, ŝmirita sango kaj plorgrimacoj.

"Bone celite, Erĉi! Kriste, li mungegis post tiu ĵeto! Pafo kaj trafo rekte sur beko!" Kol gratulis la fieran Erĉi, kiu jam rekomencis ĵeti ŝtonojn post la forkurantan idioton.

Atinginte la rokegojn ĉe la marbordo la knaboj distris sin serĉante marbestetojn, kiujn lasas la tajdo en roktruaj lagetoj. Kol kaj Alan forbatis moluskojn de la rokoj, kaj fiksinte ilin senkonkaj al ŝnuretaj finoj pezigitaj de ŝtonetoj, ili ĵetis la tentaĵojn en la maron, pendigante ilin per la ŝnuretoj tiel, ke ili tuŝis la supron de la marfunda algego, sed ne profundiĝis en tion. Postnelonge krabo aperis el la algego kaj krablinte sur frondoj al unu el la moluskoj, ekkaptis tiun per ambaŭ pinĉiloj, ne forlasante ĝin kiam Kol, kiu tenis la alian finon de la ŝnureto, tiradis ĝin supren. Kiam la krustulo atingis la akvosurfacon, la knabo ektiris pli zorge sciante, ke la viktimo ofte rifuzas lasi la preferatan sferon, kaj reenfalas la maron. Tamen, ĉifoje la afero iris glate, kaj Kol kaptinte la krabon ĉe la flankoj super la kruroj, ĵetis ĝin en oportunan akvoplenan truon. Dum la sekvinta duonhoro ili kaptis seson da kraboj tiel. Neniu el la kaptitoj apartenis al la granda, ruĝa manĝebla speco; sed estis bela distro kapti, kaj de-pistinte la pinĉilojn per ŝtonoj, lasi la krabojn kroĉiĝi al la mano kaj brako per la ungaj piedoj.

Erĉi venis al Jano tenante angileton en la mano kun la kapo inter la poleksa ungo kaj la kurbigita montrofingro. "Angilo", li diris, rigardante la vizaĝon de

Jano per ruzaj okuloj, "bastardo!", kaj lia poleksa ungo premegis la maldikan nukon tiel, ke la buŝeto gapegis kaj la okuloj tute elstaris el la kapo.

Jano ŝajnigis indiferenton. "Ĉu vi ne povas trovi pli grandan?", li demandis.

Erĉi faligis la angileton.

"Ĵetu la ranon en la maron", li diris malice. "Ni vidu kiom longe ĝi naĝos en la ondoj".

"Jes", subtenis Rori, kiu aŭskultis ilin de malgranda distanco.

"Ne", kontraŭis Jano, "sala akvo ne konvenas al rano".

La aliaj knaboj, jam enuaj pri kaptado de bagateloj, proksimiĝis.

"Kion ni faros?", demandis Kol.

"Ni naĝigos la ranon en la maro", respondis Erĉi rigardante Janon.

"Ni ne!", tiu obstinis.

"Kie estas Dol Rua?", iu demandis.

"Ni fiŝkaptu mevojn", alia proponis. "Mi alportos panpecojn; iu alportu vergojn kaj ŝnurojn".

"Jes, bone".

"Tiu estas stulta ludo", protestis Jano, kiu jam vidis mevojn sin tordantajn, kiel kajtojn ĉe la fino de fiŝkaptaj ŝnuretoj, kun hokoj en gorĝoj.

Dol Rua venis: "Pri kio temas?"

"Jano Kerr deziras fari nenion", rikanis Erĉi.

"Oni deziras mortigi mian ranon", Jano akuzis.

"Tute ne".

"Nu, kiel?"

"Ni deziras naĝigi ĝin. Jen ĉio, Dol".

"Ili deziris ĵeti ĝin en la maron; en la ondojn. Ranoj ne kutimas al ondoj – kiel vi ja scias, Dol".

Dol Rua rigardis lin per afablaj okuloj. "Nu, kompreneble ne, Jano; sed la knaboj nur deziras vidi ĝin naĝanta. Do, ni iru al iu golfeto, kie la akvo estas glata, ĉu ne?"

"Nu-u, bone", Jano kompromisis, timante mokon.

La rokegojn entranĉis multaj fjordetoj, kies konverĝa streto akumule koncentrigis la atlantikan hulon en eksplodontajn masojn, kiam la onddirekto ortis la bordon; sed nun ĝi preskaŭ paralelis, kaj cetere rapida tajda fluo inter la insulo kaj najbara insuleto glatigis la ondojn apudbordajn tiel, ke la akvo en la golfetoj apenaŭ agitiĝis. La knaboj nun iris al la enlanda fino de unu el tiuj golfetoj, kie la sinuoj jam ŝirmas la surfacon ĝis vitrina plato, krom kiam muara vento balaas ĝin. Klare videblis sube la densa fuko kurbiĝanta, kiel ledaj rimenegoj.

"Enĵetu ĝin!" ordonis Erĉi.

Jano krable iris al la akvorando, kaj ripetante malfortproteste "La sala akvo ne konvenos al ĝi", enmetis la bufon kun puŝeto. La amfibio tuj ekcelis entuziasme la kontraŭan bordon per senmanka brustnaĝado, kaj la knaboj rigardis ĝin silente, trafite de tiu nebesta irmaniero.

"Oni diras, ke la rano instruis la homaron, kiel naĝi", diris Dol Rua postiome, kaj rigardante la perfektajn movojn de la bufaj kruroj Jano povis facile imagi tion. La rano ja montriĝas simila al homo, kiam ĝi streĉiĝas dum naĝo; sed al tre maljuna homo; do ĝi estas ja la instruinto, ne la instruito, sed ankaŭ pli ol instruinto: maljunega, antikva, praa – kiel oni nomas provaeroplanon – jes, prototipo. La mensfadenoj de Jano flirtis ĉe la nigroj de memoro kaj konscio.

"Mia patro diras, ke ni ĉiuj devenas de 'velura, kaŭra, tremuleto'", li diris.

"Kia sensencaĵo!" miris Rori dum la aliaj ridis.

Ŝtono plaŭdis apud la kapo de la bufo, kaj Dol Rua turnis sin kolere al Erĉi.

"Lasu tion", li siblis, "se vi ne deziras mergiĝi".

"Se la rano atingos la kontraŭan bordon, mi premios ĝin per liberigo", anoncis Jano rapide.

"Jes, jes, Jano! Bone", subtenis Dol Rua, "kaj neniu rajtos tuŝi ĝin".

Sed jam evidentis, ke ne necesos timi la kapricojn de la knaboj, ĉar escepte de Erĉi ili nun kuraĝigas la naĝanton atingi la celon. La bufo akiris por si personecon, kaj sekve ilian simpation; ili subite vidas ĝin, kiel kamaradon kun vivmotivo, ne nur interesan torturoton, kaj protektemo provizore anstataŭas malicon en iliaj koroj.

La bufo naĝis daŭre sur la surfaco, kvazaŭ la sala akvo ja ne konvenas al ĝi, aŭ kvazaŭ ĝi priscias, kaj timas, la ekzotan mondon suban. Fine ĝi atingis la kontraŭan bordon de la golfeto kaj ekgrimpis laŭ fendeto en la roko ĝis ĝi atingis malpli krutan deklivon, kiam ĝi saltetis al la herbo, kiu en tiu loko kreskis ĝis la bordaj rokegoj.

La knaboj aplaŭdis ĉion ĉi entuziasme ĝis la bufo malaperis malantaŭ herbotufon. Poste Jano sugestis, ke lia onklo ne koleros se ili uzos lian boaton, kaj ili ekiris al la plaĝeto, kie kuŝas la vilaĝanaj barkoj; sed subite iu kriis: "Jen Wili Pek kaj la knabinoj", kaj re-turnante sin ili vidis la idioton serĉantan en la herbo akompanatan de kelkaj el la vilaĝaj knabinoj, kun kiuj li ludas, kiam la knaboj forpelis lin, kaj kiuj mem toleras lin nur pro tio, ke estante freneza li kutimas urini antaŭ ili ne kaŝante sin.

Subite la serĉanto levis ion el la herbo, kaj rikanante minacis ĵeti ĝin kontraŭ la knabinoj, kiuj forkuris kun krioj timaj-ridaj.

"La rano!" kriis Jano, kaj Dol Rua vokis al la idioto: "Lasu tion, Wili! Lasu ĝin iri!"

Wili Pek rigardis ilin, kaj rimarkante, ke ili devos laŭkuri la golfetan bordon antaŭ ol atingi lin, li etendis la manon tenantan la bufon samtempe pugnante ĝin kun nova rikano, kaj babilante: "Rano, bastardo! Rano bastardo! He! He! He! Ranobastardo-ranobastardo!"

"Frakasu tiun bavantan frenezulon!", kriis Dol Rua, ĵetante mem la unuan ŝtonon, kaj ĉiuj aliaj knaboj krom Jano sekvis la ekzemplon. La kruroj de la premata bufo streĉiĝis malantaŭen; ĝia buŝo oscedis kaj vomis bluan sangon,

organojn kaj intestojn, dum la sakrantaj knaboj pli furioze ĵetis ŝtonojn, kaj en la fono la knabinoj kriis ride-time.

Sed Jano, malkongrue ŝtopante la orelojn kontraŭ sonoj neniam aŭdotaj, hipnote rigardis la fokuson de la agado, kie la infano idiota rikanis pri sia potenco, tenante en la mano la sangan pratipon de l' homaro.

El Vitralo. Beletraj kajeroj, n-ro 4.
J. Régulo (Stafeto), La Laguna 1960, p. 102-111.

Marjorie Boulton

TIEL, KIEL ĜI NE OKAZIS

"Ni kaŝu nin," diris Adamo al Eva, "ĉar la Kreinto venas."

"Kiel ni kaŝu nin?" Eva respondis; "Li kreis la cent verdojn, kiujn ni vidas sen turni la kapon; Li kreis pli da steloj, ol ni kapablas kalkuli; kaj ĉu Li ne povus krei lumon, kiu montrus la ostojn en nia karno, aŭ flamon, kiu sekigus la maron? Se Li koleros, Li povos tuj malkrei nin, eĉ dum ni restos kaŝitaj. Kaj se ni ja kolerigis Lin, la respondeco estas mia; mi proponis al vi la oran frukton; mi diros tion al Li, kaj vin Li eble pardonos."

"Ne!" diris Adamo, skuante la kapon; kaj la sunlumo ludis ore sur lia krispa barbo. "Ne, Eva, mia edzino; mi estus povinta rifuzi la frukton, mi respondos por mia propra ago kaj ne deziros, ke vi portu ankaŭ mian ŝarĝon."

Responde, Eva, kies okuloj bluis kvazaŭ la novkreita ĉielo, premis siajn firmajn, spicodorantajn mamojn kontraŭ la vilan bruston de la edzo, kaj adore kisis lian ŝultron. Sed Adamo levis ŝian kapon, klinetiĝis kaj elsuĉis de ŝiaj lipoj longan edenan kison.

Tia lumego tuj envolvis ilin, ke ili certis pri la ĉeesto de la Kreinto. Ili genuiĝis; ĉar post la manĝado de la malpermesita frukto, ili sciis rekoni kaj respekti la bonon absolutan.

"Leviĝu," diris la Kreinto, "kaj ni promenu en la malvarmeto de la tago. Sed ĉu vi ne scias, ke vi estas nudaj?"

"Jes," respondis Adamo, "ni scias, Sinjoro, ke ni ne estas kovritaj, tiel kiel la birdoj kaj la peltaj bestoj estas kovritaj. Ni laŭdas Vin pro Via krea saĝo; ĉar en nia amo ni povas pli proksimiĝi ol la kovritaj birdoj kaj bestoj; kaj ni vidas, ke ni estas belaj; laŭdata kaj dankata estu Vi, Sinjoro!"

Kaj la Kreinto ĝojis; kaj kie la Kreinto lokigis sian penson, sep novaj herbo-specoj ekplumis kaj ektremis modeste sub la vespera suno.

"Laŭdata kaj dankata estu Vi, Sinjoro!" kriis Eva; kaj Adamo ridetis al ŝi aprobe.

"Tamen," diris la Kreinto, "nun stumpa tigo troviĝas sur la arbo kies frukto brilas kiel oro kaj kiu sciigas pri bono kaj malbono."

"Jes, Eternulo," Adamo konfesis, "mi manĝis parton de la ora frukto. Faru tion, kion ordonos Via perfekteco, mi ne trompos Vin; kreita laŭ Via bildo, mi ne diros malveron."

"Eternulo," diris Eva, prenante la manon de sia edzo, "Vi malpermesis, ke ni manĝu tiun frukton; kaj mi esperas, ke mi komprenis la signifon de Via malpermeso. Mi manĝis la frukton kaj proponis ĝin al Adamo. Se mi eraris pri Via

intenco, mi krimis kontraŭ Vi, pli grave ol Adamo; faru laŭ la ordonoj de Via perfekteco."

"Kaj ĉu la Serpento iel kulpas en la afero?" diris la Kreinto.

"Ne," Eva respondis, "ĝi ja montris al mi la arbon, sed mi ne rajtas kulpigi ĝin; la decido estis mia."

"Ho, Eternulo!" kriis Adamo, "malkreu nin, se Vi volas; sed ne disigu nin, kaj permesu, ke ni ekmalestu dum la sama momento!"

La Kreinto pli ĝojis; kaj Lia ĝojo fariĝis alaŭdoparo, kiu forflugis por multiĝi.

"Diru al mi, Eva, kiel vi komprenis Mian malpermeson," ordonis la Kreinto. "Sidiĝu sur tiu ĉi mola herbejo, inter tiuj ĉi violetoj kaj primoloj, kaj klarigu ĉion al Mi, kiel inter amikoj. – Sidiĝu, Adamo! – Ni bone priparolu ĉi tiun aferon, ĉar ĝi estas gravega, kaj koncernas Mian tutan Universon. Sed inter amikoj; ĉar Mi estas via Amiko; kaj Mi estas kun vi ĉiam, eĉ se vi perceptas Min nur dum amaj agoj kaj kelkaj aliaj adorigaj momentoj." Tion diris la Kreinto el la flaveco de la vespera sunlumo.

"Vi diris al ni," Eva komencis, karesante la delikatan malvarmetecon de violetaro, "ke Vi kreis nin laŭ Via bildo, por ke ni povu rilatiĝi senpere kun Vi, kaj ke ni regu super la fiŝoj de la maro, kaj super la birdoj de la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la tero."

"Prave!" jesis la Kreinto. "Tian riĉecon Mi donis al vi, tian potencon, tian gloron. Sed Mi donis al vi unu mildan, neĝenan ordonon; kaj vi malobeis. Eva, klarigu al Mi vian motivon. Ĝin Mi jam konas; sed Mi deziras, ke vi mem plene konu ĝin; kaj, tial, vi devas vortigi ĝin."

"Mi sciis, Eterna Sinjoro, ke Vi kreis nin laŭ Via bildo, por vere kunlabori al Viaj celoj. Tial, mi kredis, ke Vi, la Kreinto, volis krei kreantojn. Sed kion ni kreu por Vi? Ni ne scias, kiel krei alian Edenon, alian Piŝan aŭ Eŭfraton; ni ne povas eĉ krei novan koloron aŭ novan meteoron."

"Ne, ĉar vi kapablas koncepti nur tion, kion vi iasence konas. Vi deziras krei infanojn, kaj vi sukcesos, sed vi povas imagi ilin nur kiel vin mem; vi fakte deziras multigi la amatojn, kiel la homoj deziros ĝis la tempofino; sed per Miaj misteraj leĝoj, vi kreos unikulojn, ĉiam novajn homojn; kaj tiel vi estos pli feliĉaj, ol kreinte spegulbildojn."

"Via saĝo estas senfina, kaj ni ne povas sondi Viajn sekretojn!" Adamo diris; ĉar li vidis, ke la Kreinto komprenis pensojn, eĉ neniam vortigitajn.

"Daŭrigu, Eva," diris la Kreinto.

"Eternulo, kiam Vi malpermesis al ni, ke ni manĝu la oran frukton, mi kvazaŭ sentis subdiron, vualitan peton. Ni estas nur Viaj kreitaĵoj; malmulton ni scias; sed mi sentis, ke Vi volas nin provi, kvazaŭ... nu, kiel mi provus bastonon en la mano, antaŭ ol uzi ĝin por havigi al mi nuksojn. Aŭ ne... ne... tio ne ĝuste prezentas mian ideon. Adamo, helpu min, mi petas."

"Eva, kiam vi faras florgirlandon, vi poste tre atente rigardas ĝin, por certiĝi, ĉu ĝi taŭgas plene... ĉu ĝi estas tiel bona, kiel vi kapablas fari..."

"Mi dankas vin, mia vivo; vi ĝuste trafas mian penson. Ho Eternulo, Vi kreis nin; sed nin, unike, Vi kreis laŭ Via propra bildo. Vi volas do, ke ni kreu; kaj tio signifas, ke ni uzu niajn mensojn; ke, kvankam Vi kreis la mensojn, ni nun devas uzi ilin por krei ion... por ke ni pli bone komprenu Vian ĝojon kaj eniru Vian amikecon..."

"Vi pravas," respondis la Kreinto.

"Kaj mi sentis, ke malpermesinte al ni ion, Vi deziris, ke ni malobeu."

"Ni timis," Adamo konfesis, "ĉar ni sentas la neperfektecon de niaj propraj mensoj; sed Eva helpis min al kuraĝo; poste, ni timis denove; ĉar se ni misinterpretis Vian volon, ni eble malhelpis al iu granda celo..."

La unuaj vesperaj steloj komencis brili super la griziĝanta sed neniam malvarma ĝardeno; kaj la Kreinto, pro la superfluo de Sia ĝojo, kreis la noktflorantan levkojon.

"Ne, Miaj geinfanoj, vi bone interpretis Mian volon. Vi estas la ĝisnune plej alta atingo de Mia arto; Mi sciis, ke Mi faris ion unikan; sed ĉu vi vere kapablos eĉ defii Min – tiun parteton de Mi, kiun vi povas koni? – pro tiu scivolemo, kaj kreemo, per kiuj Mi intencis doti vin? Vi jam spertis, same kiel Mi, feliĉon ĉi tie, ĉu ne?"

"Jes, Sinjoro," Adamo respondis, "ni estas treege feliĉaj."

"Sed feliĉo ne satigis viajn animojn. Vi volis scii; vi volis eksperimenti; vi volis krei. Nun vi havas scion eĉ danĝeran, sed Mi protektos vin; vi kaj via speco eksperimentos dum jarcentoj, kaj formos vian propran vivon. Vi daŭrigos Mian artisman taskon, en ĉiam nova krea ĝojo.

"Ĉu vi scias, ke Mi povas suferi? Mi ofte suferas, kiam dum momento Mi dubas, ĉu iu kreitaĵo Mia estas tiel bela kaj interesa, kiel Mi intencis. Kaj pri vi du, benita paro... Mi dum terura momento ekdubis. Ĉu vi blinde obeos Min, kaj satiĝos per Edeno? – Se vi estus obeintaj, Mi estus devinta krei novan vivoformon, eĉ pli altan ol vi, por havi indajn kunulojn en Mia kosmo. Dum momento, Mi timis, ĉu eble Mi fuŝis Mian plej subtilan artverkon. Kaj Eva ekmordis la pomon; kaj Mi denove ekĝojis.

"Sed alia timo subite trafis Min: ĉu vi estos sufiĉe fortaj por porti tian decidon, kaj, poste, tian scion? Se vi estus ektimintaj Min – Min, kiu amegas ĉion, kion Mi kreis – aŭ se, kun tiom da scio, estus veninta honto..."

"Eternulo," diris Eva respekteme, "mi ne plene komprenis Vin. Kio estas honto?"

"Terura koncepto, kiu iam trafulmis Mian menson, sed kiun Mi neniam volis intence konkretigi. Mi esperas, ke vi neniam konceptos ion tian; sed ke vi ne konceptas ĝin, Mi pruvis je la komenco de nia konversacio. Sed se per iu subita penso Mi estus metinta tian emocion en vin – kia tragedio! Se vi estus ektimintaj Min, kaj timus decidi, kaj eksperimenti, kaj eĉ ami – via speco estus perdita dum jarmiloj per via ago!"

"Ho ve!" ekkriis Eva.

"Ne veu, Eva; tiaj ideoj restas nur ideoj, ĉar vi du venkis; vi ja estas tiaj kreitaĵoj, kiajn Mi intencis krei. Alie, Mi ja ne detruus vin; sed via speco estus dum jarmiloj suferinta en Mensogo, Timo, Honto, kaj eĉ en Malamo."

"Ĉu tiuj strangaj vortoj estas la maloj de Vero, Kuraĝo, Fido kaj Amo?" demandis Adamo.

"Jes. Kompreneble ili estas nur konceptoj en Mia eksperimentema menso. Sed dum momento Mi ektimis, ke eble ili realiĝos en la Homo. Mi ne povas klarigi al vi, kiom da mizero tio signifus por via speco kaj por la tuta mondo. Feliĉe vi ne havas tiajn konceptojn.

"Iru do en paco, feliĉa paro; fruktu kaj multiĝu en ĝojo; eksperimentu, kreu; al vi la plastika Tero apartenas. Kaj Mi ĉiam estos kun vi, eĉ kiam vi pro okupiteco ne pensos pri Mi."

Kaj la Kreinto foriris en Sin mem, por krei uranion, iam donontan grandan potencon sendanĝeran al la eksperimentema homa speco.

Adamo kaj Eva marŝis penseme al la nupta flordometo, kiun ili konstruis por dormi inter parfumoj. Ĉe la aperturo, ili trovis grandegan tigron, kiu, vidante ilin, tuj surdorsiĝis kaj ekronronis, por ke Eva tiklu ĝian silkecan ventron.

El Okuloj. Beletraj kajeroj, n-ro 28.
J. Régulo (Stafeto), La Laguna 1967, p. 130-135.

William Auld

FAMILIA RONDO

La unua homido, kiu naskiĝis sur la planedo Astorakso estis knabino, kaj oni nomis ŝin Jakalina. Ŝia patrino, la ekspedicia geologo, havante pli ol tridek jarojn, konstatis, ke prokrasti gravediĝon ĝis reiro de la ekspedicio al la Tero fine de dekjara deĵoro preskaŭ certe signifus prokrasti ĝin definitive, kaj decidis pro subita inundo de patrineca sopiro, ke tio estus nepensebla, do rezignis pri sia kontraŭgraveda pilolo. La alveno de Jakalina koincidis preskaŭ precize kun la fino de ilia unua (Ter-)jaro sur Astorakso.

Astorakso estis mondo trankvila kaj ŝajnis tre taŭga por homa loĝado. Troviĝis abunda vegetaĵo, el kiu multo estis ne nur manĝebla sed ankaŭ bongusta. Troviĝis multvariaj vivaj estaĵoj, kiel surgrunde tiel ankaŭ en la akvo, kaj laŭ la striktaj reguloj rilate tiajn esplorekspediciojn, la homoj mortigis neniun el ili, sed sekcis nur specimenojn jam mortintajn. Ne estis ĉiam facile havigi tiujn, ĉar kadavroj estis kutime rapide voritaj de amaso da roduloj kadavromanĝaj, kiuj, strange, ŝajnis esti la solaj karnomanĝuloj sur la planedo. Sed eĉ la roduloj ne mortigis aliajn vivantojn. La senĉesa predado fare de unu specio al aliaj, tiel universala sur ĉiuj aliaj konataj planedoj, ŝajnis ne ekzisti sur Astorakso.

La specio plej grandstatura estis reptilio, meze ĉirkaŭ metro en longeco, kiu staris sur ok sveltaj mallongaj kruroj. Nomi tiun beston reptilio estas eble miskomprenige, sed la zoologoj ne povis pli trafe klasigi ĝin per terminoj teraj. La ekspedicio nomis ilin *raksoj* kaj traktis ilin pli-malpli kiel dorlotbestojn, ĉar ili estis viglaj, scivolemaj kaj amikemaj, kaj ŝajne plaĉis al ili, se oni levus aŭ karesus ilin.

Jakalina similis la planedon: ŝi estis trankvila. Ŝia patrino ĉien portis ŝin surdorse, kaj laborante ŝin kuŝigis en ombro de iu plantaĵo. Plejofte aperis rakso aŭ pluraj raksoj kaj sidis pacience apud la bebo, kaj kelkfoje raksidoj ludadis trans aŭ ĉirkaŭ Jakalinan. Komence Marda, ŝia patrino, iom maltrankviliĝis pri tio, sed baldaŭ evidentiĝis, ke neniu danĝero minacis, kaj fakte Jakalina ŝajnis ĝui la societon, kaj gargaris kaj ridadis dume.

Post periodo de, laŭ teraj kriterioj, ĉirkaŭ ses monatoj, Jakalina jam kapablis rampi, kaj pli kaj pli ŝia prizorgado okupis la atenton de Marda. Subite ŝi konstatis ion, kion en la komenco ŝi apenaŭ povis kredi: kiam ajn Jakalina rampis tro proksimen al akvobordo aŭ riskis fali de tro danĝera alto, ĉiam rakso hazarde intermetis sin kaj puŝetis Jakalinan al pli sekura loko. Iom post iom evidentiĝis al Marda, ke tio tute ne estis hazarda: la raksoj konscie rolis kiel vartistinoj. Marda povis pli kaj pli atenti siajn taskojn, sciante, ke Jakalina estas sekure prizorgata. Kompreneble, Jakalina jam kapablis partopreni la ludojn kaj petolaĵojn de la raksidoj.

Pasis tempo, kaj Jakalina lernis stariĝi, kaj ŝanceliĝi, kaj marŝi, kaj poste diri la unuajn vortojn, kaj balbuti, kaj paroli. Kiam ŝi estis kvinjara, Marda decidis, ke ŝi devus ricevi almenaŭ iom da formala eduko por pretigi ŝin al ilia reiro al la Tero, sekve la Komandanto inkluzivis lecionojn por Jakalina en la taskaro de la ekspedicio. Ŝi montriĝis lerta kaj vigla lernanto.

Finfine proksimiĝis la fino de la dekjara deĵoro tiel, ke la ekspedicio komencis pretigi sian definitivan raporton. Oni enskatoligis aŭ enkaĝigis specimenojn de la plantoj kaj bestoj: kiel Noa, la zoologoj, kiam konvenis, kaptis parojn. La raksojn, tiujn malsovaĝajn amikemajn kreaĵojn, oni kaptis lastaj: ĉiam ili abundis en la proksimeco. Preskaŭ lastmomente oni elektis pli-malpli hazarde unu paron, enkaĝigis kaj pretigis por la alveno de la kosmoŝipo.

Ĝuste tiam Jakalina kure alvenis Mardan, blankvizaĝa kaj maltrankvilega.

"Panjo, Panjo, kion oni faras al Pstht kaj Thspt?"

"Al kiuj? Pri kio vi babilaĉas, infanjo?"

"La raksoj, Panjo! Kial oni tiel enŝlosis ilin?"

"Ha, pri tio temas. Nu, por vojaĝi al Tero, kompreneble."

"Sed, Panjo, ili ne deziras iri!"

"Ne stultumu, Jakalina. Ili baldaŭ kutimiĝos."

"Ne, ili ne kutimiĝos. Ili abomenas tion. Oni ne rajtas disigi ilin de la personoj. Rigardu!"

Jakalina fingromontris al la fenestro. Perpleksite, Marda transiris kaj elrigardis. Kelkajn metrojn for de la loĝejo sidis multaj vicoj da raksoj, multdekope, kaŭrante kaj rigardante ŝin dum ŝi rigardis ilin.

"Kion signifas ĉi ĉio?" ŝi turnis sin al Jakalina.

"Ili atendas por vidi, kion vi faros. Ili petis, ke mi petu vin liberigi el la skatolo Psthtn kaj Thsptn. Tspst diris, ke vi aŭskultos min, ĉar ili ne sukcesis komprenigi sin al vi. Ili diris, ke nur al mi ili povas paroli. Kaj vi tion ne rajtas fari al ili. Estas malprave, trakti ilin kiel bestojn!"

"Sed ili ja estas bestoj."

"Ne, ili ne estas. Ili estas personoj, same kiel ni."

"Sed tio ne eblas..."

"Vi devas kredi min, Panjo. Mi scias. Mi konis ilin dum mia tuta vivo. Mi estas tiel same rakso kiel mi estas homo. Ankaŭ mi ne volas iri al Tero! Mi volas resti hejme! Lasu min diri al Tspst, ke mi povos resti ĉi tie kun ŝi, kaj Pstht, kaj Thspt kaj mia tuta familio!"

"Vi volas diri, ke vi scias interparoli kun raksoj!" diris Marda, konsternite. Se tio estus vera, ĝi ŝanĝus multajn aferojn. Ekzemple, tio pensigis, ke raksoj posedas inteligentecon, kaj interstela juro malpermesis elplanedigon kontraŭvolan de inteligentaj specioj. Ankaŭ granda parto de la raporto baziĝas sur premiso, ke, kvankam sur Astorakso abundis vivaĵoj, neniu el ili estas home inteligenta. Kaj, pli persone, kial Jakalina parolis pri sia raksa "familio"?

"Kiel, laŭ vi, nomiĝas via amikino?" ŝi demandis.

"Tspst."

"Nu, ŝajnas al mi, ke vi devas inviti ŝin en la loĝejon. Pri multaj aferoj ni devos interdiskuti."

*El la gazeto **Monato**, 1988, n-ro 5, p. 29.*

Rajna Konstantinova

SONOJ EL FORA JUNECO

Mi duonkuŝas en la lito, ripozante post la streĉa tago, kaj serĉas distron en la televida programo. "Ĉiam la samo!" – mi kun enuo pensas. Mi etendas manon por malŝalti la televidaparaton. Subite mi aŭdas parolantinon anonci: "Kaj nun vi aŭdos parton de koncerto de ĥoro "Rodni Zvuci" (Patrolandaj sonoj), laŭreato de pluraj naciaj kaj internaciaj premioj."

Mia koro ekbatas pli rapide. "Rodni Zvuci" – la amata ĥoro, en kiu mi kantis dum longaj jaroj kaj kies lastan koncerton mi partoprenis ĝuste antaŭ 40 jaroj!...

Jen ili – en belaranĝitaj vicoj, elegante uniforme vestitaj, fiksintaj rigardon al la magia vergo de la juna ĥorestrino. Ili ekkantas la nacian himnon. La publiko ŝtorme leviĝas. La dolĉaj akordoj eniras mian koron kiel io varma, konata... La sama ĉarma harmonio de la centoj da voĉoj, mallaŭtaj recitativoj, fluaj ondoj, potencaj akordoj...

Vane mi streĉas okulojn por distingi la etajn kiel pingloj vizaĝojn. Subite grupo da virinoj elnaĝas antaŭ miaj okuloj. La fotoreportero, kvazaŭ divenintе mian deziron, tenas la pligrandigitajn vizaĝojn por doni al mi eblecon rekoni ilin. Mia hezito daŭras nur minuton. Kaj jen – en tiuj jam maljuniĝintaj virinaj vizaĝoj, hellumigitaj de interna flamo, mi rekonas miajn samklasaninojn, amikinojn...

La sulkoj malaperas. Miaj pro larmoj nebulitaj okuloj vidas denove la junajn vizaĝojn, inspiritajn de la muziko. Tie kaj tie estas pli junaj virinoj – anstataŭulinoj de tiuj, kiujn la vivo – simile al mi – disĵetis for de naskiĝurbo, aŭ kiuj jam forlasis ĉi tiun mondon...

La fotoreportero direktas la kameron al la viroj – la tenorkantistoj, kaj proksimigas ilin al miaj okuloj. Ankaŭ tie ĉi la hezito daŭras mallonge. Mi rapide "deĉifras" en la dikiĝintaj vizaĝoj sub arĝentaj haroj la iamajn entuziasmajn junulojn.

Nun la kamero estas direktita al la baskantistoj. Jen staras antaŭ miaj okuloj la arĝentharaj viroj, kiuj iam estis viglaj, fajraj junuloj kun nigraj aŭ blondaj haroj. Ĝis doloro konataj fizionomioj, sed ies nomojn mi ne plu rememoras. Miaj okuloj soife serĉas lin – la amatan, la blondharan...

Strange – lia loko ne estas okupita de alia. Ĉirkaŭe estas la samaj amikoj. Mia streĉita imago kreas miraĝon. Mi vidas lin inter tiuj aĝaj homoj, sed li estas juna kaj bela, kun entuziasmaj bluaj okuloj sub alta frunto. La plej fascina rideto en la mondo malkovras blankajn dentojn. Dek jarojn mi kantis en ĥoro "Rodni Zvuci", kaj ĉiam tiuj mirinde belaj okuloj estis direktitaj al mi. Unue infanece

sindonaj, amikaj. Poste ni elkreskis kaj liaj okuloj komencis elradii vokon, sopiron. Ambaŭ ni estis solistoj kaj ofte niaj voĉoj kunfandiĝis en bela harmonio.

Amata, kie vi estas nun? Kial viaj amikoj estas jam maljunaj, kaj vi unika brilas inter ili diece bela kaj juna?!...

Larmoj fluas el miaj okuloj. La koro bategas kaj doloras. Kaj dum la majestaj konkludaj sonoj de "Patrolanda kanto ligas nin por ĉiam!" mi kvazaŭ aŭdas lian respondon: "ĉar la mortintoj restas junaj!..."

* * *

Mi avide rigardas la pligrandigitajn de la fotokamero vizaĝojn de la basuloj. Mi scias ke li, mia bluokula amato, ne plu estas inter ili, li mortis en la foraj jaroj de nia juneco. Sed en mia imago mi vidas lin. Li rigardas min de la malgranda ekrano, malgraŭ ke li ne estas tie...

Sur la fono de la majestaj akordoj simile al filmrubando traflugas antaŭ miaj larmoplenaj okuloj la rememoroj – feliĉaj kaj amaraj. Mia unua amo! Li ludis je diversaj instrumentoj, komponis, verkis, kantis. En la preĝeja balkono ni staris unu kontraŭ la alia, pro tio mi vidis nur lin. Li estis tiel bela! Nur iu perfida violkolora makulo meze de la frunto rompis la harmonian aspekton. Sed mi kutimiĝis kaj ĝi ne plu impresis min.

...Unue li nomis min "fratineto" kaj gardis min de la frivoloj de aliaj junuloj. Sed ni elkreskis, kaj jen unu tagon li alrigardis min ne plu per la okuloj de frato, sed per tiuj de sopiranta viro. Estis printempo, floris arboj, arbustoj kaj ĝardenoj, odoris je rozoj kaj jasmeno, birdoj sinforgese kantis, la ĉielo estis blua kiel liaj kaj miaj okuloj... Li komencis donacadi al mi bukedeton de sovaĝaj fajnodoraj violetoj. Li ludis gitaron, ni ambaŭ mallaŭte kantis, promenante en la arbaro...

Venis mia lasta lernejana somero. Mi finis gimnazion. Li estis laboristo (kompostisto), sed tiel inteligenta, saĝa kaj bonedukita, ke min ne ĝenis nia ligo.

Li posedis ĉarman longharan ĉashundon – Arda – kun longaj oreloj kaj vosto, blank-bruna, kun preskaŭ homaj brunaj okuloj. Ŝi ĉiam akompanis nin dum niaj promenadoj.

... Estis somera vespero. Ni sidis sur alta roko, je la rando de la arbaro. Apoginta kapon al lia brusto, mi aŭskultis la batadon de lia koro. Stranga maltrankvilo obsedis min. Io ne estis en ordo. La korbatoj sekvis en plena aritmio – malrapidiĝis, malaperis, denove plifortiĝis...

Kvazaŭ divenínte miajn pensojn, li diris:

– Amata, mi devas konfesi al vi, ke mia sano ne estas en bona ordo. Oni konstatis difektiĝon de la koro, absolutan aritmion kaj tuberkulozan originon de mia haŭtmalsano...

Levinte la kapon, mi premis liajn manojn kaj terurigite aŭskultis liajn vortojn. Arda, kiu dormis kun kapo sur miaj piedoj, kvazaŭ eksentis la maltrankvilon, leviĝis kaj streĉe alrigardis nin. En la krepusko, arĝentumita de la pala luna lumo,

mi klare vidis la tristajn bluajn okulojn de la homo kaj la brunajn, kvazaŭ homajn okulojn de la fidela hundo. Al mi ŝajnis, ke mi falas de la roko en la senfundan abismon.

– Sed vi kuracos vin, ĉu ne? Kaj vi resaniĝos! Ja ni ĵus komencas vivi!...

– Kiam mi ne plu ekzistos, amu Arda-n. Mi eĉ dezirus donaci ŝin al vi!

– Ne, ne! – mi senespere singultis. – Vi resaniĝos!

Arda ŝovis kapon sub niajn interplektitajn manojn, frapetis teren per sia longhara vosto kaj plorĝemis.

Li ekridis. Lia neripetebla rideto! Montriĝis la blankaj dentoj. Per unu mano li karesis min, per la alia – la hundon, kaj kuraĝige diris:

– Kompreneble oni kuracos min. Povas eĉ esti, ke mi resaniĝos! Sed nun vi forveturos al Sofio, kie oni enoficigis vin. Kiam vi revenos, dum via forpermeso, ni pritaksos la situacion kaj la eblecon geedziĝi.

Mi aŭskultis silente kaj triste. Li denove plivigliĝis, almenaŭ laŭŝajne, kaj ekludis per la gitaro. La dolĉaj sonoj falis en la abismon similaj al arĝentaj larmoj. Ni ekkantis nian amatan "Elegion" de la bulgara poeto Dimĉo Debeljanov, kies teksto plene kongruis kun nia animstato.

Ni ekmarŝis malrapide. Io bela, ĉarma, estis frakasita por ĉiam. Mi sciis, ke li estas grave malsana. La perfida violkolora makulo kovris jam la tutan frunton kaj la dekstran vangon. Sed mi devis veturi al Sofio, kie oni enoficigis min.

Solena estis la adiaŭo ĉe la stacidomo. Kune kun mi veturis kvar amikoj de "Rodni Zvuci", miaj samaĝuloj, por studi en Sofio. Panjo bone konis ilin kaj estis trankvila, ke ili zorgos pri mi en la granda urbo.

Preskaŭ la tuta ĥoro "Rodni Zvuci" estis sur la kajo. Ni kantis. La multnombraj pasaĝeroj kaj renkontantoj miregis – ĉu alvenas aŭ forveturas iu grava personeco? Mi staris apud li. Fidela Arda frotis sian kapon sur miaj kruroj, frapetis per la vosto, lekis mian manon kaj mallaŭte plorĝemis, kvazaŭ demandante:

– Kial vi foriras de ni?!

Kaj denove, kvazaŭ diveninte ŝiajn pensojn, li ekkaresis ŝian longharan kapon kaj diris:

– Ŝi revenos, Arda! Ni ambaŭ devas elteni la provan periodon: ŝi en Sofio, kaj mi en la hospitalo. Kaj kiam ni denove estos kune, ĉio malbona estos jam nur rememoro.

Arda daŭrigis ululi, levis la kapon, rigardis nin sinsekve kaj denove premis sian belan kapon al mi...

La trajno ekfajfis forte kaj longe. Ama ĉirkaŭpreno, lasta varma kiso... kaj ni, la kvinopo de "Rodni Zvuci" envagoniĝis. Potence eksonis la devizo de la ĥoro: "Patrolanda kanto ligas nin por ĉiam!"

Ili kantis de sur la kajo, ni – el la kupeo. Mi rigardis nur lin kaj dronis en la bluaj okuloj. La malbeligita de la haŭtmalsano vizaĝo esprimis perturbon kaj suferon. Arda plorĝemis kiel infano kaj ĵetis sin al la malrapide moviĝanta

vagonaro. Senlime longa lasta minuto, kiam oni ne plu scias kien rigardi... Li longe svingis la palan manon kaj Arda saltis ĉirkaŭ li.

Ho Dio, kiom da tempo bezonis tiuj rememoroj, por traflugi antaŭ miaj okuloj?! Sur la televida ekrano aperas alia grupo. Jen ili, aĥ, jen ili! – Du el miaj amikoj, kiuj akompanis min al Sofio antaŭ kvardek jaroj... La karaj fidelaj amikoj, kiuj zorgis pri mi en la komenca tempo, al kiuj eterne ligas min la patrolanda kanto... Nur du! La aliaj du pereis junaj. Ŝajne ĉiuj kvar estis egale bonaj, sed du el ili perdis sian vivon laŭ tute diferenca maniero, pelataj de diversaj motivoj. Unu el ili estis partizano, la alia – cara oficiro. En la decida batalo ili pafis unu kontraŭ la alian, kiel malamikoj. Ambaŭ pereis.

En Sofio mi laboris unu jaron. Mi vivis senbrue kaj modeste, ne surmetis ŝminkaĵon, ne promenadis. Li ĉesis skribi al mi. Mi eksciis, ke en la hospitalo oni forbruligis per elektro la malbelan deformadon de lia vizaĝhaŭto. Kaj mi sciis, ke li deziras liberigi min, ĉar la malsano estas nekuracebla.

Mi prenis mian forpermeson kaj veturis al la naskiĝurbo. Neniu renkontis min ĉe la stacidomo. Tenante enmane la valizeton kaj la maldikan mantelon, mi malrapide marŝis sur la aleo de la granda urba ĝardeno, sur unu el kies benkoj ni ofte sidis... Sur la benkoj ne estis multaj homoj. Post la sufokiga nigra fumo, kiu plenigis la kupeon, aparte kiam la vagonaro traveturis tunelojn, mi soife enspiris la kristale freŝan aeron, saturitan je aromo de florantaj tilioj. Miaj lacaj okuloj banis sin en la verda maro de la abunda foliaro kaj io parenca, kara, emociigis mian koron.

Subite mi aŭdis gajan bojadon. Grandpaŝe flugis al mi la ĉarma longhara Arda, la longaj oreloj kaj la vosto svingis ĉirkaŭ ŝi, kaj antaŭ ol mi rekonsciiĝis, ŝi ĵetis sin sur min, metis la antaŭajn krurojn sur miajn ŝultrojn, lekis mian vizaĝon, ululis, kvazaŭ gaje, sed ŝiaj okuloj estis malsekaj pro larmoj. Mi forte ĉirkaŭbrakis ŝin kaj ekflustris:

– Arda, de kie vi venas, kara?!

Ŝi ekkuris antaŭ mi, rapide revenis, fleksis kapon kaj korpon, svingis la voston, kuŝiĝis antaŭ mi, denove saltis kaj kuris antaŭen. Mi haltis por iom ripozi kaj preni la valizon per la alia mano. Arda delikate ekmordis mian robon kaj trenis min antaŭen.

– Sed kien vi kondukas min, Arda kareta?!

Mia karesvoĉo simple frenezigis ŝin. Ŝiaj movoj, ŝia impeto, la brilo en la fidelaj okuloj esprimis pli klare ol per vortoj, ke mi devas esti kondukita ien... Kaj mi antaŭsentis kien...

Aŭdiĝis la konata fajfsignalo. Mia koro kaj tiu de Arda egalmaniere reagis: por momento ni konsterniĝis, kaj tuj ekrapidis al li, la amata!!

Arda malaperis en la arbustoj, denove aperis, kaj tuta ŝia eksteraĵo kaj aparte la okuloj estis voko kaj peto.

Kaj ... jen li! Li malrapide leviĝis de sur la benko, konsumiĝinta, pala, kun teruraj violkoloraj cikatroj pro la forbruligado de la haŭtverukoj. Seka turmenta

tuso disŝiris lian bruston. Mi lasis la valizeton sur la herbo kaj impete kuris al li. Flama ĉirkaŭbrako... Miaj lipoj vane serĉis la liajn. Prenante min pli forte al sia brusto li ekflustris: "Lasu, amata! La malsano obsedis jam mian tutan korpon. Gardu vin!"

Mi amare ploris kaj kisis liajn palajn, travideblajn manojn, kiuj tiel diligente laboris kaj scipovis eligi el la gitaro tiajn ĉarmajn melodiojn...

La forpermeson ni pasigis kune. Ni promenis inter la grenkampoj. Mi faris el flavaj lekantoj du kronojn kaj metis ilin sur niajn harojn. Li feliĉe ridis kaj diris:

– Tia mi konservos vin en la memoro, amo mia, belulino mia!

Sed liaj lipoj ne tuŝis la miajn...

* * *

Trista kaj malgaja mi revenis Sofion. Nenio plu ĝojigis min. Mia rigardo ne estis direktita al la estonto, sed al la pasinteco. Mi nenion plu sciis pri li. Pasis tuta jaro.

Iun tagon mi aŭdis lian voĉon – li telefonis el la Laborista Hospitalo en Sofio, kie li troviĝis jam longan tempon. Mi tuj vizitis lin. Li estis nur malfacile spiranta ombro. Mi ne plu havis larmojn, nur oceano da ĉagreno brulis en mia koro kaj animo. Li petis min aranĝi lian elhospitaligon kaj akompani lin al la naskiĝurbo.

Mi plenumis la formalaĵojn, avertis lian familion, prenis mian forpermeson kaj ni kune ekveturis hejmen. Malgaja kaj senespera veturado, kun la ombro de tiu, kiu ĝis antaŭ nelonge estis tia perfekta junulo! Ni ne interparolis. Liaj okuloj estis fermitaj. Mi premis liajn manojn.

Je la stacidomo atendis nin lia frato kaj Arda. Antaŭ ol la trajno haltis, ŝi ekĵetis sin kaj plorululis. Ŝia fidela koro, plena je amo kaj sindonemo, preskaŭ krevis pro sufero.

Vidinte lin, lia patrino laŭte ekploris. Arda levis la kapon kaj akompanis.

Li tuj enlitiĝis kaj ekdormis. Post iom da tempo, vekiĝinte, li petis min doni al li la malgrandan lignogravuritan skatolon, donacitan iam de mi. Li eligis malgrandan objekton, volvitan en silka papero.

– Prenu ĝin! Tio estas la ora krono el lekantoj, kiun vi donacis al mi pasintjare. Mi dezirus, ke oni metus ĝin sur mian bruston, en la ĉerko, sed panjo diras, ke ne eblas, ĉar ĝi logos vin al mi...

Li enfalis en dormemon kaj silenton, nenion manĝis nek trinkis.

Frakasita de suferoj kaj sendormo, mi sidis apud li kaj karesis lian palan manon. Subite li malfermis la okulojn, duonleviĝis, feliĉa rideto – kiel en la belaj tagoj – lumigis lian vizaĝon, li klare prononcis: "Patrino, panjo..." kaj denove falis sur la kusenon... Plorante mi ekkuris por voki lian patrinon. Mi stumblis sur la peza, senmova korpo de Arda, kiu same kiel li nenion manĝis kaj nur kuŝis antaŭ la sojlo. Ŝi lace leviĝis, lekis mian manon, plorĝemis kvazaŭ demandante:

"Ĉu venis la fino??" Fine oni lasis ŝin eniri la ĉambron. Ŝi konsternite rigardis lin, flaris lin kaj forkuris eksteren... Li ne plu vivis!

* * *

Ho vi karaj, proksimaj al mia koro amikoj de la televida ekrano, tiam vi akompanis ankaŭ lin ĝis la lasta loĝejo. Ankaŭ al li vi promesis, ke li iras en mondon, "kie ne estas malsanoj kaj suferoj, nek sopirĝemoj, sed vivo eterna!..."

* * *

Kiam eksonis la majesta melodio de "Patrolanda kanto ligas nin por ĉiam!", la fotoreportero direktis la kameron al la publiko, kiu staris, entuziasme aplaŭdis kaj kunkantis. Precipe arĝentharuloj. La plimulton mi rekonis.

Denove aperis sur la televida ekrano la tuta ĥoro – etaj, nerekoneblaj figuroj... ombroj de la pasinteco, similaj al duonestingiĝintaj karboj, kiujn la forta blovo de la muziko por mallonga tempo revivigis en mia konscio. Kiel lasta fajrero elnaĝis la rememoro pri nia fidela Arda, kiu – kiel tio ofte okazas ĉe tre fidelaj hundoj – estis trovita post unu semajno senviva sur lia tombo...

* * *

Ho vi, mia malproksima juneco, saturita je feliĉo kaj sufero, kiun la kantoj de la amata ĥoro "Rodni Zvuci" revivigis antaŭ miaj okuloj! Mi dankas al vi, ke vi estis nome tia – ĉar al vi mi ŝuldas mian riĉan animan vivon en la maljuneco!...

El la gazeto Monato, 1980, n-ro 3, p. 17-19.

Louis Beaucaire

LA BONA FEINO AMENTA KAJ SINJORO AKUKU

Foje, en la jaro 1894, pola feino aŭdis, ke ĵus aperis en Varsovio "Ekzercaro" de iu d-ro Zamenhof. La ekzercaro kompletigis gramatikon de lingvo internacia eldonitan sep jarojn antaŭe sub la pseŭdonimo D-ro Esperanto. Oni raportis al ŝi, ke en tiu ekzercaro troviĝas teksto titolita "La feino". Ĉar ŝi kolektis ĉiujn verkojn pri sia supernatura mondo, la pola feino lernis la lingvon internacian, same kiel ŝi pli frue dediĉis iom da tempo al la franca, germana kaj dana lingvoj, por legi fabelojn de Perrault, Grimm kaj Andersen.

Karaj infanoj, vi eble miras, ke feino povas lerni tiom da fremdaj lingvoj. Ne forgesu, ke feino estas feino. Ŝi bezonas nur sidi tri minutojn sur lernolibro de la koncerna lingvo, tuŝi sian frunton per sia sorĉovergo kaj trifoje ripeti: "abrakadabra-simsalabim-pumpumtralala". Ne kredu, ke tiu metodo estas facila. Jam okazis, ke malatenta feino, post triminuta varmigo de lernolibro sub la postaĵo, fuŝdiris ekzemple: "abrasalabim-tralalapumpum". Sekve la tuta afero fiaskis, kaj la kompatindulino neniam parolis la fremdan lingvon.

La pola feino havis lertan langon, kaj, post senerara trifoja ripetado de "abrakadabra-simsalabim-pumpumtralala", ŝi perfekte ekparolis Esperanton. Ŝi atente legis la rakonton de d-ro Zamenhof pri "La feino". Vi certe konas la tekston, eble parkerigis ĝin: "Unu vidvino havis du filinojn, ktp". Ŝi tuj rimarkis, ke ĝi estas nur traduko el la franca Fabelaro de Perrault. Tamen Esperanto mem ŝajnis al ŝi tiel belsona interkomprenilo, ke ŝi poste preferis ĝin al la ceteraj lingvoj.

Jam ĉe la legado de la franca originalo ŝi ĉagreniĝis, ke oni malprave atribuas malicon al ŝiaj samulinoj. Dum pluraj jaroj ŝi ne reagis al tiu maljustaĵo, sed, kiam ŝi rimarkis, ke la lingvo internacia rapide disvastiĝas en la mondo, ŝi decidis skribi al d-ro Zamenhof:

> "Kara Majstro,
>
> vi menciis en via Ekzercaro koleginon de mi, kiu igis malamindan knabinon kraĉi serpentojn kaj ranojn. Tiu malfeliĉulino tiel suferis de la severa puno, ke ŝi mortis en angulo de arbaro. Kara Majstro, mi bedaŭras, ke vi senkritike alprenis kalumniojn de la franco Perrault. Mi asertas, ke mi neniam aŭdis pri tiaj teruraj okazaĵoj en nia medio kaj sekve mi petas vin ŝanĝi la tekston en la eldonotaj ekzercaroj de via mirinda lingvo internacia.
>
> Pola Feino
> Poŝtrestante
> Varsovio"

D-ro Zamenhof respondis (ha, mi ne forgesu diri al vi, ke tio okazis en la jaro 1905), do d-ro Zamenhof respondis:

"Estimata sinjorino feino,
skribante mian Ekzercaron, mi tute ne intencis ĉagreni vin. Antaŭ kelkaj jaroj mi estus volonte ŝanĝinta la tekston, por plaĉi al vi. Sed nun la Ekzercaro apartenas al la Fundamento. Kiel vi scias, ekde la Bulonja Kongreso la Fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj. Espereble vi komprenos tiun gravan decidon kaj eĉ klarigos ĝin al viaj koleginoj.
Mi dankas vin pro via helpo kaj restas

samideane via
L. L. Zamenhof"

La feinon, kiu estis inteligenta feino, tiel konvinkis la rezonado de d-ro Zamenhof, ke ŝi fariĝis unu el la plej energiaj defendantoj de la Fundamento. Oni eĉ nomis ŝin feino Fundamenta kaj poste simple feino Amenta. Vi homoj, kiuj rampas sur la tero, malofte renkontas feinojn. Male ni birdoj ŝvebas en la aero, kiel ili. Mi povas do fidele raporti pri kelkaj agoj de la bona feino Amenta. Ŝi estas cetere facile rekonebla inter siaj kunulinoj per brila verda stelo ornamanta ŝian sorĉovergon (Tiun detalon mi indikas ĉefe por la poetoj, kiuj ankaŭ ofte ŝvebas en la aero).

Mi ne rakontos al vi la tutan historion de la lingvo internacia. Famaj fakuloj faris tion pli bone, ol mi, simpla pigo, povus fari. Mi mencios nur kelkajn epizodojn, en kiuj oni ĝis nun bedaŭrinde prisilentis la efikon de nia feino.

En la jaro 1907 iuj esperantistoj provis per malhonestaj rimedoj anstataŭigi la Zamenhofan infanon per bastardo, kiun ili aŭdacis nomi Ido. Ili preskaŭ sukcesis. Feliĉe iun nokton Amenta vizitis la oficejon de la perfiduloj kaj, tuŝante per sia sorĉovergo iliajn gramatikojn kaj vortarojn, plenigis la kontraŭfundamentan lingvon per multaj strangaj formoj. La morgaŭan tagon adeptoj de tiu trans-sorĉita Ido subite uzis vortojn, kiujn la aliaj ne komprenis. Ekzemple, anstataŭ uzi la pronomon "ĝi", kiel ni esperantistoj, ili diris jen "olu", jen "ol", jen "lu". Sekve ilia kripla projekto baldaŭ dissplitiĝis kaj malaperis en la rubejon de la Historio (Tiun trafan formulon mi iam aŭdis de mia kuzo Lanio, kiu studis la oratoran arton en Ateno).

La bona feino Amenta oportune intervenis plu en la postaj jaroj, por ke ne pereu nia belega lingvo internacia sub la batoj de la sorto aŭ de la homoj.

Dum la unua mondmilito ŝi savis la internan ideon de Esperanto, sugestante al samideanoj loĝantaj en neŭtralaj landoj, ke ili helpu la viktimojn de la teruraj, sensencaj bataloj. Ankaŭ memoru, ke poste, kiam diktatoroj provis sufoki Esperanton en siaj landoj, frapo de ŝia sorĉovergo tuj naskis novan flamon en aliaj mondopartoj. Iafoje eĉ esperantistoj, ho honto, kondutas malamike kontraŭ esperantistoj, ofte pro nuraj bagateloj. La feino devas flugadi de akademio al redakcio kaj de redakcio al akademio, por konvinki la partiojn, ke vere ne gravas la uzo de tiu ĉi aŭ de tiu sufikso, de tiu ĉi aŭ de tiu participo. Mi, simpla pigo,

opinias, ke tiel longe, dum esperantistaj moŝtoj komprenas la insultojn de aliaj esperantistaj moŝtoj, tio sufiĉas por pruvi la klarecon de nia lingvo internacia.

Tiuteme mi rakontu al vi lastan faron de la feino Amenta. En la urbo vivis notario, s-ro Bilbok, kiu senĉese proponis ŝanĝojn en la gramatiko kaj la vortaro de Esperanto: oni forigu la artikolon, kiu ne ekzistas en la latina kaj la rusa lingvoj; oni diru: "Espelanto" pro la ĉinoj, kiuj ne konas la sonon "r"; oni ne akcentu la antaŭlastan silabon de la vortoj, por ne ĝeni la francojn; oni uzu "e" anstataŭ "kaj", ktp ktp. Kiam s-ro Bilbok aperis en kunveno, ĉiuj esperantistoj forkuris antaŭ liaj stultaĵoj. Oni plurfoje konsilis al li paroli sian ĵargonon sola en sia loĝejo. Vane. Lia lasta eltrovo estis la senutileco de la akuzativo. Tiu kreteno kompreneble ege ĝenis la propagandon de Esperanto.

La distrikta delegito iam promenis en la kamparo, apud nia vilaĝo, meditante pri la pereiga influo de s-ro Bilbok, kiam li hazarde renkontis la feinon Amenta. Ŝi atente aŭskultis liajn plendojn, ridetis kaj promesis kontraŭi al la malakuzativemulo.

– Ne timu, sinjoro delegito, mi ne igos lin kraĉi serpentojn kaj ranojn, sed baldaŭ li jam ne endanĝerigos la Fundamenton.

Fakte ŝi flugis al la urbo kaj nokte, dum lia dormo, tuŝis per sia sorĉovergo la buŝon de s-ro Bilbok. Ekde tiu momento la notario ne kapablis ĝuste prononci la vorton "akuzativo". Li nur balbutis "akaka-akuku-akakakuku".

Kiam li volis denove prediki en kunveno kontraŭ la Esperanta akuzativo, ĉiuj ĉeestantoj ridegis kaj kriis, imitante lin, "akaka-akuku". Li provis rekomenci sian argumentadon: "Gesinjoroj, mi opinias, ke la akaka-akuku-akakakuku..." Poste li silentis, ne komprenante, kial lia lango subite kroĉiĝis inter liaj dentoj, kaj li fuĝis sub la mokoj de la esperantista publiko.

De tiam oni nomis s-ron Bilbok Akuku, poste oni forgesis lin. Mi scias, ke nun Akuku restas hejme kaj dediĉas sian tempon al pedanta reordigo de juraj paragrafoj, unuvorte al nenio.

Jes, karaj infanoj, al nenio.

El Fabeloj de la verda pigo. TK/Stafeto, Antverpeno–La Laguna 1981, p. 43-49.

Julian Modest

LA BONMORA EDZO

Mi tre bone rememoras tiun aŭtunan pluvan tagon. Estis sabate kaj febre mi preparis min por la unua mia amrendevuo. Eble ege gravmiena kaj fiera mi aspektis dum tiu ĉi griza pluva posttagmezo. Ja, mi jam frekventis la unuan klason de la gimnazio kaj post la multnombraj, silentaj, sed signifoplenaj rigardoj, per kiuj mi delonge fiksis la objekton de mia amo, mi invitis ŝin por la unua rendevuo. Dio mia, kiel maltrankvila mi estis tiam. Eble tagon aŭ du antaŭe, per seka gorĝo kaj tremantaj manoj, mi diris al la objekto de mia amo, ke sabate posttagmeze, je la kvina horo, mi atendos ŝin en la kafejo de la urba parko. De tiu ĉi mia sciigo la objekto iĝis ruĝa kiel pomo, elbalbutis "jes" kaj malaperis kvazaŭ fumo.

Sed por mi la sabata posttagmezo komenciĝis turmente. Mia patrino, kiel kutime, pli frue revenis el la laborejo kaj komencis grandan lavadon, ĉar la aŭtuna mola suno promesis rapide sekigi la tolaĵojn. Panjo ĵus varmigis la akvon, metis la vestojn en la lavmaŝinon kaj majestaj grizaj nuboj kovris la ĉielon. La mola suno malaperis el la firmamento kaj mi ekflaris la konatan pikodoron de la tempesto kiu jam minacas nian trankvilan familian vivon. Paĉjo ankoraŭ ne revenis el la laborejo kaj estis klare, ke li kun siaj kolegoj nun senzorge babiladas en iu drinkejo.

Ekstere jam torente pluvis, hejme – la lavmaŝino kolere muĝis, mi rigardis ofte, ofte la horloĝon kaj febre pensis kiel mi sukcesos elgliti nevideble el la hejmo. Tio certe ne estos nun facila, sed la penso, ke ŝi atendos min tie, kuraĝigis min.

Por la unua amrendevuo, kompreneble mi devis survesti la plej novan mian ĉemizon en paŝtela rozkoloro, mian bluan italan kravaton, kiun donacis por mia naskiĝtaga festo mia onklino, kaj mian novan ĉokoladkoloran pantalonon. Sed tiel bunte vestita mi nepre vekos suspekton en panjo kaj mia unua, longe revita, amrendevuo senglore fiaskos. Nur la penso, ke mia digno estos subfosita kaj la objekto de mia unua amo primokos miajn longajn obstinajn rigardojn, frenezigis min.

Je la tria horo paĉjo revenis hejmen malseka kiel spongo, ĉar matene li forgesis aŭ tute ne pensis preni sian ombrelon. Kaj tuj, post lia eniro en la ĉambron, ekfuriozis la familia ŝtormo. Kiel ĉiam panjo komencis per la vortoj, ke li, paĉjo, estas unu terura homo kiu tute ne interesiĝas pri sia familio kaj post la laboro li preferas sidi kaj babili en iu drinkejo ol reveni hejmen kaj helpi al sia edzino en ŝia hejma laboro. En la unua momento paĉjo iomete surpriziĝis, ĉar li ne atendis tiel varman renkonton kaj kompreneble li ne povis tuj kompreni, ke la vera kaŭzo pri la kolero de panjo estas ne ĝuste li, sed la subita posttagmeza pluvo kiu malhelpis la planitan kaj komencitan lavadon.

Per milda voĉo paĉjo provis klarigi, ke li ĝuste tial malfruiĝis, ĉar subite ekpluvis kaj, pro la fakto, ke li forgesis hejme la ombrelon, li devis eniri en unu kafejon kaj atendi tie ĝis la ĉeso de la pluvo. Sed post duhora vana atendado, paĉjo sentis sin devigita ekiri hejmen, ĉar li bone scias, ke lia familio atendas lin maltrankvile.

Malgraŭ lia konvinka milda voĉo, liaj firmaj argumentoj kaj malgraŭ la fakto, ke paĉjo ĝis la ostoj estis malseka kaj diris ne "drinkejon", sed "kafejon", mi kaj panjo bonege sciis, ke li eniris en tiun ĉi "kafejon" delonge antaŭ la ekpluvo kaj eble li ankoraŭ restus tie, se li ne scias, ke sabate panjo pli frue revenas hejmen. La nigraj okuloj de paĉjo brilis, agrabla brandaromo blovetis de li kaj tio igis panjon daŭrigi la altnivelan familian disputon.

– Ah, povra mi! La tutan vivon mi sola faras ĉion. Neniu, neniu helpas al mi. Mi lavas, gladas, aĉetadas, kuiras... Ah, feliĉa estas Gizella, ke ŝi havas tian bonmoran edzon. Vidu! Ĉiutage Paszkal revenas hejmen kun plenplenaj sakoj. Eĉ foje mi ne vidis Gizella-n iri en la magazenon. Eĉ unu panon ŝi ne aĉetas. Paszkal lavas, Paszkal gladas, Paszkal kuiras... Eĉ nukskukon li spertas prepari. Imagu, nuks-ku-kon! Kaj vi, vi eĉ unu simplan fazeolsupon ne povas kuiri. Ah, feliĉa estas Gizella, ke ŝi havas tian bonmoran edzon...

Mi kaj paĉjo silente kaj atente aŭskultis la veojn de panjo, malgraŭ ke ni jam parkere sciis ilin. Estis momentoj kiam paĉjo ne povis ĝis la fino elteni tiun ĉi "predikon", sed nun li silentis kaj aŭskultis kiel diligenta lernanto kaj eble pri io alia li pensis.

Oĉjo Paszkal kaj onjo Gizella estis niaj malnovaj najbaroj kaj kun ilia filino Margit, ĉarma blondulino, ni lernis en unu sama klaso. Sed mi iomete timiĝis de oĉjo Paszkal. Li, preskaŭ ĉiam, estis vestita en nigra kostumo, modele gladita, kaj se oni devas kredi al la vortoj de panjo, li sola gladis siajn vestojn, eĉ ne nur siajn, sed ankaŭ la vestojn, la robojn, bluzojn kaj tiel plu, de siaj edzino kaj filino.

Oĉjo Paszkal portis okulvitrojn kun dikaj kadroj kaj malantaŭ la lensoj severe rigardis du etaj okuletoj, similaj al senmovaj punktoj. Li ĉiam estis oficiale afabla, malmulte parolis kaj mi preskaŭ neniam vidis lin rideti. Lia flava longa vizaĝo estis senmova kiel la vizaĝoj de la mumioj kaj kiam mi rimarkis lin kontraŭ mi sur la strato, mi rapidis trairi al alia trotuaro por ke mi ne renkontu lian pikan rigardon. Ankaŭ paĉjo evitis paroli kun li, eble pro tio, ĉar panjo ĉiam montris oĉjon Paszkalon kiel modelon de bonmora edzo, sed onjo Gizella, kiu ne laboris, ofte gastis ĉe ni, kaj ŝi kaj panjo estis bonaj amikinoj.

– Ho, Zoli, filo mia, promesu al mi, ke vi neniam estos kiel via patro kaj vi ĉiam helpos al via edzino en ŝia hejma laboro – elspiris peze panjo, eble jam laca de la duonhora monologo.

Sed nun paĉjo ne povis plu silenti.

– Mia filo estos vera viro kaj ne frotĉifono! – deklaris li kategorie.

La familia ŝtormo minacis ekfuriozi denove per pli terura forto. La montriloj de la murhorloĝo proksimiĝis al la kvara kaj ni pretis tuj promesi al panjo, ke

mi ĉiam helpos al mia edzino, kaj trankviligi paĉjon, ke mi neniam estos frotĉifono. Sed en tiu ĉi decida momento paĉjo demonstrative eliris kaj tio savis min de la solenaj promesoj. Tuj post li ankaŭ mi forkuris en la alian ĉambron kaj komencis febre vestiĝi.

Kiam panjo vidis min tiel elegante vestita, ŝi preskaŭ ekkriis pro miro.

– Kien vi iras en tiu ĉi pluvo? – suspekteme kaj severe ŝi demandis min.

– Mia samklasano... Tiu Petér, ankaŭ vi konas lin, ĉu ne, havas hodiaŭ feston, naskiĝtagan feston... – tramurmuris mi, timiĝante, ke panjo jam tralegis ĉion en mia konfuzita kaj klinita rigardo.

– Kaj atente festu, ĉar sufiĉas hejme nur unu ŝatanto de la brando. – klare diris panjo kaj kaŝe ŝovis en mian manon unu centforintan monbileton.

Feliĉa mi eliris sur la straton, ĉar ankaŭ paĉjo donis al mi kaŝe cent forintojn. Eĉ florojn mi povis nun aĉeti, sed la penso, ke iu vidos min kun granda florbukedo, rapide forpelis tiun ĉi mian ideon.

Pluvis tiel kvazaŭ el la ĉielo iu senlace elverŝis sitelojn da akvo kaj mia nova ĉokoladkolora pantalono jam pezis kiel plumbo. La stratoj estis preskaŭ senhomaj kaj mi ĝojis, ke neniu renkontus min survoje kaj ĝuste je la kvina horo mi jam sidos en la kafejo de la urba parko. Mi elektis tiun ĉi kafejon, ĉar ĝi troviĝis malproksime de la urba centro kaj oni diris, ke kutime la amantoj rendevuas tie. Nur la stultan pluvon mi blasfemis, ĉar certe ĝi malhelpos nian promenadon en la parko kaj mi ne povus kisi mian korinklinon sub la ombroj de la arboj tiel, kiel mi imagis la unuan mian ardan aman kison.

Impete mi enkuris en la kafejon, sed rigida kaj senspira mi ekgapis ĉe la pordo. Ĝis nun, eĉ foje, mi ne enpaŝis en tiun ĉi elegantan brilan ejon. Blankaj tolkovriloj kovris la tablojn kaj vazoj kun aŭtunaj floroj kaj pezaj kandelingoj staris sur ili. Malhelaj bildoj ornamis la kafejon kaj preskaŭ ĉiu bildo prezentis ian scenon de ĉasado. La malnovaj ĉasfusiloj, kiuj pendis sur la muroj, kaj majestaj cervaj kornoj rememorigis al mi la nomon de la kafejo – "Ora cervo".

Dum mi gapis ĉe la enirejo, unu el la servistoj proksimiĝis kaj afable gvidis min al tablo kiu estis nur por du personoj. Eble li jam havis sperton kaj personojn, similajn al mi, li delikate direktis al la intimaj lokoj de la kafejo.

Rigide, malrapide mi eksidis ĉe la tablo kaj timeme alrigardis la karton de la trinkaĵoj. Miaj ducent forintoj eĉ por du konjakoj ne sufiĉis. Sed mi kaŝis mian miron kaj gravmiene, eĉ iome malzorgeme, mi mendis glason da konjako kaj okulfiksis la enirejon kie post nelonge devis aperi mia korinklino.

Preskaŭ malplena estis la kafejo. Ĉe du aŭ tri tabloj sidis paroj kiuj rigardis unu la alian kiel katoj, flustris ion aŭ delikate tenis siajn manojn. Nur mi sidis sola kaj sentis min kiel fia spiono. Sed eble post sekundo ankaŭ ŝi eniros ĉi tien kaj ĉio estos en la ordo, pensis mi maltrankvile, kaj la glaso da konjako abunde ŝvitis en mia mano.

Sed ne ĉio estis en ordo; ĉu mi pli rapide drinkis la konjakon aŭ mia horloĝo ne funkciis bone, sed jam estis la kvina kaj duono. Du- aŭ tri-foje malfermiĝis

la pordo kaj mi preskaŭ saltis kiel risorto, sed vane. La objekto de mia amo ankoraŭ ne aperis. Eble ŝi malfruas pro la pluvo aŭ ege longe ŝi devas atendi aŭtobuson – provis mi diveni la kialojn por ŝia malfruiĝo, malgraŭ ke estis preskaŭ la sesa horo kaj mi jam devis decidi, ĉu mi mendu ankoraŭ unu konjakon aŭ pagi kaj foriri. Eĉ malĝojo enŝteliĝis en mian koron kaj dolore mi rememoris miajn multnombrajn, silentajn, sed signifoplenajn rigardojn per kiuj dum la lernohoroj mi fiksis la objekton de mia amo. Kio en mi ne ekplaĉis al ŝi? Ĉu ne mi estis unu el la plej bonaj sportistoj en la klaso? Ĉu ne mi estis tiu, kiu dum la matematika lernohoro kaŝe reskribis la solvon de la taskoj kaj donis ankaŭ al la aliaj samklasanoj reskribi ilin? Ĉu ne mi estis tiu, kiu... Vere, ke mi estas iomete malalta, sed kompreneble ne ĉiuj povas elkreski kiel korbopilkistoj. Kaj dum mi meditis pri mia malfeliĉa sorto, la pordo de "Ora cervo" malfermiĝis kaj ĉe la enirejo ekstaris oĉjo Paszkal kun iu svelta, juna fraŭlino. Jes, miaj okuloj ne eraris. Tiu ĉi estis la sama oĉjo Paszkal, nia najbaro, kiun mi jam konis preskaŭ de dek jaroj. Sed onjo Gizella hieraŭ gastis ĉe ni kaj, jes, mi tre bone rememoras, ŝi diris al panjo, ke oĉjo Paszkal forveturis ofice en la provincon dum unu semajno. Ne. Miaj okuloj ne eraris. Tiu estis oĉjo Paszkal, vestita en sia perfekte gladita nigra kostumo, kaj Dio mia, malantaŭ liaj dikaj okulvitroj, liaj okuletoj ridetis. Strange. Unuan fojon mi vidis oĉjon Paszkal rideti. Ankaŭ la fraŭlino, kiu eniris kun li, senzorge ridetis. Evidente en tiu ĉi pluva vespero ili sentis sin bonege.

Kiam la servisto rimarkis ilin, li tuj alkuris al la enirejo kaj proponis al ili tablon ĉe la angulo, ĝuste kontraŭ mi. Tio ege maltrankviligis min, ĉar de tie oĉjo Paszkal facile rimarkos min kaj morgaŭ panjo jam scios, ke ne Petér havis naskiĝtagan feston, sed mi sola festis en "Ora cervo". Oĉjo Paszkal kaj la servisto verŝajne bone konis unu la alian kaj nun ili amike parolis pri io kaj voĉe ridetis. Dio mia, ĝis nun mi neniam vidis oĉjon Paszkal tiel gaja kaj ĝentila. La fraŭlino, kiu sidis ĉe li, ŝajnis al mi iome bunte vestita kaj ŝiaj lipoj skarlatis kiel du ĉerizoj.

Mi jam pensis kiamaniere plej rapide kaj nerimarkite mi forlasu la kafejon kaj mi eĉ ĝojis, ke mia korinklino ne estas ĉi tie. La tablo ĉe kiu sidis oĉjo Paszkal troviĝis proksime ĉe la pordo kaj certe li vidos min ĝuste en la momento kiam mi eliros. Sed baldaŭ mi rimarkis, ke oĉjo Paszkal estas ege okupata kun la fraŭlino kiu sidas ĉe li. Simile al aliaj paroj en la kafejo, ankaŭ li komencis kate rigardi ŝin, komencis atente karesi ŝian molan manon kaj flustri ion al ŝi. De tempo al tempo la fraŭlino voĉe ridis, sed ŝajnis al mi, ke ŝi pli atente rigardas la bildojn en la kafejo ol aŭskulti la flustradon de oĉjo Paszkal. Kaj mi ne scias ĉu hazarde estis tio, sed super la tablo, kie ili sidis, pendis du majestaj cervaj kornoj.

Kaj de tiam, kiam ajn mi renkontas oĉjon Paszkal aŭ onjon Gizella, mi ĉiam rememoras pri tiuj ĉi du majestaj cervaj kornoj kaj pri la unua mia malfeliĉa amrendevuo.

El la gazeto Monato, 1981, n-ro 4, p. 17-18.

Vladimir Glazunov

LA ĈARMO DE ĈIELMONTARO

Memore pri la rusa kaj Esperanta
poeto Konstantin Gusev,
kun kiu estis iritaj multaj vojoj.

Ho, nomada sopiro
mian koron disŝiras!
Ĉu kapric', aŭ inspiro?
Mi ne scias kaj miras.
K. Gusev

1 La vizio de pratempo

Ni iras por serĉi taŭgan pasejon. Mi kaj Koĉjo. Estas frua mateno, kaj friska aero agrable nin vigligas. La suno ne ankoraŭ montriĝas el post la montosuproj, sed ĉielo jam helas blue. Ni vidas ĝin inter altaj belformaj piceoj. Ili staras dise. Rektaj kiel sagoj, kun branĉoj dense kuniĝintaj kaj la suproj pinte staraj, ili ŝajne pretas ekflugi. Ni aliras al unu el ili, kiu vidiĝas aparte gracia kaj bela. Koĉjo karesas ĝiajn branĉojn kaj nomas ĝin "kara Legendulino"... Li diras, ke se li estus pagano, li nepre adorus ĝin kaj ĉiam venus al ĝi por klini sian kapon antaŭ tiu diino de la monta arbaro. La tuta ĉirkaŭaĵo ĉi tie aperas antaŭ ni antikva, legenda kaj sovaĝa. Eĉ stranga odoro de iu ne konata herbo faras al ni impreson pri antikvaj nomadoj. Kaj ni rimarkas, ke la vojo, la pado mem, sur kiu ni iras, estas pratempa: ĝi kondukas nin tre saĝe, evitante nenecesajn krutaĵojn, danĝerajn lokojn, aŭ ĉirkaŭirante iun ŝtonon – ĉar ja dum jarcentoj multaj homoj uzis kaj flegis ĝin.

Baldaŭ la arbaro restas malsupre post ni, kaj jen estas vastaj herbejoj – la famaj "ĝajláu" aŭ "ĝajlóo" de Tian-Ŝan-montaro. Buntaj floroj prezentas mirindan ludon de koloroj. Povas esti, pro tio kazaĥoj kaj kirgizoj nomis siajn montojn "alá-táu" kaj "alá-too", kio signifas "bunta montaro". Efiko de la ĉirkaŭa pejzaĝo estas tiom forta, ke ni emocie etendas la manojn unu al la alia.

Ankoraŭ ni ne vidas la plej altajn suprojn de la Ĉielmontaro. Ankoraŭ ni ne scias kio estas Tian-Ŝan. Verŝajne la antaŭaj rokoj kaŝas de ni la misteran montolandon. Ni ascendas pene kaj fine venas al malgranda ebenaĵo. De tie ĉi subite aperas magia bildo de la neĝe kovritaj montegoj. Ili etendiĝas vico post vico kaj malproksime fadas en blua vualo. Estas io aliplaneda en la tuta montaro pro la dense violkolora ĉielo kaj la suno, kiu lumegas, bruligas la haŭton, sed ne varmigas. Dio mia! Jen ĉi tie efektive estas Pratempo mem antaŭ milionoj kaj milionoj da jaroj.

Solaj ni staras fascinataj de la majesta elemento, kruela en sia blinda potenco. Tute solaj... Iu glaciiga sento de senelira izoleco ŝtele rampetas en niajn korojn.

Konsterna naturo de tiu ŝtona malvarma mondo akordiĝas kun profunda, morta silento. Ni aŭdas nenion. Pro tio ŝajnas, ke ni surdiĝis. Ne aŭdiĝas eĉ la movado de akvo ĉar ĉi tie ĝi filtriĝas nur per gutetoj sub la neĝaj tavoloj. Sed ni ne povas forlasi nian observejon, kvazaŭ ni mem estas ŝtonigitaj. Tamen iom post iom niaj okuloj fiksiĝas al detaloj de la panoramo. Ni trovas novajn formojn kaj kolorojn. Lumo kaj ombro ŝanĝas aspekton de la rokoj, diverse nuancigas briladon de la neĝo, pli akre desegnas la trajtojn de la krestoj kaj deklivoj. Jen ŝtono falas de krutaĵo. Ĝi ruliĝas, kraketas, forpuŝas la aliajn, kaj baldaŭ la intermonta valo tondras kaj eĥas pro krakegado de la ŝtona torento. Ruĝbekaj monedoj, kredeble timigitaj de la bruego, alflugas al tiuj altaj lokoj, kaj ni aŭdas iliajn melodiajn voĉojn – "kri-kri, kria-kria". Ni vigliĝas ĉar tiuj malmultaj sonoj, la birdoj kaj la lumfenomenoj ja atestas al ni, ke la malvarma ŝtondezerto vivas laŭ sia maniero.

Jam tedas nin la pasiva kontemplado. Ni ekiras. Koĉjo diras medite, demande, ĉu ni mem ne portas en ni la erojn de Pratempo. Jes, ni certe estas parto de tiu pratempa mondo, kaj neniam antaŭe ni sentis tiel profunde nian apartenon al la fortoj de Naturo, al ties Povo.

Koĉjo prenas sian notlibron kaj ion skribas. Mi scias, li verkas novajn versojn.

2 La sorĉo de alteco

Ni iras kaj iras sur la ŝtona surfaco – krak-skrap, skrap-krak, kaj fajreroj iam elflugas elsub la feraĵoj de niaj ŝuoj. Ni rimarkas subite, ke neniu pado plu estas videbla. Jen surprizo! Verŝajne neniu homo ankoraŭ iris en tiuj foraj lokoj, kaj nun la kompaso nura montras la direkton al nia bivako. Ni sentas ĝojon kaj fieron esti pioniroj. Tial ni kantas. De tempo al tempo ni haltas, ĉirkaŭrigardas, iom diskutas.

Fine ni venas al abismo, kiu dividas du montomasivojn kaj ekstaras ĉe la rando, sorĉe logataj de la terure aperta faŭko. Kvazaŭ en inkuba sonĝo ni volas nin movi for, sed ne povas. Niaj kruroj tremas kaj plumbe peziĝas. Tamen ĝuste al la kontraŭa masivo ni devas transiri por atingi la bivakon antaŭ la nokto, kaj Koĉjo montre etendas sian manon flanken. Tie vidiĝas mallarĝa, krestoforma muro, kiu ponte kunigas ambaŭ deklivojn de la fendego. Sed la muro estas tiom mallarĝa, kaj ambaŭflanke malfermiĝas tiaj abismoj, ke nek iri sur tiu ĉi "ponto", nek eĉ nur rigardi ĝin oni povas sen kortremo. Kion fari? Ni staras meditante. Kaj subite, je mia teruro, Koĉjo rapide faras kelkajn paŝojn, saltas sur la kreston, ankoraŭ movas sin antaŭen kaj haltas.

– Ni iru, – li trankvile diras. – Nur vi ne rigardu flanken.

Tiuj kelkaj paŝoj estas senrevenaj ĉar nek returni, nek kuspi sin plu eblas. Oni povas iri nur antaŭen. Sed kiel li iros ĉi tie kun siaj okuloj, apenaŭ vidantaj tra la dikaj vitroj, se li ofte stumblas eĉ sur ordinara vojo! La plej eta mismovo minacas je neevitebla pereo. Horloĝo tiktakas ĉe mia mano. Mia koro forte batas

ĉe la gorĝo. Necesas ja tuj entrepreni ion. Tuj! Malfacile liberigante min de iu katena stuporo, mi diras kiel eble plej trankvile kaj konvinke:

– Se vi ne sidiĝos tuj, mi iros al vi kaj nepre falos.

Koĉjo scias, ke mi estas malbona ekvilibristo, kaj malrapide sidiĝas sur la kreston. Mi elspiras libere, alpaŝas lin kaj ankaŭ sidiĝas same sur la ŝtonan dorson. Apogante nin per la manoj, ni komencas iom post iom moviĝi antaŭen. Absurdecon de tia "rajdado" ni perceptas nur ĉe duono de la vojo. Koĉjo ekridas la unua. Li ridas ĉiam laŭte kaj infekte. Kaj nun, manoj-ĉe-kokse, balancante la piedojn super la abismoj, li ridegas, ion krias, kaj eĥo portas niajn voĉojn super krutaĵoj de la montaro.

"Rajdinte" mallongan distancon, ni haltas, ĝuas vidaĵon de la ĉirkaŭaj montosuproj kaj ĉiufoje ekrigardante sub niajn piedojn, sentas strangan, fascinan logon de la terura profundaĵo.

Ĉe unu tia halto Koĉjo sin turnas al mi kaj montras malgrandan skarabeton. Ĝi diligente kaj sendepende rampas sur la malglata surfaco de ŝtono, jen pendante super la abismo, jen baraktante al supraj ŝtupetoj.

– Vidu, – li diras, – ĝi ja tute neglektas la lokon. Ĝi estas tiom malgranda, kaj ĉio apude estas tiom grandega, ke ĝi indiferentas pri la loko kie ĝi troviĝas. Do ni imagu, ke ni ankaŭ estas skarabetoj en Universo, – li daŭrigas, – kaj malatentu la lokon, kie ni nun estas.

Mi ne konsentas transformiĝi en skarabeton, kaj ni ekmovas nin plu. Jam proksime de la celo atingenda ni ekvidas, ke la muro estas pli larĝa ol ĝi estis ĉe la komenco, kaj niaj kruroj ne plu povas premiĝi al ĝiaj flankoj, sed tro mallarĝa por leviĝi kaj piediri sur ĝi. Tial ni ekrampas. Malvarmetaj strioj glitas sur niaj dorsoj ĉar ambaŭflanke apud niaj vizaĝoj apertas la senfundaj abismoj. Kaj ju pli malsupren penetras la rigardo tra blua nebuleto, des pli malheliĝas la truego ĝis fine la malvarma tenebro kaŝas ĝin tute.

Rapide ni trarampas la lastan distancon kaj alfrontas krutan deklivon kun elstarantaj rokoj. Nun estas problemo forlasi la "ponton". Ni leviĝas malrapidege, gardeme. Ni kroĉas nin per la manoj al fendoj kaj tuberoj de la rokego. Ĉiu glitmovo minacas per falego. Mi rigardas sur kapricajn interplektaĵojn de la vejnlinioj en la roko rekte antaŭ mia nazo, kvazaŭ trovante apogon kaj trankvilon en tiu spitanta solideco de la ŝtono. Kaj, kiam fine, ni atingas sendanĝeran lokon, ni senforte falas tute konsumitaj de la nervostreĉo. Post nelonga ripozo Koĉjo demandas:

– Ĉu vi konsentus nun retroiri sammaniere?

Mi silente kapneas. Li ridas.

– Kial vi ridas? – nun mi demandas, iom ofendita.

Li ĵetas ŝtoneron, kiu malaperas en la abismo, kaj post iom da tempo reeĥas per kraketado el diablo scias kiu profundo.

– Mi ridas pro ĝojo, ke ni restas ankoraŭ vivaj, – Koĉjo respondas kaj komencas skribi en sia notlibro. Novajn versojn, mi ja scias.

3 Ĉielmontaro surprizas

Ni iras al nia bivako tra densa arbaro, descendante iom post iom. Dornaj arbustoj serioze tedas nin. Ili pikas niajn korpojn kaj ŝiras la vestaĵon. Sed ni kredas, ke post malbono ĉiam nepre venas bono. Bedaŭrinde ankaŭ inverse. Tiuj du antipodoj ja alternas en nia vivo.... Jen ni ekvidas tre simpatian trogsimilan valeton, kiu krute kaj rekte malsupreniĝas al apenaŭ videbla arĝenta strio – la rivero. Ĝi fluas ĝuste laŭ la direkto al nia bivako. La "trogo" montriĝas al ni edena loko – senarba kaj senarbusta, bonege irebla. Maldensa herbaro agrable susuras sub niaj piedoj. Supre, inter la regule desegnitaj bordoj de la valo, ni vidas sennuban ĉielon. Sed kiam ni komencas tiel ĝui la senpenan iradon, similan al senzorga promenado, aperas tiu "antipoda" plago, tiom stranga kaj mortdanĝera, ke ĉiuj niaj alpinistaj akrobataĵoj ŝajnas esti infana ludo kompare kun ĝi. Montgrimpado dependas de la grimpantoj mem, de ties lerteco kaj elekto, sed la fenomeno, kiu nin subite alfrontas, faras el ni verajn sklavojn de la sinjoro Sorto.

Subite ni aŭdas iujn frapegojn desupre kaj post momento ni vidas kiel saltante kaj tremigante la teron, ruliĝas al ni granda ŝtono. La situacio komplikiĝas ĉar ĝi flugas jen sur unu bordon de la trogo, jen galopas al la alia. Tial ni ne povas antaŭvidi ĝian vojon kaj serĉi la rifuĝon. Tamen instinkto igas nin fuĝi el tiu terura kegloludejo, kaj ni grimpe ĵetas nin supren laŭ la bordo. Dum ni baraktas, la ŝtono tondrumas pretere kaj jam tamburas ie en fora malsupro.

La dua ŝtono sekvas pli frue ol ni sukcesas iom suprengrimpi. Kun terura bruo ĝi alflugas al nia flanko kaj, desegnante kurban linion inter niaj korpoj, forsaltas same kiel la unua.

Fine ni elgrimpas sur randon de la trogo kaj, streĉe aŭskultante, atendas daŭrigon de la bombardado. Sed ĉio estas trankvila. Ĉu por longe? Almenaŭ nun ni povas cerbumi pri la kaŭzo de tiu atako. Nur unu cirkonstanco estas tute klara al ni: en la arbaro, de kie falas la ŝtonoj, ne estas iu ajn nuda masivo kun faleblaj ŝtonoj. Se ili falas de pli altaj rokhavaj lokoj, ili estus retenataj de arbotrunkoj. Post tia rezonado kio do restas al ni supozi? Certe ja iu *konscie* kaj celdirekte ĉasas nin, eligante la ŝtonojn elsub la grundo kaj plant-radikoj!

Koĉjo demetas siajn okulvitrojn, ne rapide frotas ilin, kvazaŭ intencante pli bone pririgardi la malamikon, kaj min demandas:

– Ĉu vi memoras ion el la lekcioj de nia estimata profesoro Nikoláj Nikolájeviĉ?

Li diras pri la profesoro, kiu gvidis en nia universitato la kurson de zoogeografio. "Ha, – mi pensas, – Koĉjo aludas pri kelkaj interesaj bestoj de Tian-Ŝan-montaro".

– Ĉu la "blankungulo"? – mi demandas, kaptante la divenigan penson.

– Do certe! Kiu krome ĵetadus ŝtonojn kontraŭ nin?

La "blankungulo" estas ĉi-tiea urso – grandega kaj forta besto, kun longaj blankaj ungoj, kiu ŝatas sin distri per ŝtonĵetado kaj iam eĉ atakas tiamaniere. Estas konate, ke paŝtistoj translokas siajn jurtojn pro la celtrafaj bombardoj de la bestego.

Ni decidas plu descendi tra la arbaro, sed baldaŭ rezignis tiun pikilejon kaj denove malsupreniĝis en la trogvalon, esperante pri la mildiĝo de Blankungulo. Jes, ĉio estas en ordo kaj ni senĝene atingas la riveron. Tamen ĉi tie atendas tre malagrabla surprizo. Ni venas sur etan sablozan kabon formitan de la printempaj akvoj, fluantaj laŭ la trogo. De tiu kabeto ni povas iri nenien ĉar laŭlonge de la rivero ne ekzistas irebla plaĝo. La bordo ĉi tie krute falas rekte en la akvon. Restas nur denove ŝoviĝi tra la apudbordaj dornozaj densejoj, sed ne eblas eĉ imagi kiom da tempo ni bezonus por atingi la bivakon! Tiel ni trafas en duoblan kaptilon: resti celeblaj por la urso-bombardisto kaj pasigi la nokton en la plej malkonvena loko. Kaj intertempe jam aperas longaj montaj ombroj. Rapide krepuskiĝas, kaj la ondoj de humida malvarmo ĉirkaŭas nin minace. Necesas iamaniere aranĝi nian noktumon. Feliĉe ĉi tie kuŝas trunko de sekiĝinta arbo alportita de la rivero. Ni bruligas ĝin kaj pasigas longan malvarman nokton. Ni ne povas dormi ne nur pro malvarmo, kiu frostigas jen unu, jen la alian flankon de la korpo, sed ankaŭ ni devas deĵori atendante la "petolojn" de Blankungulo. Ni deklamas versojn, kantas, rememoras niajn antaŭajn vojaĝojn. Tiel la nokto pasas pli rapide. La fajro iom post iom estingiĝas. Por liberiĝi de la frostiga senmoveco, ni plenumas strangan improvizitan dancon, kaj en svaga lumo de la frua tagiĝo ni similas iujn sovaĝajn sorĉistojn. Ni iom varmiĝas, ankaŭ kuraĝigas nin kaj grimpas for de la trogo. La arbaro estas tenebra, dornoplena kaj malseka pro abunda roso. Bruado de la rivero kaj kompaso orientigas nin bone. Paŝon post paŝo ni trarompas la verdajn fortresojn, kaj post kelkaj horoj niaj kamaradoj ĝoje salutis nin.

4 Ĉe la fajro de paŝtistoj

En nia piedirado kaj grimpado tra foraj kaj sovaĝaj lokoj de Ĉielmontaro ni akiris necesan sperton, alkutimiĝis al ĉiutaga rutina ritmo. Inter ni nun tiom ofte aŭdiĝas la vortoj "kresto", "pasejo", "supro", "roko", ke ties sono mem ŝajne akordiĝas kun peza tretado de niaj montŝuoj, kun ilia obtuza frapado sur ŝtono aŭ susurado sur gruzo. Kaj ni eksentis, ke io mankas al ni. Aperis iu maltrankvilo. Kio ĝi estis? Ĉu ŝteliris al ni la tiel nomata "Tian-Ŝana sopiro", la sento deprimiva, simila al nostalgio? Jes, tia spiritostato povas iam aperi, kaj tiu termino dum longa tempo estis uzata eĉ en la geografia literaturo. Sed baldaŭ ni komprenis, ke mankis al ni komunikiĝo kun homoj!

Iun belan tagon fine ni ekvidis kirgizan ĉasiston, kiu ĉevale rajdis al ni. Poste montriĝis, ke li unua rimarkis nin de granda distanco per siaj akrevidaj okuloj. Li rapide algalopis, elseliĝis kaj ĝoje salutis nin per forta manpremo, bonveniga rideto kaj la vortoj, kiujn ni... ne komprenis.

– Inĝeniero? Moskvo? – li demandis.

– Jes, – ni respondis kaj fervore klinis niajn kapojn ĉar alie ni ne povis klarigi nian aperon en tiu fora valo inter la gigantaj montegoj. Plu sekvis ne malpli stranga "konversacio" per la manoj, fingroj kaj desegnaĵoj. Finfine klariĝis por

ambaŭ flankoj, ke nia nova amiko estas paŝtisto, ke ni estas geografoj, ke li invitas nin kore al sia somera hejmo ĉe la paŝtejo. Ni danke akceptis la inviton.

Vesperiĝis kiam ni venis al la gastama jurto de Oruzbáj. La suno proksimiĝis al rokego de apuda monto, kaj oblikvaj radioj pitoreske lumigis la pacan bildon de la vasta herbejo kaj de la foraj deklivoj. Ĉi tie kaj tie nigraj ombrostrioj jam falis sur tiun verdan tapiŝon, sur la dise starantajn jurtojn de paŝtistoj. La aero rapide malvarmiĝis, kaj fumo de la vesperaj fajroj leviĝis trankvile kaj logante. Aŭdiĝis blekado de brutaro revenanta de malproksimaj gresejoj, gaja rido de ludantaj infanoj, laŭtaj voĉoj kaj paroloj. Ĝuste estas la tempo, kiam ĉiuj rapidas eluzi ĝin antaŭ la baldaŭa trankvilo de la nokto.

Oni jam atendis nin. Ĉirkaŭ la familia fajro "kolomtó" en mezo de la jurto kunvenis la familianoj, proksimaj najbaroj kaj ni, la rusaj gastoj. Multaj homoj tiel kolektiĝis. Sed ĉiu trovis lokon sur mola felto, ekaŭdis bonvenajn vortojn kaj ricevis bongustan regalaĵon. Aĥ, kian miraklan laktaĵon antaŭ ĉio preparis al ni la zorgema mastrino! "Ajrán" ĝi estas nomata. Oni preparas ĝin el kazeo kun boligita kaj malvarmigita lakto, kaj ĝi bonege servas por refreŝigi lacajn homojn.

Iom post iom klariĝis kiu estas kiu, kien kaj por kio ni iras, kiuj brutoj paŝtiĝas sur ĉi-tieaj gresejoj, kiom multaj ili estas. Kaj kiam venis nova gasto, kiu pli-malpli sciis paroli ruse, ni sciiĝis reciproke ankoraŭ pri multaj aliaj aferoj. Tiel longe daŭris la amika konversacio.

Jam nokto ekregis super la montaro. La lokaj gastoj foriris. Sur feltmatracojn oni sternis al ni pure blankajn tolaĵojn, metis kusenojn el lanugo kaj zorgeme kovris nin per varmaj litkovriloj. Sed ne ĉiuj el ni tuj ekdormis. Tra la fumtruo de la jurto rigardis nin lontanaj steloj. Ie henis ĉevalo, iam apudaj arbedoj susuris pro la antaŭmatena venteto. Ne venas dormo en tia nokto. Ĝi ja estis tute neordinara por ni. Koĉjo turnas sin apud mi de flanko al flanko, ion balbutas kaj flustras ne aŭdeble. Poste li skribos pri tiu nokto en sia poemo ruslingva "La paŝtejoj de Tian-Ŝan-montaro":

Herbo friskas en vento,
ĝi per ros' akvumita...
Barb' de l' akva torento
per la roko kombita.

Nokto – nigra ĉevalo
paŝtas sin en herbaro,
maĉas herbon en valo
de altega montaro.

Laŭte snufas kaj henas,
saltas supren ĝi alte.

Ĝin nenio retenas,
ĝi ja kuras senhalte!

Ĵetas stelon subite
al tremantaj folioj,
de l' aŭroro bridite
per la oraj radioj.

Super neĝ', super valo
hufe frapas krakete,
al ĉielo – la stalo
Ĝi jam flugas impete.

Matene ni denove ĝuis la nomadan gastamon. Oni petis, ke ni gastu ankoraŭ – "Nu, almenaŭ dum unu monato"... Karaj, bonkoraj homoj!

Estimata blankbarba maljunulo, popola bardo kun sia kordmuzikilo "komúz", speciale venis por adiaŭe kanti al ni. Multaj homoj, viroj kaj virinoj, liberaj de siaj ĉiutagaj okupoj, grandaĝaj kaj apud-patrin-jupaj infanoj ĉirkaŭis la maljunulon. Por ni oni elektis la plej oportunan lokon, zorgante, ke nenio ĝenu aŭ iel malhelpu nin. Tia estas ne skribita kaj rigore atentata regulo rilate al gastoj.

Baldaŭ ekregis silento, ĉies okuloj estis fiksitaj ĉe la bardo. Li ektuŝis la kordojn kaj komencis recitativon per la voĉo surprize forta, alta kaj bela.

– Ĉu estas fabelo aŭ sonĝo? – Koĉjo diris kaj ĉirkaŭrigardis la tutan bildon. Grandega verda kaliko, kontrasta al la neĝe blankaj montosuproj sub la blua ĉielo, estis unika scenejo, kiun ni iam ajn vidis antaŭe.

El tradukaj diroj, disaj kaj aludaj, ni eksciis, ke la maljuna bardo rakontis pri historiaj peripetioj de sia popolo. Streĉitaj, atentoplenaj vizaĝoj, retenita spirado kaj subitaj erupciaj aklamoj atestis, ke vera fascino kaptis la tutan ĉeestantaron.

Kiam finiĝis la recitalo kaj ni jam estis forirontaj, Oruzbáj denove invitis nin al sia jurto por diri la lastajn vortojn de adiaŭo.

Tradicia "ŝirzak" – buntkolora tapiŝo – ornamis la loĝejon. Agrabla surprizo estis al ni filineto de la gemastroj Alimán, kiun ni ne vidis hieraŭ. Kun ruĝa kravato ĉirkaŭ la kolo, ŝi ĝoje salutis nin. Ŝi komencis paroli kun ni ruse, montris al ni siajn kirgizlingvajn lernolibrojn. En ŝiaj nigraj okuloj brilis sparkoj de intereso kaj amikemo. Ni donacis al ŝi skribilojn, kajerojn, bombonojn. Koĉjo vigle konversaciis kun ŝi, kaj kiam ili embarasiĝis por bone kompreni unu la alian, ili gaje ridis. La patro kontente kaj aprobe observis ilian konversacion, videble fiera pro avantaĝoj de sia filino. Subite li leviĝis kaj kore premis niajn manojn, dirante iujn vortojn.

– Kion li diras? – iu demandis.

La knabino ruĝiĝis pro la interveno kaj respondis:

– Mia patro diras, ke klereco estas fonto ne elĉerpebla. Tiel nia popolo proverbas.

Neniu el ni povis tiam supozi, ke tiu konversacio difinos la sorton de la malgranda knabino. Ne sciis ankaŭ Koĉjo, ke post kelkaj jaroj li verkos poemon pri ŝi kaj titolos ĝin per ŝia infana kromnomo – Alimán. Jen estas fragmento el tiu poemo – pri la sonĝo de Alimán:

Tardas. Aero frida
plektas striojn de l' fumo...
Vento – povra ŝafido
kaŭras ĉe la noktumo.

Sub glacia ĉielo
nigras nokt' de Tian-Ŝan.
Sur la pelto kamela
dormas nun Alimán.

Kaj apude kunestas
libroj, ruĝa kravato...
Sonĝo klare sugestas
kvazaŭ paĝo legata.

Sonĝo urbon konstruas
en la montaj penatoj –
vivo novas kaj bruas
en la domoj kaj stratoj.

En apudaj kioskoj
jen por via inspiro –
Puŝkin kaj Majakovskij,
Navoí kaj Ŝekspiro.

Ĉu Madrid aŭ Peruo,
tuta mondo senviza! –
Sonĝo alta kaj blua
en la jurto kirgiza...

Mia amiko por ĉiam ekamis la popolon kaj la montaron, vesperan friskon de gresejoj kaj gastaman varmon de la nomada fajro. Li ne povis subpremi en si la ĉarmon de Ĉielmontaro, kaj verve skribis plu en sia poemo:

Alimán! Mi preferas
jurton al la palaco!...

Mi preferas la selon
kaj la vojon nomadan
al komforta fotelo,
al la urba vivado.

...Alimán prenis paŝtistan fluton "ĉoór" kaj ludis al ni malgajan adiaŭan melodion. Ni ekiris nian pluan vojon akompanataj de multaj volontuloj.

Koĉjo silente iras apud mi. Rideto de profunda kontento heligas lian vizaĝon.

– Vi scias, – li diras, – ŝajnas, ke mi aŭdas iun strangan, belan muzikon... – Li eĉ haltas por momento, levas la manon kaj kvazaŭ atentigas min pri la sonoj aŭdataj.

Li verkas, mi scias tion.

5 La lastaj surprizoj

Oni ĝojas kiam celo estas atingita, sed post iom da tempo oni bedaŭras pri la ĉeso de sia strebado, pri iu perdita impulso, kiu aktivigas homon, puŝas lin antaŭen kaj antaŭen al novaj kaj novaj celoj atingendaj. Tial ni descendas de la ĉielaj montoj iom tristaj. Ni forlasas tiun foran, ĉarman ermitejon, ne certaj, ĉu ni revidos ĝin iam. Tamen baldaŭ ni vidas alian nekutiman pejzaĝon. Nia melankolio foriĝas. Ho jes, ĉar ni vidas la maron. La maron, kiu plaŭdetas alte en la montaro! Ĝi rebrilas sub la suno, lazura kaj kvieta. Fore, ĉe la horizonto, vidiĝas miraĝe neĝe kovritaj montoj, similaj al nuboj.

Neniam glaciiĝanta "Varma lago" (kirgize "Issik-Kul") efektive ja similas maron, kvinoble pli granda ol la fama lago Ĝeneva. La antaŭmontoj de Alpoj de Savojo bedaŭrinde ŝirmas la imponan grupon de la Monto Blanka, kaj oni ne povas vidi ĝin de sur la bela svislanda lago, sed ĉi tie, sur la bordo de "Kirgiza maro", etendiĝas aperta panorame grandioza monto-ĉeno pli ol 300 kilometrojn longa.

Post mallonga ripozo en apudborda vilaĝo, ni decidis iri plu dum nokto por eviti troan varmon de la sunplena tago. La ondoj facile plaŭdis ĉe niaj piedoj, agrabla brizo blovetis sur niajn vizaĝojn. Iom post iom krepusko densigis la ombrojn, vualigis konturojn de la bordo, kaŝis la apudan montaron. Ĉirkaŭaj altkreskaj gramenacoj nun aspektis kiel sovaĝa ĝangalo.

Ni marŝas ritme, pendolsimile. Unutone tintas gamelo, kroĉita al dorsosako, gruzo susuras sub la piedoj, ies bastono frapetas kontraŭ la ŝtonojn. Dormemo pli kaj pli nebuligas la konscion, kaj jen iuj sonĝeroj, malcertaj kaj svagaj, hantas en niaj laciĝintaj kapoj.

Fine dormo faligis nin en sekan, dezertan herbaron kaj nokto silenta kaj mistera nin protektis. Sed stranga estis nia vekiĝo: neniu el ni povis sin levi. Ne nur sin levi, ni ne povis eĉ moveti niajn rigidajn krurojn kaj brakojn! Ni kuŝis senhelpaj sub radioj de la suno, jam ardanta de la sennuba ĉielo. Kaj ĉirkaŭe ni ekvidis mirindan spektaklon, kvazaŭ iun strangan sonĝon aŭ fikciajn aventurojn

de la fama barono Munkhaŭzeno: inter niaj sternitaj korpoj saltadis leporoj, en la aero jen kaj jen frapis flugiloj de fazankokoj, ie proksime gruntis aproj! Ve, la spektaklo ne plu videbla en la nuna tempo.

Iom post iom la panea stato pasis. Ni aliris la maron kaj banis nin en ĝi. Agrabla ĉirkaŭplaŭdo de akvo, kvazaŭ delikata silko, glitis sur niaj korpoj kaj tre baldaŭ tute refreŝigis nin. Denove la bela mondo malfermiĝis antaŭ ni, sed – ho ve! – nun por diri al ĝi nian lastan "adiaŭ".

6 Post multaj jaroj

Grizhara homo, fakestro de mondfama tag-gazeto malrapide aliras al indikita pordo kaj haltas kvazaŭ hezitante. Lia koro rapidigas la batojn ĉar tute eksterordinara renkontiĝo tuj estas okazonta. Fine li forte tiras la anson kaj eniras en la sunplenan ĉambron, duonfermante siajn vitrumitajn okulojn pro neatendita torento da lumo. Svelta, belvizaĝa virino renkonte ekpaŝas de la tablo. Dum momento ambaŭ silentas. Rigardante unu la alian, ili enspiras provizon de aero kaj eksplodas per reciprokaj aklamaj salutoj. Akademianino pri sciencoj, ĉefredaktorino de la Kirgiza Enciklopedio, iama filino de la paŝtista familio en la Ĉielmontaro, Alimán renkontis fine la amikon de sia infaneco – la onklon Koĉjo...

Post nelonga konversacio, plena de emociaj rememoroj, aŭto jam haste portas ilin tra belega, floranta ĉefurbo de Kirgizio. Rapide restas post ili la muregoj de mallarĝa montofendo Boom kaj jen malfermiĝas la vasta panoramo de la "Kirgiza maro". Konata vojo al Koĉjo! Sed nun li ventrapide veturas sur luksa ŝoseo. Post iom da tempo la ŝoforo turnas la stirilon, kaj la aŭto direktiĝas al la valo. Tie ankaŭ bona vojo kondukas ĉiam pli kaj pli alten ĝis, fine, la aŭto haltas sur placeto.

Kiel en la tempo delonge pasinta, sur la verda herbejo vidiĝas jurtoj de paŝtistoj. Apude nun ankaŭ staras specialaj tendegoj – melkejoj, laktaĵfarejoj, feltondejoj, vendejoj, ambulanco kaj nepra klubejo. Alimán kun fiera ĝojo ĉion montras al sia amiko. Li prenas ŝian manon kaj diras, ridetante iom ĝeneme:

– Ĉu vi memoras, Alimán? Jen estas via sonĝo realiĝinta.

*El la gazeto **Fonto**, 1983, n-ro 37, p. 7-17.*

Liven Dek

LA BLEKO DE L' ŜARGÚ

Foje rekta, foje sinua, la streta pado kondukas orienten, al la rivero kiu venas de la altaj kaj misteraj montoj de la nordo. La giganta disko de la ruĝa suno dronis jam post la horizonto, kaj la vespera krepusko inundis la tutan ĉielon per svaga vualo el lumo verda kaj malva. La atmosfero plenas de strangaj aromoj, kaj, inter la ombroj, senurĝe, serene, sed kun firma decido, paŝas virino.

Blovas tepida zefiro, kiu lulas milde, preskaŭ nerimarkeble, la longajn kaj graciajn branĉojn de la boĥu-oj, jam plene ŝarĝitaj de mana-oj, la plensukaj fruktoj kies dolĉa karno kantas kiam oni ĝin gustumas. Lontane, la terura bleko de maskla ŝargú akre vundas la silenton de la valo. Eble la malsato pelas lin al nokta ĉasado, eble lia korŝira krio estas nur amalvoko por kiu, tamen, ne sonas respondo. Ajne, la virino daŭrigas sian marŝon. Ŝi ne timas. Ne, tute ne. Jam de longe ŝi lernis ne plu timi.

Alveninte al certa punkto de la vojo, ŝi forlasas la padon kaj penetras en la ne tro densan arbaron, dekstren. En la ĉiela volbo, la ronda vizaĝo de Njĥé fariĝas pli klara, nete konturita kun la definitiva alveno de la nokto. Baldaŭ aperos ĉe la horizonto ĝia fratino, la eta luno Ejcé, por kune fari la kutiman rondon tra la nigra firmamento. Dume, sur apenaŭ skizita vojo, la virino avancas zorgante ne stumbli sur la ŝtonetoj kaj elstaraj radikoj, ale al speciala renkontiĝo.

Iom poste, la arbaro fariĝas pli kaj pli maldensa. La milda vento murmuras inter la grandaj folioj skarlataj de la boĥuoj. Ŝi haltas. Antaŭ ŝi etendiĝas ne tro larĝa strio da senarba tero. Tie, apud tri simplaj tomboj, kuŝas la metalaj ruinoj de frakasita kosmoŝipo.

Jam la pala cirklo de Ejcé komencas montriĝi ĉe la horizonto, lante, kiel timida fraŭlino, dum ie, kaŝe en la frondaro, la fiera kriĉo de nokta birdo Tají resonas salute. La virino proksimiĝas al la griza maso de la rompita giganto, kies korpon la fajna kaj densa herbo komencas jam parte kovri per sia velura tapiŝo nigra kaj ora.

Tra granda truo en la ŝirita ŝelo, ŝi alvenas interne. Obskuras, kaj la grandaj kaj esprimplenaj okuloj bluaj de la virino bezonas iom da tempo por kutimiĝi al la manko de lumo. Tamen, eĉ ne unu momenton ŝi hezitas: ŝia memoro konservas kun matematika precizo ĉiun centimetron de la ŝipo. La koridoroj labirintas, sed ŝi alvenas facile al la kapo de la ruina koloso, ĝis la ĉambro kie situas ĝia cerbo: la komandejo. Neniu ŝanĝo konstateblas ekde ŝia lasta vizito. Ŝajnas kvazaŭ nenio en tiu sovaĝa, kruda kaj primitiva planedo, kuraĝus profani la lokon. Aŭ ĉu eble jes? Jen, en angulo de la kajuto la virino unuafoje rimarkas la ekziston de io nova, neatendita: kelkaj herbetoj, oraj kaj nigraj, obstine luktas por

supervivi, sieĝitaj de la senanima metalo, alkroĉitaj al kelkaj grajnoj de tero kaj polvo, kiujn la tempo akumulis. La hela lumo de Njĥé ŝovas sin tra ŝiro en la supro de la ŝirma ŝildo, iam protektanta la kristalan kupolon kiu tegmentas la kajuton. Ŝia koro kapriolas. Nur la vivo, nur la senbrida potenco de la vivo kapablas venki la morton.

La dekstra mano de la virino promenas, en delikata kareso, sur la frida surfaco de la komanda panelo. Etaj lampoj, butonoj, diĝitaj ekranoj... Sur la klavaro de la centra komputoro, nun preskaŭ plene detruita, ŝia mano haltas momenton. Tiam, kun delikata movo, kvazaŭ de sperta piankoncertisto, la sveltaj fingroj de la virino tajpas vorton: SALUTON.

Respondo ne venas.

For, kvankam ĉi-foje pli proksime, aŭdiĝas denove la korŝira bleko de l' ŝargú.

Dum kelkaj sekundoj, la virino restas senmova meze de silento preskaŭ religia, kvazaŭ ŝtoniĝinta, kvazaŭ trafita de mistera sorĉo, simile al krizalido kiu, kovrita per sia protekta ŝelo, sin nutrus per ĉiuj siaj plej amataj rememoroj, asimilante ilin kun terura avido, por kreski. Jes, por kreski. Por kreski kaj transformiĝi en papilion.

La pensoj kirliĝas: la meteoroj; la terura kaj neriparebla paneo kaŭzanta la morton de la tri kompanoj, tiam vojaĝantaj en subviva tranco; la nekontrolebla devio for de la antaŭplanita itinero; la kraŝo sur nekonata planedo; la intensaj klopodoj por supervivi; la senfundamenta espero esti trovita; la neeltenebla soleco; la longa kaj insida atendo, unu monaton, du, tri... unu jaron, du...

Kiam la sorĉo estingiĝas, du larmoj kristale puraj glitas lante sur la vangoj de la virino. Kun mildaj movoj, ŝi direktas sin al angulo de la panelo, kie diĝita kalendaro obstine indikas, per siaj intermite lumaj ciferoj, la ĝustan daton sur la Tero: 2836 12 25. Tiu aparato funkcias, sed nur ĉar tion ŝi deziris. Neniam ŝi faris uzon de la sola fonto de energio disponebla post la kraŝo, la eta sekurecpilo, por alia ajna neceso. De la unua momento ŝi konektis ĝin, sole kaj ekskluzive, al la panelkalendaro indikanta la tempon sur la planedo Tero. La tagoj de ĉi planedo ne longas kiom la teraj, kaj la kalendaro... Jes, kelkaj ciferoj kiel lasta kaj senespera umbilika ŝnuro.

Neatendite, en la daŭro de palpebrumo, ŝi fulme ĵetas la dekstran manon al la kalendaro kaj kaptas la kablojn konektitajn al la pilo. Forta, seka tiro. Deŝiro. La ciferoj svenas, vanuas. La kalendaro ĉesas funkcii. Ekstere, denove tondras longe kaj potence la bleko de l' ŝargú, ĉiufoje pli kaj pli proksima. En la duonombro de la kajuto ŝi turniĝas kaj kontemplas, apenaŭ dum momento, la etan tufon de fragilaj herbetoj. Poste, ŝi forlasas la ejon kaj eliras el la restoj de la kosmoŝipo.

En la nigro de la nokta ĉielo brilas jam plene la du lunoj, Njĥé kaj Ejcé, dum ĉirkaŭe, kvazaŭ svarmo da lampiroj, scintilas centoj da steloj. Senmove, penseme, la virino staras antaŭ la tri tomboj kun la rigardo kroĉita al tiuj lumaj punktetoj. Neniu el ili estas la Suno. La astro, kiu vidis ŝin naskiĝi, troviĝas nun for, tre for,

profunde kaj neatingeble for. Ŝia rigardo falas sur la tri tombojn. Ŝi genuiĝas kaj komencas mallaŭte preĝi.

Subite, bruo, sono de paŝoj proksimiĝantaj el la arbaro. Io, aŭ iu, avancas al ŝi de malantaŭe. La virino ne moviĝas. Ŝi ne timas. Neniu venas al ĉi sankta loko. Neniu... krom li.

La paŝoj haltas tuj apude kaj la virino sentas fortan spiradon siadorse. Peza manego ekpremas ŝian delikatan ŝultron.

Li venis.

Aŭdiĝas stranga, kvazaŭ sufokita, kun alia tono, la kruda bleko de l' ŝargú. Ŝi ne moviĝas, nur preĝas kaj, per sia vango, karesas tenere la enorman manon kun tri akra-ungaj fingroj plene kovritaj de skvamoj kaj krudaj haroj. Tiam ŝi memoras frazon: "Se vi ne povas havi kion vi amas, amu kion vi havas". Kaj kun amo infinita, kun tiu amo propra nur al patrinoj, ŝi brakumas sian ventron, jam videble ŝvelintan.

El Literatura foiro, n-ro 102, marto 1987, p. 10-12.

4
MONDLITERATURO

LA BIBLIO: LA PREDIKANTO

Ĉapitro 3

Por ĉio estas tempo, kaj horo difinita estas por ĉiu afero sub la suno. Estas tempo por naski kaj tempo por morti; estas tempo por planti kaj tempo por elŝiri la plantitaĵon. Estas tempo por mortigi kaj tempo por kuraci; estas tempo por detrui kaj tempo por konstrui. Estas tempo por plori kaj tempo por ridi; estas tempo por ĝemi kaj tempo por salti. Estas tempo por disĵeti ŝtonojn kaj tempo por kolekti ŝtonojn; estas tempo por ĉirkaŭbraki kaj tempo por foriri de ĉirkaŭbrakado. Estas tempo por serĉi kaj tempo por perdi; estas tempo por konservi kaj tempo por ĵeti. Estas tempo por disŝiri kaj tempo por kunkudri; estas tempo por silenti kaj tempo por paroli. Estas tempo por ami kaj tempo por malami; estas tempo por milito kaj tempo por paco. Kian profiton havas faranto de tio, kion li laboras? Mi vidis la penemecon, kiun Dio donis al la homidoj, por ke ili turmentiĝu per ĝi. Ĉion Li kreis bela siatempe, kaj scion pri la mondo Li enmetis en ilian koron, sed tiel, ke homo ne povas kompreni la farojn, kiujn faris Dio, de la komenco ĝis la fino. Mi scias, ke ekzistas nenia bono por ili, krom ĝoji kaj fari bonon en sia vivo. Kaj se homo manĝas kaj trinkas kaj ĝuas bonon de sia tuta laborado, ĝi estas dono de Dio. Mi scias ke ĉio, kion faras Dio, restas eterne; al ĝi oni nenion bezonas aldoni, kaj de ĝi oni nenion bezonas depreni: kaj Dio faris, ke oni Lin timu. Kio fariĝis, tio ekzistas de longe, kaj kio estas fariĝonta, tio antaŭ longe jam estis, kaj Dio revokas pasintaĵon. Ankoraŭ mi vidis sub la suno: loko de juĝo, kaj tie estas maljusteco; loko de vero, kaj tie estas malico. Mi diris en mia koro: piulon kaj malpiulon juĝos Dio; ĉar estas tempo por ĉiu afero kaj por ĉio, kio fariĝas tie. Mi diris en mia koro: tio ĉi estas por la homidoj, por ke Dio ilin elprovu, kaj por ke ili vidu, ke ili estas bruto per si mem. Ĉar la sorto de homidoj kaj la sorto de bruto estas sorto egala: kiel ĉi tiuj mortas, tiel mortas ankaŭ tiuj, kaj sama spirito estas en ĉiuj, kaj supereco de homo kontraŭ bruto ne ekzistas, ĉar ĉio estas vantaĵo. Ĉio iras al unu loko: ĉio fariĝis el polvo kaj ĉio refariĝos polvo. Kiu scias, ĉu la spirito de homidoj leviĝas supren kaj ĉu la spirito de bruto malleviĝas malsupren en la teron? Kaj mi ekvidis, ke ekzistas nenio pli bona, ol ke homo ĝuu plezuron de siaj faroj, ĉar tia estas lia sorto; ĉar kiu alkondukos lin, por vidi, kio estas post li?

El la hebrea tradukis L. L. Zamenhof.
Eldonis Hachette, Parizo 1907, p. 9-10.

Cervantes

LA INĜENIA HIDALGO DON QUIJOTE DE LA MANCHA

Ĉapitro 1 – Kiu temas pri la stato kaj la vivmaniero de la fama hidalgo Don Quijote de La Mancha

En vilaĝo de La Mancha, kies nomon mi ne volas memori, antaŭ nelonge vivis hidalgo el tiuj kun lanco en rako, antikva ŝildo, osta ĉevalaĉo kaj rapida levrelo. Stufaĵo pli ofte bova ol ŝafa[1] en la matenoj, haketita viando kun salo preskaŭ en ĉiu nokto, grivoj kaj frititaj ovoj sabate, lentoj vendrede, kaj plie kolombido dimanĉe prenis tri kvaronojn de lia enspezo. La alian kvaronon konsumis velura sajo[2], pluŝaj kuloto kaj pantofloj por la festaj tagoj, dum en la cetero de la semajno li kontentiĝis portante delikatan lanaĵon.

Li tenis en sia domo mastrumantinon kun pli ol kvardek jaroj, nevinon ankoraŭ ne dudekjaran kaj laborulon doman kaj agran, kiu same okupiĝis selante la ĉevalaĉon kiel uzante la serpon.

Nia hidalgo havis proksimume kvindek jarojn. Li estis fortika, magra, kavavizaĝa, frua ellitiĝanto kaj amiko de la ĉaso. Oni diras, ke li portis la nomon Quijada aŭ Quesada (ĉar ekzistas kelka diferenco de opinio inter la aŭtoroj skribintaj pri ĉi temo), kvankam laŭ seriozaj konjektoj, ŝajnas, ke li nomiĝis Quijana. Sed tio ne gravas al nia rakonto: sufiĉas, ke ĝi ne deviu de la vero eĉ unu solan punkton. Oni sciu do, ke la supre menciita hidalgo, en siaj horoj de neniofarado, t. e. dum la pli granda parto de la jaro, sin fordonis al la legado kun tiom da persisto kaj plezuro, ke li preskaŭ tute neglektis ĉasi kaj eĉ administri sian bienon; kaj ĝis tia ekstremo iris lia scivolo kaj ekstravaganco ĉi-rilate, ke li vendis multajn akreojn da plugotero por aĉeti kaj legi kavalir-librojn, kaj tiel li prenis hejmen, kiom da ili li trovis. Inter ili, plej plaĉis al li la verkoj de la fama Feliciano de Silva, ĉar ties klara prozo kaj komplikaj rezonoj ŝajnis al li veraj perloj, precipe kiam li legis pri galantaĵoj kaj defioj ofte skribitaj laŭ la jena stilo: "La nekompreneblaj rezonoj, kiujn al mia komprenemo oni prezentas, tiel ŝancelas mian komprenon, ke kompreneble, mi plendas je via belega moŝtulino". Kaj ankaŭ kiam li legis: "La altaj ĉieloj, kiuj vian moŝton dian per steloj fortigas, igas vin merita je la merito, kiun meritas via grandeco".

La kompatinda kavaliro perdadis la saĝon super tiaj rezonoj kaj klopodegis ilin kompreni kaj klarigi al si ties sencon, kvankam Aristotelo mem kaptus

[1] *pli ofte bova ol ŝafa* – tiutempe oni taksis pli bongusta kaj valora la viandon ŝafan ol la bovan.

[2] *sajo* – speco de antikva kazako longa kaj sen butonoj.

neniom kaj eltirus nenian signifon el ili, eĉ se li reviviĝus nur tiucele. Ne tre plaĉis al li la vundoj faritaj kaj ricevitaj de don Belianís, ĉar li imagis, ke lia vizaĝo kaj korpo certe plenis de cikatroj kaj markoj, kiom ajn eminentis la ĥirurgoj lin kuracintaj. Tamen li laŭdis la promeson de la aŭtoro iam daŭrigi kaj meti finon al tiel senfinaj aventuroj, kaj multfoje nia hidalgo sentis la deziron preni mem la plumon kaj alskribi al la libro la finan parton. Kaj sendube tion li entreprenus, kaj eĉ tute plenumus, se ne malhelpus lin aliaj pensoj pli gravaj kaj konstantaj.

Kun la pastro de sia vilaĝo, dokta homo licenciita ĉe Sigüenza, li diskutis multajn fojojn, ĉu estis pli bona kavaliro, Palmerín de Anglujo aŭ Amadís de Gaŭlio. Sed majstro Nicolás, la barbiro de la vilaĝo, diris, ke plej grandis la Kavaliro de la Suno, kaj ke, apenaŭ komparebla kun li, povus esti nur don Galaor, frato de Amadís de Gaŭlio, ĉar Galaor havis komplezeman naturon, ne montriĝis tiel afekte delikata nek tiel plorema kiel lia frato, kaj laŭkuraĝe li rangis eĉ ne unu colon post li.

Resume, la libroj tiel absorbis lin, ke dum la noktoj li legis de helo ĝis helo, kaj dum la tagoj de obskuro ĝis obskuro, kaj tiel, pro multa lego kaj apenaŭa dormo, sekiĝis al li la cerbo, tiamaniere, ke li tute perdis la saĝon. Lia fantazio pleniĝis per ĉio, kion li legis en la libroj: ensorĉoj, kvereloj, bataloj, defioj, vundoj, galantaĵoj, am-aferoj, tempestoj kaj neeblaj absurdoj. Kaj tiel fiksiĝis al li en la kapo, ke la tuta aparato de elpensitaj fabeloj estas vera, ke por li ne ekzistis en la mondo historio pli aŭtentika. Li asertis, ke Cid Ruy Díaz estis tre bona kavaliro sed ne komparebla kun la Kavaliro de la Arda Glavo, kiu per unu sola trahako dividis en du partojn paron da ferocaj kaj monstraj gigantoj. Li havis eĉ pli bonan opinion pri Bernardo del Carpio, ĉar ĉe Roncesvalles li mortigis inter la brakoj la ensorĉitan Rolando, same kiel Heraklo la titanon Anteo. Li laŭde parolis pri la giganto Morgante, ĉar li sola montriĝis afabla kaj ĝentila, kvankam li apartenis al generacio de orgojlaj kaj insolentaj grandeguloj. Sed, precipe, li diris multon bonan pri Reinaldos de Montalbán, ĉefe kiam li image vidis lin elrajdi el sia kastelo, rabi kion li renkontis kaj transmare ŝteli idolon de Mahometo tute oran laŭ la historio. Kaj li volontege fordonus sian mastrumantinon kaj aldone eĉ sian nevinon por la eblo tani la haŭton de la perfida Galalón.

Nu, kiam li tute perdis la saĝon, venis al li en la kapon la plej stranga ideo, neniam antaŭe trafinta frenezulon en ĉi mondo. Ŝajnis al li konvene kaj necese, tiel por grandigo de lia honoro, kiel por servo al lia lando, fariĝi vaganta kavaliro kaj iri tra la mondo kun armaĵo kaj ĉevalo, serĉante aventurojn kaj farante kion, laŭ liaj libroj, plenumis la vagantaj kavaliroj: ripari arbitrojn kaj riski sin en agojn kaj danĝeron, kiuj, se superitaj, havigas eternan honoron kaj famon. La kompatinda imagis, ke pro la kuraĝo de sia brako li jam ricevis la kronon de, almenaŭ, la imperio de Trebizondo; kaj pelate de la stranga plezuro, kiun vekis en li tiel agrablaj pensoj, li rapidis efektivigi sian deziron.

Unue li frote purigis armaĵon, kiu apartenis al liaj praavoj, kaj kiu, rusta kaj ŝima, kuŝadis jam de longega tempo, forgesite, en angulo. Li elfrotis kaj riparis ĝin kiel eble plej bone, sed rimarkis gravan mankon: la kasko estis nur simpla kapopeco sen viziero. Tamen li inĝenie aranĝis tion, ĉar li faris per kartonoj specon de viziero, kiu, fiksita al la kasko, donis al la tuto aspekton de kompleta helmo. Estas vere, ke por vidi, ĉu ĝi havas sufiĉan forton por elteni la hakojn, li elingis la glavon, frapis per ĝi du fojojn la vizieron, kaj jam per la unua bato kaj en unu momento ruinigis kion li antaŭe konstruis dum unu semajno. Ne tre plaĉis al li ĝia facila rompiĝemo, kaj por eviti al si tian danĝeron, li refaris la vizieron metante fer-stangetojn sur ĝia interna flanko, ĝis li kontentiĝis je ĝia eltenemo; kaj ne zorgante submeti ĝin al nova provo, li juĝis la tuton kiel kompletan helmon eksterordinare bonan.

Poste li iris vidi sian ĉevalaĉon, kaj kvankam ĝi havis pli da afekcioj ol realo centavojn, kaj pli da difektoj ol la ĉevalo de Gonela, kiu *tantum pellis et ossa fuit*[1], ŝajnis al li, ke nek Bucefalo, de Aleksandro la Granda, nek Babieca, de Cid Ruy Díaz, egalis ĝin. Kvar tagojn li pasigis cerbumante kiun nomon li donu al la ĉevalo, ĉar – li diris en si – ne estus juste, ke rajdbesto bona per si mem kaj apartenanta al renoma kavaliro ne havus faman nomon; tial li celis elekti unu, kiu proklamus, kia estis la ĉevalo antaŭ ol ĝia mastro fariĝis vaganta kavaliro, kaj kia ĝi estis nun; vere, se la mastro sanĝiĝis al nova stato, ankaŭ la ĉevalo devus alpreni nomon faman kaj laŭte sonantan, kiel decis al lia nova ordeno kaj funkcio. Tiel do, li elpensis, trastrekis, transformis kaj refaris en sia memoro kaj fantazio multajn nomojn, ĝis fine li nomis la ĉevalon Rocinante, nomo, laŭ li, alta, sonora kaj signife indikanta tion, kio la besto antaŭe estis, kaj ankaŭ tion, kio ĝi estis nun: la unua inter ĉiuj ĉevaloj de la mondo[2].

Doninte nomon al la ĉevalo tiel konforman al lia gusto, li decidis fari la samon rilate sin mem kaj cerbumadis ok pliajn tagojn ĝis fine li alprenis al si la nomon Don Quijote; kiel supre dirite, sur tio sendube baziĝis la aŭtoroj de ĉi vera historio por konjekti, ke li certe nomiĝis Quijada, ne Quesada, kiel aliaj asertis. Sed memorante, ke la kuraĝa Amadís, ne kontenta je tiu sola nomo, alprenis ankaŭ la nomon de sia regno por famigi ĝin, kaj nomiĝis Amadís de Gaŭlio, same li, kiel bona kavaliro, volis aldoni al sia nomo tiun de sia lando kaj nomi sin Don Quijote de La Mancha. Li pensis, ke li tiel proklamus sian familion kaj ankaŭ sian landon, kiun li honoris alprenante ĝian nomon.

La armaĵo jam estis pura, la kasko, kompleta, la ĉevalaĉo havis sian nomon, li la sian, kaj tiam li ekpensis, ke mankas nur serĉi damon, al kiu enamiĝi, ĉar

---

[1] *tantum pellis et ossa fuit* – (latinaĵo) – tiom da haŭto kaj ostoj ĝi havis.

[2] *la unua inter ĉiuj ĉevaloj de la mondo* – Don Quijote faras vortoludon. 'Rocín' en la hispana signifas ĉevalaĉo, kaj aldonante al ĝi la finaĵon 'ante' (kiu povas signifi 'antaŭe' kaj 'super ĉiuj') li indikis, ke ĝi antaŭe estis 'rocín', kaj ke, jam kiel kavalira rajdobesto, ĝi rangas super ĉiuj ĉevaloj.

vaganta kavaliro sen am-aferoj similas al arbo sen fruktoj kaj folioj, al korpo sen animo. Li diris en si: "Se pro miaj pekoj, aŭ pro bona sorto, mi renkontos ie giganton, kio ordinare okazas al la vagantaj kavaliroj, kaj mi lin faligos en duelo, aŭ trahakos lin ĉe la mezo de la korpo, aŭ fine venkos kaj submetos lin... ĉu ne estus bele sendi lin, ke li eniru kaj falu sur la genuoj antaŭ mia dolĉa damo kaj diru per voĉo humila kaj servuta: 'Sinjorino, mi estas la giganto Caraculiambro, mastro de la insulo Malindrania, kaj venkis min en duelo persona la neniam sufiĉe laŭdata kavaliro Don Quijote de La Mancha. Li ordonis, ke mi prezentu min ĉe via moŝto, por ke via ekscelenco disponu je mi laŭ via volo'?" Ho, kiel feliĉis nia bona kavaliro, kiam li faris tian paroladon, kaj eĉ pli, kiam li trovis iun, kiun li povis nomi sia damo! Okazis, laŭ la famo, ke en vilaĝo proksima al la lia vivis juna kampulino de tre plaĉa aspekto, al kiu li foje enamiĝis, kvankam ŝajne ŝi neniam tion sciis kaj eĉ ne suspektis. Ŝi nomiĝis Aldonza Lorenzo, kaj li opiniis ŝin taŭga ricevi la titolon "sinjorino de liaj pensoj". Serĉante al ŝi nomon, kiu iel konvenus al la lia kaj elvokus princinecon kaj grandsinjorinecon, li fine decidis alnomi ŝin Dulcinea del Toboso – ĉar El Toboso estis ŝia naskoloko – kaj la nomo ŝajnis al li tiel harmonia, rara kaj signifoplena, kiel la ceteraj, kiujn li elpensis por si mem kaj por ĉio sia.

El la hispana tradukis Fernando de Diego.
Eldonis "Fundación de Esperanto" (HEF), Zaragoza 1977, p. 27-32.

Camões

LA LUZIDOJ

9a Kanto

64

La novaj argonaŭtoj borden stiras
al tiu freŝo, kie interarbe
promene la diinoj belaj iras
en ŝajna senzorgemo, nesingarde.
Elcitre, kelkaj dolĉajn sonojn tiras,
aŭ el sonoraj flutoj aŭ elharpe;
aliaj ŝajne orajn arkojn celas
al bestoj, tamen ilin ne ĉaspelas.

65

Konsolis ilin la majstrino sperta
disiĝi tra la kampoj kaj sub pelo
ne tuj subiĝi kiel pred' inerta,
sed fari sin de la deziroj celo.
Pri siaj formoj kun konfido certa,
malkovras kelkaj sin en tuta belo;
lasinte flanken ĉion nenaturan,
sin metas nudaj en la akvon puran.

66

La fortaj viroj, kiuj sur la strandon
piedon metas kaj al ter' avidas,
(eniras ili sen escept' la landon,
ĉar ĉiu bestojn ĉasi ekdecidas)
sur ĉarmaj montoj ĉasi tian frandon
sen laz' aŭ reto ja ne antaŭvidas:
cedema, dolĉa predo laŭdestina,
ĉar ĝin jam antaŭvundis Ericina.

67

Pafilojn fidas kelkaj, arbalestojn
aliaj, kaj decide sin enmetas
en la arbaron por ĉaspeli bestojn,
kaj tra ombritaj vojoj ekimpetas;

en ombroj, kiuj la varmegmolestojn
fortenas de la verdo, pluraj tretas
laŭ akvo milde- kaj serenekura
sur blankaj ŝtonoj al la plaĝ' plezura.

68

Tra l' verdo branĉa tiam la subita
vidaĵ' aperas: bunto de koloroj,
laŭvide kaj laŭsente ne kreita
de la kolor' de rozoj aŭ de floroj,
sed de la fajna lan' aŭ silko glita,
pli incitantaj forton de amoroj,
per kiuj vestas sin la rozoj homaj,
por armi sin per artaj logoj kromaj.

69

Velozo tuj ekkrias kun ekscito:
"Sinjoroj, ni pri stranga ĉas' atestas!
Se daŭras plu pagana praa rito,
ĉi bosk' al dioj konsekrita estas.
Ni pli malkovris ol la homspirito
deziris iam ajn; sin manifestas
ĉi tie da aferoj raraj multo,
kaŝitaj antaŭ monda homa stulto.

70

Ni sekvu ĉi diinojn por observo,
ĉu estas ili veraj aŭ imagaj."
Ĉe tio, pli rapidaj ol la cervo,
ekkuras ili laŭ la bordoj lagaj.
La nimfoj fuĝas tra la kampa herbo,
sed pli ruzeme ol rapideagaj,
laŭgrade kun rideta kriabundo,
sin lasas finatingi de ĉashundo.

71

De unu l' orharar' envente ŝvebas
dumkure kaj la basko delikata;
eksplode la deziroflamoj krevas
pro l' karno blanka tie elmontrata.
Alia ruze falas kaj sin levas
kun pli da dolĉo ol koler' malŝata

por tiu, kiu stumble sur ŝin sinkas
post ol li ŝin sur blanka strand' atingas.

72

Aliaj vidas jam en la proksimo
diinojn nudajn, kiuj ĵus sin lavas
kaj ekkriante kvazaŭ pro ektimo
surprizon ŝajnan pro l' atako havas.
Tenante honton malpli en estimo
ol forton, nudaj ili sin forsavas
arbaren, prezentante al la vido
la korpon, tamen for de manavido.

73

Alia vigle sin enakven metas
kaj honton de la ĉasdiin' pro ĉasto
evitas, dum alia forimpetas
kaj vestojn prenas de sur bord' kun hasto.
Enakven sin junuloj pluraj ĵetas
kun vestoj kaj kun ŝuoj, ĉar prokrasto
por senvestigo ŝajnas igi tarda
estingon de ilia fajro arda.

74

Kaj kiel la ĉashundo vigla, sperta,
post bird' vundota en riverofluo,
vidinte feran tubon en averta
celado al ansero aŭ al gruo,
senpacience, pri la predo certa,
enplonĝas boje antaŭ la pafbruo,
junulo nun eknaĝas kun obstino
post iu, ne de Febo la fratino.

75

Al Leonardo,* brava en milito
flirtema, eleganta, ruzavorta,
la ofta de Amoro ĉagrenito,
de ĉiam por li nur mistraktoporta,
havanta antaŭjuĝon en spirito,
ke li pri amo estas malbonsorta,
sed tamen ne perdinta la esperojn,
ke Fato povos ŝanĝi la aferojn,

**Leonardo Ribeiro.*

76

okazas, ke li persekuti iras
Efiran, de l' beleco vera krono.
Pli kare doni tiu ĉi deziras,
kion naturo donis por fordono.
Jam laca pro tioma kur' li diras:
"Ho belulin', ne pravas ĉi opono:
atendu mian korpon, ĉar animo
mia de vi fariĝis jam viktimo.

77

Pro l' kuro lacas ĉiuj, nimfo pura,
cedante, kiom malamik' deziras;
nur vi tra l' denso estas plu forkura?
Ke mi l' sekvanto estas, kiu diras?
Se al vi diris ĝin la sorto dura
kaj Fato, kiu post mi ĉien iras,
ne fidu ĝin, ĉar kiam mi ĝin fidis,
ĝi ĉiam kaj milfoje min perfidis.

78

Nek vin nek min lacigu per evita
forkur' de mi, ĉar eĉ se vi atendos,
tiel la sorto estas al mi spita,
ke ĝi de mia tuŝo vin defendos.
Vi povas resti: estos tuj vidita,
ke ĝi subtile la rimedon sendos.
Vi vidos ĉe la epizodo-ĉeso:
Tra la spica e la man, qual muro he messo. *

79

De mi ne fuĝu, ho! De via belo
neniam fuĝu la nedaŭra nuno;
nur per bridado de la paŝakcelo
vi venkos forton duran de Fortuno.
Nek reĝo venos, nek arme' al celo,
per lukto kontraŭ min sekvanta puno
de Fato, kiam mi komencas emi;
se vi ĝin faros, ne fuĝante de mi.

* Petrarka verso: inter la spiko kaj la mano kvazaŭ mur' metita estas.

80

Ĉu vi partias al ĉi Fat' severa?
Signifas feblon, help' al fortarmila.
Ĉu ŝtelon faris vi de kor' libera?
Ĝin lasu, kuro estos pli facila.
Ĉu ne pezegas ĉi anim' mizera
portata sur la orhararo brila?
Aŭ ĉu post la kaptiĝ', la sorto-rado
ŝanĝiĝis kaj ne pezas plu l' portado?

81

Espere mi vin sekvas kun obstino,
ĉar eble pezos tro la portlaboro,
aŭ pro beleco via en la fino
ŝanĝiĝos mia trista sortrigoro.
Kaj se ĝi transformiĝos, belulino,
ne fuĝu, ĉar ja vundos vin Amoro,
vi de Amor' vundite kuri ĉesos,
kaj tiel pri l' esperoj mi sukcesos."

82

Ne tial fuĝis plu la nimfo bela
por kare vendi sin al la sekvanto,
sed pro la aŭskultado al l' miela,
je amĉagrenoj plena, trista kanto.
Post turno de l' vizaĝo ĝojrivela,
serena kaj favora al galanto,
ŝi antaŭ la venkinto sin faligas,
kaj tiu puran amon disprodigas.

83

Ho! en arbaro kia malmodero
pri kisoj, kia dolĉa ploro sonis,
karesoj tiel mildaj kaj kolero
honesta, kiu en ridetoj dronis!
Sed kion de mateno ĝis vespero
pasigis ili kaj Venusa spronis,
pli bone ol prijuĝi estas provi:
do juĝu, kiu ne sukcesas povi.

84

La belaj nimfoj tiel sin fordonis
po unu al amata naviganto;
orname ĉiu sian ĉarme kronis
per oro, laŭro, granda florokvanto.
Per blankaj manoj sin edzin-proponis
kaj per formalaj vortoj pri konstanto
de l' kompani' promesis kaj pri sorto
honora, gaja, dum la viv' aŭ morto.

El la portugala tradukis Leopoldo H. Knoedt.
Eldonis "Fonto", Chapecó 1980, Serio Oriento-Okcidento n-ro 14, p. 350-358.

William Shakespeare

OTELO

Akto 3 Sceno 3

Venas OTELO

JAGO
Nek papavo,
nek mandragor' aŭ ĉiuj sonĝoportaj
siropoj de la mondo vin relulos
en tiun dolĉan dormon, kiun vi
hieraŭ ĝuis.

OTELO
Ha, malfidela al mi?

JAGO
He kio, generalo? Lasu tion!

OTELO
For, for! Vi min elsternis sur la radon!
Pli bone esti blinde trompegata,
ol scii eĉ plej ete.

JAGO
Nu, nu, sinjoro!

OTELO
Ĉu do mi sentis ŝiajn kaŝvoluptojn?
Mi ĝin ne vidis, ĝin ne pensis, min
ĝi ne ofendis; en la posta nokto
mi dormis bone, gaje: mi ne trovis
sur ŝiaj lipoj kisojn de Kasio.
Kiu ne scias sian perdon, li
ne sciu do, kaj li nenion perdis!

JAGO
Mi bedaŭras aŭdi tion ĉi.

OTELO
Mi vivus en feliĉo, eĉ se l' tuta
tendaro, pioĉistoj kaj soldatoj,
gustumis ŝian delikatan korpon,
se nur mi ĝin ne scius! Nun por ĉiam
adiaŭ trankvileco! Jam adiaŭ
kontento! Kaj adiaŭ la plumkaska

armeo kaj la grandmilitoj, kiuj
la ambicion faras virto. Ho
adiaŭ la ĉevalo fajre hena,
trila trumpet', tamburo kor-alarma,
la orelbora fluto, la standardo
majesta kaj la tuta garnituro,
pompo, fiero de l' milito glora!
Kaj vi, mortomaŝinoj, kies gorĝoj
konkuras tondrojn de l' senmorta Jovo:[1]
jam for! Otelo perdis la okupon!

JAGO — Ĉu povas esti, via moŝto?

OTELO — [*kaptas lin ĉe la brusto*]
Kanajlo, pruvu do, ke mia kara
estas putino – pruvu por l' okuloj!
Ĉar – je l' eterna homanim' mi ĵuras –
pli bone vi naskiĝus kiel hundo,
ol stari antaŭ mia furiozo!

JAGO — [*sin elŝiras*] Ĉu temas jam pri tio?

OTELO — Lasu min vidi,
aŭ pruvu ĝin almenaŭ tiel firme,
ke sur la pruvo manku hok' aŭ banto
por kroĉi dubon – aŭ ve al via vivo!

JAGO — [*aliras* OTELON] Mia nobla moŝto –

OTELO — [*lin kaptas ĉe la gorĝo*]
Se ŝin vi kalumnias, min turmentas,
for konscienco, ne preĝadu plu!
Hororon sur hororo amasigu,
pro viaj faroj larmu la ĉielo,
la tero konsterniĝu, ĉar nenion
por via damno povos vi aldoni,
super ĉi tio! [*Li ĵetas* JAGON]

JAGO — Ho graco! Dio helpu!
Ĉu vir' vi estas, aŭ sensaĝa bruto?

[1] *Jovo.* Jupitero, ĉefdio de la roma mitologio (la greka Zeŭso).

Sufiĉe! For l' oficon! Ho mi stulta,
pelanta la honeston ĝis malvirto!
Ho monstra mondo! Notu, mondo, notu
danĝerojn de la simpla honesteco!
Mi dankas por ĉi lerno, ĉar mi poste
amikon plu ne amos tiakoste.

OTELO Ne – restu – tamen ŝajnas vi honesta.

JAGO Prefere esti saĝa, ĉar honesto
malsaĝe perdas, se ĝi volas helpi.

OTELO Mondo, mi kredas ĉasta la edzinon,
kaj kredas ŝin malĉasta: vin mi kredas
justa kaj ankaŭ ne: mi volas pruvon.
Jen ŝia nomo, kiu estis freŝa,
kiel vizaĝo de Diana,[1] nun
fariĝis nigra kiel miaj vangoj.
Se estas ŝnuroj, klingoj, fajr', veneno
aŭ sufokantaj akvoj, mi ne plu
toleros tion. Ho, nur esti certa!

JAGO Sinjoro, la kolero vin konsumas.
Mi pentas jam, ke mi sciigis vin.
Vi volas esti certa?

OTELO Jes. Kaj estos.

JAGO Do estu! Tamen kiel? Kiel certa?
Ĉu vi, spiono, volus beste gapi,
vidi ŝin karni?

OTELO Morto kaj damno, aj!

JAGO Jen ĝena malfacilo, ilin trafi
ĉe tiu ludo. Pesto! Ja neeble,
ke homokuloj vidus ilin tangi,[2]
krom ili mem! Do kio? Kiel fari?
Kion mi diru? Kia kontentiĝo?

---

[1] *Diana.* Virga diino de la luno kaj de la ĉasado (roma mitologio).
[2] *tangi.* Marista termino (vd. *Plena Vortaro*) uzata de Jago fisence.

Ne eblas, ke vi tion vidu, eĉ
se ili estus ardaj kiel kaproj,
aŭ viglaj kiel makakoj, tiel akraj[1]
kiel printempe lupoj, kaj miopaj
kiel stultuloj en ebrio. – Sed,
se forta ŝajno kaj apoga fakto,
gvidantaj ĝis la pordo de la vero,
vin povos kontentigi, vi ricevos.

OTELO Mi havu vivan montron, ke ŝi pekas.

JAGO Al mi ne plaĉas tiu komisio;
sed, ĉar mi jam enpaŝis, instigite
de la malsaĝaj amo kaj honesto,
do pluen. – Lastatempe kun Kasio
mi kuŝis, kaj, ĉar dento min doloris,
ne povis dormi. Nu, ekzistas homoj
tiel malfortanimaj, ke dum dormo
siajn aferojn ili elmurmuras.
Kasio estas tia hom'. Mi aŭdis
lin diri dorme: "Dolĉa Desdemona,
ni estu gardaj kaŝi nian amon!"
Kaj tiam li ekkaptis mian manon,
ĝin premis kaj ekkriis: "Dolĉa mia",
kaj min kisegis, kvazaŭ li elŝirus
de miaj lipoj kisojn tie-kreskajn.
Poste li levis sian gambon super
mian femuron, ĝemis, kisis – poste
ekkriis: "Damna sorto, kiu jam
vin donis al la Maŭro!"

OTELO Ho monstre, monstre!

JAGO Ne, li ja nur sonĝis.

OTELO Sed tio signis jam faritan sperton.
Tre povas esti vero, kvankam sonĝo.

JAGO Kaj tio armas la aliajn pruvojn
pli delikatajn.

---

[1] *akraj.* Seksardaj. Kp. *Hamleto*, III, 2, p. 90:
OFELIO. *Vi estas tre pikema, princo, tre pikema.*
HAMLETO. *Vi devus ĝemi, se vi volus malakrigi mian pinton.*

OTELO Mi disŝiros ŝin!

JAGO Ne, restu saĝa. Ni nenion vidis.
Ŝi povas esti bona. Diru al mi:
ĉu vi neniam vidis mantuketon
kun fragornamo en l' edzina mano?

OTELO Mi donis al ŝi tian: tio estis
mia unua dono.

JAGO Nu, pri tio
mi ja ne sciis, sed per tiu tuko,
aŭ iu tre simila, mi hodiaŭ
vidis Kasion viŝi sian barbon.

OTELO Se estis tiu –

JAGO Se estis tiu, aŭ alia ŝia,
tio ŝin stampas kun l' aliaj pruvoj.

OTELO Ho, se la sklavo[1] havus centmil vivojn!
Por mia venĝo unu tro mizeras.
Nun mi la veron konas: vidu, Jago:
mi blovas mian amon al ĉielo.
Ĝi estas for. Leviĝu, nigra venĝo,
el volbo de l' infero! Cedu, amo,
la kronon kaj la korosceptron al
tirana malamego! Ŝvelu, brusto,
plena de serpentlangoj![2]

JAGO Regu vin.

OTELO Ho sangon, sangon, sangon!

JAGO Nur paciencon: eble vi ŝanĝiĝos.

---

[1] *sklavo.* La angla vorto estas komunseksa, sed Otelo ĉi tie aludas Kasion. Komparu V, 2:
Se ĉiuj liaj vivoj estus haroj,
mia venĝemo granda ilin glutus.

[2] *serpentlangoj.* En la epoko de Shakespeare oni kredis, ke la serpento venenpikas per la lango.

OTELO Neniam, Jago. Kiel la Ponta Maro,
kies glacia flu' kaj truda pelo
neniam sin retiras, sed impetas
plu al Proponto kaj al Helesponto;
tiele mia sanga pensotajdo
neniam rerigardos, nek malflusos
al povra amo, ĝis plej vasta venĝo
forglutos ĝin. Nun, je la astra volbo,[1]
per ĵuro sankta kaj solena mi
dediĉas miajn vortojn. [*Li genuiĝas*]

JAGO Ne leviĝu.
Atestu, vi eternaj ĉielfajroj,
vi elementoj, kiuj nin ĉirkaŭas,
atestu nun, ke Jago fordediĉas
la fortojn de la cerbo, manoj, koro,
al la trompita Otelo! Li ordonu,
kaj konscience mi obeos, ĝis
plej sanga drasto.

OTELO Tion mi akceptas [*li leviĝas*]
ne kun banala danko, sed tutkore:
kaj tuj mi vin okupos. Post tri tagoj
vi povu al mi diri, ke Kasio
ne vivas plu . . .

JAGO Jam mortis mia amiko: vi ĝin volis.
Sed lasu ŝin pluvivi.

OTELO Ho damnu ŝin! Hetajro!
Venu kun mi. Mi volas al mi preni
ian rapidan mortigilon por
la bela diablino. Nun estas vi
mia leŭtenanto.

JAGO Via por eterno!

Ili foriras

El la angla tradukis Reto Rossetti.
Eldonis J. Régulo (Stafeto), La Laguna 1960, Belliteratura serio n-ro 18, p. 114-122.

---

[1] *astra volbo.* Laŭvorte "tiu marmora ĉielo". *Marmora* havis sencon varibrila kiel marmoro, sed tiu senco ŝajnas netrudebla al la Esperanta vorto. Cetere Otelo ĵus menciis Proponton, maron kies nuna nomo estas Maro de *Marmora*, do estiĝus senckonfuzo.

Voltaire

KANDID

ĈAPITRO 3 – Kiel Kandid forkuris el inter la Bulgaroj kaj kio li fariĝis.
Nenio estis tiom bela, tiom facilmova, tiom brila, tiom bonorda kiel la du armeoj. La trumpetoj, la fajfiloj, la hobojoj, la tamburoj, la kanonoj formis tian harmonion, kia neniam estis en infero. Unue la kanonoj ambaŭflanke terenfaligis proksimume ses mil homojn; poste la muskedistaro forigis el la plej bona mondo proksimume naŭ aŭ dek mil friponojn, kiuj putrigis ĝian supraĵon. La bajoneto ankaŭ estis la sufiĉa kialo por la morto de kelkaj miloj da homoj. Sume oni buĉis eble tridekmil homojn. Kandid, kiu tremis kiel filozofo, sin kaŝis tiel bone, kiel li povis, dum tiu heroa buĉado.

Fine, dum la du reĝoj, ĉiu en sia propra tendaro, ordonis, ke oni kantu *Te Deum*-ojn, li decidis iri en alian lokon rezonadi pri la efikoj kaj la kaŭzoj. Li trapasis amason da mortintoj kaj mortantoj, kaj atingis apudan vilaĝon; ĝi estis cindrigita; ĝi estis arbara vilaĝo, kiun bruligis la Bulgaroj, laŭ la leĝoj de la ĝenerala juro. Ĉi tie estis trapikitaj maljunuloj, kiuj rigardis morti buĉitajn virinojn, tenantajn siajn infanojn ĉe la sangantaj mamoj; tie estis junulinoj kun tratranĉitaj ventroj, kiuj, satiginte la naturajn bezonojn de kelkaj herooj, ellasis la lastan spiron; aliaj, duone bruligitaj, kripetegis, ke oni finmortigu ilin. Cerbaĵoj estis disŝutitaj sur la tero apud tratranĉitaj kruroj kaj brakoj.

Kandid kiel eble plej rapide forkuris en alian vilaĝon: ĝi apartenis al la Bulgaroj, kaj estis ricevinta de la abaraj herooj saman traktadon. Kandid, ĉiam marŝante sur membroj ankoraŭ vivantaj aŭ tra ruinoj, finfine atingis ekster la batalkampon, portante iom da provizaĵo en sia sako, kaj neniam forgesante F-inon Kunegond. Lia provizaĵo mankis, kiam li trafis Holandon; sed aŭdinte, ke en ĉi tiu lando ĉiuj personoj estas riĉaj kaj kristanaj, li ne dubis, ke oni traktos lin tiel bone, kiel li estis traktata en la kastelo de lia barona moŝto, antaŭ ol li estis forpelata pro la belaj okuloj de F-ino Kunegond.

Li almozpetis ĉe kelkaj gravaj personoj, kiuj respondis, ke se li daŭrigos tiel konduti, oni fermos lin en pundomon por lin eduki.

Poste, li sin turnis al iu viro, kiu en granda kunveno dum unu horo estis ĵus parolanta pri humaneco. Tiu oratoro, strabe rigardante al li, diris:

– Kion vi faras ĉi tie? Ĉu vi servas la bonan kaŭzon? (aferon)[1]

– Ne ekzistas efiko sen kaŭzo, modeste respondis Kandid, ĉio estas nepre interligita kaj aranĝita plej bone. Necesis, ke oni forpelu min de apud F-ino

[1]Ludvorto; en la franca lingvo la vorto *cause* (kaŭzo) tradukas la esperantajn vortojn *afero* kaj *kaŭzo*. – *Trad.*

Kunegond, ke mi estu vergata, kaj ke mi almozpetu panon ĝis mi povos ĝin laborakiri; ĉio tio ne povis aliel okazi.

– Mia amiko, diris al li la oratoro, ĉu vi kredas, ke la papo estas la Antikristo?

– Ĝis nun pri tio mi ne aŭdis, respondis Kandid; sed ĉu li estas, aŭ ne estas, tio ne povas ŝanĝi la fakton, ke mankas al mi pano.

– Ci ne meritas manĝi panon, diris la alia; for, fripono, for, malŝatindulo, neniam proksimiĝu al mi.

La edzino de la oratoro, rigardinte tra la fenestron, kaj vidinte homon, kiu dubas ĉu la papo estas aŭ ne la Antikristo, elverŝis sur lian kapon plenan... Ho ĉielo! ĝis kia grado atingas ĉe virinoj la fervoro al religio!

Iu viro, kiu ne estis baptita, iu bona anabaptisto, nomita Jakobo, vidis la kruelan kaj malnoblegan manieron laŭ kiu oni traktis unu el siaj fratoj, unu estulon kun du piedoj kaj sen plumoj[1], kiu havas animon; li kondukis la fraton hejmen, purigis lin, donis al li panon kaj bieron, donacis al li du florenojn kaj volis eĉ lernigi lin labori en siaj holandaj manufakturoj, en kiuj oni fabrikis persajn ŝtofojn. Kandid preskaŭ genuiĝante antaŭ li, ekkriis:

– Majstro Panglos prave diris, ke ĉio statas kiel eble plej bone en ĉi tiu mondo, ĉar mi estas multe pli forte kortuŝata de via treege granda malavaro ol de la senkompato de tiu sinjoro kun nigra mantelo kaj de lia edzino.

La morgaŭon, promenante, li renkontis mizerulon, tute kovritan per pustuloj, kun malvivaj okuloj, kun nazo ĉirkaŭmanĝita, kun malrekta buŝo, kun nigraj dentoj kaj gorĝa voĉo, turmentata de fortega tuso kaj kraĉanta denton ĉe ĉiu peno.

ĈAPITRO IV – Kiel Kandid renkontis sian malnovan majstron, doktoron Panglos, kaj kio rezultis el tio.

Kortuŝate de kompato pli ol de abomeno ĉe la vido de tiu terura mizerulaĉo, Kandid donis al li la du florenojn, kiujn li estis ricevinta de la honesta anabaptisto Jakobo. La fantomo fikse rigardis lin, ekploris kaj ĵetis sin al li sur la kolon. Timigite, Kandid malantaŭenpaŝis:

– Ho ve! diris la mizerulo al la alia mizerulo, ĉu do vi ne rekonas vian karan Panglos?

– Kion mi aŭdas? Vi, mia kara majstro! vi, en tia abomena stato! Kia malfeliĉo okazis al vi? Kial vi ne plu estas en la plej bela el la kasteloj? Kio okazis kun F-ino Kunegond, la plej perfekta el ĉiuj junulinoj, la ĉefverko de l' naturo?

– Mi ne plu povas elteni, diris Panglos.

Tuj Kandid kondukis lin en la stalon de la anabaptisto, kie li manĝigis al Panglos iom da pano; kaj kiam ĉi tiu lasta rebonigis sian farton:

– Nu, demandis Kandid, Kunegond?

– Ŝi mortis, respondis Panglos.

---

[1] Moka aludo al iu difino de la fama antikva filozofo Platono. –*Trad.*

Ĉe tiuj vortoj, Kandid svenis; lia amiko rekonsciigis lin per iom da malbona vinagro, kiu hazarde troviĝis en la stalo. Kandid remalfermis la okulojn:

– Kunegond mortis! Ha! plej bona mondo, kie vi estas? Pro kia malsano ŝi mortis? Ĉu ne pro tio, ke ŝi vidis min forpelata el la bela kastelo de sinjoro ŝia patro per fortaj piedbatoj?

– Ne, diris Panglos; ŝi havis la ventron tratranĉata de bulgaraj soldatoj, post kiam ŝi estis seksperfortita, tiom, kiom estas eble; ili disrompis la kapon al sinjoro ŝia patro, kiu volis defendi ŝin; la barona sinjorino estis dispecigata; mia kompatinda zorgato havis la saman traktadon kiel lia fratino; kaj el la kastelo ne restas ŝtono sur ŝtono, ne restas unu garbejo, nek unu ŝafo, nek unu anaso, nek unu arbo; sed ni estis bone venĝataj, ĉar la Abaroj faris la samon en apuda baronejo, kiu apartenis al bulgara sinjoro.

Ĉe tiu parolado, denove Kandid svenis; sed, rekonsciiĝinte kaj dirinte ĉion dirindan, li informiĝis pri la kaŭzo kaj la efiko, kaj pri la sufiĉa kialo, kiu metis Panglos en tian mizeran staton.

– Ho ve! diris la lasta, estas la amo; la amo, la konsolanto de l' homa speco, la konservanto de l' universo, la animo de ĉiuj sentemaj estuloj, la juna amo.

– Ho ve! diris Kandid, mi ĝin konas, tian amon, tiun reĝon de la koroj, tiun animon de nia animo; kaj ĝi havigis al mi nur unu kison kaj dudek piedbatojn sur la postaĵon. Kiel tia bela kaŭzo povis produkti en vi tiel abomenan efikon?

– Ho kara Kandid! vi konis Paket, tiun beletan servistinon de nia plejnobla baronino; en ŝiaj brakoj mi ĝuegis kiel en paradizo kaj tio produktis la inferajn turmentojn, kiuj min forkonsumas; ŝi estis infektita kaj pro tio eble mortis. Paket ricevis tiun donacon de tre klera monaĥo, kiu kutimis ĉion kontroli ĉe la fonto: li ja ricevis la malsanon de maljuna grafino, kiu ricevis ĝin de kavaleria kapitano, kiu dankis ĝin al markizino, kiu prenis ĝin de jezuito, kiu, dum sia noviceco, ekkaptis ĝin rekte de unu el la kunuloj de Kristofo Kolumbo. Mi mem povos transdoni ĝin al neniu, ĉar mi mortiĝas.

– Ho Panglos, ekkriis Kandid, jen stranga genealogio! ĉu la diablo ne troviĝas ĉe la komenco?

– Tute ne, rerespondis ĉi tiu granda homo; ĝi estis nepre necesa malsano en la plej bona mondo, ĝi estis necesa rimedo. Ja, se Kolumbo ne estus kaptinta en iu insulo de Ameriko tiun malsanon, kiu putrigas la fonton de la nasko, kiu ofte eĉ malhelpas la naskon, kio evidente tute kontraŭas la celon de la naturo, ni ne havus la ĉokoladon nek la koĉenilon; necesas ankaŭ atenti, ke ĝis hodiaŭ, sur nia kontinento, tiu malsano, kiel la interargumentemo, karakterizas nin. La Turkoj, la Hindoj, la Persoj, la Ĉinoj, la Siamanoj, la Japanoj ĝin ankoraŭ ne konas; sed ekzistas sufiĉa kialo por ke siavice, post kelkaj jarcentoj, ili ankaŭ ĝin konos. Dume, ĝi mirinde progresis inter ni, kaj precipe en tiuj grandaj armeoj, konsistantaj el honestaj dungitoj, bone edukitaj, kiuj decidas pri la sorto de la Ŝtatoj; oni povas certigi, ke, kiam tridek mil viroj enviciĝe batalas kontraŭ samnombra armeo, ambaŭflanke estas proksimume dudek mil sifilisuloj.

– Tio estas admirinda, diris Kandid; sed necesas, ke vi resaniĝu.

– Nu, kiel mi povus? diris Panglos; mi estas tute senmona, amiko, kaj, sur la tuta amplekso de ĉi tiu terglobo, ni ne povas ricevi senpage ian ajn kuracilon, krom se iu pagas donace por ni.

Ĉi-lasta diro decidigis Kandid; li iris al la bonfarema anabaptisto Jakobo, genuiĝis antaŭ li, kaj faris tiel kortuŝan priskribon pri la stato de sia amiko, ke la bonulo ne ŝanceliĝis kompate helpi doktoron Panglos; li kuracigis lin per siaj elspezoj. Dum la resaniĝo Panglos perdis nur unu okulon kaj unu orelon. Li havis belan skribmanieron kaj konis perfekte aritmetikon. La anabaptisto Jakobo faris el li sian librotenistion. Post du monatoj, devigate veturi al Lisbono pro komercaj aferoj, li veturigis en sia ŝipo la du filozofojn. Panglos klarigis al li, ke ĉio estis kiel eble plej bona. Jakobo ne havis saman opinion.

– Ŝajnas, li diris, ke la homoj iom difektis la naturon, ĉar ili ne naskiĝis lupoj, kaj ili fariĝis lupoj. Dio donis al ili nek kanonon, nek bajoneton por sin interbuĉi. Same mi povus argumenti pri la bankrotantoj kaj la juĝistaro, kiu kaptas la bienojn de la bankrotantoj por senigi je ili la kreditantojn.

– Ĉio tio estis nepre necesa, rebatis la unuokula doktoro, kaj la apartaj malfeliĉoj faras la ĝeneralan feliĉon, tiel, ke ju pli estas da apartaj malfeliĉoj, des pli ĉio statas bone.

Dum li rezonadis, la vetero malheliĝis, blovis la ventoj el la kvar anguloj de l' mondo, kaj la ŝipo estis atakata de plej terura uragano, kiam estis videbla la haveno de Lisbono.

El la franca tradukis E. Lanti.
Eldonis Sennacieca Asocio Tutmonda, Leipzig 1929, p. 23-29.

KALEVALA

Dekunua Kanto

Tempo venis por prikanti labilmensan Lemminkäinen.
Ahti, fraŭla fil' de Lemmi, insulan' labila mense,
kreskis en alteta hejmo apud sia panjo kara,
fone de plej larĝa golfo, sur terlang' de Kaukoniemi.
Kauko tie kaptis fiŝojn, Ahti manĝis multajn perkojn,
kreskis ĝis plej brava viro, sange ruĝa, cerbe saĝa,
havas koron kun kuraĝo, alton logan, korpon sveltan,
sed li more tro kapricas, tre maldece kondutadas:
ĉiam ĉasas post virinoj, tranoktadas ĉe knabinoj,
dancas dande kun virginoj, amindumas belulinojn.

Kyllikki en Saari loĝas, bela virgulin' insula,
kreskis hejme kvazaŭ floro, ĝojis sub ĉevrono alta,
ĉiam en la patra domo sidis sur la fona benko,
longe kreskis, larĝe famis; fraŭloj malproksimaj venis
en la faman filinejon por svatpeti ŝian manon.
Svatis Sun' al sia filo: ŝi ne iris en Sunejon
por briladi apud Suno sub somerlaboraj urĝoj.
Petis Lun' al sia filo: ŝi ne iris en Lunejon
por lumadi apud Luno, por cirkuli tra aero.
Petis Stel' al sia filo: ŝi ne iris en Stelejon
por trembrili tutajn noktojn sur ĉiel' de vintraj frostoj.
Venis viroj Estoniaj, bravaj fraŭloj Ingerlandaj,
prezentiĝis fianĉece, svatis ŝin fianĉinige,
sed ŝi ridis, ne konsentis, nur respondis rifuzeme:
"Sen rezulto vi konsumas viajn orojn kaj arĝentojn.
Mi ne iros al estonoj, nek promesos nek ekiros
remi maron Estonian, nek padelos al l'insuloj
por manĝadi kaj min nutri per estonaj bordaj fiŝoj.
Ankaŭ ne en Ingerlandon, ringullandon, rondullandon,
mi deziras nek ekiros, ĉar malsato kaj malhavo
regas tie preme ĉiam: ligno mankas, torĉoj mankas,
akvo kaj tritiko mankas, eĉ sekala pano mankas."

Nun petola Lemminkäinen, labilmensa Kaukomieli
fanfaronis, ke li svatos la filinon de l'insulo,

petos kiel fianĉinon tiun belan buklulinon.
La patrin' avertis pete, la maljuna sperte pensis:
"Ne kaptemu al pli famaj, mia fil', ol mem vi estas!
Eble ne akceptos Saari vin en sian faman genton."
La petola Lemminkäinen tiam diris tiuvorte:
"Se perhejme mi ne famas nek pergente estas alta,
mi per mia korpo gajnos kaj elektos perstature."
Plue la patrino neis kaj avertis sian filon:
"Ne aspiru al la alta gento de l'insulo Saari.
Tie vin virinoj mokos kaj bubinoj ridrikanos."
Ne atentis Lemminkäinen, sed respondis perparole:
"Pelos mi virinan ridon, mokon de bubin' mutigos,
ŝovos filon sub la bruston, suĉan bebon en la sinon,
jen finiĝos la mokado kaj mutiĝos la mallaŭdo."
Tiam diris la patrino: "Ve al mi, mizera homo!
Se vi trompus ĉastulinojn, virgulinojn de l'insulo,
tiam tuj kverel' fariĝus, kontraŭ ni milit' eksplodus,
ĉiuj viroj de l'insulo, cent herooj, mil glavuloj
are kontraŭ vi atakus, saltus ĉirkaŭ vin, solecan."
Ne atentis Lemminkäinen la avertojn de l'patrino!
Prenis li ĉevalon sian, jungis junan elektiton,
kaj veturis al l'insulo, en vilaĝon famkonatan
por svatpeti la fieran belulinon de l'insulo.

La virinoj lin priridis, ĉiu el knabinoj mokis,
ĉar tre strange li veturis al vilaĝo kaj en korton,
li renversis sian sledon, koliziis kun pordego.
Labilmensa Lemminkäinen tiam tordis sian buŝon,
skuis kun koler' la kapon, gratis la hararon, diris:
"Mi ĝis nun neniam aŭdis nek mi vidis pasinttempe,
ke virinoj min priridis, ke knabinoj ŝatis moki."

Ne malĝojis Lemminkäinen, sed demandis tute dece:
"Ĉu en Saari estas loko, ĉu troviĝas en l'insulo
seka grund' por mi ekludi, tera pec' por mi ekdanci
kun knabinoj de l'insulo, kun belinoj en la baloj?"
La virginoj de l'insulo donis tiam la respondon:
"Jes, en Saari estas loko kaj troviĝas en l'insulo
seka grund' por vi ekludi, tera pec' por vi ekdanci
kiel paŝtistet' arbare, bovgardisto sur la kampoj;
niaj knaboj kaj knabinoj tro malgrasas por paŝtado,
ĉevalidoj tro grasiĝis, ke la buboj povus paŝti."

Ne malĝojis Lemminkäinen, dungis sin por paŝtlaboro:
tage li paŝtante paŝis, nokte ĉastulinojn ĉasis,
dancis bale kun knabinoj, ludis lerte kun virginoj.
Tiel bela Kaukomieli, labilmensa Lemminkäinen
pelis ridon de virinoj kaj mutigis la mokemajn.
Baldaŭ inter la plej ĉastaj ne troviĝis virgulino,
kiun li ne palpis, tuŝis, apud kiu li ne kuŝis.

En la granda gent' de Saari estas nur virgino unu,
kiu pelas for fianĉojn kaj ne ŝatas fraŭlajn logojn:
ĉarma Kyllikki ŝi estas, bela floro de l'insulo.
Labilmensa Lemminkäinen, belmiena Kaukomieli
reme rompis cent remilojn kaj cent botojn eluzadis
postĉasante la knabinon, kaptadante Kyllikki'on.

Kyllikki, fiere bela, foje faris la demandon:
"Kion vi, fiviro, ĉasas, bordanaĉo, ĉirkaŭpaŝtas,
strebas kapti nur knabinojn, svatas ĉiujn stanzonulojn?
Mi ne havas tempon antaŭ ol mi dismuelis ŝtonon,
dispistadis la pistilon kaj trahakis la pistujon.
Kaj neniam mi min donos al petolaj kapriculoj,
volas mi staturon firman al staturo firma mia,
pli imponan korpan formon por imponaj formoj miaj
kaj vizaĝon pli belforman por vizaĝo bela mia."
Poste pasis kelka tempo, eble parto da monato.
Unu tagon, dum vespero, la knabinoj de l'insulo,
belaj, junaj, are dancas rondodancojn de l'popolo
sur ebena arbarrando, iom for de bord', sur stepo,
Kylli super la aliaj, flor' de Saari plej ŝatate.

Tiam la petolemulo, sangoriĉa Lemminkäinen
alveturis per ĉevalo kaj atakis kvazaŭ aglo
mezen de la danca kampo, al la belaj dancantinoj,
kaptis Kylli'n en la sledon, rabis la virginon vigle,
metis sur la sledajn felojn, premis sur la fundajn latojn,
vipis la ĉevalon verge, frapis per perlita ŝnuro,
haste forveturis, fulme, sed dum la veturo diris:
"Ne denuncu min, knabinoj, kaj neniam prirakontu,
ke vizitis mi ĉi tie kaj rabkaptis la knabinon!
Se vi ne obeos tion, tiam spertos vi malbonon,
ĉar mi sorĉos en militon, kantos inter glavbatalon
viajn fraŭlojn kaj fianĉojn, tiel, ke neniam ilin

oni vidos nek priaŭdos iri laŭ la kortaj vojoj,
paŝi sur la hejmaj stepoj sub la suno, sub la luno!"

Kyllikki komencis plendi, la insula flor' petegis:
"Lasu min, infanon, iri, tuj min liberigu, lupo,
por reiri rekte hejmen, kie la patrino ploros!
Se vi min ne liberigos nek forlasos iri hejmen,
vokos mi kvin fratojn miajn, la sep filojn de la onklo
por laŭspuri min lepore, por repreni mian kapon."
Sed ĉar ŝi ne liberiĝis, tiam ŝi amare ploris
kaj lamentis sub la larmoj: "Vane mi naskiĝis, povra,
vane kreskis, vane vivis, vane ĝojis, vane revis,
ĉar nun kaptis min vantulo, rabis viro senvalora,
kiu volas nur militi, ŝatas nur batali ĉiam!"
Labilmensa Lemminkäinen penis per parol' konsoli:
"Kyllikki, plej kara mia, bero mia, birdo mia!
Ne malĝoju nek murmuru. Mi ne traktos vin malbone:
manĝos mi kun vi ensine, paŝos mi kun vi surbrake,
staros mi kun vi apude, kuŝos mi kun vi ĉeflanke!
Kio vin ĉagrenas, kara, kial ĝemas vi malĝoje?
Ĉu ĉagrenas, ĉu ĝemigas tio vin, ke mankus pano
kaj butero kaj viando kaj vestaĵoj kaj manĝaĵoj?
Ne prizorgu, birdo mia. Mi posedas bovinaron,
kiu donas multan lakton: marĉe marŝas Kamemoro,
sur deklivo trotas Frago, sur brulkampo Vakcinio.
Tiuj grasas nenutrate, fartas bone nebredate,
oni ne bezonas lasi tiujn el bovej' matene,
nek vespere ligi ĉene, nek alĵeti fojnofaskon,
nek pri salo vintre zorgi, nek farunojn mikse servi.
Aŭ ĉu vin ĉagrenas, ĉarman, ĉu ĝemigas vin, ke estas
ne tre granda gento mia, nek tre alta hejmo mia?
Se per gento mi ne grandas nek per hejmo estas alta,
mi posedas fajran glavon, spadon, kiu disradias,
ĝi el granda gent' devenas, originon raran havas,
oni forĝis ĝin ĉe Hiisi kaj poluris ĉe la dioj.
Mi per tiu pligrandigos genton mian, havon mian,
per la glavo fajroklinga, kiu brile disradias."
La knabin' ekĝemis, povra, kaj avertis preskaŭ ame:
"Ho, vi Ahti, fil' de Lemmi! Se vi volas edzinigi
ame min al vi por ĉiam kiel koran kokineton,
ĵuru nun por ĉiam ĵuron, ke neniam vi militos,
eĉ se vi bezonus oron kaj dezirus arĝentaĵojn!"

Labilmensa Lemminkäinen tiam donis tiun ĵuron:
"Ĵuras mi por ĉiam ĵuron, ke neniam mi militos,
eĉ se mi bezonus oron kaj dezirus arĝentaĵojn.
Sed mem ĵuru, ke vi balojn de l'vilaĝo ne vizitos,
eĉ se vi dezirus danci, se sopirus salti rondon!"
Tiam ili ĵuris tie por eterne kaj por ĉiam
antaŭ la plej alta Dio, sub rigard' de l' Plejpotenca,
ke neniam li militos nek la balojn ŝi vizitos.

Labilmensa Lemminkäinen vipis la ĉevalon verge,
frapis per rimen' de brido kaj parolis per la vortoj
"He al vi, insul', adiaŭ, he, herbejoj, he, arbaroj,
he, radikoj de piceoj, kaj adiaŭ, gudraj stumpoj,
kiujn tra somer' mi tretis kaj tra vintro trotis kaŝe
en sekret' sub nubaj noktoj, serĉis ŝirmon kontraŭ ŝtormoj,
dum mi ĉasis ĉi anason, spuris post ĉi bonasio!"
Li veturas, vigle glitas; jam la hejm' vidiĝas fore.
Tiam la knabino diris: "Tie staras dom' videbla,
malsatejruin' montriĝas, mizerejo kaŭras kaŝe.
Kies la kabano estas? Kiu maltaŭgul' ĝin havas?"
Labilmensa Lemminkäinen tiam donis la respondon:
"Ne prizorgu pro la domoj nek priĝemu pro la ĉambroj!
Ni ja faros novajn domojn kaj konstruos eĉ pli bonajn
el teruraj pinaj trunkoj, el imponaj prapinegoj."

Post nelonge Lemminkäinen ĝisveturis kaj atingis
siajn hejmon kaj patrinon, sian karan naskintinon.
La patrino lin salutis, mem parolis per la vortoj:
"Longe vi forestis, filo, longe en la fremdaj landoj."
Labilmensa Lemminkäinen tiam donis la respondon:
"Nu, mi devis iom tikli la virinojn, la virginojn,
venĝi pro ke ili mokis kaj priridis min tro longe.
Mi kunrabis la plej raran, metis sub la sledajn felojn,
premis sur la fundajn latojn, rulis sub la sledkovrilon.
Tiel pagis mi la mokojn de virinoj kaj knabinoj.
Ho, patrino, kara mia, kiu min vartadis kore!
Kiun mi deziris kapti, ankaŭ tiun mi akiris.
Sternu nun matracojn molajn, kapkusenojn el lanugoj,
por mi kuŝi propralande kune kun la hejmkokino!"

Tiam la patrin' parolis, la bonkora babiladis:
"Estu nun dankata, Dio, kaj laŭdata nur Kreinto,

ĉar vi donis bofilinon, kiu scias zorgi hejmon,
ŝpini lanon, teksi tolon, lavi vestojn, baki panon,
gardi bone fornan fajron kaj blankigi linajn ŝtofojn!"
"Mem vi, filo, laŭdu ŝancon! Vi akiris bonan predon
kaj Kreint' la bonan donis, Dio vin permesis gajni.
Puras ja pirol' sur neĝo, sed vi havas la pli puran,
ŝaŭm' sur maro estas blanka, sed vi regas la pli blankan,
ĉarmas cigno sur lageto, sed vi ŝirmas la pli ĉarman,
brilas stelo surĉiele, via fianĉin' pli brilas."
"Plilarĝigu nun la plankojn, pligrandigu la fenestrojn,
jam ĉarpentu novajn murojn, faru eĉ pli bonan domon,
faru sojlojn kun vestibloj, novajn pordojn sur la sojlojn,
ricevinte la virginon, akirinte la belinon,
kies belo vin superas, gento vin superas fame!"

El la finna tradukis Joh. Edv. Leppäkoski.
Eldonis Fondumo Esperanto, Helsinko 1964, Serio Oriento-Okcidento n-ro 4, p. 67-72.

N. V. Gogol

LA REVIZORO

AKTO DUA
Malgranda ĉambro en hotelo. Lito, tablo, valizo, malplena botelo, botoj, broso por vestoj, k. t. p.

SCENO I.

OSIP sola.

OSIP *kuŝas sur la lito de la sinjoro.* – Diablo prenu, mi tiel volas manĝi, kaj en la ventro estas tia krakado, kvazaŭ tuta regimento ekblovus trumpetojn. Nu, ni ne atingos la hejmon, tion mi vidas! Kion vi konsilos fari? Estas jam la dua monato de kiam ni elveturis el Peterburgo! Li tradandis en la vojo la monon, mia kara; nun li sidas kaj subtiris la voston kaj ne flamiĝas. Kaj estus sufiĉe, tute sufiĉe da mono por la vojaĝo; sed ne, vi vidas, oni devas en ĉiu urbo sin montri! (*Imitante*): "He, Osip, iru serĉi ĉambron pli bonan, kaj tagmanĝon mendu la plej bonan: mi ne povas manĝi malbonan tagmanĝon, mi bezonas pli bonan tagmanĝon." Nu, se li almenaŭ estus io valora, sed li ja estas simple "registreto"! Faras konatecon kun traveturanto, poste tuj venas kartetoj. – Nu, jen li atingis! Ha, tedis tia vivo! Mi certigas vin, en la vilaĝo estas pli bone: almenaŭ publikaĵo ne ekzistas, kaj ankaŭ da zorgaĵo ne tiom multe: prenu al vi virinon kaj kuŝu la tutan vivon apud la forno kaj manĝu kukojn. Nu, kiu disputos, kompreneble, se preni la veron, la vivo en Peterburgo estas la plej bona. Se nur estus mono, la vivo tie estas delikata kaj politika: teatroj, hundoj por vi dancas, kaj ĉio, kion vi volas. Ĉiu parolas en artifika delikateco, preskaŭ tute kiel nobeloj; vi iras al la bazaro – la komercistoj al vi krias: "estimata"; vi bezonas transveturi per ŝipeto – vi sidiĝas apude de oficisto; vi volas kompanion – iru en la butiketon: tie kavaliro rakontos al vi pri tendaroj kaj raportos al vi, kion ĉiu stelo signifas en la ĉielo; nu, vi ĉion vidas, kiel sur la manplato. Maljunulino-oficiredzino entrafas, iafoje ĉambristino enmontriĝas tia... fu, fu, fu! (*Ridetas kaj skuas la kapon.*) Galanteria kondutado, diablo prenu! Neĝentilan vorton vi neniam aŭdas: neniu diras al vi "ci". Se tedis al vi iri – vi prenas veturilon, kaj vi sidas kiel sinjoro, kaj se vi ne volas pagi – bone: ĉiu domo havas trapasan pordegon, kaj vi tiel enflugas, ke nenia diablo vin trovos. Nur unu afero estas malbona: unu fojon vi manĝas en plej brilanta maniero, kaj alian fojon vi povas preskaŭ krevi de malsato, kiel ekzemple nun. Kaj en ĉio nur li estas kulpa. Kion vi faros kun li? La patreto alsendas monon, li anstataŭ ĝin teni iom pli forte – li, atendu, li komencas tuj diboĉi: veturas en kaleŝoj, ĉiun tagon aĉetas al si bileton por la teatro, kaj poste

– apenaŭ pasis semajno – jen li jam sendas al la bazaro de malnovaĵoj vendi novan frakon. Iafoje li tradiboĉas ĉion, ĝis la lasta ĉemizo, tiel ke sur li restas nur surtuteto kaj palteto.... Vere, mi ĵuras al vi! Kaj la drapo estas tiel grava, angla! ĉirkaŭ cent-kvindek rublojn la sola frako kostas, kaj en la bazaro li ĝin forblovas por dudeko da rubloj; kaj pri la pantalonoj eĉ ne parolu – ili iras por nenio. Kaj kial? ĉar per afero li sin ne okupas. Anstataŭ iri al ofico, li – ho ve! li promenadas sur la bulvardoj, ludas kartojn. Ha, se tion ĉi ekscius la maljuna sinjoro! Li ne atentus, ke vi estas oficisto, sed, levinte la ĉemizeton, li tiel enŝutus al vi, ke vi kvar tagojn gratus la haŭton. Se vi volas servi, tiam servu. Jen nun la hotelisto diris: "Mi ne donos al vi manĝi, ĝis vi pagos por la antaŭa". Nu, kaj se ni ne pagos? (*Kun ĝemo.*) Ha, mia Dio, almenaŭ ian simplan brasikaĵon! Ŝajnas al mi, ke mi nun formanĝus la tutan mondon! Oni frapas; certe ĝi estas li. (*Rapide desaltas de la lito.*)

SCENO II.

OSIP kaj ĤLESTAKOV.

ĤLESTAKOV. – Jen, prenu ĝin (*fordonas la ĉapon kaj kanon*). Ha, vi denove ruliĝadis sur la lito?

OSIP. – Kial do mi ruliĝadus? Ĉu mi neniam vidis liton, efektive?

ĤLESTAKOV. – Vi mensogas, vi ruliĝadis; vi vidas, ĝi tuta estas malordigita!

OSIP. – Sed por kio mi ĝin bezonas? Ĉu mi ne scias, kio estas lito? Mi havas piedojn: mi povas stari. Por kio mi bezonas vian liton?

ĤLESTAKOV *paŝadas en la ĉambro.* – Rigardu, ĉu tie en la saketo ne troviĝas iom da tabako?

OSIP. – Nu, de kie do povus troviĝi tabako? Antaŭ tri tagoj vi la lastan elfumis.

ĤLESTAKOV *paŝadas kaj diversmaniere premadas siajn lipojn; fine li diras per laŭta kaj decida voĉo.* – Aŭskultu... he, Osip!

OSIP. – Kion vi ordonas?

ĤLESTAKOV *per laŭta, sed ne tiel decida voĉo.* – Vi iru tien.

OSIP. – Kien?

ĤLESTAKOV *per voĉo tute ne decida kaj ne laŭta, tre proksima al petado.* – Malsupren, en la manĝejon... tie diru..., ke oni donu al mi tagmanĝi.

OSIP. – Nu, ne, mi eĉ iri ne volas.

ĤLESTAKOV. – Kiel vi kuraĝas, malsaĝulo?

OSIP. – Nu tiel; tute egale, se mi eĉ iros, nenio el tio ĉi estos. La mastro diris, ke li plu ne donos tagmanĝi.

ĤLESTAKOV. – Kiel li povas permesi al si ne doni? Jen ankaŭ sensencaĵo!

OSIP. – Li ankoraŭ diras, mi iros al la urbestro; jam la trian semajnon via sinjoro monon ne pagas. Vi, li diras, kun via sinjoro, estas friponoj, kaj via sinjoro estas trompisto. Ni, li diras, ni vidis tiajn vagistojn kaj malnoblulojn.

ĤLESTAKOV. – Kaj vi, bruto, jam ĝojas, ke vi povas ĉion tion ĉi ripeti al mi.

OSIP. – Li diras: "Tiamaniere ĉiu alveturos, loĝos, faros ŝuldojn, kaj poste vi lin eĉ elpeli ne povos? Mi, – li diras, – ŝercojn ne faros, mi rekte iros kun plendo, por ke oni prenu lin en la policejon kaj tuj en la malliberejon."

ĤLESTAKOV. – Nu, nu malsaĝulo, ĉesu! Iru, iru, diru al li. Tia kruda besto!

OSIP. – Jam pli bone mi vokos al vi la mastron mem.

ĤLESTAKOV. – Por kio do la mastron? Vi iru, mem diru.

OSIP. – Sed kredu al mi, sinjoro...

ĤLESTAKOV. – Nu, iru, diablo vin prenu! voku la mastron. (*Osip foriras*).

SCENO III.

ĤLESTAKOV sola.

ĤLESTAKOV. – Terure kiel mi volas manĝi! Mi faris malgrandan promenadon, mi pensis: eble pasos la apetito; – ne, la diablo prenu, ĝi ne pasas. Jes, se en Penzo mi ne estus diboĉinta, estus sufiĉe da mono por alveturi ĝis la hejmo. La infanteria kapitano forte min forkis: mirinde lerte li, kanajlo, manovras la kartojn. Ne pli ol kvaronon da horo li sidis – kaj li faris min tute nuda. Kaj tamen mi terure dezirus ekbatali kun li ankoraŭ unu fojon. Sed mi ne havis okazon. Kia abomena urbeto! En la fruktaj butikoj oni nenion donas kredite. Tio ĉi jam estas simple malnobla. (*Li fajfas antaŭe el Roberto-Diablo, poste "Ne kudru, patrino, al mi", kaj fine – ian senordan miksaĵon.*) Neniu volas veni.

SCENO IV.

ĤLESTAKOV, OSIP kaj restoracia SERVANTO.

SERVANTO. – La mastro ordonis demandi, kion vi deziras.

ĤLESTAKOV. – Bonan tagon, mia kara! Nu kiel, ĉu vi estas sana?

SERVANTO. – Dank' al Dio.

ĤLESTAKOV. – Nu, kio, kiel estas ĉe vi en la hotelo, ĉu ĉio bone iras?

SERVANTO. – Jes, dank' al Dio, ĉio iras bone.

ĤLESTAKOV. – Estas multe da traveturantoj?

SERVANTO. – Jes, sufiĉe.

ĤLESTAKOV. – Aŭdu, mia kara, oni tie ĝis nun ne alportas al mi la tagmanĝon, – mi petas, rapidigu, ke ili iom pli viglu, ĉar vidu, mi tuj post la tagmanĝo devas min okupi per io.

SERVANTO. – Sed la mastro diris, ke li plu ne donos. Eĉ jes, li hodiaŭ volis iri plendi al la urbestro.

ĤLESTAKOV. – Nu, kial jam plendi? Juĝu mem, mia kara, kiel do? Mi ja bezonas manĝi. Alie mi povas tute maldikiĝi. Mi tre volas manĝi: mi diras tion ĉi sen ŝerco.

SERVANTO. – Jes. Li diris: "Mi ne donos al li tagmanĝi, ĝis li pagos al mi por la antaŭa." Simple tia estis lia respondo.

ĤLESTAKOV. – Sed vi prudentigu lin, konvinku lin.

SERVANTO. – Sed kion do diri al li?

ĤLESTAKOV. – Vi klarigu al li serioze, ke mi bezonas manĝi. La mono estas alia afero.... Li pensas, ke se por li, malklerulo, ne estas malfeliĉo, se li unu tagon ne manĝos, tial ankaŭ por aliaj tio sama. Jen interese!

SERVANTO. – Se vi volas, mi diros.

SCENO V.

ĤLESTAKOV sola.

ĤLESTAKOV. – Estas tamen malbone, se li absolute nenion donos manĝi. Mi tiel volas manĝi, kiel mi ankoraŭ neniam volis. Eble el la vestoj ion forkomerci? Vendi ekzemple la pantalonon? Ne, jam pli bone estas iom malsati, sed veni hejmen en Peterburga kostumo. Estas domaĝe, ke Joĥim ne donis lue kaleŝon; estus bone, diablo ĝin prenu, veni hejmen en kaleŝo, alruliĝi tiel en diabla maniero al ia najbaro-bienhavanto rekte al la perono, kun lanternoj, kaj Osipon havi malantaŭe vestitan per livreo. Nu, mi prezentas al mi, kiel ĉiuj ektumultus! "Kiu li estas, kio ĝi estas?" Kaj la lakeo eniras (*sin rektigante kaj prezentante lakeon*): "Ivan Aleksandroviĉ Ĥlestakov el Peterburgo, vi ordonas akcepti?" Ili, kampaj simpluloj, eĉ ne scias, kion signifas "vi ordonas akcepti". Ĉe ili, se alveturas ia dika bienhavanto, li simple sin puŝas, la urso, rekte en la salonon.... Al ia beleta filineto mi alirus: "Fraŭlino, kiel mi...." (*frotas la manojn kaj salutstrekas per la piedo.*) Fi! (*kraĉas.*) Eĉ naŭzas, tiel forte mi volas manĝi.

SCENO VI.

ĤLESTAKOV, OSIP, poste la SERVANTO.

ĤLESTAKOV. – Nu, kio?

OSIP. – Oni alportas la tagmanĝon.

ĤLESTAKOV *aplaŭdas kaj saltetas sur la seĝo.* – Oni portas! oni portas! oni portas!

SERVANTO *kun teleroj kaj telertuko.* – La mastro donas jam la lastan fojon.

ĤLESTAKOV. – Nu, la mastro, la mastro.... Mi ridas pri via mastro! Kio tie estas?

SERVANTO. – Supo kaj rostaĵo.

ĤLESTAKOV. – Kiel, nur du manĝoj?

SERVANTO. – Nur du.

ĤLESTAKOV. – Jen kia absurdo! Mi tion ĉi ne akceptas. Vi diru al li: kio tio ĉi efektive estas!... Estas tro malmulte.

SERVANTO. – Ne, la mastro diras, ke estas ankoraŭ tro multe.

ĤLESTAKOV. – Kaj saŭco, kial ne estas?

SERVANTO. – Saŭcon ni ne havas.

ĤLESTAKOV. – Kial do vi ne havas? Mi mem vidis, pasante preter la kuirejo, tie multe estis kuirata. Kaj en la manĝoĉambro hodiaŭ matene du iaj mallongaj homoj manĝis salmon kaj ankoraŭ multe da alia.

SERVANTO. – Nu, cetere, ni havas kaj tamen ne havas.

ĤLESTAKOV. – Kiel vi ne havas?

SERVANTO. – Nu, simple, ni ne havas.

ĤLESTAKOV. – Kaj salmo, kaj fiŝo, kaj kotletoj?

SERVANTO. – Nu, ili estas por personoj pli gravaj.

ĤLESTAKOV. – Ha vi, malsaĝulo!

SERVANTO. – Jes.

ĤLESTAKOV. – Vi, porkido abomena.... Kial do ili manĝas kaj mi ne manĝas? Kial do, diablo vin prenu, mi ne povas ankaŭ? Ĉu ili ne estas tiaj samaj vojaĝantoj kiel mi?

SERVANTO. – Kompreneble, ne tiaj.

ĤLESTAKOV. – Kiaj do?

SERVANTO. – Ordinaraj, kiel oni devas! ili – konata afero – ili pagas monon.

ĤLESTAKOV. – Mi kun vi, malsaĝulo, ne volas paroli. (*Enverŝas la supon kaj manĝas.*) Kia supo ĝi estas? Vi simple akvon enverŝis en la tason: nenian guston ĝi havas, ĝi nur malbonodoras. Mi ne volas tiun ĉi supon, donu al mi alian.

SERVANTO. – Ni prenos. La mastro diris: "Se vi ne volas, oni ne bezonas."

ĤLESTAKOV *defendante la manĝon per la mano.* – Nu, nu, nu... lasu, malsaĝulo! Vi kutimis havi aferon kun aliaj: mi, mia kara, ne estas tiaspeca! Kun mi, mi ne konsilas.... (*Manĝas.*) Mia Dio, kia supo! (*Manĝas plue.*) Mi pensas, ke ankoraŭ neniu homo en la mondo iam manĝis tian supon: iaj plumoj naĝas anstataŭ graso. (*Li tranĉas la kokinon.*) Aj, aj, aj, kia kokino! Donu la rostaĵon! Tie restis iom da supo, Osip, prenu al vi. (*Li tranĉas la rostaĵon.*) Kia rostaĵo ĝi estas? Tio ĉi ne estas rostaĵo.

SERVANTO. – Kio do ĝi estas?

ĤLESTAKOV. – La diablo ĝin scias, kio ĝi estas, nur ne rostaĵo. Ĝi estas hakilo, rostita anstataŭ viando. (*Li manĝas.*) Friponoj, kanajloj! per kio ili nutras? Eĉ la makzeloj ekdoloros, kiam vi manĝos unu tian pecon. (*Fosas per la fingro en la dentoj.*) Malnobluloj! Tute kiel ligna ŝelo – per nenio oni ĝin povas eltiri; eĉ la dentoj nigriĝos post tiuj ĉi manĝoj. Friponoj! (*Viŝas la buŝon per la telertuko.*) Plu nenio estas?

SERVANTO. – Ne.

ĤLESTAKOV. – Kanajloj! Malnobluloj! Kaj eĉ nenia saŭco aŭ kukaĵo! Sentaŭguloj! Ili nur prirabas la vojaĝantojn.

(*La servanto deprenas de la tablo kaj forportas la telerojn kune kun Osip.*)

El la rusa tradukis L. L. Zamenhof. Eldonis Hachette, Parizo 1907, p. 21-28.

Henryk Sienkiewicz

QUO VADIS?

ĈAPITRO 66

Dum la tempo de Nero tiel en la cirko, kiel en la amfiteatroj populariĝis vesperaj spektakloj, antaŭe maloftaj kaj aranĝataj nur en esceptaj okazoj. La aŭgustanoj ŝatis ilin, ĉar ofte sekvadis ilin festenoj kaj drinkadoj, daŭrantaj ĝis la mateno. Kvankam la popolo estis jam trosata de la sangoverŝado, tamen, kiam diskoniĝis la famo, ke venas la fino de la cirkludoj kaj ke la lastaj kristanoj estas mortontaj en la vespera spektaklo, sennombraj amasoj plenigis la amfiteatron. La aŭgustanoj venis senescepte, ĉar ili konjektis, ke ĝi ne estos ordinara spektaklo kaj ke la cezaro decidis aranĝi al si tragedion el la doloro de Vinicius. Tigellinus gardis sekreton pri la speco de torturo, destinita por la fianĉino de la juna tribuno, sed ĉi tio ekscitis nur la ĝeneralan scivolon. Tiuj, kiuj iam vidadis Ligian ĉe Plautiusoj, rakontis nun mirindaĵojn pri ŝia belegeco. Aliajn interesis antaŭ ĉio la demando, ĉu efektive ili vidos ŝin hodiaŭ sur la areno, ĉar multaj el tiuj, kiuj aŭdis la respondon, kiun la cezaro donis al Petronius ĉe Nerva, komentis ĝin dusence. Kelkaj simple supozis, ke Nero transdonos aŭ eble eĉ jam transdonis la knabinon al Vinicius: oni rememoris, ke ŝi estas garantiulino kaj rajtas, sekve de tio, adori tiujn diojn, kiuj plaĉis al ŝi, kaj ke la leĝo de nacioj ne permesas ŝin puni.

La necerteco, atendado kaj scivolo ekregis ĉiujn rigardantojn. La cezaro alvenis pli frue, ol ordinare, kaj kun lia alveno oni komencis denove flustri al si reciproke, ke tamen okazos certe io eksterordinara, ĉar, krom Tigellinus kaj Vatinius, Neron akompanis Cassius, centuriestro kun grandega staturo kaj grandega forto, kiun la cezaro kunprenadis nur tiam, kiam li volis havi apude defendanton, ekzemple kiam plaĉis al li fari noktajn ekskursojn en Suburran, kie li amuzis sin per la ludo, nomata *sagatio*, konsistanta en supren̂ĵetado de renkontitaj envoje knabinoj sur soldata mantelo. Oni rimarkis ankaŭ, ke en la amfiteatro mem estis entreprenitaj certaj gardorimedoj. Oni pligrandigis la pretorian gardon, kaj la komandon super ĝi havis ne centuriestro, sed tribuno, Subrius Flavius, konata ĝis nun pro sia blinda sindono al Nero. Oni ekkomprenis tiam, ke la cezaro deziras por ĉia eventualo sendanĝerigi sin kontraŭ eksplodo de malespero flanke de Vinicius, kaj la scivolo kreskis ankoraŭ pli.

Ĉies rigardoj turnadis sin kun streĉita intereso al la loko, kie sidis la malfeliĉa fianĉo. Kaj li, tre pala, kun frunto kovrita de ŝvitgutoj, estis necerta, kiel la aliaj, sed maltrankvila ĝis la plejfundo de la animo. Petronius, ne sciante mem precize, kio okazos, diris al li nenion, li nur demandis Viniciuson, reveninte de Nerva, ĉu

li estas preta al ĉio, kaj poste, ĉu li ĉeestos la spektaklon. Vinicius respondis al ambaŭ demandoj: "Jes!" sed ĉe tio ĉi malvarma tremo trakuris lian tutan korpon, ĉar li komprenis, ke Petronius demandis ne senkaŭze. Li mem vivis de ia tempo kvazaŭ duonvive, li mem profundiĝis jam en la morto kaj konsentis la morton de Ligia, ĉar ĝi devis esti por ili ambaŭ kune liberiĝo kaj geedziĝo, sed nun li ekkonis, ke alia afero estas pensi de malproksime pri la lasta momento, kiel pri trankvila endormiĝo, kaj alia – iri rigardi torturon de persono, pli kara, ol la vivo. Ĉiuj antaŭe suferitaj doloroj vekiĝis en li denove. La kvietigita malespero komencis denove krii en lia animo; ekregis lin la antaŭa deziro savi Ligian por ĉia kosto. De la mateno li volis penetri en la *cunicula*, por certiĝi, ĉu Ligia troviĝas tie, sed pretoriaj gardoj postenis ĉe ĉiuj pordegoj kaj la ordonoj estis tiel severaj, ke la soldatoj, eĉ konantaj la junan tribunon, lasis sin moligi nek per peto, nek per oro. Al Vinicius ŝajnis, ke la necerteco mortigos lin, antaŭ ol li ekvidos la spektaklon. Ie en la fundo de lia koro pulsetis ankoraŭ la espero, ke eble Ligia ne estas en la amfiteatro kaj ke ĉiuj timoj estas vanaj. En momentoj li kroĉis sin al ĉi tiu penso per ĉiuj fortoj. Li parolis al si, ke Kristo ja povis preni ŝin el la malliberejo, sed Li ne povis permesi ŝian turmenton en la cirko. Antaŭe li konsentis jam en ĉio Lian volon, nun, kiam, forpuŝite de la pordoj de la *cunicula*, li revenis sian lokon en la amfiteatro, kaj kiam el scivolaj rigardoj, al li direktataj, li ekkonis, ke plej teruraj supozoj povas esti pravaj, li komencis en la animo petegi Kriston pri savo, kun pasio simila al minaco. "Vi povas!" li ripetadis, konvulsie kunpremante la manojn. "Vi povas!" Antaŭe li eĉ ne supozis, ke ĉi tiu momento, kiam ĝi iĝos reala, estos tiel terura. Nun, ne konsciante, kio kun li okazas, li antaŭsentis tamen, ke se li vidos turmenton de Ligia, tiam lia tuta amo ŝanĝos sin en malamon, kaj la kredo en lia koro – en malesperon. Kaj kune teruris lin ĉi tiu sento, ĉar li timis ofendi Kriston, kiun li petegis pri kompato kaj miraklo. Li ne petis jam pri ŝia vivo, li deziris nur, ke ŝi mortu antaŭ ol oni ŝin kondukos sur la arenon, kaj el la senfunda abismo de doloro li ripetadis en la animo: "Almenaŭ tion ĉi al mi ne rifuzu, kaj mi amos Vin ankoraŭ pli, ol ĝis nun mi Vin amis!" Fine liaj pensoj senkateniĝis, kiel ondoj, tordataj de ventego. Vekiĝadis en li avido je venĝo kaj sango. Ekkaptadis lin furioza deziro ĵeti sin sur Neron kaj sufoki lin antaŭ ĉiuj rigardantoj, kaj kune li sentis, ke per ĉi tiu pasio li denove ofendas Kriston kaj malrespektas Liajn ordonojn. En momentoj trafulmadis lian kapon la espero, ke ĉion tion, antaŭ kio tremis lia animo, forturnos eble ankoraŭ la ĉiopova kaj kompatema mano, sed tiuj fulmoj tuj estingiĝadis, kvazaŭ en senlima senreviĝo pro tio, ke Tiu, kiu povis per unu vorto detrui ĉi tiun cirkon kaj savi Ligian, forlasis ŝin tamen, kvankam ŝi fidis kaj amis Lin per ĉiuj fortoj de sia pura koro. Kaj li pensis plue, ke ŝi kuŝas tie en la malluma *cuniculum*, malforta, sendefenda, forlasita, donita al plaĉo aŭ malplaĉo de brutsimilaj gardistoj, dum li devas atendi senhelpe en ĉi tiu terura amfiteatro, ne sciante, kian turmenton oni elpensis por ŝi kaj kion li ekvidos post momento. Fine, kiel homo, falanta en abismon, ekkaptas ĉion, kio kreskas ĉe ĝia rando, tiel

li ankaŭ ekkaptis ambaŭmane la penson, ke tamen nur per la kredo li povas ŝin savi. Restis ja nur tiu ĉi sola rimedo! Petro ja diris, ke per la kredo oni povas movi la fundamentojn de la tero!

Do li koncentriĝis, subpremis en si la dubon, fermis sian tutan estaĵon en du vortojn: mi kredas, kaj atendis miraklon.

Sed kiel trostreĉita kordo devas krevi, tiel ankaŭ lin rompis la streĉo. Kadavra paleco kovris lian vizaĝon kaj la korpo komencis rigidiĝi. Tiam li ekpensis, ke lia preĝo estas elaŭskultita, ĉar jen li mortas. Ekŝajnis al li, ke Ligia sendube ankaŭ estas jam mortinta kaj ke Kristo tiamaniere prenas ilin al si. La areno, la blankaj togoj de la sennombraj rigardantoj, la lumo de milo da lampoj kaj torĉoj, ĉio kune malaperis de lia vido.

Sed tiu senforteco ne daŭris longe. Post momento li vekiĝis, aŭ pli ĝuste vekis lin la piedfrapado de la malpaciencanta popolo.

– Vi estas malsana – diris al li Petronius – ordonu reporti vin hejmen.

Kaj ne atentante, kion diros al ĉi tio la cezaro, li leviĝis, por subteni Viniciuson kaj eliri kune kun li. Lia koro ŝvelis de kompato, kaj krome incitis lin neelporteble tio, ke la cezaro rigardis tra la smeraldo Viniciuson, studante kun kontenteco lian doloron, eble tial, por poste priskribi ĝin en patosaj strofoj kaj gajni aplaŭdojn de aŭskultantoj.

Vinicius ekskuis la kapon. Li povis morti en ĉi tiu amfiteatro, sed li ne povis eliri el ĝi. La spektaklo estis ja komencota en plej proksimaj minutoj.

Efektive preskaŭ en la sama momento la urboprefekto ĵetis antaŭ sin ruĝan tukon, kaj je ĉi tiu signo ekknaris la rigliloj kontraŭ la cezara podio, kaj el la nigra faŭko sur la hele lumigitan arenon eliris Ursus.

La grandegulo palpebrumis, videble blindigita de la lumo, reganta sur la areno, poste li elŝovis sin sur ĝian mezon, rigardante ĉirkaŭen, kvazaŭ li volus ekkoni, kontraŭ kio li devos batali. Ĉiuj aŭgustanoj kaj pliparto de la rigardantoj sciis, ke tio estas la homo, kiu sufokis Croton, tial je lia vido murmuro aŭdiĝis en ĉiuj vicoj. En Romo ne mankis gladiatoroj, multege superantaj la ordinaran homan kreskon, sed iun similan ne vidis ankoraŭ la okuloj de la kviritoj. Cassius, staranta en la podio post la cezaro, ŝajnis kontraŭ tiu ligo homo senaspekta. La senatanoj, la vestpastrinoj, la cezaro, la aŭgustanoj kaj la popolo rigardis kun la ravo de kompetentuloj kaj cirkamantoj liajn potencajn femurojn, dikajn, kiel branĉoj, la bruston, similan al du kunigitaj ŝildoj, kaj la herkulajn brakojn. La murmuro kreskis kun ĉiu momento. Por tiuj amasoj ne povis ekzisti plezuro pli granda, ol vidi tiajn muskolojn en movo, en streĉo kaj en batalo. La murmuro ŝanĝadis sin en ekkriojn kaj en ekscititajn demandojn, kie loĝas la gento, en kiu naskiĝas similaj grandeguloj, kaj li staris en la mezo de la amfiteatro, nuda, pli simila al ŝtona koloso, ol al homo, kun koncentrita kaj kune malgaja vizaĝo de barbaro, kaj, vidante la malplenan arenon, rigardis kun miro per siaj bluaj, infanaj okuloj jen la publikon, jen la cezaron, jen la kradojn de la *cunicula*, el kie li atendis torturistojn.

En la momento, kiam li estis eniranta la arenon, en lia koro de simplulo lastfoje ekpulsis la espero, ke eble atendas lin kruco, sed, kiam li ekvidis nek krucon, nek pretan kavon, li ekpensis, ke li ne indas tian favoron kaj ke li devos morti alie, certe de sovaĝaj bestoj. Li estis senarma kaj decidis perei, kiel decas al konfesanto de la "Ŝafido", trankvile kaj pacience. Dume li volis preĝi ankoraŭ al la Savinto, do, genuiĝinte sur la areno, li kunmetis la manojn kaj levis la rigardon al la steloj, flagrantaj tra la supra malfermaĵo de la cirko.

Ĉi tiu sinteno malplaĉis al la amasoj. Oni jam havis sufiĉe da kristanoj, mortantaj kiel ŝafoj. Oni komprenis, ke se la grandegulo ne volos sin defendi, la spektaklo malsukcesos. Tie kaj ie aŭdiĝis eksibloj. Kelkaj komencis voki pri la *mastigophori*, kies tasko estis vipi luktistojn, ne volantajn batali. Post momento tamen ĉiuj eksilentis, ĉar neniu sciis, kio atendas la grandegulon kaj ĉu li ne volos batali, kiam li renkontos la morton, okulo kontraŭ okulo.

Oni ne atendis plu longe. Subite aŭdiĝis la akra sono de la trumpetoj, kaj je ĉi tiu signo malfermiĝis la krado kontraŭ la cezara podio kaj sur la arenon enkuris, meze de krioj de bestistoj, grandega germana uro, portanta sur la kapo nudan virinan korpon.

– Ligia! Ligia! – ekkriis Vinicius.

Poste li ekkaptis ambaŭmane la harojn sur la tempioj, kuntordiĝis, kiel homo, kiu eksentis en si la pinton de lanco, kaj per raŭka, nehoma voĉo komencis ripeti:

– Mi kredas! mi kredas!.... Kristo! miraklon!!

Kaj li eĉ ne sentis, ke en ĉi tiu momento Petronius kovris lian kapon per la togo. Ŝajnis al li, ke morto aŭ doloro vualis liajn okulojn. Li ne rigardis, li ne vidis. Ekregis lin la sento de ia terura malpleno. En lia kapo restis nek unu penso, nur la buŝo ripetadis, kvazaŭ freneze:

– Mi kredas! mi kredas! mi kredas!

Subite la amfiteatro eksilentis. La aŭgustanoj leviĝis de siaj lokoj, kiel unu homo, ĉar sur la areno okazis io eksterordinara. La ligo, antaŭ momento humila kaj preta al morto, ekvidinte nun sian reĝidinon sur la kornoj de la sovaĝa besto, saltleviĝis, kvazaŭ brulvundita per fajro, kaj, klininte la nukon, komencis kuri oblikve al la furioza besto.

El ĉiuj brustoj elŝiris sin mallonga ekkrio de miro, kiun sekvis profunda silento; la ligo dume alkuris en unu momento la furiozan urviron kaj ekkaptis ĝin je la kornoj.

– Rigardu! – ekkriis Petronius, deŝirante la togon de la kapo de Vinicius.

Kaj ĉi tiu leviĝis, klinis malantaŭen sian tolpalan vizaĝon, kaj komencis rigardi la arenon per vitrosimilaj, senkonsciaj okuloj.

Ĉiuj brustoj ĉesis spiri. En la amfiteatro oni povis aŭdi traflugantan muŝon. La homoj ne volis kredi al la propraj okuloj. Kiel longe Romo ekzistis, oni vidis nenion similan.

La ligo tenis la sovaĝan beston je la kornoj. Liaj piedoj eniĝis ĝis super la maleoloj en la sablon, la dorso kurbiĝis, kiel streĉita pafarko, la kapo kaŝiĝis

inter la ŝultrojn, la muskoloj de la brakoj tiel ŝvelis, ke la haŭto preskaŭ krevis sub ilia premo, sed li haltigis la uron loke. La homo kaj la besto iĝis tiel senmovaj, ke al la rigardantoj ŝajnis, kvazaŭ ili vidas bildon, prezentantan agon de Herkulo aŭ Tezeo, aŭ grupon, skulptitan el ŝtono. Sed en tiu ŝajna trankvilo oni sentis teruran streĉon de la du fortegoj. La uro, same kiel la homo, enigis la piedojn en la sablon, kaj ĝia malhela, vila korpo kuntiriĝis tiel, ke ĝi ŝajnis simila al grandega bulo. Kiu elĉerpiĝos la unua, kiu falos la unua, jen estis la demando, kiu por tiuj rigardantoj, amegantaj la cirkajn batalojn, signifis ĉi-momente pli, ol ilia propra sorto, ol la tuta Romo kaj ĝia mondoregado. Tiu ligo estis nun por ili duondio, inda je adoro kaj statuoj. Eĉ la cezaro mem leviĝis. Li kaj Tigellinus, aŭdinte pri la fortego de la homo, speciale aranĝis ĉi tiun spektaklon kaj moke parolis al si: "Venku tiu Crotomortiginto la uron, kiun ni por li elektos", nun dume ili rigardis kun mirego la bildon, kiun ili havis antaŭ si, kvazaŭ ne kredante, ke ĝi povus esti vero. En la amfiteatro oni povis vidi homojn, kiuj, levinte la manojn, restis tiel. Al aliaj ŝvito surverŝis la fruntojn, kvazaŭ ili mem batalus kontraŭ la besto. En la cirko oni aŭdis nur la sibladon de la flamoj en la lampoj kaj la bruetadon de karboj, defalantaj de la torĉoj. La voĉoj morthaltis en la buŝoj de la rigardantoj, la koroj nur bategis en la brustoj, kvazaŭ volante ilin krevigi. Ŝajnis al ĉiuj, ke la batalo daŭras jarcentojn.

Dume la homo kaj la besto staris ĉiam en terura streĉo, oni dirus, fiksitaj en la teron.

Subite el la areno aŭdiĝis obtuza, ĝemsimila muĝo, post kiu el ĉiuj brustoj elŝiris sin ekkrio, kaj denove ekregis silento. La homoj kredis, ke ili sonĝas: la monstra kapego de la uro turniĝadis en la feraj manoj de la barbaro.

Kaj la vizaĝo de la ligo, lia nuko kaj brakoj ruĝiĝis purpure, lia dorso kurbiĝis ankoraŭ pli. Oni vidis, ke li streĉas la reston de siaj superhomaj fortoj, sed ke ili sufiĉos al li jam por nelonge.

Ĉiam pli obtuza, pli raŭka kaj ĉiam pli dolora muĝado de la uro miksis sin kun fajfa spirado de la brusto de la grandegulo. La kapego de la besto turniĝadis ĉiam pli, kaj el la faŭko elŝoviĝis longa, ŝaŭmokovrita lango.

Unu momento ankoraŭ – kaj la orelojn de la pli proksimaj rigardantoj atingis kvazaŭ krako de ostoj, post kio la besto falegis teren kun mortrompita nuko.

Tiam la grandegulo deŝovis en unu momento la ŝnurojn de ĝiaj kornoj kaj, preninte la knabinon sur la brakojn, komencis spiri rapide.

Lia vizaĝo paliĝis, la haroj kungluiĝis de ŝvito, la ŝultroj kaj la brakoj ŝajnis surverŝitaj per akvo. Dum momento li staris tiel kvazaŭ duone konscia, poste tamen li levis la okulojn kaj komencis rigardi la publikon.

Kaj la amfiteatro ekfrenezis.

La muroj de la konstruaĵo komencis tremi pro kriegado de kelkdek mil rigardantoj. De la komenco de la spektakloj oni ne vidis tian ekscitegon. La homoj, sidantaj en la pli altaj vicoj, forlasis ilin kaj komencis paŝi malsupren, interpremante sin en la interbenkoj, por rigardi pli proksime la fortegulon. De

ĉie aŭdiĝis vokoj pri kompato, vokoj pasiaj, obstinaj, kiuj baldaŭ ŝanĝiĝis en unu ĝeneralan krion. Por la popolo, adoranta la fizikan forton, tiu grandegulo iĝis nun kara kaj unua persono en Romo.

Kaj li komprenis, ke la popolo postulas, ke oni lasu al li la vivon kaj redonu la liberecon, sed videble ne nur pri si mem li zorgis. Dum momento li rigardis ĉirkaŭen, poste li proksimiĝis al la cezara podio kaj, balancante sur la etenditaj brakoj la korpon de la knabino, levis la okulojn kun la esprimo de petego, kvazaŭ li volus diri:

– Ŝin kompatu! ŝin ŝparu! por ŝi mi tion faris!

La rigardantoj komprenis bonege, kion li postulis.

Je la vido de la sveninta knabino, kiu apud la grandega korpo de la ligo ŝajnis malgranda infano, kortuŝo ekregis la popolon, la kavalirojn kaj la senatanojn. Ŝia delikata figuro, tiel blanka, kvazaŭ skulptita el alabastro, ŝia sveno, la terura danĝero, el kiu savis ŝin la grandegulo, kaj fine ŝia beleco kaj lia amo ekskuis la korojn. Kelkaj kredis, ke tio estas patro, peteganta kompaton por sia infano. La kompato eksplodis subite, kiel flamo. Sufiĉe jam oni havis da sango, sufiĉe da morto, sufiĉe da turmentoj. Larmopremitaj voĉoj komencis voki pardonon por ili ambaŭ.

Ursus dume antaŭeniĝadis laŭronde de la areno kaj, balancante ĉiam la knabinon sur la brakoj, per la gesto kaj okuloj petegis por ŝi la vivon. Subite Vinicius leviĝis de sia loko, transsaltis la ĉirkaŭbaron, apartigantan la unuajn vicojn de la areno, kaj alkurinte al Ligia, kovris per la togo ŝian nudan korpon.

Poste li disŝiris la tunikon surbruste, malkovris la cikatrojn, kiuj restis al li post vundoj, ricevitaj en la armena milito, kaj etendis la brakojn al la popolo.

Tiam la ekscito de la rigardantoj superis ĉian mezuron, viditan iam ajn en la amfiteatroj. La amasoj komencis piedfrapi kaj muĝi. La voĉoj, vokantaj pardonon, iĝis simple minacaj. La popolo propetis jam ne nur por la atleto, sed ĝi prenis en la defendon la knabinon, la soldaton kaj ilian amon. Miloj da rigardantoj turnis sin al la cezaro kun kolera brilo en la okuloj kaj kun manoj kunpremitaj. Li tamen malrapidis kaj hezitis. Kontraŭ Vinicius li ne havis, vere, malamon, kaj la morto aŭ vivo de Ligia estis al li indiferentaj, sed li preferus vidi la korpon de la knabino disŝiritan per la kornoj de la uro, aŭ disgratitan per la dentegoj de sovaĝaj bestoj. Same lia krueleco, kiel lia degenerinta fantazio kaj degenerintaj instinktoj trovis ian volupton en similaj bildoj. Kaj nun la popolo volis senigi lin de tiu volupto. Ĉe tiu ĉi penso kolero speguliĝis sur lia grasa vizaĝo. La ambicio ne permesis ankaŭ al li subiĝi al la volo de la amaso, kaj kune, pro la denaska timemo, li ne kuraĝis ĝin kontraŭstari.

Li komencis do rigardi, ĉu almenaŭ inter la aŭgustanoj li ne vidos subenturnitajn fingrojn, la signon de morto. Sed Petronius tenis la manon levitan supren, rigardante ĉe tio preskaŭ provoke en lian vizaĝon. La superstiĉa, sed ekscitiĝema Vestinus, kiu timis la spiritojn, sed ne timis la homojn, donis la signon de pardono. Same faris la senatano Scævinus, same Nerva, same Tullius Senecio,

same la maljuna glora militestro, Ostorius Scapula, same Antistius, same Piso kaj Vetus, kaj Crispinus, kaj Busonius Thermus, kaj Pontius Telesinus, kaj la plej respektinda, adorata de la popolo, Thraseas. Je ĉi tiu vido la cezaro mallevis la smeraldon de la okulo kun la esprimo de malestimo kaj ofendo, subite tamen Tigellinus, kiu deziris spiti Petroniuson, kliniĝis al li kaj diris:

– Ne cedu, dia, ni havas la pretorianojn.

Tiam Nero turnis sin al la loko, kie la komandon super la pretorianoj havis la severa kaj ĝis nun tutanime fidela al li Subrius Flavius, kaj li ekvidis ion eksterordinaran. La vizaĝo de la maljuna tribuno estis severa, sed surverŝita de larmoj, kaj li tenis la manon supren, signe de pardono.

Dume la amasojn komencis kapti furiozo. Polvo leviĝis de sub la frapantaj piedoj kaj vualis la amfiteatron. Meze de la ekkrioj aŭdiĝis la voĉoj: "Ahenobarbus! patrinmurdinto! brulmetinto!"

Nero ektimis. La popolo estis ĉiopova reganto en la cirko. La antaŭaj cezaroj, precipe Caligula, kuraĝis iafoje kontraŭstari ĝian volon, kio cetere ĉiam kaŭzadis ribelojn, eĉ sangoverŝon. Sed Nero estis en diferenca situacio. Unue, kiel komedianto kaj kantisto, li bezonis la favoron de la popolo, due, li volis havi ĝin pro si kontraŭ la senato kaj patricioj, kaj fine, post la bruligo de Romo li penis ĉiel favorigi ĝin al si kaj direkti ĝian koleron kontraŭ la kristanojn. Li ekkomprenis fine, ke kontraŭstari pli longe estus simple danĝere. Ribelo, komencita en la cirko, povus ekregi la tutan urbon kaj kaŭzi neantaŭvideblajn konsekvencojn.

Li rigardis do ankoraŭ fojon al Subrius Flavius, al la centuriestro Scævinus, parenco de la senatano, al la soldatoj, kaj, vidante ĉie kuntiritajn brovojn, kortuŝitajn vizaĝojn kaj fiksitajn sur li okulojn, li donis la signon de pardono.

Tiam tondro de aplaŭdoj eksonis de supre ĝis malsupre. La popolo estis jam certa pri la vivo de la kondamnitoj, ĉar de ĉi tiu momento ili iĝis kvazaŭ ĝiaj zorgatoj, kaj eĉ la cezaro ne kuraĝus persekuti ilin plu per sia venĝo.

El la pola tradukis Lidja Zamenhof.
Eldonis Populara Esperanto-Biblioteko, Amsterdamo 1933, Parto 2, p. 223-231.

Ivan Vazov

SUB LA JUGO

Parto dua, Ĉapitro 37
DU RIVEROJ

En tiu tempo Ognjanov estis malproksime en la monto. Li la lasta forlasis la tranĉeojn, kiam la turkoj jam estis surgrimpantaj la remparon kaj aliaj ĝin celis el proksime. Sanganta, nigrigita de pulvo, kun jako truita je du lokoj, li kvazaŭ mirakle eskapis el la manoj de la malamikoj kaj de iliaj kugloj... Li serĉis la morton, sed la instinkto de la memkonservo, pli forta ol ia ajn volo en tiu momento, savis lin.

Nun li troviĝis sur la supro de Varliŝtnica, sur ĝia maldekstra deklivo, ĉe kies piedoj fluis rivereto.

Sur la sango, sur la ŝvito, sur la pulva nigro, sur la polvo de lia vizaĝo nun fluetis larmoj.

Ognjanov ploris.

Li estis haltinta kaj rigardis la terurajn bildojn de la ruiniĝo de la revolucio. Li estis nudkapa.

Malsupre, en la valo, timigita amaso da ribeluloj, virinoj, infanoj, kiuj en freneza paniko kuris por savi sin en la interno de la monto. La ploregoj kaj la kriegoj de la malfeliĉuloj atingis klare ĝis liaj oreloj.

Vidalvide – Klisura en flamoj.

Subite lia rigardo falis sur lian dekstran manon, kovritan de sango. Li rememoris, ke ĝi estis sango de Kandov. Kaj en la sama momento liaj pensoj transpasis de Kandov al Rada... Lia hararo hirtiĝis: li ŝovis la manon en sian internan poŝon kaj eltiris la ĉifitan leteron de Rada, kiun li malfermis.

Li tralegis la sekvantajn kelkajn liniojn, skribitajn per krajono de ies malfortiĝinta kaj tremanta mano:

> "Bojĉo!
> Vi lasis min kun malestimo. Sen vi me ne povas vivi... Mi petas vin, sendu al mi nur unu vorteton... Se vi ordonos, mi restos viva... Senkulpa mi estas... Respondu al mi, Bojĉo. Terurajn horojn mi travivas... Se ne, adiaŭ, adiaŭ, mia adorata, mi enterigos min sub la ruinojn de Klisura...
> Rada".

Neesprimebla angoro pentris sin sur la vizaĝo de Ognjanov. Li fiksis rigardon al la urbo, kie la incendioj plimultiĝis. En diversaj punktoj de la urbo novaj flamoj ŝprucis super la tegmentoj, leviĝis kaj lekis la aeron per siaj paleruĝaj

langoj... Nigraj nuboj el fumo sterniĝis super la urbon kaj miksiĝis kun la nuboj en la ĉielo, kiuj ĝin kovris tuta; pro ili pli frue komencis malheliĝi. La brulegoj disvastiĝis per granda rapideco al ĉiuj flankoj. Iliaj sangruĝaj rebriloj reflektiĝis sur la krutaĵoj, sur la ravinoj de Ribarica kaj en la ondoj de Stara Reka... Ognjanov streĉis la okulojn por vidi la duetaĝan domon, kie loĝis sinjorino Muratlijska. Li baldaŭ rimarkis ĝin kaj kun emocio rekonis ambaŭ fenestrojn de la ĉambro de Rada. La domo ankoraŭ ne estis tuŝita de la fajro, sed la apudaj domoj jam brulis kaj rapide proksimigis la fajron al ĝi.

– Ho! La malfeliĉa, ŝi certe estas tie!... Terure! Terure! – Kaj li tuj sin ĵetis malsupren tra la ravino al la valeto. Li malsuprensaltis aŭ pli ĝuste ruliĝis sur la krutegaĵoj kaj la denskreskaĵoj kaj poste ekiris returne al la enfluejo de la rivero, al Klisura.

La mallarĝa intermonto Varliŝtnica estis ŝtopita per fuĝantoj de ambaŭ seksoj, de ĉiuj aĝoj kaj rangoj. Tiu timigita homamaso moviĝanta laŭ la tuta longo de la rivero, similis al alia rivero, sed fluanta en kontraŭan direkton. La paniko nur en la daŭro de unu horo senhomigis la urbon Klisura kaj plenŝtopis ĉi tiun montan valeton. Ĉiuj kuris, ĉiuj fuĝis, anhelantaj kaj freneziĝintaj, kiel homoj, kiujn la persekutantoj preskaŭ atingas. Iuj estis forkurintaj nur kun vesto surdorse, aliaj ŝarĝitaj per diversaj kovriloj, hejmaj bezonaĵoj kaj ĉifonaĵoj, ofte eĉ per tute senbezonaj aĵoj, prenitaj en la rapideco. Iuloke eĉ tio aspektis komika. Ekzemple, iu riĉa dommastro forlasinte domon kaj hejmon, estis preninta subbrake nur unu murhorloĝon, kiu tute ne estis bezona en tiu momento... Aliloke virino portis sian kribrilon, kiu nur ĝenis ŝin dum la kurado. Oni renkontis maljunulinojn kaj knabinojn, kiuj nudpiede kuris sur la ŝtonoj, tenante enmane siajn ŝuojn, por ne difekti ilin... Ognjanov kunpuŝiĝis ĉiumomente kun tiuj timigitaj homamasoj aŭ stumblis kontraŭ falintaj kaj duonsvenintaj virinoj, kiuj malespere kriis, sed neniu venis por helpi al ili leviĝi... Li vidis ĉiujn ĉi teruraĵojn kun hirtiĝinta hararo, konsternite, nudkape, kaj impetis en direkton al la urbo, kun ununura penso, restinta en lia konscio: savi Radan. Li instinkte serĉis ŝin per sia rigardo en la amaso da deformitaj pro timo vizaĝoj de la renkontataj virinoj kaj junulinoj, kaj denove kuris antaŭen. Tiuj homoj estis al li fremdaj, ili estis fantomoj, ili ne ekzistis por li. Li eĉ ne komprenis kial tiuj homoj fuĝas, pri ili li ne pensis, kiel ankaŭ ili ne pensis pri li, kaj neniu miris, nek demandis kial li iris malantaŭen, dum ĉiuj iris antaŭen. Mankis prudento: estis nur ideo pri kurado. Ĉiupaŝe la scenoj de teruro estiĝis pli monstraj kaj pli oftaj. Ĉe iu kurbiĝo de la ravino li stumblis kontraŭ knabineto, kiu, frakasita pro kurado, freneziĝinta pro teruro kaj sanganta, estis falinta en la riveron, kriegis por helpo... Iom pli malproksime suĉinfano bluiĝinta pro ploro je sia panjo, kiu verŝajne ĝin estis forlasinta, por faciligi sian fuĝon... Maljunulinoj, viroj, virinoj transsaltis tiun povran kreaĵon, sed neniu ĝin rimarkis, nek aŭdis. Ĉiu pensis nur pri si mem. Timo igas la koron kruela, ĝi estas la plej supera kaj abomena formo de la egoismo. La malhonoro mem ne metas tian malnoblan stampon sur la

vizaĝon, kiel la timo... Ognjanov aŭtomate kliniĝis, prenis la infanon kaj pasis antaŭen... Apud iu arbustaro flanke de la vojo, virino estis abortinta kaj, kun tordiĝinta pro suferego vizaĝo, etendis brakojn al la preterpasantoj... Ploroj, raŭkaj krioj, infanaj kriegoj plenigis la aeron... Kiel krono al ĉiuj ĉi malfeliĉoj, komencis pluvi torente. La pluvego klakis sur la lacaj fuĝantoj kaj per sovaĝa eĥo plenigis la montojn. La pluv-neĝo estiĝis de momento al momento pli forta, el la ravinoj komencis flui kotaj torentetoj al la rivero kaj superverŝis la piedojn de la malfeliĉaj fuĝantoj, kies vizaĝojn vipis la pluvo. Ĉiuj estis tute malsekiĝintaj kaj preskaŭ glaciiĝintaj pro la frosto. La infanoj, tirataj perforte de siaj patrinoj, ploregis korŝire kaj trenis sin tra la torento, kaj falis... Ploroj kaj veoj kreskis pli kaj pli.

La ravinoj de la trapasejo ripetadis tiun sovaĝan eĥon de la suferoj kaj de la ŝtormo, kun kiu miksiĝis ankaŭ la bruo de la rivero. Subite, tra la pluvo, en la iranta kontraŭ li vico da homoj, Ognjanov tuj rekonis virinon – la unuan konatinon en tiu svarmo da homoj. Estis sinjorino Muratlijska, kun suĉinfano surbrake, kaj tri pli aĝaj infanoj, kiuj sekvis ŝin. Li travadis la kotan riveron kaj renkontis la lacan patrinon.

– Kie estas Rada? – demandis li.

Ŝi malfermis la buŝon, sed pro anhelo ne povis paroli.

Ŝi nur montris al li per mano al la urbo.

– En via domo?

– Tie, tie, rapidu... – apenaŭ elparolis ŝi.

Malforta, kia ŝi estis, sinjorino Muratlijska apenaŭ povus elteni tiun vojon. Ŝiaj okuloj estis nekutime elstarantaj pro la streĉado marŝi sur tiu malfacila vojo. Sed la volo anstataŭigis la muskolojn... Tiun energion inspiris al ŝi ŝiaj infanoj, belaj kiel anĝeletoj.

– Kien vi portas tiun ĉi infanon? – demandis ŝi per malforta voĉo, apenaŭ aŭdebla pro la bruo de la pluvo.

Ognjanov ĵetis rigardon al siaj brakoj, nur nun rimarkinte, ke li estis preninta de ie ĉi tiun infaneton kaj portis ĝin, sen rememori kiel... Li nur nun eksentis la pezon de ĉi tiu malgranda kreaĵo kaj ĝiajn plorkriojn.

Li konsternite rigardis sinjorinon Muratlijska.

– Donu ĝin, donu ĝin al mi...

Kaj ŝi prenis ĝin de Ognjanov, alpremis ĝin sur la maldekstran flankon de sia malseka brusto, kaj sur la dekstran ŝi alpremis la sian, kaj daŭrigis sian vojon...

Estis tute mallume, kiam Ognjanov atingis la enfluejon de la rivero Varliŝtnica. De tiu loko oni povis vidi la tutan urbon Klisura. La pluvo estis estinginta la incendiojn; nur flamoj kaŝiĝintaj sub la tegmentoj ankoraŭ flagretis kaj ĵetis tra la fenestroj en la mallumiĝintan urbon ruĝetajn lumgarbojn... Aŭdiĝis krakegoj de falegantaj konstruaĵoj... Flamoj reaperis kaj transpasis al aliaj domoj. Neatendite Ognjanov rimarkis grandan novan brulegon, kiu eksplodis en la suda parto de la urbo. Grandaj flamoj kun krakego kaj fulmoj elsaltis el ĝi kaj

miriadoj da fajreroj disflugis en la aeron. Ognjanov rimarkis, ke sur tiu loko estis la domo de sinjorino Muratlijska... Jes, ĝi mem brulis... En la sama momento la supra etaĝo de tiu domo falegis en maron da flamoj kaj flava fumo. En la sama etaĝo estis la ĉambro de Rada.

Li ĵetis sin freneze en la flamantajn stratojn, plenajn de furiozantaj turkoj, kaj malaperis inter ilin.

El la bulgara tradukis diversaj. Redaktis Simeon Simeonov kaj Asen Simeonov. Eldonis Bulgara Esperantista Asocio, Sofio 1959, p. 394-398.

Selma Lagerlöf

GÖSTA BERLING

Sesa Ĉapitro

LA BALO EN EKEBY

Ho, virinoj de tempoj pasintaj!

Paroli pri vi estas kiel paroli pri la regno ĉiela; nur belo vi estis, nur lumo. Eterne junaj, eterne belaj vi estis kaj mildaj kiel okuloj de patrino, kiam ŝi rigardas sian infanon. Molaj kiel sciuridoj vi pendis ĉirkaŭ la kolo de la viro. Neniam via voĉo tremis pro kolero, neniam sulkiĝis via frunto, via mola mano neniam fariĝis kruda kaj malmola. Dolĉaj sanktulinoj, kiel ornamitaj statuoj vi staris en la templo de la hejmo. Incensojn kaj preĝojn oni oferis al vi, pere de vi la amo plenumis siajn miraklojn, kaj sur vian verton la poezio metis orbrilan aŭreolon.

Ho, virinoj de tempoj pasintaj, jen estas rakonto, kiel ankoraŭ unu el vi donis sian amon al Gösta Berling.

Du semajnojn post la balo en Borg estis festo en Ekeby.

Kia festo tiam estis! Maljunaj viroj kaj virinoj kvazaŭ rejuniĝis, ridetis kaj ĝojis, kiam ili nur parolis pri ĝi.

Sed la kavaliroj ja estis solaj estroj de Ekeby en tiu tempo. La majorino vagis en la lando kun almozulaj sako kaj bastono, kaj la majoro loĝis en Sjö. Li ne povis eĉ partopreni la feston, ĉar en Sjö variolo aperis, kaj li volis eviti disvastigon de la infektaĵo.

Kiom da ĝuo ampleksis tiuj dolĉaj dekdu horoj, ekde la klako de la unua vinbotelo ĉe la tagmanĝa tablo ĝis la lasta arĉmovo, kiam la noktomezo jam antaŭ longe pasis! Ili malaperis en la abismo de la tempo, tiuj florumitaj horoj, sorĉitaj de plej fajra vino, de plej franda manĝaĵo, de plej bela muziko, de plej spritaj teatraĵoj, de plej okulravaj scenbildoj. Ili malaperis, ebriaj de plej ebriiga danco. Kie ekzistis tiom glataj plankoj, tiom ĝentilaj kavaliroj, tiom belaj virinoj?

Ho, virinoj de tempoj pasintaj, bone vi komprenis doni brilon al festo. Torentoj de fajro, de sprito kaj juneca forto trafluis ĉiun, kiu proksimiĝis al vi. Valoris la koston fordoni sian oron por la vaksaj kandeloj, kiuj prilumis vian belecon, por la vino, kiu naskis gajecon en viaj koroj, valoris la penon neniigi la ŝuplandojn per danco kaj ĝis paraliziĝo movi la brakon, kiu tenis la arĉon.

Ho, virinoj de tempoj pasintaj, estis vi, kiuj posedis la ŝlosilon de la pordo al la paradizo.

En la salonoj de Ekeby svarmas la plej dolĉaj el via dolĉa aro. Tie estas la juna grafino Dohna, gaja kiel birdo kaj soifa pri ludo kaj danco, kiel decas por ŝiaj dudek jaroj, tie estas la belaj filinoj de la leĝisto en Munkerud kaj la gajaj

fraŭlinoj de Berga, tie estas Anna Stjärnhök, milfoje pli bela ol antaŭe en la milda melankolio, kiu regas ŝin de tiu nokto, kiam la lupoj ĉasis ŝin, tie estas ankoraŭ multaj, kiuj ankoraŭ ne estas sed baldaŭ estos forgesitaj, kaj tie estas ankaŭ la bela Marianne Sinclaire.

Ŝi, la fama, kiu brilis ĉe la kortego de la reĝo kaj en la grafaj kasteloj, la reĝino de beleco, kiu traveturis la landon kaj ĉie estis adore akceptata, ŝi, kiu flamigis la fajreron de amo, kie ajn ŝi montris sin, ŝi honoris la feston de la kavaliroj per sia ĉeesto.

Alte radiis tiutempe la gloro de Vermlando, portata de multaj fieraj nomoj. Pro multe la gajaj infanoj de la bela lando povis fieri, sed kiam ili menciis siajn glorulojn, ili neniam preterlasis mencii pri Marianne Sinclaire.

La lando estis plena de legendoj pri ŝiaj venkoj.

Oni parolis pri grafaj kronoj, kiuj ŝvebis super ŝia kapo, pri milionoj, kiujn oni metis antaŭ ŝiajn piedojn, pri militistaj glavoj kaj poetaj laŭroj, kies brilo logis ŝin.

Kaj ne nur belecon ŝi posedis. Ŝi estis spritplena kaj klera. La plej eminentaj homoj de tiu tempo ĝojis pro interparolo kun ŝi. Ŝi ne verkis mem, sed reekvivis en kantoj multaj el ŝiaj ideoj, kiujn ŝi metis en la animojn de siaj poetaj amikoj.

En Vermlando, la ursolando, ŝi malofte loĝis. Ŝi pasigis sian vivon dum ĉiamaj vojaĝoj. Ŝia patro, la riĉa Melchior Sinclaire, kune kun sia edzino restis hejme en Björne kaj lasis Marianne veturi al siaj altrangaj geamikoj en la grandaj urboj aŭ la potencaj grandbienoj. Lia plezuro estis rakonti pri la mono, kiun ŝi detruis, kaj la du gemaljunuloj vivis feliĉaj en la brilo de la radia ekzisto de Marianne.

Ŝia vivo estis vivo de plezuroj kaj adoro. La aero ĉirkaŭ ŝi estis amo, amo estis ŝiaj kandelo kaj lanterno, amo ŝia ĉiutaga pano.

Ofte ŝi mem amis, ofte, ofte, sed neniam tia plezurfajro daŭris sufiĉe longe por forĝi la katenojn, kiuj ligas por la tuta vivo.

"Mi atendas ĝin, la fortan konkeranton," ŝi kutimis diri pri la amo. "Ĝis nun ĝi ne transgrimpis remparojn aŭ transnaĝis kastelfosojn. Obeema ĝi venis, sen sovaĝo en rigardo kaj malprudento en koro. Mi atendas la potenculon, kiu kondukos min for de mi mem. Tiom forta mi volus scii la amon en mi, ke mi devus timi pro ĝi; nun mi sentas nur tiun amon, pri kiu mia prudento ridetas."

Ŝia ĉeesto donis fajron al la parolo, vivon al la vino. Ŝia ardanta animo rapidigis la arĉojn, kaj la dancantoj ŝvebis en pli dolĉa sentebrio ol antaŭe sur tiuj planktabuloj, kiujn tuŝis ŝia maldika piedo. Ŝi radiis en la scenbildoj, ŝi donis spriton al la komedioj, ŝiaj belaj lipoj...

Silentu, tio ne estis ŝia kulpo, neniel ŝi intencis! Kulpis la balkono, la lunlumo, la puntvualo, la kavalira kostumo kaj la kanto. La kompatindaj junaj homoj estis senkulpaj.

Ĉio tio, kio alportis tiom da malfeliĉo, tamen estis farita en granda bonintenco. Sinjoro Julius, kiu komprenis ĉion, aranĝis scenbildon speciale por ke Marianne brilu en plena gloro.

En la teatro, aranĝita en la granda salono de Ekeby, sidis la cent gastoj kaj vidis sur la scenejo la flavan lunon de Hispanujo moviĝi sur malhela nokta ĉielo. Iu Don Juan venis ŝtelire sur strato en Sevilla kaj haltis sub hederokovrita balkono. Li estis vestita kiel monaĥo, tamen oni vidis broditan manumon iom elstari sub la maniko kaj brilan spadpinton sub la rando de la kapoto.

La maskito ekkantis:

Ne logas min knabina buŝ',
nek la pokal' kun ŝaŭma vin'.
Ne ardas mia sang'
pro tento en rigardotuŝ'
serĉanta okulume min,
nek mi ekflamas pro knabin'
kun ĉerizflora vang'.

Al krad' ne venu tien ĉi,
señora en beleca glor',
forpelus min la tent'.
Por mi kapot' kaj rozari',
kaj Dipatrin' por mia kor'.
La akvokruĉo, jen konsol'
por la malĝoja sent'.

Kiam li eksilentis, Marianne elvenis sur la balkonon, vestita per nigra veluro kaj puntvualo. Ŝi klinis sin super la kradaĵo kaj kantis malrapide kaj ironie:

"Piulo, kio tenas vin
en noktomez' ĉe la balkon'?
Ĉu preĝ' por mia sav'?"

Sed jen subite varme kaj vigle:

"For, oni povus vidi nin!
Jen, malgraŭ pia psalmoson'
perfidas vin tintanta spron'
kaj via longa glav'."

Je tiuj vortoj la monaĥo ĵetis sian maskaĵon, kaj Gösta Berling staris sub la balkono en kavalirkostumo el silko kaj oro. Li ne atentis pri la averto de la belulino, tute male grimpis supren laŭ unu el la balkonaj kolonoj, svingis sin trans la balustradon kaj laŭ la programo de sinjoro Julius, ekgenuis antaŭ la piedoj de la bela Marianne.

Ameme ŝi ridetis al li, etendante sian manon al li por kisi, kaj dum la du junaj homoj rigardis unu la alian, kaptitaj de amo, la kurteno falis.

Kaj antaŭ ŝi genuis Gösta Berling, kun vizaĝo molesprima kiel tiu de poeto kaj kuraĝa kiel tiu de militestro, kun profundaj okuloj, kiuj briletis de petolemo kaj sprito, kiuj petis kaj trudis. Gracia kaj fortika li estis, fajra kaj rava.

Dum la kurteno leviĝadis kaj faladis la du gejunuloj ĉiam restis en la sama pozicio. La okuloj de Gösta kapte tenis la belan Marianne, ili petis, ili trudis.

Jen finiĝis la aplaŭdoj, la kurteno restis senmova, neniu vidis ilin.

Tiam la bela Marianne klinis sin kaj kisis la belan Göstan Berling. Ŝi ne sciis kial, ŝi devis. Li levis la brakojn kaj metis ilin ĉirkaŭ ŝian kapon kaj tiel fikstenis ŝin. Ree kaj ree ŝi kisis lin.

Sed la tutan kulpon havis la balkono, la lunlumo, la puntvualo, la kavalirkostumo, la kanto kaj la aplaŭdoj, la kompatindaj junaj homoj estis senkulpaj. Tion ili ja ne volis. Ŝi ja ne forŝovis grafkronojn, kiuj ŝvebis super ŝia verto, kaj preterpasis milionojn, kiuj kuŝis antaŭ ŝiaj piedoj, pro sopiro al Gösta Berling, kaj li ja ne forgesis ankoraŭ Annan Stjärnhök. Ne, ili estis senkulpaj, neniu el ili volis tion.

La milda Lövenborg, li kun larmo en la okulo kaj rideto sur la lipoj, estis kurtenlevanto tiun tagon. Distrita de multaj malĝojaj memoroj li malmulte rimarkis de la aferoj de tiu ĉi mondo kaj neniam lernis prizorgi ilin bone. Kiam li nun ekvidis, ke Gösta kaj Marianne prenis novan pozicion, li kredis, ke ankaŭ tio apartenas al la scenbildo, kaj jen li komencis tiri la kurtenan ŝnuron.

La junaj sur la balkono rimarkis nenion, ĝis tondraj aplaŭdoj ree salutis ilin.

Marianne ekmovis sin kaj volis forkuri, sed Gösta retenis ŝin, flustrante:

"Restu, ili kredas, ke tio ĉi apartenas al la scenbildo!"

Li sentis, kiel ŝia korpo tremas pro frostosento, kaj kiel la ardo de la kisoj estingiĝas sur ŝiaj lipoj.

"Ne timu!" li flustris. "Belaj lipoj rajtas kisi."

Ili devis resti, dum la kurteno leviĝadis kaj faladis, kaj ĉiufoje, kiam la cent paroj da okuloj vidis ilin, same multe da manoj tondrigis skuantan aplaŭdon.

Ĉar estas bele vidi du belajn, junajn homojn prezenti la feliĉon de amo. Neniu povis kredi, ke tiuj kisoj estas io alia ol teatra ŝajno, neniu suspektis, ke la señora tremas pro honto kaj la kavaliro pro maltrankvilo. Neniu povis kredi, ke ĉio ne apartenas al la scenbildo.

Fine Marianne kaj Gösta staris malantaŭ la scenejo.

Ŝi glittuŝe movis la manon supren sur la frunto.

"Mi ne komprenas min mem," ŝi diris.

"Fi, fraŭlino Marianne!" li diris grimace kaj gestis per la manoj. "Kisi Göstan Berling, fi!"

Marianne devis ridi.

"Ĉiu scias ja, ke Gösta Berling estas nekontraŭstarebla. Mia kulpo ne estas pli granda ol tiu de aliaj."

Kaj ili tute pace interkonsentis konservi trankvilan mienon, por ke neniu suspektu la veron.

"Ĉu mi povas esti certa, ke oni ne ekscios la veron, sinjoro Gösta?" ŝi demandis, kiam ili estis enirontaj al la publiko.

"Vi povas, fraŭlino Marianne. La kavaliroj povas silenti, pri ili mi povas garantii."

Ŝi mallevis la palpebrojn. Stranga rideto ludis sur ŝiaj lipoj.

"Se oni, tamen ekscios la veron, kion homoj tiam kredos pri mi, sinjoro Gösta?"

"Ili kredos nenion, ili scios, ke tio ĉi signifas nenion. Ili pensos, ke la rolo kaptis nin kaj ni daŭrigis la ludon."

Ankoraŭ unu demando ŝtele aperis sub la mallevitaj palpebroj, sub la alprenita rideto.

"Sed vi mem, sinjoro Gösta? Kion vi pensas pri la afero?"

"Mi pensas, ke vi amas min, fraŭlino Marianne," li ŝercis.

"Ne kredu ion tian!" ŝi ridetis. "Tiam mi devus trapiki vin per tiu ĉi hispana ponardo por montri, ke vi estas malprava."

"Multekostaj estas virinaj kisoj," Gösta diris. "Ĉu kostas la vivon esti kisata de fraŭlino Marianne?"

Tiam rigardo ekflamis al li el la okuloj de Marianne, tiel akra, ke ĝi sentiĝis kiel puŝo.

"Mi volus vidi vin mortinta, Gösta Berling, mortinta, mortinta!"

Tiuj vortoj ardigis malnovan sopiron en la sango de la poeto.

"Ho," li diris, "se tiuj vortoj estus pli ol vortoj, se ili estus sagoj sible flugantaj el malhela arbustaro, se ili estus ponardo aŭ veneno kaj havus povon detrui tiun ĉi aĉan korpon kaj doni liberecon al mia animo!"

Ŝi ree estis trankvila kaj ridetis.

"Infanaĵoj!" ŝi diris kaj prenis lian brakon por iri al la gastoj.

Ili ankoraŭ portis siajn kostumojn, kaj iliaj triumfoj reaperis, kiam ili montris sin ekster la scenejo. Ĉiuj laŭdis ilin. Neniu suspektis ion.

La balo ree komenciĝis, sed Gösta fuĝis de la balsalono.

Lia koro doloris pro la rigardo de Marianne, kvazaŭ vundus ĝin akra ŝtalo. Li ja komprenis la sencon de ŝiaj vortoj.

Estis hontinde ami lin, estis hontinde esti amata de li, honto pli terura ol morto.

Li neniam plu volis danci, neniam plu vidi ilin, la belajn virinojn.

Li ja sciis. Tiuj belaj okuloj, tiuj ruĝaj vangoj ne flamis por li. Ne por li ŝvebis tiuj malpezaj piedoj, sonoris tiuj nelaŭtaj ridoj. Jes, danci kun li, amindumi kun li ili povis, sed neniu el ili sincere deziris fariĝi la lia.

La poeto iris en la fumĉambron al la maljunaj sinjoroj kaj eksidis ĉe unu el la ludtabloj. Okaze li prenis lokon ĉe la sama tablo, kie sidis la potenca posedanto de Björne ludante ordinaran hazardludon alterne kun "pola ludo" kaj kolektis antaŭ si grandan amason da kupraj kaj arĝentaj moneroj.

Temis jam pri altaj sumoj. Nun Gösta ankoraŭ plivigligis la ludon. Oni elprenis la verdajn bankbiletojn, kaj ĉiam kreskis la monamaso antaŭ la potenca Melchior Sinclaire.

Sed ankaŭ antaŭ Gösta kolektiĝis kaj moneroj kaj monbiletoj, kaj baldaŭ li estis la sola, kiu persistis en la batalo kontraŭ la granda uzinposedanto de Björne. Baldaŭ eĉ la granda monamaso transiris de Melchior Sinclaire al Gösta Berling.

"Gösta, mia knabo!" la uzinposedanto ride kriis, kiam li jam forludis ĉion, kio troviĝis en monujo kaj monbiletujo. "Kiel ni nun faru? Mi estas senmona, kaj mi neniam ludas per pruntita mono, tion mi promesis al mia patrino."

Li tamen trovis solvon. Li forludis la horloĝon kaj la kastoran pelton kaj ĝuste volis ekludi pri siaj ĉevalo kaj sledo, kiam Sintram haltigis lin.

"Enmetu ion, kio donos gajnon!" la malica uzinposedanto de Fors konsilis al li. "Metu ion, kio povas rompi la malbonŝancon!"

"Diablo scias, kion mi tiam eltrovu!"

"Ludu pri via plej ruĝa korsango, frato Melchior, ludu pri via filino!"

"Tion vi sendanĝere povos fari," Gösta diris kun rido. "Tiu gajno neniam venos al mi."

Ankaŭ la potenca Melchior povis nur ridi. Li apenaŭ toleris, ke oni mencias la nomon de Marianne ĉe la ludtabloj, sed tio ĉi estis tiel freneze ridinda, ke li ne povis koleriĝi. Forludi Marianne al Gösta, jes, tion li ja povis riski.

"Tio estas," li klarigis, "se vi povos ricevi ŝian jeson, Gösta, tiam mi metos sur tiun ĉi karton mian benon al la geedziĝo."

Gösta enmetis sian tutan gajnon, kaj la ludo komenciĝis. Li gajnis, kaj sinjoro Sinclaire ĉesis ludi. Li vidis, ke li ne povas batali kontraŭ la malbonŝanco.

La noktaj horoj pasis, jam estis post noktomezo. La vangoj de la belaj virinoj komencis paliĝi, la buklaj haroj rektiĝis, la robaj krispgarnaĵoj ĉifiĝis. La maljunaj sinjorinoj levis sin el la sofanguloj kaj diris, ke ĉar la festo daŭris jam dum dekdu horoj, povas esti tempo iri hejmen.

Kaj la bela festo devus finiĝi, sed tiam Lilliecrona prenis la violonon kaj ekludis la lastan polskon. La ĉevaloj staris antaŭ la pordo, la maljunaj sinjorinoj vestis sin per peltoj kaj kufĉapeloj, la maljunaj sinjoroj surmetis la veturskarpojn kaj butonis la superbotojn.

Sed la junaj ne povis forŝiri sin de la danco. Oni dancis en supervestoj, dancis kvaro-polskon, kurpolskon, rondpolskon, estis furioza dancado. Kiam kavaliro forlasis sian sinjorinon, tuj venis alia kaj kuntiris ŝin.

Kaj ankaŭ la malgaja Gösta Berling kuntiriĝis en la kirlon. Li volis fordanci la malĝojon kaj humiligon, li volis reenigi tremigan vivĝojon en la sangon, li volis esti gaja, li kiel la aliaj. Kaj li dancis tiel, ke la muroj de la ĉambro rondiris kaj liaj pensoj deliris.

Jen, kiun sinjorinon li altiris el la mezo de la svarmo? Ŝi estis malpeza kaj gracia, kaj li sentis, ke torentoj de fajro fluas inter li kaj ŝi. Ho, Marianne!

Kiam Gösta dancis kun Marianne, Sintram jam sidis en sia sledo sur la korto, kaj apud li staris Melchior Sinclaire.

La granda uzinposedanto estis malpacienca pro la atendo por Marianne. Li frapmovis siajn grandajn superbotojn en la neĝo kaj frapis per la brakoj, ĉar estis severa malvarmo.

"Eble estis malsaĝe, Sinclaire, forludi Marianne al Gösta," Sintram diris.

"Kion?"

Sintram ordigis la kondukrimenojn kaj levis la vipon, antaŭ ol li respondis: "Tiu kisado ne apartenis al la scenbildo."

La potenca uzinposedanto levis la brakon por mortiga bato, sed Sintram jam estis for. Li forveturis, vipis la ĉevalon en sovaĝan rapidon kaj ne kuraĝis rigardi malantaŭen, ĉar Melchior Sinclaire havis pezan manon kaj mallongan paciencon.

La uzinposedanto de Björne iris en la dancsalonon por serĉi sian filinon kaj tiam vidis, ke Gösta kaj Marianne dancas kune.

Sovaĝa kaj furioza aspektis la lasta polsko. Iuj paroj estis palaj, aliaj flame ruĝaj, la polvo ŝvebis kiel fumo en la salono, la konsumitaj vakskandeloj ardis en la ingoj, kaj meze en la fantomeca detruiĝo ili flugis antaŭen, Gösta kaj Marianne, reĝaj en sia nevenkita forto, en senmakula beleco, feliĉaj en la sindono al la belega moviĝo.

Melchior Sinclaire rigardis ilin dum tempeto; sed jen li foriris sen ĝeni la dancadon de Marianne. Li brue fermis la pordon, piedbruis terure sur la ŝtuparo kaj tuj eksidis en la sledo, kie lia edzino jam atendis, kaj veturis hejmen.

Kiam Marianne ĉesis danci kaj demandis pri siaj gepatroj, ili jam estis for.

Eksciante pri tio ŝi tamen ne montris iun surprizon. Ŝi silente vestis sin kaj iris sur la korton. La sinjorinoj en la vestĉambro kredis, ke ŝi veturas per propra sledo.

Sed en siaj maldikaj silkaj ŝuoj ŝi rapidis antaŭen sur la vojo sen paroli al iu pri sia mizero. En la mallumo neniu rekonis ŝin, kiam ŝi iris apud la vojrando, neniu povis kredi, ke tiu malfruhora irantino, kiun la preterflugantaj sledoj pelis flanken en la altajn neĝamasojn, estas la bela Marianne.

Kiam ŝi estis sekura meze sur la vojo, ŝi komencis kuri. Ŝi kuris tiom longe, kiom ŝi povis, poste ŝi iris, poste ree kuris. Terura, turmenta angoro pelis ŝin.

Maksimume ne povas esti pli ol kvarona mejlo de Ekeby al Björne. Marianne baldaŭ estis hejme, sed ŝi preskaŭ kredis, ke ŝi iris erare. Ĉiuj pordoj estis fermitaj, kiam ŝi atingis la domon, ĉiuj kandeloj estingitaj. Ŝi demandis sin, ĉu ŝiaj gepatroj ne venis ankoraŭ.

Ŝi aliris kaj faris kelkajn pezajn frapojn sur la eniran pordon. Ŝi prenis la anson kaj skuis tiel, ke bruis en la tuta domo. Neniu venis por malfermi, sed kiam ŝi lasis la feron, kiun ŝi kaptis per nudaj manoj, la frostfiksita haŭto forŝiriĝis de la mano.

La granda uzinposedanto Melchior Sinclaire veturis hejmen por fermi la pordojn de Björne por sia sola infano.

Li estis ebria pro multa trinkado, sovaĝa pro kolero. Li malamis sian filinon, pro tio ke ŝi ŝatis Gösta Berling. Li enfermis la geservistojn en la kuirejo kaj sian edzinon en la dormĉambro. Per fortaj ĵuroj li promesis al ili, ke li kripligos tiun, kiu provos enlasi Marianne. Ili sciis, ke li ne rompos la promeson.

Neniam iu vidis lin tiom kolera. Pli granda doloro neniam trafis lin. Se la filino venus antaŭ liaj okuloj, li eble mortigus ŝin.

Ornamaĵojn el oro, vestojn el silko li donis al ŝi, bonajn manierojn kaj libran kleron li instruigis al ŝi. Ŝi estis lia fiero, lia gloro. Li fieris pro ŝi, kvazaŭ ŝi portus kronon. Ho, lia reĝino, lia diino, lia adorata, bela, fiera Marianne! Ĉu li rifuzis ion al ŝi? Ĉu li ne kvazaŭ konsideris sin tro simpla por esti ŝia patro? Ho, Marianne, Marianne!

Ĉu li ne malamu ŝin, kiam ŝi enamiĝis al Gösta Berling kaj kisis lin? Ĉu li ne malakceptu ŝin, fermu sian pordon por ŝi, kiam ŝi volas malhonori sian superecon per amo al tia viro? Ŝi restu en Ekeby, ŝi kuru al la najbaroj por peti tranoktejon, ŝi dormu en la neĝamasoj! Estas egale, ŝi jam estas trenita en la koto, la bela Marianne. Ŝia brilo estas for. La brilo de lia vivo estas for.

Li kuŝas en sia lito kaj aŭdas, kiel ŝi frapas sur la vestibla pordo. Ĉu tio koncernas lin? Li dormas. Ekstere staras tiu, kiu volas edziniĝi kun eksigita pastro, li ne havas hejmon por iu tia. Se li estus aminta ŝin malpli, se li estus malpli fierinta pro ŝi, tiam li eble povus enlasi ŝin.

Jes, sian benon li ne povos rifuzi al ili. Ĝin li forludis. Sed sian pordon li ne malfermos por ŝi. Ho, Marianne!

La bela, juna virino ankoraŭ staris antaŭ la pordo de la hejmo. Jen ŝi skuis la seruron en senpova kolero, jen ŝi ekgenuis, faldis siajn vunditajn manojn kaj petis pri pardono.

Sed neniu aŭdis ŝin, neniu respondis, neniu malfermis.

Ho, ĉu tio ne estis terura? Angoro kaptas min, kiam mi rakontas tion. Ŝi venis de balo, kies reĝino ŝi estis. Ŝi estis fiera, riĉa, feliĉa, kaj en unu momento ŝi ĵetiĝis en tian abismon de mizero. Elfermita de sia hejmo, viktimo de la frosto, ne mokita, ne batita, ne malbenita, nur elfermita per malvarma nefleksebla sensenteco.

Mi pensas pri la frosta, stelklara nokto, kiu volbis sin ĉirkaŭ ŝi, la granda, vasta nokto, kun la malplenaj, dezertaj neĝokampoj kaj la silentaj arbaroj. Ĉio dormis, ĉio ripozis en sendolora dormo, nur unu vivanta punkto troviĝis en tiu dormanta blankaĵo. Ĉio malĝoja, angora kaj terura, kio alitempe estas dividita en ĉiuj lokoj de la mondo, rampis antaŭen al tiu sola punkto. Ho, Dio, suferi sola meze en dormanta, glaciiĝinta mondo!

La unuan fojon en ŝia vivo renkontis ŝin malkompato kaj krudeco. Ŝia patrino ne forlasis sian liton por savi ŝin. Maljunaj, fidelaj geservistoj, kiuj gvidis ŝiajn unuajn paŝojn, aŭdis ŝin sed ne movis eĉ piedon por ŝi. Pro kia krimo ŝi do estis punata? Kie ŝi povus esperi kompaton se ne ĉe tiu ĉi pordo? Se ŝi estus murdinta, ŝi tamen estus frapinta ĝin, kredante ke la homoj en la domo pardonos ŝin. Se ŝi falinte estus la plej aĉa el estaĵoj, venus detruita kaj en ĉifonoj, jen, tamen ŝi

konfide irus al tiu ĉi pordo kaj atendus amoplenan bonvenon. Tiu ĉi pordo estis la enirejo al ŝia hejmo. Malantaŭ ĝi ŝi povus renkonti nur amon.

Ĉu ŝia patro ne suferigis ŝin jam sufiĉe longe? Ĉu ili ne malfermos baldaŭ?

"Patro, patro!" ŝi vokis. "Enlasu min! Mi frostas, mi timas. Estas terure tie ĉi ekstere!"

"Patrino, patrino, vi, kiu iris tiom da paŝoj por servi min! Vi, kiu maldormis tiom da noktoj pro mi, kial vi nun dormas? Patrino, patrino, maldormu ankoraŭ tiun solan nokton, kaj mi neniam plu malĝojigos vin!"

Ŝi vokas kaj poste senspire silentas por aŭskulti respondon. Sed neniu aŭdis ŝin, neniu obeis ŝin, neniu respondis.

Tiam ŝi angore tordas la manojn, sed ŝiaj okuloj ne posedas larmojn.

La longa, malluma domo kun siaj fermitaj pordoj kaj senlumaj fenestroj kuŝis timige senmova en la nokto. Kio nun fariĝos el ŝi, la senhejmulino? Brulmarkita kaj malhonorita ŝi estos ĉiam, kiam la tera ĉielo ankoraŭ volbos sin super ŝi. Kaj ŝia patro mem premis la ruĝan feron al ŝia ŝultro.

"Patro," ŝi krias ankoraŭfoje, "kio fariĝos el mi? La homoj opinios ĉion malbonan pri mi."

Ŝi ploris kaj turmentiĝis, ŝia korpo estis rigida pro frosto.

Ve, ke tia mizero povas veni al tiu, kiu ĵus staris tiel alte! Ke oni tiel facile povas transiĝi en plej profundan mizeron! Ĉu ni ne devas timi la vivon? Kiu velas per sekura boato? Ĉirkaŭ ni malĝojo ondas kiel ŝaŭmanta maro, jen, malsataj ondoj lekas la flankojn de la ŝipo, jen, ili alkuras por salti en la ŝipon! Ho, neniu fiksa punkto, neniu firma tero, neniu sekura boato estas videbla en la tuta vasto, nur nekonata ĉielo super oceano de malĝojo!

Sed silentu! Fine, fine! Facilaj paŝoj sonas en la vestiblo.

"Ĉu estas patrino?" Marianne demandas.

"Jes, mia infano."

"Ĉu mi nun rajtas eniri?"

"Patro ne volas permesi al vi enveni."

"Mi kuris en la neĝo en miaj maldikaj ŝuoj de Ekeby kaj tien ĉi. Mi staris tie ĉi dum unu horo kaj frapis kaj vokis. Mi frostmortos tie ĉi. Kial vi forveturis de mi?"

"Infano mia, infano mia, kial vi kisis Gösta Berling?"

"Sed diru do al patro, ke tio ne signifas ami lin. Estis ludo. Ĉu li imagas, ke mi volas havi Göstan?"

"Iru al la domo de la terlaborestro, Marianne, kaj petu permeson resti tie dum tiu ĉi nokto! Patro estas ebria. Oni ne povas paroli kun li. Li tenis min kiel kaptiton tie supre. Mi ŝtele foriris, kiam mi kredis, ke li dormas. Li mortbatos vin, se vi envenos!"

"Patrino, patrino, ĉu mi iru al fremduloj, kvankam mi havas hejmon? Ĉu vi estas same kruda kiel patro? Kiel vi povas permesi tion, ke mi estu elfermita? Mi ekkuŝos en la neĝo tie ĉi ekstere, se vi ne enlasos min."

Tiam la patrino de Marianne metis sian manon sur la seruron por malfermi, sed en la sama momento aŭdiĝis pezaj paŝoj sur la alsupra ŝtuparo, kaj severa voĉo vokis ŝin.

Marianne aŭskultis; ŝia patrino rapidis for, la severa voĉo insultis ŝin kaj jen...

Marianne aŭdis ion teruran. Ŝi povis aŭdi ĉiun sonon en la silenta domo.

Ŝi aŭdis la bruon de frapo, de bastona frapo aŭ vangofrapo, poste malfortan brueton kaj ree frapon.

Li batis ŝian patrinon, la terura! La herostatura Melchior Sinclaire batis sian edzinon!

Kaj pala pro teruro Marianne ĵetis sin sur la sojlon kaj tordiĝis en angoro. Nun ŝi ploris, kaj ŝiaj larmoj glaciiĝis sur la sojlo de la hejmo.

Kompaton, indulgon! Malfermu, malfermu, por ke ŝi povu klini sian propran dorson sub la batoj! Ho, ke li povis bati la patrinon, bati ŝin pro tio, ke ŝi ne volis vidi sian filinon mortinta en la neĝo la venontan tagon, pro tio, ke ŝi volis konsoli sian infanon!

Granda malhonoro tiun nokton trafis Marianne. Ŝi revis esti reĝino, kaj jen ŝi kuŝis tie preskaŭ kiel vipita sklavino.

Sed ŝi levis sin en glacia kolero. Ankoraŭfoje ŝi frapis la pordon per sia sanga mano kaj kriis:

"Aŭskultu, kion mi diras al vi, vi, kiu batas patrinon! Vi ploros, Melchior Sinclaire, ploros!"

Post tio la bela Marianne iris por ripozi en la neĝo. Ŝi demetis la pelton kaj kuŝis en sia nigra velura robo, facile distingebla kontraŭ la blanka neĝo. Ŝi imagis, kiel ŝia patro elvenos la venontan tagon por sia frumatena promeno kaj trovos ŝin tie. Ŝi deziris nur ke li mem trovu ŝin.

Ho, morto, pala amiko! Ĉu estas same vere kiel konsole, ke mi neniel povos eviti renkonton kun vi? Ankaŭ al mi, la plej inerta de la teraj laboristoj, vi venos, deprenos la eluzitan ledŝuon de mia piedo, fortiros la kirlilon kaj la farunujon el mia mano, demetos la laborvestojn de mia korpo. Per milda perforto vi etendos min sur puntornamita kuŝejo, per ĝispiedaj, drapiritaj tolvestoj vi ornamos min. Miaj piedoj ne bezonos ŝuojn plu, sed miajn manojn oni vestos per neĝoblankaj gantoj, kiujn laboro neniam malpurigos. Sanktigita de vi por la dolĉa ripozo, mi dormos miljaran dormon. Ho, liberiganto! La plej inerta el la teraj laboristoj mi estas, kaj kun tremo de plezuro mi revas pri la momento, kiam mi estos prenata en vian regnon.

Pala amiko, libere uzu kontraŭ mi vian forton, sed mi diras al vi: pli malfacila estis por vi la batalo kontraŭ la virinoj de tempoj pasintaj. La fortoj de la vivo estis potencaj en iliaj sveltaj korpoj, neniu frosto povis malvarmigi ilian ardantan sangon.

Vi metis la belan Marianne sur vian kuŝejon, ho, morto, kaj vi sidis apud ŝi kiel maljuna vartistino sidas apud la lulilo por dormigi la infanon. Vi fidela, maljuna vartistino, kiu scias, kio estas bona por la homidoj, kiel tio devas inciti

vin, ke ludkamaradoj venas, kiuj brue kaj petole vekas vian dormigitan infanon! Kiel vi devis ekkoleri, kiam la kavaliroj levis la belan Marianne el la kuŝejo, kiam viro metis ŝin al sia brusto kaj varmaj larmoj falis el liaj okuloj sur ŝian vizaĝon!

En Ekeby ĉiuj kandeloj estis estingitaj kaj ĉiuj gastoj forveturintaj. La kavaliroj staris solaj en la kavalira domo ĉirkaŭ la lasta, duone eltrinkita tasego.

Tiam Gösta tinte tuŝis la randon de la tasego kaj faris paroladon por vi, virinoj de tempoj pasintaj. Paroli pri vi, li diris, estas kiel paroli pri la regno ĉiela, nur beleco vi estis, nur lumo. Eterne junaj, eterne belaj vi estis kaj mildaj kiel okuloj de patrino, kiam ŝi rigardas sian infanon. Molaj kiel sciuridoj vi pendis ĉirkaŭ la kolo de la viro. Neniam via voĉo tremis pro kolero, neniam sulkiĝis via frunto, via mola mano neniam fariĝis kruda kaj malmola. Dolĉaj sanktulinoj vi estis, ornamitaj statuoj en la templo de la hejmo. La viroj genuis antaŭ viaj piedoj, oferante al vi incenson kaj preĝojn. Pere de vi la amo plenumis siajn miraklojn, sur vian frunton la poezio fiksis orbrilan aŭreolon.

Kaj la kavaliroj eksaltis, ekstazaj de vino, ekstazaj de liaj vortoj, kun la sango ŝaŭmanta en festa ĝojo. La maljuna onklo Eberhard kaj la maldiligenta kuzo Kristoffer ne foriris de la ludo. En fluga rapido la kavaliroj jungis ĉevalojn al la sledoj kaj rapidis for en la malvarma nokto por ankoraŭfoje honori tiujn, kiujn oni ne povis sufiĉe honori, por kanti serenadon al ĉiu el tiuj, kiuj posedis la ruĝajn vangojn kaj la klarajn okulojn, kiuj ĵus brilis en la vastaj salonoj de Ekeby.

Ho, virinoj de tempoj pasintaj, certe plaĉis al vi, kiam vi eniris la ĉielon de belaj sonĝoj, ke vekis vin serenado de la plej fidelaj el viaj kavaliroj! Certe plaĉis al vi, kiel plaĉas al endormiĝinta animo, ke vekas ĝin la dolĉa muziko de la ĉielo.

Sed la kavaliroj ne atingis malproksimen dum tiu pia veturo, ĉar jam kiam ili venis al Björne, ili trovis la belan Marianne kuŝanta en la neĝo, tuj apud la pordo de la hejmo.

Vidante ŝin tie ili ektimis kaj koleris. Estis kvazaŭ trovi adoratan sanktulbildon kuŝi detruita kaj prirabita antaŭ preĝeja pordo.

Gösta skuis sian pugnitan manon al la malhela domo. "Infanoj de malamo," li kriis, "hajlopluvoj, nordaj ventoj, detruantoj de la paradizo de Dio!"

Beerencreutz lumigis sian kornlanternon kaj lumis sur la blupalan vizaĝon. Tiam la kavaliroj ekvidis la vunditajn manojn de Marianne kaj la larmojn, kiuj glaciiĝis sur ŝiaj okulharoj, kaj ili ĝemis kiel virinoj, ĉar ŝi estis ja ne nur sanktulbildo sed bela virino, kiu donis ĝojon al maljunaj koroj.

Gösta Berling ekgenuis apud ŝi.

"Jen ŝi kuŝas, mia fianĉino," li diris. "Ŝi donis al mi la fianĉinan kison antaŭ kelkaj horoj, kaj ŝia patro promesis al mi sian benon. Ŝi atendas, ke mi venu por dividi kun ŝi ŝian blankan kuŝejon."

Kaj Gösta levis la senvivulinon sur fortaj brakoj.

"Hejmen al Ekeby kun ŝi!" li kriis. "Nun ŝi estas mia. En la neĝo mi trovis ŝin, neniu prenos ŝin de mi. Ni ne veku ilin en la domo. Kion ŝi povus fari malantaŭ tiuj pordoj, sur kiuj ŝi frapis sian manon ĝissange."

Oni lasis lin fari, kiel li volis. Li metis Marianne en la unuan sledon kaj eksidis apud ŝi. Beerencreutz starigis sin malantaŭe kaj prenis la kondukrimenojn.
"Prenu neĝon kaj frotu ŝin!" li ordonis.
La frosto paralizis ŝiajn membrojn, sed la sovaĝa maltrankvila koro ankoraŭ batis. Ŝi eĉ ne perdis la konscion, ŝi sciis ĉion pri la kavaliroj kaj kiel ili trovis ŝin, sed ŝi ne povis movi sin. Tial ŝi kuŝis rigida en la sledo, dum Gösta frotis ŝin per neĝo kaj jen ploris jen kisis, kaj ŝi sentis animplenigan deziron povi tiom levi almenaŭ unu brakon, ke ŝi povu redoni kareson al li.
Ŝi memoris ĉion. Ŝi kuŝis rigida kaj senmova sed pensis klare kiel neniam antaŭe. Ĉu ŝi amas Gösta Berling? Jes. Ĉu estis nur kaprico de tiu ĉi vespero? Ne, tio ekzistis longe, dum multaj jaroj.
Ŝi komparis sin kun li kaj la aliaj homoj en Vermlando. Ili ĉiuj estis nekomplikitaj kiel infanoj. Ili sekvis ĉiun inklinon, kiu kaptis ilin. Ili vivis nur la eksteran vivon, neniam esploris la profundojn de sia animo. Sed ŝi fariĝis tia, kia oni fariĝas per interrilato kun multaj homoj; ŝi neniam povis tute dediĉi sin al io. Se ŝi amis, kion ajn ŝi faris, ŝia duona parto kvazaŭ rigardis tion kun frosta, rikana rido. Ŝi sopiris al pasio, kiu povus fortiri ŝin en senpripensa furiozo. Kaj jen li alvenis, la potenca.
Kiam ŝi kisis Gösta Berling sur la balkono, tiam ŝi la unuan fojon forgesis sin mem.
Kaj jen la pasio ree kaptis ŝin, ŝia koro tiel laboris, ke ŝi aŭdis ĝiajn batojn. Ĉu ŝi ne povos baldaŭ estri siajn membrojn? Ŝi sentis furiozan ĝojon pro la forpelo el la hejmo. Nun ŝi senhezite donos sin al Gösta. Kiel stulta ŝi estis, dum kiom da jaroj ŝi bridis sian amon! Ho, dolĉe, dolĉe estas cedi al la amo. Sed ĉu ŝi do neniam liberiĝos el tiuj glaciaj katenoj? Ŝi estis glacio en sia interno kaj fajro ekstere, nun estas male, fajranimo en glacikorpo.
Jen Gösta eksentas, kiel du brakoj en malforta, senpova premo metas sin ĉirkaŭ lian kolon.
Apenaŭ li sentis la premon, sed Marianne opiniis, ke ŝi per sufoka ĉirkaŭbrako donis vojon al la kunpremita pasio en sia interno.
Sed kiam Beerencreutz vidis tion, li lasis la ĉevalon kuri laŭplaĉe sur la konata vojo. Li levis la rigardon kaj persiste kaj senĉese rigardis al la Plejadoj.

El la sveda tradukis Stellan Engholm.
Eldonis Eldona Societo Esperanto, Stokholmo 1934, p. 93-115.

Lusin

POST LA MORTO

Mi sonĝis, ke mi estas morta sur la vojo.

Kie mi estas, kiel mi venis tien ĉi kaj kiamaniere mi mortis: ĉion ĉi mi ne sciis. Unuvorte, kiam mi ekkonsciiĝis ke mi estas morta, mi jam mortis en tiu loko.

Aŭdiĝis pigokrioj kaj tuj poste sekvis korva kriado. La aero estis tre freŝa, kvankam ĝi odoris iomete je la humo. Eble estis ĉe la mateniĝo. Mi volis malfermi la okulojn, sed ili neniel moviĝis, kvazaŭ ne apartenus al mi; tiam mi provis levi la manojn, sed la rezultato estis tute sama.

Akra sago de teruro trapikis subite mian koron. Dum mia vivo mi imagis kun ŝerco: se morto de homo signifus simple la senfunkciiĝon de la motor-nervo kaj restus ankoraŭ la konscio, ĝi estus pli terura ol la plena morto. Jen efektiviĝis mia supozo, ĉar mi mem pruvis la hipotezon.

Aŭdiĝis paŝbruoj. Eble iu pasanto. Unurada ĉaro preterruliĝis apud mia kapo. Verŝajne ĝi estis ŝarĝita. La krakado naskis en mi naŭzon kaj kaŭzis malagrablan senton al miaj dentoj. Mi perceptis ion ruĝan antaŭ la okuloj. Ŝajne la suno leviĝis. Do mi kuŝis vizaĝe al la oriento. Sed ĉio tio estis negrava. Jen homa flustrado. Scivolemuloj. Ilia irado levis polvon kaj blovis ĝin en mian nazon, ke mi volis terni. Tamen mi ne ternis, mi nur havis ternemon.

Paŝbruoj venis unu post alia kaj ĉiuj haltis en la proksimo. Flustrado kreskadis, ŝajne plimultiĝis la rigardantoj. Mi ekdeziris priaŭskulti iliajn opiniojn. Samtempe mi ekpensis, ke tio estis malsincera parolo, kion mi esprimis dum mia vivo, ke neatentinda estas la kritiko de aliaj homoj. Jen mi perfidis min tuj post la morto. Mi tamen aŭskultis. Sed la opinioj venis al nenia konkludo. Kion mi aŭdis, mi povas resumi en jena maniero:

"Mortis?..."

"Hm... tiu ĉi..."

"Ba!..."

"Fi... Ho!..."

Mi tre ĝojis, ĉar mi aŭdis neniun voĉon de miaj konatoj. Alie mia morto donus al ili aŭ ĉagrenon aŭ kontentigon, aŭ pli da materialo por ilia postmanĝa babilado kaj tiukaze kostus al ili multe da multvalora tempo. Pri ĉio ĉi mi tre bedaŭrus. Nun neniu el ili vidis, do neniu estis influita. Bone, jen mia morto malutilis al neniu!

Sed io – verŝajne formiko – rampis sur mia spino tiklante. Mi ne povis moviĝi kaj ne havis la kapablon ĝin forpeli. En aliaj tagoj mi simple iom tordu mian korpon kaj ĝi jam fortimiĝus. Nu, alia surgrimpis mian femuron. Kion vi faras? vermaĉoj!

Jen io ankoraŭ pli malbona: verda muŝo kun ekzumo haltis sur mia vango. Ĝi faris kelkajn paŝojn, alflugis al mia nazpinto kaj eklekis ĝin. Mi pensis malbonhumore: ho via moŝteto, mi ne estas granda homo kaj ne indas la penon malkovri ĉe mi materialon por disertacio... Sed mi ne povis eligi mian sekretan penson. Ĝi kuris malsupren de mia nazpinto kaj nun lekis mian lipon per sia malvarma lango. Mi ne sciis ĉu tio estas signo de amikeco. Kelkaj aliaj kolektiĝis sur miaj brovoj. Ĉe ĉiu paŝo, kiun ili faris, skuiĝis mia harradiko. Tio kaŭzis al mi netolereblan – plej netolereblan naŭzon.

Subite estiĝis ekblovo de vento kaj io falis sur min de supre. Ili forflugis ĉiuj dirante ĉe la foriro:

"Kia domaĝo!..."

Mi tiel koleriĝis, ke mi preskaŭ svenis.

* * *

Obtuza sono de lignaĵo ĵetita sur la teron kune kun skuiĝo de la tero ekvekis min. Mia frunto sentis la strio-desegnaĵon de fragmitotiga mato. Sed ĝi estis baldaŭ forprenita kaj mia frunto sentis denove la ardon de la sunradioj. Cetere mi aŭdis, ke iu diras:

"Kial li mortis ĉi tie?..."

La voĉo estis tre proksima al mi, ŝajne li kliniĝis super mi. Sed kie oni devas morti? Antaŭe mi kredis, ke se homoj ne havas la rajton vivi ie ajn laŭdezire, ili havas almenaŭ la rajton laŭdezire morti. Nun mi eksciis, ke ne. Eĉ en tio estas ankaŭ malfacile plaĉi al ĉiuj. Bedaŭrinde mi ne havis delonge plumon kaj paperon; eĉ se mi havus, mi jam ne povis skribi; kaj eĉ se mi skribus, mi ja ne havis ŝancon ĝin publikigi. Do mi devis rezigni.

Iuj venis min forporti. Mi ne sciis, kiuj ili estas. Aŭdiĝis tintado de glavingo. Tie, kie mi ne rajtis morti, ĉeestis ankaŭ policisto. Mi estis transturnita plurfoje, sentis levon kaj poste malsuprenigon. Mi aŭdis, ke kovrilo estas surmetata kaj najloj estas martelataj. Sed, strange, nur du najloj. Ĉu tie ĉi oni fiksas la ĉerkkovrilon nur per du najloj?

Mi pensis: ĉi-foje tabuloj kun najloj ĉirkaŭas min je ses flankoj. Jen plena fiasko kaj fino por ĉio!...

* * *

"Sufoke!..." mi pensis denove.

Fakte mi tamen multe pli trankviliĝis ol antaŭe, kvankam sciis malbone, ĉu mi estas enterigita. Mia mandorso tuŝis la strio-desegnaĵon de fragmitotiga mato kaj sentis, ke la mortvesto ne estas malbona. Sed mi ne sciis, kiu pagis por ĉio ĉi. Abomenindaj estis la kanajloj enterigistoj! Angulo de mia subvesto estis ĉifita sub la dorso. Ili ne glatigis ĝin. Nun ĝi kaŭzis al mi multan malkomforton. Ĉu vi kredis, ke mortintoj estas senkonsciaj kaj fuŝis ĉion tiel senatente? Haha!

Mia korpo ŝajne fariĝis multe pli peza ol en la vivo, tial la ĉifaĵo donis al mi des pli da malkomforto. Sed mi kredis, ke mi baldaŭ kutimiĝos al ĝi, aŭ mi baldaŭ putros kaj tiam ĝi ne donos plu grandan ĝenon. Nun preferinde iom mediti silente.

"Kiel vi fartas? Vi mortas"

Estis bone konata voĉo. Mi malfermis miajn okulojn kaj vidis, ke estas la kuranta komizo de Boguĝaj, la vendejo de malnovaj libroj. Mi ne vidis lin dudek jarojn. Li restis senŝanĝa kiel antaŭe. Mi rigardis ankoraŭfoje la tabulojn ĉe la ses flankoj. Ili ja estis tro malglataj, tute ne prilaboritaj kaj vilaj restis la segsurfacoj.

"Ne grave! Tio ne malhelpas," diris li malligante pakaĵon volvitan en malhelblua tolo. "Jen *Gongjang Ĉuan*[1] presita en Ming-dinastio, Giaging-a eldono[2] kun nigra rando, mi portas al vi. Bonvolu preni. Ĝi estas..."

"Vi!" diris mi fiksante mian rigardon sur liaj okuloj kun miro. "Ĉu vi efektive malsaĝiĝas? Rigardu ja al mia nuna stato! Ĉu mi ankoraŭ havas la emon legi Ming-presaĵon?..."

"Vi povas legi, tio ne malhelpas."

Mi fermis tuj miajn okulojn, ĉar lia ĉeesto forte tedis min. Pasis momento. Nenia bruo aŭdiĝis, verŝajne li foriris. Sed ŝajnas, ke iu formiko rampis denove sur mia kolo, ĝi venis fine al la vizaĝo, rondirante ĉirkaŭ la okulkadro.

Mi ne atendis, ke la homa penso ŝanĝiĝas eĉ post la morto. Subite iu forto rompis la pacon en mia koro, kaj samtempe svarmo da sonĝoj viziiĝis antaŭ miaj okuloj. Kelkaj amikoj deziris al mi feliĉon, kaj malamikoj mian pereon. Sed mi vivis ĉiam ŝvebante inter feliĉo kaj pereo, povante kontentigi nek ties nek alies deziron. Kaj nun mi eksvenis kiel ombro, eĉ ne sciigante la malamikojn por doni al ili iom da ĝojo, kiu ja kostas al mi nenion...

Mi sentis, ke en la kontenteco mi ekvolas plori. Verŝajne, estis la unua fojo, ke mi ploris post la morto.

Elfluis neniu larmo; mi nur vidis ion kvazaŭ ekbrilon de fajrero antaŭ la okuloj, kaj mi sidiĝis.

La 12an de julio, 1925.

El la ĉina tradukis S. J. Zee.
Sovaĝa herbaro. Ŝanhaja Esperantista Ligo, Ŝanhajo 1951, p. 49-53.

---

[1] *Gongjang Ĉuan*: Verkita de Gongjang Gaŭ en la tempo de Militantaj Regnoj (476–221 a.K.), unu el la klasikaj verkoj de la konfuceanismo.

[2] Giaging-a eldono: Giaging (1522–1566) estis la regtempo de la imperiestro Ŝizong de Ming-dinastio. Giaging-a eldono estas eldono de tiu tempo.

Arisima Takeo

AL MIAJ ETULOJ

Kiam vi pligrandiĝos kaj fariĝos homoj plenkreskaj, – ĝis tiam ĉu mi, paĉjo, ĝisvivos aŭ ne? tion mi ne scias, – kredeble vi havos okazon foliumi la verkojn de mi postlasitajn. En tiu okazo ankaŭ ĉi tiu peco certe aperos antaŭ viaj okuloj. Tempo ĉiam flue forpasas. Mi tute ne povas imagi kiel mi, via patro, speguliĝos al vi tiam. Eble vi mokride komparos mian mucidan sentimenton, kiel mi nun faras same por la pasanta generacio. Verdire, por vi mi esperas, ke vi agos tiel. Senhezite uzante min kiel ŝtupon, vi nepre devas min transpaŝi kaj iri plialten kaj plimalproksimen. Tamen, miaopinie estas ĉiam necesa por vi la konvinko pri la fakto, ke en ĉi tiu mondo ekzistas aŭ ekzistis unu persono, kiu vin senlime estis amanta. Mi pensas, ke mia amo vin varmigos, konsolos, kuraĝigos kaj konvinkos pri la ebleco de la vivo, eĉ dum vi mokridas mian penson kiel nematuran kaj obstinan, legante ĉi tiun skribaĵon. Tial ĉi tiun pecon mi adresas al vi.

En la lasta jaro vi perdis panjon, ununuran, por eterne. Apenaŭ post via naskiĝo la plej grava nutraĵo por la vivo estis forprenita de vi. Kaj de tiam via vivo jam fariĝis malluma. Lastatempe la redakcio de iu gazeto petis min verki eseon pri “Mia patrino”, kaj mi senintence skribis, “mi estas feliĉa, ĉar mia patrino ankoraŭ vivas, eĉ sola, jam de antaŭ longa tempo.” Apenaŭ mi finis la movigon de mia fontoplumo, mi vin ekpensis: mia koro doloris kvazaŭ mi farus krimon. Sed la fakto estas fakto. En tio mi estis feliĉa, kaj vi malfeliĉaj. Vi estas nekuracigeble malfeliĉaj. Ho, miaj etuloj kompatindaj.

De la tria matene, antaŭ sep jaroj, – nun mi rememoras, – via patrino eksentis neakutan akuŝdoloron, kaj pro tio maltrankvileco disvastiĝis en nia hejmo. Estis tago neĝblova, treege severa, kian eĉ en malvarma Hokkaidô oni nur malofte spertis. Nia apudrivera domo malproksime izolita de la urbo skuiĝis tiel terure, ke ĝi estis preskaŭ forblovata. La neĝflokoj forte alblovitaj al la vitroj de la fenestroj baris la sunradiojn, kiuj estis, jam sen tio, kovritaj de lanugaj nuboj; kaj nokta mallumo regis la ĉambron ĝis malfrue. Tie la elektra lampo jam ne brilis, kaj via patrino kovrita en blankaj tukoj delire ĝemkriis. Helpate de miaj studento kaj servistino mi jen faris fajron, jen preparis varman akvon, jen sendis homojn al la akuŝistino kaj kuracisto. Kiam la akuŝistino neĝkovrite blanka enkuris kvazaŭ enfalante, la tuta familio momente trankviliĝis kaj reekspiris. Sed, ĝis la tagmezo, eĉ post la tagmezo ni vane atendis la akuŝon, kaj kiam mi sola ekrimarkis la maltrankvilan mienon de la akuŝistino kaj flegistino, mi tute perdis pacon de animo. Mi ne plu povis resti kaj atendi la rezulton en mia studoĉambro. Do, mi malsupreniris en la akuŝejon, kaj prenis sub min la taskon firme premi la manojn de via patrino. Ĉiufoje, kiam la doloro tajde atakis ŝin, la akuŝistino

per vortoj instigaj kvazaŭ riproĉaj kuraĝigis ŝin, por ke la akuŝon ŝi finu laŭeble plej baldaŭ. Sed post sufiĉe longa doloro, via patrino subite refalis en profundan dormon. Ŝi eĉ ronkis, kaj ŝajnis, ke ŝi komforte ĉion forgesis. Kaj la akuŝistino kaj kuracisto, kiu estis poste alkurinta, senfare rigardis unu la alian, kaj nur ĝemadis. Ĉiufoje kiam komao atakis ŝin, la kuracisto verŝajne pripensis apliki iun urĝan rimedon por ŝi.

Post la tagmezo la neĝblovado ekster la domo iom post iom kvietiĝis ĝis tiom, ke la sunbriletoj elŝteliĝantaj el densa neĝnubo feble karesis la neĝon tavolantan sur la fenestroj. Sed la peza nubo en la ĉambro subpreme kovris nin pli kaj pli dense. La kuracisto, kaj akuŝistino siaflanke kaj ankaŭ mi, ĉiu aparte estis kaptita de maltrankvileco. En la ĉambro tiuj, kiuj verŝajne sentis nenian minacon, estis nur la akuŝontino kaj la feto, starantaj sur la bordo de la plej terura abismo de la sorto. La du vivoj senĉese endormiĝadis al la morto.

Ĉirkaŭ la tria, laŭ mia memoro, – post dekdu horoj depost ŝia eksento de la akuŝdoloro – en la vesperiĝa krepusko, ŝajne la lasta, terura doloro atakis ŝin. Kvazaŭ ŝi reale vidus inkubsonĝon, ŝi larĝe malfermis la okulojn, kaj sencele rigardante unu punkton, tordis la trajtojn de sia vizaĝo kvazaŭ terurite pli ol dolore. Kaj ŝi altiris mian supran korpon sur sian, firme min ĉirkaŭpremis per la brakoj metitaj sur mia dorso. Estis tiel forte, ke ŝiaj brakoj povus rompi mian bruston, se mi ne estus min streĉinta same kiel ŝi. Senkonscie la atento de ĉiuj ĉeestantoj estis altirita al ŝi. La kuracisto kaj akuŝistino kuraĝigis ŝin tiel laŭte, ke kvazaŭ ili forgesus modestecon.

Ĉar mi subite sentis, ke la premforto de ŝiaj manoj estis malstreĉiĝinta, mi levis mian vizaĝon. Apud la genuoj de la akuŝistino pale malvigla infano kuŝis surdorse. "Vinon, vinon!" kriis ŝi, frapante ĝian bruston intense kvazaŭ oni frape saltigas pilkon. La flegistino ĝin alportis. Per vizaĝesprimo kaj vortoj, la akuŝistino ordonis ŝin enverŝi ĝin en la basenon. Kun forta aromo la varma akvo en la baseno tuj fariĝis sangoruĝa. En ĝi oni banis la infanon. Baldaŭ la unua malforta krio de la naskito aŭdiĝis tra la senspire streĉita silento en la domo.

Jen, inter la grandaj ĉielo kaj tero patrino kaj infano subite aperis en tiu momento.

Tiam la nova patrino vidis min kaj ridetis senforte. Vidante tion, senkaŭze mi eksentis aperiĝon de la larmoj en miaj okuloj. Al mi mankas vortoj klarigi tion. Ĉu mi povus diri, ke la tuto de mia vivo elpremis larmojn el miaj okuloj? Ekde tiu momento ĉiuj miaj vivfazoj tute ŝanĝiĝis antaŭ miaj okuloj.

La unua el vi, kiu vidis la lumon de la mondo, tiamaniere vidis ĝin. Ankaŭ la dua kaj la tria, kvankam la naskiĝa malfacileco ne egalis, al la gepatroj donis similan impreson misteran.

Tiele la junaj geedzoj fariĝis la gepatroj de vi, tri infanoj sinsekve naskitaj.

En tiu tempo mi posedis tro da problemoj en la koro. Kaj malgraŭ ĉiamaj klopodoj senindulgaj, nenion mi ellaboris por alproksimigi min al "kontenteco". Ĉar mi emas pripensi ĉion en mi nur sole, mia koro ekscitiĝis pro maltrankvileco,

kiu de tempo al tempo iel elŝprucis, kvankam supraĵe mi vivas sufiĉe kontente. Foje mi pentis mian edziĝon; foje mi malbenis viajn naskiĝojn. Kial mi edziĝis antaŭ ol mi distingis klare la sintenadon de mia vivo? Kial mi volonte alfiksis ĉirkaŭ mi kelkajn pezaĵojn, kiujn oni devas treni pro sia edzeca vivo? Kial mi devas konsideri la rezultatojn de la seksa vivo kiel la donacon de la ĉielo? Ĉu mi ne devis uzi la klopodon kaj energion, elspezitajn por konstrui hejmon, por alia celo?

Pro la malordiĝo de mia koro, jen mi ofte turmentis kaj malgajigis vian patrinon, jen mi kondutis al vi malice kaj malbone. Kiam mi aŭdis vin obstine plorantan aŭ disputantan, mi ne povis ne fari ian kruelaĵon. Kiam mi sidis antaŭ la tablo por verki, se via patrino venis peti konsilon al mi pri bagatela afero mastruma, aŭ se vi kriis kaj bruis, mi ekstariĝis aŭtomate frapante la tablon. Mi aŭ eligis violentajn vortojn, aŭ punis vin kruele, kvankam mi bone sciis, kia neeltenebla malgajeco atakos min poste.

Sed fine venis la tempo, kiam la sorto punas miajn egoismon kaj malkompatemon. Neniel povante lasi vin sub la zorgo de la servistino, via patrino ĉiunokte kuŝigis vin, tri etulojn, apud si, kaj tranokte ŝi klopodis jen dormigi unu, jen varmigi lakton por la dua, jen akompani al necesejo la trian, – ŝi tiel elzorginta vin kun plej profunda amo preskaŭ ne havante tempon dormi, subite ekkuŝis sur la lito pro terura ekfebriĝo je 41° C. Kompreneble mi surpriziĝis pro tio; sed mi nurnure paliĝis, kiam du kuracistoj venigitaj ekzameni ŝin diris, ke ili vidas simptomon de tuberkulozo en ŝi. La rezulto de sput-ekzameno ankaŭ certigis ilian diagnozon. Kaj fine de oktobro, en iu soleca aŭtuna tago ŝi jam devis eniri en hospitalon, lasante vin, kiuj estis tiam kvar-, tri- kaj du-jaraj.

Fininte la taglaboron, mi ĉiam sage iris hejmen, kaj rapidis al la hospitalo akompanate de unu aŭ du el vi. La diligenta, pia budaista maljunulino, kiu servis nin, kiam ni ekloĝis en la urbeto, prizorgis la malsanĉambron. Kiam ŝi vidis viajn figurojn, ŝi kaŝe viŝadis siajn larmojn. Trovinte la patrinon sur la lito, al ŝi vi volis alkuri kaj vin alkroĉi. Ankaŭ ŝi, ankoraŭ nesciigita pri sia tuberkulozo volis ĉirkaŭbraki vin, kvazaŭ ŝi karesus siajn trezorojn. Sed mi devis mistifike deteni vin de ŝia lito. Plurfoje mi spertis tian animstaton, kian eble havus homo, deziranta esti lojala al la mastro, en cirkonstanco, en kiu oni lin ekstreme miskomprenas, sed li ne devas tion refuti. Tamen al mi jam mankis kuraĝo indigni pri tio. Preskaŭ ĉiam strataj lampoj malhele lumigis jam la vojon, kiam mi revenis hejmen, forŝirinte vin de la patrino. En la domo nur geservistoj loĝis dum nia foresto. Neniu el ili, malgraŭ ke ili estis du aŭ tri, volis ŝanĝi vindtukon por la lasita suĉinfano; ofte ĉirkaŭ la koksoj de ĝi, malagrable plorkrianta, estis trempe malseke.

Strange vi ĉiuj ne facile familiariĝis kun nekonatoj. Apenaŭ mi lasis vin endormiĝi, mi ŝtele eniris la studoĉambron por labori. Tiam mia korpo jam estis laca, sed mia cerbo ekscitita. Ĉirkaŭ la dekunua, kiam mi, fininte studon, volis enlitiĝi, vi fariĝantaj nervozaj ofte vekiĝis timigite pro sonĝo aŭ io alia. Je la

tagiĝo kutime unu el vi ekploris sopirante lakton. Kaj kiam mi estis vekita pro tio, mi jam ne plu sukcesis refermi la okulojn ĝis la mateno. Post matenmanĝo mi iris la oficejon kun la okuloj kongeste ruĝiĝintaj kaj la kapo enhavanta ion similan al kerno.

En la norda insulo vintro rapide komenciĝas. Iun tagon, kiam mi vizitis la hospitalon, via patrino estis rigardanta eksteren tra la fenestro, levante sin sur la lito, kaj kiam ŝi rimarkis min, ŝi sin turnis al mi kun la sciigo, ke ŝi deziras forlasi la malsanulejon plej baldaŭ, ĉar ŝi sentas solecon, rimarkinte la aceron ekster la fenestro tiel ŝanĝitan laŭ aspekto. Vere la folioj de la arbo, kiuj estis flame ornamantaj la branĉojn je la tempo de ŝia enhospitaliĝo, nun tute forfalis, eĉ unu folio ne restis, kaj ankaŭ krizantemoj en la florbedo jam velkis difektite de prujno, malgraŭ ke ankoraŭ ne estas tempo velki. Mi pensis, ke lasi ŝin vidi ĉiutage tian solecan scenon estas por ŝi ja tre malbone. Sed ŝia vera deziro ne devenis de tio: ŝi jam trovis netolerebla esti apartigata de vi eĉ unu momenton.

Ĉar la tago, kiam fine ŝi estis eliĝonta el la hospitalo, estis tiel malbonvetera, ke hajlis kaj blovis frosta vento kun akraj sonoj, mi iris al ŝi tuj post la taglaboro kun intenco konvinki ŝin resti plu tie. Sed ŝia ĉambro jam estis malplena. Mi nur vidis maljunulinon ordigantan kun brueto aĵojn ricevitajn, kusenojn kaj teservilaron en angulo de la ĉambro. Rapide mi venis hejmen, kaj tie mi trovis vin ĝoje petolantaj ĉirkaŭ la patrino. Antaŭ tiu sceno mi nur larmis.

Ni jam estis kunigitaj ne plu disigeble, dum ni ne konsciis tion. Kiel stoploj de herbo apoge kaj kune penas travintri, ni, kvin familianoj, reciproke alproksimiĝante penis varmigi unu la alian kontraŭ malvarmo ĉiam pli severa. Sed la frideco en la norda lando estis tiel severa, ke nia kora varmigo ne sufiĉis protekti nin. Fine mi devis rifuĝi suden for de la frosteco, kiel migranta sovaĝa ansero, prizorgante la malsanulinon kaj vin, ankoraŭ infanecajn.

Estis en iu nokto, dum kiu la unua neĝo en la sezono estis pli kaj pli dense falanta; ni ekvojaĝis for de la loko, kie vi, tri infanoj, naskiĝis kaj kreskis. Kelkaj neforgeseblaj vizaĝoj bedaŭre adiaŭis al ni sur la kajo de la malluma stacidomo. La melankolian koloron de la akvo de Tugaru Markolo ni jam postlasis. Unu studento, kiu bonvolis akompani nin ĝis Tokio, tranokte brakumis patrine la plej etan el vi. Se mi priskribus tiuspecajn okazaĵojn, mi devus daŭrigi senfine. Ĉiuokaze post enua dutaga veturado feliĉe ni senakcidente alvenis Tokion en malfrua aŭtuno.

Diference de la loko ĝisnuna, en Tokio loĝis multaj miaj parencoj kaj fratoj, kiuj montris al ni sian profundan simpation. Kia kuraĝigo tio estis por mi! Baldaŭ via patrino eklogis en eta vilao luita ĉe marbordo K, sed ni, restante en proksima hotelo, de tie ŝin vizitadis. Foje ŝia malsano ŝajnis fariĝi tiel bagatela, ke ni – vi, panjo kaj mi – povis kuniri al la dunoj, kaj agrable pasigi du-tri horojn sub la bano de la suno.

Mi ne scias pro kia motivo la sorto donis al ni tian interpaŭzon. Tamen ĝi neniel forlasis plenumi sian taskon plenumendan. En la fino de la jaro ŝia sano

pli kaj pli remalboniĝis kaŭze de negrava malvarmumo. Ankaŭ unu el vi subite estis atakita de alta febro nedivenebla. Tion mi ne kuraĝis sciigi al ŝi. La malsana infano ne permesis al mi forlasi ĝin eĉ por mallonga tempo. Dume la edzino plendis mian neglekton por ŝi. Finfine ankaŭ mi malsaniĝis. Kuŝante apud la malsana infano, mi devis ĝemi kaj suferi pro mia alta febro neniam spertita. Mia laboro? Ĝi estis for de mi mil mejlojn. Tamen mi jam ne plu pentis pri mi mem. En mia brusto la flamo preta elbatali por vi ĝis la fino nur brulis pli arde ol la febro.

Komence de la nova jaro la tragedio venis al la klimakso. Jam venis la tempo, kiam ŝi devis esti informita pri la vera stato de sia malsano. Post la foriro de la kuracisto, kiu volonte plenumis la malfacilan taskon sciigi tion al ŝi, mi rigardis ŝian vizaĝon. La tiama memoro pri ŝi restos ĉiam freŝa kaj korŝira en mi dum la tuta vivo. Kuŝante en la lito ŝi kviete rigardis min kun la pala sed serena vizaĝo, esprimante sian trankvilan pretecon je rideto. En ŝia mieno estis imprese ĉizita "rezignacio" por la morto kaj samtempe forta persistemo de la amo al vi, etuloj. Tio aspektis eĉ horora. Kortuŝata de la terura sceno, mi senkonscie mallevis la okulojn.

Fine venis la tago, kiam ŝi eniris hospitalon en marbordo H. Via patrino firme decidis neniel revidi vin, ĝis ŝi tute resaniĝos. Preta foriri en parada vesto, kiun, oni timis, ŝi ne havos okazon surmeti ankoraŭfoje, – kaj fakte ŝi ne havis, – ŝi ĵetis sin antaŭ la nask- kaj bo-patrinoj kaj plorĝemis. Ŝi havis fortan karakteron nekutiman por virino kaj malgraŭ ke mi preskaŭ neniam vidis ŝin ploranta, eĉ kiam ni estis nur duope, tiam ŝiaj larmoj falis kaj falis torente, dum ŝi ilin viŝis kaj viŝis. Tiuj varmaj larmoj ja estas kara posedaĵo de nur vi, etuloj. Nun ili jam sekiĝas. Ĉu ili transformiĝis en penikon da nubo sur la ĉielo, ĉu en unu guton da akvo de intermonta rivero, aŭ en ŝaŭmon sur oceano, aŭ ĉu ili estas konservitaj en la larmujo de iu homo eksterimaga? Tion mi ne scias. Ĉiuokaze tiuj ardaj larmoj estas ja kara posedaĵo speciale al vi donacita.

Por adiaŭi panjon vi venis al la loko, kie oni preparis aŭtomobilon, – unu el vi venis portate sur la dorso de servistino, ĉar li estis en la posta stadio de la febra malsano kaj ankoraŭ ne povis piediri, – kaj la alia venis kun ŝanceliĝemaj paŝetoj, – la plej malpliaĝan ni ne kunportis, ĉar viaj geavoj timis, ke ĝia ĉeesto troe turmentos la patrinon. Viaj naivaj okuloj surprizitaj estis nur alsorĉitaj al la granda veturilo. Ŝi tion malgaje rigardis. Kiam la aŭtomobilo ekmoviĝis, konsilite de la servistino vi salutis al panjo levante la manon kiel soldato; kun rideto ŝi klinetis sian kapon. Vi certe ne imagis, ke de tiu momento ŝi forlasos vin por eterne. Ho, vi malfeliĉaj!

De tiam ĝis la momento de ŝia lasta spiro, – dum unu jaro kaj sep monatoj, – ni ĉiuj furioze batalis por vivi. Ŝi por preni la plej noblan sintenadon kontraŭ la morto, por postlasi al vi la plej grandan amon, kaj por kompreni min precize; mi por elsavi ŝin el la malsano kaj por porti kuraĝe kaj brave la sorton, kiu ĉiam minacis min kiel ŝarĝo sur la ŝultroj; kaj vi por liberigi vin mem de la stranga

sorto kaj por kutimigi vin al la netaŭgaj cirkonstancoj. Ni ĉiuj batalis sangomakulite, mi rajtus por tiel diri. Kiom da fojoj ni – ŝi, vi kaj mi – falis teren trafite de kugloj kaj trapikite de glavoj! Ree ni levis nin, kaj refoje falis!

La duan de aŭgusto en tiu jaro, kiam vi aĝis kvin, kvar kaj tri, fine la morto konkeris nin. Ĝi subpremis ĉion kaj savis ĉion.

La plej sublima parto de ŝia testamento estis al vi adresita. Se vi havos okazon legi ĉi tiun mian verketon, samtempe legu la ŝian. Ŝi ploris sangajn larmojn; tamen ĝis la morto ŝi ne ŝanĝis sian decidon ne vidi vin. Ne sole tion, ke ŝi infektos vin per baciloj, aŭ ke ŝia koro disŝiriĝos pro la renkonto al vi, sed ŝi ankaŭ timis ke ŝi morne malheligos vian estontecon, montrante sian kruelan figuron el la morto al viaj puraj animoj, kaj lasos iom pli da cikatroj en viaj koroj, kiuj devus ĉiam libere kreskadi. "Sciigi mian morton al miaj infanoj estas ne nur senutile, sed ankaŭ malutile. Je mia funebra ceremonio lasu ilin gaje pasigi la tutan tagon kun servistino," – tiel ŝi skribis. Ankaŭ jenan utaon ŝi postlasis:

Senfine amas
L' infanojn la patrino;
Ja tion samas
Nur suno la konstanta
La mondon prilumanta.

Kiam ŝi mortis, okaze vi estis sur monto en provinco Sinano. Vi eble iam pensos min kruela, ĉar mi aŭdacis ne revenigi vin de tie, petinte vian prizorgon altrude al via onklo, kiu konsile skribis min, ke mi pentos tra la tuta vivo, se mi ne alvokos vin ĉe la lasta momento de ŝia eterna adiaŭo. Nun estas la dekunua kaj duono. Vi dormas kuŝante unu apud la aliaj en la ĉambro apud la mia, kie mi nun skribas ĉi tiun pecon. Ankoraŭ vi estas etaj; sed kiam vi atingos la nunan mian aĝon, certe vi alte taksos mian agon, alivorte, kion via patrino deziris, ke mi faru.

Kian vojon dume mi trapasis? Kaŭze de ŝia morto mi ekvagis sur la grandan vojon por travivi. Mi sciiĝis, ke mi nur devas antaŭeniri, protektante min mem, laŭ la vojo senerare. En unu el miaj noveloj iam mi pritraktis viron, kiu decidis viktimigi la edzinon por si mem. Fakte via patrino oferis sin por mi. Oni malofte renkontas tian homon, kiu ne scias uzi sian propran kapablecon kiel mi. Miaj proksimuloj ne povis krom rigardi min kiel unu skrupulan, malspritan, sentaŭgan kaj kompatindan viron. Neniu volis penetri en miajn skrupulon, malspritecon kaj senkapablecon ĝisfunde, sed ŝi tion plenumis por mi. Mi eksentis forton en mia malforteco. Mi trovis kapablon en mia senkapableco, kuraĝon en mia senkuraĝo, kaj akrecon en mia neakreco. Alivorte mi penetre retrorigardis al stulteco, plenanime rekonis mian skrupulon, kaj per laboro spertis mian senkapablecon. Mi kredas, ke per ĉi tiu konscio mi povas sproni min kaj vivi alimaniere. Vi ĝojos, vidante, ke ankaŭ mi ne vivis vane, se hazarde vi havos okazon retrovidi mian pasintecon.

En tia tago, kiam daŭre pluvas kaj melankolia atmosfero regas la domon, iukaze unu el vi silente eniras en mian studoĉambron. Kaj dirinte nur unu vorton "Paĉjo", li ekploras singulte, apogante sin sur miaj genuoj. Ho, kio postulas larmojn al viaj naivaj okuloj! Vi, miaj malfeliĉuloj! Nenio donos al mi pli malgajan impreson pri la mondo ol vidi vin korŝiritaj de senmotiva malĝojo. Kaj neniu momento pli akre trapikas mian koron ol kiam vi alkuras antaŭ la foton de via patrino kaj diras gaje, "Bonan matenon, panjo!", post kiam vi salutis al mi bonhumore en la mateno. Tiam mi terurite vidas la Eternan Mondon antaŭ miaj okuloj.

Certe oni devas rigardi mian rememoran priskribon kiel absurdan. Ĉar la morto de edzino estas unu el ĉiutagaj aferoj, kiuj tie kaj ĉi tie okazas tede ofte. Homoj ne estas tiel malokupitaj, ke ili traktos tian aferon kiel gravan. Jes, ili pravas. Tamen malgraŭ tio iam certe al vi venos la tempo, kiam ne nur mi, sed ankaŭ vi malĝojos kaj bedaŭros senkompare la morton de via patrino. Eĉ se la mondecaj homoj estus malatentaj pri tio, ni ne bezonus honti! Tio tute ne estas hontinda. Ni povas profunde tuŝi malgajecon de la homa vivo ankaŭ tra tiu trivialaĵo. Malgranda afero ne ĉiam estas malgrava, kaj granda ne ĉiam grava. Tio nur dependas de nia sintenado.

Ĉiuokaze, mi vidas, ke vi estas kompatindaj ĝermoj de la homa vivo. Vi jen ploras kaj ridas, jen amuziĝas kaj malgajiĝas; kaj mia koro vin rigardante dolore vundiĝas.

Tamen kredeble vi ankoraŭ ne scias, ke ĉi tiu malĝojo donas tiom da forto al vi kaj mi. Dank' al la domaĝo ni eniris pli profunden en la vivon. Niaj radikoj pli-malpli profunde etendiĝis internen en la grandan teron. Ve al tiuj, kiuj ne penetre vivas la vivon, eĉ se ili ricevis vivon en la mondo.

Samtempe ni ne devas trempi nin nur en nia propra malĝojo. Ĝis la lasta tago via patrino ne estis ĝenata de monafero. Ŝi povis preni kiun ajn medikamenton ŝi volis. Ŝi povis manĝi, kion ajn ŝi volis. Dank' al la hazardo de nia socia sistemo ni ĝuadis tiun nejustan privilegion, kiun verdire ni ne meritis ricevi. Unu el vi, kredeble, sed ne klare, memoras la situacion de la familio de S-ro U. Kiam mi pensas pri la animstato de li, infektita per ftizo de la mortinta edzino, mia koro doloras; malgraŭ ke li havis tian intelektan karakteron, li kredis la religion Tenrikio*, kaj penis sin sanigi per preĝo. Mi ne scias ĉu medikamento aŭ preĝo kiu estas pli efika. Kompreneble li deziris preni medikamenton, sed li ne povis. Spite de la ĉiutaga hemoptizo, li frekventis la oficejon. El la gorĝo ĉiam ĉirkaŭvolvita per poŝtuko nur raŭkan voĉon li povis eligi.

Al li estis klare, ke ju pli li laboras, des pli lia sanstato malboniĝas. Tion li bone sciis, sed por vivteno de siaj maljuna patrino kaj du infanoj, li kuraĝe kaj persiste laboris apogante sin sur la preĝado. Kiam lia malsano graviĝis, li petis al

Tenrikio: japane Tenrikyô; religio fondita en 1838, surbaze de ŝintoismo kaj popolkredoj; ĉi tie, rigardata de la aŭtoro iom absurda.

provinca kuracisto injektadon de Koga-solvaĵo*, elpagante multe da mono el sia malpeza monujo, sed tio kaŭzis al li intensan febron, ĉar la kuracaĵo senatente mistrafis lian vejnon. Kaj pro tio li mortis, postlasante la senhavajn maljunan patrinon kaj infanojn. Ili loĝis en nia najbara domo. Kia ironio de la sorto! Kiam vi rememoras la morton de via patrino, vi ne forgesu samtempe refreŝigi vian memoron pri S-ro U. Kaj vi devas klopodi por neniigi ĉi tiun abomenan fendegon en la socio. Tion mi kuraĝas diri, ĉar mi kredas, ke la morto de via patrino sufiĉe vin instigos vastigi vian amon ĝis tiu grado.

Vere la homa mondo estas sufiĉe malgajiga. Sed ĉu ni povas vivi senfare nur tion plendante? Ni, vi kaj mi, avare gustumis amon, kvazaŭ bestoj sangon. Ni iru antaŭen, kaj laboru laŭpove por elsavi niajn proksimulojn el soleco! Mi amis vin kaj amas vin por eterne. Tion mi ne diras al vi por ricevi rekompencon kiel la patro. Al vi, kiuj instruis al mi ami vin, mi nur postulas, ke vi akceptu mian dankemon. Kiam vi estos plenkreskintaj, ĉu mi estos mortinta, aŭ ankoraŭ estos fervore laboranta, aŭ estos kaduka kaj sentaŭga – tion mi nun ne povas diveni. Sed ĉiuokaze ne estos mi, kiun vi devas helpi tiam. Via freŝa forto neniam devas esti konsumata por mi. Kiel leonoj, kiuj formanĝas siajn mortintajn gepatrojn, kaj provizas energion al si, vi ekiru forte kaj kuraĝe en la mondon senkompate min forlasante.

Nun pasis la noktmezo, kaj la horloĝo montras la unuan kaj kvaronon. Tra la nokta silento kvieta nur viaj pacaj spiradoj en la dormo aŭdiĝas ĝis ĉi tiu ĉambro. Antaŭ miaj okuloj, antaŭ la fotografaĵo de via patrino, troviĝas rozoj donacitaj de via onklino por ŝia memoro. La fotografaĵo rememorigas al mi la tempon, kiam mi fotografis ŝin. Tiam la plejaĝa el vi ankoraŭ estis en ŝia utero; ŝi senĉese suferigis sin pro misteraj espero kaj timo, kiujn eĉ ŝi mem ne komprenis. En tiu tempo ŝi estis aparte bela. Por sekvi ekzemplon de la grekaj patrinoj, ŝi ornamis la ĉambron per portretoj de eminentuloj. Inter ili troviĝis statuo de Minerva kaj portretoj de Goethe, Cromwell kaj F-ino Nightingale. Mi tiam rigardis kun iom da ironio ŝian ambicion knabinecan, sed kiam mi nun rememoras tion, mi neniel povas mokridi. Iam mi proponis ŝin fotografi, kaj tiam ŝi, plej zorge pudrita kaj plej parade vestita, venis en mian ĉambron sur la unua etaĝo. Mi eĉ mirigite ŝin rigardis. "Akuŝo estas militiro por virino," ŝi diris kun malgaja rideto. "Ĉu akuŝi bonan infanon aŭ morti, – mi devas elekti unu el la du, do mi ornamis min same kiel ĉe la momento de mia morto." – Ankaŭ tiam mi ridis senpripense. Sed ankaŭ tion nun mi ne povas nur ridi.

La silento de la profunda nokto igas min serioza. Mi eĉ sentas, ke ŝi sidas antaŭ mi trans la skribotablo. Ŝia amo al vi ne povas ne daŭre protekti vin, kiel via patrino skribis en la testamento. Dormu bone. Dormu sufiĉe, lasante vin al la

---

* *Koga-solvaĵo:* Medikamento inventita de Koga Gensaburô, Kitazato Instituto, kaj publikigita en 1915 kaj multe propagandita kiel kontraŭftizaĵo, sed kiu baldaŭ malaperis kontraŭargumentite de Instituto Kontraŭ Epidemioj en Tokia Imperia Universitato.

zorgo de la funkcio de la mirinda "tempo". Kaj en morgaŭa tago vi elsaltu vigle el la litoj plikreskintaj kaj pli saĝaj ol en la pasinta. Mi streĉos mian tutan forton por plenumi mian taskon. Eĉ se mi finos mian vivon en kia ajn malsukceso, aŭ se mi estos subvenkita de kia ajn tento; mi almenaŭ elfaros tiel, ke vi povos trovi nenion malpuran en miaj postsignoj. Nepre mi plenumos tion. Vi devas ekmarŝi de tie, kie mi falis. Sed kiun direkton kaj kiel vi devas antaŭenmarŝi, – tion spite de malklareco vi eble povos eltrovi en miaj spuroj.

Miaj etuloj! Komencu la homan vojaĝon, kun la beno de viaj gepatroj malfeliĉaj kaj samtempe feliĉaj en viaj brustoj. La estonto estas malproksima kaj malluma. Sed vi ne devas timi. La vojo malfermiĝas antaŭ tiuj, kiuj ne timas.

Nu marŝu, kuraĝe, miaj amataj etuloj!

(1918)

El la japana tradukis Isobe Yukiko.
***El japana literaturo.** Japana Esperanto-Instituto, Tokio 1965, p. 28-39.*

Jaroslav Hašek

ŜVEJK SOLDATIĜAS

En la tempo, kiam arbaroj laŭ rivero Raba en Galicio vidis fuĝi rivertranse aŭstrian soldataron kaj sube, en Serbio, la aŭstraj divizioj unu post la alia estis traktataj pantalondraŝe laŭ merito delonga, la aŭstria militministerio rememoris ankaŭ pri Ŝvejk, ke li helpu la imperion elkotiĝi.

Kiam oni alportis al li skriban sciigon, ke post unu semajno li estas venonta al la Pafista Insulo por kuracista ekzameno, Ŝvejk ĵus kuŝis en la lito, denove trafita de reŭmatismo.

Sinjorino Miler kuiris kafon por li en la kuirejo.

– Sinjorino Miler – mallaŭta voĉo de Ŝvejk eĥis de la ĉambro – sinjorino Miler, venu tien ĉi por momento.

Kiam la servistino staris apud la lito, Ŝvejk denove diris tiel mallaŭte: – Sidiĝu, sinjorino Miler.

Lia voĉo ŝajnigis ion mistere solenan.

Kiam sinjorino Miler sidiĝis, Ŝvejk, leviĝante en la lito, proklamis: – Mi soldatiĝas!

– Sankta Virgulino – ekkriis sinjorino Miler – kion vi faros tie?

– Batalos – respondis Ŝvejk per ia transtomba tembro. – Aŭstrio statas tre malbone. Supralande oni penetras jam al Krakovo, malsupre en Hispanion. Kien ajn ni rigardu, ni estas draŝataj kiel greno, kaj tial oni alvokas min soldatiĝi. Ja mi legis al vi hieraŭ en la gazeto, ke la karan patrion iuj nuboj ĉirkaŭvolvis.

– Vi ja ne povas moviĝi.

– Ne gravas, sinjorino Miler, por soldatservi mi veturos en ĉareto. Vi konas la sukeraĵiston proksime de nia domo, li posedas tian ĉareton. Antaŭ jaroj li veturigis en ĝi promene sian laman fiavĉjon. Vi, sinjorino Miler, fortrenos min en tiu ĉareto por soldatservo.

Sinjorino Miler ekploris: – Ĉu ne venigi kuraciston, sinjormoŝto?

– Nenien vi iros, sinjorino Miler, escepte de la piedoj mi estas komplete sana kanonfuraĝo, kaj en la tempo, kiam Aŭstrio aĉe statas, ĉiu kriplulo devas okupi sian lokon. Kuiru la kafon trankvile plu.

Kaj dum sinjorino Miler, plormiena kaj emociita, filtris la kafon, la bona soldato Ŝvejk kantis en la lito:

> General' Windischgratz kaj soldatar' altranga
> militi komencis ĉe l' sun' leviĝanta,
> hop, hop, hop!
> Ĉe l' sun' leviĝanta kun jena ekvoko:
> Savinto helpu nin kun Virgulino Sankta,
> hop, hop, hop!

Konsternita sinjorino Miler forgesis pri la kafo, impresite de la terura milit-kanto, kaj, tremante sur la tuta korpo, ŝi timeme aŭskultis, kiel la bona soldato Ŝvejk kantas plu en la lito:

Kun Sankta Virgulin' kaj la pontoj kvar,
firmigu postenojn, Piemont', sen avar',
hop, hop, hop!
Batalad' okazis Solferin-apuda,
ĝis genuoj alte sang' fluis abunda,
hop, hop, hop!
Sang' fluis abunda kaj la karn' amasis,
ja tie regiment' dekoka batalis,
hop, hop, hop!
Regiment' dekoka, tenu vin aŭdace,
sur ĉaro postiras la mono donace,
hop, hop, hop!

– Sinjormoŝto, pro mizerikordo dia, mi petas vin, – eĥis lamente de la kuirejo, sed Ŝvejk jam estis finanta sian militkanton:

La mono donace, manĝproviz' regale,
por tiu regiment' brava senkompare,
hop, hop, hop!

Sinjorino Miler ekimpetis tra la pordo, kurante venigi kuraciston. Ŝi revenis post unu horo, dum kiam Ŝvejk dormetis.

Tiel do li estis vekita de diketa sinjoro, kiu mallonge tenis la manon sur lia frunto, dirante:

– Ne timu, mi estas doktoro Pávek el Vinohrady – montru la manon – tiun ĉi termometron subakseligu... Tieeel – montru la langon – iom pli – tenu la langon – sekve de kio mortis viaj patro kaj patrino?

Kaj en la tempo, kiam Vieno deziris, ke ĉiuj popoloj de Aŭstrio-Hungario demonstru la plej brilajn ekzemplojn pri siaj fidelo kaj sindono, doktoro Pávek preskribis al Ŝvejk bromon kontraŭ lia patrujama entuziasmo, rekomendante al la brava kaj bonkora soldato ne pensi pri la milito:

– Kuŝu rekte kaj trankvilu, morgaŭ mi venos denove.

Veninte sekvatage, li demandis sinjorinon Miler en la kuirejo, kiel fartas la paciento.

– Malpli bone, sinjoro doktoro – respondis ŝi kun sincera aflikto, – nokte, kiam lin atakis la reŭmato, li kantis, pardonpete, la aŭstrian himnon.

Doktoro Pávek konsideris la devo reagi al tiu ĉi nova manifestiĝo pri lojaleco far la paciento per plialtigo de la brom-dozo.

La trian tagon sinjorino Miler raportis al li, ke Ŝvejk fartas ankoraŭ malpli bone.

– Posttagmeze, sinjoro doktoro, li sendis por mapo de batalkampo, kaj nokte lin obsedis halucino pri la venko de Aŭstrio.

– Ĉu pulvorojn li uzas strikte laŭpreskribe?

– Li ankoraŭ eĉ ne sendis por ili, sinjoro doktoro.

Doktoro Pávek foriris, post kiam li tempeste skoldis Ŝvejk'on, asertante neniam plu veni kuraci la homon, kiu rifuzas lian kuracistan helpon per la bromo.

Restis nur du tagoj, antaŭ ol Ŝvejk estis aperonta antaŭ la rekruta komisiono.

Dum tiam Ŝvejk sin preparis konforme. Unue – li sendis sinjorinon Miler aĉeti soldatan ĉapon, due, li sendis ŝin prunti de la proksimdoma sukeraĵisto ĉareton, en kiu tiu ĉi veturigis promene sian laman fiavĉjon. Poste li rememoris, ke estas bezonataj lambastonoj. Feliĉe, la sukeraĵisto konservis ankaŭ tiujn kiel familian relikvaĵon pri sia avĉjo.

Mankis ankoraŭ rekruta bukedo al li. Ankaŭ tiun prizorgis por li sinjorino Miler, kiu dum la du tagoj okulfrape maldikiĝis, plorante ĉiupaŝe.

Tiel do, en tiu memorinda tago aperis sur la pragaj stratoj fenomeno pri kortuŝa lojaleco.

Olda virino, puŝanta antaŭ si ĉareton, en kiu sidis viro, soldata ĉapo kun polurita metala butono, svingante lambastonojn. Kaj sur lia jako pompis bunta rekruta florornamo.

Kaj la viro, svingante denove kaj denove la lambastonojn, kriis tra la pragaj stratoj:

Ek al Beogrado, ek al Beogrado!

Lin sekvis grupo daŭre kreskanta el bagatela aro, kunveninta antaŭ la domo, de kie Ŝvejk ekiris por soldatservi.

Ŝvejk povis konstati, ke policgardistoj starantaj sur iuj vojkruciĝoj mansalutas lin.

Sur la Venceslavo-placo la homamaso ĉirkaŭ la ĉareto kun Ŝvejk kreskis je kelkcent kapoj kaj ĉe la angulo de Krakovská-strato oni batvundis iun ĉapumitan burŝon, kiu kriis al Ŝvejk:

– Heil! Nieder mit den Serben! (germane: Hura! For kun la Serboj!).

Ĉe la angulo de Vodičková-strato intervenis rajdista policano, dispelante la amason.

Kiam Ŝvejk montris al kvartala inspektisto la dokumenton, ke li devas esti hodiaŭ antaŭ la rekruta komisiono, la kvartala inspektisto iomete desapontiĝis; por malhelpi skandalon li igis akompani la ĉareton kun Ŝvejk de du rajdo-policanoj al la Pafista Insulo.

Pri la tuta okazaĵo aperis en la Praga Oficiala Gazeto tiu ĉi artikolo:

> "**Patriotismo de la kriplulo.** Hieraŭ antaŭtagmeze pasantoj sur la pragaj ĉefstratoj ĉeestis la scenon, kiu belege atestas pri tio, ke en tiu ĉi grandioza kaj serioza tempo ankaŭ la filoj de nia nacio povas servi per la plej brila ekzemplo pri la fidelo kaj sindono al la trono de la profundaĝa potenculo. Ŝajnas al ni, ke revenis la epoko de la antikvaj Grekoj kaj Romanoj, kiam Mucius Scævola rekrutiĝis por

batalo sen atenti pri sia brulkonsumita mano. La plej sanktaj sentoj kaj interesoj estis hieraŭ helege demonstritaj far kriplulo lambastonhava, kiun la olda panjo veturigis per malsanula ĉareto. Tiu ĉi filo de la ĉeĥa nacio libervole, sen zorgi pri sia kadukeco, rekrutiĝis por oferi siajn vivon kaj havaĵon al la imperiestro. Kaj se lia vokado: Ek al Beogrado! tiel vigle reeĥis en la pragaj stratoj, tio nur atestas, ke la praganoj donas modelajn pruvojn pri sia amo al la patrio kaj regnestra domo."

Esence same skribis ankaŭ la "Prager Tagblatt" (Praga Ĵurnalo), finante sian artikolon, ke la kriplan volontulon akompanis aro da Germanoj, kiuj ŝirmis lin proprakorpe antaŭ linĉado parte de la ĉeĥaj agentoj de la Kvarentento.

"Bohemia", publikigante ĉi raporton, postulis rekompencon por la kripla patrioto, sciigante, ke por la nekonato ĝi akceptas donacetojn de la germanaj civitanoj en la ĵurnala administrejo.

Se laŭ la tri gazetoj la lando ĉeĥa ne povis naski civitanon pli noblan, tiam sinjoroj en la rekruta komisiono ne identiĝis kun tiu opinio.

Precipe ne la soldata ĉefkuracisto Bautze. Estis la viro senkompata, kiu ĉion rigardis ruza provo eskapi de la milito, frontlinio, kuglo- kaj ŝrapnel-trafoj.

Fama estas lia eldiro: "Das ganze tschechische Volk ist eine Simulantenbande" (germane: La tuta ĉeĥa popolo estas bando da simulantoj).

Dum dek semajnoj de sia aktivado el 11 000 civiluloj li ekstermis 10 999 simulantojn kaj sukcesus ankaŭ ĉe la dekunumila, se la malfeliĉulon, ĝuste en la momento, kiam li alkriegis tiun "Kehrt euch!" (germ. Turniĝu!) ne estus trafinta apopleksio.

– Forportu tiun simulanton, – diris Bautze, trovinte, ke la viro estas morta.

Kaj antaŭ li staris en tiu memorinda tago Ŝvejk, kiel ceteraj komplete nuda, kaŝante ĉaste sian nudecon per lambastonoj, sin apogante je ili.

– Das ist wirklich ein besonderes Feigenblatt – (Tio estas vere kurioza figfolio), diris Bautze – tiaj figfolioj ne ekzistis en la paradizo.

– Arbitracie rekonita idioto, – notis suboficiro konsultante la dokumentojn.

– Kaj pri kio vi plendas ankoraŭ? – demandis Bautze.

– Obee mi raportas, ke mi estas reŭmatulo, tamen al Sinjor' imperiestro mi servos ĝis la korpo-fragmentigo – diris modeste Ŝvejk – miaj genuoj estas ŝvelintaj.

Bautze ekokulis terure al la bona soldato Ŝvejk kaj kribojis:

– Sie sind ein Simulant! (Vi estas simulanto!) kaj turnante sin al la suboficiro li diris glacie trankvile: – Den Kerl sogleich einsperren! (Tiun ulon tuj enprizonigu!)

Du soldatoj kun bajonetoj akompanis Ŝvejk'on for al garnizona karcero.

Ŝvejk iris helpe de lambastonoj, rimarkante konsternite, ke lia reŭmatismo komencas malaperi.

Sinjorino Miler, kiu atendis Ŝvejk'on supre sur la ponto kun la ĉareto, ekvidinte lin sub la bajonetoj, ekploris kaj foriris de la ĉareto por ne plu reveni al ĝi.

Kaj la bona soldato Ŝvejk iris modeste, eskortata de armitaj ŝtat-defendantoj. La bajonetoj lumis en sunbrilo kaj en Malá strana-kvartalo, antaŭ la monumento de Radetzki li turniĝis al amaso ilin akompananta:

– Ek al Beogrado! Ek al Beogrado!

Kaj marŝalo Radetzki reveme postrigardis de sia monumento la malproksimiĝantan bonan soldaton Ŝvejk'on kun rekruta florfasko surjake, lamantan je kadukaj bastonoj, dum iu seriozmiena sinjoro komunikis al la apuduloj, ke oni eskortas dizertulon.

*El la ĉeĥa tradukis Oldřich Knichal. Revuo **Fonto**, 1983, n-ro 31, p. 5-9.*

Ŝukumar Ray

HO ĜO BO RO LO

estas varmege, kvankam mi simple kuŝas en la ombro sub arbo kaj faras nenion, tamen mi daŭre ŝvitas, mia poŝtuko kuŝis sur la herbo; apenaŭ mi eklevas ĝin por forviŝi la ŝviton, kiam ĝi diras, "miaŭ!".

ĝene! kial miaŭas la poŝtuko?

mi rigardas ĝin kaj trovas, ke la poŝtuko jam ne estas poŝtuko, sed ke senmove rigardas al mi brilruĝa, grasa kato, kiu elstarigas la lipharojn.

"kiel ĝene!" mi diras. "estis poŝtuko, kaj nun estas kato."

la kato tuj replikas, "kiel estus ĝene? estis ovo, kaj nun estas anaso kvakanta: ofte okazas tiel."

mi pensas iomete, kaj diras, "do, kiel mi nomu vin nun? vi ja ne estas vera kato, sed fakte poŝtuko."

la kato diras, "vi povas nomi min kato, aŭ poŝtuko, aŭ sonorilo."

mi demandas, "kial sonorilo?"

responde al tio, la kato, dirante "ĉu eĉ tion vi ne scias?", fermas unu okulon kaj moke ridaĉas. mi estas ege embarasita. ŝajnas al mi, ke mi certe devus kompreni la aferon de tiu sonorilo. do, konfuziĝante, mi senprokraste diras, "ho jes, jes, tute klare."

tio kontentigas la katon, kiu diras, "jes, estas ja facile kompreneble – la 'so' de sonorilo, la 'mer' de kato, kaj la 'o' de poŝtuko – fariĝas *somero*, ĉu ne?"

mi ne komprenas ion ajn, sed mi timas, ke la kato povus denove ridaĉi, kaj tial mi jesadas. poste, rigardinte al la ĉielo dum iom da tempo, la kato subite diras, "se vi suferas pro la varmo, kial vi ne iras al tibeto?"

mi respondas, "estas pli facile diri, ol iri."

"kial estus malfacile iri?"

"ĉu vi scias, kiel oni irus tien?"

kun plenvizaĝa rido la kato diras, "kial mi ne scius? kalkato, baruipuro, ranagato, tibeto – jen! rekta vojo daŭras unu kaj kvaronan horojn, oni simple devas starti."

"do, ĉu vi povas klarigi al mi la vojon?"

je tio, la kato subite iĝas iom serioza. kaj li skuas la kapon, dirante, "ne, tion mi ne kapablas. se mia arba kuzo ĉeestus, li povus diri senerare."

mi diras, "kiu estas via arba kuzo? kie li loĝas?"

"en arbo", diras la kato. "kie alie arba kuzo povus loĝi?"

"kie oni povas renkonti lin?"

tre vigle kapneas la kato, dirante, "tion oni ne povas, tio simple ne estas farebla."

"kiel?"

"ĉu vi volas scii, kiel? supozu, ke vi iras al uluberio por lin renkonti; tiam li estos en motihario. se vi iros tien, oni diros al vi, ke li estas en ramkiŝtopuro. sed, irante tien, vi trovos, ke li jam foriris al kaŝimbazaro. neniel eblas renkonti lin."

"kiel do vi lin renkontas?"

"tre malfacile", la kato diras. "unue oni devas kalkule trovi la lokojn, kie la arba kuzo ne estas. poste oni devas pensi, kie li estas ĝuste je tiu momento. kaj oni devas kalkuli, kie li eble estos, kiam oni atingos tiun lokon. poste necesas kalkuli –"

interrompe mi diras, "kia kalkulo estas tio?"

"malfacila kalkulo. ĉu vi volas vidi?" kaj li prenas branĉeton, desegnas longan strekon sur la herbo, dirante, "supozu, ke jen la arba kuzo." kaj li restas solene silenta dum kelka tempo.

post dua, tute simila streko, kaj la anonco "supozu, ke jen vi", li same pasigas iom pli da tempo, klinante la kapon.

subite sekvas alia streko: "jen, supozu, sonorilo." en la sama maniero iom post iom aperas pliaj strekoj, kun la klarigoj: "supozu, ke jen tibeto", – "supozu, ke jen la arba bokuzino, kiu kuiras", – "supozu, ke jen truo en la arbo" –

aŭskultadante, mi fine iel ekkoleras, kaj diras, "diable! kiajn sensencaĵojn li babilas, estas tute tede!"

la kato diras, "bone, mi do klarigos iom pli simple. fermu la okulojn, kaj mense kalkulu tion, kion mi diradòs." mi obeas.

kun la okuloj fermitaj mi atendas, atendas, sed la kato tute ne diras ion. subite mi ial suspektas ion, rigardas, kaj trovas, ke la kato ridaĉante forkuras trans la heĝo de la ĝardeno.

kion fari? mi eksidas sur ŝtono sub la arbo. iu tuj diras je raŭka, basa voĉo: "kiom estas duoble sep?"

kiu parolas? dum mi rigardas tien kaj tien, la voĉo denove sonas: "kial do vi ne respondas? kiom estas duoble sep?" tiam mi rigardas supren kaj vidas korvon, kiu skribadas ion sur ardeza tabuleto, kiun li tenas, kaj fojfoje rigardas al mi, klinante la kapon.

mi diras, "du oble sep faras dek kvar."

la korvo tuj kapneas: "malprave! malprave! vi malsukcesas."

kolerege mi diras, "mi nepre pravas! unu oble sep faras sep, du oble sep faras dek kvar, tri oble sep faras dudek unu."

la korvo ne respondas, sed nur pensas iomete kun la skribilo ĉe la buŝo. fine li diras, "du oble sep estas dek kvar, kaj enskribante kvar, restas la skribilo en la mano."

"nu?" mi diras, "vi volis diri, ke du oble sep ne estas dek kvar! kial do vi diras alie nun?"

la korvo diras, "kiam vi diris tion, ankoraŭ ne fariĝis dek kvar, sed nur dek tri moneroj kaj okdek unu cendoj. se mi ne estus skribinta dek kvar je la ĝusta momento, nun fariĝus dek kvar kaj naŭ cendoj."

mi diras, "neniam mi aŭdis tian malsaĝaĵon! se du oble sep faras dek kvar, do devas ĉiam esti dek kvar. ĉu antaŭ unu horo, ĉu post dek tagoj – tute ne gravas."

miregante, la korvo diras, "ĉu la tempo ne valoras en via lando?"

"valoras - kiel?"

la korvo diras, "se vi restus ĉi tie kelkajn tagojn, vi ja komprenus. en nia merkato, la tempo aktuale estas tre multekosta. se oni malsaĝe elspezas eĉ iometon, okazas granda problemo. dum kelkaj tagoj, penpene, ŝtelŝtele, mi ŝparis iom da tempo, kaj jen la duono de tio perdiĝas dum mi disputadas kun vi." kaj li denove komencas kalkuli, dum mi sidas, embarasite.

subite, el truo en la arbo, io glitfalas sur la teron. estas maljunulo duonmetron alta, tute kalva, kun verda barbo etendiĝanta ĝis la piedoj, kiu tenas enmane nargileon [fumilon] sen tabakujo. estas io skribita sur lia kalva kapo per kreto.

tuj post la alveno, la maljunulo suĉas la fumilon unu-du fojojn kaj senpacience demandas, "nu, ĉu vi finis la kalkulon?"

la korvo iom hezitas, kaj diras, "ĝi estos baldaŭ preta."

"mirinde," diras la maljunulo. "jam pasis dek naŭ tagoj, sed la kalkulo ne estas preta!"

kelkajn momentojn la korvo suĉas la skribilon tre serioze, kaj fine demandas, "kiom da tagoj?"

la maljunulo diras, "dek naŭ."

la korvo tuj etendas la kolon kaj krias, "jen, jen – dudek!"

"dudek unu", diras la maljunulo. "dudek du", diras la korvo. "dudek tri", krias la maljunulo. "dudek tri kaj duono", kriegas la alia. kvazaŭ ili proponadus en aŭkcio.

subite la korvo rigardas al mi kaj diras, "kial vi ne faras proponon?"

mi diras, "kial mi devus senutile krii proponojn?"

la maljunulo ne rimarkis min ĝis tiu momento. subite aŭdante mian voĉon, li turniĝas ok-naŭ fojojn kaj fine haltas, kaj frontas al mi. poste li tenas la fumilon antaŭ la okulo kvazaŭ teleskopon kaj longe observas min. kaj, elpoŝiginte kelkajn pecojn de kolora vitro, li observas min tra ili ree kaj ree. fine li subite aperigas malnovan tajloran bendon kaj komencas mezuri min, kriadante, "alto; sesdek kvar centimetroj. maniko: sesdek kvar centimetroj. brusto: sesdek kvar centimetroj. kolo: sesdek kvar centimetroj."

mi forte protestas, dirante, "evidente ne eble! se sesdek kvar centimetroj por la brusto, kiel eblas sesdek kvar centimetroj ankaŭ por la kolo? ĉu mi estas porko?"

la maljunulo diras, "se vi ne kredas, vidu mem."

mi trovas, ke la indikoj sur la mezura bendo estas tute viŝiĝintaj, krom la indiko sesdek kvar; tiu sola estas iomete legebla. tial, kion ajn la maljunulo mezuras, ĉio iĝas sesdek kvar centimetroj.

poste li demandas, "kiom vi pezas?"

"mi ne scias."

per la fingroj li iom premas min, kaj anoncas, "du kaj duonan kilogramojn."

"kion vi diras? fraĉjo pezas dudek unu kilogramojn, kaj li estas du jarojn malpli aĝa ol mi."

la korvo rapide klarigas, "nu, viaj kalkuloj estas malsimilaj."

la maljunulo diras, "skribu, do. pezo: du kaj duona kilogramoj. aĝo: tridek sep."

mi diras, "baf! mi havas nur ok jarojn kaj tri monatojn, kaj vi diras: tridek sep."

la maljunulo pensas kelkajn minutojn, kaj demandas, "ĉu kreska aŭ malkreska?"

"kion vi celas?" mi demandas.

"mi volas demandi, ĉu via aĝo pliiĝas aŭ malpliiĝas?"

"kial la aĝo povus malpliiĝi?"

la maljunulo klarigas, "nu, la aĝo evidente ne povus daŭre kreski! diable! tiel unu tagon oni eble trovus, ke oni havus pli ol sesdek, sepdek, okdek jarojn. kaj fine oni mortus pro maljuneco!"

mi diras, "sed tio ja okazos. kiam oni havos okdek jarojn, oni nepre estos maljuna, ĉu ne?"

"kiel malsaĝa vi estas!" diras la maljunulo. "kial oni devus havi okdek jarojn? kiam ni atingas kvardek jarojn, ni renversas la aĝon. tial, anstataŭ atingi kvardek unu, kvardek du, la aĝo malkreskas al tridek naŭ, tridek ok, tridek sep, kaj tiel plu. kiam la aĝo tiamaniere malpliiĝas ĝis dek jaroj, oni allasas, ke ĝi denove kresku. mia aĝo, ekzemple, kreskis kaj malkreskis multajn fojojn, kaj aktuale mi havas dek tri jarojn." aŭdante tion, mi forte emas ridi.

"bonvolu paroli iom mallaŭte," la korvo diras. "mi devas fini la kalkulon kiel eble plej frue."

la maljunulo je tio eksidas apud mi kaj, svingante la krurojn, flustras al mi, "mi volas rakonti bonan fabelon al vi. atendu, mi devas pensi iomete." li gratadas la kalvan kapon dum li pensas kun la okuloj fermitaj. poste li diras, "jes, nun mi memoras, aŭskultu –

– dume, la ĉefministro glutis la fadenbulon de la reĝidino. neniu scias pri tio. je la sama tempo, la dormanta giganto subite kriis, 'manĝo-aromo! flaro de homo! manĝos mi homon hodiaŭ!' kaj brue elfalis el la lito. jen, tuj: tamburoj, flutoj, klarionoj, cimbaloj, gardistoj, soldatoj, pordistoj, servistoj – traf traf, bat bat – kaj subite la reĝo diris, 'se temas pri flugĉevalo, kial mankas al ĝi vosto?' je tio, ministroj kaj oficiroj, kuracistoj kaj furaĝistoj, klientoj kaj talentoj unuvoĉe diris, 'prave, prave! kio okazis pri la vosto?' neniu povas respondi la demandon, kaj ĉiuj senbrue forkuras."

je tiu momento la korvo turnas sin al mi, demandante, "ĉu vi ricevis la reklamon? la flugfolion?"

"ne, mi ne ricevis", mi diras. "pri kio temas?" kaj la korvo elprenas el paperamaso presitan folion kaj donas ĝin al mi. mi trovas, ke tekstas jene:

– omaĝe al lia plejalt-korva moŝto –

s-ro korvnigra grakilego
41 arbobazaro, korvokvartalo

ni faras per sciencaj procedoj ĉiuspecajn komputajn taskojn, ŝparkalkulajn kaj malŝparkalkulajn, podetalajn kaj pograndajn. kosto: unu monero kaj tridek cendoj por centimetro. duona rabato por infanoj. se vi sendos al ni la ĉefajn informojn, inkluzive vian ŝugrandon, haŭt-koloron, ĉu la oreloj doloras, ĉu viva aŭ morta, ktp., ni tuj sendos nian katalogon al vi.

a v e r t o !   a v e r t o !   a v e r t o !

ni apartenas al la aŭtentika nobela korvoklano – al la grakilega klano. nuntempe multe da frugilegoj, privilegoj, intelegoj k.s. lanĉis diversajn fientreprenojn pro mon-avido. gardu vin! ne lasu vin delogi de iliaj erarigaj reklamoj.

la korvo demandas, "ĉu vi ŝatas ĝin?"
mi diras, "mi ne komprenas la tuton."
la korvo mienas serioze kaj diras, "ĝi ja estas tre malfacila. ne ĉiuj komprenas ĝin. iam venis kliento kun kalva kapo –"
tuj eksaltas kolere la maljunulo: "atentu! se vi denove dirados 'kalva kapo, kalva kapo', mi frakasos vian skribtabulon per mia fumilo!"
iom konfuzite, la korvo iom pensas, kaj diras, "mi diris, ne kalva, sed karba. temas pri kapo, kiu estas forta kaj malmola, kiel karbo."
tio ne kontentigas la maljunulon. li sidas kaj grumbladas. vidante tion, la korvo diras, "ĉu vi volas vidi la kalkulon?"
la maljunulo trankviliĝas iomete kaj diras, "ĉu vi do finis? montru."
"vidu", diras la korvo, kaj faligas la tabulon krake sur la kalvan kapon de la maljunulo, kiu eksidas, tenante la kapon enmane, kaj paŭte ploras, kiel infano, kriante 'panjo! paĉjo! onjo!' kaj simile.
dum iom da tempo, la korvo rigardas kun miro, kaj fine diras, "ĉu ĝi vundis vin? mil diabloj prenu ĝin!"
la maljunulo tuj forgesas pri la plorado, kaj krias ekscitite, "mil dek!"
"mil dudek", respondas la korvo. "mil ducent!" rekrias la alia.
timante, ke la vetkriado rekomenciĝos, mi haste atentigas, "sed vi ne vidis la kalkulon, ĉu?"
"jes, jes, vi pravas", diras la maljunulo. "legu do la kalkulon." mi levas la tabulon kaj trovas, ke per etaj literoj estas skribite sur ĝi: "konsidere, ke tiu akto dokumento ĵurdeklaro de la kliento estas unuflanke ekzekuciita; kaj konsidere, ke la posedanto plendanto testamentanto jurrajte peticias kaj apelacias; kaj

konsidere, ke la ĵuro misĵuro de la atestantoj estos kasaciita de injunkcio kaj alvoka ordono de la juĝistaro kaj la persekutanto notario prokuratoro procesante, la verdikto mandato dekreto krom se –"

la maljunulo interrompas mian legadon, ekdirante, "kiajn sensencaĵojn vi skribis?"

"necesas skribi ĉion ĉi en la komenco", diras la korvo. "alie la kalkulo ne estos firma. perfekta laboro bezonas tian antaŭpreparon."

"bone", diras la maljunulo. "sed ĉu vi ne skribis la veran kalkulon?"

la korvo diras, "jes, ankaŭ tion mi skribis. legu la finan parton."

mi vidas, ke en la fino estas skribite per dikaj literoj: "du oble sep faras dek kvar; aĝo – sesdek kvar centimetroj; debeto – du kaj duona kilogramoj; kredito – tridek sep jaroj."

la korvo diras, "estas evidente, ke la kalkulo estas nek algebra ekvacio nek geometria teoremo, do ĝi devas esti aŭ decimalaĵo aŭ frakcio. kontrolinte, mi konstatas, ke du kaj duona kilogramoj estas frakcio. do la tri ceteraj devas esti decimalaĵoj. nun mi bezonas scii: ĉu vi volas frakcion aŭ decimalaĵon?"

la maljunulo diras, "atendu do, mi iom demandos." kaj li mallevas sian buŝon al la bazo de la arbo kaj komencas voki, "budo! ho budo!"

post kelkaj momentoj, ŝajnas aŭdiĝi kolera voĉo de ie en la arbo: "kial vi vokaĉas?"

"aŭskultu, kion diras grakilego."

"kion do?" demandas la sama voĉo.

"li diras, ĉu decimalaĵo aŭ frakcio?"

"kiun li nomas frakcio? ĉu vin aŭ min?" – koleregа respondo.

"ne tiel", diras la maljunulo. "li demandas, ĉu vi volas por la kalkulo decimalaĵon aŭ frakcion?"

post iom da tempo venas respondo, "nu, postulu decimalaĵon."

dum kelkaj momentoj la maljunulo kun serioza mieno trafingris la barbon. poste li kapskue diras, "kia malsaĝulo li estas, tiu budo! kial mi petus decimalaĵon? kial ne indas frakcio? ne, ne, grakilego, donu al ni frakcion."

la korvo diras, "do, se oni subtrahas la du entjerajn kilogramojn el du kaj duona kilogramoj, restas kiel frakcio la duona kilogramo. tio do estas la kalkulo por vi. ĝi kostas, nu, du monerojn kaj okdek kvin cendojn se senmiksa, kaj dek cendojn se miksita per akvo."

la maljunulo diras, "kiam mi ploradis, tri gutoj da larmo falis sur la kalkulon. jen via skribtablo, kaj jen la dek cendoj."

ricevinte la pagon, la korvo ĝojegas. frapante la tabulon, li dancas, ritme kantante: "kalevala, kal val! kalevala, kal val!"

denove koleregas la maljunulo: "vi denove diras *kal-va*, *kal-va*! atendu! budo, ho budo! venu tuj! li denove mokas! apenaŭ li finis paroli, jen rulfalas ia granda pakaĵa afero el arbo-truo sur la teron. mi vidas, ke iu maljunulo estas kapte premita sub granda pakaĵo. li freneze kaj vane movegas la brakojn kaj krurojn.

li aspektas tute simile al la alia maljunulo kun la fumilo. tiu ĉi, anstataŭ levi lin helpe, mem eksidas sur la pakaĵo kaj batas lin per la fumilo, dirante dume, "levu vin, mi diras! leviĝu tuj!"

la korvo okule signalas al mi kaj diras, "ĉu vi ne komprenas? estas diraĵo, 'falas sur budon la ŝarĝo de udo'. ĉi tiu sukcesis trudi la ŝarĝon al tiu, kaj kompreneble ne volas repreni ĝin. pri tio ili ĉiutage interbatalas."

dume, budo jam staras, kaj tenas la pakaĵon. grincante la dentojn, li diras, "kanajlo, udaĉo!" kaj udo rulfaldas siajn manikojn, svingas la fumilon, kaj krias, "fripono, budaĉo!"

la korvo kuraĝigas, "brave! brave! al batalo – antaŭen!"

kaj tuj frap frap, bat bat, krak krak! post momento, mi vidas, ke udo anhelas, sternita surtere, kaj budo konvulsie frotetas sian kalvan kapon.

budo komencas plori, "ho udo, fraĉjo udo, kien vi foriris?" ankaŭ udo ekploras, "ho ve! kio okazis al nia budo?" kaj ili ambaŭ ekstaras, brakumas unu la alian kaj kune ploras, kaj fine tute gaje eniras tra la truo en la arbon. vidante tion, ankaŭ la korvo pakas sian laboraĵaron kaj iras for.

mi pensas, ke mi devus nun eltrovi vojon hejmen, sed subite mi aŭdas ian sonon de malantaŭ proksima arbusto – kvazaŭ iu ridadus preskaŭ ĝis la senspiriĝo, kaj ne povus ĉesigi la ridadon. mi rigardetas tien kaj trovas, ke iu – ĉu homo aŭ simio, strigo aŭ fantomo, ne estas klare – ĵete svingas la brakojn kaj krurojn kaj ridadas, dirante, "jen krevos nun, krevos mia ventro!"

ekvidante min, li regajnas iom sian spiron, kaj diras, "tre feliĉe, ke vi alvenis! alie mia ventro nepre krevus pro la ridado."

mi demandas, "kial vi ridas tiel terure?"

la estaĵo diras, "ĉu vi volas scii, kial? imagu do, ke se la tero estus plata, kaj la tuta akvo-amaso surfluus sur la grundon, kaj la tero iĝus aĉa koto, kaj la homoj glitglite faladus en la kotaĉon, tiam – ho hi hi ha ha –" kaj denove li falas, ruliĝante surtere pro la ridado.

"kiel absurde!" mi diras. "ĉu pro tio vi ridas tiel terure?"

li denove ĉesas ridi kaj klarigas, "ho ne, ne nur pro tio. supozu, ke viro iras, portante glaciaĵon en unu mano kaj kalkon en la alia, kaj volante manĝi la glaciaĵon, li erare enbuŝigas la kalkon – ho ha ha he he hi hi –" neregebla ridegado denove.

mi diras, "kial vi suferas tiel, imagante ĉi ĉiajn neeblaĵojn?"

"ne ne, ja ne ĉiuj estas neeblaĵoj. supozu, ke viro havas lacertojn kiel dombestojn, kaj li banas ilin, manĝigas ilin, sekigas ilin en la suno, kaj unu tagon granda kapro alvenas kaj formanĝas ĉiujn lacertojn, ho hi hi ha ha ha –"

la agadmaniero de la estaĵo tre mirigas min. "kiu vi estas?" mi demandas. "kio estas via nomo?"

li pensas iomete kaj diras, "mi nomiĝas hiĝibiĝbiĝ. mi nomiĝas hiĝibiĝbiĝ, mia frato nomiĝas hiĝibiĝbiĝ, mia patro nomiĝas hiĝibiĝbiĝ, mia onklo nomiĝas hiĝibiĝbiĝ –"

mi interrompas lin: "pli facile vi povus diri, ke via tuta familio nomiĝas hiĝibiĝbiĝ."

li denove pensas iomete kaj diras, "tio, tamen, ne estas vera. mi nomiĝas tokai. mi nomiĝas tokai, mia kuzo nomiĝas tokai, mia avo nomiĝas tokai, mia bopatro nomiĝas tokai –"

mi severe admonas, "ĉu vi diras la veron aŭ blagas?"

tute konfuzite, la estaĵo respondas, "ne, ne, mia bopatro nomiĝas biskvito."

tio tre provokas min, kaj mi diras kolere, "eĉ ne unu vorton mi kredas!"

ĝuste tiam senaverte puŝas sian kapon tra la arbusto granda kapro kun barbo, kaj diras, "ŝajne vi parolas pri mi, ĉu ne?"

mi estas dironta, ke ne, sed antaŭ ol mi povus diri ion, li paroladas rapide kaj longe: "vi povas vigle disputi, tamen vere ekzistas multaj objektoj, kiujn la kapro ne manĝas. tial mi volas prelegi pri la proverba temo 'kion ne manĝas la kapro!'" post tio, li venas antaŭen kaj komencas:

"karaj knaboj kaj mia kara hiĝibiĝbiĝ, pro la atesto pendanta de mia kolo vi certe komprenas, ke mia nomo estas s-ro baisto kornov, b.a., m.s. mia bleko ba estas bone konata; tial mi nomiĝas baisto; kaj la kornojn vi certe vidas. la diplomo b.a. atestas pri mia povo bone bai, kaj m.s. diras, ke mi estas manĝo-specialisto; mi mem esploris la manĝeblon kaj nemanĝeblon de ĉiuj objektoj. vi havas onidiron, 'kion ne diras la frenezulo! kion ne manĝas la kapro!' tio estas tute maljusta. antaŭ nelonge tiu kompatindulo diris, ke kaproj manĝas lacertojn. nu, tio estas kruda mensogo. mi mem prove lekis lacertojn de diversaj specoj; ili estas tute nemanĝindaj. kompreneble, ni kelkfoje manĝas multajn aferojn, kiujn vi ne manĝas, ekzemple: papersaketon, kokoso-ŝelon, ĵurnalon, aŭ iun bonan libron, eble tiun de cezaro rossetti. sed fortike binditan libron ni neniam manĝas. tre malofte ni iom manĝetas lankovrilon, tukon, matracon, aŭ kusenon, sed tiuj, kiuj diras, ke ni manĝas litojn, tablojn, aŭ seĝojn, estas senhontaj mensoguloj. kiam ni sentas nin vervaj kaj viglaj, ni pro scivolemo frandas diversajn objektojn maĉe aŭ leke: krajonojn aŭ skrapgumon, botelkorkon aŭ sekan ŝuon aŭ kanvasan sakon. mi aŭdis, ke en gaja humoro mia avo iam formanĝis duonon de la tendo de iu altranga oficiro. tamen, ni neniam manĝas trançilojn, tondilojn, aŭ botelojn. iuj el ni ŝatas manĝi sapon, sed temas ĉe tio pri malgrandaj, tre ordinaraj specoj. mia plej juna frato iam formanĝis tutan brikon da sapo –" kaj subite s-ro kornov komencas ploregi, blekante ba ba, kun la okuloj turnitaj al la ĉielo. ni konstatas per tio, ke, manĝinte la sapon, tiu frato mortis juna.

hiĝibiĝbiĝ dume dormadis; subite li ekaŭdis la raŭkan plorkriadon de la kapro kaj eksalte leviĝas, kriante pro la timo, kaj komencas singulti preskaŭ ĝis sufokiĝo. ŝajnas al mi, ke la malsaĝulo eble mortos nun. sed post momento mi vidas, ke li denove komencis ridadi laŭ tiu antaŭa maniero.

mi diras, "kion do vi trovas ridinda en ĉi tio?"

li respondas, "vi eble ne scias pri iu viro, kiu terure ronkadis, kaj ĉiuj najbaroj

koleris pri li. unu tagon trafis fulmobato sur lian domon, kaj oni tuj alkuris kaj komencis batadi lin – ho he he ha ha –"

dirante, "kia sensencaĵo!" mi ekturnas min, kiam mi vidas, ke jen viro kun razita kapo, kiu portas piĵamon kaj jakon, kiel ĥora kantisto de la kamparaj operoj. li ridetante alrigardas min tiele, ke mia tuta korpo agaciĝas. vidante, ke mi turnas min, li flanken klinas la kapon, kiel dorlotita knabo, kaj diras, svingante la manojn: "ne ne, fraĉjo, bonvole ne petu min kanti nun. mi vere devas diri, ke hodiaŭ mia voĉo ne havas bonan sonon."

mi diras, "diable! kiu petis vin kanti?"

la homo estas tiel senhonta, ke li tamen venas al mi kaj diradas, insiste, "ĉu vi ofendiĝas, fraĉjo? diru vere, ĉu mi ofendis vin? nu bone, mi do ja kantos por vi, kial necesus ofendiĝi, fraĉjo?"

antaŭ ol mi povus ion diri, la kapro kaj hiĝibiĝbiĝ unuvoĉe krias, "jes jes, oni kantu, oni kantu!" kaj la razitkapulo tuj elpoŝigas du grandajn faskojn da kanto-folioj, tenas ilin antaŭ la okuloj, kaj, iom zumzuminte, subite ekkantas je laŭtega soprana voĉo: "blu-mu*zi*ka ruĝa *kan*to ride odo*ran*ta!" tiun unusolan verson li kantas unufoje, dufoje, kvinfoje, dekfoje.

"kiel ĝene!" mi diras. "ĉu la kanto ne havas aliajn versojn?"

la razitkapulo diras, "jes, havas, sed havas ilin alia kanto. tiu tekstas: 'stratoj stratetoj, krias knabetoj, tremas dometoj, falas arbetoj'. nuntempe tiun mi ne kantas plu. ekzistas alia kanto – 'novaj terpomoj de nainital' – tiun oni devas kanti ekstreme mole, kaj ankaŭ tiun mi nuntempe ne kapablas. tio, kion mi nuntempe kantas, estas la kanto de l' ombra rideto", kaj li komencas kanti:

> ombra rideto maldike zumas
> kurba flustraĵo svenige lumas
> korka animo botelojn ĉasas
> blankon kaj nigron dolĉo frakasas.

mi protestas, "ĉu tio estas kanto? ĝi havas nenian signifon!"

hiĝibiĝbiĝ diras, "jes, la kanto estas solide malfacila."

"la sola solida parto," diras la kapro, "estas eble la boteloj."

la razitkapulo sentas sin tre vundita: "kial vi do ne diris pli frue, ke vi volas aŭskulti facilajn kantojn? kial kritiki min tiom? ĉu mi ne scias facilajn kantojn?" kaj li ekkantas:

> diras vesperto al bona histriko,
> "aperos ĉi-nokte amuza fantiko" –

mi intervenas: "ekzistas neniu vorto 'fantiko'."

"kial ne?" demandas la razitkapulo. "se estas vortoj kiel histriko, eriko, tropiko, kial do ne fantiko?"

la kapro diras, "daŭrigu la kantadon; pri vortoj oni disputu poste." la kanto ekis denove:

diras vesperto al bona histriko,
"aperos ĉi-nokte amuza fantiko,
alvenas atake la strigoj diversaj,
la musoj mortiĝos, la ranoj amasaj
tremegos pro timo, kaj ŝvitos tutkorpe
la talpoj, kaj saltos la bufoj centope;
la dentoj de ĉiuj bruege klakklakos,
vi vidos, kiele l' afango frakakos."

mi estas protestonta denove, sed subpremas la emon. la kantado daŭras:

la bona histriko, kun buŝo aperta,
eldiras solene, "mi kredis vin sperta!
ĉu vi eĉ ne vidas apude dormontan
mian edzinon? strigaron svarmontan
avertu, ke se ili tiel ekbruos,
kaj vekos ŝin, tiam persone mi truos
al ili la haŭton, kaj stultaj la strigoj
pripentos la sekvojn de siaj intrigoj."
vesperto ridegas: "ho, vere vi stultas!
tielan frenezon ne strigoj aŭskultas.
jen, vian edzinon atencas grasumo,
dormantan en tia nigrega mallumo;
ankaŭ vi – mi konstatas – vi tagon post tago
fariĝas barelo plenplena de blago."

mi ne scias, ĉu la kantado daŭrus plu aŭ ne; sed je tiu momento aŭdiĝas granda tumulto. mi vidas, ke ĉirkaŭe estas subite amaso da estaĵoj. iu histriko, antaŭ la aliaj, singulte ploras, kaj iu krokodilo, vestita kiel advokato, konsolas lin, frapante la dorson per grandega libro, kaj dirante, "ne ploru, ne ploru, mi baldaŭ metos ĉion en bona ordo." subite bufo surhavanta uniformon levas bastonon kaj krias, "proceso pri kalumnio!"

tuj alvenas de ie granda strigo, vestita per nigra mantelo. li eksidas sur alta ŝtonego, fermas la okulojn, kaj komencas dormeti. granda talpo ventumas lin per malbela, malpura ventumilo.

per malhelaj okuloj, la strigo rigardas ĉirkaŭ sin, kaj tuj refermas la okulojn, dirante, "prezentu la plendon."

la krokodilo per granda peno faras ploran mienon kaj, gratante per la ungoj siajn okulojn, sukcesas venigi kvin-ses larmo-gutojn al la okuloj. kaj, per basa, kvazaŭ malvarmuma voĉo, li ekparolas: "via juĝista moŝto! estas proceso pri kalumnio. do evidente temas pri kaloj, pri lumo, kaj pri ni. ni komencu ĉe la kaloj. ili estas diversaj. la kaloj de leporo, ekzemple, ne similas al tiuj de vulpo –"

tion protestas ĉeestanta vulpo, vestita kiel advokato, kiu eksaltas, dirante, "via moŝto, mi tute ne havas, kaj neniam havis, kalojn. la persekutanta advokato devas paroli nur pri eventualaj kaloj de la histriko."

la histriko estas ekploronta denove, sed la krokodilo per sia librego frapas lian kapon kaj demandas, "ĉu estas dokumentoj, atestantoj, kaj simile?" la histriko rigardas al la razitkapulo kaj diras, "tiu homo havas dokumentojn enmane." la krokodilo tuj forprenas de la razitkapulo la faskon da kanto-folioj, kaj tute hazarde komencas laŭtlegi unu folion:

viraĉo staras
ion li flaras
virino iras
ion ŝi tiras
vento koleras
nubo toleras
florarboj floras
kial vi ploras?

la histriko diras, "ho ne, ne tiun." la krokodilo diras, "ĉu ne? do bone, atendu." kaj li legas alian folion:

fantoma onklino saltante dancaĉas,
sorĉulo platkapa la ostojn krakmaĉas,
de kverka branĉego jen pendas kun kapo
malsupren koboldo vestita per drapo.
la hidro kantaĉas sep kapojn skuante,
sep voĉojn eligas kantege bruante.
"neniu invitas min," krias l' onklino,
"mi ŝatus homaĵon por manĝi kun vino."

la histriko krias, "ho ve, kiajn sensencaĵojn li legaĉas!"

"kiun do vi bezonas?" demandas la krokodilo. "ĉu tiun ĉi? – 'muĝanta maro, fuĝanta jaro, balanta paro, falanta baro, restanta varo, kreskanta haro' – ĉu ankaŭ ne tiun? nu, mi baldaŭ trovos. jen ĝi, nepre – 'nokto silenta, kuŝante solsola, sur tria etaĝo, sur lito malmola, kial mi ege malsatas?', ĉu ne? eĉ ne tiu taŭgas, laŭ vi! kion vi diras? ha, temas pri poemo pri via edzino, vi diras! tion vi devis diri pli frue. jen ĝi – 'l' edzino de ĝino, kvazaŭ tigrino, krevigas la monton ĉi tiu virino' – ho, eĉ ne tiu kontentigas vin. tiam nepre temas pri: 'maljunulo tusas, malvarmume kuŝas, kap' kaj kol' doloras, singultante ploras' –"

la histriko ploregas. "ho ve, ve! mia tuta mono perdiĝis vane! kia stulta advokato, se oni eĉ donas al li la dokumentojn, li tamen ne kapablas trovi la ĝustan!"

la razitkapulo time staradis la tutan tempon. nun li subite ekdiras, "kiun kanton vi volas aŭdi? ĉu tiun, kiu tekstas, 'diras vesperto al bona histriko'?"

la histriko ekscitite diras, "jes ja, ĝuste tiun~"
agrese intervenas la vulpo, "kion diras la vesperto? via moŝto, bonvole ordonu do, ke s-ro vesperto aperu kaj atestu."
pufante sian gorĝon, la bufo laŭte vokas, "s-ro vesperto! vokiĝas s-ro vesperto!"
oni rigardas en ĉiuj direktoj kaj konstatas, ke nenie estas vesperto. tiam la vulpo diras, "en tiu okazo, via moŝto, bonvole mortkondamnu ĉiujn plendantojn."
la krokodilo diras, "kial estu tiel? ni apelacios."
la strigo kun la okuloj fermitaj diras, "apelacio akceptita. prezentu atestantojn."
la krokodilo rigardas tien kaj ĉi tien, kaj fine diras al hiĝibiĝbiĝ, "ĉu vi volas atesti? vi ricevos pagon de dudek cendoj." pro la mon-avido, hiĝibiĝbiĝ eksalte konsentas atesti, kaj tuj komencas forte ridadi.
"kial vi ridas?" demandas la vulpo. hiĝibiĝbiĝ diras, "oni instruis iun, ke li atestu jene: la pakaĵo estas volvita per flava papero, ligita per ŝnuro, kaj sigelita per lako. kiam la advokato demandas al li, 'ĉu vi konas la akuziton?', li tuj diras, 'ho jes, li estas volvita per flava papero, ligita per ŝnuro, kaj sigelita per lako' – ho he he ha ha hi hi –"
la vulpo demandas, "ĉu vi konas la histrikon?"
"ho jes, mi konas la histrikon, mi konas la krokodilon, mi konas ĉiun specion. la histriko loĝas en truo kaj havas longajn pinglegojn. la krokodilo havas malmolan kaj ondan haŭton, kaj de tempo al tempo manĝas kaprojn." je tio, s-ro baisto kornov komencis laŭte plori.
mi diras, "kio okazis nun?"
la kapro diras, "la duonon de unu mia onklo manĝis krokodilo, kaj do la restanta duono mortis."
mi diras, "lasu morti, bone okazis. nun fermu la klapon."
la vulpo demandas, "ĉu vi scias ion pri la proceso?"
hiĝibiĝbiĝ diras, "jes, mi scias bonege. en la proceso, estas iu, kiu plendas, kaj li havas advokaton; kaj ies kuzo estas alportita, tiu nomiĝas akuzito, kaj denove havas advokaton. ambaŭ flankoj havas po dek atestantoj. kaj ekzistas juĝisto, kiu sidas kaj dormas."
la strigo protestas, "mi neniel dormas. pro okula malsano, mi tenas la okulojn fermitaj."
hiĝibiĝbiĝ respondas, "mi vidas multajn aliajn juĝistojn. ili ĉiuj havas malsanon en la okuloj." kaj li ekridegas, kiel ĉiam.
la vulpo diras, "kio denove?"
hiĝibiĝbiĝ klarigas, "iu suferis pro cerba malsano. li donis nomojn al ĉiuj objektoj. lia ombrelo nomiĝis asekurperanto, liaj okulvitroj bonviziulo, lia dentobroso blankiganĝelo. sed kiam li eknomis sian domon neantaŭzorganto, tuj okazis tertremo, kiu detruis la domon. ho ha ha hi hi –"
la vulpo diras, "ĉu vere? kaj vi, kiel vi nomiĝas?"
"nun mia nomo estas hiĝibiĝbiĝ."

"kion signifas 'nun', se temas pri nomoj?"

"ĉu eĉ tion vi ne scias? en la mateno mia nomo estas panfromaĝ. kaj en la malfrua posttagmezo ĝi fariĝas grandfask."

la vulpo demandas, "kie estas via hejmo?"

hiĝibiĝbiĝ respondas, "ĉu vi demandas pri s-ro vehemo? li jam foriris al sia kampara loĝejo."

el la amaso tuj krias udo kaj budo samtempe, "tiuokaze, li sendube mortis." udo diras, "foririnte al la kamparo, la homoj senprokraste mortas." budo diras, "la onklo de habul iris al la kamparo kaj baldaŭ oni diris, ke li mortis."

la vulpo diras, "aĥ, ne parolu ĉiuj samtempe, tio kreas ĥaoson."

udo diras al budo, "se vi denove parolos ĉiuj samtempe, mi mortbatos vin per mia fumilo." budo diras samtempe, "se vi kreos ĥaoson denove, mi frakasos vian kapon per mia pakaĵo."

la vulpo diras, "via juĝista moŝto, ili ĉiuj estas frenezuloj kaj idiotoj. ne valoras iliaj atestoj."

je tio, la krokodilo kolere vostofrapas la teron, dirante, "kial ne valorus? nepre valoras! oni ja elspezas dudek cendojn por atestigi! kaj li tintfrape nombras dudek cendmonerojn, kaj donas ilin al hiĝibiĝbiĝ.

tuj aŭdiĝas de ie supre, "atestanto numero unu, kontante pagita, prezo: dudek cendoj." mi rigardas supren kaj vidas, ke grakilego kalkuladas, sidante sur arbo.

la vulpo denove demandas, "ĉu vi scias nenion alian pri ĉi tiu afero?"

hiĝibiĝbiĝ pensas iomete kaj diras, "mi scias kanton pri vulpoj."

"kian kanton?"

hiĝibiĝbiĝ melodias: "venu, vidu tiun scenon, vulpo manĝas melongenon, kie trovas li oleon?"

"sufiĉas," diras la vulpo haste. "tio temas pri alia vulpo. via atestado estas finita."

aliflanke, konstatinte ke oni pagas la atestantojn, multaj bruas kaj puŝas por povi atesti. en la puŝkonfuzon subite saltas grakilego de sur la arbo, kaj, ekstarante en la loko por la atestanto, li komencas atesti. antaŭ ol oni ion demandus, li komencas diri, "omaĝe al lia plejalt-korva moŝto, s-ro korvigra grakilego. 41 arbobazaro, korvokvartalo. ni faras per sciencaj procedoj ĉiuspecajn komputajn taskojn, ŝparkalkulajn kaj –"

la vulpo diras, "ne parolu sensencaĵojn. respondu nur al miaj demandoj. kio estas via nomo?"

"kia ĝeno!" diras la korvo. "mi jam diris: s-ro korvigra grakilego."

"kie vi loĝas?"

"ĉu mi ne jam menciis korvokvartalon?"

la vulpo demandas, "kiom for de ĉi tie?"

"estas tre malfacile diri," klarigas la korvo. "laŭhore, dudek kvin cendoj. laŭkilometre, dek du cendoj. ĉe kontanta pago, rabato de du cendoj. adicie fariĝas sesdek cendoj, subtrahe dek sep cendoj, divide tri cendoj, kaj multiplike

dudek unu moneroj."

"vi ne bezonas paradi vian saĝecon," diras la vulpo. "mi volas scii, ĉu vi konas la vojon al via hejmo?"

"certe," diras la korvo. "jen la rekta vojo antaŭ vi."

"kien iras tiu vojo?"

la korvo diras, "kien povus iri la vojo? ĝi restas tie, kie ĝi kuŝas. ĉu vojoj promenas tien kaj reen? aŭ ĉu ili vojaĝas al marbordoj por ferio?"

la vulpo diras, "mi konstatas, ke vi estas tre impertinenta. se vi aŭdacas veni por atesti, kion do vi scias pri la procesa afero?"

"dio mia!" diras la korvo. "kiu do tiel zorge kalkuladis la tutan tempon, se ne mi? kion ajn vi volas scii, mi povos doni al vi. jen, komence, kio estas kalo? kaloj estas diversspecaj: kalko, kaliko, kalkano, kalkanumo. la kalo de vulpo doloras, sed ne tiu de korvo. poste aperis atestanto, kontanta prezo: dudek cendoj. li estis la kuzo de s-ro vehemo kaj lia haŭto iĝis malmola kaj onda – tio nomiĝas la flava febro. kaj estis viro, kiu donis nomojn al ĉio. li nomis la vulpon oleoŝtelisto, la krokodilon okangulkurba, la strigon neantaŭvidanto –"

tuj okazas granda konfuzo en la kunsido. kolere, la krokodilo ekglutas la bufon. la talpo vidas tion kaj ŝire kriadas. la vulpo minacas la korvon per ombrelo kaj provas forpeli lin.

la strigo solene diras, "silentu, ĉiuj. mi proklamos la verdikton." kaj li ordonas al la kuniklo, kiu havas plumon ĉe sia orelo, "skribu tion, kion mi diras. proceso de kalumnio, numero dudek kvar. plendanto: la histriko. akuzito: atendu, kie estas la akuzito?" ĉiuj diras, "ho jes, aperis problemo! mankas akuzito!"

haste oni persvadas la razitkapulon ekstari kiel akuzito. tiu naivulo kredas, ke ankaŭ akuzito ricevos pagon, tial li ne protestas.

la verdikto estas, ke la razitkapulo estos en karcero dum tri monatoj kaj pendumiĝos dum sep tagoj. mi komencas pensi, ke mi devus protesti pri tiel maljusta verdikto, sed subite la kapro kornotrafas min de malantaŭe, dirante, "ba-isto kornov!" la ĉirkaŭaĵo turniĝas kaj nebuliĝas. la vizaĝo de la kapro iom post iom ŝanĝiĝas al tiu de mia onklo. tiam mi konscias, ke mia onklo skuadas min kaj diras, "ba! ba! vi dormadas, kaj via lernolibro kuŝas tie!"

mi tre miras! unue mi ekpensas, ke eble mi nur sonĝadis la tutan tempon. sed, vi eble ne kredos, mi provas serĉi mian poŝtukon kaj trovas, ke nenie estas tiu poŝtuko, kaj ke kato, kiu sidadis sur la heĝo kaj glatigadis la lipharojn, ekvidas min kaj forsaltas. kaj je tiu momento kapro blekas 'b-a-a' de malantaŭ la heĝo.

mi rakontis la tutan aferon al la plej aĝa onklo, sed tiu diris, "for! vi sonĝas sensencaĵojn kaj venas rakonti ilin." kiam la homoj iĝas plenkreskaj, ili fariĝas tiaj kruduloj, ke ili neniel volas kredi ion. sed vi ankoraŭ ne tro aĝiĝis; tial mi kuraĝas rakonti ĉion ĉi al vi.

El la bengala tradukis Badal Sircar kaj Probal Daŝgupto.
*Revuo **Fonto**, 1986, n-ro 70, p. 10-26.*

5

EL VIVO KAJ SCIENCOJ

Ĉen Baŭhe

GRANDIOZA SPORTA MANIFESTACIO EN AZIO

Senprecedenca konkuro

La ĉiukvarjara azia sportkunveno estas la plej altnivela en la okuloj de la ĉirkaŭ 3-miliarda azia popolo.

De post la Unua Azia Sportkunveno okazinta en Hindio en 1951 la aziaj landoj donis ĉiam pli grandan atenton al sia sportado kaj la nivelo de iliaj sportaj ludoj leviĝis rapide. Antaŭ la malfermo de la Deka Azia Sportkunveno en 1986 la diverslandaj sportaj organizoj anoncis sian celon por gajni medalojn. La delegacio de japanaj sportistoj, kiu gajnis plej multe da oraj medaloj de la Unua ĝis la Oka Aziaj Sportkunvenoj, esprimis, ke ĝi prezentos sian tutan lertaĵon por konkuri kun la ĉina delegacio, kiu gajnis plej multe da oraj medaloj en la Naŭa Azia Sportkunveno. La sudkorea delegacio, kiu ĉiam estis sub la dua loko laŭ la nombro de oraj medaloj gajnitaj de ĝi en la pasintaj aziaj sportkunvenoj, intencis superi aliajn, utiligante favorajn kondiĉojn esti gastiganta lando. Ĝia principo estis "Preterlasi Ĉinion kaj malhelpi Japanion por gajni la duan lokon en la totala nombro de oraj medaloj." Al la rivaloj la delegacio de ĉinaj sportistoj donis definitivan respondon, ke ĝi gajnos plej multe da oraj medaloj. Ankaŭ la sportaj delegacioj de Irano, Filipinoj, Tajlando, Hindio, Indonezio kaj Pakistano esprimis, ke ili venkos la defiantojn en siaj fortaj sportobranĉoj.

La 20-an de septembro 1986, en la stadiono de Seulo ekbrulis la grandega torĉo. Jen inaŭguriĝis la sportkunveno longe preparita.

Tuj en la sekvanta tago komenciĝis la konkurso. Ĉinaj sportistoj gajnis naŭ el la dek unu oraj medaloj en la konkursoj de pafo, naĝo, biciklado, halterlevo kaj gimnastiko kaj rompis tri rekordojn en pafo, unu en biciklado kaj unu en naĝo kadre de la aziaj sportkunvenoj. Tiutage japanaj naĝistoj gajnis la aliajn du orajn medalojn. Je la 22-a de septembro la sudkorea delegacio, kiu ne malstreĉis sian forton, gajnis kvar orajn medalojn kaj la japana ses orajn medalojn.

Poste, dum tri tagoj, kreskis respektive la nombro de oraj medaloj gajnitaj de Ĉinio, Japanio kaj suda Koreio, kun diferenco laŭvice inter 30 kaj 10. Sed tia situacio daŭris nelonge. Ekde la sesa tago de la konkurso la nombro de oraj medaloj gajnitaj de suda Koreio proksimiĝis al tiu de Japanio. Je la 30-a de septembro la delegacio de suda Koreio gajnis plej gravan sukceson: unuafoje ĝi superis Japanion en la totala nombro de gajnitaj oraj medaloj. Post tio, la sudkorea delegacio kun forta batalvolo defiis la ĉinan, kiu eksentis ĝian efektivan minacon.

En la postaj konkursoj la sudkorea delegacio gajnis orajn medalojn sinsekve en piedbatalo, bokso, ĵudo, atletiko, tabloteniso, volanludo kaj hokeo, plene elvolvante sian superecon en iuj sportobranĉoj kaj utiligante favorajn kondiĉojn esti gastiganta lando.

Kaj Ĉinio gajnis la unuan lokon en vira korbopilkado, vira flugpilkado, virina flugpilkado kaj virina teniso. Post sia unua malsukceso ĉinaj tablotenisistoj kaj volanistoj uzis sian tutan forton en la posta konkurso kaj gajnis grandan parton de la oraj medaloj de la individuaj ludoj en la du sportobranĉoj.

En la 4-a de oktobro la statistiko klare montris, ke Ĉinio kaj suda Koreio posedas po 92 orajn medalojn.

En la 5-a de oktobro, la lasta tago de la sportkunveno, restis nur ses oraj medaloj gajnotaj, kvin por atletiko kaj unu por piedpilkado.

Je 13:50, 24 sportistinoj el ses landoj partoprenis en la 4x100-metra virina stafetkuro. Kaj en la konkurso kvar ĉinaj knabinoj en blankaj kostumoj starigis la novan azian rekordon de 44"78 kaj per tio gajnis plian oran medalon por sia delegacio. Poste en la 4x100-metra vira stafetkuro ĉina atleto la unua ĝiskuris la cellokon, tio portis al Ĉinio la 94-an oran medalon.

Ĉe la fino de la atletika konkurso la japana delegacio gajnis du el la ceteraj tri oraj medaloj kaj la hinda unu. Tiutage je 18:00 suda Koreio venkis Saudi-Arabion per 2:0 en la piedpilka finalo kaj tiel gajnis la lastan oran medalon de la sportkunveno. Jen finiĝis la tuta konkurso. Rezulte, la ĉina delegacio gajnis la unuan lokon, kun 94 oraj medaloj, la sudkorea delegacio la duan lokon, kun 93, kaj la japana la trian lokon, kun 58.

Novaj rekordoj kreitaj

En la Deka Azia Sportkunveno sportistoj el diversaj landoj kaj regionoj kreis grandan nombron da novaj rekordoj kadre de la azia sportkunveno, i.a. oni rompis aziajn rekordojn je 99 homofojoj en la konkursoj de pafo, arkopafo, atletiko, halterlevo, biciklado kaj kegloludo. Oni rompis je 224 homofojoj la rekordojn de la azia sportkunveno en naĝo kaj supre menciitaj sportobranĉoj. En la arkopafa konkurso oni rompis kaj egaligis respektive du mondajn rekordojn. En la 29 disciplinoj de naĝo oni rompis 28 rekordojn. En iuj disciplinoj de la pafo, naĝo, arkopafo kaj atletiko ne nur gajnintoj de oraj medaloj, sed ankaŭ tiuj de arĝentaj kaj kupraj medaloj rompis rekordojn kadre de Azio kaj la azia sportkunveno. Eĉ iu gajninto de la sesa loko rompis rekordon de la azia sportkunveno.

En la Deka Azia Sportkunveno ĉinaj sportistoj konkursis en 20 el la 25 sportobranĉoj. En la sportobranĉoj de atletiko, pafo, arkopafo, halterlevo, naĝo kaj biciklado ili 69-foje rompis rekordojn kadre de Azio kaj la azia sportkunveno.

Krome, ili unuafoje gajnis la unuan lokon en la 10 000-metra virina kuro, vira kaj virina biciklado, virina arkopafo, vira flugpilkado, virina teniso kaj velado.

La 758 sportistinoj el diversaj partoj de Azio bonege ludis kaj estis admirataj de la publiko.

Inter ili troviĝis la hinda sportistino P. T. Usha, konata kiel "flugvirino" de Azio. La totala nombro de oraj medaloj gajnitaj de ŝi en Azio superis 12. Antaŭ la konkurso de la Deka Azia Sportkunveno ŝi aspiris al ses oraj medaloj. Fakte ŝi gajnis nur kvar orajn medalojn, tamen neniu atletino povis rivali kun ŝi.

En la stadiono de Seulo la 15-jara ĉina gimnastino Ĉen Cujting per sia lerta ludo konkeris la publikon. Ĉiufoje ŝi gajnis almenaŭ 9.7 poentojn. En la teama konkurso pri grundgimnastiko ŝi gajnis dek poentojn. En la sportkunveno ŝi gajnis tri orajn medalojn.

Krom ili, ankaŭ la sudkorea kuristino Lim Chun Ae, la nova elstara ĉina naĝistino Jan Ming kaj la filipina kuristino Vegaa Lydia De atingis brilajn sukcesojn en la konkurso.

En la sportkunveno 19 sportistinoj gajnis po almenaŭ du orajn medalojn.

Sporta leviĝo en Azio

Pasis jam 36 jaroj, de kiam oni okazigis la Unuan Azian Sportkunvenon en 1951. Kaj tiaj sportkunvenoj fariĝis ĉiam pli grandaj kaj akiris sukcesojn ĉiam pli bonajn.

La Unuan Azian Sportkunvenon partoprenis nur pli ol 500 sportistoj el dek unu landoj kaj regionoj, kaj postaj aziaj sportkunvenoj havis pli kaj pli da partoprenantoj. Kaj tiu ĉi sportkunveno estis la plej grandioza.

En la pasintaj 35 jaroj multaj aziaj landoj rimarkinde progresis en sportado. Indonezio fariĝis forta volanluda lando, kiel la monda publiko opinias. Plurfoje ĝi gajnis mondĉampionecon. Tajlandaj kaj sudkoreaj boksistoj sub pezkategorio 60 renomiĝas ne nur en Azio, sed ankaŭ iom en la mondo. Ankaŭ kegloludo rapide progresis en Singapuro kaj okupas gravan pozicion internacie. Pakistano plurfoje gajnis mondĉampionecon en hokeo kaj oran medalon tiurilate en la 23-aj Olimpikoj. Oni laŭdis okcident-aziajn landojn, kiel Saudi-Arabio kaj Kuvajtio, pro ilia lerta piedpilkado, kvankam ili ne perfektiĝis en aliaj sportobranĉoj.

Ĉinio kun multnombra loĝantaro kaj vasta teritorio, same kiel aliaj aziaj landoj, rapide disvolvis sian sportadon dum la pasintaj pli ol 30 jaroj. Ekde 1974 Ĉinio oficiale partoprenis en la aziaj sportkunvenoj. Ĝi gajnis 25, 50 kaj 61 orajn medalojn respektive en la Sepa, Oka kaj Naŭa Aziaj Sportkunvenoj en 1974, 1978 kaj 1982. Kaj en la naŭa ĝi estis gajninto de plej multe da oraj medaloj.

En la 80-aj jaroj la ĉina sportado eniris novan stadion. Inter 1981 kaj 1985 en Ĉinio aperis novaj elstaraj sportistoj kaj sportaj teamoj rekonitaj en Azio aŭ en la mondo. Dum tiu periodo ĉinaj sportistoj 156-foje gajnis ĉampionecon en 16 sportobranĉoj kaj 79-foje rompis mondajn rekordojn.

En tiu ĉi sportkunveno Ĉinio gajnis 94 orajn, 82 arĝentajn kaj 46 kuprajn medalojn. Ĝi pli progresis ol en la Naŭa Azia Sportkunveno, ĉu en kvanto de oraj medaloj de ĝi gajnitaj, ĉu en la sportobranĉoj, en kiuj ĝi okupis la unuan lokon.

En tiu ĉi sportkunveno plej multe kreskis la nombro de oraj medaloj gajnitaj de suda Koreio. Ĝi gajnis 28 orajn medalojn en la Naŭa Azia Sportkunveno kaj la nombro de oraj medaloj ĉi-foje gajnitaj de ĝi kreskis je 65. Tiu cifero estis pli granda ol la nombro de oraj medaloj gajnitaj de Japanio en tiu ĉi sportkunveno. La kaŭzo de la mirinda kresko kuŝis en tio, ke ĝi unuflanke utiligis la favorajn kondiĉojn esti gastiganta lando kaj aliflanke ĝiaj sportistoj rimarkinde progresis en pafo, atletiko, ĵudo kaj tabloteniso.

Iuj landoj kaj regionoj, kiaj Hongkong, Katario kaj Libano, unuafoje gajnis orajn medalojn. Resume, 22 landoj kaj regionoj gajnis medalojn ĉi-foje, i.a. 13 gajnis orajn medalojn. Ambaŭ ciferoj estis pli grandaj ol tiuj en la Naŭa Azia Sportkunveno. Tio montris novan progreson de la azia sportado.

Estis rimarkindaj la sukcesoj de la Deka Azia Sportkunveno, rimarkindaj ankaŭ ĝiaj mankoj.

Ekzistis grandaj diferencoj de sportado inter diversaj landoj. La tri potencoj Ĉinio, suda Koreio kaj Japanio gajnis ĉirkaŭ 85% de la 269 oraj medaloj. Tia serioza malekvilibro jam vekis atenton de la aziaj sportaj rondoj.

Cetere, en tiu ĉi sportkunveno sportistoj de iuj landoj malsukcesis en iuj sportobranĉoj, en kiuj ili estis fortaj antaŭe. Estis klara ekzemplo, ke la ĉinaj vira kaj virina tablotenisaj teamoj perdis la ludojn en la teamaj konkursoj. Ankaŭ Japanio perdis orajn medalojn en ĵudo kaj naĝo.

La aziaj sportkunvenoj montris, ke la nivelo de sportaj ludoj de Azio estas ankoraŭ multe malpli alta ol tiu de la mondo. Ĉi-foje sportistoj rompis kaj egaligis respektive du mondajn rekordojn nur en arkopafo. Tiuj faktoj montris direkton al la aziaj landoj en disvolvo de sportado.

La 11-a Azia Sportkunveno okazos en 1990 en Pekino de Ĉinio, kaj oni atendas pli bonajn ludojn de aziaj sportistoj.

*El la gazeto **El Popola Ĉinio**, 1987, n-ro 1, p. 14-16. Tradukita el la ĉina.*

Alberto Fernández

DEKSEPA DIALOGO: LA NATURA SELEKTO

Ni jam scias, ke la konstruproceson de la vivo direktas liliputaj genoj, tio estas iuj gigantaj makromolekuloj, en kies sino kaŝiĝas la plej profundaj misteroj de la viva materio. Ankaŭ ni vidis, ke la hereda mekanismo kondukas al senkompara riĉeco en ĉiu vivoformo, dank' al vasta eksperimentado.

Ni tiel kapablas principe klarigi la ekzistadon *de la nuntempa vivularo. Sed kiel ankaŭ klarigi ĝian historian* devenon*? Kiel klarigi tiun nekredeblan progreson disde simpla, mikroskopa pravivo, ludilo de la ĥaosaj naturfortoj, ĝis penspova estulo, kapabla propraprofite ordigi kaj majstri tiujn samajn naturfortojn? Ĉu la eksterordinaraj kvalitoj de la organika materio sufiĉas por ekspliki la admirindan adaptiĝon de ĉio vivanta al ties medio? Aŭ ĉu nepre devas interveni metafizika forto por modli la vivularon laŭplane kaj ĝin gvidi al antaŭfiksita celo?*

Per aliaj vortoj: ĉu la raveriĉa Simfonio de la Tera Vivo estas verkita de preternatura komponisto aŭ ĉu ĝi verkiĝis sola, per si mem?

Ni ne postulu de nia babilema triopo decidan respondon al tiuj gravaj demandoj. La temo ja estas malfacila, ampleksa, ofte eĉ pasia. Tion ni tuj spertos, se ni fende malfermetas la pordon kondukantan al la studĉambro de Terano por ŝtelaŭskulti viglan dialogon pri miriga mekanismo:

TERANO - ...kaj mi perfekte komprenas, Pensuto, vian naturan malemon akcepti tiun grandiozan majstroverkon de la naturo, la vivularon de nia planedo, kiel frukton sole de ege pacienca sed tamen blinda evoluo. Ankaŭ mi foje hezitas kaj, fronte al la nekredebla komplekseco de ĉio vivanta, ofte redemandas, kiel tiaj mirindaĵoj povis estiĝi sen antaŭfiksita plano, sen celhava forto, kiu premus la vivularon en privilegian direkton!... Kaj tamen, sufiĉas okupi konvenan vidpunkton, por ke nia panoramo sennebuliĝu kaj aperu la ĉeflinioj de natura solvo. Dubinja, ĉu vi ion scias pri la plej fama konkerado de la kunikla raso?

DUBINJA - ...? Mi nur scias, ke kunikloj senvole konkeradas niajn kuirpotojn, eĉ amase je la jarfino! Kion vi denove preparas per tiu... kunikla pensosalto?

PENSUTO - Ĉu vi aludas ilian fulmrapidan invadon de la aŭstralia kontinento?

TERANO - Efektive! Sed rakontu ĝin foje al via fratino, kiu, pri kunikloj, ŝajne scias nur la gastronomian flankon...

PENSUTO - Foje iuj enmigrantoj alportis en Aŭstralion iom da "eŭropaj" kunikloj por ilin trankvile bredi surloke. Sed kelkaj kunikloj eskapis el sia kaĝo

kaj ĝoje multiplikis sin en la libera naturo. Tie ili eksterordinare prosperis, ĉar abundis manĝeblaj vegetaĵoj en tre konvena tereno, dum mankis signifaj malamikoj aŭ ĝenaj konkurantoj. La kunikla hordo ŝveliĝis laŭ freneza ritmo kaj baldaŭ okupis la tutan loĝeblan kontinenton. Sed mi ne vidas rilaton inter tiu demografia eksplodo kaj nia temo.

TERANO - Vi tuj komprenos. El tiu ekzemplo (kiu neniel estas unika!) klare evidentiĝas la senbrida reprodukto-kapablo de plejmulto de la specioj. Niaj bravaj kunikloj eĉ estas senkulpaj amatoroj ĉi-rilate. Simple komparu kun la riĉega semo-produktado de multaj plantoj, aŭ kun haringo, kiu disĵetas milionojn da fekundotaj ovoloj en la marprofundo, aŭ kun vulgara muŝo, kiu kovrus la tutan terglobon per kilometrojndika muŝo-tavolo, se ĉiuj ĝiaj ovoloj naskus reproduktkapablan idon kaj tio ripetiĝus dum nur kelkdeko da muŝo-generacioj. Mi eĉ flanklasu virusojn kaj bakteriojn, kiuj frakasas ĉiujn rekordojn, kiam temas pri reproduktado. Kaj tamen, malgraŭ tiu senĉesa premo en ĉiu specio, malgraŭ la impona idaro produktebla disde unu-du individuoj, tamen la vivo sur nia Tero restas pli-malpli konstanta laŭkvante, tio estas, ĝi entute evoluas en dinamika ekvilibro. Kiel solvi tiun antagonismon?

DUBINJA - Per grandskala buĉado, kompreneble! La ĵusnaskitaj haringidoj ja amase malaperas en la faŭkon de atentemaj marbestaĉoj. Kaj nur kelkaj feliĉuloj sukcesas atingi plenkreskan staton por siavice reproduktiĝi... antaŭ ol vendrede ornami proletan teleron!

TERANO - Ekzakte! Similan sorton spertas ĉiuj aliaj specioj. En la libera naturo nur malmultaj plantosemoj atingas fertilan grundon, dum ĉiuj aliaj pereas, ĉu englutitaj de birdoj kaj insektoj, ĉu putrintaj en marĉoj aŭ sekiĝintaj sur malamika tereno. La naturo tiel aŭtomate forigas ĉiujn tronaskitojn. Tiu nocio de eliminaj naturfortoj estas gravega el scienca kaj filozofia vidpunktoj. Darvino estis verŝajne la unua, kiu tion klare konsciis. Vi sendube scias, ke li nomis ĝin *natura selektado* aŭ, pli simple, *natura selekto*.

PENSUTO - Sed kial "selektado" kaj ne "natura eliminado" aŭ "loteria buĉado"? La proceso ja estas blinda kaj sendistinga!

TERANO - Foje rememoru, Pensuto, kion mi antaŭ nelonge rakontis pri la estiĝo de gametoj aŭ seksaj ĉeloj. Vi certe ankoraŭ scias, ke la gametoj produktitaj de unu individuo estas ne identaj inter si, sed diferencas en multaj detaloj. Sekve, ĉe la fekundiĝo la respondaj zigotoj, tio estas la estontaj idoj, kompreneble aperos en sennombraj variantoj, ĉiu kun propra genotipo.

DUBINJA - Momenton! Mia memoro nur limake trotadas post viaj gametoj kaj zigotoj! Kial ne tuj diri, ke inter miloj da haringidoj, naskiĝintaj de la samaj gepatroj, unuj estas pli viglaj ol aliaj, aŭ pli dikaj, pli rapidaj, pli manĝemaj, pli belformaj?

TERANO - Dankon, Nevinjo, viaj haringidoj tuj utilos! Diru foje, ĉu vi opinias, ke ĉiuj havas la saman (matematikan) ŝancon por rezisti la amasbuĉadon kaj fariĝi plenkreskuloj? Ĉu la plej rapidaj ne havas avantaĝon por eskapi siajn

malamikojn? Ĉu la plej viglaj ne akiros sian manĝon aŭ predon pli abunde ol iliaj malpli energiaj kunuloj? Ĉu tiu dotita per la plej akraj sentumoj ne estos la unua avertita pri minaca danĝero?

PENSUTO - Mi ekvidas!... La eliminaj faktoroj, kvankam operante blinde kaj hazarde, postlasas ne kiun ajn parton de la originala idaro, sed *selektitan* sortimenton, kie la plej bone adaptitaj al la medio proporcie pli abundas ol antaŭe! Same, el inter miloj da semoj kuŝantaj sur sekega tereno nur tiuj sukcesos radikumi (kaj poste reproduktiĝi!), kiuj plej bone eltenas la sunardon kaj sekecon, aŭ tiuj, kies ekstera aspekto malplej elstaras sur la natura fono kaj tiel kamufle evitas esti formanĝitaj!

TERANO - Ni tiel konstatas, ke la "natura selektado" efektive selektas, aŭtomate kaj senkompate, nur tiujn, kies fenotipo (tio estas, kies biologiaj kvalitoj) plej bone kongruas kun la ĉirkaŭanta medio. Tio jam parte klarigas la mirindan harmonion en la naturo. Ni prenu kiel ekzemplon la imponajn kakto-plantojn, kiuj izole rompas la monotonecon de la amerikaj dezertoj. Ni admire konstatas, ke tiuj plantoj "inteligente" disponas pri rezerva akvokvanto, dank' al kiu ili sukcese rezistas kontraŭ longdaŭra sekeco, mortiga por aliaj plantoj. Sed ni ne konsideru tion kiel "inventon" de la kakto mem aŭ kiel produkton de iu laŭplane aganta forto, kiu pro kompato aŭ simpatio foje estus dotinta la dezerto-pikulon per akvo-provizujo. Ne! En tiu kazo, kaj en milionoj da aliaj troveblaj en ĉiuj vivoformoj, ni serĉu la klarigon de la preskaŭ perfekta adaptiĝo en la statistika efiko de blinde eliminaj fortoj agantaj sur tiun ekstreme modleblan materion, kiun ni nomas vivo!

He!?... Kiu lasis la pordon malfermita? Ventumas! Nevinjo, ĉu vi bonvolas ĝin...

* * *

Jes, kara leganto, nia triopo nun pludiskutas en fermita rondo! Vere domaĝe, ĉar estus ja interese ankaŭ scii la opinion de Pensuto, kiu kritike alrigardis sian Onklon dum ties monologo. Ĉu vere iu natura selekto sufiĉas por klarigi la sennombrajn mirindaĵojn de la vivo? Dube! Ni risku denove malfermeti la pordon...

* * *

PENSUTO - ...ĉar ĝi estas nur kribrilo, via natura selekto! Kribrilo, kiu tralasas nur la plej taŭgajn, kiu selektas inter jam ekzistanta materialo, sed neniel kapablas ĝin modifi – eĉ malpli perfektigi! Kie ni serĉu la fonton de la nekontestebla progreso videbla en la evoluproceso de ĉiu specio? Aŭ ĉu vi pretendas, ke tiu progreso povis estiĝi sen antaŭfiksita plano? Aŭ, ke la naturo kreas siajn produktojn sen programo?!

DUBINJA - Ĉu mi povas lumigi tiun patoson per banala ekzemplo? En la amerikaj dezertoj ni ankaŭ vidas, ke senbrida erozio kapablas estigi plej strangajn formojn en la rokaro. Nu, mia fraĉjo dubas, ke tiu sama erozio ankaŭ kapablas skulptadi la vizaĝon de Ramseso I... konvene lekante la rokojn!

TERANO - Via argumentado, Pensuto, kaj via elvokiva ekzemplo, Dubinja, havas la meriton klare resumi la problemon. Sed vi ambaŭ fundamente eraras! Mi tamen ĝojas, ke vi ne ĉion forgesis, kion mi foje diris pri la entropio. Efektive, hazarde operantaj naturfortoj ĝenerale ne kapablas krei ordon aŭ "laŭplanajn" strukturojn *en la inerta mondo*. Sed ĉi tie temas pri *viva materio*, kapabla kopii sin mem kaj ĉiam preta por sin reprodukti – jen la diferenco! Kaj se la natura selekto "kribras" kaj "rekribras" iun specion, generacion post generacio, tiam ni povas konstati, ke la meza genotipo iom post iom pliperfektiĝas, do, ke ĝi biologie *progresas*!

PENSUTO - Konkretan ekzemplon, mi petas...

TERANO - Mi sendube ne bezonas klarigi, kio estas penicilino, ĉu?

PENSUTO - Penicilino? Kial miksi ĝin en nian diskuton? Ĉiu ja scias, ke penicilino estas historie la unua antibiotiko, kiu atingis sensaciajn rezultatojn en la lukto kontraŭ ĉiuspecaj bakterioj. Poste oni tamen konstatis, ke ĝi estas malpli mirakla ol tio komence ŝajnis, des pli, ĉar ripetitaj injektoj en la saman organismon laŭgrade perdigas ĝian antisepsan povon...

DUBINJA - ...el kio sekvas, ke la streptokokoj, pneŭmokokoj kaj aliaj kokoj denove gaje multiplikiĝas, eĉ en penicilina suko!

TERANO - Mis! La penicilino *ne* perdis siajn ecojn (ĝi ja restis la sama!), sed la bakterioj de ĝi atakitaj *akiris novajn!* Kaj tiun plifortigitan rezistemon kontraŭ la penicilina efiko ili dankas ne al iu lerta kemiisto en sia mikroba rondo, sed al la mute kaj blinde operanta natura selekto! Ne rigardu min tiel suspekteme, ĉar la klarigo estas simpla kaj natura.

Kiam penicilino unuafoje atakas kolonion de iu bakteriospeco – kiel viaj pneŭmokokoj, Dubinja – tiam ĝi sukcese eliminas plejmulton da ili, eble eĉ ĉiujn. Sed pneŭmokokoj ne estas identaj inter si. Same kiel la gametoj de pli evoluiĝintaj vivuloj ili rezultas de ĉeldivida proceso, kie la originala kromosomaro arbitre dividiĝas inter la du novnaskitoj. Ili tiel havas iomete malsamajn ecojn, do, ankaŭ malsaman rezisto-kapablon kontraŭ la "nekonatan" penicilinon. Sed, se iuj feliĉuloj hazarde kapablas pli-malpli bone alfronti la minacon, ili restos solaj post la hekatombo. Kaj *nur ili* poste reproduktiĝos – sed la nova kolonio estos kvalite malsimila al la unua: en ĝi ja multe pli abundos individuoj kun kontraŭ-penicilinaj ecoj! Se nun...

PENSUTO - Kaptite!... La rezisto-povo, kiu estas escepta en la unua generacio, fariĝas pli ĝenerala en la dua. Kaj en tiu nova generacio, kompreneble, ree devas troviĝi individuoj, kiuj, pro hereda hazardo, disponas pri defendo-mekanismo iom pli taŭga, iom pli perfekta ol tiu de la mezulo. Se nun intervenas nova, eĉ pli forta penicilina atako, ili estos aŭtomate selektitaj kiel postvivintoj.

La rezisto-povo de la tria generacio, do, denove plialtiĝas! Mi agnoskas: en sia medio tiuj pneŭmokokoj efektive spertis biologian progreson... sen helpo de iu mistera, celhava forto!

TERANO - La sama rezonado, karaj genevoj, principe validas por klarigi grandtrajte tiun abundegan faskon da diversspecaj adaptiĝoj, kiun ni povas admiri en la vivularo. Kombinante la efikojn de senbremsa reproduktado, diversiga heredo kaj senkompata eliminado, ni deduktas, ke ĉiu specio aŭtomate pliperfektiĝas, do, evolue progresas ĝis atingo de dinamika ekvilibro kun sia medio. La escepto fariĝas regulo, la hazardo estigas normon – jen la kerno de tiu admirinda proceso!

DUBINJA - Vi permesu, estimataj profesoroj, ke mi enŝovu senkulpan rimarkon en viajn belajn teoriojn. Se mi ne miskomprenis, la heredo-leĝoj miksas la kartojn, dum la natura selekto elpikas prefere la asojn kaj atutojn. Per aliaj vortoj, el jam ekzistanta materialo la naturo selektas kaj kombinas siajn plej sukcesajn produktojn. Sed nenio vere nova kreiĝas! Ĉu vi spite volas kredigi min, ke ekde la balbuta komenco de la vivo, je mikroskopa nivelo, ĝis nia nuntempa dupiedula specio entute nenio inventiĝis? Mi fastos tri tagojn, se vi jese respondos!

TERANO - Ne timu, vi trankvile povos festeni. Ĝis tiu stadio mi ja intence plisimpligis la problemon, por ke vi bone taksu la influon kaj meriton de ĉiu faktoro en la evoluiga proceso. Sed ni ekzamenu nun la gravegan rolon, kiun ludas la mutacioj. Mutacio, kiel ni jam vidis, estas subita ŝanĝo en la transdonota genetika mesaĝo. La genoj, kiuj mutacias, ne plu portas la kodon fidele hereditan de antaŭaj generacioj, sed iun vere novan. Plejofte tiu nova aranĝo en la ADN-molekuloj diferencas nur malmulte disde la originala. Sed foje, kvankam rarege, la mutacio enkondukas revolucian ŝanĝon, ekzemple, kiam ĝi okazas ĉe hierarkie grava geno. Vi eble...

PENSUTO - Lumiĝas!... Je genetika nivelo mutacio reprezentas absolute novan eblecon, esplorindan fare de la natura selekto. Se ĝi hazarde taŭgas, do, se ĝi donas iun avantaĝon al la koncerna vivulo, tiam ĝi estos aŭtomate selektita por resti en la heredeblaj kvalitoj de la specio, same kiel la favoraj geno-kombinoj. Dank' al la natura selekto la mutacioj tiel alportas freŝan sangon kaj novajn ideojn en la genetikan stokon!

TERANO - Kiel vi vidas, la "ideoj", kiuj nutras nian menson, tiuj spontaneaj ekflagroj de nia pensado, havas sian analogion je biologia nivelo. Sed tie haltas la komparo. Ideoj ja estas produktoj de nia konscie kaj senkonscie funkcianta cerbo. Ili ĉiam rilatas al niaj scioj aŭ spertoj kaj ĝenerale entenas prognozon pri la estonteco. Mutacioj, kontraŭe, rezultas de pure hazardaj cirkonstancoj, ĉu pro difektiĝo de la genetika mesaĝo fare de atomradiado aŭ alia energifonto, ĉu pro fuŝa sinkopiado de la genoj, ĉu pro ankoraŭ misteraj aspektoj de la hereda mekanismo. Ili, do, esence estas sencelaj, blindaj, senplanaj. Ne mirige, en tiaj kondiĉoj, ke ili plejofte estas malutilaj kaj baldaŭ malaperas post senkompata selekto.

Sed kelkfoje iu mutacio tamen alportas tujan avantaĝon kaj, kiel vi prave rimarkis, Pensuto, ĝi estas aŭtomate elpikita de la natura selekto, kiu ĝin injektas en la genetikan trezoron. Vi konsentos, ke tiu sukcesa mutacio ne estis "inventita" de iu Gvida Forto nek ke ĝi apartenas al "plano" anticipanta estontan progreson. Ĝi simple estas disonanco, kiu hazarde plibeligas kaj renovigas jam ekzistantan melodion!

DUBINJA - Per aliaj vortoj: al tiu blinda evoluproceso, kiu stumble kaj palpe antaŭenmarŝas, la same blinda natura selekto afable montras la vojon! Nekredeble! Tio pensigas min al pentraĵo de Petro Breughel...

TERANO - La natura selekto efektive estas direkto-dona elemento en la historia evoluo de la vivo. Kaj ĝi estas eksterordinare efika! Sufiĉas, por tion bone kompreni, ke ni faru mensan eksperimenton. Ni nome supozu, ke ekde la komenco de la vivo sur nia Tero *ĉiu* produktita organismo estintus kapabla sin libere reprodukti antaŭ ol mem perei. Tio signifas, ke en tiu imaga mondo la natura selekto ne ekzistus, aŭ, pli ekzakte, ĝi estus senefika antaŭ la reproduktado. En tia mondo, geamikoj, la genetikaj akiraĵoj spertus senliman liberecon kaj la vivo estus naskinta miriadon da plej strangaj estuloj, unuj pli fantaziaj ol aliaj...

DUBINJA - ...kiel la graciaj monstroj de Hieronimo Bosch!

TERANO - Eble! Sed, kiam oni kalkulas la kvanton da tiel produkteblaj, *diversspeciaj* organismoj, oni alfrontas nombron preter ĉiu imagpovo: de 10^{3000} ĝis $10^{4000.000}$! Por komparo: oni taksas la pezon de nia galaksio, la Lakta Vojo, je bagatelaj 10^{45} gramoj!... En tiu infinita kohorto ni ie kaj tie retrovus iun jam konatan specion, kaj se ni havus sufiĉan paciencon, eĉ ĉiujn speciojn aperintajn dum ĉiuj geologiaj epokoj – de bakterio ĝis brontosaŭro, de miozoto ĝis palmo, de muŝo ĝis homo! La tuta tera vivularo, kiun ni tiom admiras pro ĝia senkompara diverseco, estus en tiu halucina amasego eĉ malpli ol sablero en Saharo – sed sablero kun aparta brilo kaj eksterordinaraj kvalitoj!

PENSUTO - Sablero zorge elektita kaj glate polurita dank' al la natura selekto! La natura selekto, kiel mi nun ekvidas, estas mekanismo kapabla elmergi neprobablajn organismojn el la ĥaosaj produktaĵoj de la vivo!

TERANO - Vi plene pravas, Pensuto. Sed ni ankaŭ aldonu, ke la natura selekto konsiderinde *akcelas* la evoluon de la vivo. Per la amasa eliminado de la malpli taŭgaj vivoformoj ĝi ja plifaciligas la renkontiĝon de la elituloj kaj tiel favoras ties reproduktadon.

Resume: la natura selekto ludas unuarangan rolon en la organika mondo. Sen ĝi ni probable ankoraŭ ŝvebus kiel unuĉelaj viveroj en la kapricaj ondoj de monotona oceano!...

* * *

Ni retiriĝu diskrete kaj lasu nian triopon ĉe la bordo de tiu oceano. Eble vi scias, kara leganto, ke foje Neŭtono uzis belan metaforon, en kiu intervenas nemezurebla oceano. Li ja komparis sin kun infano ludanta sur strando, fronte

al vastega maro. De temp' al tempo la tajdo postlasas sur la sablo escepte belan konkon, kiun la infano admire kolektas. Vi certe divenis: tiu oceano reprezentas la naturon kun ĝiaj sennombraj misteroj. La konko estas sekreto senvualigita kaj la infano – sciencisto ravita de sia malkovro.

La natura selekto estas tia konko. Sed en ties labirinta interno ankoraŭ zumas multaj misteraj melodioj...

El ***Senĝenaj dialogoj****. Popularscienca Eldonserio n-ro 4.*
J. Régulo (Stafeto), La Laguna 1971, p. 151-157.

Petar Giunio

ZORGOPLENA PATRO

Ne pasas tago, ke la fiŝistoj ne eltiras el la maro per sia *sejno* kune kun la valora kaptaĵo, ankaŭ marestaĵojn, kiuj ne estas por vendado: diversajn malgrandajn fiŝetojn, krabetojn, markolbasojn kaj marstelojn. Ĉion tion ili simple reĵetas en la maron kiel senvaloraĵon. Al tiaj estaĵoj apartenas ankaŭ la *marĉevaleto* kaj la *maralenoj*.

Kvankam tiuj malgrandaj fiŝoj havas nenian valoron, ĉar ili ne venas en konsideron por nia nutrado, tamen ili estas tre interesaj loĝantoj de la maro, kaj distingiĝas de la aliaj fiŝoj per siaj formoj. Plej volonte ili restadas en la verdaj herbejoj de la marherbo zostero, kie ili trovas nutraĵon kaj kaŝejon, kaj ankaŭ ilia idaro estas tie sufiĉe bone protektata. Estante nek spertaj nek persistaj naĝantoj, kaj krom tio kun tia korpkonstruo, ke ili pene kontraŭstaras la ondojn kaj la marfluon, la herbejoj de la surfundaj marherboj estas por ili la plej sekura restadejo, kvankam ankaŭ tie ekzistas manĝeguloj. Per sia movebla vosto la marĉevaloj povas tre bone alfiksi sin al la folioj de la zostero, kaj la maralenoj kaŝas sin de la malamika rigardo inter tiuj longecaj folioj al ili similantaj.

La marĉevaleto laŭ sia formo diferencas de la maraleno, sed tamen ili ambaŭ havas tiom da komuno, ke oni kune envicigis ilin en la familion de *singnatedoj*. La korpo de ambaŭ estas tegita ne per skvamoj, sed per lamenetoj, kaj ŝajnas, kvazaŭ ili estus vestitaj per kiraso. Ankaŭ la maniero de zorgado pri la idaro estas la sama.

Laŭ la korpoformo la plej okulfrapa estas la marĉevaleto (hipokampo), elstaranta inter ĉiuj aliaj fiŝoj en la maro. Ĝia kapo vere similas al la ĉevala, kaj la tuta animalo multe similas al la samnoma ligna ŝakfiguro. Pro tio ĉi tiu fiŝo ricevis en ĉiuj lingvoj la saman nomon – marĉevaleto. De la aliaj fiŝoj ĝi diferencas ankaŭ laŭ rekta korptenado. La dorsa naĝilo similas al ventumilo, kaj dum naĝado moviĝas tre rapide. La vosto estas kunrulita al la ventro, ne havas naĝilojn kaj servas kiel direktilo kaj alfiksilo. La naĝadon helpas ankaŭ la malgrandaj brustaj naĝiletoj, kuŝantaj malantaŭ la kapo kaj similantaj al oreloj.

La hipokampo certagrade similas ankaŭ al la rampulo kameleono, ĉar ankaŭ ĝi povas ĉiun okulon movi ĉiuflanken kaj same ŝanĝi la koloron de la korpo, por akomodiĝi al la medio. Kiam ĝi estas malsata aŭ timigita, la korpo ricevas pli helan koloron, kaj kiam ĝi estas sata kaj kvieta, ĝi estas malhela. En la tempo de frajado (amekstazo) ĝia korpo metale brilas.

Kiel konate, dum la fekundiĝo plej ofte estas la virbestoj, kiuj ricevas belan edziĝveston kaj tiamaniere, laŭ la beleco, superas la inbestojn. Ni malkaŝu ankaŭ tiun intiman vivoflankon de la marĉevaletoj. Ĉe ili la edziĝveston ricevas la inoj

kaj tiuj estas pli viglekoloraj ol la virbestoj. Plue, la virbestoj transprenas sur sin la plej grandan parton de la zorgoj pri sia idaro. Fakte, la virbestoj zorgas pri la protekto de la idaro ankaŭ ĉe aliaj marfiŝoj, sed tamen ne laŭ la maniero, kiel tion faras la virbestoj de la marĉevaleto.

Dum la nuptotagoj, en la varmaj monatoj de la jaro, la enamiĝintaj paroj interplektiĝas per la vostoj kaj balanciĝas, kvazaŭ ili dancus. Dum tiu tempo al la masklo elkreskas surventre aparta saketo, en kiun la femalo deponas pere de aparta tubeto t. n. elkovejo la malmultnombrajn ovojn, kiujn la virbesto tuj fekundigas. Sed ĉar la saketo devas pleniĝi, la masklo serĉas plurajn inojn, respektive la inoj de si mem aliras la virbestojn kaj enĵetas siajn ovojn en ilian saketon. Tio estas la sola zorgo de la ino pri la idaro. Tiu plenigado de la saketo daŭras tri, kaj eĉ plurajn tagojn. Kiam la saketo estas sufiĉe plena, ĝi fermiĝas per si mem. La virbesto, al kiu la sorto destinis la zorgadon pri la estonta generacio, naĝas plenventre ĉirkaŭe. Dudekon da tagoj post la fekundiĝo la saketo malfermiĝas kaj eloviĝas la malgrandaj marĉevaletoj, apenaŭ duonan centimetron grandaj, sed jam tute similaj al la plenkreskuloj. Kaj eĉ ne rigardante la zorgoplenan patron, ili tuj disiras ĉiuflanken. Ĉiu sekvas sian panakiran vojon en la nova vivo.

Ankaŭ la maralenoj estas interesaj loĝantoj de la marherbejoj. La nomo konformas al ilia eksteraĵo, ĉar tiel longaj kaj maldikaj, kun pinta vostopinto, ili vere similas al aleno. Ankaŭ ĉe ili pri la idaro zorgas la virbestoj, sed anstataŭ saketo ili havas ĉe la suba korpoparto kavaĵon, similan al defluilo. Kiam la inbesto en la defluilon enĵetas la ovetojn, tiuj enĉeniĝas, unu apud la alia, kiel vico da perloj. Tiam la defluilo per apartaj klapoj, troviĝantaj apude, fermiĝas. Ĉe iuj maralenoj, ne havantaj klapojn, la internaj korpopartoj eligas gluecan fluaĵon, kiu kuntenas la ovetojn.

Ĉe la marĉevaletoj kaj maralenoj estas interesa la maniero de ilia nutrado. Ili ne englutas la rabaĵon kiel la aliaj fiŝoj, sed simple ensorbas ĝin. La marĉevaleto unue elpremas el la buŝkavo la akvon, kaj alproksimiginte sian makzeleton tute ĝis la kankreto aŭ vermeto subite malfermas ĝin kaj tiamaniere, kune kun la marakvo, ensorbas ankaŭ la frandaĵon.

El Sekretoj de la marestaĵoj. Kroatia Esperanto-Servo, Zagrebo 1960, p. 55-57.

Marinko Ĝivoje

POMPEJO – URBO PERDITA SED RETROVITA

Antaŭ preskaŭ 19 jarcentoj malaperis la urbo Pompejo, ŝtoniĝinta age de la erupcio de vulkano Vezuvio. La katastrofo, okazinta en la jaro 79 estis terurega, sed jam Gœthe substrekis, ke preskaŭ eĉ ne unu natura katastrofo alportis al la scienco tiom da ĝuo kiom ĝuste tiu ĉi. La urbo ne estis detruita, sed, dank' al tiu katastrofo, ĝi fariĝis la plej fidinda atestanto pri iu romana urbo el la unuaj jaroj post Kristo.

La malkovro de Pompejo havas vere tre gravan signifon. Pere de ĝi ni konatiĝis ne sole kun la aranĝo de klasikepoka urbo, ĝia arkitekturo kaj interna aranĝo de domoj, sed ankaŭ kun multaj detaloj el la vivo socia, komerca, ekonomia kaj privata. La urbo eminentis per vigla vivo komerca kaj industria, en kiu superregis la profesioj gastejista, bakista, ledista kaj ŝamista.

Unue ni konatiĝu iomete kun la situo de Pompejo kaj ĝia historio. Pompejo troviĝas 24 km de Napolo. La grekdevena origino de la urbo datiĝas el la sesa jarcento antaŭ Kristo. Komence ĝi estis malgranda vilaĝo, loĝata de terkulturistoj kaj paŝtistoj. La unuaj enloĝantoj estis Oskoj, de kiuj konkeris la urbon Samnitoj en la jaro 424 antaŭ Kristo. En samnitaj militoj Pompejo batalis kontraŭ Romanoj; tamen fine ĝi estis de ili venkita. Dum la periodo de Sulo, ĝi fariĝis tute romana urbo. Riĉaj Romanoj konstruis tie multajn ĉarmajn villojn. La unua eminentulo pri kiu ni scias, ke li tie konstruis sian kampodomon estis Cicerono. La roma imperiestro Klaŭdio havis en Pompejo somerdomon, en kiu li perdis la filon Druso, sufokmortiĝintan de piro (li kutimis ĵetadi aeren pirojn kaj enbuŝe kapti ilin). Ekster la urbo ĉirkaŭita per remparoj kun dek du kasteloj, en longo de pli ol tri kilometroj, ekestis ankaŭ la antaŭurboj. Oni povas taksi la nombron de loĝantoj de Pompejo meze de la unua jarcento p.K. je 25 000. Post tio proksimiĝis la fino de floranta urbo: en la jaro 68 Pompejo estis surprizita de terura tertremo kiu preskaŭ tute ruinigis la urbon. Tamen Pompejo releviĝis el ruinoj kaj estis konstruitaj eĉ novaj temploj kaj privataj domoj preskaŭ ĉiuj renovigitaj. En la momento de la katastrofo okazanta 16 jarojn poste, la renovigo de la urbo tamen ne estis jam finita. Dank' al tiu fakto oni povas bone sekvi la evoluon de la urbo laŭ ties detruaĵoj en la daŭro de pli ol tri jarcentoj. Tiamaniere oni povas sekvi novajn konstrutendencojn enigitajn en novekonstruitaj loĝobjektoj. Estas grava fakto, ke la urbo kuŝis sur la loko, kie renkontiĝis du mondoj: la romana kaj la greka.

Antaŭ ol priskribi la katastrofon indas priskribi Vezuvion, la solan aktivan vulkanon de kontinenta Eŭropo, kiu kaŭzis la katastrofon. Leviĝante en distanco proksimume 14 km oriente de Napolo kaj 6 km de la marbordo super la ebenaĵoj

de Kampanio, ĝi estas proksimume 1 300 metrojn alta. Post ĉiu erupcio ĝiaj alto kaj formo ŝanĝiĝas: en la jaro 1906, antaŭ la vulkana elsputo, ĝia plej supra pinto troviĝis en alto de 1 330 metroj, sed post la erupcio malaltiĝis al nur 1 260 m. Do, konsiderinda diferenco: 70 metroj. La ĉefa faŭko de la vulkano estas 200-300 metrojn profunda kaj proksimume 500 metrojn larĝa.

Kaj nun kelkajn vortojn pri la erupcioj de Vezuvio.

Forta erupcio okazis la 6-an de novembro 472, la cindro deflugis ĝis Konstantinoplo kaj Tripolio. Tre aktiva estis Vezuvio en la jaroj 1036-1038. Sekvis preskaŭ 600-jara periodo de trankvilo. En la jaro 1631 terura cindro-erupcio dezertigis la vastan ĉirkaŭaĵon. La fluego de lafo, tiu fandita varmega materio kiu eliĝas el vulkanoj kaj solidiĝas malvarmiĝante, enverŝiĝis kun grandega rapideco en la maron. Fortega erupcio okazis jarfine 1760, 1779, 1794, kiam la vulkana konuso mem estis aeren ĵetita kaj kiam la fluego de lafo tute ruinigis Torre del Greco kaj kelkaj miloj da homoj perdis la vivon. Dum la erupcio en la jaro 1872, la konuso de Vezuvio pro terura eksplodo duiĝis de supre ĝis sube: ŝtonegoj elfluadis, konsistigante montetojn ĝis 100 metrojn altajn. Lafa fluego mortigis multajn homojn kiuj ne povis saviĝi per forkuro. Tamen la observejestro Palmieri, ĉirkaŭita de lafo, kuraĝe eltenis sur sia loko. Sendube oni devas atendi erupciojn de Vezuvio ankaŭ en la estonto.

Pri la lastaj momentoj de Pompejo restis al ni kelkaj tiutempaj informoj. Ĉiuokaze la detrua okazintaĵo surprizis ĉiujn loĝantojn de tiu regiono kiuj konsideris Vezuvion jam estingiĝinta vulkano. En la jaro 63 p.K. okazis forta tertremo kiel fatala admono, kaj Vezuvio denove aktiviĝis. La centro de tiu tertremo estis ĝuste la urbo Pompejo. Riĉaj civitanoj dum mallonga tempo renovigis konsiderinde difektitan urbon. Sed la plej detrua estis la erupcio okazanta 16 jarojn poste kaj komenciĝanta la 24-an de aŭgusto 79 p.K. Viktimoj fariĝis la urboj Pompejo, Herkulano kaj Stabio. La katastrofo okazis subite kaj daŭris tri tagnoktojn. Ĝi kaŝis Pompejon por homa okulo por preskaŭ du miljaroj. La okazintaĵon oni povas envicigi inter la plej grandaj katastrofoj kiuj iam trafis la homaron. Estis tia amaso da vulkanpolvo ke parto atingis eĉ Afrikon kaj Egiptujon.

La katastrofon priskribas tre detale Plinio la juna en sia letero al historiisto Tacito. La verkisto troviĝis dum la ekesto de la katastrofo ĉe sia onklo, konata natursciencisto, Plinio la maljuna, kiu cetere estis komandanto de la militŝiparo en Miseno. En sia letero li celas ne priskribi detale la katastrofon, sed la pereon de sia eminenta onklo.

Tagmeze de la jam menciitaj tago kaj jaro Plinio la maljuna estis informata pri subita katastrofo de Herkulano kaj avertata ke la loĝantoj povas savi sin nur per forkuro al la maro. Li kiel admiralo devis tuj marveturi al Herkulano por savi tiujn kiuj ankoraŭ estis saveblaj, sed la patrino de Plinio la juna atentigis lin pri la nubo strangforma kaj granda. Pro scivolemo li supreniris iun monteton por povi pli bone rigardi la vidaĵon. En la fono oni ne povis tuj rimarki de kiu

monteto leviĝas tiu nubo, sed poste oni konstatis ke temas pri Vezuvio. Li komparas tiun nubon kun pinio, ĉar ĝi leviĝis kvazaŭ ia arbo ĝis certa alteco kun etenditaj branĉoj ĉe la supro. Plinio rakontas ke tiun teruran tagon malheliĝis post la tagmezo kvazaŭ estus la nokto, kaj nur la fulmoj ekbrilis en la timiga mallumo, dume la alten ondanta maro kaj uragano plenigis la spacon per timegiga bruo, kaj la faŭko de Vezuvio estis elsputeganta lafon kaj ŝtonetojn.

Plinio la maljuna enbarkiĝis kaj klopodis alproksimiĝi al la bordo ĉe Herkulano, sed la maro estis malkvieta tiagrade, ke li ne povis albordiĝi. En tiu momento montriĝis sur Vezuvio kelkloke grandegaj flamoj. Plinio albordiĝis en Stabio por iomete ripozi, sed baldaŭ li devis forlasi la domon ĉar en la korto kolektiĝis ĉiam pli kaj pli grandaj amasoj da cindro, minacantaj superŝuti la elirejon. Same kiel multaj aliaj loĝantoj de Stabio kaj Pompejo tiel ankaŭ li eliris sur la straton, fiksis per ŝnuro kusenon surkapen por eviti mortigajn trafojn de falantaj ŝtonoj. La tero komencis eligi gasojn kaj flamojn kaj Plinio tie trovis la morton.

La maro retiriĝis de la marbordo kaj marestaĵoj restis sur la tero. Baldaŭ la fatala nubo malleviĝis sur la teron kaj maron. Komencis eĉ pluvi. Plinio la juna priskribas la ploron kaj ĝemadon de virinoj kaj infanoj. La cindro de Vezuvio ekstermis ne sole multajn homojn sed ankaŭ birdojn kaj fiŝojn.

La katastrofo atingis Pompejon ĝuste en la momento kiam la loĝantaro amuziĝis en la teatro. La plej granda parto de la loĝantoj saviĝis per forkuro, sed multaj ne forlasis la domojn tiel rapide, volante kunporti almenaŭ la pli valorajn juvelojn kaj monon. Tiel okazis ke preskaŭ 2 000 homoj, kiom ni scias ĝis nun, perdis tie la vivon.

Eĉ la plej eta postsigno ne restis sur la tersupraĵo post la katastrofo de Pompejo; oni poste eĉ ne sciis la lokon, kie troviĝis la malbonŝanca urbo.

En la jaro 1738 edziniĝis Maria Amalia Kristina, filino de Aŭgusto la tria de Saksio, kun Karlo la tria Burbona, reĝo de ambaŭ Sicilioj. Promenante en la parko de napola kortego ŝi entuziasmiĝis pri la statuoj kiujn en la jaro 1737 trovis generalo Elboeuf sur la tereno damaĝita de erupcio. Por kontentigi ŝian interesiĝon la reĝo instigis en la jaro 1748 serĉadon de monumentoj en ĉirkaŭaĵo de Herkulano. La tasko estis komisiita al Roko Joakimo de Alenbierra, komandanto de pioniraj trupoj, kiu oficiale ekis la elfosadon, kaj la fakan gvidadon transprenis markizo Marcelo Venuti, direktoro de la Reĝa biblioteko. Ek de la jaro 1860, kiam la elfosadoj estis komisiitaj al eminenta scienculo Giuseppe Fiorelli, oni komencis renovigi la urbon laŭsisteme. Fiorelli fiksis la domblokojn (*insulæ*), kiujn li elfosadis tavolon post tavolo.

Iom post iom aperis la urbo Herkulano, kiu kuŝis sub 20 metrojn dika laftavolo. Post dek jaroj oni ekŝovelis en Pompejo, kie oni malkovris la murpentraĵojn kaj mortintojn kun ormoneroj. Sed oni superŝutis la funelformajn truegojn kaj oni komencis elfosi aliloke serĉante monon sed ne la monumentojn. Nur ekde la jaro 1754 komenciĝis sistemaj elfosadoj kaj en la jaro 1757 Valetta publikigis la libron pri la elfosadoj kiun la reĝo premiis. Aperas Winckelmann

kiu ricevas permeson viziti la reĝan muzeon, sed ne la permeson skizi la artaĵojn. Bonŝance en la monaĥejo kie li loĝis li konatiĝis kun influhava Patro Piaggi, kiu helpas lin en liaj klopodoj. La unua verko de Winckelmann bolekscitas la kortegon. Pluraj liaj asertoj estis malĝustaj, la konkludoj tro aŭdacaj. Tamen li faris ordon en ĝis tiam reganta kaoso, li enkondukis sciencon anstataŭ legendoj.

Pompejo malrapide prezentiĝas al la taglumo. Dum du jarcentoj la homa mano klopodas senvualigi tiun grandegan tombejon kiu siatempe estis floranta urbo. Ĝi allogas multnombrajn generaciojn de arkeologoj kaj arthistoriistoj, krome amasojn da vizitantoj kiuj deziras ekkoni la klasikepokan vivon, de kiu multegaj postsignoj tie konserviĝis.

Kion fakte donas al ni tiuj elfosadoj? Ili kompletigas, pliklarigas kaj konfirmas la sciigojn postrestintajn de antikvaj aŭtoroj. Ili donas al ni tiom da detaloj, gravaj por rekonstrui eĉ tiun plej simplan ĉiutagan vivon de riĉuloj kaj malriĉuloj. La tavolo kovranta la ruinojn de Pompejo estas kelkloke 7 ĝis 9 metrojn dika; ĝi apartenas al ununura erupcio el la jaro 79. Por povi poste pli bone kompreni la aliajn aferojn ni memorigu, ke komence sur la urbon falis tavolo de pli-malpli grandaj ŝtonetoj (*lapilli*), kiuj kovris ĝin per tavolo proksimume 2-3 metrojn alta, kaj poste, super tiu tavolo Vezuvio ŝutegis la cindron kiu post miksiĝo kun akvo preskaŭ ŝtoniĝis. En tiu ĉi dua tavolo de vulkanpolvo la laboristoj trovis en la jaro 1863 truojn en kiuj iam kuŝis kadavroj. La gvidanto de elfosadoj alvenis al la ideo plenigi tiujn truojn per fandita gipso. Kiam la gipsa maso hardiĝis, oni deprenis la cindron. La gipsokopio malkovris kortuŝajn scenojn: la tuta familio, patro, patrino kaj du filinetoj kun dolorplena mieno kuŝis samloke sufokitaj. Tiamaniere oni trovis multajn personojn aŭ bestojn en tia pozicio en kia ili trovis la morton. Ekzemple oni trovis truojn en kiuj iam staris enkatenitaj hundoj ne povintaj disrompi la ĉenojn. Kaj oni faris gipsokopiojn, fidelajn al la originaloj, kiujn oni ekspoziciis en la Pompeja muzeo.

Ni detalumus, se ni nun priskribus ĉiujn luksajn konstruaĵojn elfositajn en la tri urboj. Ni preterlasos la plej antikvan monumenton konservitan en Pompejo – dorikan templon, konstruitan en la 6-a jarcento, la amfiteatron, kiu povis gastigi 20 000 homojn. Ni preterlasos ankaŭ teatrojn, templojn, bazilikojn, forumojn, banejojn, akveduktojn, arkaĵojn, bazaron kaj multajn elstarajn publikajn kaj privatajn domojn. Ni priskribos skize nur la antikvan romanan domon.

Pere de Vitruvio ni jam estas bone informitaj kiel aspektis malnovromana domo, sed tamen ni ne povis tiel fidinde rekonstrui ĝin, ni ne povis imagi al ni kiel ĝi estis meblita ĝis ni trovis tiel belajn ekzemplojn en Pompejo. Ĝi estis ortangulo, kies malpli longa latero (ĉe la strato) estis en la fronto kun enirejo en la mezo. Ofte ambaŭflanke troviĝis butikoj. Mallarĝa koridoro (*vestibulum*) kondukis al la pordo, per kiu oni tra *fauces* eniris en atrion – internan kvarangulan korton. La korto estis lumigata tra truego en tegmento (*compluvium*), tra kiu la akvo malsuprenfluis en marmoran basenon (*impluvium*).

Ĉirkaŭ la atrio estis ĉambroj (*cellæ*), uzataj kutime kiel dormoĉambroj. En la lasta el ili ofte estis lokitaj la vaksmodlitaj portretoj de praavoj.

El atrio oni enpaŝis en la akceptejon (*tablinum*) kie la dommastro akceptadis siajn gastojn; tiuj du ejoj estis apartigitaj per kurtenoj. Post la akceptejo estis ĝardeno, ĉirkaŭita per kolonaro (*peristylium*). Ĉirkaŭe estis diversaj ĉambroj: kuirejo (*culina*), manĝejo (*triclinium*), dormejoj (*cubicula nocturna, c. diurna*), banejo (*tepidarium, caldarium, frigidarium*). Malantaŭe, post la kolonaro estis eleganta salono (*exedra*). Iam romana domo havis ankoraŭ apartan ĝardenon post la peristilo (*viridarium*). La garddioj de la hejmo ne havis ĉiam propran sanktejon kaj ofte devis kontentiĝi eĉ pri kuirejo aŭ pri statuetoj ie en la niĉo. En la supraj ĉambroj (*cœnacula*) loĝis kutime la sklavoj aŭ la posedantoj de la butikoj. La plankoj konsistis el lignaj tabuloj aŭ brikoj, en pli riĉaj domoj ofte el mozaiko. La murojn de domo oni ornamis per freskoj aŭ mozaikoj. Pri la formoj oni ne tro zorgis; ilia arkitektura ornamo estas preskaŭ tute malzorgita. Ankaŭ estas malmulte da fenestroj, ĉar romana domo estis provizata je lumo per atrio kaj peristilo. La ĉefa konstrumaterialo de tiuj domoj estis brikoj (*later coctus*).

La vestaĵojn, objektojn de la ĉiutaga uzo ktp. ni ne mencios ĉi tie. Cetere ekzistas kelkaj miloj da diversaj tiaj objektoj, havantaj apartajn nomojn, kiujn la arkeologo devas bone koni. Kiam oni post jarcentoj elfosis la urbon oni trovis monon en butikaj tirkestoj, panon en fornoj kaj sur la muroj de la domoj afiŝojn por la sekvonta cirka prezentado, kiu neniam okazis, ĉar ĝin malebligis tute alispeca prezentado kiun neniu atendis.

Oni trovis sur la muroj ankaŭ surskribojn de enamiĝintoj, same kiel ni tion trovas nuntempe en urboj kaj vilaĝoj. En Pompejo estas trovita ekzemple jena surskribo: "Romula estis ĉi tie kun sia Stafilo." Sed ŝajnas, ke tiu Stafilo ne estis tute fidela al ŝi, ĉar iom pli malproksime li surmure eternigis la rememoron al feliĉaj momentoj pasigitaj apud iu Kvieta!

La ĉefa ornamo de romana domo estis surmuraj pentraĵoj, kies enhavo kelkloke estas parte aŭ tute malĉasta (ekz. en "domo de Faŭno" kaj en t.n. "domo de amo" kiu troviĝas en Strada del Lupanare, tiel nomita laŭ certa domo en ĝi lokita).

Ni finu per kelkaj lastatempaj elfosadoj. Jam de la jaro 1924 Amadeo Majuri, la ĉefa direktoro de la elfoslaboroj inter la du mondmilitoj, postulis ke oni subtenu la laborojn por la periodo de minimume 50 jaroj. En la jaro 1952, 300 dungitoj laboris en Pompejo, elterigante per maŝinoj, kamionoj, ŝoveliloj kaj pioĉoj la mortintan urbon, kiu ŝtono post ŝtono daŭre plivastiĝas. Aperis novaj domoj kun surmuraj freskoj dum tiu grandioza arkeologia entrepreno. Dank' al abunda monhelpo (konsistanta el unu miliono da dolaroj) flanke de Usono kaj dank' al financa subteno de itala "Fonduso por la Sudo", la elfosadojn ĉesigitajn antaŭ 30 jaroj oni tiam daŭrigis denove. Necesus du jarcentoj por malkovri ankoraŭ 2/5 de Pompejo, urbo perdita sed retrovita.

*El **Interesa arkeologio**. Sennacieca Asocio Tutmonda, Parizo 1973, p. 23-30.*

Edward L. Johnson

INTERNACIAJ GEEDZIĜOJ KAJ PRIVATA INTERNACIA JURO

En la ordinara senco de la vorto, la internacia juro rilatas al la juraj interrilatoj de la diversaj landoj, tio estas, de la diversaj nacioj, aŭ ŝtatoj en la politika senco. Tamen, ekzistas alia speco de internacia juro, la privata internacia juro, kies ekzisto mem ofte estas nekonata de personoj, kiuj ne estas juristoj. La privata internacia juro, do, ne rilatas al la aferoj de ŝtatoj, sed al la aferoj de privatuloj, individuoj aŭ firmoj, kies aferoj, komercaj, heredaj, aŭ eĉ sentimentaj, ne ĉiam estas limigitaj inter la limoj de unu nacia ŝtato: – aŭ, pli precize, inter la limoj de la efika tereno de unuopa jura sistemo, aŭ leĝaro. Plej ofte, kompreneble, la politika ŝtato kaj iu leĝaro havas la saman teritorion: ekzemple, la sveda juro validas kaj efikas ĉie en Svedujo, sed nenie ekster Svedujo; sed en kelkaj landoj estas diversaj leĝaroj por diversaj specoj de enloĝantoj, diversaj leĝoj por diversaj religianoj, almenaŭ en tiuj fakoj de la juro kiuj rilatas al privataj kaj personaj aferoj, kiel edziĝo, adopto de infanoj, heredo, k.t.p. En Hindujo ekzemple estas unu juro por Hinduoj, alia por Islamanoj.

Kaj en aliaj landoj la leĝoj varias laŭ la distrikto aŭ provinco: en Kanado ĉiu provinco havas sian propran juron, same kiel ĉiu ŝtato de Usono, kvankam Kanado kaj Usono mem estas ŝtatoj en la internacia senco. Same estas en Britujo: ankaŭ Britujo estas ŝtato, sed – por nenion diri pri apartaj insuloj kiel Man kaj la Ŝanelinsuloj – estas eĉ en Britujo du malsimilaj juroj aŭ leĝaroj; la angla juro kaj la skota juro. Ĉar Skotlando havas apartan juron, kvankam ĝi ne havas apartan parlamenton, kaj la skota juro, simile al la leĝaroj de multaj eŭropaj landoj, estas bazita sur la romana juro. Pro tio skota juristo povas interkompreniĝi multe pli facile kun kontinenta eŭropa juristo ol angla juristo povas, ĉar en Anglujo la romana juro havis preskaŭ nenian influon.

Do, ni komprenu ke internacia edziĝo, por juristoj kiuj traktas la privatan internacian juron, signifas edziĝon inter du individuoj kies personaj leĝoj estas malsamaj, eĉ se ili apartenas al la sama politika ŝtato. Do laŭ la vidpunkto de privata internacia juro la edziĝo de anglo kun skotino estas internacia edziĝo tute same kiel edziĝo de anglo kun francino: la jura problemo estas precize la sama.

Mi diris, "laŭ la vidpunkto de privata internacia juro" kaj necesas insisti pri ĉi tiu punkto, ĉar laŭ politika vidpunkto aŭ laŭ la vidpunkto de la publika internacia juro, la edziĝo de anglo kun skotino, aŭ de viro el Texas kun virino el Louisiana ne estas internacia afero; ĝi rilatas nur al Britujo, aŭ al Usono. Do, kio estas tiu privata internacia juro, kies vidpunkton ni devas akiri por la momento? Mi diru tuj, ke ĝi *ne* estas parto de la publika internacia juro, kaj nur

tre malofte venas al la Internacia Kortumo en Hago demandoj aŭ problemoj de privata internacia juro. La privata internacia juro do ne estas speco de publika internacia juro, aplikata de internaciaj tribunaloj, sed, kontraŭe, la aplikado de privata internacia juro apartenas al la naciaj kortumoj de ĉiu lando.

La privata internacia juro do traktas privatajn jurajn aferojn en kiuj estas iu ajn eksterlanda aŭ internacia elemento, ekzemple, internaciaj kontraktoj, kontraktoj inter privatuloj aŭ firmoj en diversaj landoj, import- kaj eksport-kontraktoj, aŭ la heredo de posedaĵoj de personoj kiuj havas posedaĵojn en diversaj landoj. Sed la privata internacia juro ne estas sistemo de reguloj, disponebla por la traktado de la afero, sed kontraŭe, ĝi nur indikas la leĝon, la nacian leĝaron, kiun la kortumo devas apliki. Ne kredu ke la kortumoj de iu ajn lando ĉiam traktas ĉiajn procesojn laŭ sia propra juro, ke angla kortumo ekzemple ĉiam juĝas procesojn laŭ la angla juro: ne, ofte estas okazo kiam kortumo en iu lando devas apliki la juron kaj la leĝojn de aliaj landoj. Ekzemple, se franco, aŭ italo, – aŭ skoto, ĉar laŭ nia vidpunkto la skotoj ankaŭ estas eksterlandanoj – mortas, kaj lasas posedaĵojn en Anglujo, la disdono de tiuj posedaĵoj estos laŭ la franca, aŭ la itala, aŭ la skota leĝo respektive, sed ne laŭ la angla leĝo: kaj se estas disputo inter la familianoj de la mortinto pri la disdono de la heredaĵo, la angla kortumo juĝas la aferon ne laŭ la angla leĝo, sed laŭ la persona leĝo de la mortinto, franca, itala, aŭ skota. En tiu okazo, la angla juĝisto simple aplikas la indikitan eksterlandan leĝon.

Tamen, estas aliaj okazoj kiam la aplikenda leĝo, la leĝo kiu devus decidi la aferon, ne estas memevidenta – se estas kontrakto pri la importo de varoj el Francujo en Anglujon, kaj estas disputo inter la franca vendisto kaj la angla aĉetanto, laŭ kiu leĝo oni devas decidi la disputon: laŭ la franca leĝo, kiel la leĝo de la franca vendisto, aŭ laŭ la angla leĝo, la leĝo de la angla aĉetanto? Eble la rezulto de la proceso dependos de tio. Al tiu demando ne estas simpla respondo, mi diros nur ke se ne estas forta kontraŭa indiko en la kontrakto aŭ en la cirkonstancoj, kontrakto estas reguligata laŭ la leĝo de la lando en kiu ĝi estas plenumota; ni povas rigardi tiun problemon rilate al la temo de tiu ĉe prelego, la internaciaj edziĝoj.

Antaŭ edziĝo estas fianĉiĝo. En kelkaj landoj fianĉiĝo validas kiel leĝa kontrakto, en aliaj landoj ĝi estas nur socia aranĝo sen leĝa efiko, sed mi supozas ke ĉiu scias, ke en Usono kaj en Anglujo, fraŭlino kies fianĉo rifuzas edziĝi kun ŝi rajtas procesi kontraŭ li en kortumo por ricevi monan kompenson. Tiu scio estas necesa por la kompreno de usonaj filmoj, en kiuj tiaj procesoj ofte estas prezentataj.

Internacia fianĉiĝo do estas fianĉiĝo inter du personoj kiuj apartenas al diversaj landoj, aŭ al diversaj juroj. En angla kortumo antaŭ kelkaj monatoj estis sensacia proceso rilate al internacia fianĉiĝo kaj pri tio multon skribis la anglaj ĵurnaloj – kies legantoj avide legas ĉiujn detalojn pri tiaj procesoj. Tiun proceson nomis la ĵurnalaro "La Proceso de la Virgulino de Ateno" (aŭ "de la Junulino de

Ateno", la angla vorto *maid* estas dusenca). La faktoj de tiu proceso estis, ke angla oficiro renkontis, dum la liberiĝo de Grekujo, grekan fraŭlinon, tre belan – laŭ la ĵurnaloj – kaj fianĉiĝis kun ŝi. Estis konsentite kaj aranĝite inter ili, ke ili geedziĝos en Grekujo, en Ateno, kaj post la edziĝo ili kune veturos al Anglujo, kie estos la definitiva geedza hejmo. Tamen, post iom da tempo la angla oficiro revenis al Anglujo, kie li enamiĝis al angla fraŭlino, kaj li rifuzis edzinigi la "junulinon de Ateno"; en la lingvo de juristoj, li rifuzis plenumi sian kontrakton, li rompis la fianĉecon, kaj la atena belulino procesis kontraŭ li en angla kortumo. Nu, laŭ la angla leĝo ŝi rajtis pri granda monsumo kiel kompenso pro la rompita kontrakto; tamen, la greka leĝo ne estas tiel indulgema al fraŭlinoj kun rompitaj koroj. Laŭ la greka leĝo, certe, fianĉiĝo validas kiel leĝa kontrakto, sed laŭ greka leĝo, ŝi ne rajtis al sumo da mono kiel kompenso pro rompita koro, sed nur al repago de la mono kiun ŝi elspezis por necesaĵoj por la edziniĝo, por edziniĝa robo k.t.p. Do la jura demando – kaj pri ĉi tiu kompreneble la ĵurnaloj nenion skribis – la jura demando estis, ĉu oni devas apliki la anglan, aŭ la grekan leĝon? Kiu leĝo reguligas la kontrakton, ĉar kontrakto ĝi estis, kaj laŭ la angla kaj laŭ la greka leĝo.

Nu, en internaciaj kontraktoj la kontraktantoj rajtas indiki en la kontrakto mem la leĝon kiu devas reguligi ĝin, kaj en komercaj kontraktoj, en import- kaj eksportkontraktoj ofte estas sekcio kiu indikas ĉu la juro de la vendisto aŭ de la aĉetanto devas reguligi ĝin, kaj certe enestas tia sekcio se la kontrakto estas redaktita de juristo. Sed la angla oficiro ne estis juristo, kaj kiam li fianĉiĝis kun la junulino de Ateno, li tute forgesis indiki, ĉu la fianĉiĝo estas laŭ la angla aŭ laŭ la greka leĝo. Eble en tiaj cirkonstancoj nur juristo memoras ke li tion indiku. Do, la kontraktantoj ne indikis la aplikotan leĝon, kaj la juĝisto devis decidi ĉu apliki la anglan aŭ la grekan leĝon. La regulo de privata internacia juro rilate al kontraktoj sen indiko pri la aplikota leĝo ĝenerale estas, ke oni devas apliki la leĝon de la lando en kiu la kontrakto estis plenumota, kaj tiu regulo validas por la komercaj kontraktoj kaj ankaŭ por la sentimentaj. Do, la leĝo de la lando de la plenumiĝo – de la intencita plenumiĝo, – devus esti aplikota, sed estis plua demando: ĉu tiu lando estis Grekujo, kie oni intencis soleni la edziĝon, ĉar oni povas argumenti ke plenumiĝo de fianĉiĝo estas edziĝo: aŭ ĉu ĝi estis Anglujo, la lando en kiu la fianĉparo intencis krei sian hejmon, kie ili intencis loĝi kiel geedza paro? La juĝisto decidis, ke estis Anglujo, kiel la lando de la proponita geedza hejmo, de la proponita edza domicilo. La rezulto estis, ke oni aplikis la anglan leĝon, kaj la Junulino de Ateno ricevis treege grandan monsumon; la kompenso ne estis limigita al ŝiaj elspezoj, kiel postulas la greka leĝo.

Mi citis tiun proceson tiel detale pro du kialoj: unue, por doni al vi ideon pri la speco de problemo kiun traktas la privata internacia juro, kaj, por tiel diri, pri la pensmaniero de la fakanoj en tiu juro; kaj due, por montri la gravecon, en privata internacia juro, de la geedza hejmo, de la edza domicilo. Se estas demando, se estas dubo, kiu leĝo estas aplikota, ĝenerale estas la leĝo de la lando

en kiu estas la edza domicilo. La rajtoj inter si de geedzoj ĝenerale dependas de la leĝo de la lando de ilia domicilo, tio estas la lando pli koncernita.

Nu, mi parolis pri fianĉiĝo; ni nun konsideru la edziĝon mem. Je okazo de internacia geedziĝo, la soleno de la edziĝo kompreneble efikas por krei la staton de laŭleĝa geedzeco, sed estas la demando, ĉu edziĝa soleno en iu ajn loko, ĉie validas, aŭ en aliaj vortoj, eĉ se la solena ceremonio estas akceptita kiel sufiĉa en unu lando, ĉu ĝi ankaŭ necese validos kaj efikos en aliaj landoj? Kaj oni povas respondi: Ĝenerale, jes; edziĝo ie ajn, validas ĉie. Estas kelkaj esceptoj – en juro ĉiam estas esceptoj – sed ili ne estas tre gravaj, kaj tiu problemo ne ofte okazas en la praktiko, ĉar kutime antaŭ la ceremonio la geedzoj igas sin informataj pri la valideco de la solena ceremonio en la alia lando, kaj se tio necesas, okazas du ceremonioj. La esceptoj de la ĝenerala regulo, ke edziĝo en iu ajn loko, ĉie validas, ne estas multnombraj aŭ gravaj. Tamen, povas okazi, ke viro kaj virino estas laŭleĝe geedzoj en unu lando sed ne en alia. Plej ofte tio estas la rezulto de eksedziĝo, aŭ de nuligo de la geedzeco; kaj se estas vere, ke edziĝo ie ajn ĉie validas, la malo ne estas vera, eksedziĝo en iu loko, tre ofte ne ĉie validos. Eksedziĝo estas alia temo; sed mi citos okazon rilate al nuliĝo de edziĝo por montri kia estas la problemo.

En preskaŭ ĉiuj landoj estas leĝo, ke neplenaĝulo ne rajtas edziĝi sen la konsento de siaj gepatroj, aŭ de sia kuratoro aŭ de iu funkciulo kompetenta. Do, preskaŭ ĉiu lando havas leĝon de tiu speco, sed la leĝa rezulto de malobeo al tiu leĝo varias en diversaj landoj. En kelkaj landoj edziĝo de neplenaĝulo sen patra aŭ alia konsento estas simpla nulaĵo, ĝi havas nenian leĝan efikon, tio estas, simple ne estas edziĝo. En aliaj landoj, Francujo ekzemple, la gepatroj de la neplenaĝulo rajtas nuligi la edziĝon, se ili deziras tion fari; se ili ne faras tion, la edziĝo restas valida. En aliaj landoj, Anglujo ekzemple, la edziĝo ĉiam validas kaj ne estas nuligebla pro manko de patra konsento: la neplenaĝulo kiu edziĝas sen patra konsento estas punebla de kriminala kortumo, ĉar se li efektive sukcesis edziĝi, estas memevidente ke li trompis la solenantan funkciiston kredigante aŭ ke li estas plenaĝulo aŭ ke li havas gepatran konsenton. Sed, kvankam li estas punebla pro tiu trompo laŭ la kriminala leĝo, la edziĝo validas.

Nun vidu ni la rezulton de tiaj diversaj naciaj leĝoj en la privata internacia juro. Por preni ekzemplon – franca neplenaĝulo venas al Anglujo kaj per ia trompo pri sia aĝo, aŭ eble per falsita patra konsento, sukcesas edziĝi kun angla fraŭlino. Pro la trompo, kia ajn ĝi estis, ekzemple malvera deklaro pri sia aĝo, li estas punebla de angla kortumo, sed eĉ se li estas kondamnata al puno de angla kriminala kortumo, la edziĝo validas laŭ angla leĝo. Laŭ la franca leĝo, liaj gepatroj, kies konsenton li bezonis por edziĝo, sed ne ricevis, rajtas nuligi la edziĝon, kaj ni supozu, ke ili tion faras: ili akiras dekreton de franca kortumo kiu nuligas la edziĝon. Ĉu ni povas diri ke la edziĝo validas en Anglujo, sed ne en Francujo? Eble; sed se Francujo estas la geedza domicilo, se la geedza hejmo estas en Francujo, en tiu okazo la dekreto de la franca kortumo ankaŭ validas

en Anglujo; se Francujo estas la domicilo, ĉiuj dekretoj de francaj kortumoj rilate al tiu edziĝo estas akceptitaj kaj ankaŭ validas en Anglujo. Sed kontraŭe, se la franca junulo restas en Anglujo kun sia edzino, se ili akiras edzan domicilon en Anglujo, en Anglujo oni ne rekonas la dekreton de la franca kortumo nuligantan la edziĝon, kaj fakte, la edziĝo validas en Anglujo sed ne en Francujo. La kialo estas, ke laŭ angla vidpunkto nur kortumo de la lando en kiu estas la edza domicilo rajtas nuligi edziĝon, kaj se alia kortumo pretendas fari tion, ĝia dekreto estas simpla nulaĵo.

Bedaŭrinde estas fakto, ke en kelkaj okazoj ne estas konsento inter la nacioj pri la kompetenteco de naciaj kortumoj rilate al internaciaj aferoj, aŭ por esprimi tion en alia maniero: la reguloj de privata internacia juro ne ĉie estas tute samaj – la bazaj principoj estas la samaj, sed la aplikado varias, kaj pro tio oni povas eĉ paroli pri franca privata internacia juro, nederlanda privata internacia juro, angla privata internacia juro, k.t.p. kun la signifo, privata internacia juro kiel oni komprenas kaj aplikas ĝin en Francujo, en Nederlando, en Anglujo respektive.

Estas ĝenerale akceptite, ke ĉiu havas sian propran leĝon, leĝon kiu reguligas la aferojn de la privata vivo, kiel plenaĝo, edziĝo, adopto de infanoj, disdono de siaj posedaĵoj post la morto, sed ne ekzistas akordo pri tio, ĉu tiu persona leĝo estu la leĝo de la nacia ŝtato de kiu oni estas ano, aŭ la leĝo de la domicilo, la lando en kiu oni havas fiksitan hejmon. Kompreneble ofte tio ne gravas, ĉar, ekzemple, la plimulto de la francoj havas sian domicilon en Francujo, do ĉiuokaze ilia propra leĝo estas franca leĝo, sed, kiel ni vidis, en la kazo de franco kiu havas sian domicilon en Anglujo, estas konflikto, – la franca leĝo pretendas reguligi lian privatan vivon, kaj precipe lian edziĝon, ĉar li estas franco, ano de la franca ŝtato; ankaŭ la angla leĝo pretendas reguligi tiajn aferojn, ĉar ĝi estas la leĝo de lia domicilo. Internacia konsento je tiu punkto estas tre dezirinda, sed eble ne havebla, pro diversaj kialoj. Antaŭ la franca revolucio, ĉiuj landoj akceptis la teorion de la domicila leĝo, aŭ la teorion de la domicilo, tio estas, ke ĉies persona leĝo estas la leĝo de lia domicilo, sed en la *Franca Civila Kodo*, la *Napoleona Kodo*, Francujo adoptis la teorion de ŝtataneco anstataŭ la antaŭa teorio de domicilo; do, la franca leĝo pretendas reguligi la privatajn leĝajn aferojn de francoj, kie ajn en la mondo ili loĝas. Kaj dum la deknaŭa jarcento preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo sekvis la francan modelon, kun escepto de Svislando, Norvegujo kaj Danujo. Kontraŭe, Usono, ĉiuj landoj de la Brita Imperio, kaj preskaŭ ĉiuj landoj de Mez- kaj Sudameriko konservis la teorion de domicilo.

Parte tio estas politika afero; la landoj de enmigrado, la britaj transmaraj regnoj kaj la landoj de la amerika kontinento, preferas la sistemon de domicilo, ĉar laŭ tiu teorio ili povas ordigi la vivon de novaj enmigrantoj eĉ antaŭ ol ĉi tiuj akiras novan naciecon. La eŭropaj landoj, precipe Italujo kaj la landoj de Mezeŭropo, la landoj de elmigrado, preferas la teorion de nacieco, laŭ kiu ili rajtas daŭre reguligi la privatajn leĝajn aferojn de siaj ŝtatanoj ekster la landlimoj.

En tiu rilato estas notinde ke nuntempe kelkaj eminentaj juristoj francaj preferus ke Francujo reakceptu la malnovan sistemon de la domicila leĝo; efektive Francujo fariĝis lando de enmigrado, lando en kiu trovis fiksitan hejmon tre granda nombro da rifuĝintoj okaze de la rusa revolucio kaj de la naziaj kaj faŝistaj registaroj en Germanujo, Italujo kaj aliaj landoj. La rezulto de tiaj enmigradoj en Francujon estas, ke en la aplikado de privata internacia juro en Francujo oni faras pli kaj pli da esceptoj en la teorio de ŝtataneco. Ekzemple, laŭ la strikta aplikado de tiu teorio, dum la valido de la hontindaj Nurnbergaj leĝoj en Germanujo, Francujo devus malpermesi geedziĝon en Francujo inter germanaj kontraŭnaziaj rifuĝintoj, se unu estas judo kaj la alia nejudo, ĉar tiaj geedziĝoj estis malpermesitaj de germana leĝo, la leĝo valida laŭ la nacieco. Francujo ne faris tion. Ĝi permesis tiajn edziĝojn. Tio signifis do, ke oni forlasis la striktan aplikadon de la teorio de nacieco, kaj permesis escepton. Tamen, en la aplikado de la teorio de domicilo, tiaj malfacilaĵoj ne tre ofte okazas, ĉar la leĝo de la lando en kiu oni havas fiksitan domicilon, rajtas reguligi privatajn aferojn, ekzemple edziĝon.

Estas alia grava afero pri kiu mi devus ion diri rilate al internaciaj edziĝoj, kaj tio estas la tiel nomitaj geedzecaj reĝimoj; geedzeca reĝimo estas leĝa sistemo kiu reguligas la reciprokajn rajtojn de la geedzoj rilate al posedaĵoj. Tiaj sistemoj diversas multe en diversaj landoj. En multaj landoj ankaŭ diversaj specoj de edziĝaj kontraktoj ekzistas, kiuj permesas al la edzparo klare indiki siajn rajtojn inter si pri estantaj kaj estontaj posedaĵoj. Se estas edziĝa kontrakto en internacia edziĝo, estas tre grava afero ke oni informiĝu ĉu ĝi validos en la du koncernataj landoj, rilate al la enhavo de la kontrakto, al sia formo, kaj al la kompetenteco de ambaŭ geedzoj fari tian kontrakton: eble ĝi ne validos en unu el la du landoj, se unu el la geedzoj estas neplenaĝulo en tiu lando – kaj la laŭleĝa plenaĝo ne estas ĉie la sama.

Se estas edziĝa kontrakto, kiu estas valida en la du koncernataj landoj je la okazo de la edziĝo, laŭ la personaj leĝoj de la geedzoj, kaj kelkfoje se ĝi nur estas valida laŭ la leĝo de la edzo, tiu kontrakto restos valida dum la daŭro de la geedzeco, eĉ se la geedzoj ŝanĝas sian domicilon aŭ ŝtatanecon. Tio estas la doktrino de la neŝanĝebleco de la edziĝaj kontraktoj. Do, edziĝa kontrakto valida je la komenco de la geedzeco ĉiam restas valida en ĉiuj landoj.

En kelkaj landoj kie tiaj kontraktoj ekzistas, ili estas tre kutimaj, en aliaj oni tre malmulte uzas ilin, kaj eble estas vere, ke tamen en ĉiuj landoj la pli multaj personoj edziĝas sen speciala edziĝa kontrakto. Do ĉiuj landoj aŭ havas regulojn pri la posedaĵoj de la geedzoj, aŭ ili havas regulon, ke sen speciala kontrakto, la edziĝo nenion ŝanĝas en la leĝa pozicio de la posedaĵoj de la geedzoj. Ekzistas diversaj sistemoj: antaŭe, ofte ĉiuj posedaĵoj de la edzino apartenis, jure, al la edzo, kaj eĉ nun en kelkaj landoj, ekzemple en Germanujo kaj Svisujo, la edzo rajtas ĝui kaj administri la posedaĵojn de la edzino; tamen en tiuj landoj estas esceptoj al tiu regulo, ekzemple koncerne monon gajnitan de la edzino per aparta

laboro aŭ komerco. Alia sistemo, kiu estas la leĝa sistemo en Nederlando kaj Portugalujo, estas ke la geedzoj fariĝas komunaj posedantoj de la posedaĵoj de ambaŭ: en juro, la posedanto de la posedaĵoj de la edzo aŭ de la edzino estas simple la edzparo. Kaj en aliaj landoj, en Anglujo kaj en multaj Mezeŭropaj landoj, la edziĝo ne havas ian leĝan efikon rilate al la posedaĵoj: nek la edzo, nek la edzino havas ian rajton al la posedaĵoj de la alia.

Je okazo de internacia geedziĝo, se ne estas aparta edziĝa kontrakto, la sistemo de la leĝo de la edzo estas aplikenda, sen konsidero pri tio, ĉu ĝi estas pli aŭ malpli favora al la edzino ol ŝia antaŭa persona leĝo. Virino kiu edziniĝas kun eksterlandano devas akcepti la leĝon de lia domicilo. Sed estas notinde, ke ĝenerale, se la geedza paro ŝanĝas sian domicilon iom da tempo post la edziĝo, tio ankaŭ povas ŝanĝi la geedzecan reĝimon: ekzemple, se nederlanda geedza paro akiras domicilon en Anglujo, tio kaŭzus tro da malfacilaĵoj se oni klopodus apliki la nederlandan komunecon de posedaĵoj en Anglujo, ĉar tiu sistemo estas nekonata en Anglujo. Tamen, oni akceptus la fakton en Anglujo ke la nederlanda juro efikis en Nederlando, kaj oni rekonus la komunecon de posedaĵoj pri tiuj posedaĵoj, kiujn la paro posedis kiam ili venis en Anglujon. Sed por posedaĵoj akiritaj en Anglujo post la ŝanĝo de domicilo, oni aplikus la anglan leĝon. Estas tre konsilinde, do, je ŝanĝo de domicilo, ke oni informiĝu pri la leĝo de la lando en kiu oni loĝas, kaj ĉu estas dezirinde kaj permesate, ke la geedzoj faru novan kontrakton inter si, ĉar la problemoj kiuj okazas en tiu rilato plej ofte okazas nur post la morto de unu el la geedzoj, kiam oni disdonas la posedaĵojn. Kaj se ne estas nova kontrakto, postedziĝa kontrakto aŭ testamento, eble la laŭleĝa disdono de posedaĵoj tre malsimilas al tiu laŭ la leĝo de la lando, kiu estis la domicilo kiam okazis la edziĝo.

Tiu temo, la juraj efikaĵoj kaj rezultoj de internaciaj edziĝoj, estas malfacila kaj malsimpla, sed mi esperas ke mi diris sufiĉon por ke vi havu ian ideon pri la problemoj kiujn traktas la juristoj kies fako estas la privata internacia juro, problemoj kaŭzitaj de la malsimileco de la diversaj naciaj leĝoj.

*El **Elektitaj prelegoj** [de Internacia Somera Universitato] 1949-1954.*
J. Muusses, Purmerend 1955, p. 29-35.

László Ferenc

LA ŜIRMADO DE NIA MEDIO ESTAS KOMUNA AFERO DE LA HOMARO

En la lastaj jaroj tutmonde fariĝis komuninteresa la ŝirmado de la homa medio. Tion komprenigas, ke sekve de la eksplodeca evoluo de la tekniko aperis tiaj kontraŭmediaj nocadoj, kiuj endanĝerigas la homan vivon.

Al la fenomenoj, kaŭzantaj la malboniĝon de la homa medio, apartenas

- la malpuriĝo de la akvo, aero, grundo kaj nutraĵoj,
- la intensa plifortiĝo de la bruo,
- la apero de nocaj radiadoj,
- la troamasiĝo de solidaj defalaĵoj,
- la regreso de la estetika kaj plezuriga valoro de certaj naturpejzaĝoj,
- la plimultiĝo de psikaj stresantaj agantoj.

Unu el la fontoj de la kontraŭmediaj nocadoj estas la aliiĝo de la antaŭa ekvilibra situacio, kaŭze de la kvanta kaj kvalita evoluo de la produktiloj; la alia fonto – strikte ligita al la unua – estas la multiĝo de la loĝantaro kaj la urbanizado.

Dum la evoluo de la homaro – se ni ekzamenas longajn etapojn – ĝis nun ĉiam restariĝis la ekvilibro inter la evoluo de la tekniko kaj la homa medio. Sed en nia jarcento la dua scienca-teknika revolucio plirapidigis la evoluon tiagrade, ke la socia ŝirmado, per sia egaliga efiko, jam ne povas esti aŭtomate sinkrona kun tiu procezo. Niatempe jam necesas konscie direktita agado, tiom pli, ĉar la aŭtomata konsciiĝo de la socio pri la danĝeroj okazis ĝenerale nur kun granda malfruo.

En la centro de la medioŝirmado staras unuavice la homo, vivanta en grandaj loksidejoj kaj industriaj centroj; tial – bedaŭrinde – oni devas konsideri vicon de negativaj cirkonstancoj. Oni devas mencii unuavice la iom-post-ioman (kaj en perspektivo de kelkaj generacioj – fundamentan) aliiĝon de la homaj vivkondiĉoj. La homoj tie loĝantaj aliigis sian nutrad-metodon. Ili eltiris sin el sub la efiko de la naturaj ŝanĝiĝoj de la vetero, komencas redukti siajn fizikajn movojn ĝis minimumo kaj krom tio ili estigas ĉirkaŭ si biosferon saturitan per bruoj kaj eĉ pli malpurigitan akvan medion.

Sur la mapo de la mondo plidensiĝas kaj sur ekonomie evoluintaj teritorioj jam formas koherajn regionojn tiaj zonoj, kie en la medioj gravaj por la homa vivo, nome en la akvo, en la aero, sur la agrikulturaj teritorioj, sume en la tuta biosfero, la danĝera nivelo superpasis la permeseblan mezuron, pro tio neniiĝas nereprodukteblaj naturfontoj. La malpurigoj resendas sian nocan efikon sur la fizikan, spiritan kaj socian evoluon, superombras la hejman kaj laborlokan mediojn kaj bremsas la evoluon de la tuta pli larĝa natura ĉirkaŭaĵo.

Eksterordinare maltrankviliga fenomeno estas niatempe ankaŭ la malpuriĝo de la maroj, kiu grandskale endanĝerigas la vivon de la marestaĵoj. Sed sekve de ĝi fariĝas tre malfacila ankaŭ la trinkakvo-produktado bazita sur la sensaligo de la marakvo.

Kio estas la solvo?

Por gardi la deziratan ekvilibron de la homa medio, la sola imagebla vojo estas: tiel evoluigi la artefaritan medion, ke dume oni optimume ŝirmu – ankaŭ en longa perspektivo – la naturan medion. Jam ĉe la komenco de la investado oni devas zorgi pri tio, ke en la genetikan kodon de la realigo, evoluigo kaj modernigo estu enprogramitaj ankaŭ la nemalhaveblaj ekologiaj parametroj.

Nuntempe la rilaton inter la evoluigo de la ekonomio kaj de la homa medio karakterizas unuflanke la dialektiko de la antagonismoj kaj aliflanke la dialektiko de komplikiĝintaj faktoroj reciproke sin kompletigantaj. La interrilato inter la homa vivo kaj la biosfero estas kompleksa, interplektita, multflanka. La taskojn ĉi-koncernajn ni povas esplori nur per multaj scienco-fakoj. Apliko de sole kelkaj scienco-branĉoj per si mem ne povas alporti daŭran rezulton. Grave estas, ke ĉe komunaj fortostreĉoj la aliro al la problemoj – kiel tion ni jam aludis – estu ĉiam homocentra. Plej urĝe estas, ke la socia ekologio kaj la scienco pri la medio-ekonomio trovu kiel eble plej baldaŭ vojon komunan. Civilizacio, eĉ kun tekniko ankoraŭ pli evoluinta ol la hodiaŭa, estas necesa, sed ĝi devas esti ekologia, kaj adaptiĝi senskue al la biologia sistemo de nia Tero. La naciajn antaŭpaŝojn devos sekvi mondskale unuecigitaj instrukcioj por rebonigo de la difektitaj medioj kaj konservado de ilia rebonigita konsisteco. Kaj sur la vojo, kondukanta ekde la nacia ĝis la tutmonda ordofaro, la regiona kunlaboro de la najbaraj landoj estos neellasebla ĉenero.

Sekvante tiujn ĉi principojn, ni povos fari multon por restarigi la difektitan ekvilibron de la natura homa medio kaj preventi la pluajn damaĝojn.

La akvo kiel primara natura faktoro

En la ŝirmado de la natura medio gravan lokon havas la akvo pro sia multrilata signifo. Nome, eble neniu natura faktoro tuŝas tiel vastajn teritoriojn de nia ĉiutaga vivo kaj mastrumado kiel la akvo. La reto de la loksidejoj tiel same, kiel la elformiĝo de la ekonomihistorio de la landoj evoluis ĉiam depende de la ĉeesto de akvo. Sur la nuntempa nivelo de la socia kaj ekonomia evoluo la lukto por la akvo kaj kontraŭ la detruaj fortoj de la akvo ĉiam pli akriĝas. Senutila estas la kolose granda – 1,3 miliardoj da km^3 – akvomaso de la Tero, se nur ties 0,5% estas rekte utiligebla sensala akvo kaj eĉ konsiderinde granda parto de tiu lasta estas malpurigita. La malpurigo fundamente ŝanĝas la enakvan vivomondon, konsekvence ŝanĝas ankaŭ la homan medion kaj en pli strikta kaj en pli larĝa senco. Krom la malpuriĝo de la akvoj – kontraste al la aero, senproblema rilate ĝian kvantan utiligon – ilia tempe kaj loke malegala distribuo kaŭzas jam niatempe gravajn akvomankojn en certaj teritorioj.

Kiajn damaĝojn povas estigi la malpuriĝo de la akvoj, la malstabiliĝo de la ekvilibro de la enakva vivo? Por respondi la demandon oni devas rigardi kelkajn kampojn de la akvoutiligo.

La akvo, kiel esence grava elemento, estas nemalhavebla kriterio de ĉiaspeca vivo. Ankaŭ la homo pli facile toleras la mankon de la nutraĵo ol tiun de la akvo. Ĉe certagrada soifo – tiu grado estas malsama ĉe la diversaj estaĵoj – ĉiu alia postulaĵo fariĝas duagrada.

Ankaŭ la kontentigo de la "soifo" de la industrio ne estas facila tasko, ĉar la postuloj salte kreskas, sed la akvoprovizoj estas limitaj.

Ankaŭ la agrikulturo, produktanta vivantan varon – animalojn, plantojn – ne povas ekzisti sen akvo.

La akvo ankaŭ kiel refreŝiga faktoro ludas elstaran rolon en la vivo de la homo. Oni ne deziras daŭre restadi sur senvegetaĵaj teritorioj, dezertoj aŭ karstaj altebenoj, tiom pli sopiras iri apud lagojn, kuŝantajn en pitoreska ĉirkaŭaĵo, apud abundakvajn riverojn garnitajn de arbarostrioj. Al la ripoziga medio oni turnas sin kun estetikaj pretendoj. Ĉio, kio ofendas nian estetikan senton – kiel ekz-e la poluita, malpura akvo – misagordas nin. La sopiro al refreŝiĝo kaj ripozo vaniĝas en tia medio, oni ne kapablas senzorgiĝi, senstreĉiĝi.

Kion faras kaj kion povas fari la ŝtato kaj la socio por la ŝirmado de la akvoj?

Krom defendi kontraŭ la detrua efiko de la akvo, la digo-sistemoj laŭlonge de la riveroj ankaŭ servas elformiĝon de homa medio. En nia lando, sur areoj drenitaj kaj sekurigitaj per kontraŭinundaj instalaĵoj, elformiĝis vivosfero pli homa, ekonomie pli utila. La 30%-oj de la landa loĝantaro vivas tie en novaj modernaj loĝlokoj, kaj akumuliĝis tie popolekonomia havaĵo en valoro de ĉ. 300 miliardoj da forintoj. Kompreneble, ankaŭ nia respondeco kreskis, defendi tiujn teritoriojn kaj pluevoluigi ilin estontatempe.

Malgraŭ la jam efektivigitaj akvoordigaj laboroj, ekstrem-okaze ankoraŭ internaj akvoj kovras por certaj tempodaŭroj ĉ. 20-25 procentojn de la profunde situantaj ebenaj regionoj. Tie estas necese plu densigi la reton de kanaloj kaj pliigi la plenumo-povon de la pumpila sistemo. Ŝirmi la grundon kontraŭ detruiĝo en montaj kaj montetaj regionoj, fari akvo-ordigon sur valofundoj, mekanike protekti la grundon sur val-deklivoj, kolekti akvo-rezervojn: ĉio ĉi estas unuaranga tasko de la medio-ŝirmado tiel same en la akvo-mastrumado, kiel en la agro- kaj forsto-kulturo.

La ĉeesto de akvo estas de determina signifo ankaŭ por la homa medio. La grandaj kanaloj jam elkonstruitaj, kiel ekz-e la Orienta Ĉefkanalo, la reguligitaj river-sekcioj, niaj naturaj lagoj, Balatono kaj lago de Velence, kun siaj reguligitaj, prikonstruitaj bordostrioj, estas novaj areoj refreŝigaj por la homo tiel same, kiel niaj artefaritaj akvorezervaj baraĵoj en la departemento Borsod, aŭ en la valo de la rivereto Gaja, sed neniom malpli ankaŭ la nun formiĝanta nova, grandega artefarita lago post la antaŭ nelonge elkonstruita akvonodo de Kisköre. La grandaj akvoaferaj instalaĵoj ne nur kreas novan socian kaj ekonomian fonon,

sed samtempe donas novan trajton al la koncerna pejzaĝo. La ordigitaj kaj reguligitaj akvobordaj teritorioj tiel same apartenas al la "homocentra" medio, kiel niaj artefaritaj kurac- kaj strandbanejoj.

Inter la faktoroj, transformantaj la homan medion, eble unu el la plej gravaj estas la provizado per higiena trinkakvo. Dum la pasintaj 15 jaroj la nombro de la loĝantoj provizitaj per kondukila trinkakvo kreskis en nia lando de 2 milionoj al 5,5 milionoj. Per tio ni kreis la kondiĉojn por la modernaj dommastrumoj, por la sana hejmo, por la akvomastrumado de la vilaĝa kaj urba vivo. Sed la rapida urbanizado, la amasa konstruado de loĝejoj el domfabrikaj elementoj, la konstanta akumuliĝo de la loĝantaro en la novaj kaj malnovaj loĝlokoj postulas ĉiam pli novajn fortostreĉojn.

Nuntempe la malpurigitaj akvoj efikas kun kreskanta danĝereco sur la naturajn akvojn, damaĝas la vivomondon de la akvoj, limigas la refojan uzadon de la jam uzita akvo. Ĝuste pro tio unu el la plej gravaj taskoj de nia tutlanda akvomastrumado fariĝis la defendado kontraŭ la akvopoluado. La instrukcioj faritaj ĉi-kampe favore influis la situacion pasintjare.

Koncerne la ŝirmadon de la akvokvalito grandan signifon havas la rezultoj atingitaj jam ĝis nun en la kunlaboro realigita kun la najbaraj landoj. La fundamentadon de la modernaj akvodefendaj sistemoj servas la nun konstruataj teritorioj de la modela ŝirmado de akvokvalito apud Danubo kaj en la valo de la rivero Sajó, ambaŭ kun la financa subteno de la Evoluiga Fonduso de UN. Ili estos la modeloj de la kompleksa reguligo de akvokvalito en nia lando.

La organizita ŝirmado de akvokvalito havas do komencajn rezultojn: la antaŭa rapida malpuriĝo de la akvoj moderiĝis. Sed la taskoj de la estonta tempo postulas pli da fortostreĉo, ja la kvanto de la industrie kaj dome poluata akvo kreskos dum la venontaj 15 jaroj de 3 al 7 milionoj da kubmetroj tage. Paralele kun la kresko de la poluo-danĝero kreskos ankaŭ niaj devoj por la akvo-ŝirmado.

Oni devas ĉiam konscii, ke la poluado de niaj akvoj jam ne estas pliigebla, eĉ se tio postulas tiajn investadojn, kiuj nur malrapide repagiĝos kaj pro tio la rentabilitato provizore malpliiĝos. La ŝirmado de la homa medio, la certigo de la kondiĉoj de la sana vivo ne povas esti nur objekto de momenta financa prikonsidero. Eĉ tiam ne, se la elspezo repagiĝos nur post longa tempo – eventuale en jarcentoj –, ja temas pri la estonteco de nia ekzistado.

*El la gazeto **Hungara vivo**, 1974, n-ro 5, p. 16-19.*
Tradukita el la hungara de Tibor Újlaky-Nagy.

Seiiĉi Kato

PRI OFTALMOLOGIO

Lekcio 10 – Okulpozicioj

Kutime niaj okuloj pozas nestrabe (*orthophoria*) kaŭze de impulso por vidi biokule ian definitivan objekton. Se la vidobjekto ne ekzistas aŭ la fuziofunkcio estas perdita, la okuloj pozas tute libere laŭ siaj propraj inklinoj. Oni povas distingi la fuziogradojn de ambaŭ okuloj kiel sekve:

1) anatomia (absoluta) ripozopozicio
2) fiziologia (relativa) ripozopozicio
3) pozicio sen fuzio
4) pozicio kun fuzio

La unua estas la pozicio de l'okuloj mortintaj, la dua estas tiu de dormegintaj aŭ treege narkotitaj, la tria estas tiu de neatentaj kaj la kvara estas de atentaj.

La plena ekvilibro de ambaŭflankaj multaj muskoloj okazas anatomie tre malofte; alivorte la kompleta nestrabo aŭ ortoforio povas esti ideala, sed ordinare estas ne realigita, kaj la plejmultaj okuloj havas iom da devio, nome ili estas de latenta strabo aŭ heteroforio.

Latentaj strabecoj estas klasifikataj kiel jene:

konverĝa latenta strabo aŭ ezoforio
diverĝa latenta strabo aŭ ekzoforio
supra latenta strabo aŭ hiperforio
suba latenta strabo aŭ hipoforio
rotacia latenta strabo aŭ cikloforio

Ekzemple en la diverĝa latenta strabo aŭ ekzoforio, se la unua okulo estas ŝirmita per mano, dum la alia rigardas rekte antaŭen, la okulo ŝirmita sin tenas abdukte malantaŭ la ŝirmo, ĉar tiaj okuloj emas diverĝi unu de la alia kaj apenaŭ tenas sian biokulan vidadon dank' al fuziofunkcio.

Pri la ekvilibro inter eksteraj kaj internaj okulmuskoloj estas jam supre skribite. En la miopeco, la impulso de konverĝo estas kompreneble pli granda ol tiu de akomodo, sekve tie rezultiĝas relativa nesufiĉo de konverĝimpulso, rezultigante la inklinon de diverĝa strabo, same kiel okuloj hiperopaj emas al konverĝa strabo.

Provometodo de latenta strabo estas simpla ŝirmometodo per mano aŭ MADDOX'a bastoneto, kiu konsistas el multaj cilindraj vitraj bastonetoj; kiam oni rigardas tra ĝi, oni perdas la biokulan fuzion.

Kiam latentaj straboj perdas siajn fuziofunkciojn pro iuj kaŭzoj, tiam rezultiĝas manifestaj straboj ordinare nomataj straboj ko-operaj (*strabismus concomitans*),

kiuj estas tiel same klasifikataj en konverĝa, diverĝa, surverĝa, subverĝa kaj rotacia.

En la ko-opera strabo, primara okuldevio estas egala al la sekundara, ne ekzistas diplopeco aŭ erara orientado, kiuj ekzistas en la paraliza strabo.

La ĉefa plendo de manifeste straba paciento ordinare estas kosmetika (aŭ estetika). Ĉe la okulo longe deviinta ofte okazas ambliopeco pro neuzo (*ambliopia ex anopsia*).

Operaciaj terapioj de la straboj estas antaŭenigo de muskolotendeno (mallongigo) kaj malantaŭenigo (tendenotomio) de antagonista muskolo. Funkcia resaniĝo de la fuzio aŭ ambaŭokula vidado estas ideala, sed por tio sin postulas frustadia paciencema kuracado, kun prava uzo de stereoskopo, ekzercado kaj operacio.

Lekcio 11 – Nistagmo

La okulo estas, eĉ en sia normala stato, tre delikate tremetanta ĉirkaŭ la rigardopunkto. En iaj patologiaj statoj pliiĝas tiu tremeto, kaj tiam ĝi estas nomata nistagmo (okuloskuo).

Tia cirkonstanco povas esti bildigita jene: ĉio okazas, kvazaŭ la fiziologia tremeto havus mallongan ankroŝnuron ĉirkaŭ la rigardopunkto, kaj en iuj patologiaj statoj, ekzemple en ambliopio, la ankroŝnuro plilongiĝus, kaj la okulo vagadante serĉus la plej akre videblan retinolokon.

Direktoj kaj formoj de nistagmoj:

pendola nistagmo
spasmeca nistagmo (rapida kaj malrapida fazoj)
horizontala nistagmo
vertikala nistagmo
oblikva nistagmo
rotacianta nistagmo

Normala persono montras nistagmon en specialaj okazoj, ekzemple la tiel nomataj trajno-nistagmo kaj devianta nistagmo.

Trajno-nistagmo (optikokineza nistagmo) estas onidire trovita de PURKINJE en la okuloj de popolamaso, kiu estis vidanta la marŝon de kavalerio. Ni povas facile trovi tiun ĉi, kiam ni rimarkas la okulojn de najbaro, kiu estas rigardanta eksteran vidaĵon tra la fenestro de veturanta trajno.

Devianta nistagmo okazas, kiam la okulo estas tenata en ekstrema pozicio; tial ĝi estas ankaŭ nomata ekstrempozicia nistagmo (*Endstellungsnynstagmus*).

Kaŭzoj de patologiaj nistagmoj povas esti oftalmogenea, otogenea kaj centreca. Ni, okulistoj, tre ofte havas okazojn observi la denaskan nistagmon kaŭzitan de ambliopeco. La denaska ambliopeco ordinare rezultigas nistagmon kaj la postnaska ambliopeco (post la establiĝo de fuziofunkcio) strabon. Malofte sin trovas heredita nistagmo kun bona vidakreco malgraŭ ĉiam skuiĝanta okulo.

Otogenea nistagmo estas kaŭzata de korpa turniĝo, temperatura ŝanĝo en mezorelo aŭ multaj malsanoj de meza kaj interna orelo.

Ĉe la centreca nistagmo ludas la plej gravan rolon la cerebelo, ĉar ĝi estas konsiderata kiel la reganto de la eksterpiramida sistemo. Krome tiel nomata demjeliniga malsano, heredataksio de FRIEDREICH, montras nistagmon kiel ĉefan simptomon. Malofte trovata **nutacia spasmo** estas iu speciala formo ĉe infano, kiu havas ne nur distingindan nistagmon sed ankaŭ kapobalancan spasmon kaŭzitan de cirkonstanca mallumeco aŭ heredeco.

Kiel tipa profesia malsano estas rimarkinda la minista nistagmo, kiu okazas pro longedaŭra laborado en la minejo. Jam antaŭe tiu ĉi nistagmo estis entuziasme diskutata en Anglujo, kiel grava laborproblemo. Nuntempe ni devas konkludi, ke la minista nistagmo estas simila al neŭrozo kaŭzita de malbona laborkondiĉo.

Oftalmogenea nistagmo estas plejparte denaska kaj preskaŭ nekuracebla. Nutacia spasmo estas resanigebla per plibonigo de cirkonstancoj. Minista nistagmo ankaŭ resaniĝas per forlaso de enmineja laboro.

*El **Lernolibro pri oftalmologio**. Shinkjo Presejo, Nagano, Japanio 1963, p. 28-31.*

Paul Neergaard

FLUGANTAJ SEMOJ

Antaŭ trideko da jaroj mia patro aĉetis kamparan domon kun terpeco de du-tri hektaroj, plejparte herbokampo kaj iama torfejo. La herbo de nia kampo donis furaĝon por unu ĉevalo, kaj ni sentis nin kiel veraj kamparanoj. Sed dise ni plantis piceojn kaj pinojn, kelkajn betulojn kaj fraksenojn kaj citizojn kaj apud la domo pli delikatajn arbojn kiel tujon, kameciparidon kaj noblan abion.

Nun disvolviĝas sur nia grundo peco da sovaĝa naturo. Tiuj arboj, kiujn ni plantis, kiam mi estis knabo, fariĝis grandaj, sed tie kaj ĉi tie, en la plej diversaj lokoj, je longa distanco de la grandaj arboj, ekaperas nun amaso da malgrandaj arbetoj, tute surprize, ĉar oni povas konstati, ke ili estas infanoj de la gepatroj, kiuj kreskas malproksime de tiuj lokoj, kie sukcesis enradikiĝi tiuj ĉi nov-alvenintoj.

En fora angulo staras granda acero. Ankaŭ ĝi ekhavis nun idojn je longa distanco de sia loko. Ĝia globa nukso portas grandan flugilon, duope la nuksoj formas perfektan ŝvebaviadilon – ĝemeloj kiel ĉiam estas tiuj fruktoj. En kvieta vetero la semo ronde turniĝas, kiam ĝi malleviĝas tra la aero, sed kiam la vento forte blovas, la flugilo helpas al la semo longe forflugi. Neniel, tamen, komparebla kun la betulo, kiu vere nin turmentas sur la grundo.

Kiel trudherbo la betulo ekaperas ĉie, la fruktetoj estas tre malpezaj kaj krome ĉirkaŭitaj de papere maldika, korforma portilo, por ke la vento povu ilin disen kirli. Sekve fariĝas tro multaj el tiuj belaj, blankŝelaj arboj ĉi tie, kaj nun ni devas haki kaj multe peni por forigi ilin, tiomgrade la etaj, flugantaj konfetoj komencas transpreni la potencon.

Eĉ nun montriĝis kelkaj ulmoj, kaj ilin tamen ni ĝis nun evitis sur la tereno. Ni malkovris, ke ili sendube devenas de la komunuma vojo, situanta je distanco de kvinminuta promeno de tie ĉi. Forta vento supozeble portis aere la flugilhavajn ulmofruktojn, kaj nun ili desupre falis al ni kvazaŭ manao el la ĉielo, sed malpli bonvenaj ol la manao de la Biblio, al kiu asignis la popola kredo ja i.a. ankaŭ la ulmofruktojn. Kiam mi estis knabo, miaj kamaradoj kaj mi kolektis manaon en la strato antaŭ nia lernejo, ĉe granda parko, kaj ni gustumis la nukseton, kiu sidas en la mezo de la flugilo. Ni imagis al ni la situacion dum la dezerta migrado, tutaj neĝamasoj da tiuj ĉi fruktoj abundis, malavaro de la naturo. Kaj ni imagis al ni la amatan parkon, al si mem tute lasitan, iom post iom transformita al unu grandega arbaro plena de ventokirlita manao.

Preta, la naturo embuskas ĉie ĉe niaj ĝardenoj kaj kampoj. Se nur malmultajn jarojn ni lasas la bridon, jam transformiĝas tiu tero, kiu antaŭe estis sub plugilo aŭ forkego, kaj fariĝas el ĝi sovaĝa naturo, kreita el senĉesa luktado inter tiuj

plantoj, kiuj sin trudas en la regionon de la senbridigita socio de plantoj. Pratempa dana pejzaĝo reaperas, certe ne tre diferenca de tiu mondo, en kiu vivis niaj malproksimaj prapatroj antaŭ du-tri jarmiloj.

La granda movoforto malantaŭ tiu ĉi proceso de transformiĝo estas la semdisvastiĝo. Kaj antaŭ ĉio la disvastiĝo per la vento portis sian parton al la ŝanĝiĝo de la grandaj, malfermitaj, herbokovritaj ebenaĵoj inter tiuj arboj, kiujn ni plantis, kiam mi estis knabo, al la nuna, fekunda arbara kaj arbetara pejzaĝo, tiel varia kaj riĉa de sovaĝaj floroj.

Ĉe la vojeto apud la domo staras miloj da leondentoj – eble la plej potenca floro de nia sovaĝa floraro, potenca, ĉar ĉien ĝi povas penetri, kaj ĉar ĝi per sia fortika pivotradiko solide povas persisti. Estas la perventa disvastigado, kiu ĉeestigas ĝin ĉie ĉe niaj vojoj, en niaj kampoj, en niaj ĝardenoj.

La leondento estas la unua kaj plej bela floro de nia infaneco. Kun mia knabineto mi eliris por studi ĝin. Singarde ni plukis unu el la finflorintaj kapoj kaj rigardis la malgrandan, iomete volbitan tabureton, kiu estas dense okupita de areto da lanugaj ombreloj, ĉiu portanta unu grajnon. Kaj tiam, per unuigitaj fortoj, ni faris blovan veteron, kaj leviĝis nubeto da paraŝutoj el la malgranda startejo sur la kava flortigo, alte aeren turniĝis la nubeto kaj disflugis en ĉiujn direktojn, disportita de aerfluoj kaj ventetoj, multaj el ĝiaj eroj baldaŭ malaperis el nia vidpovo, for de la patrina planto.

Ĉe nia kampara domo ni posedas lageton, dense ĉirkaŭitan de fragmito kaj tifao sur preskaŭ sia tuta bordo. Tia granda, grasa tifao konsistas el miloj da grajnoj. Per la ungoj ni povas distaŭzi ilin, kaj la dense kunpremita pelto malfiksiĝas en sennombrajn floketojn, kiujn la vento alten forportas. Ĉe la lago, kie ĝi kreskas, ĉio ja estas okupita. La flokoj bezonas amasflugi super la ĉirkaŭanta pejzaĝo, estas necese, ke ili neĝu de supre al la tuta regiono, por ke iu floko povu ĝermi sur la bordo de alia lageto kun pli da spaco ol ĉe la nia.

Dise inter la fragmitoj ĉe la lago kaj pli malproksime en la akvo kreskas planto kun belaj konikoj el helruĝaj floroj kaj kun freŝe verdaj folioj. Estas la plantaga alismo – ĝiaj folioj rememorigas pri plantago.

Alismo forsendas siajn grajnojn en la mondon laŭ la akva vojo. Ĝiaj malgrandaj frukteroj estas nete aranĝitaj en ringo. Se oni dismanipulas la ringon kaj faligas la grajnojn en la akvon, ili restas flosantaj. La vando, kiu ĉirkaŭas la semon, konsistas el grandaj, aerplenaj ĉeloj. La semo portas naĝozonon, flosante sur la akvo ĝi povas fari longan vojaĝon, malproksimen for de la gepatra planto.

Kiam ĝi estas flosinta dum iom da tempo, la akvo penetras en la naĝozonon, la semo peziĝas, la vojaĝo finiĝis, la semo malsupreniĝas al la fundo, kaj ekĝermas. Tiel komencas sian vivon multaj akvoplantoj.

Ankaŭ ĝis la kamentubo de nia domo disvastiĝis la naturo. Granda urtiko enradikiĝis ĉe ĝia bazo, kaj unu-du metrojn de tie, en la malnova, muskokovrita parto de nia pajlotegmento, ekdisvolviĝis malgranda sorpo. Tiun ĉi lastan praarbaran ĝermon ni facile povas devenigi el vico de sorpoj, kiuj staras apenaŭ

cent metrojn disde la domo, kaj kiom koncernas la urtikon, ho ve, tro da ili abundas sur la tereno. Sed de tie ĝis la dorso de la domo, jen tamen salto. Estas bestoj, supozeble birdoj, kiuj prizorgas la transporton tien. Disvastigado de semo per bestoj okazas grandskale. La etaj, malgrandaj urtikgrajnoj facile povas alfiksiĝi sur la plumaro de birdo, kaj la interesiĝo de la birdoj al la sorpaj beroj estas perfekta faktoro en la disvastiĝbiologio de la arbo: la ruĝaj beroj logas la birdojn al kunlaboro.

La sturnoj atakas niajn ĉerizojn – la vivo estas vigla en la arboj, kaj tio estas pli je la profito de la arboj ol de ni. Grajnoj el multaj plantoj estas manĝataj tutaj kun la dika, ŝirma ŝelo, kaj eble ili finas la vojaĝon, perditaj en la ekskrementoj de birdo aŭ pli granda besto, en iu malproksima loko, kie la kondiĉoj por ĝermado estas favoraj. En bovina kuko aŭ en ĉevala piro, perdita ie en la erikejo, elĝermas plantetoj nekonataj tie, kie regas eriko kaj mirtelo.

La lapon kun ĝia densa ekipaĵo de hokoj oni apenaŭ povas forŝiri el trikita bluzo. La solidaj hoketoj efektive prizorgas, ke la infloreskoj de la lapo kiel kaŝpasaĝeroj estu longe forportataj sur la felo de besto, for al lokoj, kie estas pli da ŝancoj, por ke la semo ĝermu, ol en densa kreskaĵaro de larĝfoliaj lapoj. Ankaŭ asperulo, hundolango, galio, agrimonio jam longe antaŭ Odiseo konis la avantaĝon esti ŝtelportata de besta felo.

Grandaj bestoj kaj malgrandaj bestoj agas kiel semistoj. Ursoj, paseroj kaj formikoj. Sur nia tereno ni havas du-tri konsiderindajn formikejojn ĉe la rando de abiaro. Iliaj etaj loĝantoj urĝe portadas siajn blankajn, ovosimilajn pupojn, sed ankaŭ aliaj objektoj estas transportindaj, i.a. grajnoj – pli ol cent metrojn ili pene povas forporti ilin. Grajnoj de violo kaj primolo kaj multaj aliaj plantoj surhavas oleoriĉan kaj vitaminhavan alpendaĵon, kiun la formikoj ŝatas manĝi, kaj kiu instigas ilin forporti la grajnojn. En la tropikoj la formikoj portas grajnojn kaj fruktojn supren al la arboj kaj aranĝas milojn da pendantaj ĝardenetoj, mejlojn vaste en la kunplektitaj branĉoj de la praarbaro.

Sed aliaj plantoj disvolvas en siaj ŝajne tiel delikataj ĉelaroj sufiĉe da energio por povi mem dissendi en la mondon siajn grajnojn per forta puŝo. En nia vilaĝo estas ĝardenisto, kiu travivis invadon de balzamino sur sia tero. Antaŭ kvar-kvin jaroj li ricevis ĉaron da arbara humo por siaj potplantoj. La humamaso kuŝis iom da tempo ĉe la rando de la hortikulturejo. La postan someron aperis la unuaj balzaminoj, kaj jaro post jaro ili disvastiĝis kaj nun atingis de unu fino de la entrepreno ĝis la alia kaj ankoraŭ eĉ konsiderindan distancon en la ĝardenon de la najbaro. Tra tiuj jaroj oni povis observi la progresantan fronton de la balzaminaj trupoj, ĝis fine ili nun okupadis la tutan hortikulturejon.

La balzamino kun sia fragila sukstreĉo estas ĉarma planto. Ĝi havas fajroruĝan tigon, freŝe verdajn foliojn, flavajn kun ruĝaj punktoj, ĝia longa frukto estas kapsulo kun multaj grajnoj. La frukto estas la pafilo de la planto. Se oni tuŝas per fingro ĝian pinton, ĝi krakete eksplodas, kaj grajnoj dissaltas en ĉiujn direktojn. En frakcio de sekundo la diskrevinta frukto retroruliĝas kaj finas sian

ekziston falante al la tero kiel taŭzita fadenaro, dum la grajnetoj rapidegas for de la gepatra planto. Aktiva, drama memdisvastigo de semo.

*El **La vivo de la plantoj**. Popularscienca eldonserio n-ro 1. J. Régulo (Stafeto), La Laguna 1957, p. 69-77.*

Juan Régulo Pérez

DE LA HESPERIDINAJ ĜIS LA KANARIAJ INSULOJ

Por la antikvuloj la Elizea Kamparo, la Hesperidinaj Insuloj, la Lando de la Beatuloj aŭ la Feliĉaj Insuloj – malsamaj nomoj por la sama afero – konsistigis parton de la realo kaj de la mondo. Temis ja pri mondoparto malmulte konata kaj ĝenerale rigardata kiel nealirebla, sed des pli dezirinda kaj alloga en sia timiga malproksimo. Poetoj prirevis la Landon de la Beatuloj kiel certan sed al ili ne donitan feliĉon; iel simile al la fakto kiel loterio prezentas en si certan esperon – ĉar ja ĝi findonas pozitivan rezulton –, sed espero preskaŭ nula por ni, pro tio, ke apenaŭ ekzistas probablo, ke tiu rezulto trafos nin.

Trajtoj komunaj al ĉiuj tiuj insuloj estas, ke en ili regas ĉiam milda kaj senŝanĝa klimato; ke tie la grundo, abunde akvumita kaj rosumita de zefiroj, kreskigas per si mem ĉiajn fruktojn, kaj ke tie la homoj ĝuas longan kaj senpenan vivon kaj mortas en dolĉa agrablo, sen ia ajn doloro.

La helenoj, kiuj konsistigis grandiozan poetan, filozofian kaj kreivan popolon, sed kiuj en la sama mezuro estis realismaj kaj praktikaj homoj, eklokis la Hesperidinajn Insulojn transe ĉe la okcidento de Libio, sur kelkaj realaj insuloj, kiuj samtempe estis la Ĝardeno de la Hesperidinoj de la pramito, kun la oraj pomoj de la juneco, kaj, krome, la Kamparo, kie loĝis la beatuloj.

Kaj efektive, ĉe la malproksima Okcidento ekzistas insuloj, al kiuj konvene adaptiĝas la priskriboj de la poetoj, eĉ mem sub iliaj hodiaŭaj cirkonstancoj. Temas pri Kanariaj Insuloj, kiujn konis ĉiuj marveturantaj popoloj de la unua jarmilo antaŭ nia erao. Kelkaj fakuloj kontestis tiun lokigon, sed tio ŝuldiĝas al la fakto, ke ili ne bone rimarkis, ke la antikvaj tekstoj kunfandis imagitajn aŭ poeziajn rakontojn kun nekonataj aŭ konfuzaj geografiaj realaĵoj. Tion ni sufiĉe certe povas nun spuri, laŭ geografoj kaj historiistoj de la klasika antikveco. Jen do trove-prova skizo pri la maniero kiel kruciĝis kaj kunfluis sur la realan geografion de Kanarioj la klasikaj komprenaĵoj pri tiuj mirgeografiaj insuloj kun la mitoj pri Atlanto kaj la Drako.

La Hesperidinaj Insuloj

La Hesperidinoj estas mito. Temas pri mito, kiu naskiĝis en la imago de la helenoj – eĉ se kun profundaj kretaj kaj egiptaj radikoj – kaj de la helena mitologio pasis al la romana kaj de ambaŭ al la moderna literaturo. La mito pri la Hesperidinoj komence sidis ĉe la Plejadoj aŭ stelsepo de la konstelacio Taŭro, kiuj steloj helpis la helenojn por orientiĝo dum navigado kaj de kiuj la egiptoj deiris por fiksi, antaŭ kvar jarmiloj, la komencon de la printempo. Tiel la Hesperidinoj kaj la Plejadoj ligiĝis al simbolo de juneco kaj printempo.

Sed tiu ĉi mito, unue deirinta de la egipta eskatologio, baldaŭ kruciĝis kun alia el la sama eskatologio, nome tiu, kiu prezentas la homajn animojn irantaj kun la suno ekde Oriento kaj sin kaŝantaj en Okcidento. Tiamaniere, la mito de la Plejadoj, de unu flanko, kaj tiu de la animoj marŝantaj al Okcidento, de la alia, koincidis en la saman geografian direkton. Dum multaj jaroj la mito vojaĝis de la kruda realo de Italio, Iberio kaj Libio, de ĉi ties malmilda geografio, ĝis la konfuze implikitaj konceptoj de la astronomio kaj de la vivo de la steloj; kaj, jen ĝi fiksiĝis sur pli-malpli konataj lokoj, jen ĝi kroĉascendis ĝis difuzaj metafizikaj imagaĵoj aŭ eskatologiaj ideoj pri transmondo. Tial ne estis ĉiam eble koincidigi en koheran rakonton la dirojn de ĉiuj aŭtoroj rilate la miton de la Hesperidinoj; la diverĝoj ŝuldiĝas, ĉu al pli forta dozo da imago aŭ spiritualismo de ilia filozofia aŭ religia mondo, ĉu al pli granda realisma krudeco de ilia mitologio.

Ĝenerale, la Insuloj de la Hesperidinoj estis belega mito de la oceana malproksimo. Jam la *Odiseado* rakontas pri la Lando de la Beatuloj aŭ Elizea Kamparo, kie post la morto loĝas la herooj en eterna printempo; pri la insuloj Eea kaj Ogigia, respektivaj loĝejoj de Kirka kaj Kalipsa; pri la insulo Siria, patrujo de Eŭmeo; pri la insulo Sĥeria, la lando de la feakoj... Hesiodo estas la unua, kiu baptis ilin per la ĉarme-rava nomo *Insuloj de la Beatuloj*; li estas same la unua, kiu priskribas ilin kiel ĝardenon de la gedioj, plenan de oraj fruktoj, kie loĝas Atlanto kaj kies gardado estas komisiita al la Hesperidinoj[1].

La Hesperidinoj, filinoj de la Nokto, estas la Okcidentulinoj, la Vesperidinoj, kuŝantaj preter la sunkaŝejo. Oni devis do serĉi ilin je la okcidenta direkto[2]. Kaj bela ĥoraĵo de Eŭripido lokigas tiun Ĝardenon trans la Heraklaj Kolonoj, sur iuj insuloj de la Oceano. Post ĉi tiu lokigo, ekzistas konkretaj atestaĵoj de helenaj aŭtoroj, konintaj la realan geografion de la pralibia Okcidento, kiuj, en maniero tute preciza kaj speciale detala, diras kiuj kaj kie estas la Hesperidinaj aŭ Feliĉaj Insuloj kaj la monto Atlanto, al kiuj rilatas nia temo. La plimulto de la atestaĵoj de la helena antikveco materiigis la Hesperidinojn, ne sur iu ajn pralibia regiono, sed ĝuste en grupo da sep insuloj, situantaj ĉe la paralelo, kie la Suno sin kaŝas. Vero estas, ke kelkaj aŭtoroj parolas pri tri aŭ kvar Hesperidinoj; sed ĝenerale la mitologio, la plimulto de la verkistoj kaj la plej ortodoksa eŭhemerisma interpreto de la mito normale kalkulas sep Hesperidinajn Insulojn. Resumas antaŭajn rakontojn kaj ĝuste konkretigas ilin Maksimo, sofisto el la urbo Tiro, kiu laŭ preciza maniero fiksas la geografion de la *Ἑσπερίδες* aŭ *Fortunatæ*, ne sur mita, fantazia aŭ nebula regiono, sed sur sep realaj insuloj, kuŝantaj ĉe la maro, kiu kaŝas la Sunon, apud la okcidentlibia bordo. – Tiajn kondiĉojn plenumas nurnure Kanariaj Insuloj.

[1]Ne tute ĝuste interpretis Plaŭto la hesiodan nomon *αἱ τῶν μακάρων νῆσοι* per *Insulæ Fortunatorum*, laŭ kiu interpreto la postaj verkistoj Mela, Plinio k. a. diris *Insulæ Fortunatæ*; nur Horatio sciis ĝuste traduki la helenan nomon *μακάρων νῆσοι* per la latina *Arua Beata*.

[2]Cetere oni bone scias, ke la helena vorto *ἕσπερος* egalas la latinan *uesperus*, kaj ke la klasikaj nomoj tre ofte havas spureblan semantikan substraton, respondantan al reala fakto.

Kaj se laŭ la mito, en diro de Hesiodo, la Hesperidinoj gardadis la orajn pomojn de la juneco kaj loĝadis en la ora ĉielrando, tiu diro ankaŭ konvenas al Kanarioj. Temas pri la oraj pomoj, kiujn Gea donis al Hera ĉe la edziniĝo al Zeŭso; Heraklo, post kiam li venkis la Drakon, reprenis kaj redonis ilin al Atena. Nu, inter la fakuloj ne regas akordo kiun frukton reprezentas tiuj *χρύσεα μῆλα* de la mitologio. La filologio ne helpas, ĉar *μῆλα* estas ĝenerala nomo por ĉiu arba frukto, kaj *χρύσεα* tre probable ne estas aliaĵo ol poezia epiteto, kiel ofte okazas en la prahelenaj tekstoj (ekz. Pindaro, kiu parolas pri *oraj* floroj). La identigo de *μῆλα* al *pomoj* verŝajne havas genealogion paralelan al tiu, kiu identigas al *pomo* la frukton, kiun Eva donis al Adamo, ĉar ja la biblia teksto ne diras pri kiu frukto temas, kiel same ni ankaŭ ne scias kiujn fruktojn produktis la arbo de la vivo, al kiu rilatas la eterna juneco de la biblia paradizo. – Tial, kiu ajn el la bonegaj fruktoj, kiuj sen kultivo pendis de la kanariaj arboj kaj kiuj igis la kronikistojn de la konkero dum la 15-a jarcento nomi ilin manao, povis ja esti la fruktoj de la Hesperidinoj.

La monto Atlanto

Mencias unuafoje la lokigon de la monto Atlanto la serioza kaj verama Herodoto, jam kvin jarcentojn antaŭ nia erao. Liaj vortoj estas tre interesaj; kaj ĉar multfoje oni citis ilin laŭ mistradukoj kaj sekvaj miskonkludoj, jen la originala teksto:

> *Ἔχεται δὲ [...] οὖρος τῷ οὔνομά ἐστι Ἄτλας· ἔστι δὲ στεινὸν καὶ κυκλοτερὲς πάντῃ, ὑψηλὸν δὲ οὕτω δή τι λέγεται ὡς τὰς κορυφὰς αὐτοῦ οὐκ οἷά τε εἶναι ἰδέσθαι: οὐδέκοτε γὰρ αὐτὰς ἀπολείπειν νέφεα οὔτε θέρεος οὔτε χειμῶνος. Τοῦτον κίονα τοῦ οὐρανοῦ λέγουσι οἱ ἐπιχώριοι εἶναι*[1].

La citita helenlingva paragrafo troviĝas en teksto, kie Herodoto priskribas la translibian okcidentan Oceanon (4-a Libro, 184-a ĉapitro); kaj ja neniu alia monto povas konveni al tiu priskribo krom la monto de Tenerife, vere svelte konusforma, preskaŭ ĉiam neĝkovrita, akre krutdekliva kaj pli ol 3 720 metrojn alta super la marnivelo, alteco preskaŭ nekonata de la klasika mondo.

Mela insistas pri tiu punkto, kiam li lokas tiun monton sur la Hesperidinaj Insuloj, kaj Solino, kiu sciis ĝin neĝokovrita preskaŭ dum la tuta jaro, diris: *Vertex semper nivalis [...] lucet nocturnis ignibus*. Tio aludas la vulkanon de la monto Tejde kaj estas definitiva situigo: neniu alia aktiva vulkano ekzistis aŭ ekzistas en okcidenta Afriko aŭ sur la atlantikaj insuloj – almenaŭ ne dum la lastaj tri mil jaroj.

---

[1]Jen mia interpreto de la herodota teksto: "Troviĝas [en la Oceano] monto, kies nomo estas Atlanto; ĝi estas akra kaj tute konusforma, kaj laŭfame tiel alta, ke ĝian pinton ne atingas la vido, ĉar ĝin neniam forlasas la nuboj, same somere kiel vintre. La landidoj diras, ke ĝi estas la subtenilo de la ĉielo".

Sed eble la plej konvinka pruvo estas la priskribo de Maksimo el Tiro, kiun ni jam citis. Li diris, ke Atlanto gardas la orajn pomojn de la Hesperidinoj kaj ke ĝia situo estas ĉe la okcidenta limo de la konata mondo, kie la Suno sin kaŝas. La ideoj kaj vortoj de Maksimo estas speciale interesaj koncerne la monton Atlanto kaj la Hesperidinajn Insulojn, ĉar konkrete li esprimas jenon: a) Zeŭso estis aliiginta Atlanton je monto; b) tiu monto staras sur insulo; c) tiu insulo estas unu el la sep Hesperidinoj.

Hodiaŭ la monto Atlanto staras sur la nordokcidento de Afriko; sed tiu situigo ŝuldiĝas al la tre lamaj geografiaj konoj de la Mezepoko, kiam Kanarioj estis aŭ nekonataj aŭ forgesitaj. Maksimo el Tiro, koninto de la vera geografio de la libia nordokcidento, precizigas, ke la monto Atlanto staras sur insulo, kaj ne ĉe la okcidenta bordo de la firmtero. Laŭ tio, oni povas kompreni, aŭ ke la helena geografo Maksimo navigis tiun regionon, aŭ, pli probable, ke li havis tre ekzaktajn informojn de antaŭaj vojaĝintoj aŭ el helenaj, fenikaj, sudiberiaj aŭ libiaj navigistoj pri la vera geografio de Kanarioj. Sufiĉas citi nur lian poezian priskribon de la monto Atlanto: La malbeno de Zeŭso aliigis Atlanton je alta monto, kies pinto kaŝiĝas inter la nuboj; la fadenoj de lia barbo iĝis neĝaj kaj frostaj strioj, kaj la supraj membroj de lia korpo ŝajnis rokeca muskolaro; ĉirkaŭ lia talio kreskis vastega pinarbaro, en kies apudeco etendiĝas la plej bela valo de la mondo. Ĉi tiu priskribo estas preskaŭ laŭvorta traduko de la teksto de Maksimo (38,125). Konantoj de la okcidento de Afriko scias bone, ke nur la insulo Tenerife plene koincidas kun la vortoj kaj la penso de Maksimo, kaj sekve, ke la monto Atlanto identiĝas kun la monto Tejde[1]. – Same oni povus konkludi el atenta studado de la ĉi-rilataj priskriboj de Ovidio, Vergilio, Mela k. a.

La Drako

Antaŭe ni jam diris, ke en la Ĝardeno de la Hesperidinoj estis Drako, kiun Heraklo venkis. Nu, ĉu Kanarioj posedas ion, kion oni povas rilatigi al la konsistigaj karakterizaĵoj, kiujn la klasika antikveco asignis al la Drako de la Hesperidinoj? Unue ni vidu la distingaĵojn de la mita Drako. – La Drako aperas kiel kruelega, fajrokula besto, gardŝirmanto de fontoj, virgulinoj, ĝardenoj aŭ trezoroj; ĝi estas haladzospira monstro, ĵetanta fajron per unu aŭ pluraj buŝoj kaj havanta aglungegojn, grandajn vespertecajn flugilojn, egan voston kaj serpentan kapon. Esence tiaj estis la klasikaj drakoj, kaj tia estis tiu, kiun Heraklo venkis.

Kiel ni jam diris ĉe la okazo pri *ἕσπερος / uesperus*, la helenaj imagaĵoj aperas preskaŭ ĉiam kiel personigo aŭ plastika reprezentaĵo de natura elemento. Tre verŝajne, laŭ nia opinio, ĉi-okaze temas pri la personigo de tiu nemezurebla forto de la Naturo, kiu eliras el sia kaverno, en la internaĵo de la Tero, kie ĝi loĝas, kaj paŝas, ĵetante fajron kaj brilegon per sia rigardo kaj ĉion ruinigante. Kiuj iam povis vidi erupcion de vulkano, tiuj certe povas formi al si bildon, laŭ kiu eblis

[1]Tie ĉi ni devas atentigi, ke tre verŝajne la Oceano ricevis sian nomon *Atlantika* el la Insuloj, kaj konkrete el la monto de Tenerife, kaj ne inverse.

al la homa imago formi la sintezan kaj mitan elpensaĵon de la Drako. Imagu kiel aperas vulkano en la nokto, kiel ĝi ŝprucas kaj disverŝiĝas je multaj kapoj aŭ riveroj sur montoj kaj kampoj; ĝia vaporo, ĝia haladza spiro ĉiujn atingas, varma, terurveka, sulfurodora; ĝi ĵetas ĉionmanĝantan fajron; ĝi serpentumas, kvazaŭ supermezura saŭro, tra valoj, kaj, nehaltigebla, ĉion detruas. Dum epoko kiel la helena, kiu ĉion animigis, kiu metis nimfojn ĉe fontoj kaj riveroj, kiu diaĵe personigis arbojn kaj lokojn, dum tiu epoko estas bone kompreneble kiel, surbaze de spertitaj vulkanaj erupcioj, la homoj imagis kaj kreis la Drako-miton. Tiel la navigistoj de la unua jarmilo antaŭ nia erao, kiuj laŭveturis la kanariajn marbordojn, povis kredi, dum noktoj de tiam oftaj vulkanaj erupcioj de la Insuloj, ke la Drako vekiĝis, sputas flamegojn kaj blekegas, defendante la Hesperidinojn.

Sed estas ankoraŭ pli. Ĉi tiu mito de la pratempa Drako akiris realan kaj botanikan enkorpiĝon en la fama drakarbo de Kanarioj[1]. Temas pri majesta arbo, ekskluziva de Kanarioj, kiu kreskas malrapide kaj vivas jarmilojn. Hodiaŭ troviĝas sur Tenerife imponaj ekzempleroj, kiujn oni diras aĝaj inter 3 000 kaj 4 000 jaroj, t. e. ili povus roli kiel vidatestantoj de la Trojo-milito aŭ de la konstruado de la egiptaj piramidoj. La enkorpigo de la Drako-mito en la kanarian drakarbon ŝuldiĝas al serio da cirkonstancoj, kiuj apartigite havas tre malsaman gravecon, sed kiuj, per interĉena koincido, nome kunfluis al tiu singulara konkretiĝo.

Tiu fama kanaria vegetaĵo eligas ruĝan kaj densan rezinon, kiun la prafarmakopeo konis sub la nomo *draksango*[2], dum al la helenaj kaj romanaj naturistoj ĝi estis familiara per la klasikaj terminoj *cinnabari* aŭ *cinnabaris*[3]. Kaj eĉ se komercistoj kutimis falsigi la draksangon per mineralaj kaj ĥemiaj produktoj, por akiri pli grasajn profitojn, tiuj, kiuj praktikadis medicinon, sanigarton, magion aŭ sorĉaĵojn dum la antikveco, tiuj ĝin serĉis aŭtentika, nome de Kanarioj. Ĉar ja oni naive kredis, ke temas pri animala sango, kvazaŭ la mita Drako estus elsangigebla!

[1]Mi permesas al mi proponi, por *dracæna draco* L. de la naturistoj, la nomon *drakarbo* en Esperanto, simile al la klasika *draco arbor*, al la germana *Drachen(blut)baum* kaj al la angla *dragontree*. La franca *dragonnier* kaj la portugala *dragoeiro* estas en la sama linio: en ambaŭ lingvoj temas pri derivaĵo de la vorto, per kiu ili nomas la drakon: *dragon* kaj *dragão*, respektive. – Wüster kaj aliaj vortaristoj proponis la terminon *draceno*, kompreneble pli sciencan, sed ankaŭ malpli elvokivan. – La hispana nomo de la arbo, *drago*, estas, tute simple, malnoviĝinta nomo de la drako, t. e. dum jarcentoj la hispanlingvanoj nomis per la sama vorto la mitan monstron kaj la kanarian vegetaĵon.

[2]Kion la mitologoj kaj la malnova farmakopeo nomas *draksango*, estus pli ekzakte kaj science nomi *drak(arb)rezino* aŭ *dracenrezino*; sed por la nuna okazo mi preferas pluuzi la malnovtempan terminon.

[3]El la termino *cinnabari* venas la esperanta *cinabro* (tra la franca *cinabre*), angla *cinnabar*, germana *Zinnober*, hispana *cinabrio*, itala *cinabro*, rusa *kinovar'* ktp, sed kun la ĉefa klasika senco: "ruĝkolora mineralo (= sulfido de hidrargo)", "ruĝkolorigilo". La alia klasika senco, "draksango", jam registrita de la kuracisto Dioskorido meze de la unua jarcento de nia erao, ne transiris niajn modernajn lingvojn.

La eksteraĵo, laŭ formo kaj strukturo, de la drakarbo, kun sia krusta kaj skvameca ŝelo, ŝajnas nuda korpo de serpento; kaj eble bone helpis la alproksimiĝon de la botanika kreskaĵo al la helena mito la plurkapeco de ambaŭ estaĵoj, ĉar se oni rompas pinton de drakarbo tuj ĝi kreskigas plurajn novajn tigegojn, kiuj je reaj senpintigoj ripetas la fenomenon; tio donas al la vegetaĵo vere monstran strukturon. Se oni aldonas, ke ĝi posedas durajn kaj akrapintajn, randtranĉajn foliojn, la tuto taŭge kunhelpas la similigon.

La kanaria medio

Kvankam jam la klasikuloj sciis, ke la nomoj Elizeaj, Feliĉaj aŭ *Fortunatæ* ne plene kongruas al la realo de niaj Insuloj, kaj Solino mem, kiam li priparolis la Arĥipelagon, diris, ke *infra famam vocabuli res est*, tamen ĝis hodiaŭ Kanarioj firme eltenis la prestiĝon kaj restis unualoke inter la teraj paradizoj. Ja la klimato estas vere ideala; nun abundas la plej bonaj bananoj kaj tomatoj de la mondo, same kiel unuaranga vino plurjarcente fama, sukerkanoj, figarboj.... La vivo estas preskaŭ nekredeble malmultekosta. La pejzaĝo montriĝas plene idilia, ĉiupaŝe malsama, kun laŭgrada sinsekvo de daŭraj neĝoj ĝis varmaj dezertaj sablaroj, inter kies ekstremoj troviĝas plaĉaj valoj, belegaj ĝardenoj, allogaj ravinoj, vegetaĵara diboĉo, ravaj aŭ timigaj marbordoj, imponaj rokegoj, fendoj aŭ apikaĵoj, aŭ apartigitaj lokoj, kie ŝajne la vivo haltis antaŭ jarmiloj kaj daŭras senŝanĝe kiel dum la patriarkaj tempoj...

Ĵus aperis (somere, 1956) rezulto de enketo, kiun faris la usona *Globe Trotters Club*, laŭ kiu el la kvin plej famaj teraj paradizoj, al Kanarioj apartenas la unua loko. La enketo rangigis jene la terajn paradizojn: 1. Fuerteventura (Kanarioj), 2. Ajijic (Meksikio), 3. Moorea (Tahitio), 4. Mallorca (Balearoj), 5. La tropika atolo Granda Kajmano kun sia ĉefurbo Georgetown. Nu jen do kiel la 20-jarcenta statistiko kunhelpis pravigi la helenan intuicion!

Konkludo

Resume do, kunigante tiujn ŝajne malkoherajn elementojn, nome la altega monto Tejde – la dua laŭ alteco de ĉiuj montoj konataj de la antikva mondo –; la oftaj ĉiondetruaj vulkanaj erupcioj – mem la monto Tejde estis tiam aktiva vulkano –, kaj la draksangaj vegetaĵoj, kovritaj de ŝirantaj folioj, surfone de eĉ se reala tamen dubatingebla transfirmtera arĥipelago, tiel ja oni povis forĝi la inĝenian alegorion de la Drako kun la danĝeroj minacantaj tiujn, kiuj kuraĝis ĝin inciti. Kaj ĉar tiuj elementoj troviĝas, kune, sole kaj nure en Kanarioj, lando de ideala klimato, spontaneaj bongustaj fruktoj – tiom karaj al la vegetaranaj helenoj! – kaj belega misterrava pejzaĝo, sekve do ekde praa antikveco la Arĥipelago estas samtempa sidejo kaj pravigo de tiu ĉarma mito, kiu ĝis nun vivis en harmonia simbiozo kun la Insuloj.

*El **Sciencaj studoj**. Internacia Scienca Asocio Tutmonda, Kopenhago 1958, p. 75-82.*

Leander Tell

PRI LA KVATERNARA EPOKO KAJ LA GLACIEGAJ PERIODOJ

La religia kredo pri iu diluvio, t. e. grava subakviĝo de la tuta tero, ricevis subtenon kaj apogon de la scienco jam en la deksepa jarcento. En kampoj kaj rokoj oni ektrovis ŝtoniĝintajn skeletojn de estaĵoj, evidente malaperintaj pro drono aŭ subakviĝo. La granda C. de Linné (1707-1778) ekz-e pro tiaj fosilioj en montaj tavoloj deklaris, ke la monto iam fariĝis fundo de maro aŭ ĉiuokaze iel subakviĝis. Trovinte tiajn marestaĵojn en rokoj de Alpoj, Pireneoj, Balkano, Andoj kaj Himalajo oni preskaŭ konvinkiĝis je la penso, ke la tuta mondo iam estis komplete subakviĝinta.

Tiu komplika ektrovo, kiu poste klare montris, ke la mondo ne nur fojon sed multfoje subakviĝis, devigis la eminentan francan scienciston G. de Cuvier (1769-1832) akcepti la faman teorion pri ripetitaj katastrofoj, pri kio mi cetere rakontos en la dua parto de tiu ĉi libro. Aliaj sciencistoj tamen ne kontentiĝis kun la sama teorio. Unue la aperoj estas malsimilaj en diversaj mondopartoj, due la erozio klare montras, ke ne nur subakviĝo sed grandegaj riveroj agadis, kaj trie la grandegaj amasoj da sablo kaj ŝtonoj aperantaj en morenoj estas plej verŝajne postsignoj de glaciego aŭ pli ĝuste glaciegoj. Alia problemo estis, ĉu morenoj fariĝis kaj "vagantaj ŝtonegoj" transportiĝis per glacio aŭ ondoj en maro aŭ per glacia rivero. Eminenta sciencisto, angla profesoro Ch. Lyell (1797-1875), provis sistemigi la diversajn teoriojn kaj fakte elpensis geologian skemon ankoraŭ ĝenerale akceptitan. Li ekz-e difinis la supre priskribitajn praepokojn en la evolucio de la tero tiel admirinde perfekte, ke modernaj esploroj ne bezonis multe korekti lian skemon.

La demandon pri la glaciegoj li tamen ne solvis. Sed feliĉe tiu tempo estis plena de multaj aliaj sciencistoj, kiuj, liberigitaj el antikvaj teorioj, nun serĉis naturan kaj ĝenerale kompreneblan klarigon pri diversaj teraj fenomenoj. La evoluciaj teorioj de la juna Ch. Darwin (1809-1882) skuis la mondon, kaj eĉ se ne tute akceptante tiujn novaĵojn aliaj esploristoj tamen sammaniere provis "repensi" la faktojn, revolucie ŝanĝante la mondon de ideoj. La fama sveda geologo Sven Nilsson (1787-1883) tiel disputis kun la simile fama franco A. T. Brongniart (1770-1847) kaj la mondkonataj svisaj profesoroj L. J. R. Agassiz (1807-1873) kaj H. de Saussure (1767-1845) pri iama ekzisto de glaciego, en la maro naĝantaj glacirokoj, aŭ glaciaj riveroj.

Iom post iom oni sukcesis konformigi la diversajn teoriojn pri kvaternaro, kiu pruviĝis sola per si mem inda je specialaj studoj. Precipe la paleontologio evoluadis dank' al tiuj studoj, kiel montriĝas en nia ĉi-libra traktaĵo pri la

homiĝado; kaj la famaj profesoroj M. Hoernes (1882-1917) kaj H. Obermaier (1873-1946) el Aŭstrujo kune kun la franca abato H. E. P. Breuil (1877-1961) publikigis ekscitantajn ekzaktajn sciigojn pri diversaj kvaternaraj homaj rasoj tiel bone, ke fine ŝajnis, ke oni pli bone konas la estintaĵojn ol la aktualan mondon. Fondiĝis granda tutmonda asocio de kvaternaraj esploristoj, kaj en 1952 ankaŭ fondiĝis speciala asocio je la memoro de Hugo Obermaier, de kiu la plej konataj nunaj paleontologoj, geologoj kaj arĥeologoj estas membroj, kaj kiu asocio eldonas elstarajn sciencajn traktaĵojn.

La plej elstara eminentulo de kvaternara scienco tamen estas la germana profesoro A. P. Penck (1858-1945), kiu post multaj jaroj da studoj kaj esploroj, precipe en Alpoj, fine povis difini iujn glaciegajn epokojn, nomante ilin laŭ la lokoj, kie ili postlasis klarajn signojn. Same kiel la arĥeologoj Lartet-Christy iam nomis la prahomajn rasojn laŭ la grotoj, en kiuj la esploristoj ektrovis apartajn postsignojn (Crô-Magnon, Moustier, Madeleine ktp), Penck tiel nomis kvar diversajn epokojn de granda superglaciigo respektive Günz, Mindel, Riss kaj Würm. Aliaj geologoj aplikis la sistemon de Penck sur siajn landojn. En la norda Eŭropo oni ekz-e anstataŭe parolas pri Balta, Elster, Saale kaj Vistula epokoj, kaj en Norda Ameriko pri respektive Nebraska, Kansas, Illinois kaj Wisconsin glaciegoj.

Ĝenerale oni sistemigis la glaciepokojn jene: Günz komenciĝis iom post la fino de terciaro, antaŭ pli ol 600 000 jaroj, Mindel antaŭ 425 000, Riss antaŭ 350 000 kaj Würm antaŭ 120 000 jaroj. Oni ankaŭ bone sistemigis la interglaciajn epokojn, kiuj eble pli multe ol la glaciegoj mem fariĝis gravaj okazintaĵoj en la nova historio de nia tero, ĉar en kelkaj tiaj intertempoj la klimato estis eksterordinare varma, eĉ varmega. Pro tio la nun videblaj ŝanĝoj en la naturo inter kreskaĵoj, bestoj, prahomoj kaj homoj fariĝis tiel diferencaj, tiel malsimilaj. La geologoj, paleontologoj kaj arĥeologoj povas tial precize lokigi trovitajn fosiliojn en bone difinitajn kaj difineblajn ŝtupojn de evolucio.

Tre malfacile tamen estis lokigi iujn naturajn fenomenojn kaj iujn fosiliojn en la glacia periodo de Würm. Fine estis tute necese dividi tiun periodon en diversajn partojn, precipe konsiderante, ke ĝi estis la lasta evidenta glaciego, kies postsignojn oni ankoraŭ tre bone vidas kaj povas studi sur la norda duonglobo de la tero, speciale en la skandinaviaj landoj. Oni nome tre precize konas la regreson de la norda glaciego, kiu forlasis Skanion antaŭ ĉ. dudek mil jaroj kaj la departementon Jemtlando en meza Svedujo antaŭ ĉ. ok mil jaroj. Tiun ekzaktan kronologion eminenta sveda geologo, G. De Geer (1858-1943), difinis post multjaraj studoj de sezonaj kaj jaraj tavoloj en la postlasita glacia argilo, kiujn tavolojn aŭ videblajn strekojn li nomis *varvoj*.

Per longtempa studado de nunaj glaciegoj oni konvinkiĝis, ke la granda maso de la praglaciegoj estiĝis el neĝo. Malseka atmosfero kondensiĝas per malvarmaj ventoj, formante pli kaj pli densajn neĝadojn, kiuj kovras la polusan terparton per pli kaj pli dika kovrilo de neĝo. Densiĝanta kaj sin premanta, tiu neĝo formas iom post iom malmolan glacion.

Laŭ la teorio de De Geer la glacia kovrilo en varmiĝanta klimato regule degelas. La akvo penetras malsupren per poroj kaj fendoj al la tera fundo, kiu ofte tute ne estas frostiĝinta, depende de la fakto, ke la temperaturo de la glacio ĝenerale ne estas sub la nulpunkto, cetere izolante la teron kontraŭ la ekstera malvarmo. Tiel suba erozio formas i. a. argilon. Tiu argilo deponiĝas el la riveroj defluantaj sub la glacio kunportante ankaŭ enhavon de sablo kaj ŝtonoj. Klare tiu alfluo kaj depono dependas ekzemple de la sezona temperatura ŝanĝiĝado. Dum la somero pli da degelo kaj sekve pli da elfluo kaj depono. Dum la vintro preskaŭ nenia degelo kaj sekve eta aŭ nenia depono.

En ĉiu profilo de moreno aŭ argila termaso oni tial povas vidi iujn maldikajn strekojn aŭ liniojn, unuj helaj kaj iom pli dikaj, aliaj malhelaj kaj tre maldikaj. La depono dum somero klare formiĝas dike pro rapida alfluo kaj depono, sed vintre maldike kaj malrapide per malhela argilo. Fakte oni povas kalkuli kaj sekvi tiujn liniojn, el kiuj ĉiu linio signifas difinitan deponitan tavolon, milimetron post milimetro en multaj centoj kaj miloj da tiaj *varvoj*, klare kaj bone kalkulante multcentjare, eĉ multmiljare ripetitan gelon kaj degelon de antaŭenmigranta aŭ regresanta glaciego.

Ekzistas tial en morenoj kaj argiloj ofte same fenomeno kiel la ringoj en la sekco de arba trunko, per kies nombro oni kapablas difini la aĝon de la arbo mem. Fakte ne nur svedaj sed amerikanaj kaj alilandaj sciencistoj ankaŭ povis konformigi la ringojn de arba kreskado kun la varvoj de De Geer.

Pro la fakto, ke la lasta glaciperiodo estis tiel mallonga, oni devis kompletigi la sistemon de Penck, ĉar laŭ lia teorio Würm daŭris dum pli ol cent mil jaroj. Efike oni tial konvinkiĝis pri la sekvanta programo: post la glaciperiodo de Riss regis longa periodo kun seka klimato, formanta i. a. grandajn amasojn da leŭso. Dum komenciĝanta malvarmo la musteria homa raso migris tra Eŭropo. Post tio la glaciego, nomita Göttweig, sin iom retiris, kreante novajn grandajn morenojn. Post iu varma intertempo la glacio ree vastiĝis suden kaj okazigis la plej longan kaj plej malvarman periodon de Würm (la geologoj ĝin nomas Ĉef-würm). Tiel ŝanceliĝante la glacia epoko fine ĉesis, kaj la lasta granda glaciego, iam sin streĉinta ĝis la mezo de Eŭropo, regresadis norden.

Kial alvenis tiaj glaciepokoj? Kio estas la kaŭzo de tiu terura dika glacia kovrilo, kiu, ofte multajn kilometrojn dika, malrapide ruliĝis super la nordaj landoj kaj la plej altaj partoj de ne nur Eŭropo sed ankaŭ de aliaj nordaj terpartoj? Oni multe diskutis kaj eksperimentis por ekscii tiun kaŭzon. Per ekzamenado de mineraloj kaj fosilioj per modernaj fizikaj metodoj, i. a. per la karbono C-14, per studo de la kurbo de la suna aktiveco laŭ la teorio de la jugoslava profesoro M. Milanković (1879-), per kalkulado de la argilaj varvoj laŭ De Geer, per la metodo de polenoj, per paleontologiaj eltrovoj kaj per diluvia stratigrafio oni provis ekscii la historion de la glaciaj periodoj, sed la solan faktan kaŭzon oni ĝis nun ne trovis.

La nomita sciencisto Milanković laboras laŭ la monde konata teorio de la greka filozofo Hipparkos (150 a. Kr.) pri la precesio, t. e. la translokiĝo de steloj kaj planedoj. Milanković eltrovis ian regulecon inter klimata ŝanĝiĝo kaj la kurbo, kiun la terglobo faras ĉirkaŭ la suno. Per la samtempa moviĝo de la suno, tiu kurbo nome estas pli spirala ol precize cirkla. Tial la distanco inter la suno kaj la tero multe ŝanĝiĝas, ne nur ĉiujare, sed pli multe laŭ jarmiloj. Li kalkulis, ke daŭras ĉ. 40 000 jaroj inter ĉiu maksimumo de intensa suna aktiveco. Inter tiuj maksimumoj, malpli intensa radiado kreas malfavoran klimaton. Li per skemoj, tabeloj kaj diagramoj tial klopodis pruvi, ke la glaciaj periodoj de kvaternaro estas fizike lokigeblaj en la skemo de Penck kaj aliaj geologoj.

Per polenoj trovitaj, ofte profunde en sedimentaĵoj, oni povis difini la migradon de arboj, alterne aperantaj kaj malaperantaj en diversaj teritorioj kaj periodoj. Kaj per la paleontologiaj trovaĵoj oni simile fiksis la tipojn de iama, nun parte malaperinta bestaro.

Eble reformita teorio sur la bazo de la kalkuloj de Milanković povos fine solvi tiun malfacilan problemon. Eble la meteorologio per modernaj rezultoj el atmosferaj kaj kosmaj studoj povas helpi klarigi la kreskadon kaj dekadencon de glaciegoj. Eble la sismologoj kaj geologoj povos difini la ŝanceliĝadon de la tera akso, almenaŭ rilate al la vagantaj magnetaj polusoj de nia planedo. La moderna astrofiziko nome jam konstatis rimarkindan efekton de suna radia aktiveco rilate al la natura magneta "kampo" de la terglobo.

La elstara signifo de kvaternaro estas la jena: ĝi estas nia propra geologia epoko. Ĝiaj periodoj posedas la ŝlosilon de la estiĝo de la nunaj tipoj de kreskaĵoj, de la bestoj kaj de la homo mem. Ĝiaj diversaj postsignoj ne kuŝas tiel malproksime aŭ profunde kaj ne estas tiel transformitaj kiel la fenomenoj apartenantaj al pli fruaj geologiaj epokoj. Precipe la historio de la homaro apartenas plejparte al kvaternaro, kaj pro tio mi, kiel menciite, iom pli detale pritraktas tiun interesplenan temon en la dua parto. En tiu ĉi parto mi volas resti ĉe pure geologia temo, kaj fine priskribi iujn modernajn konceptojn pri la estiĝo de la nuna ekstera tera krusto.

*El **Estiĝo de la tero kaj de la homo**. Beletraj Kajeroj n-ro 38.*
J. Régulo (Stafeto), La Laguna 1969, p. 39-45.

Y. Väisälä

PRI SIMPLAJ ASTRONOMIAJ OBJEKTIVOJ

La unuaj teleskopoj en la 17a kaj 18a jarcentoj havis simplan lenson kiel objektivon. La ĉefa manko ĉe tia objektivo estas ĝia granda kolor-difekto, kromata aberacio. Ĉar la diametro de la disko, kiun estigas la kromata aberacio, dependas nur de diametro de objektivo estante rekte proporcia al ĝi, la angula grandeco de la kromata aberacio malgrandiĝas proporcie al la fokusa longeco de objektivo. Tial oni faris la teleskopojn iom post iom pli longaj, ĝis pluraj dekoj da metroj, dum la diametro de objektivo ĝenerale estis nur ĉirkaŭ dek centimetroj. La tubo mem estis ofte forlasata, la objektivlenso muntita sur alta turo kaj la okulario sur movebla stablo. Evoluigo de spegulteleskopoj kaj precipe la invento de akromataj objektivoj kaŭzis, ke simplaj objektivoj foriĝis el uzado ĉirkaŭ la finiĝo de la 18a jarcento. Nuntempe oni utiligas ilin en astronomio ĉefe nur kiel longfokusajn mirlensojn (miro = meridianmarko) por meridianinstrumentoj. Ankaŭ amatoraj astronomoj uzas kelkfoje simplajn objektivojn pro ilia malkara prezo.

Tamen la kromata aberacio eble ne estis la nura kaŭzo por forigi la simplajn objektivojn. Antaŭ du-tri jarcentoj la materialo por lensoj estis sendube ofte tre malbona kaj eble ankaŭ la lenssurfacoj ne estis sufiĉe korekte sferformaj. Sed oni povas demandi, ĉu estas necese prilabori la kromatan objektivon kun sama precizeco kaj el tiom bona vitro kiel la akromatajn objektivojn, ĉar la kromata aberacio estas ja grandega. Ekzemple ĉe lenso de 100 mm diametro la kolora disko estas ĉirkaŭ 1 mm!

La solvon de ĉi tiu problemo oni ricevas farante simplan objektivon kun astronomia precizeco kaj eksperimentante pri ĝi. Oni scias, ke rigardante fiksajn stelojn aŭ ĝenerale lumpunktojn per akromata aŭ spegula teleskopo, oni havas en la fokusa ebeno de teleskopo difraktan bildon, kiu ĉe uzado de normalaj relativaj aperturoj, estas de ordo 0,01 mm. Ĉirkaŭ la difrakta bildo vidiĝas unu aŭ pluraj interferaj franĝoj. Oni povas taksi objektivon kiel bona, se la difrakta bildo estas ronda kaj la interferaj franĝoj kompare malfortaj sen diverĝa lumo ĉirkaŭe. Sed oni vidas klaran kaj por precizaj mezuradoj uzeblan difraktan bildon ankaŭ per simpla objektivo, se ĝi estas zorgeme farita. Ĉi tia bildo estas unukromata kaj ĝia koloro ŝanĝiĝas laŭ la enfokusigo de la teleskopo. Mia disĉiplo, fraŭlino Liisa Helminen, faris eksperimentojn kun ebenkonveksa lenso de 200 mm diametro kaj 5 m fokusa longeco. La eksperimentoj estis farataj en laboratorio uzante punktforman lumfonton, artefaritan stelon, kiu estis en distanco de 40 m de la lenso. En la okulario oni vidis grandan kolordiskon kaŭzitan de la kromata aberacio, sed en ĝia centro vidiĝis klara difrakta bildo sen interferaj franĝoj. La bildo restis videbla tutan tempon, dum oni enfokusigis la

okularion 80 mm. Ĉe la plej ekstera pozicio de la okulario la difrakta bildo estis ruĝa kaj kiam oni ŝovis la okularion en la direkton al la objektivo, ĝia koloro ŝanĝiĝis je flava, verda, blua kaj fine viola malaperante poste. Fotografante la bildon aperis respektiva fenomeno. En la centro de la ĉirkaŭ 2 mm-a kolora diverĝa disko formiĝis neta difrakta bildo. Uzante konvenajn kolorvitrojn oni povis malaperigi la violan parton de la spektro kaj kun konvenaj platoj kaj kolorvitroj ĉefe nur la malgranda difrakta bildo restis videbla. Simile oni povas mallarĝigi la spektran regionon ĉe la vizualaj observoj per kolorfiltroj aŭ pli bone per interferaj filtriloj. Ĉiuokaze la perdo de lumintenseco estas elstara, sed malgraŭ tio precizaj mezuradoj estas fareblaj kun kromata objektivo.

La supre citita 200 mm-a objektivo estas uzita ĉirkaŭ 2 jarojn por determini la latitudon kaj deklinaciojn observante zenitproksimajn stelojn per zenittubo, kiun mi konstruis en Tuorla por la astronomi-optika institucio de Turun Yliopisto. Tiam montriĝis, ke steloj ĝis ĉirkaŭ 6-7a grandeco estas observeblaj per tiu objektivo. La zenittubo havas ankaŭ samdimensian akromatan objektivon, kiu ebligas observadon je 2–2,5 pliaj magnitudoj. Ĉar en la cititaj mezuradoj temas pri la determinado de la preciza pozicio de la difrakta bildo, la ĉirkaŭanta kolorrondo, kiu tute ne vidiĝas ĉe malbrilaj steloj, ne ĝenas mezuradojn. Koncernante brilajn stelojn, ekzemple γ *Cassiopeiæ*, kiu estas de la dua grandeco, la observado per kromata objektivo estas eĉ pli agrabla, ĉar la ĝenantaj interferaj franĝoj ne aperas ĉirkaŭ la difrakta bildo.

El la mezuradoj rezultiĝis ankaŭ, ke la precizeco atingata per kromata objektivo neniel estas malsupera al la precizeco per akromata objektivo, prefere kontraŭe. La meza eraro ĉe unu mikrometra mezuro de stelo estis ±0"20 ĉe observoj per akromata kaj ±0"14 per kromata objektivo. Certe nur kompare malmultaj observoj estis farataj per la kromata objektivo, sed la supre citito montras, ke kromata objektivo minimume egalas, eble eĉ superas akromatan ĉe precizaj mezuradoj. Mi ankaŭ faris rimarkinde pli grandan simplan objektivon (Ø = 390 mm, fokusa longeco 25 m), per kiu mi volas fari eksperimentojn por zonaj observoj. – Por la konstruota pli granda zenittubo (aperturo 400 mm, fokusa longeco 6,9 m) estos farata, por eksperimentaj celoj, krom akromata ankaŭ simpla objektivo.

Ĉe la citita simpla eksperimenta objektivo estas la aperturrilato (la rilato de la diametro al la fokusa longeco de objektivo) tiom malgranda, 1:25, ke la surfacoj de la lenso povis esti farataj sferformaj, sen ke la sfera aberacio ĝenas. Se la aperturrilato superas la permesitan gradon, oni povas malaperigi la sferan aberacion farante unu surfacon iom ekarta de sfero. En nia institucio estas faritaj por la meridianinstrumento de la observatorio de Lund du simplaj kolimatoraj objektivoj de 100 mm aperturo kaj 1,6 m fokusa longeco. La lensoj estas farataj senkomaaj. La rilato de la radio de surfacoj estas ĉirkaŭ 9:1. La malpli kurba surfaco estas deformata por malaperigi la sferan aberacion. Ĉar la kolimatoroj estos uzataj nur kiel helpteleskopoj ĉe la observoj per meridianinstrumento,

sekve ne por stelobservoj, la simplaj objektivoj tute sufiĉas, se unukromata lumo estas uzata kiel lumfonto, ekzemple la verda lumo de merkuro aŭ la flava de natrio.

Ĉe la menciitaj okazoj kaj ĝenerale ĉe la aparatoj uzataj por precizaj mezuradoj, simplaj objektivoj havas rilate al la akromataj superecon en tio, ke ilia enkadrigo kaj centrigo estas pli facila kaj sekura. Ĉe simplaj objektivoj la fleksiĝo de la lenso pro sia propra pezo kaj ŝanĝiĝo de sia formo pro temperaturaj variacioj estas pli malgrandaj ol ĉe akromataj objektivoj kun du aŭ pluraj lensoj.

Sed la supre citita eco de la simpla objektivo, nome ke la difrakta bildo restas neta eĉ ŝanĝante rimarkinde la bilddistancon, validas ankaŭ en kompare grandaj bildanguloj. Pro la kurbeco de la bildsurfaco la bildoj estigitaj per la akromata objektivo estas jam en distanco de unu grado ekster la akso elstare grandiĝintaj kaj elipsformaj. Ĉe la simpla objektivo vidiĝas kontraŭe amuzega fenomeno. Ni enfokusigu la teleskopon tiamaniere, ke ekzemple blua bildo vidiĝas en la akso. En la sama bildebeno ekster la akso tiam vidiĝas kolora kruco, kies unu direkto estas ekzemple verda, alia ruĝa. La centro de ĉi tiu kruco estas precize mezurebla. La verda linio estas kaŭzata per la verda sagitala bildsurfaco, la ruĝa per la meridiana surfaco. Ĉe la kromata objektivo oni havas tiamaniere 5–10-gradan mezureblan kampon.

Sama estas la afero uzante la simplan objektivon por fotografado. Por nia observatorio estas farita fotografilo, kies kromata objektivo havas diametron de 80 mm kaj fokusan longecon de 1 m. Oni ricevis sur tuta uzebla fotografa plato (diametro 120 mm, bildangulo sekve 6°40') mezureblajn stelbildojn. Tiel la kromata objektivo estas iamaniere anastigmata objektivo.

Kiel jam menciite, simpla objektivo estas ĉiam bone enfokusigita, eĉ se oni variigas ege la enfokusigon, la koloro de la difrakta bildo nur ŝanĝiĝas. Tio eble malgrandigas la atmosferajn perturbojn ĉe stelbildoj kaŭzataj per la atmosfero. Almenaŭ lensformaj perturboj ne povas malbonigi la bildon, nur ĝia koloro ŝanĝiĝas iom. Pere de sufiĉe longaj mezurserioj oni devus esplori, ĉu vere eblas atingi per la kromata objektivo pli grandan mezurprecizecon ol per la akromata, kiel la supre-citita malgranda mezurserio montras.

Farante altecmezuradojn de horizontproksimaj steloj la stelbildoj vidiĝas kiel mallongaj vertikalaj spektroj. La kolordiferencoj de steloj tiam kaŭzas sisteman eraron en altecoj. Uzante simplan objektivon la mezuradoj okazas en kompare limigita spektra regiono. Tial la altecobservoj devus esti malpli ĝenataj de sistemaj eraroj. Eble la afero estus esplorinda per praktikaj eksperimentoj.

Estu fine menciate, ke en lastaj jaroj estas faritaj por fotometraj celoj objektivoj, ĉe kiuj oni intence restigis iom da kromata aberacio. Ĉe sufiĉe brilaj steloj oni povus uzi ankaŭ simplan objektivon por fotometraj studoj.

El Sciencaj studoj.
Internacia Scienca Asocio Tutmonda, Kopenhago 1958, p. 129-132.

6
PRILINGVAJ ARTIKOLOJ

William Auld

MITOJ KAJ FAKTOJ PRI ESPERANTO

Estas mirinde, ke en nia scienca epoko, kiam sciencaj metodoj de kontrolataj provoj kaj eksperimentado, observado kaj objektiva pruvado estas aplikataj al preskaŭ ĉio, ekde lavpulvoroj ĝis la homa psiĥo, ankoraŭ restas pluraj temoj, kiujn oni traktas grandparte mitologiece kaj superstiĉece. La rezonado laŭ konstatitaj fenomenoj, kiu iom post iom liberigas la homan menson kaj la homan socion el la miljara stagno de la t.n. mezepoko, ial haltas ankaŭ nun antaŭ la teritorioj de kelkaj problemoj, en kies pritraktado pli efikas la emocioj kaj la antaŭjuĝoj ol la racio. Tiaj teritorioj estas, ekzemple, la naciismo, la politiko, kaj tiu, kiu hodiaŭ min koncernas, nome la lingvo, kaj tute aparte kaj speciale la internacia lingvo. Tre verŝajne tre malmultaj temoj en la mondo ricevadas tiel torditan kaj malkleran traktadon, kiel Esperanto. Tre ofte ŝajnas, ke, rilate nian lingvon, granda parto de la mondo vivas ankoraŭ en la mezepoko. Ĉar vi devas kompreni, ke en la mezepoko la granda, kaj ofte la sola, kriterio pri iu ajn fenomeno estis Aŭtoritato. Se iu volis, ekzemple, verki traktaton pri la rano, eĉ ne venis al li en la kapon iri por kapti kaj observadi vivantan ranon. Anstataŭ tio, li traserĉis ĉiujn librojn por trovi, kion diris aliaj aŭtoroj antikvaj kaj tiutempaj (sed ĉefe antikvaj, ĉar ju pli antikva des pli aŭtoritata) pri ranoj, kaj ĉion li kompilis kaj eldonis kiel la verajn faktojn pri la koncerna temo. Tiamaniere ekestiĝis kaj estis daŭrigataj la plej absurdaj opinioj, kiujn plej elementa esploro estus refutinta. Ekzemple, dum jarcentoj la homoj, eĉ la plej kleraj, vere kredis, ke menstrua sango kapablas mortigi herbon, malbriligi spegulojn, velkigi vinbersprosojn, solvi asfalton kaj neforviŝeble rustmakuli tranĉilklingon. Tion la homoj kredis, kaj ne ĝis dum la deksepa jarcento, kiam juna franco, Jean-Jacques Bouchard, helpe de sia amatino, havigis al si iom da menstrua sango kaj ĝin efektive aplikis al herbo, spegulo, vinbersprosoj, asfalto kaj tranĉilklingo, montriĝis la malvereco de tiu kredo. Ĉu necese substreki, ke ankaŭ post tiu supozeble konvinka demonstro tre multaj homoj obstine kredadis plu, ke *tamen*... ktp; ĉar opinio tiel malnova kaj respektinda, akceptita de tiom da aŭtoritataj personoj, ja ne povas esti senbaza, malgraŭ la konfesinde iom fortaj argumentoj de tiu strangulo Bouchard? Finfine, la homoj ne tiel volonte rezignas pri siaj malveraj opinioj kaj antaŭjuĝoj....

Se ni prenas alian ekzemplon, ni povas vidi unu manieron, laŭ kiu tiaj falsaj kredoj povas naskiĝi, eĉ ankaŭ hodiaŭ. Dum pluraj generacioj, multaj kuracistoj opiniis, ke antimono estas kuracilo por preskaŭ ĉiuj malsanoj. La moderna medicino pruvis, ke tiu opinio estis erara; nur por unu tropika malsano la antimono vere estas kuracilo; por ĉiuj aliaj la uzado de antimono ne valoras la

riskojn. Malgraŭ tio, ĝia uzado daŭris plurajn generaciojn; konfesinde la ekonomio ludis rolon en tiu daŭrado, ĉar antimona pilolo ne eluziĝis, kaj la saman pilolon oni povis uzi fojon post fojo (ĝin reakirinte el la noktovazo kaj ĝin lavinte) kaj eĉ transdoni ĝin al siaj posteuloj; sed kiel la opinio ekestiĝis? Ĝi ekestiĝis pro analogio: la aŭtoritata Parakelso skribis: "Kiel la antimono purigas la oron kaj postlasas neniun skorion, tiel en la sama formo ĝi purigas la homan korpon". La analogio estis la bazo de granda parto el la mezepoka argumentado kaj disputado, kaj ĝi estas *tute kaj absolute nescienca*. Tamen ĝi estas alloga, kaj eĉ en nia scienca epoko, ni trovas, ke ĝi estas multuzata en rilato, en miskompreniga kaj erariga rilato, al pluraj aferoj, interalie al Esperanto. Unu nia kontraŭulo skribis proksimume, ke prezenti Esperanton kiel modernan komunikilon estas kvazaŭ konkurigi aŭtomobilon el 1887 por la Granda Premio de 1964. Tio estas pura analogio, kaj tute falsa cetere. Unue, lingvo kaj aŭtomobilo havas absolute neniun econ komunan, ili simple ne estas kompareblaj. Due, la kritikinto fakte asertas, ke, kvankam aŭtomobilaj prototipoj ŝanĝiĝis inter 1887 kaj 1964, Esperanto tamen ne ŝanĝiĝis – kio estas malvera; bedaŭrinde, kvankam ĉiuj homoj scias ion pri aŭtomobiloj, nur la esperantistoj scias pri Esperanto kaj ĝia fakta evoluo. La citita analogio havas tiom da senco, kiom se oni dirus, ke la angla lingvo ne estas taŭga por la moderna vivo ĉar ĝi naskiĝis (en la formo, kiun ni konas) en 1066. Ni devas konstati, tamen, ke tre multaj homoj cerbumas analogie, kaj per tiaj ŝajnaj argumentoj ekestiĝas eraraj opinioj, kiuj fariĝas ĝenerale akceptataj, kaj tamen ne enhavas pli da vero, ol la mezepoka opinio, ke menstrua sango solvas asfalton. Multaj falsaĵoj disvastiĝis pri Esperanto, kiuj, kvankam science refutitaj per la metodoj de eksperimento, sperto kaj demonstro, estas konstante ripetataj de homoj, kiuj ne faris al si la penon informiĝi pri la faktoj, ĉu senintence ĉu pro konsciaj aŭ nekonsciaj ideologiaj kaŭzoj. Se tiaj opinioj portas la sigelon de Aŭtoritateco, al kiu ni bedaŭrinde ankoraŭ emas kliniĝi tiel same kiel la mezepokanoj, sub tiu formo, ke konata publika persono ilin ripetas kun la tuta pezo de sia reputacio publika pri iu tute alia afero, multaj personoj kredas ilin, kaj estas treege malfacile forigi eĉ per faktoj la antaŭjuĝojn tiel kreitajn en la mensoj de la publiko. Tiel fantaziaj estas tre multaj tiaj supraĵaj kaj nerespondecaj publikaj diraĵoj, tiel facile refuteblaj pere de sciencaj kaj praktikaj pruvoj, ke mi tre ofte vere tentiĝis jure procesi kontraŭ la dirintoj pro misfamigo; bedaŭrinde, akiri tiamaniere la justecon postulas pli da mono ol mi disponas. Tamen ĉu estas juste, ke publika persono povas skribi kaj disvastigi, ke "la esperantistoj trovas malfacile aŭ neeble konversacii pere de sia ĵargonaĉo"? Aŭ ke alia povas skribi, ke "ĝis nun neniun artverkon oni kreis en tiu ĉi lingvaĉo", kaj oni eĉ ne povas publike demandi, kiel li scias tion kaj sur kio li bazas sian aserton?

Oni povas demandi, kial entute multaj personoj sentas neceson tiel malhoneste kontraŭstari Esperanton. Mi memoras, ke foje iu konato eksciis, ke mi estas esperantisto, kaj tuj atakis la lingvon per diversaj pli-malpli konataj argumentoj.

Kiam ni estis diskutintaj dum duonhoro, kaj mi estis sukcese kontraŭstarinta al ĉiuj liaj punktoj, okazis iom longa paŭzeto. Finfine li diris, "Efektive, mi momente ne povas elpensi aliajn argumentojn kontraŭ via lingvo". Mi demandis al li, kial entute li sentas neceson elpensi argumentojn kontraŭ ĝi, kial li ne simple akceptas ĝin. Li rigardis min iom surprizite, kaj diris malrapide, "Mi ne scias". Lia sinteno ne estas malofta. Al multaj personoj, la ideo mem pri internacia lingvo estas malagrabla, ĉu aŭ ne ili konscias tion. Tre ofte tiu malagrablo estas, kiel ĉe mia konato, subkonscia – oni emus diri "instinkta", sed tiu termino estas maltrafa; tiaj t.n. "instinktoj" estas pli precize pavlovaj reagoj pro sentoj kaj dogmoj konstruitaj kaj ensorbitaj pere de la socio, en kiu ni vivas. Ni estu tre klaraj pri tio ĉi: estas tute eble kaj tute permesinde, ke iu kontraŭstaru pro ideologiaj motivoj la tutan koncepton pri internacia lingvo – kondiĉe, ke li klare asertas, ke laŭ lia opinio tia lingvo estas nedezirinda. Oni ne povas malhelpi, ke fanatika naciisto, kia estis elstare Hitlero, rifuzu la ideon mem de Esperanto (kvankam por tion fari li nomis ĝin "juda" lingvo!); evidente internacia lingvo, kiu egaligus ne nur la naciojn sed ankaŭ la individuojn, estus danĝero por li kaj liaj propraj konceptoj. Kaj kompreneble la samo validas en malplia grado por ĉiuj kontraŭuloj de la internaciismo kaj por ĉiuj ŝovinistoj. Krom tiaj personoj ekzistas ankaŭ homoj, kiuj tute honeste rajtas deklari sin indiferentaj al la tuta afero de la internacia lingvo, pro tio, ke ili mem ne sentas bezonon pri tia komunikilo, aŭ ĉar ili neniam havas kontakton kun eksterlando, aŭ ĉar ili iras eksterlanden turiste laŭ la vojaĝagentaj vojoj sub egido de kuriero, kiu solvas por ili ĉiujn surlokajn eventualajn dilemojn. Tiuj du kategorioj tipigas tute klare niajn malamikojn kaj niajn neamikojn, kaj, kvankam la unua kategorio havas fortajn motivojn por kontraŭbatali nian movadon, la dua kategorio, en sia pura formo, ne devus reprezenti malhelpon al ni, ĉar kiu estas efektive indiferenta, tiu ne havas motivojn por kontraŭstari aŭ eĉ interesiĝi pri nia kampanjo.

Sed kiam ni trovas – kiel ni ja tro ofte trovas – personon, kiu per unu spiro konsentas pri la neceso, eĉ la urĝa neceso, pri definitiva solvo de la lingva problemo, kaj per dua spiro malice kaj insulte atakas Esperanton, tio estas jam tute alia afero, kaj kompreni tiun fenomenon ni devas klopodi, kun la celo efike kaj trafe reagi. Ĉar tute evidente ekzistas nuda kontraŭdiro en lia sinteno, kaj tiu kontraŭdiro estas evidente intenca aŭ neintenca. Ĝi estas intenca nur en kelkaj okazoj, se temas pri homo ruze sabotema, kiu havas konsciajn ideologiajn motivojn por kontraŭstari la solvon de la lingva problemo, sed estas tro lerta por aperte deklari sian starpunkton. Ĝi estas senintenca en multegaj okazoj, kiam sinceraj homoj, pro anticipe alprenitaj sintenoj, vere ne kapablas rimarki la kontraŭdiron en sia pozicio. Se vi opinias tion tro naiva, mi volonte citas ekzemplon pri tia duflankeco. Iu s-ro Richards tre saĝe skribis: "Neniu, lernante la mondlingvon, devas havi kaŭzon eĉ por la ombro de la sento, ke li submetiĝas al fremda influo aŭ estas kondukata sub la potencon de aliaj grupoj". Tre saĝaj, tre pravaj vortoj; sed tiu s-ro Richards estas ĝuste unu entuziasma propagandinto

de Basic English, laŭ kiu, en la sama libro, unu granda avantaĝo de Basic English estus tio, ke ĝi "enkondukus al la origina lingvo", t.e. al la angla! Do tutklare la celo de Basic English estis, instruigi al alilandanoj la anglan lingvon, per kiu ili nepre submetiĝus al fremda influo kaj estus kondukataj sub la potencon de aliaj grupoj; aŭ almenaŭ ili havus pli ol ombron de sento pri tio, kion, laŭ Richards, ili nepre ne devus havi! Mi ne dubas, ke s-ro Richards tute sincere ne scias rimarki la kontraŭdiron de sia pozicio. Kaj verŝajne estas same pri la nemalmultaj homoj, kiuj ne domaĝas diri publike pri Esperanto aferojn, kiujn ili ŝatas supozi veraj, sed kiujn plej minimuma objektiva esploro montrus absurdaj.

Sed al tiaj personoj objektiva esploro ne prezentiĝas kiel necesa, ĉar ili ekiras de pozicioj apriore alprenitaj kaj nediskutindaj. Por kelkaj homoj, la esprimo "artefarita lingvo" enhavas kontraŭdiron, ĝuste ĉar laŭ ili lingvo devas esti "natura" aŭ ĝi ne estas lingvo. Espereble la plimultaj esperantistoj jam delonge scias, ke neniu lingvo estas "natura", se tiu vorto implicas tiajn konceptojn, kiaj "vivo" kaj "morto". Denove erarigas analogio; se ni parolas ekzemple pri la "mortinta" lingvo latina, ni parolas nur figure, metafore, analogie, laŭ jena pensfadeno: kiel vivanta estaĵo, kiam ĝi ĉesas vivi, mortas, tiel lingvo, kiam la homoj ĉesas pensi per ĝi, metafore "mortas"; kio, metafore, estas tre trafa. Sed la vorto "morta" implicas sian malon, t.e. "vivanta", kaj tial ni ekparolas pri la "vivantaj" lingvoj, t.e., pri tiuj, per kiuj la homoj pensas; kaj el la simpla metaforigo naskiĝas erara koncepto. Ĉar ne la lingvo vivas, sed vivas nur la homoj ĝin uzantaj. Eĉ tiu homo eraris, kiu skribis: "Ni nomas lingvon morta, kiam ĝi ĉesas evolui", pro la bedaŭrinda dusenceco de la vorto "evolui". Ĝi signifas samtempe "ŝanĝiĝi" kaj "esti ŝanĝata". Vivanta organismo povas ŝanĝiĝi, kaj tute aparte sinsekvo de organismoj, kiuj generiĝas tra gepatroj al geidoj, povas tiel ŝanĝiĝi, ke ĉiu ido ne tute similas al la gepatroj, kun la rezulto, ke post pluraj generacioj montriĝas, ke la *tipo* de organismo signife ŝanĝiĝis. Tio estas bazo de la biologia t.n. "evoluismo". Sed kiam ŝajnas, ke la sama fenomeno okazas en iu lingvo – kiam, ekzemple, la britoj de la dekoka jarcento nomis la teon *te*, kaj la britoj de la dudeka jarcento nomas ĝin *ti* (por preni tre simplan ekzemplon), kaj ni diras pro tio, ke la lingvo "evoluis", tio signifas, ne ke la lingvo "ŝanĝiĝis", sed ke ĝi "estis ŝanĝita": la ŝanĝo ne povis okazi sen la interveno de la vivanta organismo, la homo, por ĝin ŝanĝi. Tiel, la latina lingvo "mortis" kiam ne plu ekzistis homoj, ĝin uzantaj, por ŝanĝi ĝin. Sekve, kiam de tempo al tempo iuj entuziasmuloj deziras uzigi la latinan kiel modernan internacian lingvon, ilia unua tasko estas ĉiam – tiel ŝanĝi la delonge neuzitan lingvon, ke ĝi adaptiĝu al la bezonoj de la moderna vivo. Neniu el ili eĉ venas al la ideo, ke la latina lingvo kapablas proprainiciate ŝanĝiĝi sen interveno de la homa, la vivanta homa, menso. Parenteze, tio mem pruvas, ke la vorto "morta", kiam oni aplikas ĝin al lingvo, estas nur metafora, ĉar ni ĝis nun ne trovis metodon por revivigi veran mortintan organismon, des malpli organismon, kiu mortis antaŭ pluraj jarcentoj! Sed evidente, se nur iuj homoj komencus uzi la latinan kon-

sekvence por ĉiuj postuloj de la nuntempa vivo, la lingvo baldaŭ estus – metafore – "vivanta" denove, ĉar ĝin uzus vivantaj homoj! Do estas tute erarige uzi biologiajn terminojn kiam oni parolas pri lingvoj – kvankam mi ne dubas, ke multaj respektinduloj daŭre tion faros por nebuligi kaj konfuzi la aferon de Esperanto. Esperanto estas "artefarita", jes – sed tio signifas nur, ke Zamenhof forigis el ĝi la ĝenajn gramatikajn komplikaĵojn kaj esceptojn, kiuj absolute nenecese ekzistas en ĉiuj aliaj lingvoj kaj ilin efektive difektas. Tio postulis ne nur sciencon, sed ankaŭ arton, kaj tial oni povas diri, ke Esperanto estas artefarita. Tio estas – kvankam ne ĉiu uzanto de la esprimo tion rimarkas – laŭda vorto. Sed Esperanto ne estas pro tio malpli "natura", ol estas la aliaj nuntempe uzataj lingvoj, ĉar, kiel ilin, ĝin uzas tute nature, t.e. por pensi kaj por ĉiuj aliaj lingvaj necesaĵoj, la esperantistoj. Tial nomi ĝin, kiel tion faras Richards kaj ne malmultaj aliaj, "sennaturigita", kun la celo ĝin senreputaciigi, estas lingve kaj logike kaj semantike maltrafe.

Alian interesan terminologian misuzon prezentas s-ro Richards en la sama libro. Li almenaŭ ne rifuzas la ekziston de literaturo en Esperanto; sed li nomas ĝin "limigita kaj artefarita literaturo"! Ke ĝi estas limigita, tion ni volonte konsentas – ĝis nun limigita al pluraj miloj da libroj originalaj kaj tradukitaj, kiuj inkluzivas ne malmultajn ĉefverkojn – kaj ke ĝi estas artefarita, tion ni ankaŭ devas konsenti: ĝuste pro tio, ho dio! ke *ĉiu* literaturo estas laŭdifine artefarita, t.e. farita arte. Literaturo, finfine, estas unu el la artoj! Kaj tio ĉi ne estas nura vortĵonglado; ĝi klare pruvas la maltrafon jam diskutitan de la terminoj "natura" kaj "artefarita" en rilato al lingvoj, kaj la konfuzon kaŭzatan de ilia uzado. Sed s-ro Richards kaj liaj samspeculoj, se ili ĉeestus, ne sentus sin venkitaj de mia ĵusa konstato. Tre facile ili transigus la argumenton – estus por ili malgranda kaj natura paŝo – sur la kampon de tiu alia konata argumento, kiun mi nur povas nomi la mistikisma. Mi nomas ĝin tia, ĉar, kiel multaj arkanoj, ĝi sonas tre bele, se oni tute malatentas la sciencajn faktojn. Laŭ la vortoj de Richards: "Neniu artefarita lingvo povas akiri dekonon de la riĉa interdependado" (de vortsignifoj), "negrave kiel ruze la eblecoj de la radikoj estas utiligataj, sen jarcentoj da vasta kaj varia uzado". Tiu ĉi skolo pretendas, ke per la multjarcenta uzado en ĉiuj facetoj de iu nacia kulturo la vortoj akiris al si kaj eksplicite jam enhavas tre subtilajn nuancojn – kio tre maturigas la koncernan lingvon – kaj ke similaĵon ne povas havi Esperanto, kio estas grava manko kaj krudigas aŭ primitivigas ĝin. Pritraktante tiun ĉi argumenton, mi volas rigardi ĝin el du vidpunktoj; unue, ĝis kia grado estas vere, ke la multjarcenta kulturo fakte riĉigis la lingvan materialon mem, kaj due, ĉu estas vere, ke Esperanto ne estas samgrade riĉigita?

La unua konstato devas esti, ke iu ajn lingva materialo nenion enhavas eksplicite, sed nur implicite; kaj la unua implico estas simple tio, ke oni devas posedi la koncernan lingvon. Mi povus deklami al s-ro Richards: *Nem volt sok ház a kis uccában*, kaj mi estas certa, ke neniun nuancon li kaptus. Mi povus klarigi al li, ke tio estas plej altpoezia verso, plenplena de subtilaj aludoj al la

jarcentlonga kulturo, plenplena de "riĉa interdependado" de la vortmaterialo, kaj tion li povus nur akcepti senkritike. Krom se hazarde li konas la hungaran lingvon, en kiu la citita frazo estas tre proze banala, kaj signifas fakte, "Ne estas multaj domoj en la malgranda strato"! La hungaraj vortoj nenion komunikas, krom se oni lernis (ĉu denaske, ĉu poste) la hungaran lingvon; la vortoj nenion esprimas eksplicite. Do ĉiun lingvon oni devas lerni, kaj la dua konstato estas: la nuanceco kaj subtileco de la vortmaterialo dependas, por individuo, de la grado ĝis kiu oni lernas la lingvon. Kaj la fakto estas, ke tre malmultaj personoj (relative) lernas iun ajn lingvon ĝis grado, kie la vortmaterialo fariĝas kulture nuancita. Por la plimultaj angloj, ekzemple, "fiŝisto" (*fishmonger*) estas simple homo, kiu vendas fiŝojn. Kelkaj tamen, aŭdante la vorton, ekpensas pri la interparolo de Polonio kaj Hamleto:

POLONIO: Ĉu vi min konas, via princa moŝto?
HAMLETO: Tre bone. Vi ja estas fiŝisto?

Kaj el tiuj kelkaj, ankoraŭ kelkaj scias kaj memoras, ke en la epoko de Ŝekspiro "fiŝisto" estis slanga termino signifanta "bordelisto". Povas esti, cetere, ke la vorto "fiŝisto" havas en la angla lingvo ankaŭ aliajn nuancojn, kiujn mi ĝis nun ne lernis. Ĉar ĉion ĉi mi lernis. En la infanaĝo mi lernis, ke "fiŝisto" estas homo, kiu vendas fiŝojn; en la liceo mi legis "Hamleton" kaj ekrimarkis la kuntekston tie de la vortoj; kaj en universitato mi eksciis, ke la vorto siatempe havis ankaŭ fian nuancon. Nun, se mi diras al certa amiko, ke li estas fiŝisto, li komprenas, ke mi mokinsultas lin kaj memoras pri Polonio. Sed se iu nekonato sin prezentas ĉe mia pordo kaj demandas, "Ĉu vi min konas, sinjoro?", kaj mi respondas, "Tre bone. Vi ja estas fiŝisto", li tre verŝajne respondos, "Tute ne, sinjoro. Vi eraras; mi vendas asekuron", – kaj probable supozos min iom freneza; ĉar tre verŝajne li neniam legis Hamleton, kaj eĉ se jes, li ĝin ne *lernis*.

Mi povus, kompreneble, centobligi tiajn ekzemplojn; sed tio sufiĉas por demonstri la tezon, ke kulturaj nuancoj ne estas eksplicitaj, sed dependas de la *konateco kaj komuneco* de la kultura fono, kio estas afero, ne de lingva komuneco (ĉar klera profesoro kaj malklera komizo teorie, kaj certagrade fakte, parolas komunan lingvon), sed de *lernita kultura komuneco lingve esprimita*, kio kondukas ĝis tio, ke du homoj denaske parolantaj la saman nacilingvon ne sukcesas egalece interkompreniĝi, dum du aliaj homoj, prefere kleruloj, sukcese kaj egalece interkompreniĝas parolante lingvon, kiu estas denaska por neniu el ambaŭ – pro la simileca kultura fono de kleruloj tra, ekzemple, la tuta okcidenta Eŭropo, se ne pli. Por uzi lingvon, finfine, la uzantoj devas implicite kaj eĉ eksplicite interkonsenti pri la arbitraj signifoj, kiujn havos la arbitraj sonoj formantaj la lingvon; la subtilaĵoj, aŭ ties manko, ekzistas ne en la lingva materialo, sed en la individuaj homaj mensoj, kiuj utiligas la lingvon por ilin komuniki. Prof. Childe, cetere, rekte – kaj korekte – nomas tiun ĉi procedon "artefarita", por ĉiuj lingvoj, kaj ĝi ne estus io speciala por Esperanto.

Ni devas tamen konsenti, ke la kultura fono de iu nacia lingvo estas realaĵo, kiun tiuj, kiuj deziras aŭ kapablas tion fari, povas lerni. Ĝi ne ekzistas eksplicite en la lingva materialo, sed nur implicite, tiel ke kulturitaj homoj povas ĝin subkompreni surbaze de lernita materialo. Ĉu do estas fakto, ke mankas al Esperanto, kiel tion asertas Richards kaj aliaj, simila kultura fono? Ĉu al la esperantistoj mankas la kultura fono, kiu ebligas subtilan kaj tre nuancitan manovradon de la lingva materialo? Ĉu lingvo ankoraŭ ne okdekjara povas esti tiel signifo- kaj aludo-plena kiel lingvo uzita jam de multaj jarcentoj por interalie kulturaj celoj? Nu, unue, la vortmaterialo de Esperanto ne estis kreita apriore, sed ĝi devenis de la vortmaterialo de aliaj kulturaj lingvoj, tiel same kiel la vortmaterialo de la angla lingvo devenis de la vortmaterialo de aliaj lingvoj, kaj tiu materialo kunportis la tutan ŝarĝon de la komuna eŭropa kulturo, al kiu, iom post iom, aldoniĝas, pro la efektive tutmonda uzado de Esperanto, kulturaj asociecoj ne ĉiam troveblaj en la geografie pli limigitaj etnikaj lingvoj, asociecoj, ekzemple, el la ĉefaj aziaj kulturoj. La kulturo de Esperanto estas la kulturo de la esperantistoj, kaj ili ne estas primitivuloj – finfine ili ĉiuj estas, senescepte, minimume dulingvuloj, kion oni ne povas diri pri la plimultaj neesperantistoj! – sed ankoraŭ havas, kiel esperantistoj, la kulturan trezoron, kiun ili havas kiel nacilingvanoj. La esperantistoj havas sian Biblion, ili havas sian Hamleton, ili havas sian Dian Komedion, ktp; ne mankas al ili la literaturaj fontoj, sur kiuj baziĝas la eŭropa kulturo. Krom tio, ili havas sian Manjoo-Ŝuu, sian Librokonstantaĵo pri fila pieco, sian Japana Kroniko, sian Bhagavad-gita, ktp; ne mankas al ili la literaturaj fontoj, sur kiuj baziĝas la aziaj kulturoj. Ili havas sian Ŝtato kaj revolucio, sian Komunista Manifesto, sian Spiritaj ekzercadoj de Sankta Ignacio, ktp; ne mankas al ili la filozofiaj bazoj de la politika kulturo kaj la religia kulturo. La kultura fono por ilia lingvo tute ne mankas. Kontraŭe, ĝi estas iasence pli larĝa ol la fono de iu ajn nacilingvo, ĉar la kultura fono de Esperanto ne konstruiĝis sole sur la konataj mondfiguroj, sur Ŝekspiro kaj Dante kaj Konfucio, sed ankaŭ sur la hungaro Petöfi, sur la ĉeĥo Havlíček Borovský, la estonino Marie Under kaj la bulgaro Vazov, k.a., figuroj alie preskaŭ nekonataj ekster la propra lingva teritorio. Kiom da angloj, kiuj kalkulas la Paradizon Perditan de Milton kaj la Dian Komedion de Dante inter siaj kulturaj riĉaĵoj, konas la apenaŭ malpli gravan Tragedion de l' homo de Madách, kiun la kultura esperantisto ankaŭ akiris en sian panteonon? Kaj en la originala literaturo de Esperanto reaperas la kulturaj figuroj kaj la kulturaj nomoj, kiuj revekas en kulturhomoj tiom da interdependado de aludoj kaj ideoj: komunaj vortoj en Esperanto estas la *donkiĥoto* kaj la *donĵuano*; ni konas Ŝimŝon kaj Zeŭso. La kultura fono de la deksepajarcenta angla poeto Milton estas fieraĵo de la angla literaturo:

> Nods and Becks, and Wreathed Smiles,
> Such as hang on *Hebe's* cheek...

Sed tiu sama Hebe, greka diino de la juneco kaj filino de la Terpatrino, reaperas en la esperantaj versoj de Maura, en ĝisdata formo:

> Inkognite Heba trotas
> en ŝvelpufa jup', kaj post
> ŝi la tuta strat' pendolas
> laŭ la sving' de l' pone-vost'.

Kio povus esti pli kultureca ol tiu delikata aludo de Maura? Kaj ĉu Maura estas malpli kultura homo ol estis Milton, nur pro tio, ke li verkas en Esperanto? Estas evidente, ke ne la lingvo difinas la limojn de la kultureco, sed la homo, la individuo, sendepende de lia lingvo aŭ lingvoj.

Sed kulturo ne estas nur literaturo. La vorto "kulturo" inkluzivas la diversajn teĥnikajn kaj morajn diferencojn inter diversaj homgrupoj aŭ en diversaj mondregionoj. La formo, kiun ricevas fosilo, ekzemple, ĉu la klingo estas kvadrata aŭ pinta, estas afero de "kulturo", ĉar la efikeco de la ilo ne dependas de ĝia formo: ĉiuj estas efike uzeblaj por fosi. Tiel same, la idearo kaj konceptaro, eĉ rilate al ĉiutagaj aferoj, ofte malsamas en diversaj regionoj. Ekzemple, laŭ Prof. Wren: "Tiel oni povas diri, ke la franca *cheval*, la itala *cavallo* kaj la rusa *kon'* ĉiuj signifas *horse* "ĉevalo"... ĉar la francoj, la italoj kaj la rusoj ĉiuj dividas komunan intuician sciaron kun la britoj, kaj la vortojn oni povas interŝanĝi kiam oni tradukas el unu lingvo en alian. Sed kiam oni memoras, kiel malsame tiun saman ĝeneralan nocion pri 'ĉevalo' interne sentas kaj komprenas la diversaj nacioj – kiel malsame la franco, italo, ruso kaj anglo *sentas* pri tiu besto... la kvar cititaj vortoj vere ne estas entute interŝanĝeblaj dum tradukado". Nu, estas fakto, ke tiaj kulturaj diferencoj ekzistas; sed kompreneble tio estas ĝenerala lingva malfacilaĵo kaj ne apartenas speciale al Esperanto. Ĉiu ajn, kiu parolas iun ajn lingvon kun homo el malsama regiono, devas venki tiun malfacilaĵon. Tio stariĝas eĉ inter samlingvanoj kaj samnacianoj; se ni elektas vortojn kiel "striko" aŭ "populara muziko", ni tuj vidas, ke ilia efiko malsamas, depende de la kultura aŭ politika fono de eĉ samnacianoj. Kaj kiam temas pri diversnacianoj, vortoj kiel "komunisto" kaj "demokratio" havas tute aliajn signifojn en Vaŝingtono ol ili havas en Moskvo. Sed homo, kiu rilatas kun alilanduloj, povas "lerni" pri tiaj diferencoj kaj lingve adaptiĝi al ili, kion oni faras tiel same bone per Esperanto, kiel per aliaj lingvoj.

Sed s-ro Richards ankoraŭ ne konvinkiĝis; nun li rebatas jene: "La Esperanto-parolanto... probable alportas en la interagadon de ĝiaj signifoj multajn nuancojn de lia denaska lingvo, nuancojn, kiuj estos neekzistantaj por homoj kun malsimila fono". (Mi aparte ŝatas tiun vorton "probable", kiu montras, ke s-ro Richards estas nur konjektanta – kvazaŭ ni tion ne scius tre bone!) Tamen, kiel apriora supozo, tiu argumento tute ne estas stulta. Se ne ekzistus pluraj gravaj kontraŭfaktoroj, s-ro Richards – probable! – pravus. Sed ili jes ekzistas. La plej forta el ili estas la simpla fakto, ke la celo de lingvo estas la interkompreniĝo, kaj

ke la homoj uzas ĝin kun ĝuste tiu celo, pri kiu ili tre konscias. Tial, se iu komencanta esperantisto, sub influo de nacia lingvo, misuzas la vorton *pretendi*, la pli sperta esperantisto atentigas lin: "Ĉu vi ne intencas diri *preteksti*?" Simila situacio, cetere, ne estas malofta ankaŭ en nacilingvoj, ĉar la edukitaj homoj estas lingve surprize pedantaj, ne nur en Esperanto! Oni ŝatas korekti la erarojn de la aliaj homoj! Kaj en la kazo de malpli evidentaj nuancaj malfacilaĵoj, cetere, ĉu la sama problemo ne ekzistas kiam ajn malsamlandanoj interparolas en kiu ajn lingvo? Se hispano parolas angle kun anglo, ĉu li ne emas kunporti en la anglan multajn nuancojn de sia denaska lingvo, kaj same miskompreni la nuancojn de la anglo? Kompreneble jes; sed li kaj ĉiuj povas kontroli lian lingvaĵon en rilato al ekzistanta *normo* – la akceptata uzado de la angloj, registrita en diversaj vortaroj kaj gramatikoj. Tiel same, Esperanto havas sian *normon*, en rilato al kiu ĉiuj povas kontroli sian lingvouzadon. Tiu normo konsistas el la Fundamento, la Plena Vortaro, la Plena Gramatiko, kaj la tuta literaturo de Esperanto, kune kun la sperto de ĉiutaga uzado de la lingvo. Ankaŭ tiurilate ne ekzistas ajna diferenco inter la nacilingvoj kaj Esperanto, kaj la *normo* estas la dua kontraŭfaktoro al la tezo de Richards. La tria estas la teĥniko. Kelkfoje oni parolas pri la "disdialektiĝo" de iu lingvo, kvazaŭ temus pri tio, ke en la komenco estis tiu lingvo kaj poste aperis la dialektoj kiel variantoj de ĝi. Denove la terminologio erarigas. La fakto estas, ke unue ekzistis la dialektoj, kaj nur iom post iom ili unueciĝas por formi la lingvon. Mi loĝas en lando, Skotlando, kie la homoj parolas tri lingvojn: la gaelan, la skotan kaj la anglan, kaj plurajn dialektojn de tiuj tri; dum la nuna jarcento, tamen, rapidege mortadas la du unuaj lingvoj, kaj preskaŭ komplete malaperis, dum la vivtempo de homoj hodiaŭ vivantaj, kelkaj florintaj dialektoj. Mi povas karakterizi la evoluon jene: mia praavino parolis nur la gaelan, mia avino parolis la gaelan kaj la anglan (ne la skotan), mia patro parolis nur la anglan, kaj mi parolas la anglan kaj la skotan, sed la skotan mi devis lerni preskaŭ kvazaŭ ĝi estus fremda lingvo. Sekve mia patro kaj mi povis konversacii kun mia praavino (lia avino) nur pere de interpretisto! En multaj regionoj, nunaj lernejanoj jam *ne komprenas* dialekton, kiun sole parolis iliaj prageavoj! Tiu ĉi evolulinio estas ĝenerala en ĉiuj civilizitaj mondpartoj; kaj tiu vorto "civilizita" estas ŝlosila, ĉar la kaŭzo de tiu rapidega formortado de minoritataj lingvoj kaj riĉaj dialektoj estas ĝuste la rapidega teĥnika evoluo de la civilizo. Facila transportado ebligas, eĉ devigas, ke la homoj renkontiĝadas kaj miksiĝadas kun homoj el malproksimaj landpartoj; la radio, televido, filmoj, eĉ la gazetaro, senĉese disvastigadas normigitan lingvaĵon, kiun ne povas ne imitadi la tuta popolo. La celo de lingvo estas interkompreniĝo. En epoko, kiam la granda plimulto de la homoj havis okazon kaj bezonon interkompreniĝi nur en la kadro de limigita regiono, kiam ili preskaŭ neniam renkontis homojn el malproksimaj landpartoj, ili bezonis uzi nur lokan dialekton. Sed hodiaŭ, kiam la filoj de kamparanoj ricevas proksimume la saman edukon kiel la filoj de profesiuloj, kiam ili aŭskultas la samajn programojn kaj rigardas

la samajn filmojn, kiam ili forlasas la hejmregionojn por vivi kaj labori en malproksimaj distriktoj kaj eĉ landoj, kiam ili edziĝas al virinoj el la alia hemisfero, ili devas interkompreniĝi sur multe pli larĝa tereno kaj sekve normigas laŭeble sian lingvaĵon. Kaj iasence Esperanto reprezentas la kulminon de tiu evolulinio. Se la esperantistoj estus homoj, kiuj nur hejme uzus la lingvon, lernitan en izolo kaj sen kontakto kun la cetera mondo, tre certe ekzistus tiom da dialektoj (ankaŭ rilate la demandon pri nuancoj), kiom ekzistus esperantistoj. Sed same evidente, tia persono ne bezonus Esperanton. La ekzistorajto de Esperanto estas ĝuste tio, ke ĝi ebligas kontakton kaj interkompreniĝon inter homoj diverslandaj kaj diverslingvaj; kaj la teĥniko ne nur ebligas Esperanton, sed ĝi eĉ kreis la bezonon por Esperanto. Kaj same la teĥniko kontraŭfaktoras la tezon de Richards. La facila transportado ebligas la oftan renkontiĝadon inter la diverslandaj esperantistoj, per la radio kaj per sonbendo ili aŭdadas la lingvon, per la literaturo ili legadas la lingvon; kaj tiel la lingvo estas *daŭre kaj internacie uzata* por ĝia ekzistocelo, kaj tiel ĝi estas kaj restas unueca, eĉ laŭ la plej subtilaj niveloj, kiujn aludas s-ro Richards. En alia parto de sia libro li diras, "Lingvojn formas uzado pli ol planado", kaj tio estas vera, ankaŭ rilate Esperanton. Zamenhof planis la lingvon ĝuste tiel, ke la uzado formu ĝin, kaj pro tio ĝi plenumas sian rolon kiel la internacia lingvo.

La eraroj de tiaj kritikemuloj devenas grandparte de la fakto, ke ili rigardas Esperanton, aŭ internacian lingvon entute, kiel ion akcesoran, uzindan nur en situacio senespera, kiam ĉiuj aliaj eblecoj montriĝis neeblaj. Personoj, kiuj rigardus ĝin tiel, certe neniam posedus ĝin sufiĉe profunde por utiligi ĝin en subtilaj kaj kulturaj kuntekstoj. Ili konsentus, ke eble oni povus mendi bieron per ĝi, sed eĉ ne komprenus, ke oni povas diskuti filozofian temon per ĝi – ĉar lingvo ĝi ja ne estas, *por ili*. Sed, kiel ĉiuj lingvoj, Esperanto ekzistas en la mensoj de tiuj, kiuj ĝin parolas, kaj inter tiuj personoj estas sciencistoj kaj artistoj, kiuj ne nur ne estus kontentaj pri ia lingva "ĉifro", sed ankaŭ ne kontentiĝas pri tiu neperfekta posedo de iu fremda nacilingvo, kiun ili kapablas akiri per dekoble tiom da klopodo, kiom ili bezonas por perfekte posedi Esperanton. Inter tiuj personoj estas la poetoj kaj verkistoj, kiuj kreis originalajn artverkojn en la internacia lingvo – artverkojn, kies ekziston povas konfirmi ĉiu, kiu, antaŭ ol esprimi opinion pri la afero, deziras informiĝi pri la faktoj.

Niaj eraraj konceptoj pri lingvo entute ĝenerale devenas de nia mensa insuleco. Tio naskas, ekzemple, la nemaloftan komenton, ke "la anglan oni parolas ĉie". Se tio estus vera, ĝi signifus nenion alian, ol ke la angleparolantaj nacioj estus konkerintaj – ĉu milite, ĉu alimaniere – la tutan mondon. Kaj tamen eĉ se tio estus fakto, la lingva problemo ne estus reale solvita. Por pruvi tiun aserton, ni rigardu Hindujon, kie, post multjara angla regado, la regantaj kaj administrantaj klasoj efektive parolis la anglan, sed la granda plimulto de la civitanoj ankoraŭ parolis nur unu el la tricent aŭ pli indiĝenaj lingvoj. Ĉu povas esti, ke la malica kaj malracia opozicio de iuj bonzoj al Esperanto subkonscie devenas de deziro

malebligi, ke pli modestaj kaj malpli bonstataj civitanoj akiru tiujn privilegiojn en internaciaj aferoj, kiujn la bonzoj deziras rezervi al si? Scii fremdan lingvon estas signo de intelekta kaj eduka supereco, kaj tiajn superecojn oni tre malvolonte rezignas. Estas vere, ke por la plimultaj homoj estas pli-malpli neeble, posedi fremdan lingvon same bone kiel la denaskan lingvon. Oni povas babiladi per ĝi, jes; oni povas mendi bieron per ĝi, jes; sed por funde diskuti subtilaĵojn mankas la eblecoj pro la formaj malfacilaĵoj de la lingva materialo. Devigi alilingvulojn lerni nian nacilingvon estas psiĥologia kaj politika manovro celanta starigi nian propran psiĥologian kaj politikan superecon. Sed ĉiu, kia ajn estas lia intelekta aŭ eduka staturo, kapablas fariĝi tute dulingva se li lernas kaj uzas Esperanton. Tia koncepto – ni devas tion ĉi klare kompreni – estas ideologie kaj intelekte malagrabla por multaj personoj, kiuj reagas kontraŭ ĝi, kaj per ĉiaj rimedoj de lerta sed nescienca ŝajnlogiko kontraŭbatalas ĝin. Ne necesas, ke ni timu tion; la faktoj estas pli fortaj, se nur ni scias utiligi kaj disvastigi ilin.

Centro de Esploro kaj Dokumentado, Londono 1964.

Werner Bormann

SITUACIO KAJ EBLOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO

La nuntempa situacio de la Esperanto-movado estas rigardata de multaj esperantistoj pesimisme. Ili estas malnovaj membroj de Esperanto-societoj, kiuj nun perdas siajn maljunajn membrojn unu post la alia. Mankas alfluo de junaj aktivuloj, kaj tiel fakte multaj kluboj venis en bedaŭrindan staton. Tio nun estas la ĝenerala panoramo ĉirkaŭanta la mezan esperantiston. Se lia lingvoscio estas bona, li certe ne nur bedaŭras la kvantan staton de la kluboj, sed ankaŭ la kvalitan. Oni vere ne povas riproĉi, se en la daŭro de la jaroj firmiĝis en rigardanto de tiu situacio pesimismo rilate Esperanton.

Tamen estas necese por ĉiu troviĝanta en tiu tento, ke li pensu pri ĉiuj flankoj de nia situacio. Neniu permesu al si ekhavi falsan bildon de la tuto nur pro eksteraĵoj. En komparo kun la pasinteco, kiun la pli maljunaj membroj tiel forte laŭdas, nur la klubvivo estas multe pli malbona; cetere en tiu fakto la evoluo trafis same kiel nin ankaŭ ĉiujn aliajn organizaĵojn. Sed en preskaŭ ĉiuj aliaj punktoj ni plibonigis nian situacion aŭ almenaŭ tenis ĝin. Tio ekzemple validas por la membrociferoj. La statistikoj de la UEA-membraro montras por 1911 aŭ por 1928 ne esence alian bildon ol por 1966; tio estas facile kontrolebla el la jarlibroj. Ni scias, ke antaŭe la laboristaj organizaĵoj havis membronombron preskaŭ egalan, kelktempe eĉ superan, al tiu de UEA – sed relative al la loĝantaro tiu estas tiel malgranda, ke eĉ duobla kvanto da esperantistoj ne multe influus la ĝustecon de tiu aserto. Sed se nun la membrocifero de UEA restis proksimume en la sama alteco kaj se la raportoj de la maljunaj esperantistoj estas ĝustaj, tiam evidente nur la ekzistantaj membroj ne plu kutimas viziti la klubkunvenojn. Tio certe estas malagrabla pro la granda signifo de Esperanto-grupoj por la ekzercado de la lingvo, sed katastrofo tio tutcerte ne estas.

La ĝustajn dimensiojn oni nur vidas, kiam oni ankaŭ rigardas tiujn laborkampojn, kie okazis progresoj. Ili estas multnombraj. Hodiaŭ nia organizo estas firma, neŝanceliĝanta bazo por niaj laboroj. La organizaĵoj naciaj kaj internaciaj ne estas diletantaĵoj, sed preskaŭ ĉiuj estas gvidataj celkonforme kaj de kapablaj personoj. La kunlaboro inter ili estas ĝenerale bona, kaj kie ekzistas malfaciloj estas taŭgaj institucioj por superi ilin en diskutoj, ekzemple en la Komitato de UEA. La financa situacio de la Esperanto-movado certe ne estas bona – ni bezonas ankoraŭ multe pli da mono! – , sed regas ordo en ĝi kaj ni ne daŭre balanciĝas super la abismo de bankroto. La publikigaĵoj plejparte ne plu estas amatoraj. Inter la revuoj kontentigantaj la esperantistojn estas multaj, kiujn oni povas montri al neesperantistoj kreante ĉe ili bonan impreson. Bonega estas la

libroeldonado, kaj imponaj estas pro tio la grandaj Esperanto-bibliotekoj. La internaciaj kaj la naciaj kongresoj havas hodiaŭ ĝenerale altnivelan programon kaj tial ofte honorajn protektantojn de tre alta rango. Ankaŭ la esperantistaj vizitantoj de tiuj aranĝaĵoj nun en vestaĵoj kaj konduto harmonias al tiu nivelo. Ne mirige estas, ke sub tiuj kondiĉoj la informoj pri Esperanto en la gazetaro, en radio kaj televido estas relative multnombraj kaj pozitivaj. Tiun liston oni povas ankoraŭ longe daŭrigi. Mi nur plue volas citi la turismon kaj la laborojn de la Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista kune kun la altvaloraj esperantistaj renkontiĝejoj, antaŭ ĉiuj Kastelo Grésillon. Speciale pro tiuj aktivadoj ni hodiaŭ povas jam varbi novajn lernantojn per la argumento, ke Esperanto utilas al ili; tiel ni povas kontentigi la materialismajn postulojn de niaj samtempuloj.

La konkludo el tiu serio de faktoj nur povas esti, ke la nombro de vizitantoj al grupkunvenoj ne povas esti tro peza argumento en la rigardado de nia situacio. La aliaj pozitivaj faktoroj permesas la juĝon, ke entute la situacio de Esperanto en la nuntempo ne estas malbona. Sed malgraŭ ĉiuj laŭdoj la membronombro tamen estas grava indikilo. Se ĉio pri Esperanto estas tiel bona, kial tiukaze la ideo ne altiras pli da homoj? Certe restas al ni kiel unu el niaj plej gravaj taskoj la intensa varbado de novaj membroj por niaj organizaĵoj aŭ almenaŭ de novaj Esperanton parolantaj homoj por kunkonsumi la servojn kaj aĵojn, kiujn ni ofertas. Malgraŭ la alta rango de tiu postulo la pligrandigo de la nombro de la esperantistoj ne estas nia ĉefa zorgo. Ni ja ne estas organizaĵo por varbi membrojn, sed por antaŭenigi la ideon, ke internacia lingvo povas doni utilajn kaj bonajn servojn al la homaro. Survoje al tiu celo ne estas decide, ĉu ni havas 20 personojn en iu klubo aŭ 40, ĉu landa asocio havas 2 000 aŭ 4 000 membrojn. Se ni parolas por la solvo de la mondlingva demando per internacia lingvo, ekzemple en sciencaj medioj aŭ antaŭ oficialaj instancoj, ni ja ne estas la advokatoj de iu kvanto da esperantistoj, sed ni estas la reprezentantoj de unu logika solvo de la mondlingva problemo, nome tiu per artefarita lingvo. Ĉefe la apogantoj de Esperanto tiras sian reputacion el tiu fakto. Tial nia pozicio inter la proponantoj de solvoj por la mondlingva problemo estas la plej grava elirpunkto por ni. Ĉar ni parolas por io, kio el logikaj kaŭzoj devas ekzisti, ni reprezentas gravan ideon, kies videbla institucio ni estas.

Esti rigardata kiel institucio estas relative bona situacio. Institucioj estas en nia lando, same en eksterlando, tre alte ŝatataj. Ekzistas multaj ideoj, kiuj ne sukcesis arigi ĉirkaŭ si multajn personojn aŭ de kiuj la altirkapablo malkreskis. Tamen la reprezentantoj de tiuj ideoj (se la ideoj estas gravaj) havas siajn signifojn kiel institucio. La militrezistantoj estas de tiu speco. Kvankam nur malpli ol 1% de la vokitaj junuloj rifuzas soldatiĝi, la militrezistantoj estas agnoskitaĵo. Inter la junularo la nombro de la aktivuloj en junulgrupoj estas tre malgranda, sed ili havas altreputaciajn reprezentadojn ekzemple en Stadtjugendring (duonoficiala parlamenteto de junulorganizaĵoj). La Eŭropo-asocioj jam transpasis la tempon,

kiam ili estis amasmovado, kaj koncentriĝis al la laboro de funkciularo – kio ne malutilis al la prestiĝo de la institucio. En rilato al la tuta loĝantaro ankaŭ la nombro de la partimembroj estas eta, sed kiel institucioj la partioj eĉ havas bazon en la konstitucio.

La rolo de institucio kunaganta en la publika vivo tamen nur estas atribuita al io, kio reprezentas iun gravan ideon. La ideo de la esperantistoj estas, ke oni povas bonege solvi la mondlingvan problemon per neŭtrala, kreita lingvo, per Esperanto. Do la rango de la institucio Esperanto-movado dependas de du faktoroj: unue de la graveco, kiun tiu mondlingva problemo havas en la okuloj de la decidpovaj homoj, kaj due de la kvalito de nia argumentado, ke Esperanto taŭgas kiel efektiva solvo. Rilate la unuan demandon ni estas en bona situacio. Ankoraŭ antaŭ dek aŭ dudek jaroj la angla lingvo havis superregan pozicion. Neniu riskis publike pridubi la mondlingvan rolon de la angla, krom speciale la esperantistoj, kaj tiu ekstera cirkonstancaro instigis multajn ankaŭ pridubi la asertojn de la esperantistoj. Sed intertempe la angla perdis terenon en siaj ekskolonioj kaj en la ceteraj partoj de la mondo, ĉar la homoj en tiuj landoj konsciiĝis pri la kultura influo firme ligita al la uzo de la lingvo de alia popolo. Ilia liberiĝo el la dependeco ne povas esti kompleta, se ĝi nur validas por la kampoj de politiko kaj, almenaŭ grandparte, de la ekonomio, sed ne por la kultura vivo. Tiu perdo de signifo de la angla koincidas kun la refirmiĝo de la pozicioj de la franca kaj la germana lingvoj. En la kazo de la franca la nova forteco rezultas el la politike sendependa vojo, kiun Francujo nun sekvas. La germana ree estas uzata en meza, norda kaj orienta Eŭropo, post kiam Germanujo post sia detruiĝo nun akiris gravan funkcion en la ekonomiaj rilatoj.[1] Aldone la angla nun estas endanĝeriĝinta pro novaj lingvoj kun mondlingvaj ambicioj. Speciale la rusa lingvo meritas atenton; ĝi estas interkomprenilo de juna generacio de politikistoj kaj fakuloj en orienta Eŭropo, kiu lernis speciale tiun lingvon en siaj lernejoj. La ĝis nun nomitaj lingvoj nur estas eŭropaj. Povas esti, ke ankaŭ ekstereŭropa lingvo postulas mondvastan uzon; tio ne estas neebla en la kazo de la ĉina, pro la granda potenco de Ĉinujo. Resume: kvin lingvoj volas esti mondlingvoj, kio kompreneble estas sensencaĵo, ĉar nur unu lingvo povas esti la mondlingvo. Do la afero montriĝas kiel nesolvita, kaj tio donas la eblon diskuti pri solvoj.

En tiu situacio la demando postulas respondon, ĉu Esperanto estas enordigenda inter la eblaj solvoj, kiuj ofertas sin, por ke unu el ili en la estonteco estu la mondlingvo. Tio certe estas la kazo. La logiko montras, ke solvoj de la problemo

[1]Dum la vintraj Olimpiaj Ludoj 1968 en Grenoble (Francujo) la gazetarkonferencoj estis faritaj kaj dokumentoj kaj materialoj por la redakcianoj disponigitaj de la aranĝantoj en kvar lingvoj: la franca (lingvo de la loko, en kiu la ludoj okazis), la angla, la germana kaj la rusa. La ĵurnalistoj do devis formi kvar grupojn kaj povis libere elekti al kiu aparteni. En la grupoj estis la jenaj procentaĵoj: angla 40%, germana 25%, franca 24%, rusa 11% (laŭ raporto en germanaj gazetoj, citita en "Germana Esperanto-Revuo", aprilo 1968).

de internacia lingvo estas eblaj sur kelkaj vojoj. Plej facile tio estas videbla, se oni desegnas diagramon komplete entenantan ĉiujn eblajn vojojn sen eldiri ion jam pri la valoro aŭ ŝancoj de iu el la eblaj solvoj trovitaj per rezonado.



En la teorio, tion montras la diagramo, dek solvoj de la mondlingva problemo estas eblaj:

1) sen lingvolernado per uzado de tradukoj
2) per kodo de signoj
3) per pluraj naciaj lingvoj
4) per la lingvo de granda ŝtato
5) per la lingvo de malgranda ŝtato
6) per plisimpligita nacia lingvo
7) per morta lingvo
8) per plisimpligita morta lingvo
9) per Esperanto
10) per artefarita projekto.

Tiuj teoriaj ebloj havas tre malsamajn ŝancojn en la nuntempo kaj en la estonteco, ĉar ilia taŭgeco por solvi la mondlingvan dilemon tre diferencas. La signifoj de la montritaj ebloj do ne estas egalrangaj. Pri kelkaj oni eĉ rajtas dubi, ĉu entute temas pri solvo. Jam la unue desegnita vojo, atingi internacian komprenadon sen lingvolernado, do nur per uzado de tradukoj, ne estas solvo, sed rezignado. La tradukado per interpretistoj kaj per tradukmaŝinoj sendube estas komforta helpo. La pliklerigo de la tradukistoj kaj la daŭra plibonigo de la maŝinoj rajtigas al la espero, ke la valora helpo de la tradukado ankoraŭ pligraviĝos. Sed ne estas eble, ke ĉie kaj ĉiam en renkontiĝoj de homoj kun diversaj lingvoj tiu vojo estu praktikata. Ĝi do estas limigita al oficialaj aranĝaĵoj kaj publikaĵoj. Ankaŭ la altaj kostoj malebligas ĝeneralan uzadon de tradukado. Kvankam nun ni volonte uzas la agrablajn servojn de la tradukado, estas klare, ke tiu vojo ne kondukas al finfine kontentiga solvo.

La forigo de la mondlingva dilemo per kodo de signoj havas la saman rangon kiel la tradukado. Uzi kodsignojn certe estas valora helpo, speciale nun, kiam ĝenerale la lingva interkompreno en eksterlando ne estas ebla. Ili estas mallongaj informoj rapide percepteblaj. Tial estas ĝojige, ke ekzemple la Eŭropa Konferenco de la Trafikministroj klopodas unuecigi la ŝildojn uzatajn sur la stratoj por averti aŭ informi la aŭtomobilistojn. Tiu jam malnova ekzemplo de la trafikŝildoj montras la avantaĝojn de tiu sistemo, kaj estas kompreneble, ke pro la bonaj spertoj oni nun volas kopii ĝin kaj inventi informŝildojn ankaŭ por la diversaj ejoj en stacidomoj. Sed per tio ankaŭ montriĝas la limoj de la uzeblo de kodsignoj. Ili povas utili tie, kie ili nun estas uzataj, sed ili ne estas imageblaj kiel tutĝenerala internacia komprenilo. Pri tio revis en formo de simbolskribo la pazigrafiistoj en la pasinta epoko, kaj kiu hodiaŭ ĝenerale proponas kodsistemon kiel internacian komprensistemon montras, ke li ne trapensis la kaŭzojn, kial tiu vojo jam malsukcesis. La internacian lingvoproblemon oni nur povas solvi per efektiva lingvo.

La deziro kompletigi la rezonadon instigis ankaŭ citi la eliron el la internaciaj lingvaj malfaciloj per la uzado de pluraj mondlingvoj. Ĝi fakte alproksimiĝas al la hodiaŭa stato, se ĉiu homo scipovus unu el la grandaj lingvoj. Sed kompreneble la nuna situacio ne meritas la nomon solvo. Do eliro el la mondlingva dilemo per tiu vojo nur povus konsisti el koncentrigo al tre malgranda nombro de uzataj lingvoj. Du estis la proponita cifero, kiam oni antaŭ jardeko proponis *bilinguism* angla-francan. Ĉiu homo – kompreneble oni nur pensis pri la okcidenta mondo – lernu unu el ili. Facile oni vidas, ke tio ne estas solvo, ĉar dano kun angla "mondlingvo" kaj italo kun franca ne povas paroli unu kun la alia. Ankaŭ ofertis sin du mondlingvoj por mondo disigita politike en du hemisferoj: la rusa por la orienta bloko kaj la angla por la okcidento. Sed ankaŭ tio hodiaŭ estas senŝanca. La ŝtatoj ja forte strebas al memstareco, al nur pli malfirma ligiteco kun la gvidaj potencoj en la oriento kaj en la okcidento. Nun libervole devigi sin akcepti jen tiun, jen tiun lingvan hegemonion kaj tial kulturan influon signifus gravan

rebaton por la klopodoj memstariĝi. La ĝenerala politika evoluo de la mondo transpasis intertempe la stadion de pensado en blokoj, kaj kiu volus proponi tiuforman solvon por la mondlingva afero devus konsciiĝi, ke tiu ideo ne plu konvenas – kaj cetere, kiel montrite, ĝi eĉ ne solvas la postulon al unu lingvo por ĉiu homo en ĉiuj partoj de la mondo.

En la elektita sinsekvo nun venas tiu solvo, kiu estas plej okulfrapa: la akcepto de unu nacia lingvo kiel la internacia lingvo. Granda plimulto de la homoj estas konvinkita, ke sur tiu vojo troviĝas la estonta solvo. Kelkaj eĉ opinias, ke tiun solvon ni ne plu atendas, sed ke ni jam havas ĝin. En Germanujo tiuj personoj asertas, ke la mondlingva problemo estas solvita per la angla. Tion alilandanoj ne tiel facilanime dirus. La rusoj havas sufiĉe da memfido je sia propra forteco, ke ili ne bezonas la lingvon de la granda konkurencanto kiel mondlingvon en la unua loko. Ankaŭ la franca politiko ne estas preta submeti la francan kulturon al la anglalingva influo el Usono. Sed sufiĉas nur diri la nomon de la plej granda lando de la tero, por kompreni, ke ekster la rondo de la anglemuloj ne ekzistas bazo por angla mondlingvo: Ĉinujo. La solvo de la problemo, kiu lingvo estu la internacia lingvo, nur ĉe supraĵa rigardo estas facila pro la ekzisto de vaste konataj naciaj lingvoj. Detala pripensado montras, ke ĉiu unuopa lingvo de granda potenco detruas per sia postulo la ŝancojn de ĉiuj aliaj, tial ke finfine neniu restas por ludi la deziratan rolon.

Tro forta estas la ligiteco inter tiu rolo de ĉie konata mondlingvo kaj la influo sur la aliajn naciojn de la kulturaj produktoj de tiu lingvo. De tia kultura influo la ŝtatoj volas resti liberaj. Nacia lingvo do ne taŭgas kiel mondlingvo, se ĝin akompanas granda kultura premo aŭtomate efikanta. Tiu konstato entenas la ideon, ke nacia lingvo sen forta kultura potenco, do sen abunda produktado de kulturaĵoj, povus servi tutmonde, se nur la nacio ĝin donanta estas sufiĉe malgranda por certigi, ke ĝi ne kombinas la mondvastan uzon de sia lingvo kun amasa eksportado de kulturo. Ankaŭ tiu ideo, solvi la mondlingvan problemon per la lingvo de malgranda ŝtato, jam estis proponita. En malnova eldono de *The British Encyclopædia* mi iam legis, ke la norvega povus tiel funkcii. El la vidpunkto de neŭtraleco tio estas relative akceptebla, almenaŭ por ni eŭropanoj; eble loĝantoj de aliaj kontinentoj demandas, kial oni ne prenu la mongolan aŭ la amharan. Sed kompreneble ankaŭ la lingvo de malgranda lando estas nacia lingvo kun ĉiuj malfaciloj, kiuj evoluiĝis dum la senskriba periodo, kaj tial estas relative malfacile ilin lerni. Sur la kampo de facileco ili do ne ofertas avantaĝojn. Cetere estas tre interese konstati, ke oni proponis ja la norvegan. Tiu lingvo estas en vasta senco konstruita, artefarita sur la bazo de norvegaj kamparanaj dialektoj kaj la dana eksŝtata lingvo. Tio montras, ke korektaj agoj konscie faritaj en la nature kreskinta materialo de lingvo povas estigi ĉiel taŭgan lingvon, ĉi-foje la norvegan.

Tiu propono jam metis la atenton al la granda problemo de la facileco de la lingvo ĝenerale uzota en la internaciaj rilatoj. La kutima vojo krei pli facilan

tipon de nacia lingvaĵo, kiu ne estas fremda al la normala parolanto, estas la forstreko de preskaŭ la tuta vorttrezoro ĝis nana kerno. La gramatiko ne povas esti tuŝita, ĉar frazo en la kripligita formo devas esti klare komprenebla ankaŭ por iu, kiu plene scipovas tiun lingvon. Lingvo de tiu tipo estas Basic English kiel la plej konata; pli en la eksperimenta stadio estas Français Fondamental kaj Grunddeutsch. La limigo al malmultaj vortoj, en Basic English al 850 (plus ĝenerale konataj vortoj kiel ekzemple la nomoj de la monatoj), kaŭzas, ke la lingvo ne estas bone esprimkapabla. Tio kompreneble estas esenca postulo ĉe mondlingvo. La manko je vortoj estas tiel prema ĉe la uzo de tiuj bazaj lingvaĵoj, ke hodiaŭ oni ĝenerale konsilas al ĝiaj lernantoj ne plu ĵongli kun la malgranda vorttrezoreto, sed lerni kaj ekuzi novajn vortojn de la kompleta lingvo. Tiel Basic English transformiĝis en metodon lerni la anglan, cetere tre bona metodo. Jam frue oni regas malgrandan sed bonege elektitan vortaron de la lingvo kaj do estas kapabla uzi, praktiki la lingvon. Praktikante oni poste plulernas. Tio estas la valoro de tiuj plisimpligitaj lingvoj, sed ne la postulo, ke unu el ili servu kiel mondlingvo (kiu cetere, pro la neŭtraleco?).

Naciaj lingvoj ĉiel estas transportiloj de nacia kulturo. Tial naciaj lingvoj ne estas sufiĉe neŭtralaj por sukcese sin oferti por la rolo de mondlingvo. Ne eblas kompromiso, kiu permesus al unu el ili forigi la aliajn. Tio validas por lingvoj de grandpotencoj kaj de malgrandaj ŝtatoj, ĉu komplete ĉu en plisimpligita formo. La fermiteco de tiu vojo preskaŭ aŭtomate kondukas la serĉanton al la eblo proponi mortan lingvon por la rolo de la internacia lingvo. Inter ĉiuj tiuj lingvoj nur la latina estis serioze proponita. Sed lerni ĝin estas tiel malfacila tasko, ke tiu ideo ne havas eĉ la plej malgrandan ŝancon, kvankam de tempo al tempo iuj utopiuloj revas pri revivigo de la latina mondlingvo el la mezepoko. Pli da ŝancoj havus la latina kun sia relativa neŭtraleco en plisimpligita formo, eble kiel la projekto Latino sine flexione de Peano. Ĝi estas la latina lingvo senigita de sia gramatika fleksio kaj per tio plifaciligita. Sed se oni jam estas preta uzi mondlingvon, kiu ne estas en ĉiuj siaj partoj kaj en ĉiuj fazoj de sia evoluo nature kreskinta, estus mallogike nur raciigi unu parton. Se oni jam estas partiano de la ideo, ke racie kreita lingvo povas fariĝi la internacia lingvo, tiam oni kiel pensanta homo ankaŭ iru tiun vojon ĝis ĝia fino kaj raciigu ĉie, kie tio promesas sencplenan plifaciligon.

Per tiu rezonado ni venis al la solvo de la mondlingva problemo per internacia lingvo, do lingvotipo en ia senco en kontraŭa pozicio al la tipo nacia lingvo. Esperanto apartenas al tiu grupo, sed ĝi ne estas la sola reprezentanto. Apartenas al ĝi tre multaj aliaj lingvosistemoj jam ekzistantaj aŭ nur kreotaj poste, kiam la mondlingva demando estos definitive aktuala. Malgraŭ la multeco estas bonaj kaŭzoj, kial en la diagramo nur aperas du branĉoj de tiu solvo. Tio dependas de la postuloj, kiujn internaciaj lingvoj devas plenumi. Unue ili devas esti neŭtralaj. Pri tiu termino oni povas longe disputi, sed jam la fakto, ke internacia lingvo ne apartenas al la ilaro de iu nacio en ĝia strebado pligrandigi sian influon, faras ĝin

neŭtrala. Do oni povas koncedi, ke ĉiuj konstruitaj lingvosistemoj estas neŭtralaj. Due internaciaj lingvoj devas esti facilaj. Ankaŭ pri tiu esprimo intensaj diskutoj eblas; eĉ ekzistas ne facilaj internaciaj lingvoj, ekzemple Volapük. Sed ĝenerale neniu kontestas, ke la pli gravaj projektoj esperantaj fariĝi la mondlingvo ne multe diferencas de Esperanto rilate la facilecon. Do ankaŭ el tiu vidpunkto la grupo de la internaciaj lingvoj estas relative homogena. Tamen neŭtraleco kaj facileco ne estas jam ĉiuj postuloj por internacia lingvo; facileco ja estas ankaŭ karakterizaĵo de Basic English. Lingvo kun ŝancoj iam vere tutmonde servi devas esti ĉiel esprimkapabla. Tiu kapableco ne rezultas el rezonadoj. Ĝin nur montras la praktiko en provo de taŭgeco. Dum neŭtraleco estas politike-sociologia kaj facileco lingvistike-sociologia esprimo kaj la nomitaj sciencistoj povas interkonsenti pri jes aŭ ne, la esprimkapablo ne estas teoria afero, sed konsekvenco el longtempa uzado, kiu sole povas montri, ĉu ĝi ekzistas aŭ ne. Ĉar nun el la tri postuloj por internacia lingvo nur Esperanto havas pruvitajn avantaĝojn en ĉiuj punktoj, estas ĝuste doni al ĝi specialan atenton sub la logike eblaj solvoj de la problemo de internacia lingvo. Esperanto havas pro sia longjara uzateco nepridubeble elstaran lokon ne atingeblan de iu ajn alia internacia lingvo.

La pozicio de Esperanto en tiu logika skemo do estas relative bona, kaj tio povas doni al ni la certecon, ke la verŝajneco de fina venko estas tre granda. Ĉiukaze ĝi montras, ke Esperanto estas serioza propono por tiu ekzistanta problemo. Tiu seriozeco nun estas la kaŭzo, ke ni, reprezentantoj de tiu ideo, rajtas kunparoli, kiam temas pri la afero de internacia lingvo. Ĝi kaŭzas, ke niaj vortoj estas aŭdataj; ĝi faras nin institucio de la publika vivo. Neniu scias, ĉu nia propono estos jam akceptita kiel definitive elektita solvo. Tiu necerteco estas kompreneble malagrabla por ni, sed en rilato al aliaj, la publikaj instancoj ekzemple, ĝi estas tre favora. Ili respektas en ni aferon, kies estonta valoro ne jam estas certa, sed ankaŭ ne neverŝajna. Tiu situacio estas plejeble kontentiga. Neniu povas rigardi en la estontecon: pri estontaj eventoj nur ekzistas supozoj. Ni mem scias, ke nia argumentado – skribita ĉi tie en la antaŭaj alineoj – estas tiel bona kaj logika, ke niaj estontaj ŝancoj estas bonaj. Tio estas nia konvinko. La cetera mondo almenaŭ estas konvinkita, ke nia rezonado ne estas malbona kaj ke certeco pri nia malpravo do ne ekzistas. Pli ni ne povas postuli en la momento. La publiko opinias, ke nia venko estas ebla, ni opinias ĝin certa – jen kontentige bona situacio. Ĝi faras nin por la nuntempo respektata institucio de la publika vivo.

Tamen la fakto, ke en la nuntempaj cirkonstancoj niaj ŝancoj estas bonaj, ne estas garantio por la estonteco. Eĉ la plej bonaj ŝancoj povas malaperi en la forpaso de la tempo aŭ ili povas esti fuŝitaj. Tial ni devas atente kaj zorge gardi niajn ŝancojn, por ke ili ne perdiĝu. Ni do devas per ĉiuj fortoj labori tie, kie Esperanto havas klarajn avantaĝojn kaj pligrandigi speciale ilin. Kie troviĝas la avantaĝoj de Esperanto, la bonaj trajtoj, kiujn aliaj aspirantoj ne havas, tion montris la farita rezonado.

Esperanto estas elprovita sistemo, vere funkcianta lingvo kaj ne nur artefarita projekto. Kaj ĉar proverbo diras, ke la lernado neniam ĉesas, ĝi eĉ estu nomata elprovata sistemo. Ke Esperanto estas uzata de tre multaj homoj en ĉiuj partoj de la mondo, do de ni esperantistoj, estas grandega testo pri la uzeblo de internacia lingvo, do de io nova sur la tero, kio ankoraŭ devas pruvi la veron de siaj asertoj. Tiu elprovado de la taŭgeco de la internacia lingvo okazas per la uzado. Tial estas nia ĉefa tasko uzi Esperanton, apliki ĝin ĉie kaj ĉiam. Sed tiu konstanta uzo de Esperanto nur tiukaze estas vera elprovado, se la nombro de la uzantoj estas sufiĉe granda. Per tio ni ree alvenis al la komence priparolita problemo kaj nun ankaŭ el tiu vidpunkto vidas, ke estas necese havi tiom da esperantistoj, ke oni prave povas aserti la vivantecon de Esperanto. Varbado de novaj anoj do restas grava laboro.

En la varbado ni devas atenti la novan situacion por plifaciligi la laboron al ni. Celo de la varbado estas pligrandigi la nombron de la uzantoj de Esperanto. Ni do varbas, ke personoj uzu la lingvon. Nu, la uzo de Esperanto ĉefe okazas inter homoj kun malsama gepatra lingvo. Do ni fakte ankaŭ varbas por internaciaj kontaktoj. Ili estas agrabla akompanaĵo de la lingvo Esperanto. Per tio ni metas materiajn avantaĝojn en la centron de nia varbado. Ni do ne plu argumentas, ke oni lernu lingvon el idealismaj kaŭzoj, sed ke oni eluzu bonajn eblojn, kiujn ofertas Esperanto. Tiu reklamo estas pli konforma al la nuntempaj cirkonstancoj ol la malnovaj postuloj. Estus vane kredi, ke eblus altiri homamasojn per tiuj ebloj, sed nia varbado estu direktata al homoj kun intereso en internaciaj kontaktoj. Tiel la rekta varbado ankaŭ havas relative grandan utilon. Por ni sufiĉas en la nuna tempo, se ni sukcesas havi tiom da esperantistoj, ke nia internacia vivo floras kaj progresas.

Se ni praktikas internacian komunikadon per Esperanto por akiri memorojn je belaj travivaĵoj, ni do samtempe faras valoran laboron, ĉar ni montras, ke kreita lingvo estas vivkapabla kaj povas plene servi al ĉiuformaj homaj kontaktoj. Per la mondvasta uzo ni formas internacian kolektivon kun tre firmaj rilatoj inter la unuopaj membroj. Estas tiu internacieco de nia laboro, kiu estas rigardata favora por la tutmonda interkompreniĝo. Se ni estas iasence agnoskitaj de politikaj instancoj, ekzemple de Unesko, ni povas ĝin danki al tiu jam ekzistanta internacia kunlaboro. Tio estas idealisma afero, eĉ se la esperantistoj flegas siajn internaciajn kontaktojn ne pro la idealismo, sed pro materialisma ĝuo. Esperanto do estas bonega afero: profitante el ĝiaj avantaĝoj oni aŭtomate samtempe faras ion bonan: oni partoprenas en la laboro transdoni al nova generacio la mondon iomete pli bela ol ĝi estas nun. La duflankeco de la Esperanto-movado estas la dua kaŭzo, kial ni estas rigardataj institucio de la publika vivo: ni havas baze idealisman celon, sed ni plibonigas niajn ŝancojn pro materialismaj avantaĝoj. Tio plifaciligas la varbadon de novaj membroj kaj certigas, ke ankaŭ idealistoj fariĝas esperantistoj, ĉar ilin ni plej forte bezonas, por ke ili antaŭenŝovu nian aferon.

Citinte tiun bezonon je fervoraj aktivuloj por Esperanto apud la multaj, kiuj pasive konsumas esperantaĵojn kaj tiel valore helpas al ni, ni jam klarigis, ke nur la membrovarbado ne sufiĉas. Ĝi devas esti, kiel estis dirite antaŭe, unu el niaj plej gravaj taskoj. Apud ĝi ekzistas tre multaj aliaj taskoj, sed ili ne ĉiuj estas samrangaj. Se necesas elekto inter ili, ŝajnas ĝuste, doni al la pliintensigo de la Esperanto-turismo elstaran pozicion. La varbado de membroj dependas de la oferto de ĝuindaĵoj. Al ili ne plu apartenas la klubvivo, tion ni enkonduke detale montris. Ankaŭ la aliaj iam tre favore taksataj aferoj ne plu havas gravan pozicion. Sed la turismo estas kreskanta komerca branĉo. La ekonomia evoluo kondukas al ĉiam pli altaj personaj enspezoj kaj malkreskanta labordaŭro. Tiuj tendencoj rezultigis tre forte pligrandiĝantan turismon. Ni povas oferti specialaĵon por turistoj: helpe de Esperanto ili ne nur troviĝas en alia klimata zono, sed vere inter la homoj de alia lando. Kun granda bedaŭro ni devas konstati, ke tre multaj turistoj ne havas grandan emon kontakti la loĝantojn de vizitata lando, sed estus honto por la homa speco, se inter la multaj vojaĝantoj ne ankaŭ estus tiaj, kiaj sentas la homan bezonon paroli kun la ĉirkaŭantoj. Ĉar nun la nombro de la turistoj ĝenerale plialtiĝas, ankaŭ pliboniĝas la ŝanco havi tiel interesatojn. Se nun ni flegas tiun terenon kaj ofertas kutimajn turismajn servojn, plus Esperanto, ni estas sur la ĝusta vojo. Nepre oni ĉi-loke denove devas akcenti la valoron de turismaj Esperanto-centroj, de Kastelo Grésillon, sed ankaŭ de la Universalaj Kongresoj.

Tiaj aktivadoj apartenas al celkonformaj agoj por plibonigi niajn ŝancojn, ke Esperanto, kiam oni diskutos la solvon de la mondlingva problemo, estos akceptita. Tamen ili ankoraŭ ne sufiĉas. Se ni parolas ĉi tie pri la plej gravaj laboroj de la hodiaŭaj esperantistoj, ni nepre atentigu, ke ni ankaŭ devas science pruvi la taŭgecon de Esperanto. Esperantistoj kun sciencaj kapabloj do devas trapensi niajn problemojn kaj asertojn por trovi la plej efikajn vojojn antaŭenigi nian aferon. Sed kiel en la tuta civitanaro ankaŭ inter la esperantistoj nur estas ia kvanto da personoj, kies instruiteco ebligas al ili pritrakti tiujn aferojn. Ili ekaktivu. Se ili same fervore laboras kiel la granda plimulto de la esperantistoj, la finfina sukceso ne povos forresti. Ni ĉiuj ja, kiel mi montris tion, laboras en kampo, kie estas multaj favoraj signoj. Kompreneble la laboro estas malfacila, eĉ tre malfacila. Plena sukceso ne estas proksima. Sed en rilato al la grandeco de tio, kion ni volas, ni estas sur bona vojo. Nia situacio pliboniĝas malrapide, sed konstateble. Oni post la eldiroj ĉi tie certe ne plu asertos, ke iam, ĉu antaŭ la unua mondmilito aŭ ĉu en la dudekaj jaroj, ni havis kulminon kaj ke ekde tiam ni malkreskis, tiel ke el la daŭra malkresko iam devos rezulti la falo. Kompreneble estas rebatoj en nia evoluo, kaj ni ne iras rekte supren. Se oni tamen ne rigardas jarojn, sed pli longan tempon, la pliboniĝo estas klare videbla post zorga ekzamenado de ĉiuj fenomenoj. Ni do fakte estas sur la vojo al la celo, kiun ni mem metis antaŭ nin, malgraŭ eblaj malfaciloj. Tiu konstato devas doni al ni la fidon, ke la pliboniĝo daŭros kaj ke nia celo post pluaj intensaj laboroj efektive

estos atingita. Tial ni forigu la senbazan pesimismon kaj rigardu en la estontecon kun optimismo – kun tiu optimismo, kiu estas necesa por kapabligi nin fari ĉiujn ankoraŭ necesajn laborojn por Esperanto.

El Bona ŝanco; Dek du prelegoj pri la internacia lingvo kaj la sociaj sciencoj. Eldonserio Movado n-ro 5. J. Régulo (Stafeto), La Laguna 1970, p. 79-94.

Stanley R. Dalton

RECENZO PRI LA ANGLA LINGVO

De tempo al tempo oni vidas kritikojn pri Esperanto verkitajn de personoj (ofte lingvistoj) kiuj ŝajne neniam ellernis ĝin, neniam aŭskultis parolon inter esperantistoj, neniam tralegis esperantan libron aŭ eĉ havigis al si fidindan vortaron, sed ŝajne nur trafoliumis elementan lernolibron kaj senkomprene rigardis hazarde elektitajn tekstojn.

Ni imagu, ke iu el tiaj spertuloj neniam antaŭe renkontis la anglan lingvon kaj provis verki artikolon pri ĝi post simila esploro.

Antaŭ iom da tempo aperis lingvo kun la stranga nomo English aŭ Ingliŝ.

Ĝiaj subtenantoj faras la fantazian kaj nekredeblan aserton, ke en kelkaj mondpartoj, ekzemple Britujo kaj Nordameriko, ekzistas personoj, kiuj eĉ lernis kaj de tempo al tempo provas interkompreniĝi per tiu stranga kodo.

Post tralego de kelkaj tekstoj kaj preskaŭ duonhoro da studo de la verko *English for Beginners* mi povas senhezite diri, ke neniu lingvisto povas eĉ dum momento akcepti la asertojn de la tiel nomataj "Englishmen" (elparolu Amerikanz).

Unue ni rigardu tipan verban konjugacion

I give
thou givest
he gives
we give
you give
they give

Kia miksaĵo!

En la pluralo tute ne okazas morfema ŝanĝo, sendube oni ne povas aŭdi verbon kaj kompreni ĉu temas pri unua aŭ tria persono sen la helpo de pronomo. Oni devus diri "The boys they give" por esti komprenata.

Jen alia arbitraĵo: la sama litero "s" kiu montras ke verbo estas singulara (He gives) kaj ne plurala (They give) montras, ke substantivo estas plurala (the boys) kaj ne singulara (the boy). Kiel ordinara persono povas memori tion? Bona lingvisto povas eble memori la regulon, sed kion farus ordinara homo, kiu eĉ ne konscias pri la diferenco inter substantivo kaj verbo?

Tiel arogantaj aŭ konfuzitaj estas la protagonistoj de tiu lingvaĉo, ke kelkaj eĉ emas skribi: "I give" por "Mi donas" anstataŭ korekta "I gives" kvazaŭ la vorto "I" estus plurala!

Plue pri la pronomoj; oni diras "I give him it" sed "He gives me it"; sendube la aŭtoro de la projekto sentis sin devigita de la Latina lingvo enkonduki akuzativan kazon (kiun sendube neniu povas uzi) sed eĉ ne komprenis la diferencon inter akuzativo kaj dativo.

Alia sensencaĵo estas la tiel nomita korelativa tabelo:

Somewhere	Anywhere	Nowhere
Someone	Anyone	Noone
Somehow	Anyhow	Nohow
Something	Anything	Nothing

kaj tiel plu.

Sendube ĝi estas logika; sed ne tiel logika estas la homa menso. Ĉu la English-parolanto devus ĉiam porti karton kun la tabelo kaj rigardi ĝin antaŭ ĉiu vorto, kiun li eldiras?

Ni rigardu kelkajn tipajn specimenojn de la lingvo:– "She sells sea shells on the sea shore", "Peter Piper picked a peck of pickled peppers", "My grandmother has dropped her yo-yo in the mashed potatoes"; monstraj vortoj plenigas ĉiun tekston kiel "pseudoproantidisestablishmentarianisticality", "chiaroscuro", "ungetatability" kaj senfina serio de aliaj.

Kompreneble tia "lingvo" (se oni povas tiel nomi ĝin), kvankam teorie ebla, ne povas esti uzata en la realo; oni certe ne povus traduki en ĝin la majstroverkojn de la mondliteraturo.

Imagu se oni provus meti en la "anglan" la verkojn de Voltaire, Goethe, Turgenev aŭ eĉ la Biblion kiel sugestus kelkaj obseduloj! Kaj ni ne parolu pri originala literaturo. Eble English povas esti ludilo por kelkaj frenezetaj intelektuloj (kiuj cetere, ni suspektas, estas sendube anarkiistoj!) sed, se vi deziras lingvon por la Nordamerika kontinento, estus pli reale studi lingvojn kiel Hopian aŭ Ĉinukan, kiuj havas historiajn tradiciojn kaj konformas al la bezonoj de la ĉiutaga vivo. Kaj por lingvo de Britujo, English havas fortajn konkurantojn, nome kornvalan kaj manksan.

*El la gazeto **The British Esperantist**, 1963, n-ro 686, p. 3-4.*

Stellan Engholm

ESPERANTO KAJ LINGVA SENTO

En n-ro 3-4, 1945 de *Esperanto Internacia* troviĝas artikolo titolita "Lingva Sento". La verkinto, Ismael Gomes Braga, rakontas, ke li en sia nacia lingvo legis libron de verkisto, kiu naskiĝis en alia lando sed longe vivis en Brazilo kaj scias la landan lingvon. La lingvo en la libro estis korekta, tamen ĝi iel ne plaĉis. Sinjoro Braga ne povis kompreni kial. Filologo donis respondon: la verkinto "scias" la lingvon, sed li ne "sentas" ĝin, ĝi estas por li fremda lingvo.

Post tiu klarigo sinjoro Braga komprenis, kial li, malgraŭ vasta studo de la angla lingvo, ne povas paroli angle tiel kiel la angloj mem. La angloj havas "senton" por la angla lingvo, li ne.

"Tia lingva sento estas io sankta, neklarigebla, kio apartigas la homojn per nedifinebla antipatio." – "Ĉu ankaŭ en esperanto ekzistas tiu lingva sento? Ne, ĝi estas nenies nacia lingvo. Ni ĉiuj lernas ĝin kiel fremdan lingvon kaj ne ofendiĝas, se iu alia scias ĝin ne tiel perfekte kiel ni mem."

La cititaj asertoj meritas atenton. Precipe la lasta tuŝas gravan punkton.

Ni unue okupu nin pri la unua aserto pri la lingva sento.

En mia hejmo vivis dum dek jaroj juna parenco, knabo, kiu naskiĝis en Berlino kaj loĝis tie, ĝis li havis kvin kaj duonan jarojn. Tiam li venis al ni. Li tiam tute ne parolis kaj same malmulte komprenis la svedan lingvon. La germanan lingvon li mirinde bone posedis. Li estis vivinta en tre favora lingva medio, kaj lia provizo da vortoj, esprimoj kaj frazkonstruoj egalis almenaŭ al tiu de inteligenta dekjarulo. Kiam ni interparolis kun li kaj estis necertaj pri sekso, fleksioj aŭ aliaj aferoj, li senhezite donis korektan informon. Ĉu li havis "senton" por la germana lingvo? Certe. Lia "sento" por la germana verŝajne estis konsiderinde pli granda ol ĝi estas ĉe la pli multaj svedaj instruistoj de la germana lingvo.

La unuajn monatojn li persiste rifuzis lerni la svedan. Kiam li komencis iom kompreni ĝin, li tamen respondis germane al sveda demando. Post duonjaro li neatendite por ni kaj per unu sola paŝo transiris al la sveda. Lia nova lingvo malmulte similis al kulturita sveda, ĉar li estis lerninta ĝin de ludkamaradoj kaj afablaj gemaljunuloj, kaj ĝi estas la loka dialekto en ĝiaj plej orelfrapaj formoj. Tiun lingvon li ekŝatis kaj diligente perfektigis sin en ĝi. Post kelkaj jaroj li egalis al la maljunaj indiĝenoj rilate al vortoscio, elparolo, nuancosento kaj frazkonstruado. Dume li forgesis la germanan, eĉ konscie klopodis forigi el sia memoro ĉion germanan. Estis dum la epoko de Hitler, kaj scio de la germana ne estis merito inter svedoj.

En la popola lernejo li en la sveda lingvo superis la pli multajn el siaj kamaradoj. Ĉiam li demandis klarigon pri vortoj kaj esprimoj, kiuj ne estis tute

klaraj por li, kaj tial lia efektiva vortprovizo estis pli granda ol tiu de la aliaj infanoj. Ĉu li nun havis "senton" por la sveda lingvo? Jes. Ĝi estis same forta kaj certa kiel iam lia sento por la germana.

Kiam li estis dektri-jara li komencis lerni la germanan en mezlernejo. Tiam lia sento por la germana estis tute for. La seksojn de la substantivoj li senzorge intermiksis, la germanan parolmanieron li ne povis retrovi, esprimojn kaj frazojn li konstruis laŭ sveda modelo. – Tiaj transiroj al aliaj lingvoj okazis kaj okazas ĉie en la mondo. Se temas pri infanoj, la sento por unu lingvo post mallonga tempo estas anstataŭata de sento por alia.

La lingvosento rilate al la propra lingvo ne estas io mistera kaj neklarigebla. Ĝi konsistas tute simple el tiuj lerto kaj certeco, kiuj devenas de ĉiama ekzercado. Kaj ekzercon ni havas ĉiuj superabunde. Fakte ni en neniu alia kampo de mensa agado havas tiom da ekzerco. Imagu kiom da ekzerco havas infano de sia unua lingva sono ĝis sia sepa jaro! En tiu aĝo ĝi ordinare povas bone paroli, kaj ĝi foje havas tre bone evoluintan lingvosenton. Tamen ĝia lingvo kaj la sento por ĝi estas tre limigitaj kompare kun la lingvo kiel tuto. Se mi al la knabo en la supra ekzemplo estus leginta paĝon el Faust aŭ gvidartikolon el Berliner Tageblatt, li estus povinta nenion diri pri la valoro de tiuj.

En tiu aĝo la pli grava parto de la lingvoscio estas akirita, kaj ĝi estas akirita sen peno kaj kun ĝojo. Poste komenciĝas la akiro de la kultura lingvo, kaj ĝi estas longa, peniga kaj ofte teda. La unuan parton de la lingvoinstruado prizorgas la naturo, la dua estas homa elpensaĵo. Verŝajne de tio dependas la granda diferenco. Sed ĉiuokaze la dua ŝtupo estas senfine vasta, oni devas enmemorigi senfine multe da detaloj, devas konscie kritiki, elekti kaj konstrui sian lingvon. En kulturlingvo kun vasta literaturo temas pri akiro de lerto kaj rutino, kiujn amaso da lingvomajstroj kune akiris dum multaj jarcentoj! Vere ne estas mirige, se ne ĉiuj dudekjaraj homoj kun abiturienta ekzameno povas verki kritikrezistan skribaĵon.

Kaj la granda plimulto, por kiu la fino de la elementa lernejo signifas finon ankaŭ de sistema lernado de la propra lingvo? Kompreneble ili ankoraŭ iom lernas, de gazetoj, libroj kaj parolantaj homoj. Sed ilia lernado estas pasiva observo. Ili tiel akiras certan imagon aŭ "senton" pri la kulturita lingvo, stilo en libro aŭ parolado plaĉas aŭ malplaĉas al ili, sed ili ne povas kontentige klarigi kial. Mankas ĉe ili konscia pensado pri lingvaj aferoj kaj konscia klopodo perfektigi la propran lingvon. Tial tute ne estas mirige, se la pli multaj el tiuj ne povas skribi ordinaran leteron korekte. Tamen ankaŭ tiuj havas "senton" por la gepatra lingvo, kvankam ĝi neniel estas tiel vasta kaj certa kiel tiu de studento.

Se ni tiom ekzercas nin per uzado kaj sistema lernado, kiam temas pri la gepatra lingvo, estas ja evidente, ke ni ne povas lerni fremdan nacian lingvon tiel, ke ni povas uzi ĝin kiel nian propran. Nia kapablo ne sufiĉas por proprigi en dua lingvo tiun gigantan materialon, kiun ni dum dudek jaroj proprigis al ni en nia gepatra lingvo kaj kiun ni poste daŭre proprigas al ni. Kaj se kapablo sufiĉus, la disponebla tempo kaj ceteraj cirkonstancoj ne permesus tion. Krom tio

ni en niaj pli multaj agadoj estas kutimagantaj. La pli multaj el ni tute ne povas akiri la ĝustan "senton" por manskribado per la maldekstra mano. En la lingva kampo ni tiom kutimiĝis al kaj fariĝis dependaj de parolmanieroj kaj aliaj proprecoj en la gepatra lingvo, ke ni ne povas forlasi ilin kaj tute transiri al novaj. Por infano, kies kutimoj ankoraŭ estas freŝaj kaj ne fiksitaj, estas pli facile transiri al alia lingvo.

* * *

Ni nun traktu la duan punkton. Sinjoro Braga demandas, ĉu en esperanto ekzistas tia lingva sento, kaj li mem respondas, ke ne.

Por ne esti maljusta mi devas diri, ke sinjoro Braga ne tute pravas. Verdire ekzistas lingvosento en la esperanta popolo. Kompare kun la granda nombro de la esperantistoj kaj ilia cetere arda amo al la lingvo, la kreaĵoj de tiu lingvosento kaj la pruvoj pri ĝi estas tamen tiel maloftaj kaj solstaraj, ke oni devas aldoni, ke sinjoro Braga preskaŭ pravas.

Sed ĉu vere estas eble akiri tian senton por esperanto, kian ni havas por nia gepatra lingvo? Mi pretendas, ke nepre jes. Kiel oni akiru ĝin? Same kiel ni akiras la senton por la gepatra lingvo, escepte la unuaŝtupan lernadon de malgranda infano. Nur malofte iu komencas lerni esperanton per imitado de vortoj kaj interparolo. Krome logiko kaj persona lingvokreado ludas en esperanto pli grandan rolon ol en naciaj lingvoj. Sed cetere estas la sama afero.

"Ni ĉiuj lernas ĝin kiel fremdan lingvon." – Kompreneble ĝi estas fremda al ni, kiam ni komencas lerni ĝin, same kiel la homa lingvo estas fremda al ĵus naskita infano. Sed ĝi ne devas resti al ni fremda kiel lernita nacia lingvo. Neangloj povas diligente legi anglan literaturon dum dudek jaroj kaj pli, kaj la lingvo tamen restas al ili fremda kompare kun ilia propra. Tiel ne devas esti en esperanto.

Komencan kurson oni povas kompari kun la antaŭlerneja lingvolernado de infano. Oni lernas la samajn fundamentajn aferojn. Diferenco estas, ke infano lernas nekonscie, esperantolernanto konscie. Sed kontraŭe al lernanto de fremda nacia lingvo la esperantolernanto lernas aŭ ĉiuokaze devus lerni tiel, ke la lingvo en la fino de la kurso ne ŝajnus al li fremda sed jam intime konata afero, kiun li ĝis certa grado povas mem regi kaj laŭ propra pensopovo uzi korekte, same kiel sesjara knabo uzas la gepatran lingvon. Li scias certan kvanton da vortoj, kaj li scias – kio estas tre grava – la tute precizan sencon de tiuj vortoj, li scias, kiel oni fleksas la vortojn kaj konstruas frazojn. Multege da vortoj kaj frazoj li povas mem konstrui, kvankam li antaŭe ne vidis aŭ aŭdis ilin. Por uzi tiun fundamentan parton de sia nova lingvo, li bezonas nur racie uzi sian propran pensopovon. Ĝi estas jam io, kion li ĝis certa grado mem regas, sekve io propra.

Bedaŭrinde ne ĉiam estas tiel. Kaj bedaŭrinde la daŭrigata studado ne ĉiam havas kiel rezulton veran proprigon de la lingvo kaj tiun lingvosenton, kiun ni pli malpli havas rilate al la gepatra.

Tro ofte oni lernas esperanton – mi pensas ne nur pri la komenco – same kiel nacian fremdan lingvon. Oni mekanike lernas vortojn, gramatikajn aferojn, esprimojn. Poste oni skribante kaj parolante same mekanike uzas la lernitajn aferojn kaj kredas, ke ĉio estas korekta. Necesas do kritikigi malpli trafan skribaĵon kaj diraĵon, por lerni forstreki ĉion, kio ne estas necesa. Tiel ni akiras lingvosenton. Poste ni povas, se ni tion deziras, iom post iom transiri al pli komplikita stilo. Uzante tian ni tamen devas esti same zorgaj kiel antaŭe aŭ ankoraŭ pli.

Memkompreneble modela esperantoliteraturo ludas por la evoluo de la lingvosento la saman rolon kiel nacia literaturo por la evoluo de la sento por la gepatra lingvo.

Sed ĉu tia lingva sento vere estas necesa? Jes. Ni volas, ke esperanto taŭgu kiel internacia kulturlingvo por ĉiuj homoj kaj por ĉiuj temoj, de la plej simplaj ĝis tiuj, kiuj postulas la plej altajn kvalitojn de la lingvo. Sed tia lingvo, kulturlingvo, povas estiĝi nur per konscia kulturado de ĝi. Nenia branĉo de kulturo povas estiĝi, daŭri kaj progresi sen penado kaj senhalta laboro. Jen nia respondeco.

Kiu dum tiaj cirkonstancoj povas fariĝi bona esperantisto? Se tiaj estas la postuloj pri esperantisto, estus pli bone ne okupi sin pri la afero. Multaj homoj ne povas fariĝi unuarangaj stilistoj, eĉ ne duarangaj aŭ triarangaj, kiom ajn ili klopodas.

Nu, ankaŭ en tio ni devas kontentiĝi per la saĝo de la naturo kaj per egalvaloro kun naciaj lingvoj. Kio fariĝus el aliaj branĉoj de la kulturo, se la ĉefa intereso de ĉiuj homoj estus lingvaj aferoj? En naciaj lingvoj ekzistas multegaj gradoj de lingvoscio kaj lingvosento, de tiuj de malgranda infano kaj neinstruitaj homoj ĝis tiuj de lingvaj profesoroj kaj majstroj de belliteraturo. La profesoroj kaj la majstraj verkistoj ne malestimas la infanojn pro tio, ke ili ne scias ĉion pri la lingvo kaj ne povas uzi ĝin perfekte. Se ili estas saĝaj, ili ankaŭ neniel malestimas aŭ mokas arbarlaboriston aŭ kamplaboriston pro tio, ke li ne povas skribi leteron korekte. Same estas kaj ĉiam estos ankaŭ en la esperanta popolo. Ni havas kaj havos multegajn gradojn de lingvoscio kaj lingvosento; sed la lingvo estas komuna posedaĵo de ni ĉiuj, kaj komuna estas ankaŭ la lingvosento, ĉu granda aŭ malgranda, kaj tiel eĉ balbutanta komencanto ne estas al iu alia eksterulo aŭ naciano.

Sed lingva sento kaj kulturado de la lingvo estas bezonataj. Tial ĉiu el ni kiel eble plej bone administru tiujn talentojn, kiuj estas konfiditaj al ni, ili estu multaj aŭ malmultaj.

Fine mi aldonu, ke tiu ĉi artikolo tute ne estas polemiko kontraŭ sinjoro Braga. Mi bone komprenas, kion li volas diri per sia artikolo; ke esperantisto neniam ŝajnas al alia esperantisto alilingvano kaj fremdulo, ĉiuj vere estas samlingvanoj. Nur lia formulado pri la kaŭzo de tio estas iom nefeliĉa kaj erarige farita.

El Malgranda revuo, 1945, n-ro 2, p. 1-9.

E. Lanti

...VIVANTIGI ESPERANTON

En la priesperanta raporto akceptita de la *Ligo de Nacioj* oni povas legi pri milionoj da lernolibroj jam disvenditaj en la mondo.

Nu, ni komparu la nombron de veraj praktikantoj de esperanto kun tiu de lernolibroaĉetintoj.

Nur abonantoj de esperante redaktataj gazetoj indas esti konsiderataj kiel praktikantoj de la lingvo. Sciante, ke la plej legataj eliras apenaŭ dekmil-ekzemplere, oni tuj povas ekvidi, kiom sensignifa estas la rezulto de la ĝisnuna propagando.

Kiel klarigi tiun bedaŭrindan konstaton?

Multaj personoj lernis esperanton nur pro modo, pro ia dandismo. Neniam ili konsciis pri la gravo de la mondlingva afero. Forpasis la modo, aŭ pro ia kaŭzo ili plu ne okupiĝis pri la afero.

La plejmulto el la aĉetintoj de lernolibroj ne ĝisfunde lernis la lingvon. – "Ĝi estas tiel facile lernebla!" diras la troigemuloj, – k[1] pro tio ne trovas ian ĝuon en legado de esperantaj tekstoj. Tiuj baldaŭ ĉesis interesiĝi pri la movado.

Internaciistoj lernis esperanton, ĉar ili opiniis, ke internacia lingvo estas internaciigilo. Sed ne trovante okazon apliki praktike sian scion, ili ankaŭ forlasis niajn vicojn.

La ridinda, fireligieca spirito, kiu antaŭmilite ĉiam prezidis en esperantaj manifestacioj, forpelis kelkajn revoluciulojn, kiuj ne volis partopreni en movado aspektanta kiel kvazaŭa "Savarmeo".

Aliaj kaŭzoj ekzistas, kiuj ankaŭ povus respondi al la ĉi-supre starigita demando.

Kiaj ajn estas la kialoj, kiuj malhelpis la enplantiĝon de esperanto en la vivo, oni ne povas malatenti la fakton, ke, malgraŭ disvendado de milionoj da lernolibroj, la nombro de veraj praktikantoj estas ankoraŭ tre malgranda.

Tamen, nur praktikantoj de lingvo igas ĝin vivanta: Latinon ĉiutage k devige lernas milionoj da studentoj en la tuta mondo. Spite tio latino restas nur mortinta lingvo, tial ke ĝi ne estas uzata en la praktiko.

Ni do unue devas plene konscii pri la nepra neceso de ofta uzado de esperanto, por eliri, almenaŭ spirite, el la kadro de nia nacio, – cele al tutmonda kulturo. Ni devas ĝisfunde lernadi nian lingvon por ĝui ĝian spiriton k ĝin vivantigi per novaj esprimmanieroj.

---

[1]En ĉi tiu teksto *k* = *kaj*.

Uzi esperanton, ne farante gramatikajn erarojn estas nur akcesoraĵo. Kio gravas, tio estas encerbigi, enmensigi la geniecon de la racia esprimilo, kiun kreis Zamenhof.

Kaj precipe ĉiuj SAT-anoj devas lerte penadi por ke nia organizo ebligu al ĉiuj materialan utiligadon de esperanto.

La ĝisnuna preskaŭ nur varba propagando similis la mitologian barelon de la Danaidinoj. Oni varbis, varbadis, sed la varbitoj nur transpasis la senfundan esperantan movadon.

Mi esperas, ke fine ĉiuj seriozuloj atentos pri la faktoj; komprenos, ke nia afero estos solida nur kiam la aĉetintoj de gramatikoj ne forlasos esperanton post kelka tempo, sed enviciĝos en SAT por utiligi sian lernan akiraĵon.

Al ĉiuj varbitoj ni komprenigu, ke ili kuntrenas naciecan heredaĵon, kiun necesas forĵeti per kiel eble plej ofta uzado de sennacieca lingvo kun ĉiulandaj samcelanoj. Esperanto estu en niaj manoj trafa edukilo, kiu igos nin indaj mondcivitanoj.

Tiele ĝi fariĝos vere vivanta lingvo, kiu kreos mondkulturon, sennaciecan spiriton, – k helpos al la ruinigo de la landlimoj; al la forigo de la haladza patriotismo mortiga.

(Dec. 1922)

El Vortoj de kamarado E. Lanti.
Sennacieca Asocio Tutmonda, Leipzig 1931, p. 20-21.

E. Lanti

ĈU KREO AŬ NUR INICIATO?

Oni ne malofte babiladis pri la demando, ĉu Zamenhof "kreis" aŭ nur "iniciatis" esperanton. Li mem deklaris: "Mi ne volas esti *kreinto* de l' lingvo, mi volas nur esti *iniciatoro*".

Ni komprenu ĝuste la signifon de la vortoj: "Mi ne volas... mi volas nur". Cetere, Zamenhof diris aliokaze, ke "*kreado* (substreko nia) de plena en ĉiuj rilatoj taŭga k[1] vivpova lingvo postulas specialan talenton k inspiron".

Ĉu ne estas eble eliri el tiuj ŝajnaj kontraŭdiroj? Certe jes! Sufiĉas por tio kompreni, ke ĉiam la vortoj havas sian plenan k precizan signifon nur en kontakto kun la kuntekso k plie, ke oni devas scii, en kiu tempo, en kiuj cirkonstancoj ili estis eldirataj. Kompreneble tian esploron mi ne povas fari en la kadro de ĉi tiu artikoleto.

Mi tamen asertas, ke Zamenhof fakte "kreis"... la *fundamenton* de nia lingvo: li donis al ĝi spiriton, animon – pli ĝuste, vivpovon. Sed prave oni ankaŭ povas argumenti, ke li estis nur ĝia iniciatinto. Estas ja evidente, ke esperanto evoluas, pliriĉiĝas, plifirmiĝas kun sia ĉiutaga, ĉiufaka aplikado.

Homo, vivanta en antaŭfiksitaj kondiĉoj, rezultantaj el multe da heredaj, historiaj k ekonomiaj faktoroj, homo el karno k sango – Zamenhof! – enkorpigis la ecojn necesajn por lingvon "krei", "artefari", "naski" – kiel al vi plaĉos! – Jes, homo, *individuo*, ne kolektivo, ne komitato.

Sed la "kreita", "artefarita" aŭ "naskita" lingvo estis ĉe la komenco kvazaŭ malforta infano, ŝanceliĝema sur siaj kruroj; ĝi bezonis nutron, zorgon, edukadon k spacon por akiri la necesan forton k konkeri la mondon. Tion povis al ĝi donadi nur *kolektivo*. Sekve oni ankaŭ povas aserti, ke la nunan esperanton kreis – kreas! – kolektiva kunlaborado.

Se Zamenhof vivus en malgranda insulo, perdita en Oceano k havanta neniujn rilatojn kun la ekstera mondo, li certe ne "kreus" esperanton. Sed tio ne signifas, ke nia lingvo povus ekzisti sen "kreinto", nur per la mirakla forto de la kvazaŭ diigitaj "produktaj fortoj"[2]. Kiuj asertas, ke nia artefarita lingvo (ne temas pri natura idiomo) rezultas de "socia produktado" aŭ de io simila, tiuj iel parencas mense kun s-ro Merĉnt (Merchant), la prezidanto de la *Internacia Centra*

[1]En ĉi tiu teksto *k* = *kaj*.

[2]Oni ne miru pri mia insisto tiurilate. La demando ja estas tre grava: temas forte konvinki niajn kamaradojn, ke iliaj volo, persisto k sindonemo kondiĉas grandparte la sukceson de nia movado. Ni ne devas blinde malatenti la fakton, ke la grandega plimulto da esperantistoj tute ne komprenas la veran socian, historian signifon de artefarita lingvo k pro tio tre diletante rilatas al nia afero.

Komitato de la Esperanto-Movado, kiu lastatempe skribis, "ke Esperanto estas unu el la plej grandaj benoj iam donacitaj de la Bona Dio al la homaro, pere de la genio de homo".

Ĉiama problemo: Ĉu la medio faras la homon k ĉu li restas absoluta sklavo de la medio? Tro unuflanka elmeto de l' demando. La homo estas parto de la medio – k ĝia plej aktiva parto. Li transformas la medion, adaptas ĝin al si k sekve okazas, ke la transformiĝo atingas tioman gradon, ke la vivkondiĉoj, la produktaj fortoj fariĝas tute malsamaj; tial ili reefikas sur la transforminton mem. Senĉesa luktado k ekvilibro de kontraŭaj inter si fortoj!

Homo artefaris esperanton; homoj, miloj da homoj aplikas ĝin k per tio arte aliigas la medion, faciligante la interrilatojn, kreante novan spiritostaton, eĉ novan ideologion...

Tamen restas multnombraj revoluciuloj, internaciistoj tiom sklave adaptiĝintaj al la medio, tiom rutinemaj sur tiu kampo, ke ili tute ne atentas la mondlingvan movadon. Se hazarde, okaze, ili paroletas pri "kunfandiĝo de nacioj", tiam ili prezentas al si ankaŭ kunfandiĝon de ĉiuj lingvoj en unu solan – *naturan.*

Bonan ŝancon!...

Dume ni senlace aplikadu nian herezan, artefaritan esperanton.

(19 dec. 1929)

El Vortoj de kamarado E. Lanti.
Sennacieca Asocio Tutmonda, Leipzig 1931, p. 37-39.

Ivo Lapenna

KELKAJ ASPEKTOJ DE LA LINGVA PROBLEMO EN INTERNACIA PUBLIKA JURO KAJ KOMPARA JURO

I. Internacia Juro

(1) **Lingvoj uzataj.** – La fondintoj de la moderna scienco de Internacia Juro uzis la latinan, kiu estis, kiel montrite aliloke [1], la lingvo de la tiamaj interŝtataj rilatoj. La ĉefaj verkoj de tiu frua epoko *Relectiones de Indis Noviter Inventis* (1532) de la hispano Vitoria; *De Legationibus* (1588), *Commentationes de Jure Belli* (1589) kaj *De Jure Belli Libri Tres* (1598) de la italo Gentili, kiu vivis en Anglio kaj fariĝis profesoro en Oxford; *Mare Clausum* (1618) de la anglo Selden; *Mare Liberum* (1609), *De Jure Prædæ* (1605) kaj la mondfama *De Jure Belli ac Pacis Libri Tres* (1625) de la nederlandano H. Grotius, la plej granda el ĉiuj, kaj aliaj estis verkitaj en la latina. Superflue emfazi la avantaĝojn, kiujn donis la uzo de unu sola komuna lingvo por scienca branĉo plej esence internacia. Paralele kun la malaperado de la latina en la internaciaj rilatoj, ĝi malaperis ankaŭ el la doktrino. Multnombraj, praktike ĉiuj naciaj literaturaj lingvoj de la mondo, anstataŭis ĝin en la nuntempo.

(2) **Problemoj.** – Ĉu la multlingveco sur tiu ĉi kampo kaŭzas malfacilaĵojn kaj, se jes, kiujn?

(i) **Terminologio:** Pro la universaleco de la Internacia Juro, la baza terminologia materialo estas unuforma. En kelkaj lingvoj la terminoj estas pli aŭ malpli internaciaj; en aliaj ili estas kreitaj surbaze de nacilingvaj vortoj; en nombro da lingvoj paralele ekzistas ambaŭ formoj por granda nombro da nocioj. Tamen, tio ne kaŭzas malfacilaĵojn. Ne multe gravas, ekzemple, ĉu oni nomas tiun juran branĉon *Law of Nations, Droit des Gens, Völkerrecht, Meždunarodnoe Pravo, Medjunarodno Pravo* ktp., aŭ *International Law, Droit International, Diritto Internazionale, Derecho Internacional, Internacionalno Pravo* ktp., aŭ simile por aliaj nocioj. Grave estas, ke la terminoj por la diversaj nocioj estas ĝenerale firme establitaj en la diversaj lingvoj. Tio koncernas ankaŭ la terminologion por la nocioj de regiona Internacia Juro, tutcerte en la lingvoj de la regiono, al kiu ĝi aplikiĝas, sed ĝenerale ankaŭ ekster ĝi. Oni eble povus diskuti pri la pli aŭ malpli granda taŭgeco de tiu aŭ alia esprimo en iu lingvo, sed tio ne ŝanĝas la fakton, ke en la sfero de Internacia Juro, eĉ se kelkfoje oni renkontas malfacilaĵojn, tamen ĝenerale ne ekzistas veraj terminologiaj problemoj en la

[1] Vidu la studon pri *La Lingva problemo en internaciaj rilatoj* (Dok. A/II/1).

strikta senco de la vorto.[1] Interalie, tio faciligas la tradukojn de internacijuraj traktaĵoj de unu lingvo en alian.

(ii) **Fontoj:** Alie prezentiĝas la afero rilate la alireblon de la fontoj. La internaciaj konvencioj – la plej grava fonto hodiaŭ – estas farataj en la lingvoj de ĉiuj ŝtatoj de la mondo. Eĉ la plej gravaj konvencioj, unuavice la multflankaj sur kiuj baziĝas la diversaj interŝtataj organizaĵoj, estas kelkfoje skribitaj en lingvoj, el kiuj neniu estas ĝenerale konata al specialistoj kaj interesitoj de aliaj landoj. Sufiĉas atentigi, ke, ekzemple, la Traktato de Romo de 1957 kaj diversaj interkonsentoj, protokoloj, instrukcioj kaj aliaj dokumentoj de la Eŭropa Ekonomia Komunumo estas en la germana, franca, itala kaj nederlanda. Okaze de la diskuto pri aliĝo de Britio al la Komuna Merkato, politikistoj kaj la gazetaro plendis, ke pro tio la jura situacio ne estas klara kaj ke en tiaj kondiĉoj la parlamentanoj ne povas formi objektivan opinion. Urĝe estis farita angla traduko de la Traktato – ne tre sukcesa, cetere – sed la aliaj multnombraj dokumentoj restis plue nealireblaj por la grandega plimulto de la interesitoj. Kaj kion diri pri la centoj kaj miloj da aliaj internaciaj konvencioj, daŭre registrataj ĉe UN kaj publikigataj en senfina vico da volumoj? Tiu tuta materialo restas amase perdita en la polvo de bibliotekoj kaj grandparte nealirebla por esploro.

Ankaŭ alia granda fonto – la ĝeneralaj juraj principoj, rekonitaj de la civilizitaj nacioj – estas malmulte konata al la doktrino. Se la Internacia Kortumo pro sia internacia konsisto ĝis maksimumo posedas scion pri la ĉefaj juraj sistemoj de la mondo, tion certe oni ne povas diri pri la doktrino. En ĉiuj verkoj, en ĉiuj lernolibroj de Internacia Juro oni nun mencias la ĝeneralajn jurajn principojn kiel apartan fonton (kvankam iuj esprimas dubojn pri ilia signifo), sed oni nenion diras pri kiuj principoj vere temas, ĉar tutsimple la multnombreco de lingvoj obstaklas la esploron. La samon oni povas diri pri la juĝoj de diversaj tribunaloj kaj pri la "instruo de la plej alte kvalifikitaj aŭtoroj de diversaj nacioj" kiel helpaj fontoj de Internacia Juro. Kiamaniere oni povas studi la doktrinojn de aliaj landoj, se oni ne scias la respektivajn lingvojn? Eĉ la soveta doktrino de Internacia Juro – do doktrino de unu el la plej potencaj ŝtatoj – estas preskaŭ komplete nekonata en la Okcidento kaj entute ekster la t.n. soveta bloko, por ne paroli pri la aliaj skoloj en malpli gravaj landoj. En la Universitato de Zagreb, el centoj da studentoj de Internacia Juro nur kelkaj regis 1-2 fremdajn lingvojn. En du klasoj de Internacia Juro, kiujn mi instruis en 1961/1962, el 28 studentoj neniu povis

---

[1] La ĉefajn problemojn, kelkfoje gravajn, oni renkontas tie, kie estas necesa absolute precizeco, ekzemple en tradukoj de internaciaj konvencioj aŭ okaze de interpretado de tekstoj en du aŭ pli da oficialaj lingvoj. Ekzemple, en la franca teksto de la art. 36 de la statuto de la Internacia Kortumo oni uzas la vortojn *compétence* kaj *jurisdiction*, dum en la angla teksto, pro la fakto, ke la angla *competence* ne respondas al la franca *compétence,* oni trovas en ĉiuj kazoj nur *jurisdiction*.

eĉ legi en kiu ajn alia lingvo krom en la angla aŭ, kompreneble, ankaŭ en la nacia de sia lando, se temis pri alilingvanoj.[1]

Al ĉio ĉi aldoniĝas la malfacilaĵoj en internaciaj renkontiĝoj de specialistoj pri Internacia Juro, la samaj, kiujn frontas ĝenerale la internaciaj renkontiĝoj ne uzantaj unu solan komunan lingvon.

La multlingveco, do, sendube prezentas gravan obstaklon al la establo kaj studo de ĉiuj principoj kaj reguloj de la nuntempa Internacia Juro surbaze de la rekonitaj ĉefaj kaj helpaj fontoj; por la plua evoluo de la scienco de Internacia Juro; por la senperaj kontaktoj de personoj esplorantaj, studantaj, instruantaj kaj kree produktantaj en tiu ĉi jura branĉo.

(3) **Taŭgeco de la Internacia Lingvo.** – Kvankam ankoraŭ ne ekzistas en Esperanto aparta terminaro por Internacia Juro, tamen oni ne renkontas specialajn terminologiajn problemojn. Pluraj verkoj, studoj, artikoloj rilatantaj al Internacia Juro jam aperis en Esperanto. La aŭtoro de tiu ĉi malgranda raporto mem publikigis unu verkon[2], kelkajn studojn kaj artikolojn, faris plurajn prelegojn en I.S.U. kaj diversaj internaciaj seminarioj pri demandoj rilatantaj al Internacia Juro, sed neniam renkontis problemon nesolveblan. Multaj terminoj troviĝas en la *Plena vortaro*[3] kaj en la du ekzistantaj juraj terminaroj. La principoj, kiujn mi aplikas estas: (a) uzi la ekzistantajn ĝeneralajn vortojn en faka senco, kiam ajn tio estas ebla, kaj apartajn fakajn terminojn, se ili jam estas kreitaj; (b) se ne ekzistas konvena termino, krei novan laŭ la principo de la *Fundamento de Esperanto*, ke ĉiu internacia radiko povas esti transformita en Esperantlingvan (pro la universaleco de Internacia Juro tio ne kaŭzis malfacilaĵojn); (c) konservi la latinajn esprimojn kaj maksimojn, kiuj estas jam firme establitaj.

En la Aldono B troviĝas, nur kiel malgranda ekzemplo, traduko de la unuaj 12 terminoj laŭ aboca ordo el la Glosaro de Schwarzenberger[4] kaj de la fama Art. 38 de la Statuto de la Internacia Kortumo.

II. Kompara Juro

(1) **Terminologio.** – Diference de la Internacia Juro, la terminologiaj problemoj sur la kampo de Kompara Juro estas vere grandaj. Tio ŝuldiĝas parte al malesto en iu lingvo de fakaj terminoj por juraj nocioj el alia sistemo, sed ĉefe al malsameco de la signifoj de la fakaj terminoj en diversaj lingvoj. Okazas, ke kelkfoje tutsimple en iu lingvo entute ne troviĝas termino por jura nocio el alia sistemo. Lingvo ĉiam reflektas la bezonojn de pensado kaj komunikado de difinita socia medio. Sekve, se en la jura sistemo A tute ne ekzistas difinita jura

[1] La nombro de gestudentoj, kiujn la aŭtoro instruis ĝis 1983, estis pli ol mil. El ili nur unu scipovis la francan kaj du aliaj devis lerni la bazojn de la rusa por povi verki siajn doktorecajn tezojn.
[2] Lapenna: *Aktualaj problemoj.*
[3] Eĉ multe pli en la nuna *Plena ilustrita vortaro.*
[4] Schwarzenberger, Vol. 2, p. 677.

koncepto, kiu troviĝas en la sistemo B, tiam por tiu koncepto, kompreneble, ekzistas vorto en B, sed ne en A. La sola ebleco en tiaj kazoj estas prunti la vorton el la alia lingvo kaj uzi ĝin kiel fremdan aŭ naciigitan en la propra nacia lingvo, se la strukturo de la koncerna lingvo tion permesas, aŭ kiel internaciigitan en Esperanto. Tiaj vortoj, ekzemple, estas kolĥozo, sovĥozo, artelo k.s. surbaze de la rusaj *kolĥoz, sovĥoz, artel'*. Estas multe pli bone agi tiel ol diri "mastruma kolektivo", "soveta mastrumunuo", "libervola unuiĝo por produktado surbaze de ŝtatigitaj produktorimedoj" k.s. En ĉiu okazo necesas difini la terminojn. Tia termino, foje enkondukita en la lingvon, donas, almenaŭ en Esperanto, multajn eblecojn de derivado: kolĥoza proprieto, kolĥozano, kolĥozanino ktp.

Plej ofte, tamen, en la lingvoj de la komparataj sistemoj (aŭ en tria lingvo, se oni verkas en ĝi), troviĝas ĝeneralaj juraj terminoj por la traktataj konceptoj, sed la termino en unu lingvo ne kovras la saman nocion en alia. Ekzemple, eĉ la plej elementaj terminoj kiel *proprieto, posedo, civila juro, krimo, kriminala juro, kortumo, juĝisto, advokato* kaj centoj da aliaj troviĝas en la rusa, kroata, angla kaj franca por resti ĉe la lingvoj en kiuj mi laboras sur la kampo de kompara juro, sed la juraj konceptoj, kiujn ili kovras estas tre malsamaj en la soveta, jugoslavia, franca kaj angla juraj sistemoj. Sekve, nur per precizaj difinoj oni povas eviti konfuzon kaj miskomprenojn.

Necesas ankaŭ atingi – kaj tio estas ebla – ke en difinita lingvo oni uzu ĉiam la saman terminon por la sama nocio el alia jura sistemo, kaj ne, kiel nun okazas, ke, depende de la personaj preferoj de la aŭtoroj, oni uzas en la sama lingvo plej diversajn terminojn por difinita koncepto el alia jura sistemo. Tio precipe okazas en la angla kaj usona variantoj de la angla lingvo rilate la rusajn terminojn. Ekzemple, la rusa *obščenarodnoe gosudarstvo* (tutpopola ŝtato) estas tradukata per *all-people's state* aŭ *state of the whole people* aŭ simile; la rusa *pravosposobnost'* (jura kapablo) per *juridic capacity, juridical capacity, legal capacity*; la rusa *dejesposobnost'* (aga kapablo) per *capacity to act, legal capacity* (vidu la konfuzon kun jura kapablo), *capacity to enter into legal transactions* k.s.; la rusa *umysel* (dolo) per *intention, malice, premeditation* kaj alimaniere. Kaj tiel same pri multaj aliaj terminoj el Soveta Juro.

Malpli konfuza, sed tamen grava, estas la problemo de transskribado per latinaj literoj de tekstoj verkitaj en lingvoj, kiuj ne uzas la latinan alfabeton. Ekzemple, por la latinlitera transskribado de rusaj tekstoj oni aplikas en la angla almenaŭ tri sistemojn: la internacian (plej malmulte), tiun de la Biblioteko de Washington, tiun de *Slavonic and East European Review*. Krome, pluraj aŭtoroj aplikas sian propran individuan sistemon.

En Hamburgo, okaze de la Sesa Internacia Kongreso de Kompara Juro (30 jul.–4 aŭg. 1962) aparta sekcio traktis la eblecon establi komunan juran lingvaĵon. La rezultoj bedaŭrinde ne estas videblaj. Tutcerte almenaŭ io povus esti atingita en du stadioj:

(a) Unuecigi la terminaron en ĉiu unuopa lingvo por la juraj konceptoj de aliaj

juraj sistemoj kaj akcepti internacian transliterumadon kiam ajn tio eblas. Tiun laboron devus entrepreni la institutoj de Kompara Juro aŭ similaj aŭtoritaj instancoj de diversaj landoj. La aŭtoroj devus observi la regulojn tiel formulitajn.

(b) Paralele, sed ĉefe post tio, estus eble esplori ĝis kiu grado oni povas unuecigi internacie la terminologion. La neŭtrala Esperanto povus doni ankaŭ en tiu laboro grandajn servojn kiel ponto-lingvo kaj lingvo por la bazaj difinoj.

(2) **Rolo de Esperanto.** La spertoj de la aŭtoro en la sfero de Soveta kaj Orienteŭropa Kompara Juro rilatas al la uzo de Esperanto por rekta verkado en tiu lingvo kaj al ĝia utiligo kiel ponto-lingvo.

(i) **Rekta uzo:** Verkante originale en la Internacia Lingvo la aŭtoro ne renkontis iajn specialajn malfacilaĵojn. Kiam renkontitaj, la malfacilaĵoj estis konsiderinde malpli grandaj ol en la franca, angla aŭ itala. Tio certe ŝuldiĝas ankaŭ al la fakto, ke li posedas la Internacian Lingvon proksimume egale kiel la hejman (kroatan) kaj multe pli bone ol la menciitajn aliajn lingvojn, sed la ĉefan meriton li trovas en la strukturo mem de Esperanto. La pozitivaj trajtoj de tiu lingvo estas: ĝia fleksebleco, kiu permesas esprimi en ĝi ĉiujn nuancojn de la penso kaj, en kazo de citaĵoj, adapti ĝin ĝis maksimumo eĉ al la stilo de la originalo; ĝia aglutina karaktero, kiu prezentas praktike senfinajn eblecojn de derivado; la facileco, per kiu oni povas enkonduki en ĝin novajn necesajn fakajn esprimojn.

(ii) **Ponto-Lingvo:** La cirkonstancoj devigis min vastege utiligi Esperanton kiel ponto-lingvon en mia faka laboro dum kelka tempo. Kiam en 1951 mi ekloĝis en Londono, bedaŭrinde mi sciis eĉ ne unu vorton de la angla lingvo. Pro troa okupiteco mi ne havis la eblecon dediĉi min al serioza studado de la angla. Kiam venis la tempo, ke mi verku studojn el la sfero de Kompara Juro en la angla, mia scio de tiu lingvo apenaŭ transpasis la limojn de pasiva kono. En tiaj kondiĉoj mi petis amikon, s-ron William Auld el Skotlando, kiu estas instruisto de la angla lingvo kaj literaturo, kaj verkisto, sed ne juristo, helpi min per tradukoj el Esperanto en la anglan. Ni interkonsentis pri la metodo de laboro: mi verkos ĉion en Esperanto kaj li laŭvice tradukos en la anglan. Ni ankaŭ interkonsentis, ke rilate la fakajn terminojn mi ĉiam sugestos en krampoj (...) la anglan vorton aŭ plurajn vortojn por lia elekto, se mi mem scios ilin. Plue, same en krampoj, estis kelkfoje donitaj eksplikoj pri la signifo de la koncerna nocio en la soveta aŭ jugoslavia juraj sistemoj, kio estis la temo de la studoj. Necesas ankaŭ aldoni, ke s-ro Auld havas nenian scion pri la rusa, serba-kroata aŭ kiu ajn alia slava lingvo. Verkante originale en Esperanto mi renkontis, kiel jam menciite supre, tre malmultajn verajn malfacilaĵojn. Eĉ en la kazo de abundaj citaĵoj, mi povis konstati, ke tre facile mi trovas adekvatajn esprimojn en Esperanto por la pensoj de aliaj aŭtoroj kaj, eĉ pli, ke mi povas en Esperanto reflekti ĝis maksimumo la originalan tekston. Ĝi estis plej ofte kvazaŭ ia speguło de la originalo aŭ kvazaŭ iu vitro, tra kiu mia kunlaboranto povis iamaniere vidi kaj senti la originalon tra la traduko. Tekstoj de entute ĉ. 200 000 vortoj estis tiamaniere tradukitaj en la anglan. La rezultoj estis bonegaj. La fideleco al la originala penso, esprimita

tamen perfekte en la spirito de la angla lingvo, estis maksimuma. Tio eble ne estas tiel surpriza, ĉar ni interkonsentis, ke li redonos en la angla kiel eble plej multe la ideojn esprimitajn en la originalo, kaj ne sklavece la tradukon de la vortoj kaj frazoj, kiam ajn temis pri miaj propraj tekstoj. Sed kiam temis pri citaĵoj el la rusa aŭ serba-kroata originaloj, mia traduko en Esperanton devis esti ĝis maksimumo fidela al la originalo kaj, same tiel, lia traduko nepre plej preciza, tiel ke la angla teksto kaj la teksto de la originalo estu ĝis maksimumo samaj. En tiuj kazoj la Internacia Lingvo ludis la rolon de ponto-lingvo kaj plenumis ĝin perfekte. Komparante la originalan rusan aŭ serba-kroatan tekstojn kun la anglaj tradukoj, kaj lasante plene flanke la tradukon de la ponto-lingvo, evidentiĝis grandega fideleco. Tiu deviga grandega eksperimento – verŝajne la unua en la historio de la Internacia Lingvo – montris la taŭgecon de Esperanto kiel ponto-lingvo.

En la Aldono C troviĝas kelkaj specimenoj de tradukoj el Esperanta originalo en la anglan, kiel ankaŭ el la rusa aŭ franca originaloj tra Esperanto kiel ponto-lingvo en la anglan. Plia ekzemplo montras la tradukon el la angla en Esperanton, kiun mi mem faris, kaj la tradukon de s-ro Auld el Esperanto denove en la anglan sen vido de la originala angla teksto. Komparante la originalan anglan tekston kun la angla retraduko el Esperanto oni povas facile vidi la gradon de fideleco.

Resume, oni povas diri, ke la Internacia Lingvo estas ne nur matura por originala verkado en la sferoj de Internacia Juro kaj Kompara Juro, sed ke ĝi povas ankaŭ, se necese, efike plenumi la funkcion de ponto-lingvo.

Aldono A
Bibliografio

Basdevant, J. (kaj aliaj): *Dictionnaire de la terminologie du droit international* (Vortaro de la terminologio de internacia juro), Paris 1960.

Frangulis, M.A.: *Dictionnaire diplomatique* (Diplomatia vortaro), Paris 1936, Vol. 1.

Gromyko, A. A.: *Diplomatičeskij slovar'* (Diplomatia vortaro), Moskva 1960, Vol. 1-2.

Ioffe, O. S. (kaj aliaj): *Sorok let sovetskogo prava* (Kvardek jaroj de soveta juro), Leningrad 1957, Vol. 1.

Koževnikov, F. I.: *Sovetskoe gosudarstvo i meždunarodnoe pravo* (Soveta ŝtato kaj internacia juro), Moskva 1948.

Lapenna, Ivo: *Retoriko*, Dua eldono, Rotterdam 1958, Unua parto: Lingvo; *Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo*, Rotterdam 1952; *Conceptions soviétiques de droit international public* (Sovetaj konceptoj de internacia publika juro), Paris 1954; *La Internacia Lingvo – Faktoj pri Esperanto*, Londono 1954.

Lisovskij, V. I.: *Meždunarodnoe pravo* (Internacia juro), Moskva 1955.

Meillet, A., Cohen, M. (redaktoroj): *Les langues du monde* (La lingvoj de la mondo), Paris 1952.

Oppenheim, L.: *International Law* (Internacia juro), Oka eldono, red. de H. Lauterpacht, London–New York–Toronto 1958, Vol. 1.

Satow, Ernest: *A Guide to Diplomatic Practice* (Gvidilo al diplomatia praktiko), Unua eldono 1917; Tria eldono, reviziita de H. Ritchie, London–New York–Toronto 1932.

Schwarzenberger, Georg: *Manual of International Law* (Manlibro de internacia juro), Kvara eldono, London–New York 1960, Vol. 2.

Strupp, Karl: *Wörterbuch des Völkerrechts und der Diplomatie* (Vortaro de internacia juro kaj diplomatio), Berlin–Leipzig 1925.

Waringhien, Gaston: *Lingvo kaj vivo*, La Laguna 1959.

* * *

Annuaire des organisations internationales (Jarlibro de internaciaj organizaĵoj) 1960/1961, eldonita de la Unio de Internaciaj Asocioj (UIA), Bruxelles.

ASLIB Proceedings (ASLIB Presprotokoloj), London, Vol. 10, majo 1958, n-ro 5.

Associations Internationales – International Associations (Internaciaj asocioj), Monata revuo de internaciaj organizaĵoj kaj kunvenoj, Bruxelles 1957-1962.

CED: Dokumentoj en la arkivo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado:

N-ro 982A Ass.Gén.N.U., Res. 262 (III) pri la laboraj lingvoj en UN.

N-ro 983 UN: E/CN.4/737/Add.1 de la 27/II/1957 pri la Jarlibro de la Homaj Rajtoj.

N-ro 1059A Unesco: 44 EX/9 de la 22/VI/1956 pri la kostoj de la Lingva Servo.

N-ro 1059 Unesco: DPL:MEMO 56/153 de la 5/I/1956 pri la laboraj lingvoj kaj la kostoj de interpretado.

N-ro 1104 La lingva problemo antaŭ la Kongreso de PEN-kluboj.

N-ro 1119 ASLIB: Konferenco pri scienca kaj teknika tradukado 1958.

N-ro 1447 FAO: C 59/3 pri la laborprogramo kaj buĝeto 1960/61.

N-ro 1448 "Stadt Anzeiger", Köln, art. pri 150 interpretistoj kaj funkciuloj en konf. de Unesko.

N-ro 1559 Eltiraĵo el studo de D-ro James Lieberman, Boston, Usono, pri interpretado en UN.

N-ro 1667 "Het Vrije Volk", Rotterdam, 19/V/1962, pri ned. interpretistoj kaj salajroj.

Cour Internationale de Justice (Internacia Kortumo), *Série D, Acts et documents relatifs à l'Organisation de la Cour* (Serio D, Aktoj kaj dokumentoj rilate la organizon de la Kortumo), n-ro 1, Dua eldono, 1947.

Esperanto, monata oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio.

Jarlibro de Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam 1962.

Unesko: *Conference Manual* (Konferenca manlibro), reviziita eldono publikigita post la 11-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco, Paris 1960;

— *Proposed Programme and Budget for 1963/1964* (Propono de Programo kaj Buĝeto por 1963/1964);
— *Records of the General Conference* (Protokoloj de la Ĝenerala Konferenco), Oka Sesio, Montevideo 1954, Rezolucioj.

Aldono B

Ekzemplo de fakaj terminoj (laŭ Schwarzenberger II, p. 677)

Absolute Responsibility: as distinguished from the doctrine of culpability (q.v.), doctrine according to which State responsibility may arise even in the absence of guilt (intent or negligence) imputable to a subject of international law.

Absoluta Respondeco: distinge disde la doktrino de kulpeco (q.v.), doktrino laŭ kiu la Ŝtato-respondeco povas ekesti eĉ se forestas kulpo (intenco aŭ neglekto) imputebla al subjekto de internacia juro.

Absolute Right: (1) Right which may be exercised against everyone, (2) Right which may be exercised irrespective of equitable considerations to the contrary. See also under Abuse of Rights, *Jus æquum, Jus in re, Jus strictum* and Relative Rights.

Absoluta Rajto: (1) Rajto, kiu povas esti efektivigata kontraŭ ĉiu ajn. (2) Rajto, kiu povas esti efektivigata senkonsidere al kontraŭaj postuloj de justeco. Vidu ankaŭ sub Misuzo de Rajtoj, *jus æquum, jus in re, jus strictum* kaj Relativaj Rajtoj.

Abuse of Rights: doctrine according to which an unmotivated or unreasonable exercise of right amounts to an illegal act (q.v.)...

Misuzo de Rajtoj: doktrino laŭ kiu nemotivita aŭ maljusta efektivigo de iu rajto egaliĝas al kontraŭleĝa ago (q.v.)...

Accessio cedit principali: an accessory thing when annexed to a principal thing becomes part of the principal thing.

Accessio cedit principali: akcesora aĵo, se aneksita al ĉefa aĵo, fariĝas parto de la ĉefa aĵo.

Accession: (1) Acquisition of title to additional territory through natural causes. (2) Equivalent to adherence (q.v.).

Akceso: (1) Akiro de titolo al aldona teritorio rezulte de naturaj kaŭzoj. (2) Ekvivalento de aliĝo.

Acquisitive Prescription: Title to territory based on uninterrupted and uncontested occupation (q.v.) over a reasonable long period. See also under Historical Bays and Waters.

Akira Preskripto (*Uzukapo*): Titolo al teritorio bazita sur seninterrompa kaj nekontestita okupado (q.v.) dum prudente longa periodo. Vidu ankaŭ sub Historiaj Golfoj kaj Akvoj.

Actio personalis moritur cum persona: a personal right of action dies with the person.

Actio personalis moritur cum persona: persona akuzrajto mortas kun la persono.

Ad hoc: for a particular purpose.

Ad hoc: por aparta celo.
Adherence: acceptance of a treaty by a third State with the consent of the original parties.
Aliĝo: akcepto de traktato fare de tria Ŝtato kun la konsento de la originalaj partioj.
Administrative International Institutions: international institutions with executive jurisdiction.
Administraj Internaciaj Institucioj: internaciaj institucioj kun ekzekutiva jurisdikcio.
Adoption: doctrine according to which international law is incorporated into municipal law by custom or statute but does not become automatically part of municipal law. See also under Dualism and Monism.
Adopto: doktrino laŭ kiu internacia juro estas enkorpigata en la internan juron per kutimo aŭ leĝo, sed ne fariĝas aŭtomate parto de interna juro. Vidu ankaŭ sub Dualismo kaj Monismo.
Advisory Opinion: answer to a question put to the International Court of Justice by organs of the United Nations or Specialised Agencies (q.v.) authorised to make such a request.
Konsulta Opinio: respondo al demando farita al Internacia Kortumo fare de la organoj de Unuiĝintaj Nacioj aŭ Specialigitaj Organizaĵoj (q.v.) rajtigitaj starigi tian demandon.

* * *

ART. 38 DE LA STATUTO DE LA INTERNACIA KORTUMO
Angla originalo – Esperanta traduko

1. The Court, whose function is to decide in accordance with international law such disputes as are submitted to it, shall apply;
1. La Kortumo, kies funkcio estas decidi konforme al internacia juro tiujn malkonsentojn, kiuj estas submetitaj al ĝi, aplikos:
(a) international conventions, whether general or particular, establishing rules expressly recognized by the contesting States;
(a) internaciajn konvenciojn, ĉu ĝeneralajn ĉu specialajn, establintajn regulojn eksplicite rekonitajn de la Ŝtatoj en konflikto;
(b) international custom, as evidence of a general practice accepted as law;
(b) internacian kutimon kiel pruvon de ĝenerala praktiko akceptita kiel juro;
(c) the general principles of law recognized by civilized nations;
(c) la ĝeneralajn jurajn principojn rekonitajn de civilizitaj nacioj;
(d) subject to the provisions of Art. 59, judicial decisions and the teaching of the most highly qualified publicists of the various nations, as subsidiary means for the determination of rules of law,
(d) sub rezervo de la kondiĉoj de la Art. 59, juĝdecidojn kaj instruon de la plej

alte kvalifikitaj publicistoj de diversaj nacioj, kiel helpajn rimedojn por la determino de juraj reguloj.
2. This provision shall not prejudice the power of the Court to decide a case *ex æquo et bono*, if the parties agree thereto.
2. Tiu ĉi preskribo ne prejudicos la povon de la Kortumo decidi *ex æquo et bono*, se la partioj konsentas.

Aldono C

Ekzemplo 1. Esperanto-Angla
Esperanta originalo:

Por devige alkutimigi la popolon, precipe la kamparanan loĝantaron, al civila geedziĝo, la Familia Kodo 1918 (simile al Dekreto 1917) intence ne egaligis jure la faktan kunloĝadon kun la registrita geedziĝo. Fari tion estus implicinta la rekonon, ke la eklezia geedziĝo estas egalvalida kiel la registrita. Kaj precize tion ĝi volis eviti. N. V. Rabinoviĉ diras tiurilate:

Angla traduko:

In order forcibly to accustom the people, particularly the peasant population, to civil marriage, the Family Code 1918 (like the 1917 Decree) intentionally did not legally equate cohabitation *de facto* with registered marriage. To have done so would have been implicitly to recognise church marriage as being equally valid with registered marriage. And that was precisely what it was intended to avoid. N. V. Rabinoviĉ says on this head:

Ekzemplo 2. Rusa–Esperanto–Angla
Rusa originalo (transskribo):

Kodeks 1918 g., tak že kak dekret 1917 g., soveršenno ne kasalsja faktičeskih bračnyh otnošenij. Pridavat' kakoelibo pravovoe značenie otnošenijam, složivšimsja bez registraciji braka. V tot period bylo ne vozmožno. Eto moglo by privodit' k tomu, čto naselenie, vozderživajas' ot registracii braka, prodolžalo by po tradicii venčat'sja v cerkvi. (Ioffe, p. 282)

Esperanta traduko:

La Kodo de 1918, same kiel la Dekreto de 1917, tute ne koncernis la geedziĝajn rilatojn *de facto* (= fakta kunvivado inter viro kaj virino kiel geedzoj). En tiu tempo estis maleble doni kiun ajn juran signifon al rilatoj establitaj sen la registrigo de la geedziĝo. Tio estus povinta kaŭzi, ke la loĝantaro, abstinante registri la geedziĝon, daŭrigus geedziĝi en la eklezio konforme al la tradicio.

Angla traduko el Esperanto:

The Code of 1918, like the Decree of 1917, was not concerned at all with *de facto* marital relations. At that time it was impossible to give any legal significance whatever to relationships established without registration of marriage, which

might have enabled people to continue marrying in church in accordance with tradition, whilst refraining from registering the marriage.

Ekzemplo 3. Franca–Esperanto–Angla.
Franca originalo:
Le caractère propre de notre langue lui assurera toujours la faveur des diplomates, mais nous ne serions pas seuls à regretter qu'elle n'eût plus cette universalité que Louis XIV et Voltaire avaient sû lui donner. Une langue unique au service de la politique internationale était un lien intellectuel entre les nations. Elles ont trop de tendance à s'isoler, et c'est préparer entre elles de futurs malentendus que de les obliger à recourir à des interprètes pour déterminer le sens de leurs conversations. (Frangulis, I, p. 1209).
Esperanta traduko:
La aparta karaktero de nia lingvo certigos al ĝi ĉiam la favoron de la diplomatoj, kaj ni ne estos la solaj, kiuj bedaŭros, ke ĝi ne plu havas tiun universalecon, kiun sciis doni al ĝi Louis XIV kaj Voltaire. Unu sola lingvo en la servo de internacia politiko estis intelekta ligilo inter la nacioj. Ili havas tro tendencon izoliĝi, kaj devigi ilin helpi sin per interpretistoj por difini la sencon de siaj konversacioj, signifas prepari estontajn miskomprenojn inter ili. (Tradukis I.L.)
Angla traduko el Esperanto:
The special character of our language will always ensure for it the favour of the diplomats, and we will not be the only ones to regret that it no longer enjoys the universality which Louis XIV and Voltaire were able to give it. A single language in the service of international politics was an intellectual link between the nations. These have too great a tendency towards isolation, and to force them to make use of interpreters in order to define the sense of their conversations is to sow the seeds of future misunderstandings among them. (Tradukis W. Auld)

Ekzemplo 4. Angla–Esperanto–Angla
Angla originalo:
It is obvious that while a man speaking or writing in his own language is able to say whatever he wishes, on the other hand, when employing a foreign tongue, he can only say what he is enabled to express by the knowledge which he happens to possess of that particular language. (Satow, 1917, p. 67)
Esperanta traduko:
Estas evidente, ke dum homo parolanta aŭ skribanta en sia propra lingvo estas kapabla diri kion ajn li deziras, je la alia flanko, [kiam] uzante fremdan lingvon, li povas nur diri kion li estas kapabligita esprimi per la kono, kiun li hazarde posedas de tiu aparta lingvo. (Tradukis I.L.)
Retraduko en la anglan el Esperanto:
It is obvious that, while a man speaking or writing in his own tongue is able to say whatever he wants to, on the other hand, when using a foreign language

he can only say what he is enabled to express by the knowledge he happens to have of that particular language. (Tradukis W. Auld)

* * *

Atentigo:

La originale skribita mallonga teksto de la Ekz. 1, kaj nur la Esperantaj tradukoj de la tekstoj en la Ekz. 2-4, sen ia ajn indiko pri la aŭtoroj, estis senditaj al S-ro W. Auld perpoŝte al Skotlando. En la ekzemploj 2-4 mi nur informis lin el kiu lingvo estis farita la traduko kaj, en la Ekz. 4, ankaŭ ke temas pri verko publikigita en 1917.

Centro de Esploro kaj Dokumentado, Londono 1962.

Ivo Lapenna

LA LINGVA PROBLEMO EN LA INTERNACIAJ RILATOJ

Apenaŭ necesas memorigi la rakonton pri la Babela Turo, kiu atestas, ke jam en la malproksimaj tempoj de la antikvo oni komprenadis la lingvodiversecon kiel grandan malbonon, aŭ eĉ kiel punon. Efektive, dum la tuta historio de la homaro, ekde kiam du gentoj de malsamaj lingvoj ekkontaktis en kiu ajn senco unu kun la alia, la lingvaj malfacilaĵoj devis sentiĝi kiel obstaklo al reciproka rilatado.

I. Konciza historia trarigardo

Lasante flanke la primitivan formon de interkompreniĝo per gestoj, kiun ankaŭ en nia kultura kaj altecivilizita epoko eĉ plej kleraj homoj devas ofte uzi en fremdaj lingvaj medioj por komuniki siajn plej elementajn bezonojn ekde malsato kaj soifo ĝis dormemo, la problemo estis tra jarcentoj solvata ankaŭ alimaniere, almenaŭ parte. En diversaj historiaj epokoj, kondiĉite de la samtempaj politikaj kaj kulturaj eventoj, jen unu jen alia lingvo estis altrudita kiel komuna kaj uzata ofte dum longa tempo sur vastaj teritorioj kiel instrumento de komunikado super aliaj lingvoj, regionaj dialektoj kaj lokaj parolmanieroj.[1]

Tian rolon, ekzemple, ludis dum jarcentoj kaj ĉiam pli ludas la *ĉina* literatura lingvo, kreita surbaze de la Pekina dialekto kaj hodiaŭ plue intense evoluigata. Sur la teritorio de tiu granda lando paralele ekzistis kaj ankaŭ nuntempe ekzistas multnombraj lingvoj-dialektoj, tre malsamaj inter si, kiuj diferenciĝas de la oficiala lingvo ne nur fonetike, sed ankaŭ leksike kaj parte eĉ el gramatika vidpunkto. La ĉina skribo, konata ekde la 15-a jarcento antaŭ nia erao, kaj transplantita poste en Japanion, Koreion kaj Vjetnamion, estis siatempe potenca peranto kaj transportanto de la ĉina kulturo, kaj rimedo de komunikado super ĉiuj regionaj kaj lokaj lingvaj diferencoj.

Similan rolon havis la *greka "koinê"* lingvo, kiu formiĝis rezulte de kunfandiĝo de la grekaj lingvoj, ĉefe surbaze de la atika miksita kun la ionia. Aleksandro la Granda transplantis tiun novan komunan lingvon en la landojn konkeritajn de lia armeo (334-324). Ĝi fariĝis la oficiala lingvo de nombro da regnoj de la Helenisma epoko, kaj ĝi estis uzata dum pluraj jarcentoj kiel komuna lingvo super multnombraj regionaj kaj lokaj lingvoj de Adriatiko ĝis

[1] A. Meillet kaj M. Cohen prave konstatas, ke ne estas eble trovi konvenan kriterion por distingi lingvon disde dialekto kaj loka parolmaniero.

profunde en Azio, de Norda Afriko ĝis la apudmaraj regionoj de la nuna Nigra Maro. Poste, la *mezepoka greka* lingvo estis dum pliaj jarcentoj la oficiala komuna lingvo de Bizanco.

Ankoraŭ pli elstaran pozicion akiris tiurilate la *latina*. Origine lingvo de Latio (*Latium*), aŭ, pli precize, de la patricioj en la urbo Romo mem, ĝi daŭre ĉerpis novajn riĉaĵojn el la fontoj de la venkitaj lingvoj. El Romo ĝi unue disvastiĝis al la apudaj teritorioj, poste ĝi superregis la aliajn lingvojn de Italio kaj fine la legioj de Romo altrudis ĝin al la plej granda parto de la tiama okcidenta mondo. Sennombraj lingvoj kaj dialektoj estis parolataj sur tiu vastega seninterrompa surfaco de la terglobo sub la suvereneco de la Urbo de la Mondo, sed super ili troviĝis la oficiala latina lingvo, kiu estis samtempe la lingvo de kulturo, de komerco kaj de intergentaj ligoj en la sino de la Imperio.

Kiam en la kvina jarcento la Okcidenta Regno falis sub la venkaj atakoj de la barbaroj, la latina lingvo finis sian vivon de reganta ŝtata lingvo, sed ĝi tamen ne malaperis. En formo de la *mezepoka latina* ĝi daŭrigis sian ekzistadon kiel lingvo de la privilegiitaj tavoloj. Dum pliaj jarcentoj ĝi estis la lingvo de la nobelaro, de la eklezio, de la scienco kaj ĝenerale de la kulturo.

Identan aŭ tre similan funkcion havis en tiu aŭ alia historia epoko ankaŭ aliaj lingvoj: la *araba* en la periodo de florado de la araba kulturo en la mezepoko kaj hodiaŭ, en formo de la literatura araba lingvo, kiel kunligilo kultura kaj politika de la popoloj parolantaj plurajn malsamajn arabajn lingvojn; la *turka*, kiu, sekvante la militajn venkojn de la Porto, penetris siatempe profunde en Eŭropon kaj lasis multajn postsignojn precipe en la lingvoj de la Balkana Duoninsulo; la *hispana, portugala, angla, franca* en la tempo de la koloniaj kaj aliaj konkeroj kun la rezulto, ke ili hodiaŭ estas la komunaj oficialaj lingvoj de nombro de sendependaj ŝtatoj; la *rusa* ne nur sub la caroj, sed ankaŭ en Soveta Unio kiel la komuna lingvo super ĉiuj aliaj naciaj lingvoj kaj dialektoj; la *germana, itala, nederlanda* kaj aliaj literaturaj lingvoj en aliaj regionoj.

En ĉiuj ĉi kazoj ĉiam temis kaj temas pri lingvoj malantaŭ kiuj troviĝas difinita politika forto, plej ofte bazita sur krude milita potenco, sed kutime ligita ankaŭ al ekonomia dinamismo kaj kulturaj valoroj. La fakto, ke lingvoj de plej malsamaj familioj akiradis kaj perdadis dum la historio tian privilegian pozicion, montras klare, ke ilia interna strukturo per si mem havis nenian decidan signifon en tiu procezo. Principe ĉiu ajn lingvo povus ludi tian rolon aŭ esti relative rapide adaptita por ĝin plenumi, kiel, cetere, tion pruvas la nuna kreado de komunaj literaturaj lingvoj en la novaj ŝtatoj de Azio kaj Afriko. Ŝajnas utile atentigi, ke, ĝenerale parolante, la komunaj regnaj lingvoj estis kaj estas uzataj ĉefe interne de la respektivaj ŝtatoj kaj konsiderinde malpli, eĉ kiam temas pri la t.n. grandaj lingvoj, ekster tiuj limoj, unuavice en la sferoj de ilia ekonomia, kultura kaj politika influo. Tio ne signifas malgravigi ilian valoron. Tute male, el vidpunkto pure kultura el tiu de interhomaj rilatoj, la signifo de komunaj lingvoj estis kaj restas elstare granda kaj fruktodona, sed tamen limigita al difinitaj mondopartoj.

Oni povas eĉ diri, ke en la pasinteco, kiam la internaciaj rilatoj en monda skalo plene forestis aŭ kiam, pli poste, ili apenaŭ ekzistis, tiuj lingvoj kontentigis la tiamajn bezonojn de komunikado. Tute alie prezentiĝas la afero en la pli nova epoko post la malapero de la latina. Aparte grava fariĝas la lingva problemo en la historia epoko, kiun ni travivas.

El vidpunkto de interŝtataj rilatoj en Eŭropo specialan signifon havis siatempe la latina. Kiel prave atentigas Satow[1], ĝi estis la sola lingvo kiun oni sciis skribi, almenaŭ en la Centra kaj Okcidenta Eŭropo. La latina estis uzata por internaciaj rilatoj ne nur skribe, sed ankaŭ parole. Nur la reformacio kaj la formiĝo de grandaj naciaj ŝtatoj forpuŝis iom post iom la latinan el la interŝtataj rilatoj. Ĝin anstataŭis unuavice la franca kaj poste ankaŭ aliaj lingvoj. Estas interese, ke jam en la 15-a jarcento Henriko la Sesa de Anglio skribis al Karlo la Sepa de Francio en la franca lingvo, kaj ke tiu ĉi lingvo estis kutime uzata skribe kaj parole en la rilatoj inter la du landoj, sed en la 16-a jarcento, je la insistado de Anglio, oni denove komencis uzi la latinan. Fine de la 16-a jarcento la franca reĝo uzis nur la francan lingvon en siaj eksteraj rilatoj, kun la escepto de la reĝo de Pollando, al kiu li plue skribis latine.

Komence de la 16-a jarcento ĉiuj interkonsentoj verkitaj en la angla, germana aŭ itala lingvo havis efektive hejman karakteron. La germana estis uzata inter la germanaj princoj; la angla en la rilatoj inter Anglio kaj Skotlando; la itala inter la respublikoj de la duoninsulo. Por la internaciaj kontraktoj en la vera senco de la vorto nur du lingvoj estis ĝenerale uzataj: la latina kaj la franca. Ankoraŭ en la 17-a jarcento la latina havis elstaran pozicion, sed la konkurenco de la franca kaj poste de la angla kaj aliaj lingvoj sentiĝis ĉiam pli forte.

Francio pretendis havigi al la franca lingvo ankaŭ jure rekonitan pozicion de oficiala lingvo de la interŝtataj rilatoj, sed renkontis reziston. Tre probable la unua incidento tiurilate okazis en la jaro 1753. En la traktadoj por ordigo de malkonsento koncerne prezon, la francaj komisiitoj resendis al la Britoj ilian memorandon, ĉar ĝi estis skribita en la angla lingvo, kaj postulis, ke la tuta negocado okazu en la franca. Ili asertis, ke la privilegia pozicio de la franca lingvo estas ankaŭ jure establita per longa uzado en la diplomatia praktiko. La Brita Registaro sendis al siaj reprezentantoj en Parizo instrukciojn, en kiuj ĝi deklaris, ke pro ĝentileco ĝi ĉiam aldonis al la anglalingvaj memorandoj francan tradukon, sed ke la francaj komisiitoj trovis erarojn en la vortumo. Tial la anglaj komisiitoj ricevis la ordonon uzi estontece nur la anglan. Ĉar nun Francio postulas la uzon de la franca kiel rajton, la Brita Registaro opinias, ke akcepti tiun uzon en tiaj kondiĉoj signifus efektive krei precedencon kaj rekoni la uzon de la franca kiel rajton. En la dokumento estis dirite:

---

[1]Satow, Ernest, *A Guide to Diplomatic Practice*, unua eldono, 1917, Vol. I, p. 58.

> Ĉiuj nacioj havas la rajton rilati reciproke en neŭtrala lingvo. Kiel tia, la franca estas uzata en la rilatoj kun la princoj de la Imperio kaj kun aliaj Potencoj; se la Kortego de Versailles opinias oportune trakti kun Lia Majesto en la latina, la Reĝo volonte konsentos.... La Reĝo eksplicite ordonas, ke vi ne akceptu en la estonteco iun ajn dokumenton de la francaj komisiitoj en ilia propra lingvo, krom se ili devigas sin ricevi la respondon en la angla.[1]

La francaj komisiitoj tiam provis konservi la pozicion de sia lingvo per deklaro, ke la uzo de la franca ne estos konsiderata kiel precedenco, sed Britio restis firma. Estas menciinde, ke oni perdis preskaŭ la tutan jaron 1753 pro tiu lingva disputo.

En 1800 la Kortego de Sankta James enkondukis la praktikon rilati kun la diplomatoj akredititaj al ĝi, en la angla anstataŭ en la franca, kiu estis pli frue tiucele vaste uzata. Poste tiu praktiko ĉiam pli larĝiĝis kaj la Brita Registaro uzadis ĉiam pli abunde la anglan lingvon en siaj komunikoj al aliaj registaroj. En 1831 la brita reprezentanto en Pruslando ricevis instrukcion uzi nur la anglan. Okaze de alia lingva incidento, en 1851, Lordo Palmerston instrukciis la britan reprezentanton uzi nur la anglan kaj deklaris ke, laŭ la opinio de la Brita Registaro, ĉiu ŝtato rajtas uzi sian propran lingvon en la oficialaj komunikoj, ĉar oni povas pli bone esprimi la precizan sencon en sia lingvo. Li kontraŭstaris la praktikon aldoni tradukojn, ĉar tio kondukis al traktado de la traduko kiel originalo, anstataŭ la angla versio.

Al la firmiĝado de la pozicio de la angla multe helpis la kreskanta forto de Usono. Ju pli ĝi fariĝadis mondpotenco, des pli grava estis ĝia apogo al la angla. Okaze de la kunveno de la Arbitracia Tribunalo en Parizo por prijuĝi la britan-usonan malkonsenton rilate kelkajn demandojn de jurisdikcio en la Maro de Behring, oni decidis, ke la tuta afero estu traktata en la angla. Ribot, la tiama franca Ministro de Eksterlandaj Aferoj, esprimis al usona ŝarĝito de aferoj Wignaud sian surprizon pro tiu plano. La tiama Prezidanto de Usono Harrison, al kiu la usona reprezentanto raportis, energie postulis la uzon de la angla. Li nur konsentis, ke la du membroj de la Arbitracia Tribunalo – Italo kaj Svedo – povu doni sian decidon en siaj respektivaj lingvoj.

La batalo por havigi al sia lingvo kiel eble plej bonan pozicion en la internaciaj rilatoj komencis vastiĝi. Sub Bismarck la slogano estis "*Der deutsche Kaiser darf nur deutsch schreiben*" (La germana Kaiser darfas skribi nur germane). Oni deziris agi laŭ la principo, ke la oficialaj rilatoj kun la diplomatoj akredititaj en Berlino devas esti kondukataj en la lingvo de la lando. Rezulte, la Ministro Bernstorff skribis al ĉiuj diplomatoj en la germana kaj post nelonge ricevis de ĉiuj la respondojn en iliaj respektivaj lingvoj: la rusa, sveda, hispana ktp.... La afero tiam ne sukcesis. La kondiĉoj por tio ankoraŭ ne estis maturaj.

---

[1]Laŭ Satow, op.cit., tria eldono, 1932, p. 54.

Kiel oni vidas, la franca lingvo konservis siajn poziciojn, kun kelkaj sporadaj esceptoj, ĝis la Unua Mondmilito. Post la finiĝo de la milito la angla ĉiam pli forte konkurencis al la franca. En Versailles (1919) oni uzis egale la anglan kaj la francan. La Pakto de la Ligo de Nacioj estis, do, skribita en tiuj du lingvoj. Tamen, oni evitis tiam uzi la vorton "oficiala". Laŭ la Regularo (Règlement) de la 30-a de novembro 1919, la Ligo de Nacioj ne havis "oficialajn" lingvojn, sed ĝi uzis "la du kutimajn lingvojn": la francan kaj la anglan. Cetere, la Regularo antaŭvidis, ke ĉiu ŝtato rajtos uzi sian propran lingvon, sub la kondiĉo, ke ĝi mem prizorgu la tradukon en unu el la du "kutimaj lingvoj".

Per tio estis donita definitiva bato al la privilegia pozicio de la franca kiel plimalpli la sola lingvo de la internaciaj rilatoj. Sed tio ankaŭ malfermis la pordon al la plua lukto por oficialigo de aliaj lingvoj. Ĉiu pli grava ŝtato – kaj ankaŭ la malpli gravaj – komencis uzi sian lingvon en internaciaj rilatoj, kiam ajn prezentiĝis la okazo. Aŭdiĝis ĉiam pli laŭtaj postuloj por oficialigo de pliaj lingvoj, sed same laŭtaj ankaŭ por la egaleco de la lingvoj. La politikaj avantaĝoj, kiujn donas la uzo de la propra lingvo en internaciaj rilatoj, estis ofte kovrataj per pretekstoj de pure lingvaj kvalitoj. Ankoraŭ en 1933 en la mondfama verko Dictionnaire Diplomatique estis dirite:

> La aparta karaktero de nia lingvo certigos al ĝi ĉiam la favoron de la diplomatoj, kaj ni ne estos la solaj, kiuj bedaŭros, ke ĝi ne plu havas tiun universalecon, kiun sciis doni al ĝi Louis XIV kaj Voltaire. Unu sola lingvo en la servo de la internacia politiko estis intelekta ligilo inter la nacioj. Ili tro tendencas izoliĝi, kaj devigi ilin helpi sin per interpretistoj por difini la sencon de siaj konversacioj, signifas prepari estontajn malkonsentojn inter ili.[1]

Aliflanke la Rusoj, kompreneble, glorigas la kvalitojn de sia lingvo:

> Necesas emfazi – skribis la konata soveta internaciisto F. Koževnikov – ke la lingvo de la granda rusa popolo, kiel konate, ne nur ne postrestas en riĉeco al aliaj lingvoj, sed superas multajn el ili, kiel tion prave rimarkigis jam M. V. Lomonosov. Nuntempe la rusa lingvo estas oficiale rekonita kiel lingvo internacia.[2]

Multe pli objektive prezentis la aferon E. Satow en la unua eldono de sia verko el la jaro 1917:

> Estas klare, ke dum persono parolanta aŭ skribanta en sia propra lingvo povas diri kion ajn li deziras, aliflanke, kiam li uzas fremdan lingvon, li povas diri nur tion, kion permesas al li esprimi la hazarde posedata kono de tiu aparta lingvo."[3]

[1]Frangulis, M. A., *Dictionnaire diplomatique*, Paris 1936, Vol. I, p. 1209.
[2]Koževnikov, F. I., *Sovetskoje gosudarstvo i meždunarodnoe pravo*, Moskva 1948, p. 226.
[3]Satow, op.cit., unua eldono, 1917, Vol. I, p. 67.

Mallonge, la ĝenerala situacio inter la du militoj povas esti karakterizita jene: superrego de la angla kaj franca en la interŝtataj rilatoj kaj precipe en la sino de la Ligo de Nacioj; kolektivaj multflankaj internaciaj kontraktoj en la du lingvoj; duflankaj internaciaj kontraktoj en la lingvoj de la kontraktantaj partioj; firmiĝo kaj plua evoluo de la komunaj literaturaj naciaj lingvoj, el kiuj pluraj estas uzataj ankaŭ en internaciaj kadroj precipe en la sferoj de komerco kaj kulturo; akrigo de la lukto por havigo de privilegia pozicio en internaciaj rilatoj ankaŭ al aliaj lingvoj.

2. Nuna situacio

Kiel oni povis atendi, post la Dua Mondmilito aliaj grandaj ŝtatoj postulis la oficialigon de siaj respektivaj lingvoj. Rezulte, diference de la Ligo de Nacioj, kiu havis du oficialajn lingvojn sub la kaŝnomo de "kutimaj", la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj estas verkita en kvin samvalidaj lingvoj: la ĉina, franca, rusa, angla kaj hispana. La art. 111 de la Ĉarto tekstas:

> Tiu ĉi Ĉarto, kies ĉina, franca, rusa, angla kaj hispana tekstoj estas egale aŭtentikaj, estos deponita en la arĥivoj de la Registaro de Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko.

En ĉiuj organoj de Unuiĝintaj Nacioj, kun la escepto de la Internacia Kortumo en Hago, la menciitaj kvin lingvoj estas oficialaj.

En la Pariza Packonferenco de 1946 la oficialaj lingvoj estis la rusa, angla kaj franca. Do, unu plia lingvo estis aldonita kompare kun Versailles en 1919, kaj du pliaj lingvoj kompare kun la Viena Kongreso en 1815.

En aliaj internaciaj organizaĵoj apartenantaj al la familio de Unuiĝintaj Nacioj la nombro de oficialaj lingvoj varias. Ekzemple, la oficialaj lingvoj de la Internacia Kortumo en Hago, kiu estas organo de Unuiĝintaj Nacioj, estas la angla kaj la franca. La partioj povas, laŭ sia bontrovo, uzi unu aŭ alian oficialan lingvon, aŭ ili povas interkonsente uzi nur unu el la du oficialaj lingvoj por la tuta proceduro antaŭ la Kortumo. Konforme al la art. 39/III de la Statuto de la Kortumo, la Kortumo povas rajtigi la uzon de kiu ajn alia lingvo laŭ la postulo de kiu ajn partio, sed en tiu okazo la koncerna partio devas prizorgi la tradukon en unu el la oficialaj lingvoj. Kutime la lingvoj, kiuj estas akceptitaj kiel oficialaj, estas egalaj kaj la tekstoj same aŭtentikaj. Tamen, en la kazo de la juĝoj de la Kortumo, pro la ekstrema delikateco de la afero kaj por eviti miskomprenojn rilate interpretadon, la Kortumo decidas, kiam ajn ĝia juĝo estas donita en la angla kaj en la franca, kiu el la du tekstoj estos konsiderata kiel aŭtentika.

Alia organizaĵo, aparte grava el vidpunkto de internacia kunlaborado en la sferoj de edukado, scienco kaj kulturo, Unesko, havas du oficialajn lingvojn: la francan kaj la anglan. Tamen, laŭ la art. 54 de la Regularo pri Proceduro, la oficialaj lingvoj de la Ĝenerala Konferenco de tiu organizaĵo estas la araba, ĉina, angla, franca, hinda, itala, rusa kaj hispana. Krome, la Ĝenerala Konferenco

povas rekoni ankaŭ kiun ajn alian lingvon kiel oficialan je postulo de kiu ajn Ŝtato-Membro de tiu organizaĵo, sed neniu ŝtato rajtas postuli la oficialigon de pli ol unu lingvo. Siajn publikaĵojn Unesko eldonas en diversaj lingvoj. Ekzemple la revuo *Unesko-Kuriero* estas nuntempe eldonata en la angla, franca, hispana, rusa, germana, araba, itala kaj japana lingvoj.

La organizaĵo de UN por Nutraĵo kaj Agrikulturo (FAO) havas tri oficialajn lingvojn: la anglan, francan kaj hispanan. En la Monda Organizaĵo de Sano la oficialaj lingvoj estas la ĉina, angla, franca, rusa kaj hispana. La samaj kvin lingvoj estas oficialaj en la Internacia Telekomunikada Unio (ITU). En la Internacia Laboro-Organizaĵo (ILO) oni uzas por diversaj publikaĵoj la anglan, francan, hispanan, araban, nederlandan, germanan, hindan, japanan, norvegan, urduan lingvojn.

La oficialaj lingvoj de diversaj organizaĵoj de la Eŭropa Komunaĵo estas la franca, germana, itala kaj nederlanda. Tiuj lingvoj, ekzemple, estas oficialaj en la Eŭropa Komunaĵo de Karbo kaj Ŝtalo, Eŭropa Ekonomia Komunaĵo, Eŭropa Kortumo. Aliaj lingvoj estas oficialaj en aliaj interŝtataj kaj internaciaj privataj organizaĵoj. Surbaze de la informoj, kiujn entenas la Jarlibro de Internaciaj Organizaĵoj en la eldono 1960/61, E. S. Tew faris statistikon pri la nombro de lingvoj uzataj en ĉiuj registaraj kaj neregistaraj internaciaj organizaĵoj. La statistiko, publikigita en *Associations Internationales*[1], montras, ke el 1206 internaciaj registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj nur 381 havas unu solan lingvon kiel oficialan, 346 havas du oficialajn lingvojn, 248 uzas tri oficialajn lingvojn, 147 havas kvar oficialajn lingvojn, 58 utiligas kvin oficialajn lingvojn, 15 oficialigis ses lingvojn kaj 11 organizaĵoj havas sep aŭ pli da oficialaj lingvoj. Inter la organizaĵoj, kiuj havas nur unu oficialan lingvon, menciindaj estas la 24 internaciaj organizaĵoj, en kiuj la sola oficiala lingvo estas la Internacia Lingvo Esperanto.

Alia statistiko, farita same tiel surbaze de la informoj en la menciita Jarlibro, donas bildon pri la lingvoj uzataj kiel oficialaj en diversaj organizaĵoj. En la familio de Unuiĝintaj Nacioj la angla estas oficiala en 18 organizaĵoj, la franca en 15, la hispana en 13, la rusa en 7, aliaj lingvoj en 4. En la organizaĵoj de la Eŭropa Komunaĵo la angla estas oficiala en neniu organizaĵo, dum la franca, germana, itala kaj nederlanda estas oficialaj en 7 organizaĵoj. Entute, nome en ĉiuj registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj, la angla estas oficiala en 943, la franca en 920, la germana en 399, la hispana en 253, la itala en 110, la rusa en 41, la nederlanda en 43, la portugala en 42, aliaj lingvoj en 358 organizaĵoj. Tiuj aliaj lingvoj estas la araba, ĉina, dana, Esperanto, hebrea, japana, latina, hungara, norvega, pola, serba-kroata, slovena k.a.

---

[1]*Associations Internationales–International Associations*, monata revuo, Bruxelles 1960, n-ro 12, pp. 736-737.

Ambaŭ statistikoj, kvankam sendube tre interesaj, tamen ne malkovras la faktan gravecon de unuopaj lingvoj en internacia uzo. Kvankam ekzemple, la rusa estas uzata kiel oficiala nur en 41 organizaĵoj kompare kun la 43 organizaĵoj, kiuj oficialigis ankaŭ la nederlandan, támen sendube la rusa lingvo havas pli da graveco hodiaŭ en la internaciaj rilatoj ol havas la nederlanda. La samo validas ankaŭ por kelkaj aliaj lingvoj, ekzemple por la ĉina, kiu eĉ ne estas aparte menciita, sed klasigita inter "aliaj lingvoj".

La donitaj informoj pli ol evidente montras, ke la nombro de uzataj lingvoj en internaciaj rilatoj, anstataŭ malkreski kiel neinformitaj personoj ofte pensas, multiĝas de jaro al jaro kaj kreas senfinajn komplikaĵojn. Speciale grava montriĝis la problemo en la plej grandaj interŝtataj organizaĵoj. La oficialigo de pluraj lingvoj kaŭzis tiom da malfacilaĵoj ĉiaspecaj, ke ili serioze endanĝerigis la disvolviĝon de la laboroj. Malgrandigi la nombron de oficialaj lingvoj ne estis eble, ĉar ĉiu ĵaluze gardis la akiritajn poziciojn. Do, oni trovis solvon – aŭ almenaŭ oni pensis, ke solvo estis trovita – per la enkonduko de malpli granda nombro da t.n. laboraj lingvoj. Ekzemple, en la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj la angla, franca kaj hispana estis akceptitaj kiel "laboraj lingvoj" de la plenaj kunvenoj, de diversaj komisionoj kaj subkomisionoj. Ĉiu parolado povas esti farita en kiu ajn el la oficialaj lingvoj de UN kaj tiu parolado devas esti tradukita en la tri laborajn lingvojn. Parolado farita en unu el la laboraj lingvoj devas esti tradukita en la du aliajn.

La Ĝenerala Konferenco de Unesko unue enkondukis nur la francan kaj la anglan kiel laborajn. Poste, sub la premo de la hispane parolantaj nacioj, devis esti akceptita ankaŭ la hispana kiel labora. Kiam Soveta Unio aliĝis al Unesko, ĝi, tute nature, postulis, ke ankaŭ la rusa fariĝu labora lingvo. Rezulte, hodiaŭ Unesko formale havas du oficialajn lingvojn, sed ĝia Ĝenerala Konferenco oficialigis 8 lingvojn (kaj povas konsenti tiun pozicion al pliaj lingvoj), dum la laboraj lingvoj estas la angla, franca, rusa kaj hispana. Per tio, tamen, la afero ne finiĝis. Se la Ĝenerala Konferenco okazas en lando, kies nacia lingvo ne estas unu el la laboraj lingvoj de la Konferenco, la Plenuma Komitato faros specialajn aranĝojn por la uzo de la lingvo de la koncerna lando dum tiu Konferenco. Praktike tio signifas, ke en tiu okazo estos 5 laboraj lingvoj.

Ne necesas daŭrigi. La enkonduko de "laboraj lingvoj" ne solvis la problemon. Iusence tiu enkonduko eĉ komplikis ĝin. La lingva batalo per tio ne nur ne ĉesis, sed eĉ vastiĝis. Ĝi restis forta sur la kampo de "oficialaj lingvoj" kaj ĝi nun etendiĝas ankaŭ al tiu de la "laboraj lingvoj".

3. Diversaj aspektoj de la problemo

Tiu tuta lingva problemo en la nuntempaj internaciaj rilatoj estas tre kompleksa kaj ĝi kaŭzas multnombrajn komplikaĵojn. Ĝi havas plurajn aspektojn, el kiuj la plej gravaj estas la teknike-lingva, socia, psikologia, politika kaj ekonomia.

(1) *Teknike-lingva aspekto:* El pure teknike-lingva vidpunkto la problemo havas multajn facetojn, kiuj havas kiel komunan fonon la malfacilecon plene ekregi kiun ajn nacian lingvon. Antaŭ nelonge s-ro A. Woodburn sugestis la kreon de Komuna Eŭropa Lingvo, kies vortaro devus konsisti ĝis maksimumo el la jam internaciiĝintaj vortoj. Efektive, li proponis krei ion, kio esence jam ekzistas en la formo de la Internacia Lingvo Esperanto. La brita parlamentano formulis sian sugeston en formo de leĝpropono, por kiu li pledis antaŭ la Brita Parlamento la 28-an de februaro 1962. En sia parolado li mem akcentis la grandan malfacilecon de la angla. La parolata angla – li diris – konsistas el 40 malsamaj sonoj, sed ekzistas pli ol 2 000 diversaj manieroj literumi ilin. Tio alproksimiĝas al la ĉina skribo, kiu konsistas el 50 000 signoj, sed nuntempe ĉ. 4 000 estas ĝenerale uzataj. Kaj kion diri pri la rusa kun la multnombraj kazoj kaj deklinacioj, aŭ pri la franca kun ĉiuj eblaj finaĵoj por la konjugacio de la verboj, aŭ pri kiu ajn alia nacia lingvo! La fakto, ke ĉie en la mondo oni studas siajn proprajn naciajn lingvojn dum multaj jaroj en la lernejoj montras tute klare ĝis kiu grado ili estas malfacilaj. Tio kaŭzas, ke relative tre malgranda nombro da personoj ekregas kontentige fremdajn naciajn lingvojn.

Kiam pluraj lingvoj estas oficialaj, pro la strukturaj malsamecoj de tiuj lingvoj ofte ekestas la demando kiel esprimi en la traduko precize la ideon de la originalo. Okazas tre ofte mistradukoj kaj miskomprenoj, kvankam la plej gravaj organizaĵoj disponas pri unuarangaj tradukistoj kaj interpretistoj. Ne estas ĉi tie la loko por doni ekzemplojn. Sufiĉos eble mencii, ke eĉ la nomo mem de la plej grava organizaĵo de la hodiaŭo ne estas la sama en la rusa kaj en la angla aŭ franca. En la angla kaj franca aŭtentikaj tekstoj ĝi nomiĝas "Unuiĝintaj Nacioj", en la rusa same aŭtentika teksto ĝi estas "Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj". Se tio okazis en la plej grava nuntempa dokumento de la mondo kaj en kondiĉoj, kiuj ebligis al la tradukistoj pripensi la tradukotan esprimon, oni povas facile imagi la erarojn kiam temas pri rapida tradukado aŭ interpretado de unu lingvo al alia dum internaciaj konferencoj. Se la traduko estas konsekutiva (sinsekva) kaj se la interpretisto ricevas la tekston anticipe, la traduko kutime estas kontentiga. Tio, ekzemple, okazas plej ofte en la procesoj antaŭ la Internacia Kortumo. Male, se la interpretado estas simultana (samtempa), la eraroj pli ol abundas kaj kutime necesas korekti ilin poste en la skribaj dokumentoj. La problemo komplikiĝas, se la delegito ne scias sufiĉe bone la oficialan lingvon, en kiu li devas paroli. La aŭtoro de tiuj ĉi linioj, kiu havis la okazon persone partopreni en la laboroj de pluraj internaciaj konferencoj, povis mem konstati, aŭskultante rekte paroladon en unu lingvo kaj per la aŭskultilo en alia, ke la interpretistoj ofte troviĝas en granda embaraso pro la simpla kaŭzo, ke ne estas eble kompreni la koncernan oratoron, ĉar li ne scias la lingvon uzatan. Eĉ okazis, ke la interpretisto diris en la fino: "Tio ĉi estis la parolado de s-ro delegito de ..., se la interpretisto lin bone komprenis". La fakto, ke ofte okazas teknikaj difektoj en la aparatoj, tiel ke la laboro devas halti ĝis oni sukcesas trovi la difekton kaj

ripari ĝin, kaŭzas aliajn malfacilaĵojn. La groteska bildo de dignaj delegitoj kun la ĝenaj kaj dolorigaj aŭskultiloj sur la kapoj fariĝas preskaŭ tragika, kiam oni vidas iliajn kolerajn vizaĝojn, ĉar en la aŭskultilo premanta la orelojn ne aŭdiĝas la dezirata lingvo, sed iaj bruoj aŭ nenio.

Plia komplikaĵo estas trovi kompetentajn interpretistojn, precipe kiam temas pri fakaj, specialigitaj demandoj. Ju pli teknika estas la enhavo de parolado aŭ skribita teksto, des pli la interpretisto kaj tradukisto devas scii la du lingvojn por povi redoni en la traduko la penson de la aŭtoro precize kaj kompreneble. Ofte necesas apartaj studoj de la fako, se oni volas kontentige plenumi la taskon. Laŭ artikolo, publikigita antaŭ nelonge en nederlanda gazeto[1], la interpretista sekcio de la eŭropaj organizaĵoj en Bruselo ne povas havigi tiom da interpretistoj por la nederlanda, kiom estus necese, kvankam la salajroj estas altaj (de 1 800-2 200 guldenoj monate). Tiun mankon verŝajne kaŭzas la tre altaj postuloj. Laŭ sinjorino Renée Van Hoof, la ĉefino de la interpretista sekcio, bona interpretisto devas ne nur perfekte scii almenaŭ du lingvojn, sed ankaŭ esti fininta universitatajn studojn. La ideala, laŭ ŝi, estas miksaĵo de juro kaj ekonomio kun finstudoj aŭ en la Pariza Sorbonne, aŭ en la Interpretista Altlernejo en Ĝenevo.

La dokumentoj, kiuj devas esti eldonitaj en la oficialaj lingvoj, kaŭzas pliajn malfacilaĵojn, eĉ pure teknikan konfuzon en la distribuo. Por eviti almenaŭ la lastan, oni proponis, ke oni uzu diversajn kolorojn por la unuopaj lingvoj. La propono estas, ke por la angla oni uzu ĉiam la ruĝan koloron, por la franca la bluan, por la hispana la flavan, por la rusa la sablokoloran, por la germana la grizan, por la itala la verdan, por la nederlanda la oranĝan. La ĉina lingvo ne bezonas koloron, ĉar oni rekonas ĝin laŭ la skribo. Laŭ la propono, la blanka estus rezervita por la lingvoj, kiuj ne havas apartan koloron. Ĉiuj dokumentoj en difinita lingvo devus esti eldonitaj en la respektiva koloro kaj tiel ili fariĝus facile rekoneblaj. La samajn kolorojn devus porti kiel signojn la delegitoj kaj la interpretistoj, tiel ke oni tuj sciu la lingvon, kiun ili parolas.[2]

(2) *Socia aspekto:* Ĝi konsistas en tio, ke la nombro de ĉiaspecaj internaciaj kontaktoj, oficialaj kaj neoficialaj, inter registaroj kaj inter privataj organizaĵoj aŭ individuoj, konsiderinde altiĝis. Efektive, en la nuna epoko la internacia rilatado ne estas plu monopolo de pugno da privilegiitoj, sed rajto de la amasoj. Antaŭ la jaro 1860 ekzistis entute unu interŝtata organizaĵo kaj sep neregistaraj. Hodiaŭ la nombro de funkciantaj interŝtataj organizaĵoj estas 154 kaj tiu de neregistaraj 1255, do entute 1409.[3] Paralele altiĝis la nombro de kongresoj kaj aliaj pli gravaj renkontiĝoj de la internaciaj organizaĵoj. Pli ol 500 el ili okazigas ĉiujare siajn kongresojn; preskaŭ 300 kongresas ĉiun duan jaron; iom pli ol 200 ĉiun trian jaron; aliaj renkontiĝas en kongresoj ĉiun kvaran, kvinan aŭ sesan

[1]*Het Vrije Volk*, Rotterdam, de la 19-a de majo 1962.
[2]*Associations Internationales*, 1962, n-ro 2, p. 142.
[3]*Associations Internationales*, 1960, n-ro 12, p. 732.

jaron. Se oni komprenas la internaciajn rilatojn en la plej vasta senco de la vorto, oni devas aldoni al la nombro de personoj, kiuj partoprenas ĉiujn ĉi kongresojn kaj konferencojn, ankaŭ la milionojn, kiuj profesie aŭ kiel turistoj vojaĝas al aliaj landoj aŭ havas internaciajn kontaktojn. Neniam ĝis nun la amasoj en tia grado havis eblecon partopreni en internaciaj rilatoj, kaj neniam ĝis nun ekzistis tiom da lingvaj obstakloj, kiuj baras la vojon al rekta, persona interŝanĝo de pensoj.

Sur la kampo de strikte oficialaj rilatoj la limigita nombro de oficialaj lingvoj kaŭzas plian malfacilaĵon. Nur la landoj, kies lingvoj estas oficialaj, povas reprezentiĝi per la plej talentaj kaj plej kompetentaj personoj. La aliaj landoj devas por tiu celo elekti ne la plej bonajn, sed tiujn, kiuj scipovas, almenaŭ modeste, la koncernajn oficialajn lingvojn. Tio necese malaltigas la intelektan nivelon.

(3) *Psikologia aspekto:* Ne ekzistas persono, kiu ne sentus sin ĝenata paroli aŭ skribi en lingvo fremda. Ju pli klera li estas, des pli lingve konscia li fariĝas. Nur primitivuloj esprimas sin libere, ĉar ili tute ne konscias pri la eraroj, kiujn ili faras parolante en fremda lingvo. Kleruloj bone konscias, ke esprimante sin en alia lingvo ili daŭre riskas ne nur diri ion, kio ne respondas plene al ilia penso, sed eĉ fari fatalajn erarojn, kiuj, eĉ se la alia flanko rimarkas, ke temas nur pri eraro, povas facile ridindigi la ideon kaj tiel komplete detrui ĝin. Ĝuste pro tiu konscio ili kutime havas fortan senton de malplivaloro, ĝi siavice grandigas la timon kaj rezultigas pliajn, plene superfluajn erarojn, kiuj forestus, se la komplekso ne premus la menson. Kiom da fojoj okazas en internaciaj kongresoj, ke tiu aŭ alia delegito volus ion diri, sed pro nesufiĉa scio de la lingvo prefere rezignas kaj silentas! Kiom da fojoj okazas, ke delegitoj, kies hejmaj lingvoj ne estas oficialaj, ŝvitante kaj kun tremanta voĉo rapide tralegas sian antaŭe preparitan tekston kaj post tiu streĉo trankvile sidas kaj ne plu intervenas?! Sufiĉas observi la paroladojn dum kiu ajn internacia kongreso por konstati, ke kutime la paroladoj de la reprezentantoj, kies lingvoj estas oficialaj, estas multe pli longaj kaj argumentitaj ol tiuj de la delegitoj, kies lingvoj ne estas oficialaj. Ankaŭ en la debatoj kutime multe pli ofte kaj efike intervenas tiuj, kies hejmaj lingvoj estas oficialaj, ol aliaj. Tiu fakto ne nur ankoraŭ pli malaltigas la intelektan nivelon, sed ankaŭ pli facile venkigas la ideojn kaj opiniojn de personoj, kiuj plene regas la oficialajn lingvojn.

(4) *Politika aspekto:* La tuta lukto ĉirkaŭ la lingvoj malkovras la politikan gravecon de la afero. Nacio, kies lingvo estas oficiala, akiras konsiderajn avantaĝojn kompare kun la nacioj, kies lingvoj ne estas oficialaj. Ĉiuj grandaj nacioj insistas pri la uzo de siaj respektivaj lingvoj. Kaj kiel montras la tuta evoluo en tiu ĉi sfero ekde la jaro 1753 ĝis hodiaŭ, ĉiam pli granda nombro da lingvoj akiras oficialan rangon. Tiu ĉi procezo ne povas esti haltigita. La suverena egaleco de la ŝtatoj postulas ankaŭ egalecon de lingvoj. Ĝi povas esti atingita aŭ tiel, ke efektive ĉiuj lingvoj ĝuu la saman rajton de oficialaj, aŭ ke oni akceptu por ĉiuj internaciaj rilatoj unu solan neŭtralan lingvon, kiel sugestis la Brita

Registaro jam meze de la 18-a jarcento. En la kazo de la Internacia Kortumo en Hago la uzo de nur du oficialaj lingvoj kontraŭas al la principo de plena egaleco de la partioj, kiu troviĝas en la fundamentoj mem de internacia justico. Evidente, reprezentanto, konsilisto aŭ advokato, kiu pledas al Kortumo en sia propra nacia lingvo, troviĝas en multe pli bona pozicio ol lia kolego, kiu devas pledi en fremda lingvo, eĉ se tiun lingvon li lernis dum multaj jaroj.

(5) *Ekonomia aspekto:* Kiom kostas al la homaro la multlingveco, neniu fakte scias. La buĝetoj de internaciaj organizaĵoj ne estas tiurilate tute klaraj, kaj eĉ se ili estus, la informoj prezentus nur etan frakcion de ĉiuj kostoj. Laŭ unu dokumento de Unesko[1], la nombro de paĝoj tradukitaj en 1954 kaj 1955 estis 79 582. Laŭ alia informo, kiun posedas la Centro de Esploro kaj Dokumentado[2], la meza nombro de paĝoj tradukitaj ĉiujare en Unuiĝintaj Nacioj estas pli ol 270 000. Laŭ la sama informo, la Lingva Sekcio de UN inkluzivas 40 tradukistojn-oficistojn por la angla, 82 por la franca, 68 por la hispana, 49 por la rusa, 63 por la ĉina kaj 10 por la araba. Pro la nombro de la arabe parolantaj delegitoj, kelkaj gravaj dokumentoj – ne pli ol 4 000 paĝoj de la angla teksto jare – estas publikigataj ankaŭ en la araba. La nombro de interpretistoj estas 69 kaj kelkaj el ili laboras en pluraj lingvoj. Ili ne povas esti grupigitaj laŭ la sekcioj, kiel estas la tradukistoj.

Necesas atentigi, ke la nombro de tradukistoj aŭ interpretistoj kreskas en progresio laŭ la formulo $x = n(n-1)$, en kiu "n" estas la nombro de uzataj lingvoj. Tio signifas, ke por du lingvoj estas necesaj 2 interpretistoj, tiel ke ili povu interŝanĝiĝi kaj ĉiu el ili traduki en la lingvon, kiun li pli bone majstras; por 3 lingvoj estas bezonataj 6 interpretistoj, por 4 lingvoj 12 interpretistoj, por 5 lingvoj 20 ktp. Tio, kompreneble, faras, ke ankaŭ la kostoj kreskas en la sama progresio.

Ĉe Unesko la kostoj de interpretado por 2 interpretistoj potage estis 50 dolaroj, por 6 interpretistoj 150 dolaroj ktp. Laŭ la sama dokumento el 1956, la kostoj de interna traduko en 1954 kaj 1955 estis entute por la angla lingvo 196 196 dolaroj, por la franca 344 101 dolaroj, por la hispana 192 443 dolaroj, por la rusa 41 266 kaj por la araba 51 948 dolaroj, entute 825 954 dolaroj.[1] Necesas atentigi, ke la kostoj por la rusa estis tiam malaltaj, ĉar nur limigita nombro da paĝoj estis tradukita en tiun lingvon. Cetere, la dokumento prave atentigas, ke en la kostoj de multlingveco oni devus enkalkuli ankaŭ aliajn elspezojn, kiuj ne rilatas rekte al la traduko aŭ interpretado. Ekzemple, la kostoj de la Sekcio de Distribuo estus proksimume 25% malpli altaj, se la sama nombro da ekzempleroj de dokumentoj kaj periodaĵoj estus distribuita, sed nur en unu lingvo. Laŭ la buĝetpropono de Unesko por la jaroj 1963/64, la kostoj de la Servo de Dokumentoj kaj Publikaĵoj devus altiĝi je 15%, nome de 3 107 422

[1]UNESCO: 44 EX/9 de la 22-a de junio 1956.

[2]*A Study by Dr. James Lieberman on Interpreting in the UN*

dolaroj en 1961/62 al 3 568 209 dolaroj. Kun rezervoj oni povas diri, ke tiuj elspezoj ĝenerale respondas al la elspezoj de tradukado, interpretado kaj kunligitaj kostoj. La uzo de la araba lingvo, kiu estas oficiala, sed ne labora, kostos al Unesko 25 000 dolarojn.

En 1957 la Servo de Lingvoj kaj Kunvenoj de Unuiĝintaj Nacioj elspezis 4 250 300 dolarojn nur por personaj elspezoj. La materiaj kostoj por la publikigo de dokumentoj devas esti aldonitaj al tiuj elspezoj. Tiuj ciferoj ne inkluzivas la Eŭropan Oficejon en Ĝenevo, en kiu 9 interpretistoj, 54 tradukistoj kaj 107 sekretarioj kaj tajpistinoj laboras en la lingvaj servoj. Ankaŭ aliaj oficejoj de UN posedas sekciojn por interpretado kaj tradukado.

Alia dokumento de UN el la jaro 1957 informas pri la kostoj de publikigo de la Jarlibro de la Homaj Rajtoj en la ĉina, rusa kaj hispana. Laŭ tiu dokumento[1] la kostoj de tradukado, revizio kaj tajpado de tiu 500-paĝa libro estus 55 000 dolaroj kaj la kostoj de presigo 21 700 dolaroj, entute 76 700. Pro tiuj grandegaj kostoj oni proponis ne publikigi la Jarlibron en la menciitaj lingvoj.

En 1958 okazis en Londono Konferenco pri la Teknika Tradukado kaj ankaŭ ĝi pritraktis, interalie, la demandon de la kostoj. En la kontribuo de F. Liebesny pri la ekonomia flanko de tradukado estas detale pritraktitaj la kostoj de teknikaj tradukoj.[2] En la konkluda parto li emfazis, ke pluraj miloj da milionoj da vortoj estas tradukataj ĉiujare en la mondo. Lia propra kompanio tradukis en unu jaro proksimume 200 000 vortojn. Se oni multobligas tiun nombron per 50 por la aliaj grandaj komercaj organizaĵoj, oni atingas proksimume 10 milionojn da vortoj nur por la komerco kaj nur en Britio. La kostoj de tiaspeca tradukado treege varias, sed oni povas kalkuli, ke ili estas inter 3 kaj 6 pundoj por 1 000 vortoj.

Tiuj ĉi kelkaj ciferoj donas nur la plej palan bildon pri la ekonomia ŝarĝo kiun kaŭzas la multlingveco. Se oni prenas en konsideron la nombron de internaciaj organizaĵoj, ĉiujn internaciajn kongresojn kaj konferencojn, la kontaktojn en la industrio, komerco kaj turismo, la necesan longigon de ilia daŭro precipe en kazoj de konsekutiva tradukado, la kostojn de lernado kaj ĉiujn aliajn elspezojn ligitajn rekte aŭ nerekte kun la multlingveco, oni ne troigos, se oni taksos la kostojn je centoj da milionoj da dolaroj ĉiujare.

4. Solvo

Malgraŭ tiu armeo da tradukistoj kaj interpretistoj, malgraŭ la plibonigoj en la teknika aparataro kaj malgraŭ la grandegaj sumoj elspezataj ĉiujare por tradukado kaj interpretado, la problemo mem neniel estas solvita. Ĉiuj ĉi rimedoj estas sole paliativoj, nur etfrakcie efikaj kaj provizoraj. Restas la fakto, ke eĉ ŝtatestroj en la gvidaj pozicioj ne povas senpere kontakti. Forestas personaj

[1] UN: E/CN. 4/737/Add. 1 de la 27-a de februaro 1957.
[2] *ASLIB Proceedings*, London, Vol. 10, n-ro 5, majo 1958, p. 115.

rilatoj en internaciaj kongresoj kaj konferencoj. Elstaraj intelektoj kaj grandaj sciencistoj venas en embarase ridindajn situaciojn en fremdaj lingvaj medioj. Miskomprenoj abundas sur ĉiuj niveloj. La milionaj amasoj, kiuj vizitas aliajn landojn, restas plejparte mutaj kaj surdaj pro la lingvaj obstakloj. En plej bona kazo, kiel prave atentigis konata franca filozofo, la konversacio finiĝas precize tie, kie ĝi devus komenciĝi.

Ĉu ekzistas solvo por tiu bedaŭrinda situacio?

Akcepto de unu sola nacia lingvo, aŭ eĉ de du, kiel kelkaj proponas, estas neimagebla. La tuta historio de la du lastaj jarcentoj montras pli ol klare, ke la nacioj ne nur ne estas pretaj cedi la akiritajn poziciojn de siaj lingvoj, sed, eĉ pli, ke aliaj nacioj ĉiam pli postulas la saman pozicion por siaj respektivaj lingvoj.

Same tiel neimagebla estas la intensigo de la studo de fremdaj naciaj lingvoj en la lernejoj. La ĝisnunaj spertoj pruvas, ke eĉ la plej bonaj instrumetodoj donas nur tre modestajn rezultojn. Milionoj da gejunuloj tra la mondo lernas diversajn fremdajn naciajn lingvojn kaj la rezulto kutime estas, ke, post multjara lernado, ili apenaŭ kapablas esprimi la plej elementajn ideojn, se ilia akirita scio ne estas limigita al la diro en la "lernita" lingvo, ke ili ne parolas ĝin. Kaj, cetere, kiujn lingvojn oni devus lerni en la hodiaŭa mondo? Iam oni povis centriĝi al la lernado de la latina aŭ nur de la franca, sed hodiaŭ oni devus lerni tutan aron da aliaj lingvoj. La superŝarĝitaj lernejaj programoj, kiuj prave dediĉas ĉiam pli grandan atenton al la diversaj branĉoj de la scienco, tutsimple ne povas toleri plian ŝarĝon per intensigo de la instruado de fremdaj lingvoj, eĉ se tiu instruado povus doni ĝenerale kontentigajn rezultojn.

La esperoj, kiujn oni flegas rilate elektronajn tradukmaŝinojn, ŝajnas sufiĉe fantaziaj. Sendube, la rezultoj ĝis nun atingitaj montras, ke estas eble utiligi la helpon de tradukmaŝinoj por tradukado de difinitaj tekstoj. Tamen, tiuj tekstoj devas esti taŭge redaktitaj por la maŝina tradukado kaj poste, same tiel, redaktitaj en la lingvo de la traduko. Estas absolute neimageble, ke iam la maŝinoj sukcesos fari tion, kion eĉ lertaj tradukistoj kaj interpretistoj ne povas fari. La maŝinoj povas havi nur tiom da "inteligento", kiom la homa inteligento metis en ilin. Krome, la kostoj de la tradukmaŝinoj estas kaj plue estos tiel grandegaj, ke ili superas la kostojn de centoj da interpretistoj kaj tradukistoj, kiuj sendube faras la tradukan laboron pli bone ol la maŝinoj. Fine, eĉ se ne estus tiel, la apliko de tradukmaŝinoj signifus plian monopoligon de la internaciaj rilatoj, ĉar nur la plej riĉaj sociaj tavoloj kaj la ĉefaj gvidantoj de la ŝtatoj povus utiligi ilin.

Restas, do, kiel la sola racia solvo la enkonduko de neŭtrala internacia lingvo en ĉiujn internaciajn rilatojn, pri kio revis Descartes, Leibnitz, Komensky kaj aliaj pensuloj.

El milo da projektoj, nur la Internacia Lingvo iniciatita de D-ro L. L. Zamenhof en 1887, kaj konata poste laŭ la pseŭdonimo de la aŭtoro ankaŭ sub la nomo "Esperanto", transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta internacia kolektivo.

En 75 jaroj de sia ekzistado ĝi evoluis ĝis tiu grado, ke hodiaŭ ĝi plene taŭgas por ĉiuj internaciaj rilatoj. Ĝia literaturo de kelkmilo da verkoj, riĉa ĝenerala vortprovizo, ĉ. 120 fakaj vortaroj kaj terminaroj, praktikaj aplikoj en ĉiuj sferoj de la internacia vivo, inkluzive kongresojn, konferencojn, seminariojn kaj aliajn internaciajn renkontiĝojn, faras ĝin taŭga instrumento de internacia rilatado el teknike-lingva vidpunkto.

La aŭtoro de tiu ĉi raporto, kiu mem parolas 3 el la 4 laboraj lingvoj de Unesko kaj povas kompreni ankaŭ la hispanan, eksperimentis persone en pluraj okazoj la praktikan aplikeblon de la Internacia Lingvo. Kiam ajn difinita temo de la debato ne interesis lin, li tutsimple por si mem interpretadis la paroladojn faratajn en la angla, franca, rusa aŭ hispana. Tio okazis dum la Pariza Packonferenco en 1946, dum unu Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN, du fojojn dum la sesioj de la Ĝeneralaj Konferencoj de Unesko kaj en aliaj okazoj. Montriĝis, ke absolute neniaj malfacilaĵoj estis renkontitaj en la tradukado de tekstoj aŭ interpretado de paroladoj simultane en Esperanto. La diverseco de la temoj – politikaj, juraj, ekonomiaj, sociaj, edukaj – montris, ke tutcerte ne ekzistas ia ajn malhelpo por uzo de la Internacia Lingvo en tiuj sferoj.

Estas konata la fakto, ke kleraj personoj povas en tre mallonga tempo plene ekregi la Internacian Lingvon kaj esprimi sin en ĝi same facile kiel en sia propra gepatra. Tamen, eĉ personoj sen vasta edukiteco povas ellerni Esperanton konsiderinde pli facile ol kiun ajn fremdan nacian lingvon, aŭ eĉ sian propran nacian *literaturan* lingvon. Eksperimentoj montris, ke personoj, kiuj finis nur elementan lernejon, post unujara lernado de Esperanto kutime skribas en ĝi pli korekte ol en sia propra nacia lingvo. Tiu ĉi fakto faras, ke oni sentas tiun lingvon kiel sian kaj ne havas la kutimajn kompleksojn de malplivaloro, aluditajn supre.

Pro sia struktura internacieco kaj pro la fakto, ke ĝi estas posedaĵo de neniu aparta nacio, la Internacia Lingvo prezentiĝas kiel politike neŭtrala solvo de la lingva problemo.

El ekonomia vidpunkto, la enkonduko de la Internacia Lingvo en ĉiujn internaciajn rilatojn signifus ŝparon de milionaj valoroj, kiuj povus esti utiligataj por helpo al ankoraŭ ne sufiĉe evoluintaj landoj kaj ĝenerale por progresigo de la edukado, scienco kaj kulturo en la mondo.

En la jaro 1952 la Ĝenerala Konferenco de Unesko pritraktis Internacian Peticion favore al Esperanto, kiun subskribis 492 organizaĵoj kun entute 15 454 780 membroj kaj 895 432 individuaj personoj, inter kiuj mondfamaj politikistoj, sciencistoj, verkistoj, artistoj kaj aliaj publikaj agantoj. La Konferenco komisiis la Ĝeneralan Direktoron de tiu Organizaĵo komuniki la Peticion al la Ŝtatoj-Membroj kaj, konforme al iliaj respondoj, prepari Raporton por la Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco. Efektive, post detala diskuto de la Raporto de la Ĝenerala Direktoro (8C/PRG/3), la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis la 10-an de decembro 1954 Rezolucion, en kiu ĝi notis "la rezultojn atingitajn per

Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo"[1]. En la sama Rezolucio Unesko rekonis, ke "tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko", notis ke pluraj Ŝtatoj-Membroj anoncis sian pretecon "enkonduki aŭ vastigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj" kaj instrukciis la Ĝeneralan Direktoron "sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn".

Tiamaniere, la enkonduko de la Internacia Lingvo solvus la lingvan problemon en ĉiuj ĝiaj aspektoj: teknike-lingva, socia, psikologia, politika kaj ekonomia.

* * *

Siatempe la Brita Registaro povis sukcese instrukcii siajn reprezentantojn uzi estontece nur la anglan, ĉar malantaŭ tiu instrukcio troviĝis la tuta potenco de la Brita Regno. Similan postulon povas fari Ĉinio, Soveta Unio, Francio, la hispane parolantaj landoj kaj aliaj ŝtatoj koncerne la proprajn naciajn lingvojn. Malantaŭ la Internacia Lingvo ne staras la forto de kiu ajn aparta ŝtato, sed en ĝi troviĝas la forto de internacieco kaj maksimuma perfekteco el pure lingva vidpunkto, kaj malantaŭ ĝi troviĝas la potenco de la racio, de justeco, de egaleco de ĉiuj lingvoj.

La baldaŭa estonteco montros ĉu la racio venkos super antaŭjuĝoj kaj superstiĉoj kaj ĉu la homaro tiamaniere fine solvos la lingvan problemon en la internaciaj rilatoj.

*El **Elektitaj paroladoj kaj prelegoj**.*
La aŭtoro, Roterdamo 1966, p. 113-130.
La teksto unue aperis kiel dokumento A/II/1(e),
Centro de Esploro kaj Dokumentado, Londono 1962.

[1] UNESCO: *Records of the General Conference. Eighth Session. Montevideo, 1954. Resolutions. Res.IV.1.4.422.*

Gaston Waringhien

SOCIAJ PROBLEMOJ

Lingvo estas esence socia fenomeno, ĉar ĝia tuta valoro kaj unua funkcio estas ebligi la interŝanĝon de emocioj, de deziroj, de ordonoj, de malpermesoj, de argumentoj. Sed tiu socia fenomeno ekzistas nur kiel prezentata en la konscio de la individuoj; kaj oni scias, ke la lingvistoj kutime distingas eĉ tutan kategorion da lingvaj faktoj, kiuj dependas nur de la individuo: "La stilo estas la homo mem" jam delonge skribis nia Buffon.

La individua flanko de la lingvo estis komence la plej esplorita, kaj oni devis atendi la malvolviĝon de la sociologio en la dua parto de la 19a jarcento, por ke oni turnu la atenton al la socia flanko. Kaj, kiel ordinare okazas ĉe la malkovro de novaj vidpunktoj, oni emis troigi tiun socian karakteron. Kelkaj marksistoj iris ĝis la konkludo, ke la lingvo estas unu el la sociaj strukturoj; kaj tiu eraro estis tiel potenca, ke Stalin mem devis improvizi tute novan erudicion, por konvinki siajn adeptojn, ke la lingvo estas nur socia superstrukturo.

Efektive oni povas trovi iajn rilatojn inter unu sociostato kaj unu stadio de lingva evoluo; sed, je pli profunda esploro, oni rapide konstatas, ke tiaj rilatoj estas pure vortaraj, t. e. supraĵaj. Facile demonstrebla estas la fakto, ke la latina estis primitive lingvo de kampuloj; ke multaj abstraktaj vortoj estas nur metaforigo de agrokulturaj apartaĵoj: la *calamitas* t. e. 'katastrofo', estis propre la malsano de la grentigo (*calamus*), la 'lerta' homo, *callidus*, estis tiu, kiu havas kalojn ĉe la fingroj, la 'mono', *pecunia*, konsistis komence 'el brutoj' (*pecus*), kaj la 'kulturo' mem estis nenio alia ol la figura 'plugiteco', la kultiviĝo intelekta. Estus same facile montri en la franca de la 17a jarcento ĉiujn spurojn de feŭdaj moroj, interalie de la falkoĉasado: *niais* 'naivega' kaj *hagard* 'kvazaŭfreneza' difinis la du specojn de falkoj, tiuj, kiujn oni kaptis ĉe la nesto, kaj tiuj, kiujn oni kaptis jam adoltajn ĉe la heĝoj ktp; aŭ de la cervoĉasado: *rompre les chiens* 'disligi la hundojn', kaj, figure, 'ekfini ĝenantan konversacion', *prendre le change* 'eksekvi falsan spuron', kaj, figure, 'lasi sin trompi', *être aux abois* 'esti atingita de la hundoj', kaj, figure, 'esti en ekstrema situacio' ktp. Sed tiuj faktoj neniel influis la lingvistikan strukturon aŭ la literaturan elvolviĝon de la latina aŭ de la franca; ili ne klarigas, kial la unua estas fleksia sinteza lingvo, la dua fleksia analiza lingvo. Je la sama civilizstadio, oni trovas inter amerikaj Indianoj lingvojn jen fleksiajn, jen polisintezajn, jen analizajn ktp. Oni rajtas do konkludi, ke, se lingvo estas grandparte socia fenomeno, ĝi estas nek klarigita nek profunde influata de la sociostato de siaj parolantoj.

Tute male, mi emas opinii, ke la lingvoj mem probable influas la mensojn de la homoj, kiuj ilin parolas, kaj ne inverse. La pli-malpli granda facileco, per kiu

ili kapablas esprimi la abstrakton aŭ la konkreton, ligi la sensaĵojn en unu kompleksan blokon aŭ male artikigi la frazojn en interkroĉitaj propozicioj – tio, kvankam ĝi evidente ne kreas en la spiritoj propran emon al filozofio aŭ poezieco, tamen ebligas al tiuj du emoj malvolviĝi aŭ ne, kaj certe influas la direkton de la literatura fluo. La florado de la religiemo ĉe la hebrea popolo, de la filozofio ĉe la helena, de la juro ĉe la romana ja ne estas ŝuldata al la diferencaj ecoj de tiuj tri lingvoj – sed tiuj ecoj ja kontribuis al tiu florado kaj akcentis la nacian karakteron. La kvazaŭ simbola konstruo de la hebrea, kie la vortoj konsistas el tri signifoplenaj konsonantoj, inter kiuj venas ludi la nuancokreaj vokaloj; la senfina fleksebleco kaj kunmetiveco de la helena; la masiva koncizeco de la latina: tio prezentis la plej favorajn rimedojn por la esprimado de la pasiaj Di-adoroj, de la subtilaj dialektikaĵoj, de la eterne valoraj maksimoj. Estas neeble imagi iun Aristotelon kursanta en la hebrea, kaj, inverse, kiel oni sentas, ĉe legado de la *Septuaginta*, ĉion, kion la psalmaj aŭ profetaj kantoj perdas en tiu flua, klara kaj intelekta lingvo!

Al tiu strikta rilato inter unu lingvo kaj la menso de ĝiaj uzantoj aldoniĝas la tuta forto de la tradicio kaj de la parola aŭ skriba literaturo. Pro tio ke, kiel mi montris, aparta tipo de lingvo favoras apartan tipon de literaturo, la lingvo mem, iom post iom, ŝarĝas sin per amaso da aludoj al ĉefverkoj, al infanaj kanzonoj aŭ al eposaj epizodoj ktp. Alivorte, la lingvo, kiu ebligis la floradon de originala pensado, iom post iom identiĝas al tiu pensado mem. Mi citos ekzemple la kazon de la angla lingvo, en kiu la memoraĵoj de la angla Biblio kaj de la Ŝekspiraj dramoj koloras tiom la lingvon, ke kelkaj verkoj fariĝas simple ne tradukeblaj. Tre bone tion sentis kaj konfesis la granda eseisto Aldous Huxley, en antaŭparolo al la franca traduko de lia romano *Brave New World* (france: *Le meilleur des mondes*), kie li deklaras, ke "kelkaj partoj de tiu ĉi volumo apartenas al la kategorio de la netradukeblaj aferoj", ĉar ili baziĝas sur la kontrasto inter la lingvaĵo de la Ŝekspira poezio kaj la moderna angla prozo.

Mi ĉiam demandis min mire, kio povas resti el la potence elvokiva atmosfero de la kristana komunio por ekstremorientaj popoloj: tiu rito efektive pruntas parton de sia prestiĝo al la jam de jarmiloj atestita kulto de la du sanktaj kreskaĵoj, la tritiko kaj la vito. La pano, kiun rompis Jesuo en la eterne memorata vespero, la vino, kiun li verŝis al siaj disĉiploj, estis ja sanktaĵoj jam antaŭ lia gesto, kaj, post ĝi, fariĝis diaĵoj. Sed kion ili povas signifi, kiajn emociojn ili povas vibrigi ĉe homoj, kiuj konas nek unu nek alian, kiuj tradicie manĝas rizon kaj trinkas rizalkoholon? Tio cetere ne estas nura religia afero: la legantoj eble memoros tiun ĉefverkon de la hispana filmarto *Marcelino Pan y Vino*: la tuta simboleco de la rakonto kuŝas jam en tiu titolo – kaj kio restus el ĝi, kiam Ĉino aŭ Japano estos tradukinta ĝin per *Kaŭaseo Rizo kaj Sakeo*?

Ni estas do alkondukataj al tiu konsidero, ke la lingvo prezentas sin kiel la preferatan esprimilon de la tuta kreda, senta kaj pensa tradicio de unu popolo, konsistigas iel la idean deponejon de ĝiaj spiritaj trezoroj, kaj finfine simboligas

ĝian eston mem. Sed la konscio de unu popolo pri sia originaleco, sia distingiĝado disde la aliaj popoloj, tiu sento alprenis en la modernaj tempoj la formon de la naciismo. Kaj ni sufiĉe spertis, kiel danĝera estas tiu sento, kiel danĝere proksima ĝi estas al la malamo de la aliaj popoloj, por meti al ni la demandon pri la rolo kaj respondeco de la lingvoj en la kreskado de la modernaj naciismoj.

Oni konas, pri tiu punkto, la tute difinitan kaj tranĉe esprimitan opinion de Zamenhof. En sia *Memuaro por la Kongreso de Rasoj* (1911), li ekzemple skribis: "La vera kaŭzo de ĉia intergenta malamo estas nur la malsameco de la lingvoj kaj religioj. Precipe la lingvo havas tian grandegan kaj preskaŭ ekskluzivan rolon en la diferencado de la gentoj, ke en kelkaj lingvoj la vortoj *lingvo* kaj *gento* estas plenaj sinonimoj".[1] Evidente Zamenhof pensis pri la vivkondiĉoj en orienta Eŭropo: sed ĉu lia opinio havas ĝeneralan kaj konstantan valoron?

Estas fakto, ke, en multaj okazoj, la lingvo estis, por la popoloj, kiuj akiris konscion pri sia memstareco kaj volon pri sia politika sendependeco, la potenca ilo, per kiu la gentanoj aŭ nacianoj unue rekonis sin, poste per kiu ili defendis sin kune kontraŭ subpremanta potenco, kaj fine, per kiu ili ilustris sian agnoskitan kolektivan personecon. Tio estis ekzemple la kazo ĉe Polujo, en kiu la kulturado de la pola lingvo, kunigita kun la praktikado de la katolikismo, estis la plej potenca rimedo rezisti la asimilprovojn de Germanujo kaj de Rusujo, kaj, post la unua mondmilito, reglui en unuecan ŝtaton la landpartojn, kiujn jarcenta diseco igis malkoheraj kaj individuemaj.

En kelkaj similaj okazoj, ni ĉeestis eĉ spektaklon neatenditan, kiun la klasikaj lingvistoj estus eĉ rigardintaj neeblaĵo: pluraj popoloj, en Eŭropo, atinginte al la politika sendependeco, forĝis al si novan lingvon sur la bazo de sia arĥaika, kampara dialekto. En Ejro, oni vidis la naciistajn deputitojn reiri al la lernejo, por akiri la tiel nomatan nacian lingvon, kiun ili naive nesciis ĝis tiu tempo. En Finnlando, Estonio ktp oni tiel perfektigis la malnovan dialekton, ke (Helmi Dresen iam tion rakontis al mi) la elmigrintoj, revenante hejmen post dek jaroj, apenaŭ kapablis legi la gazetaron: en la estona, ekzemple, oni kreis, tute arte, sufikson por la pasiva konjugacio, ktp. En Sovetunio, oni ĉeestis la elforĝadon de tute novaj literaturaj lingvoj, kiel la permiaka, la vogula, la ostiaka, la tunguza ktp.

Sed la plej mirinda okazo estas tiu de la mortinta hebrea lingvo, kiun revivigis la cionistoj, por la starigo de la Nacia Juda Hejmo, kaj precipe post la kreo de la ŝtato Izraelio. Ili alprenis de la mezepoka rabena aramea lingvo kelkajn sufiksojn (precipe por esprimi la abstraktaĵojn), ili depruntis de diversaj modernaj

[1]Por bone klarigi la sencon de *gento*, mi citu la komencon de la *Memuaro*: "Kvankam la nomo de Via kongreso estas 'Kongreso de Rasoj', tamen permesu al mi, ke mi parolu ne sole pri *rasoj*, sed ankaŭ pri *gentoj*, ĉar ambaŭ egale signifas etnologian grupon da homoj kaj diferencas nur per sia amplekso... Tre ofte estas malfacile diri, ĉu tiu aŭ alia homa grupo prezentas rason aŭ genton".

lingvoj kelkajn necesajn vortojn – sed precipe ili fruktigis la malnovan Biblian lingvaĵon, uzante ĉiujn eblojn por adapti ĝin al la moderna vivo.

Kaj ni tuŝas ĉi tie fenomenon treege instruan por ni. La kazo de la mortinta hebrea lingvo estas teorie tute analoga al tiu de la mortinta latina lingvo – ambaŭ du gravaj civilizaj lingvoj ankoraŭ uzataj en du grandaj religioj. Sed ĉiuj provoj revivigi la latinan, ĉu de la flanko de la katolikaj medioj, ĉu de la flanko de la sciencistoj kiel Peano, ĉu de la flanko de la politikistoj, kiel Prof. J. Capelle, kiu aranĝis kongreson en Avignon en 1956, ĉiuj malprosperis kaj plu malprosperos – dum la decido revivigi la hebrean estis aplikita kaj sukcesinta. La kaŭzo estas, videble, ke la hebrea fariĝis la parolilo de unu naciismo (des pli drasta, ju pli juna ĝi estas), dum malantaŭ la latina troviĝas nenia profunda impulso komparebla kun la naciisma idealo.

Ĉe la lumo de tiuj historiaj ekzemploj, la lingvo povas do aperi kiel la enkarniĝo de la ekzistovolo, de la vivaserto de nacio – kaj pri tiu punkto Zamenhof ŝajne pravis. Sed la homaj aferoj ne estas simplaj, nek ĉiam logikaj. Apud la ĉi-supre montritaj ekzemploj, aliaj montras, ke la lingv-unueco ne estas nepra kondiĉo de la ekzisto de nacio. En Eŭropo mem, Svislando jam de jarcentoj prezentas la tipon de plurlingva ŝtato, kiu kun la tempo akiris tamen ĉiujn karakterojn de nacio: ekzistas nedubeble nekonfuzebla svisa nacieco – mi eĉ je kelkaj okazoj suspektis, svisa naciismo.

Pli malfrue alveninte al la politika sendependeco, Belgio tamen montras la saman evoluon: malgraŭ sia dulingveco, ĝi elkovis ankaŭ nacian senton, kiu nete apartigas la Flandrojn disde la Nederlandanoj, kiuj ja parolas la saman lingvon, aŭ la Valonojn disde la Francoj, kun kiuj ili havas komunan lingvon. En tiu "privilegia kazo", kiel diras la sciencistoj, oni povas konstati, ke la samlingveco ne nur ne estas nepre necesa al la nacieco, sed eĉ estas, ambaŭflanke, malpli forta ligilo, ol la nacia sento: loĝanto en Lieĝo komprenas loĝanton en Valencieno kaj ne komprenas loĝanton en Meĥlino; tiu ĉi komprenas loĝanton en Roterdamo kaj ne loĝanton en Lieĝo: kaj tamen la Meĥlinano kaj la Lieĝano sentas sin samnacianoj kaj pli proksimaj unu al la alia, ol respektive al Franco aŭ Nederlandano.

Eĉ je la nivelo de la plej primitiva sociostato oni povas konstati analogajn ekzemplojn. La franca antropologo Claude Lévy-Strauss rakontas, en sia libro *Tristaj Tropikoj*, ke, ekspediciinte en 1938 interne de la Mato Grosso, en Norda Brazilo, li renkontis du hordojn da Indianoj: unu konsistis el 18 anoj, la alia el 34; ĉiu estis gvidata de estro; la anoj de la unua nomis sin Sabane, tiuj de la dua Tarunde. Nenio distingis la du hordojn, nek la aspekto, nek la kulturo, krom la lingvo: la sabanea estis absolute diferenca de la tarundea. Kvankam la kampadfajroj restadis apartaj, ambaŭ hordoj vojaĝis kune, kampadante unu apud la alia. Unu persono, en ĉiu hordo, ludis rolon de interpretisto. La viroj de unu hordo nomis ĉiujn virinojn de la alia "fratinoj", kaj la virinoj ĉiujn virojn de la alia hordo "fratoj", ĉiu en sia aparta lingvo. Je la sekvanta generacio, laŭ

la moroj de tiuj triboj, la du hordoj devis do kunfandiĝi per intertribaj geedziĝoj. Kaj tamen, la du estroj ne kapablis interkompreni unu la alian, nek la hordanoj. Kaj tiu stranga alianco estis tiam sufiĉe freŝa. La antropologo atribuis ĝin al la terura malmultiĝado de la Indianoj, kaŭzita de epidemioj alportitaj, en tiun terpecon, ekde 1930, de la blankuloj.

Do antaŭ la danĝero de mortiga izoleco en tiuj praarbaroj, la du hordoj, per lasta puŝo de la vivimpulso, atingis tiun miraklon, ke ili ne nur ne malfidis unu la alian, sed eĉ decidis unuiĝi, malgraŭ la ŝajne radikala neeblo interkompreniĝi. Kaj la saĝo de tiuj mizeraj, malproksimaj, kadukaj sovaĝuloj strange kontrastas kun la sinteno de la tiel diritaj civilizuloj, en tiu sama Suda Ameriko, kie la komuneco de la hispana lingvo neniel malhelpis (nek eble ankoraŭ nun malhelpas) la malkonsentojn kaj fojfoje militon inter la modernaj regnoj Gvatemalo, Nikaragvo ktp. Kio estas inversa demonstro de la sama fakto, ke la interhoma malamo ne fontas ekskluzive el la neeblo interkompreniĝi.

Ni alvenas do al konkludo iom malsama, ol tiu de Zamenhof. Kio kreas la naciecon, tio estas la komuna volo vivi kune – ĉu tio volo baziĝas sur efektivaj malnovaj komunaj memoroj, ĉu ĝi baziĝas simple sur komuna rifuzo dividi la sorton aŭ suferi la regadon de alia popolo. Kie ekzistas tia volo, tie ekzistas nacio, tute sendepende de tio, ĉu ankaŭ ekzistas unu liganta lingvo, aŭ ĉu tiuj samvolanoj uzas diversajn lingvojn. Ĉiufoje, kiam aperas tia volo de kunekzistado, oni ne zorgas pri la lingvaj diferencoj. En la hodiaŭa Francujo kunekzistas homoj parolantaj la flandran, la bretonan, la alzacan, la italan, la katalunan lingvojn, kune kun tiuj, kiuj konas nur la francan: kaj ne ekzistas ia aŭtonomisma movado, nek en Bretonio, nek en Katalunio (francia), nek eĉ en Alzaco, malgraŭ la provoj de la Germanoj krei unu dum la dua mondmilito.

Male, tuj kiam aperas deziro pri aŭtonomeco, ĝi unue evidentiĝas per strebo al lingva diferencigado. Oni ĵaluze esploras la plej arĥaikajn dialektojn de la ĝis tiam komuna lingvo, aŭ la plej antikvajn literaturdokumentojn, por elfosi el ili lingvajn apartaĵojn kaj per tiuj nutri kaj plilarĝigi la lingvan diversecon. En la daŭro de unu jarcento oni povis vidi la tri nord-eŭropajn ŝtatojn, Danujon, Svedlandon kaj Norvegujon, kiuj ĝis tiam ĝuis la oportunecon de unu komuna lingvo, provi ĉiajn rimedojn por akcenti la malkomunecon de siaj dialektoj; kaj kie la prononco aŭ la vortaro ne sufiĉis, oni apelaciis al la ortografio: se por prezenti la sonon de la franca *eu* unuj uzas la signon ö, tuj aliaj decidas ekuzi ø ktp. La ĉefverko de tiu distingomanio estas probable atingita en Jugoslavio, kie Kroatoj kaj Serboj, parolante efektive la saman lingvon (krom kelkdekoj da vortoj malsamaj en la nordo kaj en la sudo de la teritorio), pie konservas por unuj la latinan skribon, por la aliaj la slavan alfabeton, favorante tiamaniere eble la presindustrion, sed certe ne la popolan kulturecon.

Konsiderante tiujn faktojn, ni povas pli ĝuste taksi la rolon de la lingvo en la interpopolaj malkonsentoj: ĝi estas nur unu el la iloj uzataj de la nacia apartismo por ligi inter si siajn anojn kaj kontraŭmeti ilin al la anoj de alia nacio; ĝi estas

unu el la *ŝibolet*-oj,[1] dank' al kiuj oni pli facile rekonas la buĉotajn fremdulojn; ĝi estas speco de flago, kiun oni svingas kontraŭ la najbaraj, kun la orgojla pretendo, ke ĝiaj koloroj estas pli belaj kaj ĝiaj emblemoj pli venkodonaj; unuvorte, ĝi estas, kun la religio, nur la eksteriĝo de tiu kolektiva deziro enfermi sin fanatike en la striktajn limojn de unu gento, de unu sentimentala aŭ politika tradicio, kiun oni povas nun nomi naciismo aŭ rasismo indiferente, ĉar la profunda kaŭzo kaj la historiaj sekvoj estas esence la samaj, t. e. malhumanaj.

Nur en tre maloftaj okazoj kelkaj kleraj spiritoj provis teni la lingvon ekster la naciisma batalkampo. Meze de la milito por la sendependeco de Alĝerio, unu juna araba poeto kaj romanisto, Kateb Yacin, skribis en 1955: "La franca lingvo apartenas al ni kaj ni intencas gardi kaj konservi ĝin tiel ĵaluze, kiel niajn tradiciajn lingvojn.... Estas la franca lingvo, plejofte, per kiu ni proklamas nian anecon al ia alĝeria komunumo.... Estus plorinda afero, se, ŝrumpante sur sin mem, la morgaŭa Alĝerio, rekonkerinte la rajton pri sia propra lingvo, estus kondamnita al la nuraj babilaĵoj de la reinfaniĝintaj ulemoj. Estus plorinda afero, se niaj arablingvaj poetoj daŭrigus prikanti la dezertan leonon, la perlodentan amatinon kaj aliajn similajn gurditaĵojn por malkleruloj. Ni devos batali sur du frontoj: ĝenerala instruado de la araba lingvo kaj de la berberaj dialektoj, por kontentigi la naciajn postulojn, sed ankaŭ konservo de la franca lingvo, por gardi alireblojn al la grandaj fluoj de la moderna literaturo".

Nobla fiera voĉo, al kiu eĥis tiu de la antila poeto Aimé Césaire aŭ de la senegalia poeto Léopold Senghor, kiuj kantas, en francaj versoj, la mizerojn de siaj negraj fratoj kaj la grandon de la negra civilizo, kaj la ambiciojn de la negra spirito. Evidente tiaj esceptaj pozicioj estis ebligitaj de la fakto, ke Francujo ĝis tiam apenaŭ konis rasismon kaj estis la sola blankula regno, en kiu la prezidanto de unu el la parlamentaj ĉambroj havas nigran haŭton. Sed tiaj pozicioj estas tre malfacile teneblaj, ĉar, eĉ se la kleruloj inter la Afrikanoj aŭ la Magrebanoj agnoskas la prestiĝon kaj utilecon de la franca lingvo, ili ne povas tute forgesi, ke tiu lingvo estas tamen tiu de la iamaj konkerintoj, de la ĵustempaj kolonimastroj; la lingvon de Kartezio, de Voltero, de la Homaj Rajtoj ili volonte, eĉ entuziasme alprenus, se ĝi ne estus ankaŭ la lingvo de la kapitalismaj trustoj kaj de la metropola polico.

La solvo de la problemo, por tiuj iam koloniigitaj popoloj same kiel por la eŭropaj iam subigitaj nacioj, estus do la alpreno de ia lingvo, kiu malfermus al ili la pordojn de la moderna, literatura aŭ scienca, civilizo kaj tamen neniel aspektus al ili kiel apartenaĵo de koloniiginta ŝtato. Kaj ĝuste por tia uzado estis elpensita nia Esperanto. Ke Esperanto estas jam de nun taŭga portilo de la plej altaj kulturaj valoroj, nur la nekompetentuloj povas tion diskuti. Ke ĝi estas neŭtrala interkomprenilo, metante ĉiujn siajn uzantojn sur la sama nivelo kaj en

[1]La leganto eble memoras tiun simbolan historion de la Biblio (*Juĝ.* XII, 6), unu el la plej sovaĝaj en sia simpleco.

la samaj kondiĉoj, tio estas evidenta al ĉiu, kiu eĉ unu fojon ĉeestis niajn kongresojn. Esperanto ne malaperigas la diskutojn, nek la kaŭzojn por diskuti, sed ĝi donas al ĉiu la konscion, ke li estas egalrajta kun ĉiuj aliaj, ke, parolante Esperante, li faras tiun saman oferon, kiel ĉiuj aliaj, kiuj ankaŭ oferas la uzon de sia nacia lingvo. La alpreno de Esperanto en internaciaj konferencoj, kaj precipe en la politikaj, radikale forigus tiun "komplekson de malsupereco pri la lingvo", kiun sagace analizis antaŭ ne longe la sudamerika Prof. Martel. Kaj tio estas vera, ne nur el la pure praktika vidpunkto (ĉar neniu delegito havus la avantaĝon paroli sian naskiĝan lingvon kaj tiel facile superi en la argumentado tiujn, kiuj devus deprunti fremdan lingvon kaj suferus la bremsadon de la tradukpenado), sed precipe el la intelekta kaj kultura vidpunkto, ĉar la memrespekto kaj prava fiero de iu ajn ano de unu lingvo ne estas ofendata per la deviga rezigno pri la uzo de sia hejma lingvo kaj la deviga submetiĝo al alia, alivorte per ia deviga fremdiĝo kaj de la parolo kaj de la pensado.

En tiu senco, sed nur en tiu senco, ni povas diri, kiel Zamenhof proklamis neforgeseble en sia parolado antaŭ la Unua Kongreso, ke Esperanto estas ilo de pacigado de la spiritoj, certigante al ĉiuj homoj la lingvan egalrajtecon.

Sed krom tiu (ankoraŭ sisteme ignorata) utileco de Esperanto ĉe la supraj instancoj kaj ĉe la gravaj momentoj de la internacia diplomatio, mi opinias, ke nia lingvo povas ludi ankaŭ pli gravan rolon en la pli ordinaraj kondiĉoj de la ĉiutaga vivo. Kaj ĉi tie mi devas konfesi, ke, eble pro mia profesio, mi ne kredas, ke la lingvodiverseco estas en si mem ia malbono, se nur ĝi estas iamaniere ekvilibrita per alia faktoro. Ŝajnas al mi, ke la varieco estas unu el la kondiĉoj de la belo, kaj eble de la feliĉo; mi ne opinias, ke, por esti nerezisteblaj, ĉiuj virinoj devus, kiel la famaj *The Blue Bell Girls*, esti unuforme 1,73 cm. altaj kaj havi ĝuste la saman mam- kaj pugmezuron. Ke ekzistas multaj lingvoj sur la supraĵo de la tero, ĉiu kun sia propra spirito, siaj apartenaĵoj, siaj idiotismoj kaj siaj parolkoloroj, tio estas spektaklo, kiu ĝojigas mian koron kaj allogas mian scivolon.

Sed la lingvoj havas, en la nuna mondo, du apartajn funkciojn: unuflanke, ili servas al la homoj por esprimi siajn sentojn, aliflanke ili servas por komuniki scierojn. La unua funkcio estas afekcia, la dua intelekta. Nu, laŭ miaj spertoj kaj emoj, nur en la unua funkcio la lingvoj ŝajnas al mi vere individuaj, nepre ne anstataŭigeblaj unu per alia. En niaj hejmaj idiomoj, eĉ en niaj plej humilaj dialektoj ekzistas amaso da sukaj, sonplastikaj vortoj, da bildokreaj dirmanieroj, da kortuŝaj tonoj, kiujn oni ne povus esprimi en iu alia. Kaj ĉio tio estas la preferata kampo de la artistoj, de la poetoj.

La dua funkcio, kontraŭe, konsistas en la transportado de la abstraktaĵoj, juraj, sciencaj, politikaj ktp. Tial kelkaj filologoj nomas la lingvojn, kiuj fariĝis iom post iom aparte dediĉitaj al tiu funkcio, lingvoj "veturilaj": sed, sur tiu kampo, ĉiu povas rapide konstati, ke ĉiuj tiuj veturilaj lingvoj estas perfekte egalaj: parlamenta konstitucio, difino kaj klarigo de nova teoremo, priskribo kaj

uzebleco de nova kuracilo ktp povas esti dirata indiferente per la angla, la franca, la germana, la rusa, la ĉina, nenion perdante el sia valoro kaj utileco. Kompreneble, tiu dua funkcio trudis al tiuj veturilaj lingvoj siajn postulojn: riĉeco de la teknika vortaro, unuformeco kaj monotoneco de la pens-esprimiloj, kiuj antaŭ ĉio celas klaran formuladon kaj ne estetikan originalecon.

Nu, en la daŭro de ĉi tiu jarcento, dum ni ĉeestis la floradon de tiom da novaj naciaj lingvoj, ni konstatas tiun fenomenon, ke ĉiu el ili, kiel ajn malvasta estas ĝia teritorio, kiel ajn senprecedenca estas ĝia uzado por abstraktaj celoj, tamen strebas rivali kun la grandaj veturilaj lingvoj, forĝante al si abundan artefaritan vortaron; kaj, kio pli gravas, tiu vortaro estas sen ia originaleco, ĉar la naciistoj ordinare limigas sin je la kopiado, pere de indiĝenaj radikoj, de la kunmetaĵoj uzataj en la rusa, la germana ktp. Tio konsistigas absolute senvaloran entreprenon, almenaŭ el la lingva vidpunkto: la tiel transdonataj scioj, apartenante egale al ĉiuj nacioj, alportas nenion fortigan kaj ŝatindan al la kulturo de la malgrandaj landoj, sed nur multigas, sen ia ajn profito por la homaro, la sumojn pagatajn por la presado de libroj kopiitaj el la alilingvaj kaj la penojn faratajn de kelkaj sciencistoj aŭ gazetistoj por la lernado de tiuj novaj lingvoj: kiom gravas, ĉu ni kapablas nomi policiston, benzinon aŭ natrian bikarbonaton en dek du lingvoj? Tio alportas ŝarĝon al la memoro, sed nenian veran akiron al la spirito![1]

Ĉe tia politiko, la malgrandaj lingvoj havas ĉion por perdi. Anstataŭ kulturi tion, kio estas al ili vere propra, akcenti sian naskiĝan originalecon, perfektigi kaj diskonigi sian grundan guston, ili penas paliĝi kaj unuformiĝi kaj fariĝi la senverva transpono de la veturila lingvo, kies influon ili ĝuste volas eviti sur la politika kampo. Kaj tiu blinda imitado ŝajnas al mi por ili la plej granda danĝero.

Mia karmemora majstro Grosjean-Maupin fieris malpli pri sia sperteco en esperantologio, ol en kuirarto. Kaj ĉar, en 1923, li disponis, en la Blinduleja Instituto, kiun li estris, sufiĉe grandan parkon, li zorge kolektis la plej famajn kaj bongustajn speciojn de fragoj, kaj enplantis ilin, ĉiun en aparta angulo. La unuan jaron, li, kun nekaŝebla plezuro, surtabligis al mi ses aŭ ok diversajn specimenojn de tiuj frandaĵoj. Sed post tri-kvar jaroj, ho ve! ĉiuj fragoj en la parko fariĝis la samaj – ia ordinara, vulgara specio, sen rimarkinda gusto kaj eminenta valoro:

---

[1]Vidu: A. Meillet, *Les Langues dans l'Europe Nouvelle* (*La Lingvoj en la nova Eŭropo*), 2a eldono, 1928, pĝ 263. La fakto estas cetere jam de longe vidita kaj bedaŭrata: ateste Joakimo Du Bellay, kiu en sia *Défense et Illustration de la Langue Française* (*Defendo kaj Famigado de la Franca Lingvo*), publikigita en 1549, jam rimarkigis: "Ho ve! Kiel pli bone estus, se ekzistus en la mondo nur unu natura lingvo, ol uzi tiom da jaroj por lerni vortojn! Kaj tion ni faras ĝis la aĝo, tre ofte, kiam ni plu havas nek la kapablon, nek la tempon okupiĝi pri pli grandaj aferoj! Certe, pensante multajn fojojn, de kie venas, ke la homoj en ĉi tiu jarcento estas ordinare malpli lertaj en ĉiaj sciencoj kaj malpli valoraj ol la antikvuloj, inter multaj kaŭzoj mi trovas jenan, kiun mi kuraĝus diri la ĉefan, t. e. la studadon de la lingvoj greka kaj latina... Kaj tre ofte, konfuzitaj de la malfacileco kaj malrapideco lernadi vortojn nurajn, ni forlasas ĉion pro malespero, kaj malamas la literaturon, antaŭ ol ni ĝin gustumis aŭ komencis ĝin ami..."

la vento, ĉiujare disportante kaj dismiksante la polenojn, finfine deprenis de ĉiu specio ĝiajn plej ŝatatajn karakterojn.

Mi timas, ke ankaŭ al la lingvoj okazos, en la nuna mondo, la sama malagrablaĵo: per silaboj kaj vortoj malsamaj, ili finfine ĉiuj diros la samajn aferojn en la sama maniero. Kaj kontraŭ tiu timiga unuformiĝado, mi vidas nenian alian rimedon, ol la ĝeneraligon de la uzo de Esperanto. Tiu nia lingvo ja posedas ĉiujn ecojn postulatajn de veturila lingvo – kaj krome, pro ĝia origino, ĝi elvokas ĉe neniu malgranda nacio la naciismajn reagojn, kiujn elvokus unu el la grandaj naciaj veturillingvoj. Estus do, laŭ mia opinio, la bona ŝanco kaj la intereso de tiuj malvaste parolataj lingvoj, se, anstataŭ peni rivali kun siaj grandaj fratoj, ili simple lasus al Esperanto la rolon de perilo en la internaciaj rilatoj, kaj saĝe dediĉus siajn fortojn al la kulturado de sia propra ĝardeno.

La solaj lingvoj, kiuj povus senti sin ofendataj, estas tiuj, kiuj jam plenumas tiun funkcion de intelekta komunikilo; sed ankaŭ al ili la samaj konsideroj valoras. Ĉar la uzado de nacia lingvo sur la internacia kampo ĉiam kuntrenas kun si grandajn oferojn kaj difektiĝojn. Kiam mi vidas la manieron, kiel oni mistraktas la francan lingvon eĉ en la oficialaj dokumentoj de Unesko (mi eĉ ne parolas pri UNO), mi deziras tutkore, ke tia kalvario estu domaĝita al ĝi! La situacio cetere ne estus la sama, se la interrilata lingvo estus Esperanto: ĉiuj parolantoj kaj skribantoj havus la saman zorgon respekti ĝin, ĉar ĝi aperus al neniu kiel fremda lingvo, sed ja kiel komuna posedaĵo; kaj aliflanke ĉiu havus multe pli da facilo por lerni ĝian simplan sintakson kaj ĝian raciigitan vortaron.

Per tia divido de la laboro inter la naciaj lingvoj kaj la internacia, oni povus atingi, kun nemezurebla ŝparo de penoj kaj elspezoj, ian staton de la aferoj, en kiu ekzistus certe ankoraŭ multaj motivoj de konflikto, sed kompense ankaŭ unu efektiva rimedo de intergenta kompreniĝado, ia efektiva kaj efika ilo je la dispono de la veraj pacamantoj.

El Lingvo kaj vivo; Esperantologiaj eseoj. Eldonserio Movado n-ro 1. J. Régulo (Stafeto), La Laguna 1959, p. 333-344.

Claude Piron

PSIKOLOGIAJ REAGOJ AL ESPERANTO

1. Diferencaj reagoj

Al psikologo esploranta la reagojn al la vorto "Esperanto" okulfrapas du faktoj: (1) alta proporcio el la personoj invititaj esprimi sin tiuteme abunde parolas; (2) ili rigardas evidentaj, kaj, multkaze, spontane citas, diversajn punktojn ne konformajn al la kontrolebla realaĵo, ekzemple: "neniu iam ajn verkis romanon rekte en Esperanto", "Esperanto estas lingvo, kiun neniu parolas", "ne ekzistas infanoj, kies gepatra lingvo ĝi estas", ktp. Tiajn konvinkojn bele ilustras letero de leganto Peter Wells, el Singapuro, al *Time magazine*:

> *Esperanto has no cultural history, no indigenous literature and no monolinguals or even first-language speakers.* (Wells, 1987)
> [Esperanto havas nek kulturan historion, nek indiĝenan literaturon, nek unulingvulojn aŭ eĉ parolantojn, kies unua lingvo ĝi estus.]

Krome, multaj demandatoj manifestas ĉiujn signojn de emocia implikiĝo. Kelkaj reagas entuziasme, ekscitiĝe. Sed la plimulto rigardas al Esperanto de alte, kvazaŭ evidente temus pri io infaneca. La koncernato demonstras, ke Esperanto ne estas io serioza, kaj lia tono estas malestima, ironia aŭ humure supereca rilate al la "naivuloj", kiuj okupiĝas pri ĝi.

Se, por disponi komparan, referencan reagon, la esploranto proponas al sia kunparolanto sammaniere esprimi sin pri la bulgara aŭ la indonezia, li ricevas tute alian respondon. Unuminute la demandito klarigas per perfekte neŭtrala tono ĉion, kion li povas pri tiuj eldiri, nome, ĝenerale, ke koncerne ilin li scias nenion.

La kontrasto mirigas. Ĝi riveliĝas eĉ pli rimarkinda, kiam oni testas la sciojn per precizaj demandoj: literaturo, geografia etendiĝo, esprimpovo, ktp. Tuj aperas, ke la informiĝo de la demandito rilate Esperanton estas preskaŭ plene erara, multe pli ol la eretoj da scio, kiujn li povas tiri el si pri la referenclingvoj. Kial li konscias sian nekompetentecon en unu kazo, sed ne en la alia?

Verŝajne lingvoj kiel la bulgara kaj la indonezia perceptiĝas kiel apartenantaj al la kampo de la faktoj, dum Esperanto estas sentata kiel propono. Antaŭ fakto, oni klinas sin. Fronte al sugesto, oni sentas sin devigita respondi jes aŭ ne, kaj tuj poste defendi sian starpunkton. Sed kial Esperanto ne sentiĝas kiel situanta sur la kampo de la faktoj? Kaj kial la reago, tiel ofte, montriĝas tiagrade emocia? La implikiĝo de la afekcia sfero ne limiĝas al individuaj interparoloj, kiel atestas jena citaĵo, tirita el artikolo pri la pedagogio de la latina, artikolo cetere elmontranta plej neŭtralan kaj informan tonon:

Gloire donc au latin, et à bas l'espéranto, mixture aux relents d'artifice et aux espérances déçues! (G.P., 1985).
[Gloron do al la latina, kaj pereu Esperanto, fi-miksaĵo odoraĉa je malnatureco kaj esperoj trompitaj!]

Tiu frazo, senrilata al la cetera teksto, impresas kvazaŭ emocia ŝpruco supreniĝus neatendite el oni-ne-scias-kia profundaĵo. Kial?

2. Defendmekanismoj

Ĉe analizo, la eldiroj pri Esperanto aŭ pri la pli vasta kampo de lingva komunikado internacia, kiaj oni facile ricevas ilin petante sian kunparolanton libere esprimi sin tiuteme, aŭ kiaj ili prezentiĝas en oficialaj kunsidoj dediĉitaj al tiu demando, riveliĝas karakterizitaj per la agado de la t.n. "defendmekanismoj". Oni tiel nomas taktikojn senkonscie organizitajn por evitigi al ni alfronti realaĵon supozeble minacan (Freud, Anna, 1937). Jen kelkaj ekzemploj:

(a) *Neado.* Esperanto estas traktata kiel neekzistanta en kuntekstoj, kie estus logike ĝin konsideri. Ekzemple la libro *Le Langage* de la enciklopedia serio *La Pléiade* (Martinet, 1968), kiu, en 1525 paĝoj, pritraktas slangojn kaj piĝinojn same kiel tradukon kaj afazion, enhavas neniun priskribon, eĉ unuparagrafan, pri tiu miriga fenomeno: lingvo scipovata de nur unu persono antaŭ jarcento, sed hodiaŭ uzata en pli ol cent landoj. Simile, la sperto amasiĝinta pri Esperanto kiel konferenclingvo estas konsiderinda: en 1986 ne troviĝis unu tago, en kiu ne estis ie en la mondo kongreso, renkontiĝo, internacia kunveno, kies laborlingvo Esperanto estis (oni trovos liston en la n-ro de la 20-a de marto 1986 de *Heroldo de Esperanto*). Kiam UN, ekzemple, detale analizas la problemojn renkontatajn ĉe lingva komunikado, estus konsekvence konsideri tiun sperton, eĉ se nur por forĵeti ĝin, post ekzameno, pro eksplicitaj kialoj. Sed tiel ne okazas (King kaj ceteraj, 1977; Allen k.c., 1980; Piron, 1980).

Eĉ lingvisto konsideranta precize la tipon de komunikado ĉiutage efektivigatan de Esperanto aliras la demandon, kvazaŭ neniam tiu sperto estus travivita:

While economists are exercised in creating a Eurodollar, why should we not try for a Eurolanguage too? (Lord, 1974, p. 40).
[Dum ekonomiistoj okupiĝas pri la kreado de eŭrodolaro, kial ni ne provu ellabori ankaŭ eŭrolingvon?]

La unua reago de industriisto fronte al produktad-problemo estas konsideri ĉiujn solvojn aliloke aplikitajn, por eltrovi, antaŭ ol serĉi novan eliron, ĉu ne ekzistus ie sistemo, kiu kontentigus lin. Tiu farmaniero, tiel natura en la ĉiutaga vivo, praktike neniam alpreniĝas koncerne internacian komunikadon. Ni efektive troviĝas ĉi tie antaŭ neado de la realo, en la psikanaliza senco.

(b) *Projekcio.* Oni nomas projekcio la fakton atribui al iu alia psikajn elementojn, kiuj troviĝas en ni, sed kiujn ni ne konscias. Bonan ekzemplon havigas la frazo:

> *Efforts to devise universal languages which could be adopted without prejudice and learned without trouble – languages like Esperanto – represent a noble intent combined with an essential ignorance of what language is and how it works.* (Laird, 1957, p. 236)
> [Strebadoj por elpensi universalajn lingvojn, kiujn eblus alpreni sen antaŭjuĝo kaj lerni senpene – lingvojn, kiel Esperanto – prezentas per si noblan intencon kunigitan al esenca nescio pri tio, kio estas lingvo kaj kiel ĝi funkcias.]

Esperanto kontentigas ĉiujn kriteriojn lingvistike akceptitajn por difini lingvon (Martinet, 1967, p. 20). Ĉu aŭtoro, kiu, nenion kontrolinte, nek bazante sian opinion sur faktaj argumentoj, deiras de la principo, ke tio ne estas vera, ne estas la nescianto, kiun li facile vidas en la aliuloj? [Pri "how it works", vidu la artikolon de la itala lingvisto Alessandro Bausani (1961) "L'esperanto, una lingua che funziona"].

Ofte oni atribuas al Esperanto trajtojn, kiuj faras el ĝi ian monstran mutaciulon. Jen kiel usona lingvo-instruisto priskribas tiun lingvon (mi citas nur la tradukon, ĉar la originalon mi nun ne disponas):

> Lingvo, kiel amo kaj animo, estas io homa kaj vivanta, kiom ajn malfacile estas ĝin difini: ĝi estas la natura produkto de la spirito de tuta raso, ne de homo sola... Artefaritaj lingvoj estas forpuŝaj kaj groteskaj, kiel homoj kun metala kruro aŭ brako, aŭ kun ritmo-regilo enkudrita enkore. D-ro Zamenhof, kiel d-ro Frankenstein, kreis monstron faritan el vivaj pecoj kaj eroj, kaj, kiel Mary Shelley provis diri al ni, nenio bona povas el ĝi rezulti. (Arbaiza, 1975, p. 183).

Aŭ, sen pravigo, oni deklaras Esperanton

> *orienté vers la suppression graduelle des traditions* (Accontini, 1984, p. 5).
> [orientita al la laŭgrada forigo de la tradicioj].

En tiaj juĝoj agas nekonsciaj timoj aŭ fantaziaĵoj, kiuj estas projekciataj sur la lingvon: anstataŭ studi ĝin kiel realaĵon lingvan, literaturan, socian aŭ psikologian, oni rilatas al ĝi kiel al ia sonĝa rolulo animita de malicaj intencoj, sen percepti, kiom delira tia sinteno estas, laŭ la psikiatria signifo de la vorto.

(c) *Raciecigo.* Neraciaj starpunktoj defendiĝas per abundo da konvinkaj argumentoj. Alivorte, samkiel en la klasika paranoja parolmaniero, la intelekta ide-prezentado estas plej rigore logika. Nur la manko de reala bazo perfidas ĝian imagan esencon.

Ekzemple, oni atribuas al Esperanto hindeŭropan, fleksian, analizan karakteron, kiun oni klarigas per la fakto, ke, laŭdire, Zamenhof scipovis nur hindeŭropajn lingvojn. Sed neniu el tiuj asertoj estas kontrolita. Fakte,

– Gravan rangon, en la trajtoj de Esperanto, okupas ĝia multkultura subtavolo, en kiu la aziaj kaj hungaraj kontribuoj rolis ne malmulte (la literatura esperantlingva aktiveco, inter la du mondmilitoj, grandparte disvolviĝis en hungara medio, la t.n. budapeŝta skolo; la hungara ne estas hindeŭropa).
– Zamenhof bone sciis nehindeŭropan lingvon: la hebrean, kaj lia kreaĵo estas per tiu stampita; ekzemple, la signifokampo de la morfemo *ig* havas ekzaktan ekvivalenton, inter la lingvoj, kiujn li scipovis, nur en la hebrea *hif'il* (Piron, 1984, p. 26).
– Esperanto procedas aglutine, ne fleksie. La eldiroj en ĝi povas esti same sintezaj kiel analizaj – oni povas diri same bone *mi biciklos urben* kiel *mi iros al la urbo per biciklo*; teksta esplorado rivelas, ke sintezaj formoj estas tre oftaj – kaj se estas vere, ke, fonetike kaj vorttrezore, ĝi estas hindeŭropa, ĝi tia tute certe ne estas strukture: neniu hindeŭropa lingvo konsistas kiel ĝi el rigore neŝanĝeblaj morfemoj.

(d) *Izolado*. Izolado oni nomas la fakton disigi ion disde ĝia kunteksto kaj juĝi senreference. Kiam aŭtoro diras, pri lingvoj:

> *Il arrive aussi qu'il en naisse, mais jamais du néant: l'espéranto est un échec* (Malherbe, 1983, p. 368).
> [Ankaŭ okazas, ke lingvoj naskiĝas, sed neniam el neniaĵo: Esperanto fiaskis].

Li izolas la internacian lingvon disde ties kunteksto, historia same kiel lingva. Fakte, Esperanto situas en longa serio da provoj kaj pripensoj etendiĝantaj sur pluraj jarcentoj. En la zamenhofa laboro, ĝi havas malrapidan genezon, kiu multrilate similas lingvoevoluon, kiel embria genezo elvokas specian; tiu laŭgrada estiĝo studindas (Waringhien, 1959, p. 19-49). Aliflanke, la morfemoj, kiuj konsistigas ĝin, radikas en aliaj lingvoj; ili ne estas elementoj "tiritaj el neniaĵo".

Esperanto ne pli naskiĝis el neniaĵo ol, ekzemple, la haitia kreola. Lingvo aperas, kiam ĝi respondas al bezono. En la Kariba Insularo, ekzistis ĉe diversetnaj sklavoj kun lingvoj reciproke nekompreneblaj bezono interkomuniki; el tiu bezono naskiĝis bunt-origina lingvo grandparte bazita sur la lingvaĵo de la blankuloj aĉetintaj ilin, sed strukture tute alispeca. Simile, en la jaroj 1880-1910, parto de la mondloĝantaro sopiris al eksteraj kontaktoj kaj soifis je vastiĝo de l' kultura horizonto, sed trovis lingvo-lernadon neebla en siaj vivcirkonstancoj. Tiuj personoj kaptis la projekton de Zamenhof, kaj uzante ĝin, transformis ĝin en lingvon vivplenan. Nek la kreola nek Esperanto naskiĝis el neniaĵo; ilin naskis sama socipsikologia forto: la emo dialogi.

Ni nun konsideru jenan tekston:

> *Allez prendre un oiseau, un cygne de notre lac par exemple, déplumez-le complètement, arrachez-lui les yeux, substituez à son bec plat celui du*

> *vautour ou de l'aigle, greffez sur les moignons de ses pattes les échasses d'une cigogne, mettez dans ses orbites la prunelle du hibou (...); ensuite, inscrivez sur vos bannières, répandez et criez ces mots: "Ceci est l'oiseau* UNIVERSEL*", et vous vous ferez une petite idée de la sensation de glacement qu'a produit sur nous cette terrifiante boucherie, cette vivisection nauséabonde, qu'on n'a cessé de nous prôner sous le nom d'espéranto ou* LANGUE UNIVERSELLE. (Cingria, pp. 1-2).
> [Ekkaptu birdon, cignon nialagan, ekzemple, komplete senplumigu ĝin, forŝiru de ĝi la okulojn, anstataŭ ĝia plata beko metu vulturan aŭ aglan, greftu al ĝiaj piedostumpoj cikoniajn irilojn, ŝovu en la orbitojn la pupilon de otuso (...); nun surskribu sur viaj standardoj, disvastigu kaj kriu frazon jene: "Jen estas la *universala* birdo", kaj vi ricevos etan ideon pri la frostiĝa sento, kiun estigis en ni tiu terura buĉado, tiu vivosekcado plej naŭza, kiun oni ne ĉesis advokati al ni kun la nomo Esperanto aŭ *lingvo universala*.]

Se oni preterlasas la bildan (kaj birdan!) aspekton de tiu citaĵo kaj la vortojn, kiuj evidentigas la amplekson de la emocia reago ("terura buĉado", "vivosekcado plej naŭza"), kritikoj restas du:

(a) Esperanto rezultas el homa interveno en ion vivantan;

(b) ĝi estas heterogena lingvo.

La konkludo de la citita aŭtoro estus racia nur trikondiĉe:

- se lingvo estus viva estaĵo, simile al besto;
- se homa interveno en ion vivantan estus ĉiufoje aĉ-efika;
- se heterogena lingvo ne taŭgus por interkomuniki.

Hipnotigata de sia premsonĝa vidaĵo, la aŭtoro izolas sian bildon de la ĉi-supraj konsideroj. Li ne vidas, ke similigi lingvon al io vivanta, estas nur metaforo, kiun oni ne tro streĉu. La koncerna birdo terure suferus, sed kiam la nederlandan ortografion oni reformis en la 40-aj jaroj, la lingvo ne kriis, nek necesis anestezo.

Due, homo ofte intervenas en vivaĵojn kun plej bonaj rezultoj. Malsato estus multe pli drama en Hindio, se oni ne estus sukcesinta, dank' al tute konscia interveno de homo en naturon, produkti novajn grenspecojn. Kaj nek hundoj, nek rozoj, nek pano ekzistus, se homo ne estus vole aplikinta siajn talentojn al estaĵoj vivantaj.

Trie, se heterogeneco estus kondamna, la angla ne povus utili kontentige. Lingva analizo ja rivelas ĝin pli heterogena ol Esperanto:

> *When we come to a language like English, we find ourselves dealing with several languages rolled into one.* (Lord, 1974, p. 73).
> [Kiam ni alvenas al lingvo kiel la angla, ni troviĝas antaŭ pluraj lingvoj kunrulitaj al unu.]

Esperanto estas pli homogena, ĉar la leĝoj, kiuj regas la asimiladon de la elementoj ĉerpitaj el ekstere, estas pli rigoraj. Kio difinas la heterogenecon de io kunmetita, tio estas, ne la diversa origino de la eroj, sed ia misharmonio plus la manko de asimilanta nukleo (kiel scias ĉiu, kiu provis fari... majonezon).

3. Subkuŝanta angoro

La funkcio de la defendmekanismoj estas protekti la egoon kontraŭ angoro. Ilia apero, tuj kiam Esperanto estas menciata, signifas, ke profunde en la psiko tiu lingvo sentiĝas kiel angoriga.

(a) *Eviti ŝanĝon en la situacio.* Kelkrilate, la psikologia rezisto kontraŭ Esperanto kompareblas kun la kontraŭstaro, kiun renkontis la ideoj de Kristoforo Kolombo kaj de Galileo: stabila, bone ordigita mondo troviĝis renversita pro tiuj novaj teorioj, kiuj perdigis al la homaro ties plurjarmilan, fortikan fundamenton. Simile, Esperanto aperas kiel ĝenanta en mondo, kie al ĉiu popolo respondas lingvo, kaj kie la komunikilo estas transdonita de la prapatroj kiel bloko, kiun neniu unuopulo rajtas atenci. Ĝi demonstras, ke lingvo ne estas necese donaco el la pasintaj jarcentoj, sed povas rezulti el simpla konvencio. Uzante kiel kriterion pri korekteco, ne konformecon al aŭtoritato, sed efikecon en komunikado, ĝi transformas la manieron interrilati: kie estis vertikala akso, jen tien ĝi metas akson horizontalan. Ĝi tiel atakas multajn profundajn aferojn, al kiuj oni ĝenerale ne inklinas ĵeti lumon. Ekzemple, kio fariĝas, ĉe ĝi, el la lingvohierarkio? La gaela [irlanda], la nederlanda, la franca kaj la angla ne situas samnivele en la mensoj, nek en multaj instituciaj tekstoj. Se, por komuniki inter si, malsamlingvuloj alprenos Esperanton, tiu hierarkio perdos sian fundamenton.

(b) *Lingvo kiel sankta valoro kaj identec-simbolo.* Lingvo ne estas nur socia, ekstera fenomeno. Ĝi estas teksita en nia personeco. "Mi suĉis la katalunan kun la lakto patrina", diris persono pridemandita kadre de la esploro, sur kiu ĉi tiu analizo baziĝas.

Niaj konceptoj havas emocian etoson, kiun lingvistiko preteratentas, sed kiu gravegas por la konduto. La senta nukleo de la koncepto "lingvo" situas en la rilatado kun la patrino, pro kio, verŝajne, multaj gepatraj lingvoj nomas "patrina" la familian lingvon. Inter la bebo, kiu povas nur plorĝemi por esprimi sian suferon, ofte ricevante neadaptitajn aŭ senhelpulajn reagojn, kaj etulo trijara, kiu per vortoj klarigas, kio ĵus okazis, grandega ŝanĝo fariĝis, kiun la infano sentas mirakla.

Ni estis tro junaj, kiam ni lernis paroli, por konscii, ke disvolviĝas nur plej banala lernprocezo. Ni vidis en tio kvazaŭ magian donacon, ludilon diecan. Antaŭe, ni ne kapablis klarigi ion ajn, kaj jen, nekompreninte kial, ni retrovas nin havantaj talismanon, kiu plenumas ĉiajn miraklojn kaj riĉigas ĝis senprecedenca grado tion, sen kio vivi ne eblus: interhoman rilatadon.

La bezono senti sin komprenata estas unu el la plej bazaj bezonoj de infano. Nu, sen lingvo, kio restus el ĝi? La sinteno de la gepatroj, kaj post ĝi la longa

influo de lernejo, kiu prezentas lingvon kiel neatencindan normon kaj kiel la ŝlosilon de ĉiuj literaturaj belaĵoj, nur fortigas tiun sentonukleon. En tia kunteksto, aserti, ke lingvo "fabrikita" de kvazaŭ-samtempulo – oni ĝenerale konfuzas Esperanton kun la projekto de Zamenhof – povas funkcii same bone kiel la gepatra lingvo, tio estas insulti ĉi-lastan, tio estas forrabi de ĝi ĝian statuson de magia talismano, kiun ĝi ĉiam konservis en nia psika profundo, eĉ se sur konscia nivelo ni konceptas ĝin pli racie. Tio estas netolerebla sakrilegio. Verŝajne por eviti tian malsanktigon iuj Esperanto-parolantoj, laŭ psikologia movo finfine plej komprenebla, diras, ke la zamenhofa laboro ne estas klarigebla per si mem kaj devas esti atribuita al inspiro de altaj spiritaj sferoj, superhomaj.

Fakte, kiam oni esploras la psikologiajn reagojn, kiujn elvokas la vorto "Esperanto", oni povas nur miri pri la nombro da personoj, kiuj ne elportas la ideon, ke tiu lingvo povas esti, kelkrilate, supera al ilia gepatra lingvo. Tiu reago devenas de emo identigi lingvon al persono: mia lingvo estas mia popolo, mia lingvo estas mi; se mia lingvo estas malsupera, mia popolo estas malsupera, kaj mi estas malsupera. Deklarante Esperanton apriore senvalora, kaj eldirante tiun juĝon kiel ion evidentan, oni saviĝas. Oni uzis artifikon plejplej homan, perfekte kompreneblan, sed ne allaseblan el scienca vidpunkto.

(c) *Diversaj timoj.* Esplori la reagojn al Esperanto per la metodo de klinika interparolo evidentigas ĉiaspecajn subkuŝantajn timojn, kiujn ne eblus pritrakti detale. Mi simple citu sep:

(i) *Timo riski.* Ĉar neniu oficiala instanco, neniu prestiĝa institucio aljuĝas al Esperanto valoron, deklari sin favora al ĝi signifas alpreni starpunkton distancan de tiu, kiu aperas kvazaŭ oficiala. Estas malpli riske ripetadi tion, kion ĉiuj diras kaj kio ŝajnas kongrui kun la sinteno de la altranguloj aŭ de la intelekta elito.

(ii) *Timo pri rekta kontakto.* Estas io sekuriga en la fakto interkompreniĝi pere de tradukado aŭ de lingvo tro malperfekte regata por ebligi interŝanĝi ideojn rekte, detale kaj nuance. Renkonti, ĉe kondiĉoj de perfekta komunika glateco, pensmanierojn radike malsamajn ol la niaj povas esti ŝoka, danĝere konfuziga sperto. Estas prave tion timi, ĉar Esperanto situas niamense sur nivelo pli proksima al tiu de spontana vortigo ol la ceteraj lingvoj. Juna japano, kiu ĉirkaŭvojaĝis la mondon renkontante ĉiuetape lokajn esperantoparolantojn, rakontis, kiom ŝokis lin tiuj rektaj dialogoj kun personoj, kiuj, nur ĉar ili estas si mem, kaj tion esprimas, ŝanĝas la tutan perspektivon de la mondkoncepto (Kiotaro Deguti, 1973).

(iii) *Timo pri infaneca retroiro.* "Simpla" konfuziĝas kun "tro simpla" aŭ kun "infaneca", kio naskas la ideon, ke Esperanto ne povas utili por esprimi vere plenkreskulan pensadon ĉe alta abstrakt-nivelo. Oni tiel izolas la faktoron "simpleco" disde ĝia komplemento – kiu tute modifas la situacion – nome la senlima kombinpovo. Ekzemple, la *a*-finaĵo, kiu markas adjektivon Esperante, estas pli simpla ol la multaj francaj sufiksoj, kiuj samrolas, sed ĝi ofte ebligas ĝuste esprimi sin, ĉar ĝi aliĝas al iu ajn morfemo, dum multaj francaj substantivoj

ne havas sian adjektivon, kiel *insécurité* (angle *insecure*, Esperante *nesekura*), *fait* (angle *factual*, Esperante *fakta*), *Etats-Unis* (hispane *estadosunidense*, Esperante *usona*, kiun Esperanto distingas disde *amerika* kaj *nordamerika*), aŭ *pays* (apud *nacia*, "de la nacio", Esperanto havas *landa*, "de la lando"), kaj tiel plu.

(iv) *Timo pri travidebleco.* Oni imagas, ke Esperanto metos en pensadon netolereblan klarecon:

> *L'élément affectif si important dans le langage trouve difficilement sa place dans cette langue claire où tout est explicite, cette langue "plus précise que la pensée".* (Burney, 1966, p. 94).
> [La afekcia aspekto, tiel grava en lingvo, malfacile trovas lokon en tiu klara lingvo, en kiu ĉio estas eksplicita, tiu lingvo "pli preciza ol pensado".]

Fakte, eblas same malprecizi en Esperanto kiel en iu ajn alia lingvo, eĉ se, ofte, estas pli facile sin pli klare esprimi en la lingvo de Zamenhof.

(v) *Timo pri malplivaloro rilata al facileco.* Pli komplika solvo al problemo sentiĝas kiel pli valora ol facila solvo. Elekti la malfacilan kontentigas ian emon suprenmeti sin, kiu havigas sekurigan kaj komfortigan senton pri la propra graveco.

(vi) *Timo pri heterogeneco.* Tiu estas aparta formo de stato klasike konata per la nomo "diseriĝa angoro". Ĉar homo facile identigas sin al lingvo, Esperanto favoras projekcion sur ĝin de emocioj rilataj al la tuto de onia personeco. Nu, tiu sentiĝas, je nekonscia nivelo, kiel facile rompebla konstruaĵo farita el disaj, sinkontraŭdiraj eroj, ĉiam preta disfali. Kiel simbolo de io ne sufiĉe fortika ĉar kunmetita el tro malsamaj elementoj, Esperanto timigas.

(vii) *Timo pri malalt-niveligo kaj detruo.* Esperanto perceptiĝas kiel ŝosea rulpremilo, kiu pasante premados ĉion morta, platigante ĉiujn kulturajn diferencojn. Oni tiel projekcias sur la zamenhofan lingvon psikajn erojn apartenantajn ĉu al tio, kion Freud nomis mort-instinktoj (Freud, 1920), ĉu al la nekonscia afekcia nukleo, kiun Charles Baudouin nomis "aŭtomato" (Baudouin, 1950, pp. 225-229).

4. Konkludo: la funkcio de psikologia rezisto

La kialo de la emociaj reagoj notitaj komence de ĉi tiu studaĵo nun fariĝas pli klara: la koncernato timas. Lin teruras la ideo, ke oni forŝiros aŭ difektos sanktan trezoron radiantan funde de lia psiko per fea beleco, kiun nenio rajtas superi: la gepatran lingvon, simbolon de lia identeco. Simile al enĉambriĝinta birdeto, kiu, paniktrafita, ne ĉesas koliziadi al la fenestro, ne rimarkante pordon apude malfermitan, li ne havas la necesan serenecon por trankvile rigardi, kio, finfine, estas tiu Esperanto, kiu ŝajnas malsanktigi la koncepton mem pri lingvo. Li estas kaptita en neelirebla cirklo: por ĉesi timi, necesus rigardi alfronte la realon, sed por kuraĝi alfronti ĝin, necesus ne plu timi.

Tia maniero reagi, nelogika, sed tipa pri la homa psikologio, ne ekzistas sen la interveno de politikaj kaj sociaj faktoroj, kiujn la amaskomunikiloj grandigas kaj disvastigas, sed kiujn ĉi tie analizi estus neeble (mi ilin pritraktis aliloke, vd. Piron, 1986, pp. 22-28 kaj 34-36). Ili ja supozigas subkonscian influon kompareblan al tiu de reklamado kaj de politika propagando, bazitan sur nevola misinformado, kiu sin reproduktas mem, aŭtomate, jam unu jarcenton. Aliel ne eblus kompreni, ke infanoj kaj adoleskantoj preskaŭ neniam prezentas la apriore negativan reagon facile troveblan ĉe plenkreskuloj, dum ĉiuj psikologiaj elementoj funkciigantaj la defendmekanismojn ĉe ĉi-lastaj enestas ankaŭ en ili.

Manipulate de siaj nekonsciaj timoj, la dudekajarcentulo ne vidas, ke, antaŭ ol juĝi Esperanton, necesus studi aron da faktoj. Oni povas bedaŭri tion. Sed, laŭ historia perspektivo, montriĝas, ke tiuj reagoj havis pozitivan efikon. Tuja ĝenerala akceptado de la lingva embrio kunmetita de Zamenhof submetus ĝin je disstreĉiĝoj, el kiuj ĝi ne eliĝus vivanta. Tiustadie, ĝi estis tro delikata, tro nekompleta. Ĝi bezonis sufiĉe longan vivperiodon en limigita, sed multkultura medio, por ke la necesaj alĝustiĝoj efektiviĝu, ke la signifokampoj difiniĝu, ke korektiĝu la mankoj plej nature, per uzado.

Aliflanke, lingvaj rilatoj ĉiam estis rilatoj de potenculo al malfortulo. La ideo anstataŭigi ilin per egalecaj rilatoj, havigantaj al la plej malgrava lingveto la saman statuson kiel al la lingvo de ekonomiaj kaj kulturaj gigantoj, estis tro ŝoka, por ke la homaro povu senvunde adapti sin rapide al ĝi. Transformoj en la ĝenerala pensmaniero postulas malrapidan asimiladon.

El jarcento da defioj, da politikaj kaj intelektaj atakoj, Esperanto elmergiĝas rimarkinde forta, fleksebla, fajnigita. Ĝin karakterizas forte stampita personeco, same vigla kiel la franca en la tempo de Rabelais. Tiun fakton la plimulto el la homoj ankoraŭ neas, sed ĉiam *apriore*. Se aŭtoro baziĝas sur la studo de dokumentoj aŭ la observado de Esperanto praktike uzata, li agnoskas ties grandan viglecon. Se la socia kaj psikologia rezisto kontraŭ Esperanto longtempe ege fortis, ĝi aperas nun pli kaj pli spirmanka. Ĉu ne simple, ĉar ĝi ĉesis plenumi sian funkcion?

REFERENCOJ

Accontini, Domenico (1984), "Les interventions", en Contri, Manlio, "Eliminer la Tour de Babel", *Bulletin européen*, 1984, 7.

Allen, Mark E.; Sibahi, Zakaria; kaj Sohm, Earl D. (1980), *Evaluation of the Translation Process in the United Nations System* (Ĝenevo: Joint Inspection Unit, Palaco de Nacioj: dokumento JIU/REP/80/7).

Arbaiza, M. D. (1975), *Foreign Language Annals, 1975, 8.*

Baudouin, Charles (1950), *De l'instinct à l'esprit* (Parizo: Desclée de Brouwer).

Bausani, Alessandro (1981), "L'esperanto, una lingua che funziona", *Affari sociali internazionali*, 1981, 1, represita en *L'esperanto* (Pizo: Edistudio, 1982), pp. 32-36.

Burney, Pierre (1966), *Les langues internationales* (2-a eld., Parizo: Presses universitaires de France).

Cingria, C.-A., *A propos de la langue espéranto dite langue universelle* (Ĝenevo: Voile latine), ne-datita broŝuro, klasita ĉe n-ro ESP-366 en la Centro por dokumentado kaj studado pri la lingvo internacia, Urba Biblioteko, La Chaux-de-Fonds, Svislando).

Freud, Anna (1937), *The Ego and the Mechanisms of Defense* (Londono: Hogarth).

Freud, Sigmund (1920), *Jenseits des Lustprinzips* (volumo n-ro 18 de la Kompleta Verkaro, Londono: Hogarth).

G. P. (1985), "Cicéron est mort, vive Donaldus Anas", *Vingt-Quatre Heures*, 25-a de marto 1985.

King, C. E.; Bryntsev, A. S.; kaj Sohm, E. D. (1977), *The implications of additional languages in the United Nations System* (Novjorko: UN, dokumento A/32/237).

Kiotaro Deguti (1973), *My travels in Esperanto-land* (Kameoka: Oomoto).

Laird, Charlton (1957), *The Miracle of Language* (Novjorko: Fawcett).

Lord, Robert (1974), *Comparative Linguistics* (Londono: English Universities Press).

Malherbe, Michel (1983), *Les langages de l'humanité* (Parizo: Seghers).

Martinet, André (1967), *Eléments de linguistique générale* (Parizo: Armand Colin).

Martinet, André, red. (1968), *Le Langage* (Parizo: Gallimard).

Piron, Claude (1980), "Problèmes de communication linguistique aux Nations Unies et dans les institutions apparentées", *Language Problems and Language Planning*, 1980, 4, 3 (fall), pp. 224-237.

Piron, Claude (1984), "Contribution à l'étude des apports du yiddish à l'espéranto", *Jewish Language Review*, 1984, 4, pp. 15-29.

Piron, Claude (1986), "Espéranto: l'image et la réalité", *Cours et études de linguistique contrastive et appliquée*, n-ro 66 (Parizo: Université de Paris VIII-Vincennes).

Waringhien, Gaston (1959), *Lingvo kaj vivo* (La Laguna: Régulo-Pérez).

Wells, Peter (1987), en "Letters – Aspiring to Esperanto", *Time*, 24-a de aŭgusto 1987, p. 3.

Esperanto-dokumentoj 26E (1988)

L. L. Zamenhof

ESENCO KAJ ESTONTECO DE LA IDEO DE LINGVO INTERNACIA

Raporto verkita de "S-ro Unuel" kaj legita (en formo iom ŝanĝita kaj mallongigita) de s-ro L. de Beaufront en la kongreso de *l'Association Française pour l'Avancement des Sciences* (Parizo, 1900).

1

Ĉiuj ideoj, kiuj estas ludontaj gravan rolon en la historio de la homaro, havas ĉiam tiun saman egalan sorton: kiam ili ekaperas, la samtempuloj renkontas ilin ne sole kun rimarkinde obstina malkonfido, sed eĉ kun ia neklarigebla malamikeco; la pioniroj de tiuj ĉi ideoj devas multe batali kaj multe suferi; oni rigardas ilin kiel homojn frenezajn, infane malsaĝajn, aŭ fine eĉ rekte kiel homojn tre malutilajn. Dum la homoj, kiuj okupas sin je ĉia plej sencela kaj senutila sensencaĵo, se ĝi nur estas en modo kaj konforma al la rutinaj ideoj de la amaso, ĝuas ne sole ĉiujn bonojn de la vivo, sed ankaŭ la honoran nomon de "instruituloj" aŭ "utilaj publikaj agantoj", la pioniroj de novaj ideoj renkontas nenion krom mokoj kaj atakoj; la unua renkontita tre malmulte lerninta bubo rigardas ilin de alte kaj diras al ili, ke ili okupas sin je malsaĝaĵoj; la unua renkontita gazeta felietonisto skribas pri ili "spritajn" artikolojn kaj notojn, ne preninte sur sin la laboron almenaŭ iom ekscii, super kio ili propre laboras; kaj la publiko, kiu ĉiam iras kiel anaro da ŝafoj post la kriemuloj, ridas kaj ridegas kaj eĉ por unu minuto ne faras al si la demandon, ĉu ekzistas eĉ guto da senco kaj logiko en ĉiuj tiuj ĉi "spritaj" mokoj. Pri tiuj ĉi ideoj "estas modo" paroli ne alie, ol kun ironia kaj malestima rideto, tial tiel agas ankaŭ A kaj B kaj C, kaj ĉiu el ili timas enpensiĝi serioze eĉ unu minuton pri la mokata ideo, ĉar li "scias antaŭe", ke "ĝi krom malsaĝaĵo enhavas ja nenion", kaj li timas, ke oni iel alkalkulos lin mem al la nombro de "tiuj malsaĝuloj" se li eĉ en la daŭro de unu minuto provos rilati serioze al tiu ĉi malsaĝaĵo. La homoj miras, "kiamaniere en nia praktika tempo povas aperi tiaj malsaĝaj fantaziuloj kaj kial oni ne metas ilin en la domojn por frenezuloj".

Sed pasas kelka tempo. Post longa vico da batalado kaj suferoj la "bubojfantaziuloj" atingis la celon. La homaro fariĝis pli riĉa per unu nova grava akiro kaj eltiras el ĝi la plej vastan kaj diversforman utilon. Tiam la cirkonstancoj ŝanĝiĝas. La jam fortiĝinta nova afero ŝajnas al la homoj tiel simpla, tiel "komprenebla per si mem", ke la homoj ne komprenas, kiamaniere oni povis tutajn miljarojn vivi sen ĝi. Kiam la posteuloj legas la rakontojn pri tio, kiel sin

tenis kontraŭ la dirita ideo la samtempuloj de ĝia naskiĝo, ili absolute ne volas kredi kaj pensas, ke ĉion tion ĉi elpensis la historioskribantoj pro mokado je la foririntaj generacioj. "Ĉu efektive", ili diras, "la tuta mondo tiam konsistis el idiotoj? Ĉu efektive ekzistis homoj, kiuj elpaŝadis kontraŭ la pioniroj kun tiaj sensencaj kontraŭparoloj, kaj la ceteraj homoj silentadis, kaj la unua renkontita kvinjara infano ne diradis al tiuj kritikantoj: 'Sinjoroj, vi ja parolas teruran, sur nenio fonditan sensencaĵon, kies rebato sin trovas ja tuj antaŭ via nazo!'? Absolute nekompreneble! La historiistoj certe trograndigas!"

Legu la historion de naskiĝo de la kristaneco kaj de diversaj grandaj ideoj en la regiono de moralo, filozofio kaj scienco; legu la historion de la eltrovo de Ameriko, de la enkonduko de fervojoj k. t. p., k. t. p. Ĉie tute tio sama. *Es ist eine alte Geschichte, doch bleibt sie immer neu.* La lumo aperas kiel necesa bezonataĵo al tiu, kiu staras malproksime, sed al la proksime starantaj ĝi tranĉas la okulojn kaj ili penas estingi ĝin. La ideo de Kolumbo, ke "devas ekzisti okcidenta vojo Hindujon", ŝajnas al ni nun tiel simpla, tiel natura, kaj ni simple ne volas kredi, ke povis iam ekzisti homoj, kiuj, sciante jam, ke la tero estas globo, povis dubi, ke al ĉia lando oni povas veni ne sole de oriento, sed ankaŭ de okcidento, kaj ke en tiu ĉi ne esplorita okcidento povas eble troviĝi ne konataj al ni interesaj landoj. Kiam ni legas tiujn kontraŭparolojn, kiujn oni tiam faradis al Kolumbo, ekzemple, ke neniu okcidenten de Eŭropo veturis, sekve ĝi estas ne ebla, ke Dio malpermesis tion ĉi fari, ke la ŝipoj malleviĝados malsupren kaj ne povos returne leviĝadi supren... k. t. p., – ni kontraŭvole demandas nin, kiamaniere homoj maturaĝaj povis paroli tiajn sensencaĵojn, pro kiuj en nia tempo ruĝiĝus ĉia infano. Kaj tamen en tiu tempo ĝuste tiuj ĉi naivaj kontraŭparoloj estis rigardataj kiel veroj, ne ebligantaj ian dubon, kiel plej logika opinio de la tuta prudenta mondo, kaj la ideoj de Kolumbo estis kalkulataj kiel infanaĵo, kiu estas inda nenian atenton. Kiam oni montris al la homoj la forton de la vaporo kaj ĝian uzeblecon, ŝajnis, ke kia prudenta homo povus ion kontraŭparoli kontraŭ ĝi? Kaj tamen kiom da multjara batalado, suferoj kaj mokoj la elpensinto devis elporti! kaj eĉ tiam, kiam fine prosperis jam atingi la celon, kiam en Anglujo jam dum tutaj tri jaroj la lokomotivoj kursadis kaj alportadis grandegan utilon, sur la kontinento de Eŭropo instruitaj homoj kaj eĉ tutaj instruitaj korporacioj, anstataŭ simple ekrigardi kaj konvinkiĝi, skribadis ankoraŭ profundapensajn traktatojn pri tio, ke konstruado de lokomotivoj estas infana entrepreno, ke ĝi estas ne ebla, ke ĝi estas malutila k. t. p. Kio tio ĉi estas? ni demandas nin; ĉu tio ĉi estis ia ĉiuhoma epidemia idioteco? ĉu efektive ekzistis tiaj generacioj? Jes, ekzistis tiaj generacioj, kaj ni, kiuj nun miregas, ni en efektiveco estas ne pli bonaj ol ili, kaj niaj nepoj estos ne pli bonaj ol ni. Ĉiuj tiuj ĉi homoj kun iliaj indignige sensencaj kontraŭparoloj kaj atakoj estis tamen ne idiotoj, kvankam ili nun eble ŝajnas al ni tiaj. Ilia tuta kulpo konsistis nur en tio, ke, dank' al la natura spirita inercio de ĉiu el ni, ili aŭ tute ne volis prijuĝi la naskiĝantajn novajn aperojn, plivolante limigi sin per sanosubtenanta ridado, aŭ

alpaŝadis al la prijuĝado kun antaŭe jam preta konvinko, ke la afero proponata al ili estas neplenumebla, kaj ĉiujn siajn argumentojn ili penadis konformigadi al tiu antaŭe farita decido, ne rimarkante la tutan senfundamentecon de tiuj ĉi argumentoj, kaj kontraŭ la argumentoj de la defendantoj de la nova ideo ili fermadis sian cerbon per la plej fortikaj seruroj, kaj tial tiuj ĉi lastaj argumentoj, kiuj penadis pruvi la eblecon de tio, "pri kio ĉiuj ja scias, ke ĝi estas neebla", devis ŝajni al tiuj inerciaj homoj tiel same infanaj, kiel al ni nun ŝajnas iliaj tiamaj kontraŭparoloj.

Al tiaj ideoj, kiuj al la samtempuloj ŝajnas senenhava fantazio kaj al la posteuloj ŝajnas tia natura afero, ke ili ne komprenas, kiamaniere la homoj miljarojn vivis sen ĝi, – al tiaj ideoj apartenas ankaŭ la ideo de enkonduko de komuna lingvo por la komunikiĝoj inter diversaj popoloj. Kiam niaj posteuloj legos en la historio, ke la homoj, tiuj ĉi reĝoj de la tero, tiuj ĉi plej altaj reprezentantoj de la monda inteligenteco, tiuj ĉi duon-dioj, en la daŭro de tutaj miljaroj vivis unuj apud la aliaj, ne komprenante unuj la aliajn, ili simple ne volos kredi. "Por tio ĉi oni ja bezonis nenian supernaturan forton," ili diros; "ĉiu el tiuj ĉi homoj posedis ja kolekton da kondiĉaj sonoj, per kiuj li tute precize kompreniĝadis kun siaj plej proksimaj najbaroj, – kiel do ne venis al ili en la kapon konsentiĝi inter si, ke unu el tiaj kolektoj da kondiĉaj sonoj estu enkondukita por la reciproka kompreniĝado inter *ĉiuj*, simile al tio, kiel por la plimulto de la kulturaj popoloj estis enkondukita jam longe unu kondiĉa kolekto da mezuroj, unu kondiĉa alfabeto, unuj kondiĉaj muzikaj signoj k. t. p.!" Niaj posteuloj indignos, kiam ili ekscios, ke la homojn, kiuj penadis pri la enkonduko de komuna lingvo, la samtempuloj montradis per la fingroj, kiel maniulojn, bubojn, ne meritantajn la nomon de seriozaj homoj; ke pri tiuj ĉi homoj ĉiu malplenkapulo povis spritadi en la gazetoj, kiom li volis, kaj troviĝis neniu, kiu dirus al tiuj malplenkapuloj: "Vi povas trovi tiujn ĉi ideojn plenumeblaj aŭ ne plenumeblaj, – sed moki ilin, eĉ ne konatiĝinte kun ili, estas honte, sinjoroj!" Kore ridegos niaj posteuloj, kiam ili aŭdos tiujn naivajn kontraŭparolojn, kiujn multaj el niaj samtempuloj faradis kontraŭ la ideo de lingvo internacia entute kaj de lingvo arta speciale. Simile al tio, kiel ni kun rideto de kompato rilatas al tiu el niaj pra-praavoj, kiu antaŭ kelke da miljaroj eble protestis kontraŭ la enkonduko de arta alfabeto, kriante kun la aplombo de instruitulo, sed tute senpruve, ke rimedo por la esprimado de niaj pensoj estas objekto organa, natura, kreita de la historio (skribado per hieroglifaj desegnaĵoj) kaj ne povanta "esti kreita en kabineto", – tiel niaj posteuloj mokados tiujn samtempulojn, kiuj nur pro tiu nenion diranta cirkonstanco, ke la nunaj lingvoj kreiĝis blinde per si mem, aŭtoritate certigas, ke lingvo ne povas esti kreita arte. "Ĝis nun ne estis, sekve ne povas esti!" – "Kiel mi povas kredi", diros en la venonta centjaro ia dekjara lernanto al sia instruanto, "ke ekzistis homoj, kiuj neadis la eblecon de ekzistado de arta lingvo, kiam antaŭ ilia nazo tia lingvo jam *ekzistis*, havis jam riĉan literaturon kaj bonege *plenumadis jam en la praktiko* ĉiujn funkciojn, kiujn

oni povas postuli de lingvo internacia, kaj tiuj ĉi sinjoroj, anstataŭ babiladi ĉiam teorian sensencaĵon, bezonis nur malfermi la okulojn kaj *ekrigardi*! Ĉu estas eble, ke homoj maturaĝaj parolus ĉiam frazistan sensencaĵon pri ia diferenco de la voĉaj organoj ĉe la popoloj, kiam ĉiu infano vidis sur ĉiu paŝo membrojn de unu popolo, bonege parolantajn en la lingvo de alia popolo!" Kaj la instruanto respondos: "ĝi estas efektive nekredebla, kaj tamen ĝi tiel estis!"

Cetere en la nuna tempo en la afero de lingvo internacia la rutino kaj spirita inercio komencas iom post iom cedadi al la sana prudento. Jam longe tie aŭ aliloke en diversaj gazetoj kaj revuoj aperas artikoloj plenaj de aprobo por la ideo mem kaj por ĝiaj batalantoj. Sed tiuj ĉi artikoloj estas ankoraŭ senkuraĝaj, kvazaŭ la aŭtoroj timas, ke oni ne elmetu ilin al publika malhonoro. Tiuj ĉi senkuraĝaj voĉoj perdiĝas en la laŭtega ĥoro de la kriistoj kaj mokistoj, tiel ke la grandega plimulto de la publiko, kutiminta iradi nur tien, kie oni krias la plej laŭte, kaj opiniadi ĉiun mokanton saĝulo, ĉiun atakanton bravulo kaj ĉiun atakaton kulpulo, ĉiam ankoraŭ rigardas la ideon de lingvo internacia kiel sensencan infanan fantazion. Tiun ĉi publikon konvinki ni ne entreprenas, ĉar ĉiuj niaj vortoj pereus vane. Ĝin konvinkos nur la tempo. Morgaŭ ĝi al la pioniroj de la ideo konstruos monumentojn kun tia sama anara sento, kun kiu ĝi hodiaŭ superĵetas ilin per koto. Nia parolo estas difinita nur por tiuj, kiuj provis rilati al nia ideo kun juĝo memstara, sed sub la influo de diversaj aŭditaj opinioj perdis la egalpezon, ne scias, kiel ili devas sin teni, dezirus kredi kaj samtempe turmentiĝas per konstantaj duboj. Por ili ni tie ĉi analizos la demandon, ĉu efektive ni, la amikoj de la ideo de lingvo internacia, laboras por ia utopio, kaj ĉu minacas al ni la danĝero, ke ĉiuj niaj laboroj pereos vane, kiel kredigas niaj kontraŭuloj, aŭ ĉu ni iras al celo klare difinita, senduba kaj nepre atingota.

Ni scias, estimataj aŭskultantoj, ke vi kutimis rilati kun estimo nur al tiaj argumentoj, kiuj estas plenigitaj per multo da citatoj, traplektitaj per multo da laŭtaj aŭtoritataj nomoj kaj brilas per amasego da alteflugaj kvazaŭ-sciencaj frazoj. Ni avertas vin, ke ĉion tion ĉi vi en nia parolo ne trovos. Se vi trovas atentinda nur tion, kio estas ligita kun laŭtaj nomoj, legu ian verkon pri lingvo internacia, kaj vi trovos tie longan serion da gloraj kaj aŭtoritataj scienculoj, kiuj laboris por la ideo de lingvo internacia. Sed ni tie ĉi forlasos ĉian superfluan balaston kaj parolos al vi nur en la nomo de la nuda *logiko*. Ne turnu atenton sur tion, kion diras Petro aŭ Johano, sed pripensu *mem*. Se niaj argumentoj estas ĝustaj, akceptu ilin, – se ili estas malĝustaj, forĵetu ilin, se eĉ miloj da laŭtaj nomoj starus post ili.

Ni analizos sisteme la sekvantajn demandojn: (1) ĉu lingvo internacia estas bezona; (2) ĉu ĝi estas ebla en principo; (3) ĉu ekzistas espero, ke ĝi efektive estos enkondukita praktike; (4) kiam kaj kiamaniere tio ĉi estos farita kaj kia lingvo estos enkondukita; (5) ĉu nia nuna laborado kondukas al ia difinita celo, aŭ ni agas ankoraŭ blinde kaj riskas, ke nia laborado pereos vane, kaj prudentaj homoj devas ankoraŭ sin teni flanke de ni, ĝis "la afero klariĝos".

2

Ĉu lingvo internacia estas bezona? Tiu ĉi demando per sia naiveco elvokos ridon ĉe la estontaj generacioj, tiel same kiel niaj samtempuloj ekridus ekzemple ĉe la demando "Ĉu poŝto estas bezona?" La plimulto de la inteligenta mondo jam nun trovos tiun ĉi demandon tute superflua; tamen pro konsekvenco ni metas tiun ĉi demandon dank' al tio, ke ekzistas ankoraŭ multe da homoj, kiuj respondas je tiu ĉi demando per "ne". La sola motivo, kiun kelkaj el tiuj ĉi homoj elmetas, estas sekvanta: "lingvo internacia detruos la lingvojn naciajn kaj la naciojn". Ni konfesas, ke kiom ajn ni rompis al ni la kapon, ni neniel povis kompreni, en kio nome konsistus la malfeliĉo por la homaro, se en unu bela tago montriĝus, ke ne ekzistas jam plu nacioj kaj lingvoj naciaj, sed ekzistas nur unu ĉiuhoma familio kun unu ĉiuhoma lingvo. Sed ni supozu, ke tio ĉi efektive estus io terura, kaj ni rapidos trankviligi tiujn ĉi sinjorojn. Lingvo internacia deziras nur doni al la homoj de *malsamaj* popoloj, kiuj staras unu antaŭ alia kiel mutuloj, la eblon komprenadi unu alian, sed ĝi neniel intencas enmiksiĝi en la internan vivon de la popoloj. Timi, ke lingvo internacia detruos la lingvojn naciajn, estas tiel same ridinde, kiel ekzemple timi, ke la poŝto, kiu donas al homoj malproksimaj unu de alia la eblon komunikiĝadi, minacas neniigi la buŝajn interparoladojn inter la homoj! "Lingvo internacia" kaj "lingvo tutmonda" estas du tute malsamaj objektoj, kiujn miksi inter si oni neniel devas. Se ni supozus, ke fariĝos iam kunfluiĝo de la homoj en unu ĉiuhoman popolon, en tiu ĉi "malfeliĉo" (kiel nomos ĝin la naciaj ŝovinistoj) estos kulpa ne la lingvo internacia, sed la aliiĝintaj konvinkoj kaj opinioj de la homoj. *Tiam* efektive la lingvo internacia faciligos al la homoj la atingon de tio, kio antaŭe estos principe decidita de ili kiel dezirinda; sed se la celado al kunfluiĝo ne naskiĝos ĉe la homoj *memstare*, la lingvo internacia per si mem certe ne volos *altrudi* al la homoj tian unuiĝon. Lasante tute flanke la demandon pri la dezirindeco aŭ nedezirindeco de nacia ŝovinismo, ni notos nur tion, ke celadon al lingvo internacia ne devas escepti eĉ la plej varmega blinda ŝovinismo; ĉar la rilato inter celado al lingvo internacia kaj inter nacia ŝovinismo estas tia sama, kiel inter nacia patriotismo kaj amo al sia familio: ĉu iu povas diri, ke la pligrandigo de reciprokaj komunikiĝoj kaj interkonsentoj inter homoj de tiu sama lando (celado *patriota*) minacas per io al la amo *familia*? Per si mem la lingvo internacia ne sole ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe, ĝi sendube devas konduki al ilia granda fortiĝado kaj plena ekflorado: dank' al la neceseco ellernadi diversajn fremdajn lingvojn, oni nun malofte povas renkonti homon, kiu posedas perfekte sian patran lingvon, kaj la lingvoj mem, konstante kunpuŝiĝante unuj kun la aliaj, ĉiam pli kaj pli konfuziĝas, kripliĝas kaj perdas sian naturan riĉecon kaj ĉarmon; sed kiam ĉiu el ni devos ellernadi nur *unu* fremdan lingvon (kaj ankoraŭ tre facilan), ĉiu el ni havos la eblon ellerni sian lingvon fonde, kaj ĉiu lingvo, liberiĝinte de la premado de multaj najbaroj kaj konservinte plene por si sola ĉiujn fortojn de sia popolo, disvolviĝos baldaŭ plej potence kaj brile.

La dua motivo, kiun elmetas la malamikoj de lingvo internacia, estas la timo, ke kiel lingvo internacia estos eble elektita ia el la lingvoj *naciaj* kaj ke tiam la homoj ne *alproksimiĝos* al si reciproke, sed simple ia unu popolo *dispremos* kaj *englutos* ĉiujn aliajn popolojn, dank' al la grandega superforto, kiun ĝi ricevos super ĉiuj aliaj popoloj. Tiu ĉi motivo estas ne tute senfundamenta; sed ĝi povas esti elmetita nur kontraŭ tia aŭ alia nepripensita kaj malĝusta *formo* de lingvo internacia. Tiu ĉi motivo kompreneble perdas ĉian signifon, se ni turnos atenton, ke lingvo internacia povas esti kaj estos nur ia *neŭtrala* lingvo, kiel ni malsupre montros.

Sekve se ni lasos por kelka tempo flanke la demandon pri la ebleco aŭ neebleco de la enkonduko de lingvo internacia (pri tiu ĉi punkto ni parolos malsupre), se ni supozos, ke la enkonduko de tia lingvo dependas nur de nia *deziro*, kaj se ni esceptos ian kriantan erarpaŝon en la *elekto* de la lingvo, ĉiu devas konsenti, ke pri *malutilo* de lingvo internacia neniel povas esti eĉ la plej malgranda parolo. Sed la *utilo*, kiun tia lingvo alportus al la mondo, estas tiel grandega kaj videbla por ĉiu, ke pri tio ĉi ni propre ne bezonus paroli. Tamen *kelke* da vortoj ni diros pri tio ĉi, se eĉ simple pro pleneco de nia analizo.

Ĉu vi ekpensis iam pri tio, *kio* propre levis la homaron tiel neatingeble alte super ĉiuj aliaj bestoj, kiuj ja en efektiveco estas konstruitaj laŭ tiu sama tipo, kiel la homo? La tutan nian altan kulturon kaj civilizacion ni dankas nur al unu objekto: al la *posedado de lingvo*, kiu ebligis al ni la *interŝanĝadon de pensoj*. Kio estus kun ni, fieraj reĝoj de la mondo, se ni ne povus *lingve komunikiĝadi* unuj kun aliaj, se sian tutan scion kaj inteligentecon ĉiu el ni devus de la komenco mem ellaboradi al si mem, anstataŭ faradi uzon – dank' al interŝanĝo de pensoj – de la jam pretaj fruktoj de la sperto kaj diversaj scioj de tutaj miljaroj, de tutaj milionoj kaj miliardoj da aliaj similaj al ni kreitaĵoj? Ni tiam eĉ per unu plej malgranda ŝtupeto ne starus pli alte ol tiuj diversaj bestoj, kiuj nin ĉirkaŭas kaj kiuj estas tiel sensaĝaj kaj senhelpaj! Forprenu de ni la manojn kaj la piedojn kaj kion vi volas, sed lasu al ni nur la povadon interŝanĝadi la pensojn, – kaj ni restos tiuj samaj reĝoj de la naturo, kaj ni konstante kaj senfine perfektiĝados; sed donu al ĉiu el ni eĉ centon da manoj, donu al ni eĉ centon da diversaj ĝis nun ne konataj sentoj kaj povoj, sed forprenu de ni la povon de interŝanĝado de pensoj – kaj ni restos sensaĝaj kaj senhelpaj bestoj. Sed se la tre neplena kaj tre limigita ebleco de interŝanĝo de pensoj havis por la homaro tian grandegan signifon, ekpensu pri tio, kian grandegan kaj kun nenio kompareblan utilon donus al la homaro tiu lingvo, kiu farus la interŝanĝadon de pensoj *plena*, kaj dank' al kiu ne sole A havus la eblon kompreniĝadi kun B, C kun D, E kun F, sed *ĉiu* el ili povus kompreniĝadi kun *ĉiu* el la aliaj! Tuta cento da plej grandaj elpensoj ne faros en la vivo de la homaro tian grandan kaj bonfaran revolucion, kian faros la enkonduko de lingvo internacia! Ni prenu kelkajn malgrandajn ekzemplojn. Ni penas tradukadi la verkojn de ĉiu nacio en la lingvojn de ĉiuj aliaj nacioj; sed tio ĉi englutas ja neproduktive grandegan multon da laboroj kaj mono, kaj tamen

malgraŭ ĉio ni povas traduki nur la plej sensignifan parton de la homa literaturo, kaj la grandega plimulto de la homa literaturo kun riĉaj provizoj da diversaj pensoj por ĉiu el ni restas neakirebla. Sed kiam ekzistus lingvo internacia, tiam ĉio, kio aperas en la regiono de la homa penso, estus tradukata nur en tiun ĉi *unu* neŭtralan lingvon kaj multaj verkoj estus skribataj rekte en tiu ĉi lingvo, kaj ĉiuj produktoj de la homa spirito fariĝus akireblaj por ĉiu el ni. Por la perfektigado de tiu aŭ alia branĉo de la homaj scioj ni aranĝas sur ĉiu paŝo internaciajn kongresojn, – sed kian mizeran rolon ili ludas, kiam partopreni en ili povas ne tiu, kiu efektive kun utilo dezirus ion aŭdi, ne tiu, kiu efektive ion gravan volus komuniki, sed nur tiu, kiu scias babiladi en kelkaj lingvoj. Nia vivo estas mallonga, kaj la scienco estas vasta; ni devas lerni, lerni, lerni! Al la lernado ni povas dediĉi nur parton de nia mallonga vivo, nome niajn infanajn kaj junulajn jarojn; sed ho ve! granda parto de tiu ĉi kara tempo foriras tute neproduktive por la ellernado de lingvoj! Kiom multe ni gajnus, se, dank' al ekzistado de lingvo internacia, ni povus la tutan tempon, dediĉatan nun al la neproduktiva lernado de lingvoj, dediĉi al la lernado de efektivaj kaj pozitivaj *sciencoj*! Kiel alte tiam leviĝus la homaro!...

Sed ni ne parolos plu pri tiu ĉi punkto, ĉar kiel ajn ĉiu el niaj aŭskultantoj rilatus al tiu aŭ alia *formo* de lingvo internacia, ni dubas, ĉu troviĝos inter ili eĉ unu, kiu dubus la *utilecon mem* de tia lingvo. Sed ĉar al multaj homoj, kiuj ne kutimis donadi al si precizan kalkulon pri siaj simpatioj kaj antipatioj, ordinare ŝajnas, ke se ili ne aprobas tiun aŭ alian formon de ia ideo, ili nepre devas ataki la ideon mem entute, – tial ni, pro sistemeco de nia analizo, petas ĉiun el la estimataj aŭskultantoj antaŭ ĉio noti al si bone en la memoro, ke pri la utileco de lingvo internacia *entute* – se tia estus enkondukita – li ne dubas. Ekmemoru do, sinjoroj, bone la unuan konkludon, al kiu ni venis, notu al vi kaj ekmemoru, ke kun tiu ĉi konkludo vi konsentas, nome:

La ekzistado de lingvo internacia, per kiu povus kompreniĝadi inter si la homoj de ĉiuj landoj kaj popoloj, alportus al la homaro grandegan utilon.

3

Nun ni transiros al la dua demando: "ĉu lingvo internacia estas ebla?" Ankaŭ pri tio ĉi nenia senantaŭjuĝa homo eĉ unu minuton povas dubi, ĉar ne sole ne ekzistas eĉ la plej malgrandaj faktoj, kiuj parolus *kontraŭ* tia ebleco, sed ne ekzistas eĉ la plej malgrandaj kaŭzoj, kiuj devigus eĉ unu minuton *dubi* pri tia ebleco. Ekzistas en efektiveco homoj, kiuj kun scienca aplombo kredigas, kvazaŭ lingvo estas objekto natura, organa, kiu dependas de apartaj fiziologiaj ecoj de la organoj de parolo de ĉiu popolo, de la klimato, heredeco, kruciĝado de rasoj, historiaj kondiĉoj k. t. p. Kaj al la amaso tiaj instruitaj paroloj tre imponas, precipe se ili en sufiĉa mezuro estas traplektitaj per diversaj citatoj kaj per misteraj por la amaso terminoj teĥnikaj. Sed homo klera, kiu kuraĝas havi propran juĝon, scias ja tre bone, ke ĉio tio ĉi estas nur senenhava pseŭdo-scienca

babilado, kiu havas nenian sencon kaj kiun rebati povus tre facile la unua renkontita infano. El la ĉiutaga sperto ni ĉiuj ja scias tre bone, ke se ni prenos infanon el kiu ajn lando aŭ nacio kaj de la tago de ĝia naskiĝo edukados ĝin inter personoj de nacio tute fremda kaj eĉ antipoda por ĝi, ĝi parolados en la lingvo de tiu ĉi nacio tiel same bonege kaj pure, kiel ĉiu natura filo de tiu ĉi nacio. Se por homo *maturaĝa* estas ordinare malfacile ellerni fremdan lingvon, tio ĉi ja tute ne venas de la konstruo de liaj organoj de parolo, sed simple de tio, ke li ne havas paciencon, ne havas tempon, ne havas instruantojn, ne havas rimedojn k. t. p. Tiu ĉi sama maturaĝulo renkontus ja tiujn ĉi samajn malfacilaĵojn ĉe la ellernado de sia *hejma* lingvo, se li en la infaneco ne estus edukita en tiu ĉi lingvo, sed devus ellernadi ĝin per helpo de lecionoj. Fine ĉiu klera homo ja ankaŭ nun *devas* ellernadi kelkajn fremdajn lingvojn, kaj li certe ne elektas tiujn lingvojn, kiuj kvazaŭ estas konformaj al liaj organoj de parolado, sed nur tiujn, kiujn li *bezonas*; estas sekve nenio neebla en tio, ke anstataŭ ke ĉiu lernas *diversajn* lingvojn, ĉiuj ellernadu ***unu saman*** lingvon kaj sekve povu komprenadi unu alian. Se eĉ ĉiu posedus la komuneakceptitan lingvon ne en plena perfekteco, eĉ tiam la demando de lingvo internacia estus jam decidita, kaj la homoj ĉesus staradi unu antaŭ alia kiel surda-mutaj. Kaj oni devas ja memori, ke se ĉie estus sciate, ke por komunikiĝoj kun la tuta mondo oni devas ellerni nur ***unu*** lingvon – ĉie ekzistus multego da bonaj instruistoj de tiu ĉi lingvo, da specialaj lernejoj, ĉiu ellernadus tiun ĉi lingvon kun la plej granda volonteco kaj fervoreco, kaj fine ĉiuj gepatroj alkutimigadus siajn infanojn al tiu ĉi lingvo en *la infaneco*, paralele kun la patra lingvo. Sekve, lasante dume flanke la demandon pri tio, ĉu la homoj *volos* elekti ian unu lingvon por la rolo de internacia kaj ĉu prosperos al ili veni al interkonsento pri tiu ĉi elekto, ni dume konstatas tiun fakton, kiu kun plena sendubeco sekvas el ĉio, kion ni diris supre, nome, ke la ***ekzistado mem*** de lingvo internacia estas tute ebla. Notu do al vi bone en la memoro tiujn du sendubajn konkludojn, al kiuj ni venis ĝis nun, nome:

1. *Lingvo internacia alportus al la homaro grandegan utilon;*
2. *La ekzistado de lingvo internacia estas plene ebla.*

4

Ĉu lingvo internacia *estos* iam enkondukita? Se ni venis al la konkludo, ke lingvo internacia alportus al la homaro grandegan utilon kaj ke ĝia ekzistado estas ebla, el tiuj ĉi du konkludoj jam per si mem elfluas la konkludo, ke tia lingvo pli aŭ malpli frue nepre estos enkondukita, ĉar alie ni devus nei ĉe la homaro la ekzistadon de ĉia eĉ plej elementa inteligenteco. Se lingvo, povanta plenumadi la rolon de internacia, ĝis nun ankoraŭ ne ekzistus, sed devus ankoraŭ esti kreita, tiam respondo je la demando metita en la komenco de tiu ĉi ĉapitro estus duba, ĉar estus nesciate ankoraŭ, ĉu oni povos krei tian lingvon. Sed ni ja scias, ke da lingvoj ekzistas tre multe kaj ke *ĉiu* el ili en okazo de bezono povus

esti difinita kiel internacia, nur kun tia diferenco, ke unu el ili *pli* taŭgus por tiu ĉi celo kaj alia *malpli*. Ni havas sekve ĉion pretan, kaj ni bezonas nur *ekdeziri* kaj *elekti*, – kaj en tia okazo la respondo je la supre metita demando jam ne povas esti duba. La homoj vivas per vivo konscia kaj senĉese celadas al sia bono; tial se ni scias, ke tiu aŭ alia afero promesas al la homoj grandegan kaj senduban utilon kaj ke ĝi estas por ili atingebla, ni ĉiam kun plena certeco povas antaŭdiri, ke de tiu momento, kiam la homoj nur ekturnis sian atenton al tiu ĉi afero, ili jam obstine celados al ĝi ĉiam pli kaj pli kaj ne ĉesos en sia celado tiel longe, ĝis ili la aferon atingos. Se du homaj grupoj estas disigitaj unu de alia per rivereto, sed scias, ke por ili estus tre utile komunikiĝadi inter si, kaj ili vidas, ke tabuloj por la kunigo de ambaŭ bordoj kuŝas tute pretaj apud iliaj manoj, tiam oni ne bezonas esti profeto, por antaŭvidi kun plena certeco, ke pli aŭ malpli frue tabulo estos transĵetita trans la rivereto kaj komunikiĝado estos aranĝita. Estas vero, ke pasas ordinare kelka tempo en ŝanceliĝado, kaj tiu ĉi ŝanceliĝado estas ordinare kaŭzata de la plej sensencaj pretekstoj: saĝaj homoj diras, ke celado al aranĝo de komunikiĝo estas infanaĵo, ĉar neniu el ili okupas sin je metado de tabuloj trans rivereto, kaj tiu ĉi afero estas tute ne en modo; spertaj homoj diras, ke la antaŭuloj ne metadis tabulojn trans rivereto, sekve ĝi estas utopio; instruitaj homoj pruvas, ke komunikiĝado povas esti nur afero natura kaj ke la homa organismo ne povas sin movadi sur tabuloj, k. t. p. Tamen pli aŭ malpli frue tabulo estas transmetata kaj la komunikiĝado estas aranĝata. Tiel estis kun ĉiu utila ideo, tiel estis kun ĉiu utila elpenso; apenaŭ la senantaŭjuĝaj homoj venadis al senduba konkludo, ke la donita afero estas tre utila kaj samtempe efektivigebla, ili povis ĉiam scii antaŭe kun plena certeco, ke pli aŭ malpli frue la afero *nepre* estos akceptita, malgraŭ ĉia batalado de la flanko de la rutinuloj; ĉar tion ĉi garantias ne sole la natura inteligenteco de la homaro, sed ankaŭ ĝia celado al sia praktika bono kaj profito. Tiel estos ankaŭ kun la lingvo internacia. En la daŭro de multaj centjaroj la homoj, ankoraŭ ne tre bezonante lingvon internacian, ne enpensiĝadis pri tiu ĉi demando; sed nun, kiam la fortiĝintaj komunikiĝoj inter la homoj turnis ilian atenton al tiu ĉi demando, nun, kiam la homoj komencis konvinkiĝadi, ke lingvo internacia alportos al ili grandegan utilon kaj ke ĝi estas atingebla, ili sen ia dubo jam celados al ĝi ĉiam pli kaj pli, ĝia neceseco fariĝados por ili kun ĉiu tago ĉiam pli sentebla, kaj ili jam ne trankviliĝos tiel longe, ĝis la demando estos solvita. Ĉu vi povas tion ĉi dubi? Certe ne! *Kiam* tio ĉi venos – ni ne intencas nun antaŭdiri: povas esti, ke ĝi venos post unu jaro, post dek jaroj, post cent jaroj aŭ eĉ post kelkaj centoj da jaroj, – sed unu afero estas jam senduba, ke kiom ajn devos suferi la unuaj pioniroj de tiu ĉi ideo, kaj se eĉ tiu ĉi ideo multajn fojojn endormiĝadus je tutaj dekjaroj, ĝi jam neniam mortos: ĉiam pli ofte kaj pli obstine eksonados voĉoj, postulantaj enkondukon de lingvo internacia, kaj fine, pli aŭ malpli frue – se la demando ne estos solvita de la societo mem – la registaroj de ĉiuj landoj *devos* cedi, aranĝi internacian kongreson kaj elekti ian unu lingvon kiel internacian. Tie ĉi povas

esti nur demando pri la *tempo*: unuj el vi diros, ke tio ĉi venos tre baldaŭ, aliaj diros, ke ĝi venos nur en plej malproksima estonteco; sed ke tiu ĉi fakto entute iam *venos* kaj ke la homaro, vidante la grandegan utilecon kaj samtempe la atingeblecon de lingvo internacia, ne restos eterne indiferenta por tiu ĉi afero kaj senhelpa anaro da ekzistaĵoj, ne komprenantaj unu alian – pri tio ĉi certe neniu el vi dubas eĉ minuton. Ni petas vin tial noti al vi en la memoro la trian konkludon, al kiu ni venis, nome:

"Pli aŭ malpli frue lingvo internacia nepre estos enkondukita."

Tie ĉi ni faros malgrandan paŭzon kaj diros kelke da vortoj pri ni, batalantoj pro la ideo de lingvo internacia. El ĉio pruvita de ni vi vidas, ke ni tute ne estas tiaj fantaziistoj kaj utopiistoj, kiajn multaj el vi eble vidis en ni kaj kiajn nin pentras multaj gazetoj, ne dezirantaj eniĝadi en la esencon de tio, pro kio ni batalas. Vi vidas, ke ni batalas pro afero, kiu alportos al la homaro grandegan utilon kaj kiu pli aŭ malpli frue *nepre* estos atingita. Ĉiu prudenta homo povas sekve kuraĝe aliĝi al ni, ne timante la mokojn de la malsaĝa kaj nepensanta amaso. Ni batalas pro afero tute pripensita kaj certa, kaj tial neniaj mokoj nek atakoj nin debatos de la vojo. La estonteco apartenas al *ni*. Ni supozu eĉ, ke tiu *formo* de lingvo internacia, pro kiu ni batalas, montriĝos en la estonteco kiel erara kaj ke venonta lingvo internacia estos ne tiu, kiun ni elektis, – sed tio ĉi ja tute nin ne devas konfuzi, ĉar ni batalas ne pro la *formo*, sed pro la *ideo*, kaj formon konkretan al nia batalado ni donis nur tial, ke ĉia batalado abstrakta kaj teoria ordinare al nenio kondukas. Malsupre ni pruvos, ke eĉ ankaŭ tiu konkreta *formo* de la lingvo estas tute pripensita kaj havas senduban estontecon; sed se vi eĉ tion ĉi dubus, la formo ja neniom nin ligas: se tiu ĉi formo montriĝos erara, ni morgaŭ ĝin ŝanĝos, kaj en okazo de bezono ni ĝin post-morgaŭ ankoraŭ unu fojon ŝanĝos, sed ni batalados pro nia ideo tiel longe, ĝis ĝi pli aŭ malpli frue estos plene efektivigita. Se ni, obeante la voĉon de la indiferenta egoismo, detenadus nin de nia laborado nur tial, ke kun la tempo la formo de la lingvo internacia eble estos alia, ol tiu, pro kiu ni nun laboras, tio ĉi signifus tion saman, kiel ekzemple rifuzi la uzadon de vaporo tial, ke poste eble estos trovita pli bona rimedo de komunikiĝado, aŭ rifuzi regnajn plibonigojn tial, ke poste iam eble estos trovitaj pli bonaj formoj por la regna konstruo. Nun ni estas ankoraŭ malfortaj, kaj ĉia bubo povas ankoraŭ mokadi nin kaj montradi nin per la fingroj; sed plej bone ridas tiu, kiu ridas la lasta. Nia afero iras malrapide kaj malfacile; tre povas esti, ke la plimulto de ni ne ĝisvivos tiun momenton, kiam montriĝos la fruktoj de nia agado kaj ĝis la morto mem ni estos objekto de mokoj; sed ni iros en la tombon kun la konscio, ke nia afero ne mortos, ke ĝi morti *neniam povas*, ke pli aŭ malpli frue ĝi *devas* atingi la celon. Kaj se eĉ, lacaj de la sendanka laborado, ni kun malespero kaj apatio lasus fali la manojn, – tute egale, la afero ne mortos: anstataŭ la lacigitaj batalantoj aperos batalantoj novaj; ĉar ni denove ripetas, ke se estas ekster dubo, ke lingvo internacia alportus al la

homaro grandegan utilon kaj ke ĝi estas atingebla, en tia okazo por nenia homo ne blindigita de rutino povas esti ia dubo, ke ĝi pli aŭ malpli frue nepre *estos* atingita, kaj nia konstanta laborado estos por la homaro eterna memorigado tiel longe, ĝis la ideo de lingvo internacia estos efektivigita. La posteuloj benos nian memoron, kaj al tiuj saĝaj homoj, kiuj nun nomas nin fantaziistoj, ili rilatos tiel, kiel ni nun rilatas al la saĝaj samtempuloj de la eltrovo de Ameriko, de la elpenso de vaporveturiloj k. t. p.

5

Sed ni revenu al nia interrompita analizado. Ni pruvis, ke lingvo internacia pli aŭ malpli frue nepre estos enkondukita; sed restas la demando: *kiam* kaj *kia-maniere* ĝi venos? Povas esti, ke tio ĉi venos nur post centoj aŭ eble eĉ post miloj da jaroj? Ĉu por tio ĉi estas bezona nepre reciproka interkonsento de la registaroj de ĉiuj landoj? Por doni pli-malpli kontentigajn respondojn je tiuj ĉi demandoj, ni devas antaŭe analizi alian demandon, nome: "Ĉu oni povas antaŭvidi, *kia* lingvo estos internacia?" Inter la unuaj demandoj kaj la lasta ekzistas la sekvanta malvasta ligiteco: se oni ne povas antaŭvidi, *kia* lingvo estos farita internacia, kaj se diversaj lingvoj havas por tio ĉi pli-malpli egalajn ŝancojn, tiam oni devas atendi ĝis la registaroj de ĉiuj (almenaŭ la plej gravaj) regnoj decidos aranĝi por tiu ĉi celo kongreson kaj decidi la demandon pri lingvo internacia. Kiu scias, kun kia granda malfacileco la registaroj decidiĝas por ĉia nova afero, tiu komprenos, ke pasos ankoraŭ tre kaj tre multe da jaroj, antaŭ ol la registaroj trovos la demandon de lingvo internacia sufiĉe maturiĝinta kaj inda je ilia enmiksiĝo, kaj poste pasos kredeble ankoraŭ vico da jaroj por la laborado de diversaj komitatoj kaj diplomatiistoj, antaŭ ol la afero estos decidita. Apartaj personoj kaj societoj tie ĉi nenion povus fari; ili povus nur konstante instigadi la registarojn, sed mem solvi la demandon sen la enmiksiĝo de la registaroj ili ne povus. Ĝis la solvo de la demando en tia okazo estus sekve ankoraŭ tre kaj tre malproksime. Sed tute alia afero estus, se montriĝus, ke oni povas antaŭe *antaŭvidi* kun plena precizeco kaj plena certeco, kia nome lingvo estos iam internacia: tiam oni jam ne bezonus atendi eble senfinan multon da jaroj, tiam ĉia societo, ĉia aparta persono povus laŭ sia propra gvido labori por la disvastigo de tiu ĉi lingvo; la nombro da adeptoj de tiu ĉi lingvo kreskadus kun ĉiu horo, ĝia literaturo rapide riĉiĝadus, kongresoj internaciaj tuj povus komenci uzadi ĝin por la reciproka kompreniĝado de siaj membroj, kaj en la plej mallonga tempo tiu ĉi lingvo tiom fortikiĝus en la tuta mondo, ke al la registaroj restus nur doni sian sankcion al fakto jam plenumiĝinta. Ĉu ni povas antaŭvidi, kia lingvo estos internacia? Feliĉe ni povas respondi tiun ĉi demandon tute pozitive: *"jes, ni povas antaŭvidi, kia lingvo estos internacia, ni povas tion ĉi antaŭvidi kun plena precizeco kaj certeco, sen ia ombro da dubo"*.

Por konvinki pri tio ĉi niajn aŭskultantojn, ni petas ilin prezenti al si, ke kongreso da reprezentantoj de diversaj regnoj jam efektiviĝis, kaj ni trarigardos,

kian lingvon ili povus elekti. Ne malfacile estos por ni pruvi, ke ekzistas nur *unu sola* lingvo, kiun ili povus elekti, kaj ke ĉia elekto de ia alia lingvo estus por ili rekte *ne ebla*, se ili eĉ *volus* ĝin elekti, kaj ke se ili kontraŭ ĉiu atendo kaj spite ĉiuj argumentoj de la sana prudento tamen elektus ian alian lingvon, tiam kontraŭ tio ĉi protestus la vivo mem, kaj ilia elekto restus nur malviva litero.

Tiel ni prezentu al ni, ke la reprezentantoj de diversaj regnoj kunveturiĝis kaj ke ili alpaŝas al la elekto de lingvo internacia. Al ili antaŭstarus la sekvanta: (1) aŭ elekti ian el la ekzistantaj lingvoj *vivantaj*, (2) aŭ elekti ian el la lingvoj *mortintaj* (ekzemple latinan, grekan, hebrean), (3) aŭ elekti ian el la ekzistantaj lingvoj *artaj*, (4) aŭ difini komitaton, kiu okupus sin je la kreado de lingvo tute *nova*, ankoraŭ ne ekzistanta. Por ke niaj aŭskultantoj povu pense partopreni en la laboroj kaj konsideroj de la elektantoj, ni devas antaŭe konatigi ilin iom kun la karaktero de la nomitaj lingvaj kategorioj. La karaktero de la lingvoj vivantaj kaj mortintaj estas al la aŭskultantoj pli aŭ malpli konata, ni diros tial kelke da vortoj nur pri la lingvoj *artaj*, kiuj por la plimulto de niaj aŭskultantoj prezentas kredeble absolutan *terra incognita*.

Kiamaniere ĉe la homoj naskiĝis la ideo de lingvo arta, kiel tiu ĉi ideo disvolviĝadis, trairadis diversajn stadiojn, komencante de la plej malperfektaj pazigrafioj ĝis la plej perfekta tipo de plena kaj riĉa lingvo, kia grandega multo da provoj estis farita en tiu ĉi direkto, kia grandega multo da laboroj iris ofere por tiu ĉi ideo en la daŭro de la lastaj du centjaroj, – pri ĉio tio ĉi ni ne parolos, ĉar por elaŭskulti ĉion tion ĉi vi ne havus sufiĉe da tempo nek pacienco. Ni diros nur ion pri la specialaj *ecoj* de la artaj lingvoj, ĉe kio ni kompreneble havos antaŭ la okuloj ne la diversajn malprosperajn provojn antaŭajn, kiuj la plimulton da analizataj de ni ecoj ne posedas, sed la plej perfektan formon de lingvo internacia, ekzistantan en la nuna tempo.

Krom plena neŭtraleco en rilato nacia, arta lingvo distingiĝas per la sekvantaj ecoj:

(1) Ĝi estas mireginde kaj nekredeble *facila por ellernado*: sen trograndigo oni povas diri, ke ĝi estas almenaŭ *kvindek* fojojn pli facila, ol ĉia lingvo natura. Kiu ne konatiĝis kun lingvo arta, ne povas eĉ kredi, ĝis kia grado atingas ĝia facileco. La granda verkisto kaj filozofo Leono Tolstoj, kiun certe neniu en la tuta mondo kuraĝos suspekti en tio, ke li volas fari reklamon al la lingvo internacia, diris pri la lingvo Esperanto jenon: "La facileco de ĝia ellernado estas tia, ke, ricevinte Esperantan gramatikon, vortaron kaj artikolojn skribitajn en tiu ĉi lingvo, mi post ne pli ol du horoj da sinokupado havis la eblon se ne skribi, tamen libere legi en tiu ĉi lingvo. En ĉia okazo, la oferoj, kiujn alportos ĉiu homo de nia Eŭropa mondo, dediĉinte kelkan tempon al la ellernado de tiu ĉi lingvo, estas tiel *sensignifaj*, kaj la sekvoj, kiuj povas veni, se ĉiuj, almenaŭ la Eŭropanoj kaj Amerikanoj, aligos al si tiun ĉi lingvon, estas tiel grandegaj, ke oni ne povas ne fari tiun ĉi provon". Komprenu, sinjoroj, kion tio ĉi signifas: *"post ne pli ol du horoj da sinokupado"*! Kaj en tiu ĉi sama maniero esprimis sin pri la lingvo

Esperanto ĉiuj tiuj senantaŭjuĝaj kaj honestaj homoj, kiuj, anstataŭ filozofadi pri ĝi blinde, prenis sur sin la malgrandan laboron efektive konatiĝi kun ĝi. Estas vero, ke homoj instruitaj povas ellerni Esperanton pli rapide, ol homoj neinstruitaj, sed ankaŭ la lastaj ellernas ĝin treege kaj mireginde facile, ĉar por la ellernado de la lingvo Esperanto de la lernanto estas postulataj neniaj antaŭaj scioj. Inter la esperantistoj vi trovos multe da homoj tiom neinstruitaj, ke ili ĝis nun en sia *propra, patra* lingvo skribas treege malbone kaj plene da eraroj, kaj tamen en la lingvo Esperanto ili skribas tute senerare, – kaj ili ellernis tiun ĉi lingvon en la daŭro de iaj kelke da semajnoj, dum la ellernado de ia lingvo natura ĉe tiuj samaj personoj devus okupi almenaŭ 4 aŭ 5 jarojn.

Kiam en la jaro 1895 Odeson venis svedaj studentoj, kiuj sciis sole svede kaj Esperante, unu ĵurnalisto, kiu deziris interparoli kun ili, matene la unuan fojon en sia vivo prenis en la manojn lernolibron Esperantan kaj vespere en tiu sama tago li povis jam sufiĉe bone paroli kun la svedoj.

De kie venas tia nekredebla facileco de lingvo internacia? Ĉiu lingvo natura konstruiĝis *blinde*, per la vojo de amasiĝado de la plej diversaj kaj pure okazaj cirkonstancoj; tie agadis nenia logiko, nenia difinita plano, sed simple nur la uzo: tian vorton estas *akceptite* uzi tiel, kaj tial ni devas ĝin uzi tiel, – tian vorton estas akceptite uzi alie, kaj tial ni devas ĝin uzi alie. Jam antaŭe tial oni povas diri, ke sistemo da sonoj por la esprimado de pensoj, kiun kreos homa *inteligenteco* konscie kaj laŭ severe difinitaj kaj logikaj leĝoj, devos esti multe, tre multe da fojoj pli facila, ol tia sistemo da sonoj, kiu konstruiĝis okaze kaj senkonscie. Ni ne havas la eblon analizi tie ĉi la tutan tiun iron de la pensoj, je kiu gvidadis sin la aŭtoroj de artaj lingvoj, nek montri detale ĉiujn tiujn grandegajn faciligojn, kiujn arta lingvo posedas en komparo kun la naturaj, ĉar tio ĉi postulus tutan vastan traktaton, – ni prenos tial nur simple kelkajn *ekzemplojn*. Tiel ekzemple preskaŭ en ĉiuj lingvoj ĉiu substantivo ial apartenas al tia aŭ alia *sekso*, ekzemple en la lingvo germana "kapo" havas viran sekson, en la lingvo franca virinan kaj en la lingvo latina neŭtralan; ĉu ekzistas en tio ĉi ia eĉ plej malgranda senco aŭ celo? Kaj tamen kian grandegan malfacilecon prezentas por la lernanto la memorado de la sekso de ĉiu substantivo! Kiom multe la lernanto devas ekzerciĝadi, ekzerciĝadi kaj denove ekzerciĝadi, antaŭ ol li venos al tiu perfekteco, ke li jam plu ne konfuziĝados kaj ne diros ekzemple "le fin" anstataŭ "la fin" aŭ "das Strick" anstataŭ "der Strick"! En lingvo arta tiu ĉi sekso de la substantivoj estas *tute elĵetita*, ĉar montriĝis, ke ĝi ne havas en la lingvo eĉ la plej malgrandan celon. Jen vi havas sekve jam unu ekzemplon de tio, kiel per la plej bagatela rimedo estas atingita plej grandega faciligo de la lingvo. En la lingvoj naturaj ekzistas la plej komplikitaj kaj konfuzitaj deklinacioj kaj konjugacioj kun grandega multo da diversaj formoj ne sole por ĉiuj deklinacioj kaj konjugacioj, sed en ĉiu el ili ankoraŭ tuta serio da formoj; ekzemple en la konjugacioj vi havas ne sole por ĉiu tempo kaj modo tutajn seriojn da formoj, sed en ĉiu el tiuj ĉi tempoj kaj modoj ankoraŭ apartajn formojn por ĉiu persono kaj nombro.

Oni ricevas vicon da grandegaj gramatikaj tabeloj, kiujn oni devas ellerni kaj konservadi en la memoro; sed tio ĉi estas ankoraŭ nur komenco: al tio ĉi aliĝas multego da deklinacioj kaj konjugacioj *neregulaj*, ĉiu kun aparta serio da formoj, kaj ĉion tion ĉi oni devas ne sole ellerni kaj konservadi en la memoro, sed konstante memori, kia vorto ŝanĝiĝas laŭ la regulaj deklinacioj aŭ konjugacioj kaj kia laŭ la malregulaj kaj laŭ kia nome de tiuj ĉi regulaj aŭ malregulaj tabeloj la donita vorto ŝanĝiĝas. La ekposedo de ĉio tio ĉi postulas inferan paciencon, multegon da tempo kaj konstantan senĉesan ekzerciĝadon. Dume lingvo arta anstataŭ tiu ĉi tuta ĥaoso, kiu postulas tutajn jarojn da pacienca laborado, donas al vi sole nur 6 vortetojn "i, as, is, os, us, u", kiujn vi povas perfekte ekposedi en la daŭro de kelke da minutoj kaj kiujn vi jam neniam forgesos kaj neniam konfuzos. Vi kun mirego demandas: "Kiel tio ĉi estas ebla?" Jen, tre simple: Esperanto diras al vi, ke deklinacioj *tute* estas bezonaj *neniaj*, ĉar ili plene anstataŭiĝas per la prepozicioj, kiujn ni ja sen tio uzas, kaj en la konjugacioj ne sole sufiĉas *unu* tabelo por *ĉiuj* verboj, sed eĉ por tiu ĉi tabelo tute sufiĉas, se ĝi enhavas en si (krom participoj, prezentantaj apartan formon) sole nur 6 finiĝojn, nome: por la tempoj estanta, estinta kaj estonta kaj por la modoj sendifina, kondiĉa kaj ordona. Vi certe en la unua minuto ekpensos, ke dank' al tiu ĉi malgrandega tabelo da konjugacioj la lingvo perdas sian flekseblecon? Tute neniel: konatiĝu kun la lingvo arta, kaj vi ekvidos, ke ĝia konjugacio esprimas ĉiujn nuancojn de la penso senkompare pli bone kaj pli precize, ol la plej komplikitaj kaj konfuzitaj tabeloj de la lingvoj naturaj, ĉar la arta lingvo forĵetis ne tion, kion la lingvo bezonas, sed nur tion, kio prezentas en ĝi absolute superfluan kaj tute al nenio servantan balaston. Efektive, por kio ni bezonas apartan serion da finiĝoj por ĉiu persono kaj nombro, kaj al tio ĉi en ĉiu tempo kaj en ĉiu modo apartan *novan* serion da tiuj ĉi finiĝoj, se ĉiuj tiuj ĉi finiĝoj estas ja tute superfluaj, ĉar la pronomo, kiu staras antaŭ la verbo, jam tute sufiĉe montras ĝian personon kaj nombron?

La ortografio en la plimulto da lingvoj (kaj al tio ĉi la plej multe ĝuste en tiuj lingvoj, kiuj la plej multe havas da ŝancoj por esti elektitaj kiel internaciaj) prezentas veran krucon por la lernanto: en unu vorto la donita litero estas elparolata, en alia ĝi ne estas elparolata aŭ estas elparolata alie, en unu vorto la donita sono estas skribata tiel, en alia vorto alie.... Tutajn jarojn devas uzi franco aŭ anglo por tio, ke li ekpovu regule skribi en sia patra lingvo! Radikale ŝanĝi tiun ĉi ortografion estas absolute ne eble, ĉar tiam grandega multo da vortoj, kiuj diferencas unu de alia aŭ neniel, aŭ nur per ia apenaŭ rimarkebla nuanco en la elparolado, fariĝus en la skribado tute nediferencigeblaj unu de alia. La lingvo arta donis al ĉiu sia litero klaran, severe difinitan kaj ĉiam egalan elparoladon, kaj dank' al tio en la lingvo arta la demando de ortografio tute ne ekzistas, kaj jam post kvarono da horo da sinokupado je la arta lingvo (t. e. simple post la konatiĝo kun ĝia plej simpla alfabeto) ĉiu skribos en ĝi diktaton tute senerare, dum en lingvo natura li atingos tion ĉi nur post tutaj jaroj da malfacila kaj enua laborado.

Jam el tiuj kelkaj ekzemploj, kiujn ni donis, vi povas ricevi ideon pri tio, kian grandegan faciligon donas al la lingvo la enmiksiĝo de konscia arto. Ni povus citi kompreneble ankoraŭ multe da aliaj ekzemploj, ĉar sur ĉiu paŝo ni renkontas en la lingvoj naturaj grandegajn malfacilaĵojn kaj konfuzaĵojn, kiuj en lingvo arta estas aŭ tute elĵetitaj kiel superflua balasto, aŭ alkondukitaj al ia unu aŭ du mallongaj vortetoj aŭ reguloj, sen ia eĉ plej malgranda difekto por la fleksebleco, riĉeco kaj precizeco de la lingvo. Tamen ni ne parolos pli pri tio ĉi, sed ni diros sole tion, ke *la tuta gramatiko de la lingvo Esperanto konsistas tuta nur el 16 mallongaj reguletoj, kiujn ĉiu povas bonege ellerni en la daŭro de duonhoro!* Post unu sola duonhoro da laborado super Esperanto la lernanto en tia grado ekposedas la tutan gramatikon kaj tutan konstruon de la lingvo, ke al li restas jam nur la simpla kaj facila akirado de provizo de vortoj! Por kompreni kaj taksi la tutan gravecon de tio ĉi, imagu al vi, ke vi entreprenis la ellernadon de ia lingvo natura kaj ke post kelke da jaroj da pacienca laborado vi fine venis al tio, ke vi ekposedis la konstruon de la lingvo en perfekteco kaj ke vi estas certaj, ke vi jam plu neniam povas fari en tiu ĉi lingvo ian gramatikan aŭ ortografian eraron kaj ke vi nun jam nur bezonas simple lernadi kiom eble pli da *vortoj*, – vi ja tiam sentus vin feliĉa kaj dirus, ke la plej malfacilan kaj plej enuan parton de la laboro vi jam pasis.... Ĉu ne vere? En la lingvo Esperanto vi atingas tion ĉi *jam post duonhoro da laborado!*

Sekve se Esperanto havus eĉ *nur* tiun econ, pri kiu ni supre parolis, t. e. grandegan facilecon kaj regulecon de la gramatiko kaj ortografio, ni jam devus diri pri ĝi, ke ĝi estas multajn, multajn fojojn pli facila, ol ĉiu lingvo natura. Sed per tio ĉi ne finiĝas ankoraŭ la facileco de la lingvo Esperanto. Kiam vi venis al tio, ke al vi restas jam nur simpla ellernado de *vortoj*, vi eĉ tie ĉi renkontos ankoraŭ grandegajn faciligojn. Tiel ekzemple jam la reguleco mem de la lingvo donas al vi grandegan ekonomion en la nombro de la vortoj, kiujn vi bezonos lerni; ĉar sciante de la vorto la formon substantivan, vi jam antaŭe, kaj sen ia lernado, scias ankaŭ ĝian adjektivon kaj ĝian adverbon kaj ĝian verbon k. t. p., dum en ĉiu lingvo natura tre multaj esprimoj havas por ĉiu parto de parolo apartan vorton (ekzemple: *parler, oral, verbalement*). Havante plenan kaj ne limigitan rajton kunigi ĉian vorton kun ĉia prepozicio kaj kun ĉia alia vorto, vi estas liberigitaj de la lernado de multego da vortoj, kiuj en la lingvoj naturaj havas por si apartajn radikojn nur tial, ke tia aŭ alia kunigo de vortoj estas ial ne permesita. Sed krom tiuj ĉi *naturaj* vortfaraj oportunaĵoj, kiujn la lingvo Esperanto havas, vi trovos en ĝi ankoraŭ apartajn, tiel diri *artajn* rimedojn, kiuj enkondukas grandegan ekonomion ĉe la lernado de la vortoj. Tiaj ekzemple estas ĝiaj sufiksoj kaj prefiksoj, el kiuj ni citos nur kelkajn pro ekzemplo: la prefikso "mal" donas al la vorto sencon rekte kontraŭan ("bona" bon – "malbona" mauvais), – sekve sciante la vortojn "bona, mola, varma, larĝa, supre, ami, estimi" k. t. p., vi jam mem povas formi la vortojn "malbona, malmola, malvarma, mallarĝa, malsupre, malami, malestimi" k. t. p., aldonante al la vorto

jam konata de vi nur la prefikson "mal"; la sufikso "in" signifas la virinan sekson ("patro" père – "patrino" mère), – sekve sciante la vortojn "patro, frato, onklo, fianĉo, bovo, koko" k. t. p., vi jam estas liberigitaj de la lernado de la vortoj "patrino, fratino, onklino, fianĉino, bovino, kokino" k. t. p.; la sufikso "il" signifas ilon ("tranĉi" trancher – "tranĉilo" couteau), – sekve sciante la vortojn "tranĉi, kombi, tondi, pafi, sonori, plugi" k. t. p., vi jam mem scias la vortojn "tranĉilo, kombilo, tondilo, pafilo, sonorilo, plugilo" k. t. p. Da tiaj vortopartetoj, kiuj treege malgrandigas la vortaron de la lingvo, ekzistas ankoraŭ multaj aliaj.

Rememoru do nun ĉion, kion ni diris pri la konstruo de arta lingvo, kaj tiam vi facile konsentos, ke se ni diris, ke lingvo arta estas almenaŭ 50 fojojn pli facila, ol natura, en tio ĉi estis nenia trograndigo. Notu al vi en la memoro tiun ĉi grandegan facilecon de arta lingvo, ĉar ni al ĝi poste ankoraŭ revenos.

(2) La dua distingiĝa eco de lingvo arta estas ĝia *perfekteco*, kiu konsistas en matematika precizeco, fleksebleco kaj senlima riĉeco. Ke lingvo arta posedos tian econ, tion ĉi ankoraŭ antaŭ la apero de la unua arta lingvo antaŭvidis kaj antaŭdiris ĉiuj tiuj eminentaj kapoj, kiuj rilatis al tiu ĉi por la homaro treege grava ideo pli serioze, ol diversaj nuntempaj Jupiteroj, kiuj pensas, ke ĉia eĉ plej supraĵa konatiĝo kun la esenco de lingvoj artaj malaltigus ilian honoron kaj indecon. Ni povus citi tiajn grandajn lumojn, kiel ekzemple Bacon, Leibnitz, Pascal, de Brosses, Condillac, Descartes, Voltaire, Diderot, Volney, Ampère, Max Müller k. t. p., – sed ni rigardas la citatojn kiel batalilon nur de pseŭdoinstruitaj sofistoj; tial, ne fanfaronante per citatoj, ni penos pruvi ĉion nur per la sola logiko. Ke lingvo arta ne sole povas, sed *devas* esti pli perfekta, ol lingvoj naturaj, tion ĉi komprenos ĉiu mem, se li konsideros la jenon: Ĉia lingvo natura konstruiĝadis per tia vojo, ke unu ripetadis tion, kion li aŭdis de aliaj; nenia logiko, nenia konscia decido de la homa inteligenteco tie ĉi havis ian forton. Ĉian esprimon, kiun vi multajn fojojn *aŭdis*, vi povas uzi, kaj ĉian esprimon, kiun vi ankoraŭ neniam aŭdis, estas al vi malpermesite uzi. Tial ni en ĉia lingvo natura sur ĉiu paŝo renkontas la sekvantan aperon: en via cerbo aperas ia komprenaĵo, sed... vi ne havas la eblon esprimi ĝin per buŝa vorto kaj devas tial helpi al vi per tuta multvorta kaj tre neoportuna *priskribo* de tiu komprenaĵo, kiu en via cerbo ekzistas kiel *unu* komprenaĵo, kiel unu spirita vorto. Tiel ekzemple, dank' al tio, ke je lavado de tolaĵo sin okupas ordinare virinoj, vi en ĉiu lingvo havas vorton por esprimo de la komprenaĵo "lavistino"; sed se *viro* ekvolos okupadi sin je lavado de tolaĵo, vi en tre multaj lingvoj staras jam senhelpe kaj ne scias, kiel nomi tian homon, ĉar nomon de viro, kiu okupas sin je lavado de tolaĵo, vi neniam aŭdis! Je kuracado ĝis nun okupadis sin sole viroj; sed kiam ekaperis kuracistinoj, aŭ virinoj posedantaj ian sciencan rangon, por ili en la plimulto da lingvoj ne troviĝis vorto! Por la esprimo de ilia nomovorto oni bezonis jam helpi al si per priskriba uzo de kelke da vortoj, kaj kiam vi ankoraŭ el ilia titolo volas fari adjektivon, verbon k. t. p. – tio ĉi estas jam tute ne ebla! En ĉiu lingvo vi trovos multe da substantivoj, kiuj ne havas tiun aŭ alian sekson,

tiun aŭ alian kazon, tiun aŭ alian devenan formon; adjektivojn, kiuj ne havas tiun aŭ alian gradon de komparado, tiun aŭ alian formon; verbojn, kiuj ne havas tiun aŭ alian tempon, personon, modon k. t. p.; de tia substantivo vi ne povas fari adjektivon, de tia verbo vi ne povas fari substantivon k. t. p. Ĉar, ni ripetas, ĉiu lingvo natura estas fondita ne sur la logiko, sed sur la blinda "oni tiel parolas" aŭ "oni tiel ne parolas"; sekve ĉian komprenaĵon, kiu naskiĝas en via cerbo, sed por kiu vi ĝis nun vortan esprimon ne aŭdis, vi ordinare esprimi ne havas la eblon kaj vi devas helpi al vi per priskriboj. Sed en lingvo arta, konscie fondita sur la severaj, permesantaj nenian escepton nek arbitron leĝoj de pensado, nenio simila povas havi lokon. Esprimoj en la speco de "tia vorto ne havas tiajn formojn aŭ ne permesas tiajn ideajn kuniĝojn" – en lingvo arta estas tute ne eblaj. Supozu ekzemple, ke morgaŭ viro ricevas la eblon naski infanojn aŭ nutri ilin per siaj mamoj, – kaj por li tuj ekzistas en la lingvo preta vorto, ĉar en lingvo arta estas ne ebla la ekzistado de ia vorto por unu sekso kaj neekzistado por la dua sekso. Supozu, ke morgaŭ iu elektas al si ian novan, eĉ la plej strangan profesion, ekzemple laboradon je aero, – por li tuj ekzistas preta vorto, ĉar se en lingvo arta nur ekzistas sufikso por la esprimo de profesio, ĝi donas al vi jam la eblon esprimi *ĉian* profesion, kia nur povus aperi en via cerbo.

Krom tio ne forgesu, ke la perfektiĝado de lingvo arta estas ebla ĝis senfineco, ĉar *ĉiun* bonan regulon, bonan formon, bonan esprimon, kiu ekzistas en kiu ajn lingvo, lingvo arta havas plenan rajton aligi al si, ĉian mankon, kiu povus troviĝi en ĝi, ĝi havas la rajton plibonigi kaj ŝanĝi, dum en lingvo natura pri nenio simila povas esti parolo, ĉar tiam lingvo natura transformiĝus jam en artan.

Krom la analizitaj de ni du grandegaj plibonaĵoj de lingvo arta (eksterordinara facileco kaj perfekteco), ekzistas ankoraŭ aliaj, pri kiuj ni ne parolos. Ni transiru nun rekte al la *malbonaĵoj* de lingvo arta. Kiu eĉ malmulte konatiĝis kun lingvo arta kaj havas sufiĉe da kuraĝo por kredi tion, kion li *vidas*, kaj ne kun fermitaj okuloj ripetadi fremdajn frazojn, tiu povas veni nur al unu konkludo, nome, ke mankojn en komparo kun lingvo natura lingvo arta posedas *neniajn*. Ĉiu el vi, vere, havis la okazon aŭdi tre multajn atakojn kontraŭ lingvo arta; sed kontraŭ ĉiuj tiuj ĉi atakoj ni povas rediri nur unu respondon: ĉiuj ili eliras el la buŝo de homoj, kiuj pri lingvo arta havas nenian scion kaj neniam ĝin eĉ vidis, – ne sole ne vidis kaj ne esploris, sed eĉ neniam logike enpensiĝis pri ĝia esenco, kaj anstataŭ ekpensi pri tio, kion ili parolas, preferas blinde ĵetadi dekstren kaj maldekstren laŭtajn kaj modajn sed sensencajn frazojn. Se ili nur iom konatiĝus kun lingvo arta, ili ekvidus, ke iliaj frazoj estas tute falsaj; se ili, eĉ tute ne konatiĝante kun la lingvo, simple ekpensus pri ĝi teorie, ili ekvidus, ke ĉiuj iliaj frazoj ne havas eĉ la plej malgrandan fundamenton. Se iu ekdeziros kredigi, ke en la najbara urbo ĉiuj domoj estas konstruitaj el papero kaj ke ĉiuj homoj tie estas sen manoj kaj sen piedoj, – li povas imponi per tio ĉi al la *amaso*, kiu ĉiun vorton elparolitan per aŭtoritata tono de scianto sankte kredas; sed homo *prudenta* jam de antaŭe rilatos al tiuj ĉi vortoj tre kritike, ĉar jam en sia saĝo

li trovos neniajn akcepteblajn fundamentojn por tiuj ĉi frazoj; kaj kiam ĉe li restos ia dubo, li simple iros en la najbaran urbon kaj *rigardos*, kaj tiam li konvinkiĝos, ke ĉiuj frazoj, kiujn li aŭdis, estas la plej absoluta sensencaĵo. Tiel estas ankaŭ kun lingvo arta: anstataŭ blinde ripetadi frazojn, vi bezonas nur simple *ekpensi* pri la esenco de tiuj ĉi frazoj, kaj vi jam komprenos, ke ili ne havas eĉ la plej malgrandan fundamenton; kaj se teoria pripenso estos por vi ankoraŭ nesufiĉa, tiam iru simple kaj *rigardu*, ĵetu okulon en lernolibron de lingvo arta, konatiĝu kun la konstruo de tiu ĉi lingvo, profundiĝu iom en ĝian jam tre riĉan kaj diversaspecan literaturon, faru ian provon, rigardu la *faktojn*, kiuj sur ĉiu paŝo sin trovas antaŭ via nazo, – kaj tiam vi komprenos, kia grandega sensencaĵo sin trovas en ĉiuj tiuj frazoj, kiujn vi aŭdadis kontraŭ lingvo arta. Vi aŭdis ekzemple frazon "lingvo ne povas esti kreita en kabineto, kiel viva ekzistaĵo ne povas esti kreita en la retorto de ĥemiisto"; tiu ĉi frazo sonas tiel bele kaj "saĝe", ke por la grandega plimulto da homoj ĝi jam lasas nenian dubon pri tio, ke lingvo arta estas infanaĵo. Kaj tamen se tiuj ĉi homoj havus tiom da propra kritika kapablo, por meti malgrandan, tre malgrandan demandon "Kial?" – tiam tiu ĉi laŭta frazo per unu fojo perdus en iliaj okuloj ĉian sencon, ĉar ili ekvidus, ke nenia logika respondo ekzistas, ke tiu ĉi frazo estas bele sonanta kolekto da vortoj, kiu ne havas eĉ la plej malgrandan logikan fundamenton. Tute tian saman frazon oni ja povus uzi ankaŭ kontraŭ la arta alfabeto, kiun la homaro jam tiel longe uzas kun la plej granda utilo por si, kaj kontraŭ la arta veturado per helpo de vaporo aŭ velocipedo, kaj kontraŭ nia tuta arta civilizacio! Kaj tiun ĉi kaj similajn frazojn la homoj obstine ripetadas ĉiun fojon, kiam aperas ia nova utila ideo.... Ho, frazo, frazo, frazo, kiam vi ĉesos regi super la spiritoj de la homoj!

Vi aŭdis, ke arta lingvo estas ne ebla, ke en ĝi homoj ne komprenados unu alian, ke ĉiu popolo uzados ĝin alie, ke en ĝi oni nenion povas esprimi, k. t. p., k. t. p. Se ni turnos atenton, ke ĉio tio ĉi estas aferoj, kiujn ĉe plej malgranda dozo da honesteco kaj bona volo ĉiu povas facile praktike *trakontroli*, kaj ke ĉiuj tiuj ĉi frazistoj simple ne *volas* trakontroli tion, pri kio ili parolas kun tia aŭtoritata tono, sed pro la aplaŭdado de la amaso ili preferas fermi la okulojn kaj ĵetadi koton sur la aferon nur tial, ke ĝi estas nova kaj ankoraŭ ne moda, – tiam ĉiuj tiuj ĉi frazoj montriĝas jam ne sole ridindaj, sed rekte *indignigaj*. Anstataŭ blinde ĵetadi frazojn, iru kaj *rigardu*, – kaj tiam vi vidos, ke ĉiuj viaj vortoj estas simple senceremonia *mensogado*: vi ekvidos, ke en efektiveco lingvo arta fakte de longe *jam ekzistas*, ke homoj de la plej diversaj nacioj jam longe kun la plej granda utilo por si *uzas* ĝin, ke ili unu alian *komprenas bonege kaj plej precize*, kiel skribe, tiel ankaŭ buŝe; ke homoj de ĉiuj nacioj uzas ĝin ĉiuj *tute egale*; ĝia jam tre riĉa kaj diversaspeca literaturo montros al vi tute okulvideble, ke ĉiuj nuancoj de la homa penso kaj sento povas esti esprimitaj en ĝi en la plej bona maniero.... Anstataŭ blinde babiladi diversan teorian sensencaĵon, iru kaj rigardu la *faktojn*, la longe jam ekzistantajn, de ĉiu facile kontroleblajn sendubajn kaj nemalkonfeseblajn faktojn, – kaj tiam por vi restos nenia dubo pri tio, ke iaj

motivoj, parolantaj kontraŭ la enkonduko de lingvo arta en komunan uzadon, ekzistas absolute *neniaj*.

Ni revenu nun al tio, pri kio ni parolis en la komenco de tiu ĉi ĉapitro, t. e. ni prezentu al ni, ke kolektiĝis kongreso el reprezentantoj de ĉiuj plej gravaj regnoj, por elekti lingvon internacian. Ni rigardu, kian lingvon ili povas elekti. Ne malfacile estos pruvi, ke ilian elekton ni povas antaŭvidi ne sole kun tre granda *kredebleco*, sed eĉ kun plena *certeco* kaj precizeco.

El ĉio, kion ni supre diris pri la grandegaj plibonaĵoj de la lingvoj artaj en komparo kun la lingvoj naturaj, jam per si mem sekvus, ke esti elektita povas nur lingvo *arta*. Ni supozu tamen por unu minuto, ke la tuta kongreso malfeliĉe konsistos plene el la plej obstinaj rutinuloj kaj malamikoj de ĉio nova kaj ke al ili venos en la kapon la ideo pli bone elekti ian en ĉiuj rilatoj maloportunan lingvon *naturan*, ol centoble pli oportunan lingvon artan. Ni rigardu, kio tiam estos. Se ili ekdeziros elekti ian lingvon vivantan de ia el la ekzistantaj nacioj, tiam kiel grandega malhelpo tie ĉi aperos ne sole la reciproka envio de la popoloj, sed ankaŭ la tute natura timo de ĉiu nacio jam simple pro sia ekzistado: ĉar estas afero tute komprenebla, ke tiu popolo, kies lingvo estos elektita kiel internacia, baldaŭ ricevos tian grandegan superforton super ĉiuj aliaj popoloj, ke ĝi ilin simple dispremos kaj englutos. Sed ni supozu, ke la delegatoj de la kongreso jam tute ne atentos tion ĉi, aŭ ke ili, por eviti reciprokan envion kaj engluton, elektos ian lingvon *mortintan*, ekzemple la latinan, – kio do tiam estos? Estos tre simple tio, ke la decido de la kongreso restos simple *malviva litero* kaj fakte *neniam atingos efektiviĝon*. Ĉiu lingvo natura, kiel viva, tiel ankoraŭ pli mortinta, estas tiel terure malfacila, ke la almenaŭ iom fonda ellernado de ĝi estas ebla nur por personoj, kiuj posedas grandan kvanton da libera tempo kaj grandajn monajn rimedojn. Ni havus sekve ne lingvon internacian en la vera senco de tiu ĉi vorto, sed nur lingvon internacian por *la pli altaj klasoj de la societo*. Ke la afero starus tiel kaj ne alie, tion ĉi montras al ni ne sole la logiko, sed tion ĉi jam longe okulvideble montris al ni *la vivo mem*: en efektiveco la lingvo latina estas ja de longe jam elektita de ĉiuj registaroj kiel internacia, kaj jam longe en la gimnazioj en ĉiuj landoj laŭ ordono de la registaroj la junularo devigite dediĉas tutan vicon da jaroj al la ellernado de tiu ĉi lingvo, – kaj tamen ĉu ekzistas multe da homoj, kiuj libere posedas la lingvon latinan? La decido de la kongreso sekve donus al ni nenion novan, sed aperus nur kiel sencela kaj senfrukta ripeto de tiu decido, kiu longe jam estas farita kaj eĉ efektivigita, sed sen ia rezultato. En nia tempo nenia decido eĉ de plej aŭtoritata kongreso iam povas jam doni al la lingvo latina tiun forton, kiun ĝi havis en la mezaj centjaroj: tiam ne sole por ĝia internacieco, sed eĉ por ĝia absoluta reĝado unuanime staris ĉiuj registaroj, la tuta societo, la tuta ĉiopova eklezio, kaj eĉ la vivo mem, tiam ĝi prezentis la fundamenton de ĉia scienco kaj de ĉia scio, tiam al ĝi estis dediĉata la pli granda parto de la vivo, ĝi elpuŝis per si ĉiujn lingvojn patrajn, ĝi estis ellernata kaj prilaborata *devigite*, jam simple pro tio, ke en siaj patraj lingvoj la instruituloj simple ne havis la *eblon*

esprimadi sin, – kaj tamen malgraŭ ĉio la lingvo ne sole falis, sed eĉ en sia plej bona tempo ĝi estis kaj povis esti nur apartenaĵo de la *elektitaj klasoj* de la societo! Dume en okazo de elekto de lingvo *arta* ĝin post kelke da monatoj povus bonege posedi jam per unu fojo la tuta mondo, *ĉiuj* sferoj de la homa societo, ne sole la inteligentaj kaj riĉaj, sed eĉ la plej malriĉaj kaj senkleraj vilaĝanoj.

Vi vidas sekve, ke la estonta kongreso tute *ne povas* elekti ian alian lingvon krom lingvo arta. Elekti ian lingvon naturan, kiam ni havas la eblon elekti lingvon artan, kiu havas antaŭ la lingvoj naturaj en ĉiuj rilatoj senduban kaj okulvideblan grandegan plibonecon, estas tia sama malsaĝaĵo, kiel ekzemple sendi ion el Parizo Peterburgon per ĉevaloj, kiam ni havas la eblon fari tion ĉi per fervojo. Nenia kongreso povas fari tian elekton; sed se ni eĉ supozus, ke la kongreso tiom malmulte pripensos kaj estos tiel blindigita per la rutinaj kutimoj, ke ĝi tamen faros tian absurdan elekton, tiu ĉi elekto per la forto de la cirkonstancoj tute egale restos malviva litero, kaj en la vivo la demando pri lingvo internacia fakte restos nesolvita tiel longe, ĝis pli aŭ malpli frue kolektiĝos nova kongreso kaj elektos lingvon artan.

Tiel ni petas vin noti al vi en la memoro tiun konkludon, al kiu ni venis, nome: *lingvo internacia de la venontaj generacioj estos sole kaj nepre nur lingvo arta.*

6

Nun restas ankoraŭ solvi la demandon, *kia* nome arta lingvo estos enkondukita en komunan uzadon. En la unua minuto ŝajnas, ke respondi tiun ĉi demandon ekzistas nenia eblo, ĉar – kiel vi sendube diros – "da lingvoj artaj ekzistas ja tre multe kaj ilia nombro povas esti ankoraŭ mil fojojn pli granda, ĉar ĉiu aparta homo povas krei apartan lingvon artan laŭ sia arbitro". Ĉu ekzistas tial ia eblo antaŭvidi, kiu el ili estos elektita? Tiel efektive ŝajnas de la unua rigardo al la homoj ne konantaj la aferon, kaj tamen antaŭvidi kaj antaŭdiri, kia lingvo arta estos elektita, estas tre facile. Tio ĉi venas de tio, ke la supre dirita en la publiko tre populara opinio pri la nombro de la ekzistantaj kaj povantaj ankoraŭ aperi lingvoj artaj estas tute erara kaj estas fondita sur plena nesciado de la historio kaj esenco de la artaj lingvoj.

Antaŭ ĉio ni konstatas la fakton, ke, malgraŭ la grandega nombro da personoj, kiuj laboris aŭ laboras super lingvoj artaj jam en la daŭro de 200 jaroj, ĝis nun aperis sole nur *du* efektive pretaj lingvoj, nome *Volapük* kaj *Esperanto*. Turnu atenton sur tion ĉi: sole nur *du* artaj lingvoj. Estas vero, ke vi preskaŭ ĉiutage legas en la gazetoj, ke jen tie jen aliloke aperis ankoraŭ unu aŭ ankoraŭ kelkaj artaj lingvoj, oni citas al vi ilian nomon, oni donas al vi ofte eĉ notojn pri la konstruo de tiuj ĉi lingvoj, oni alportas al vi kelkajn frazojn en tiuj ĉi tiel nomataj novaj lingvoj, kaj al la publiko ŝajnas, ke novaj artaj lingvoj elkreskadas kiel fungoj post pluvo. Sed tiu ĉi opinio estas tute erara kaj venas de tio, ke la gazetoj ne trovas necesa eniĝi en tion, pri kio ili skribas, kaj kontentiĝas nur per tio, ke ili havas la eblon regali la legantojn per ridinda novaĵo aŭ fari spritaĵon. Sciu do,

ke ĉio tio, kio ĉiutage estas alportata al vi de la gazetoj sub la laŭta nomo de "novaj lingvoj internaciaj", estas nur *projektoj*, en rapideco kaj sen sufiĉa pripenso elbakitaj projektoj, kiuj de realiĝo staras ankoraŭ tre kaj tre malproksime. Tiuj ĉi projektoj aperas jen en formo de mallongaj folietoj, jen eĉ en la formo de dikaj libroj kun la plej laŭtaj kaj multepromesaj frazoj, – aperas kaj tuj malaperas de la horizonto, kaj vi jam plu neniam aŭdas ion pri ili; kiam la aŭtoroj de tiuj ĉi projektoj alpaŝas al ilia *realigado*, ili tuj konvinkiĝas, ke tio ĉi estas tute ne laŭ iliaj fortoj kaj ke tio, kio en teorio ŝajnis afero tiel facila, en la praktiko montriĝas tre malfacila kaj neplenumebla. Kial la efektivigo de tiuj ĉi projektoj estas tiel malfacila kaj tial ĝis hodiaŭ aperis sole nur du efektive pretaj kaj vivipovaj lingvoj – pri tio ni parolos malsupre, kaj dume ni nur turnas vian atenton sur tion, ke da lingvoj artaj ĝis nun ekzistas sole nur du kaj ke sekve se la kongreso hodiaŭ efektiviĝus, ĝi el la jam ekzistantaj artaj lingvoj havus por elekto nur du. La problemo de la kongreso estus sekve jam tute ne tiel malfacila, kiel povus ŝajni de la unua rigardo. *Kian* el tiuj ĉi du lingvoj elekti – la kongreso ankaŭ ne ŝanceliĝus eĉ unu minuton, ĉar la vivo mem jam longe solvis tiun ĉi demandon en la plej senduba maniero kaj Volapük ĉie estas jam elpuŝita de la lingvo Esperanto. La pliboneco de Esperanto antaŭ Volapük estas tiel frapante granda, ke ĝi falas al ĉiu en la okulojn tuj de la unua rigardo kaj ne estas malkonfesata eĉ de la plej fervoraj Volapükistoj. Estos sufiĉe, se ni diros al vi la jenon: Volapük aperis tiam, kiam la entuziasmo de la publiko por la nova ideo estis ankoraŭ tute freŝa, kaj Esperanto, dank' al financaj malfacilaĵoj de la aŭtoro, aperis antaŭ la publiko kelkajn jarojn pli malfrue kaj renkontis jam ĉie pretajn malamikojn; la Volapükistoj havis por sia agitado grandajn rimedojn kaj agadis per la plej vasta, pure Amerika reklamo, kaj la Esperantistoj agadis la tutan tempon preskaŭ tute sen iaj materialaj rimedoj kaj montradis en sia agado grandegan nelertecon kaj senhelpecon; kaj malgraŭ ĉio, de la unua momento de la apero de Esperanto ni vidas grandegan multon da Volapükistoj, kiuj transiris malkaŝe al Esperanto, kaj ankoraŭ pli grandan multon da tiaj, kiuj, konsciante, ke Volapük staras multe pli malalte ol Esperanto, sed ne dezirante montri sin venkitaj, tute defalis de la ideo de lingvo internacia entute, – dume en la tuta tempo de ekzistado de Esperanto (13 jaroj) nenie sur la tuta tera globo troviĝis eĉ unu persono, – ni ripetas, eĉ *unu* – kiu transirus de Esperanto al Volapük! Dum Esperanto, malgraŭ la grandegaj malfacilaĵoj, kun kiuj ĝi devas batali, daŭre vivas kaj floras kaj konstante plifortiĝas, Volapük jam longe estas forlasita preskaŭ de ĉiuj kaj povas esti nomata jam de longe mortinta.

En kio konsistas la pliboneco de Esperanto antaŭ Volapük, ni ne povas kompreneble analizi tie ĉi tute detale: pro ekzemple ni montros nur kelkajn punktojn: (1) Dum Volapük sonas tre sovaĝe kaj maldelikate, Esperanto estas plena je harmonio kaj estetiko kaj memorigas per si la lingvon italan. (2) Eĉ por tute neinstruitaj Esperanto estas multe pli facila ol Volapük, sed por instruitaj ĝi estas tre multe pli facila, ĉar ĝiaj vortoj – krom kelkaj tre malmultaj – ne estas

arbitre elpensitaj, sed prenitaj el la lingvoj romana-germanaj en tia formo, ke ĉiu ilin facile rekonas. Tial ĉiu iom civilizita homo jam post kelkaj horoj da lernado povas libere legi ĉian verkon en Esperanto jam preskaŭ tute sen vortaro. (3) Dum la uzanto de Volapük nepre devas ĝin konstante *ripetadi*, ĉar alie li ĝin baldaŭ forgesas (dank' al la plena elpensiteco de la vortoj), la uzanto de Esperanto, unu fojon ĝin ellerninte, jam ĝin ne forgesas, se li eĉ longan tempon ĝin ne uzas. (4) Esperanto jam en la komenco estas tre facila por buŝa *interparolado*, dum en Volapük oni devas tre longe kaj pacience ekzercadi sian orelon, ĝis oni alkutimiĝas al klara diferencigado de la multaj reciproke tre simile sonantaj vortoj (ekzemple "bap, pab, pap, päp, pep, pöp, peb, böb, bob, pop, pup, bub, pub, püb, bib, pip, püp" k. t. p., kiuj fariĝas ankoraŭ pli similaj inter si, se oni prenas ilin en la multenombro, t. e. kun *s* en la fino). (5) En Volapük, dank' al kelkaj fundamentaj eraroj en la principoj de la konstruo (ekzemple: vokaloj en la komenco aŭ fino de vorto ne povas esti uzataj, ĉar ili estas signoj gramatikaj), ĉiu nove bezonata vorto nepre devas esti *kreita* de la aŭtoro (eĉ ĉiuj nomoj *propraj*, ekzemple Ameriko = Melop, Anglujo = Nelij). Tio ĉi ne sole donas grandegan nombron da tute superfluaj vortoj por lernado, sed faras ĉian disvolviĝan paŝon de la lingvo ĉiam dependa de ĝia aŭtoro aŭ de ia ordonanta Akademio. Dume en Esperanto, dank' al la plena seninflueco de la gramatiko sur la vortaron kaj dank' al la regulo, ke ĉiuj vortoj "fremdaj", kiuj jam de si mem estas internaciaj, estas uzataj senŝanĝe egale kiel en la aliaj lingvoj, – ne sole grandega multo da vortoj fariĝas tute senbezona por lernado, sed la lingvo ricevas la eblon disvolviĝadi eterne ĉiam pli kaj pli, sen ia dependo de la aŭtoro aŭ de ia Akademio.

Parolante pri la pliboneco de Esperanto antaŭ Volapük, ni tute ne intencas per tio ĉi malgrandigi la meritojn de la elpensinto de Volapük. La meritoj de Schleyer estas grandegaj, kaj lia nomo ĉiam staros sur la plej honora loko en la historio de la ideo de lingvo internacia. Ni volis nur montri, ke se hodiaŭ efektiviĝus kongreso por la elekto de lingvo internacia, tiam ĝi inter la ambaŭ nun ekzistantaj lingvoj artaj ne povus ŝanceliĝi eĉ unu minuton.

Ni pruvis sekve, ke se hodiaŭ efektiviĝus kongreso por la elekto de lingvo internacia, tiam malgraŭ la grandega nombro da ekzistantaj lingvoj ni povus jam *nun* kun plena certeco kaj precizeco antaŭvidi, *kian* lingvon ĝi elektos, nome: el ĉiuj ekzistantaj lingvoj vivaj, mortintaj kaj artaj la kongreso povas elekti sole nur *unu* lingvon: *Esperanto*. Kia ajn estus la konsisto de la kongreso, kiaj ajn estus la politikaj kondiĉoj, je kiaj ajn konsideroj, antaŭjuĝoj, simpatioj aŭ antipatioj la kongreso sin gvidus, ĝi absolute *ne povus* elekti ian alian lingvon krom Esperanto, ĉar por la rolo de lingvo internacia Esperanto estas nun la *sola* kandidato en la tuta mondo, la sola, tute sen iaj konkurantoj. Ĉar eĉ ĉe la plej malprospera konsisto de la kongreso en ĝi tamen sidos homoj pensantaj, kaj la grandega pliboneco de la lingvo Esperanto antaŭ ĉiuj aliaj lingvoj tro forte falas en la okulojn al ĉiu, kiu almenaŭ iom konatiĝis kun tiu ĉi lingvo, tial estas tute ne eble supozi, ke la kongreso elektos ian alian lingvon. Se tamen, kontraŭ ĉia

atendo, la kongreso estos tiom blindigita, ke ĝi ekdeziros ian alian lingvon, tiam – kiel ni pruvis supre – la *vivo mem* zorgos pri tio, ke la decido de la kongreso restu sole malviva litero, tiel longe, ĝis kolektiĝos nova kongreso kaj faros elekton ĝustan.

7

Nun restas al ni respondi ankoraŭ unu lastan demandon, nome: En la *nuna* minuto Esperanto, vere, aperas kiel *sola* kandidato por lingvo internacia; sed ĉar kongreso de reprezentantoj de diversaj regnoj por la elekto de lingvo internacia efektiviĝos kredeble ankoraŭ ne baldaŭ, eble post dek kaj eble post cent jaroj, tre povas ja esti, ke ĝis tiu tempo aperos multaj *novaj* artaj lingvoj, kiuj staros multe pli alte ol Esperanto, kaj sekve unu el *ili* devos esti elektita de la kongreso? Aŭ eble la kongreso mem aranĝos kompetentan komitaton, kiu okupos sin je la kreo de nova arta lingvo?

Je tio ĉi ni povas respondi jenon. La ebleco de apero de nova lingvo per si mem estas tre duba, kaj komisii al komitato la kreadon de nova lingvo estus tiel same sensence, kiel ekzemple komisii al komitato verki bonan poemon. Ĉar la kreado de plena, en ĉiuj rilatoj taŭga kaj vivipova lingvo, kiu al multaj ŝajnas tia facila kaj ŝerca afero, en efektiveco estas afero tre kaj tre malfacila. Ĝi postulas de unu flanko specialan talenton kaj inspiron, kaj de la dua flanko grandegan energion, paciencon kaj varmegan, senfine aldonitan amon al la entreprenita afero. Multajn niaj vortoj tre mirigos, ĉar ŝajnas al ili, ke oni bezonas nur decidi al si, ke tablo ekzemple estos "bam", seĝo estos "bim" k. t. p., k. t. p., kaj lingvo jam estos preta. Kun la kreado de pleneca, taŭga kaj vivipova lingvo estas tute tiel same, kiel ekzemple kun la ludado sur fortepiano aŭ kun la trairado de densega arbaro. Al homo, kiu ne konas la esencon de muziko, ŝajnas, ke nenio estas pli facila, ol ludi fortepianon, – oni ja bezonas nur ekfrapi unu klavon, kaj estos ricevita tono, vi ekfrapos alian klavon, kaj vi ricevos alian tonon, – vi frapados en la daŭro de tuta horo diversajn klavojn, kaj vi ricevos tutan kompozicion... ŝajnas, ke nenio estas pli facila; sed kiam li komencas ludi sian improvizitan kompozicion, ĉiuj kun ridego diskuras, kaj eĉ li mem, aŭdante la ricevatajn de li sovaĝajn sonojn, baldaŭ komencos komprenetadi, ke la afero iel estas ne glata, ke muziko ne konsistas en sola frapado de klavoj, – kaj tiu heroo, kiu kun tia memfida mieno sidiĝis antaŭ la forepiano, fanfaronante, ke li ludos pli bone ol ĉiuj, kun honto forkuras kaj jam plu ne montras sin antaŭ la publiko. Al homo, kiu neniam estis en granda arbaro, ŝajnas, ke nenio estas pli facila, ol trairi arbaron de unu fino ĝis la dua: "kio artifika tie ĉi estas? ĉiu infano ja povas tion ĉi fari: oni bezonas nur eniri, iri ĉiam rekte antaŭen, – kaj post kelke da horoj aŭ post kelke da tagoj vi trovos vin en la kontraŭa fino de la arbaro". Sed apenaŭ li eniris iom en la profundaĵon de la arbaro, li baldaŭ tiel perdas la vojon, ke li aŭ tute ne povas elrampi el la arbaro, aŭ post longa vagado li eliras, sed tute, tute ne en tiu loko, kie li eliri devis. Tiel estas ankaŭ kun arta lingvo: *entrepreni* la kreadon de lingvo,

doni al ĝi jam antaŭe nomon, trumpeti pri ĝi al la leganta mondo – ĉio tio ĉi estas tre facila, – sed feliĉe *fini* tiun ĉi laboron estas tute ne tiel facile. Kun memfida mieno multaj entreprenas tian laboron; sed apenaŭ ili iom enprofundiĝis en ĝin, ili aŭ ricevas senordan kolekton da sonoj sen ia difinita plano kaj sen ia indo, aŭ ili puŝiĝas je tiom da malhelpoj, je tiom da reciproke kontraŭparolantaj postuloj, ke ili perdas ĉian paciencon, ĵetas la laboron kaj jam plu ne montras sin antaŭ la publiko.

Ke la kreado de taŭga kaj vivipova lingvo ne estas tiel facila afero, kiel al multaj ŝajnas, oni povas interalie la plej bone vidi el la sekvanta fakto: oni scias, ke ĝis la apero de Volapük kaj Esperanto estis grandega multo da diversaj provoj krei artan lingvon internacian; ne malmulte da provoj aperis ankaŭ post la apero de la diritaj du lingvoj; grandegan serion da nomoj de tiuj ĉi provoj kaj iliaj aŭtoroj vi trovos en ĉia historio de la ideo de lingvo internacia; tiuj ĉi provoj estis farataj kiel de privataj personoj, tiel ankaŭ de tutaj societoj; ili englutis grandegan multon da laboroj, kaj kelkaj el ili englutis ankaŭ tre grandajn kapitalojn; – kaj tamen el tiu ĉi tuta grandega nombro nur *du*, sole nur *du* atingis efektiviĝon kaj trovis adeptojn kaj praktikan uzon! Sed ankaŭ tiuj ĉi du aperis nur *okaze*, dank' al tio, ke unu el la aŭtoroj ne sciis pri la laborado de la dua. La aŭtoro de la lingvo Esperanto, kiu dediĉis al sia ideo sian tutan vivon, komencante de la plej frua infaneco, kiu kun tiu ĉi ideo kunkreskiĝis kaj estis preta ĉion oferi al ĝi, konfesas mem, ke lian energion subtenadis nur tiu konscio, ke li kreas ion tian, kio ankoraŭ neniam ekzistis, kaj ke la malfacilaĵoj, kiujn li renkontadis en la daŭro de sia laborado, estis tiel grandaj kaj postulis tiom multe da pacienco, ke se Volapük estus aperinta 5-6 jarojn pli frue, kiam Esperanto ne estis ankoraŭ finita, li (la aŭtoro de Esperanto) certe perdus la paciencon kaj rifuzus la pluan laboradon super sia lingvo, malgraŭ ke li tute bone konsciis la grandegan plibonecon de sia lingvo antaŭ Volapük.

El ĉio supredirita vi komprenos, ke nun, kiam la tuta mondo scias, ke du tute plenaj artaj lingvoj jam longe ekzistas, estas tre dube, ke troviĝu iu, kiu entreprenus nun similan Sizifan laboron de la komenco kaj havus sufiĉe da energio, por alkonduki ĝin al feliĉa fino, tiom pli, ke lin ne vigligus la espero doni iam ion pli bonan ol tio, kio jam ekzistas. Kiom malmulte da espero havus tia entreprenanto, oni vidas la plej bone el tiuj tre multaj provoj kaj projektoj, kiuj aperis post Esperanto: malgraŭ ke la aŭtoroj havis antaŭ si jam tute pretan modelon, laŭ kiu ili povis labori, ne sole nenia el tiuj ĉi provoj eliris el la regiono de projektoj, sed eĉ jam el tiuj ĉi projektoj mem oni klare vidas, ke se iliaj aŭtoroj havus la paciencon kaj povon alkonduki ilin ĝis fino, tiuj ĉi laboroj prezentiĝus ne pli bone, sed kontraŭe, multe *malpli bone* ol Esperanto. Dum Esperanto bonege kontentigas *ĉiujn* postulojn, kiuj povas esti farataj al lingvo internacia (eksterordinara facileco, precizeco, riĉeco, natureco, vivipoveco, fleksebleco, sonoreco k. t. p.), ĉiu el tiuj projektoj penas plibonigi *unu* ian flankon de la lingvo, oferante por tio ĉi kontraŭvole ĉiujn *aliajn* flankojn. Tiel ekzemple multaj

el la plej novaj projektistoj uzas la sekvantan ruzaĵon: sciante, ke la publiko taksos ĉiun projekton konforme al tio, kiel al ĝi rilatos la instruitaj *lingvistoj*, ili zorgas ne pri tio, ke ilia projekto estu efektive taŭga por io en la praktiko, sed nur pri tio, ke ĝi en la unua minuto faru bonan impreson sur la lingvistojn; por tio ili prenas siajn vortojn preskaŭ tute sen ia ŝanĝo el la plej gravaj jam *ekzistantaj* lingvoj naturaj. Ricevinte frazon skribitan en tia projektita lingvo, la lingvistoj rimarkas, ke ili per la unua fojo komprenis tiun ĉi frazon multe pli facile ol en Esperanto, – kaj la projektistoj jam triumfas kaj anoncas, ke ilia "lingvo" (se ili iam finos ĝin) estos *pli bona* ol Esperanto. Sed ĉiu prudenta homo tuj konvinkiĝas, ke tio ĉi estas nur *iluzio*, ke al la *malgrava* principo, elmetita pro montro kaj allogo, tie ĉi estas oferitaj la principoj plej *gravaj* (kiel ekzemple la facileco de la lingvo por la nekleruloj, fleksebleco, riĉeco, precizeco k. t. p.), kaj ke se simila lingvo eĉ povus esti iam finita, ĝi en la fino absolute nenion donus! Ĉar se la plej grava merito de lingvo internacia konsistus en tio, ke ĝi kiel eble plej facile estu tuj komprenata de la instruitaj *lingvistoj*, ni ja por tio ĉi povus simple preni ian lingvon, ekzemple la latinan, *tute sen iaj ŝanĝoj*, – kaj la instruitaj lingvistoj ĝin ankoraŭ pli facile komprenos per la unua fojo! La principo de kiel eble plej malgranda ŝanĝado de la naturaj vortoj ne sole estis bone konata al la aŭtoro de la lingvo Esperanto, sed ĝuste de *li* la novaj projektistoj ja prenis tiun ĉi principon: sed dum Esperanto prudente kontentigas tiun ĉi principon *laŭ mezuro de ebleco*, penante plej zorge, ke ĝi ne kontraŭagadu al aliaj *pli gravaj* principoj de lingvo internacia, la projektistoj turnas la tutan atenton *nur* sur tiun ĉi principon, kaj ĉion alian, nekompareble pli gravan, ili fordonas kiel oferon, ĉar kunigi kaj konsentigi inter si *diversajn* principojn ili ne povas kaj eĉ ne havas deziron, ĉar ili eĉ mem ne esperas doni ion pretan kaj taŭgan, sed ili volas nur fari efekton.

El ĉio supredirita vi vidas, ke ne ekzistas eĉ la plej malgranda kaŭzo por timi, ke aperus ia nova lingvo, kiu elpuŝus Esperanton, – tiun lingvon, en kiun estas enmetita tiom da talento, tiom da oferoj kaj tiom da jaroj da pacienca kaj varmege aldonita laboro, la lingvon, kiu en la daŭro de multaj jaroj estas jam elprovita en ĉiuj rilatoj kaj en la praktiko tiel bonege plenumas ĉion tion, kion ni povas atendi de lingvo internacia. Sed por vi, estimataj aŭskultantoj, tio ĉi estas ne sufiĉa: vi deziras, ke ni donu al vi plenan kaj senduban logikan *certecon* pri tio, ke la lingvo Esperanto ne havos konkurantojn. Feliĉe ni trovas nin en tia situacio, ke ni povas doni al vi tiun ĉi plenan certecon.

Se la tuta esenco de lingvo arta konsistus en ĝia *gramatiko*, tiam de la momento de la apero de Volapük la demando de lingvo internacia estus solvita por ĉiam, kaj iaj konkurantoj al la lingvo Volapük aperi jam ne povus; ĉar malgraŭ diversaj eraroj la gramatiko de Volapük estas tiel facila kaj tiel simpla, ke doni ion multe pli facilan kaj pli simplan oni jam ne povus. Lingvo nova povus diferenci de Volapük nur per kelkaj *bagateloj*, kaj ĉiu komprenas, ke pro *bagateloj* neniu entreprenus la kreadon de nova lingvo, kaj la mondo pro

bagateloj ne rifuzus la jam tute pretan kaj elprovitan lingvon. En la ekstrema okazo la estonta akademio aŭ kongreso farus en la Volapüka gramatiko tiujn negrandajn ŝanĝojn, kiuj montriĝus utilaj, kaj lingvo internacia sen ia dubo restus Volapük, kaj ĉia konkurado estus por ĉiam esceptita. Sed lingvo konsistas ne sole el gramatiko, sed ankaŭ el *vortaro*, kaj la ellernado de la vortaro postulas en lingvo arta cent fojojn pli da tempo, ol la ellernado de la gramatiko. Dume Volapük solvis *nur* la demandon de la gramatiko, kaj la vortaron ĝi lasis tute sen atento, doninte simple tutan kolekton da diversaj elpensitaj vortoj, kiujn ĉiu nova aŭtoro havus la rajton elpensi al si laŭ sia propra deziro. Jen kial jam en la komenco mem de la ekzistado de Volapük eĉ la plej fervoraj Volapükistoj nature timis, ke morgaŭ aperos nova lingvo, tute ne simila je Volapük, kaj inter la ambaŭ lingvoj komenciĝos batalado. Tute alia afero estas kun Esperanto: oni scias – kaj tion ĉi eĉ por unu minuto nenia esploranto neas, – ke Esperanto solvis ne sole la demandon de la gramatiko, sed ankaŭ la demandon de la *vortaro*, sekve ne unu *malgrandan parton* de la problemo, sed la *tutan* problemon. Kio do en tia okazo restis por fari al la aŭtoro de ia nova lingvo, se tia iam aperus? Al li restus jam nenio ol... eltrovi la jam eltrovitan Amerikon! Ni prezentu al ni efektive, ke nun, malgraŭ la jam ekzistanta, bonega en ĉiuj rilatoj, ĉiuflanke elprovita, havanta jam multegon da adeptoj kaj vastan literaturon lingvo Esperanto, aperis tamen homo, kiu decidis dediĉi tutan serion da jaroj al la kreado de nova lingvo, ke li sukcesis alkonduki sian laboron ĝis la fino kaj ke la lingvo proponita de li montriĝas efektive pli bona ol Esperanto, – ni rigardu do, kian vidon havus tiu ĉi lingvo. Se la gramatiko de la lingvo Esperanto, kiu donas plenan eblon esprimi en la plej preciza maniero ĉiujn nuancojn de la homa penso, konsistas tute el 16 malgrandaj reguletoj kaj povas esti ellernita en duono da horo, – tiam kion la nova aŭtoro povus doni pli bonan? En ekstrema okazo li donus eble anstataŭ 16 reguloj 15 kaj anstataŭ 30 minutoj da laborado postulus 25 minutojn? Ĉu ne vere? Sed ĉu deziros iu pro tio ĉi krei novan lingvon, kaj ĉu la mondo pro tia bagatelo rifuzos la jam ekzistantan kaj ĉiuflanke elprovitan? Sendube ne; en ekstrema okazo la mondo diros: "Se en via gramatiko ia bagatelo estas pli bona ol en Esperanto, ni tiun ĉi bagatelon enkondukos en Esperanton, kaj la afero estos finita". Kia estos la vortaro de tiu ĉi lingvo? En la nuna tempo nenia esploranto jam dubas, ke la vortaro de lingvo internacia ne povas konsisti el vortoj arbitre elpensitaj, sed devas konsisti nepre el vortoj romana-germanaj en ilia plej komune uzata formo; tio ĉi estas ne por tio, ke – kiel opinias multaj pli novaj projektistoj – la instruitaj lingvistoj povu tuj kompreni tekston skribitan en tiu ĉi lingvo (en tia afero, kiel lingvo internacia, la instruitaj lingvistoj ludas la *lastan* rolon, ĉar por ili ja tia lingvo estas *malplej* bezona), sed pro aliaj, pli gravaj kaŭzoj. Tiel ekzemple ekzistas grandega nombro da vortoj tiel nomataj "fremdaj", kiuj en ĉiuj lingvoj estas uzataj egale kaj al ĉiuj estas konataj sen ellernado kaj kiujn ne uzi estus rekta absurdo; al ili unisone devas soni ankaŭ ĉiuj aliaj vortoj de la vortaro, ĉar alie la lingvo estus sovaĝa,

sur ĉiu paŝo estus kunpuŝiĝo de elementoj, malkompreniĝoj, kaj la konstanta regula riĉiĝado de la lingvo estus malfaciligita. Ekzistas ankoraŭ diversaj aliaj kaŭzoj, pro kiuj la vortaro devas esti kunmetita nur el tiaj vortoj, kaj ne el aliaj, sed pri tiuj ĉi kaŭzoj, kiel tro specialaj, ni tie ĉi detale ne parolos. Estos sufiĉe, se ni nur diros, ke ĉiuj plej novaj esplorantoj akceptas tiun ĉi leĝon por la vortaro kiel allasantan jam nenian dubon. Kaj ĉar la lingvo Esperanto ĝuste per tiu ĉi leĝo sin gvidis kaj ĉar ĉe tiu ĉi leĝo granda arbitro en la elekto de vortoj ekzisti ne povas, restas la demando, kion do povus al ni doni aŭtoro de *nova* lingvo, se tia estus kreita? Estas vero, ke al tiu aŭ alia vorto oni povus doni pli oportunan formon, – sed da tiaj vortoj ekzistas tre nemulte. Tion ĉi oni la plej bone vidas el tio, ke kian ajn el la multaj projektoj aperintaj post Esperanto vi prenus, vi trovos en ĉiu el ili almenaŭ 60% da vortoj, kiuj havas tute tiun saman formon, kiel en Esperanto. Kaj se vi al tio ĉi ankoraŭ aldonos, ke ankaŭ la restaj 40% da vortoj diferencas de la Esperanta formo pleje nur tial, ke la aŭtoroj de tiuj projektoj aŭ ne turnis atenton sur diversajn principojn, kiuj por lingvo internacia estas treege gravaj, aŭ simple ŝanĝis la vortojn tute sen ia bezono, – vi facile venos al la konkludo, ke la *efektiva* nombro da vortoj, al kiuj oni anstataŭ la formo Esperanta povus doni formon pli oportunan, prezentas ne pli ol iajn 10%. Sed se en la Esperanta gramatiko oni preskaŭ nenion povas ŝanĝi kaj en la vortaro oni povus ŝanĝi nur iajn 10% da vortoj, tiam estas la demando, kion do prezentus per si la *nova* lingvo, se ĝi iam estus kreita kaj se ĝi efektive montriĝus kiel lingvo taŭga en ĉiuj rilatoj? Tio ĉi estus ne nova lingvo, sed nur iom ŝanĝita lingvo Esperanto! Sekve la tuta demando pri la estonteco de la lingvo internacia alkondukiĝas nur al tio, ĉu Esperanto estos akceptita senŝanĝe en ĝia *nuna* formo, aŭ en ĝi estos faritaj iam iaj ŝanĝoj! Sed tiu ĉi demando por la Esperantistoj havas jam nenian signifon; ili protestas nur kontraŭ tio, se *apartaj* personoj volas ŝanĝi Esperanton laŭ sia bontrovo; sed se iam aŭtoritata kongreso aŭ akademio decidos fari en la lingvo tiajn aŭ aliajn ŝanĝojn, la Esperantistoj akceptos tion ĉi kun plezuro kaj nenion perdos de tio ĉi: ili ne bezonos tiam de la komenco ellerni ian novan malfacilan lingvon, sed ili bezonos nur oferi unu aŭ kelkajn tagojn por la ellerno de tiuj ŝanĝoj en la lingvo, kiuj estos faritaj, kaj la afero estos finita.

La Esperantistoj tute ne pretendas, ke ilia lingvo prezentas ion *tiom* perfektan, ke nenio pli alta jam povus ekzisti. Kontraŭe: kiam efektiviĝos aŭtoritata kongreso, pri kiu oni scios, ke ĝia decido havos *forton* por la mondo, la Esperantistoj *mem* proponos al ĝi difini komitaton, kiu okupus sin je la trarigardo de la lingvo kaj farus en ĝi ĉiujn utilajn plibonigojn, se eĉ por tio ĉi oni devus ŝanĝi la lingvon ĝis plena nerekonebleco; sed ĉar ekzistas nenia eblo antaŭvidi, ĉu tiu ĉi laboro entute sukcesos al la komitato, ĉu ĝi ne daŭros senfinan serion da jaroj, ĉu ĝi en konsenteco estos alkondukita al feliĉa fino, kaj ĉu la finita laboro en la praktiko montriĝos tute taŭga, sekve kompreneble estus tre malsaĝe kaj nepardoneble de la flanko de la komitato, se ĝi pro la problema *estontaĵo* rifuzus la faktan kaj en ĉiuj rilatoj finitan kaj elprovitan *nunaĵon*; sekve se eĉ la kongreso venus al la

konkludo, ke Esperanto ne estas bona, ĝi povus decidi nur la jenon: akcepti *dume* la lingvon Esperanto en ĝia nuna formo kaj *paralele* kun tio ĉi difini komitaton, kiu okupus sin je la perfektigo de tiu ĉi lingvo aŭ je la kreo de ia nova lingvo pli ideala; kaj nur tiam, kiam kun la tempo montriĝus, ke la laborado de la komitato estas feliĉe alkondukita al fino kaj post multaj provoj montriĝis tute taŭga, nur tiam oni povus anonci, ke la nuna formo de la lingvo internacia estas eksigata kaj anstataŭ ĝi eniras en la vivon la formo nova. Ĉiu prudenta homo konsentos, ke la kongreso povas agi nur tiel kaj ne alie. Sekve se ni eĉ supozos, ke fina lingvo de la estontaj generacioj estos ne Esperanto, sed ia alia ankoraŭ ellaborota lingvo, en ĉia okazo la vojo al tiu lingvo nepre devas konduki tra *Esperanto*.

Sekve resumante ĉion, kion ni diris de la komenco ĝis la nuna minuto, ni turnas vian atenton sur tion, ke ni venis al la sekvantaj konkludoj:

1. La enkonduko de lingvo internacia alportus al la homaro grandegan utilon;
2. La enkonduko de lingvo internacia estas tute ebla;
3. La enkonduko de lingvo internacia pli aŭ malpli frue nepre kaj sendube efektiviĝos, kiom ajn la rutinistoj batalus kontraŭ tio ĉi;
4. Kiel internacia neniam estos elektita ia alia lingvo krom arta;
5. Kiel internacia neniam estos elektita ia alia lingvo krom Esperanto; ĝi aŭ estos lasita por ĉiam en ĝia nuna formo, aŭ en ĝi estos poste faritaj iaj ŝanĝoj.

8

Kaj nun ni rigardu, kio sekvas el ĉio, kion ni supre diris. Unue sekvas tio, ke la Esperantistoj tute ne estas tiaj fantaziistoj, kiaj ili ŝajnas al multaj tiel nomataj "saĝaj" kaj "praktikaj" homoj, kiuj juĝas pri ĉio supraĵe kaj sen ia logika pripenso kaj mezuras ĉion per mezurilo de la modo. Ili batalas por afero, kiu ne sole havas grandegan gravecon por la homaro, sed kiu al tio havas en si nenion fantazian kaj kiu pli aŭ malpli frue *devas* efektiviĝi kaj *nepre* efektiviĝos, kiom ajn la inerciuloj batalus kontraŭ ĝi, kiom ajn la saĝuloj ŝercadus pri ĝi. Kiel estas sendube, ke post la nokto venas mateno, tiel sendube estas, ke post mallonga aŭ longa batalado Esperanto pli aŭ malpli frue estos enkondukita en komunan uzon por la komunikiĝoj internaciaj. Ni konfirmas tion ĉi kuraĝe ne tial, ke ni tiel volas, ke ni tion esperas, sed tial, ke la konkludoj de simpla logiko diras, ke tiel esti *devas* kaj ke *alie esti ne povas*. Longan tempon eble ankoraŭ la Esperantistoj devos bataladi, longan tempon eble ankoraŭ ĉia bubo ĵetados sur ilin ŝtonojn, koton kaj malsaĝajn spritaĵojn, sed tio, kio devas veni, pli aŭ malpli frue venos. La iniciatoroj de la Esperanta afero eble ne ĝisvivos ĝis tiu tempo, kiam fariĝos videblaj la fruktoj de ilia agado, ili iros eble en la tombon kun la malestima nomo de homoj, kiuj okupadis sin je infanaĵoj, sed pli aŭ malpli frue por la maldolĉa kaliko, kiun ili trinkas el la manoj de la samtempuloj, la posteuloj konstruos al ili monumentojn kaj elparolados ilian nomon kun la plej granda danko. Longe ankoraŭ eble ili ŝajnos al la mondo senfortaj, multajn fojojn eble ankoraŭ ilia afero ŝajnos al la mondo eĉ mortinta kaj je ĉiam enterigita – sed tiu ĉi afero jam

neniam mortos, ĉar ĝi morti jam *neniam povas*. La afero vivos kaj konstante rememorigados pri si; post ĉiu nova silenta tempo, se ĝi eĉ daŭrus dekon da jaroj, aperos nova reviglîĝo; kiam laciĝos unuj batalantoj, aperos pli aŭ malpli frue novaj energiaj batalantoj, kaj tiel la afero iros tiel longe, ĝis fine ĝi plene atingos sian celon. Ne malĝoju tial, Esperantistoj, se nesaĝaj homoj ironie rimarkas al vi, ke vi estas ankoraŭ tre malmultaj, ne perdu la kuraĝon, se via afero iras malrapide. La afero konsistas ne en rapideco, sed en certeco. Multe da sencelaj aferoj ekbrilis antaŭ la mondo rapide, sed ankaŭ rapide falis; afero bona kaj certa progresas ordinare malrapide kaj kun grandaj malhelpoj.

Sur la supre montritajn kvin konkludojn ni turnas apartan atenton de tiuj Esperantistoj, kiuj batalas por sia ideo *senkonscie* kaj tial ĉe la plej malgranda rimarko de la kontraŭuloj ekstaras senhelpe kaj ne scias, kion respondi, aŭ perdas la kuraĝon. Ĉiuj tiuj konkludoj prezentas produkton de la simpla kaj severa *logiko*. Tial se oni diras al vi "La mondo ne volas vian lingvon", respondu kuraĝe: "Ĉu la mondo volas aŭ ne volas, ĝi pli aŭ malpli frue *devos* akcepti ĝin, ĉar alie esti ne povas". Kiam vi aŭdos "Oni diras, ke aperis nova lingvo, oni diras, ke tia aŭ alia instruita societo aŭ kongreso deziras elekti tian aŭ alian lingvon aŭ krei novan lingvon", respondu kuraĝe: "Ĉiuj tiuj ĉi famoj aŭ entreprenoj estas fonditaj sur la plej absoluta nekomprenado de la esenco kaj historio de la ideo de lingvo internacia; tiaj provoj de la flanko ne sole de privataj personoj, sed ankaŭ de tutaj societoj ripetiĝis jam multajn fojojn kaj ĉiufoje finiĝadis kaj devis finiĝadi per la plej plena fiasko; lingvo internacia povas esti nur Esperanto, ĉar laŭ la leĝoj de la logiko kaj laŭ la esenco de la afero alie esti *neniel povas*".

Se oni diras al vi: "Tiu aŭ alia Esperantisto aŭ societo Esperantista en tro granda sed ne prudenta fervoro faris ian falsan paŝon kaj ridindigis aŭ diskreditigis per tio ĉi vian tutan aferon", tiam respondu: "La afero Esperanta dependas de nenia persono nek societo, kaj nenia homo per siaj privataj falsaj paŝoj povas havi ian influon sur ĝian sorton; eĉ la aŭtoro de Esperanto mem estas nun por Esperanto absolute seninflua, ĉar Esperanto jam longe fariĝis afero pure *publika*".

La dua, kio sekvas el ĉio, kion ni supre diris, estas la sekvanta: Se la elekto de lingvo internacia dependus de ia kongreso de reprezentantoj de diversaj regnoj, ni longe, tre longe kredeble devus tion ĉi atendi kaj neniu el ni ion povus fari por tio ĉi. Sed se, kiel ni vidis supre, oni jam nun povas kun plena certeco kaj precizeco antaŭvidi, al *kia* nome lingvo la sorto difinis fariĝi iam internacia, tiam la afero ŝanĝiĝas. Ni ne bezonas jam nun atendi kongresojn: la celo estas tute klara kaj ĉiu povas sin tiri al ĝi. Ne bezonante rigardadi, kion diras aŭ faras aliaj, ĉiu povas alporti sian ŝtonon por la kreskanta konstruo. Nenia ŝtono perdiĝos. Nenia laboranto tie ĉi dependas de la alia, ĉiu povas agadi aparte, en sia sfero, laŭ siaj fortoj, kaj ju pli da laborantoj estos, tiom pli rapide estos finita la granda konstruo. Precipe ni turnas nin al diversaj sciencaj societoj kaj kongresoj. Ne rigardante, kion faras aliaj, ne atendante, ke aliaj prenu sur sin la iniciativon, ĉiu

societo aŭ kongreso aparte decidu ion tian, kio alproksimigus la grandan komunehoman celon almenaŭ je unu paŝo.

*El **Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto**.*
Hachette, Parizo 1903, p. 268-316.

7
LA ESPERANTA MUZO

Por konatiĝi kun la plena vasta gamo de la originala poezio en Esperanto, oni sin turnu al *Esperanta antologio*. En ĉi tiu volumo mi limigis mian elekton al poemoj rekte inspiritaj de iu aŭ alia faceto de la esperantismo mem. Laŭ certa vidpunkto, tiajn poemojn oni rajtas rigardi, kiel la vere indiĝenajn versaĵojn de nia movado. Mi trovis, ke tiuj poemoj estas ĝenerale klaseblaj per kvar kategorioj: Majstro, Lingvo, Interna Ideo – kaj "Aliflanke", la satiraĵoj.

W. A.

Majstro

HO, MIA KOR'

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,
El mia brusto nun ne saltu for!
Jam teni min ne povas mi facile,
Ho, mia kor'!

brusto: la antaŭa parto de la homa korpo, de la kolo ĝis la ventro

Ho, mia kor'! Post longa laborado
Ĉu mi ne venkos en decida hor'!
Sufiĉe! trankviliĝu de l' batado,
Ho, mia kor'!

L. L. Zamenhof

MIA PENSO

Sur la kampo, for de l' mondo,
Antaŭ nokto de somero,
Amikino en la rondo
Kantas kanton pri l' espero.
Kaj pri vivo detruita
Ŝi rakontas kompatante, –
Mia vundo refrapita
Min doloras resangante.

"Ĉu vi dormas? Ho, sinjoro,
Kial tia senmoveco?
Ha, kredeble rememoro
El la kara infaneco?"
Kion diri? Ne ploranta
Povis esti parolado
Kun fraŭlino ripozanta
Post somera promenado!

Mia penso kaj turmento,
Kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
Al vi iris jam oferoj!
Kion havis mi plej karan –
La junecon – mi ploranta
Metis mem sur la altaron
De la devo ordonanta!

Fajron sentas mi interne,
Vivi ankaŭ mi deziras, –
Io pelas min eterne,
Se mi al gajuloj iras...
Se ne plaĉas al la sorto
Mia peno kaj laboro –
Venu tuj al mi la morto,
En espero – sen doloro!

L. L. Zamenhof

ZAMENHOFA BALADO

Kiam li antaŭ kvindek jaroj
L' Unuan Libron ekkaresis,
Kaj inter liaj okulharoj
Grandguta ĝojo-larmo mezis,
La Verk' por kiu li elspezis
Junaĝajn ĝojojn, staris brile –
Ekkanti al li tre necesis:
"Ho kor', ne batu maltrankvile!"

Kaj kiam, malgraŭ ĉiuj baroj,
L' afero kreskis kaj progresis,
Kaj la entuziasmaj aroj
Adeptaj en Bulonj' kongresis –
Mirakla sento lin impresis
Kaj krii volis li jubile—
(Sed gorĝsufoko ne permesis):
"Ho, kor', ne batu maltrankvile!"

Kaj en la tempo de l' amaroj,
Kiam la mondo murd-ekscesis,
El homa sango kreskis maroj,
Kaj jam esperoj ĉiuj ĉesis –
Al koro, kiu tiel pezis
En brust' spiranta malfacile,
La lastan peton li adresis:
"Ho kor', ne batu maltrankvile!"

Majstro! La mondo refrenezis,
Kaj nun alvokas ni simile,
Ĉar nin kruelaj vundoj lezis:
"Ho kor', ne batu maltrankvile!"

K. Kalocsay

LA MAJSTRO MORTIS

pia: sincere k ame respektoplena al Dio k religiaj aferoj

Ne estis mi tie,
preĝante plorpie,
katenis min sklave Siberio.
La famon ne brue,
nur poste, malfrue,
simile al eĥo de mortkrio
mallonga sciigo alportis:
"La Majstro mortis!"

Sed scias mi sente,
ke oni sensente
plezurojn pelante babiladis,
eĉ kiam plorante
la ĉerkon portante
amaso funebra trapaŝadis.
Mallonga sciigo alportis:
"La Majstro mortis!"

ĉerko: kesto en kiun oni metas la korpon de mortinto
funebro: malĝoja sento pro ies morto

Por ili, jen homo,
eĉ malpli – nur nomo
sin kaŝis por ĉiam en la ĉerko...

Por ni, funebrantoj,
por pacbatalantoj,
ĝi gardas kreinton de mondverko.
Mallonga sciigo alportis:
"La Majstro mortis!"

J. Baghy

NI LAŬDU LIN...

(Je la mortotago de Zamenhof)

Memora fest'... dolora fest'...
Funebre ni solenas...
Ho, flugis for la flam' de l' kor'
Kiun ni larme benas.

Nun nek kanon' kun tondra son',
Nek sonoriloj festas...
Nur batsonor' de nia kor'
Pri la solen' atestas.

sonori: estiĝi sonon daŭre sonantan post la ceso de ĝia kaŭzo.

En vasta mond' malgranda rond'
Ja estas ni, la fratoj,
Sed kun potenc' en sankta senc'
Kuniĝas la korbatoj.

Ho, kunsonor' de nia kor'!
Funebru la Benatan,
Per kies am', jen, flagra flam'
Kunfandis rondon fratan.

flagri: Eligi tien kaj reen rapide moviĝantan lumon.

Estingis sin la flam de l' sin',
Plu arde ĝi ne hardas,
Sed jen la Verk', ĝi malgraŭ ĉerk'
Kaj malgraŭ frostoj – ardas!

ardi: Esti varmega ĝis koloro ĝenerale ruĝa aŭ blanka.

Ĝin vartu ni, ho, ardu ĝi,
Ke el malgranda sfero
Post vintra frost' la Pentekost'
Alvenu sur la Tero,

varti: Gardi kaj prizorgi estulon, kiu bezonas helpon pro sia juneco, nefortikeco. → flegi

Kaj en kompren', eterna ben'
Fratiĝu mondo tuta...
Ni laŭdu Lin, ke aŭdu nin
Homaro surdemuta!

K. Kalocsay

ZAMENHOF

La buŝoj brule kraĉis sangajn vortojn,
la mond' flamiĝis, veis vana plend',
kaj blinde serĉis vojon l' orfa homo,
en fulmobril' mi vagis sen defend'.
Ĉifonoj pendis de la korpoj homaj,
inundo bruis, tondris roko-rompo;
sed mi kredis, frato: flugis
al la ter' kolombo.

Rifuĝis plore flampurpuraj nuboj,
fantomamaso min minacis, – plej
terure tomboj vomis ostomilon,
ekiris sorĉe, ŝvele la marĉej'.
Kredparkoj, sortoj dronis en la nokton,
Demon' draŝadis, falis tondra bombo,
sed mi vidis, frato: flugis
al la ter' kolombo.

Ho, vane hom' blasfemojn diras al mi,
ho, vane streĉas sin la sklava krim',
ho, vane tentas min ĉiel', tertremo,
bombardo, nubo ne teruras min.
Ho, vane mi kirliĝas en Kaoso,
ne murdas mi, ne servas mi por tombo;
diru kun mi, frato: – flugis
al la ter' kolombo!

F. Szilágyi

ZAMENHOF

Se ne sonos kant' majesta
por honoro de l' modesta
fervorulo senripoza
pro la verko grandioza,
kiun li amplene kreis,
kiu kreskis, ne pereis,
do almenaŭ vibru kore
vortoj mildaj rememore.

Bela estas la pilgrimo
en real' aŭ en animo
al la urbo Bjalistoko,
Zamenhofa naskiĝloko:
pense laŭ stratetoj vagi
kortuŝite kaj imagi
kiel iam knabo eta
kun animo malkvieta
laŭ stratetoj samaj paŝis
kaj esperoplene kaŝis
en la koro revon febran,
la sopiron nevenkeblan:
iam per kompreno ligi
la homkorojn kaj instigi
ilin, ĵeti for malamon,
ekbruligi sanktan flamon
de la amo intergenta.
Kaj la revo noblasenta
per la laborad' sekreta
de l' junulo oferpreta
iĝis, el la idealo,
efektivo kaj realo.
Kion havis li plej karan,
la junecon, li ploranta
metis mem sur la altaron
de la devo ordonanta.

Kaj nek monda opinio,
nek mokad', nek kalumnio,
nek la zorgoj de l' privata
vivo peza kaj malglata
povis lin plu ekŝanceli:

ho, li sciis sin oferi
senlamente kaj silente,
kaj plu daŭris diligente
lia streĉa laborado
pacience, kun obstino
kun la help' de kamarado
komprenema: la edzino.

Batis koro maltrankvile,
kiam fine venis, brile,
tago de la venk' plej frua:
la apero de l' Unua
Libro, ĉi rezulto rara
de persisto senkompara.

Kaj plu daŭris la laboro
ĝis malfrua nokta horo,
fluis el la plum' diversaj
tradukaĵoj prozaj, versaj
kiel lingva ortrezoro:
Hamlet kaj La Revizoro,
Marta kaj Ifigenio,
La Rabistoj, la Respondoj,
Andersen kaj la Biblio,
krome mar' da korespondo
kun la Esperanta mondo
kun konsiloj kaj klarigoj,
kun instruoj kaj instigoj,
kompreneme kaj modeste,
senintrige kaj honeste,
ĉiam noble en batalo
por la alta idealo.

Nin ekregas emocio
ĉe pensad' pri historio
de la tempoj plej malnovaj,
ĉe legad' de l' Zamenhofaj
paroladoj en kongresoj:
noblaj pensoj, saĝaj tezoj,
korvarmigaj, belesprimaj,
animlevaj kaj sentimaj,
kiuj de homamo brulas,
kiuj klare respegulas

lian indan personecon,
varman koron kaj bonecon.

Ja li estis homo bona
grandanima kaj sindona,
kun sopiro homfratiga,
homarane interliga,
kun persisto senkompara.

Majstro nia nobla, kara!
En tombejo Varsovia
ĉe tombaltaĵeto via
staras monument' modesta,
sed pli granda kaj majesta
ĉiam staru por memoro
en esperantista koro!

H. Dresen

LA OKULISTO

La okulisto skribis post noktmezo.
Kiam la homa gefrataro pacos?
Kia mistera manko, kia lezo
duonblindigas? Kiu ĝin kuracos?
Kaj kion povas fari unuopa
malriĉa homo por homar' miopa?

Flagoj, blazonoj, la koloroj krudaj,
larmigis; homo homon tuj mortbatis.
Blindaj homfratoj rusaj, polaj, judaj
palpis al ŝtonoj, klingoj. Strat' skarlatis.
La okulisto vidis vivoperdon,
deturnis sian kapon, vidis verdon.

Ruĝo lacigis la okulojn. Ili
nature volas vidi verdon. Sed
ŝajne ne scias kiel ektrankvili;
Ĉu malbenita estas la planed'?
Destino diktas: for esper'! Frenezo!
– La okulisto skribis post noktmezo.

Aspekto malimpona, eĉ ridinda;
malriĉa homo, sola, sen influo
en eminentaj rondoj; kaj la blinda
homar' ne pretis por la evoluo
al klara vido. Ĉio sangfetoris.
La okulisto sciis; kaj laboris.

Venis cenzuro. Venis stultaj ridoj.
La blinda homplimulto lin ignoris.
Venis disputoj akraj, kaj perfidoj
inter la vicoj. Daŭre li laboris.
Blinduloj blindan mondon gvidis ade;
tamen, vidantoj strebis jam, sporade.

La okulisto verkis kaj parolis,
tradukis, organizis. Kaj la skvamoj
de kelkaj okulparoj jam forfalis,
la antaŭjuĝoj, timoj kaj malamoj.
La okulisto mortis dummilite,
ne plenvenkinta, ne; sed ne venkite.

Kion izola homo povas fari
en mondo ŝajne blinda kaj freneza?
Li povas plenintence malbarbari
kaj lojaladi en deĵor' noktmeza;
li povas fari sian eblon nur
por la homaro, por la mondfutur'.

Ni ne feliĉos. Sed la posteuloj
eble feliĉos; malfrateco ŝtormas
sed pliklariĝas kelkaj hom-okuloj.
La okulist' en Varsovio dormas,
testamentinte paradoksan certon,
ke verdo povas venki la dezerton.

M. Boulton

15.12.1959

Hodiaŭ
en moment' solena,
en lingvo Zamenhofa, pura, plena,
facile fluas vortoj, varme, verse
karesi noblan nomon kvazaŭ per Alta Kanto:
Doktoro Esperanto.
Hodiaŭ
ritmo, rimoj kun dolĉo dance festas
pro verko, kiu mem poemo estas.

Hezite
iras nia penso
al tempo, kiam juna, arda menso
solene ĵuris homojn unuigi.
Batali iris sola, senglava kaj senŝilda
la okulisto milda,
hezite,
eĉ miope sub sia tasko granda
kaj tamen pli ol ĉiuj klarvidanta.

Humila,
saĝa, preskaŭ sola
li luktis por la lingvo senpopola,
ĝis muroj de Bulonjo krake falis.
De tiam li kun daŭre kreskanta akompano
fariĝis tutmondano.
Humila,
ne venkinta, sed ankaŭ ne venkita,
li montris vojon tra la mont' granita.

Hardita
kontraŭ falsaj frazoj
li semis toleremon inter rasoj.
"La naciismo naskas la militon,
la homo estu homo, egale kiulanda!"
La homarano granda,
hardita
pro malvarmo de cerboj kaj de koroj
rezignis pri havaĵo kaj honoroj.

Hodiaŭ
en moment' solena
jam tempo estas por rekono plena.
La nepoj de l' modesta SEMOKORTO
centmile tra Tutmondo persiste venis, venas,
konstante semis, semas.
Hodiaŭ
estas tempo, honora kaj hereda –
per vi la verko venkos, estu preta!

P. Thorsen

OKULISTO

La tutan tempon, super Esperanto,
kun sinofer' patrina kaj mesia,
li ŝvitis: ĝin li, konstruist' magia,
masonis; liaj ŝultroj de giganto

el vortminejo, en preciza kvanto,
sin servis, ke ĝi staru rektlinia!
Li vivis ĝin: eĉ vivo profesia
ĝin ŝovis al li, en deviga hanto...

Ĉar, dediĉinte sin al la kuraco
okula, novan lumon li liveris
al blindaj, dum la tuta tag', sen laco;

kaj nokte, per tradukaj proz' kaj verso
kaj per originalaj, li konkeris
spiritan lumon por la universo...

G. Mattos

MIOZOTOJ

Al la mortotago de d-ro Zamenhof

Estas tut-etaj bluaj floroj.
Kaj ŝatas ilin raraj koroj.
Ho, diru, diru al mi tion,
kie mi trovus miozotojn?
Ĉar ili havis simpation
de nia Majstro.

Jen krepuskiĝas... Eĉ sen dubo
sur frunt' de panjo naĝos nubo...
Ho, diru, diru al mi tion,
kie mi trovus miozotojn?
Ĉar ili havis simpation
de nia Majstro.

Min regas certa maltrankvilo:
Ĉu ili kreskas en aprilo?
Ho, diru, diru al mi tion,
kie mi trovus miozotojn?
Ĉar ili havis simpation
de nia Majstro.

E. Urbanová

Lingvo

PERLAS PER LA BELO STELO-STILO

Perlas per la belo stelo-stilo,
kun facilo ŝprucas Esperanto –
gaja tril' de l' najtingalbabilo
dum trankvilo de l' printempa kanto.
Amo de l' universeca koro
en kristalo de l' penetra penso
brilnuancas en bukedo-ĥoro,
sonparfumas en versaĵ-incenso,
vibras en la melodioj-ĉarmoj, –
fibroj de l' animo poezia, –
en ĝoj-ploro aŭ maldolĉaj larmoj,
en intimo kun revad' vizia.
Torenteco de l' pasi-deziro
sur la verda kampo de la amo,
radieco de l' revad-inspiro
kaj neniam foriĝanta flamo.
Antaŭ la ĝardeno de l' beleco,
permanenta celo al grandozo,
for de l' korpo en la animeco
estas mia farnient-ripozo.

E. Miĥalski

el LA ARTO POETIKA

Mi jam parolis pri la nigra listo
De tiu kaj ĉi tiu kritikisto,
Pri harfendadoj subtilgramatikaj,
Superekzaktaj kaj superlogikaj.
Jes, al sinjoro iu vort' aŭ formo
L' okulojn foje pikas kvazaŭ dorno,
Kaj li, kriante en ekstaz': Heŭreka,
Ĝin ruĝkrajonas kaj deklaras peka,

Kaj pri ĉi temo plu neniam cedas,
Ĝin terenbatas, per genuoj knedas
Sovaĝe, kiel iam en turniro
La malamikon kruda kavaliro.
Ĉu lin konvinki? Malfacila tasko.
La vortoj ne penetras tra la kasko.
Vi vane krios: "Ĝin ja ĉiu uzas!"
Eĉ se li aŭdus, lin vi ne konfuzas,
Li plue rajdas al batalo sprone,
Rekrias al vi: "Tiom pli malbone!"

Sed ĉiun malkomprenon mi korektas:
Tiujn sinjorojn ege mi respektas.
Jes, la sinjorojn mem. Sed la "principojn"?
Ne, eĉ se oni rompos miajn ripojn.
Mi asertegas, malgraŭ ĉiu klingo,
Ke la logiko servu al la lingvo,
Kaj ne la lingvo estu ĝia sklavo.
Do, malgraŭ ĉiu logikparagrafo,
Se io estas jam familiara,
Natura, kaj facile, simple klara,
Kaj donas bonan helpon por koncizo,
Tion sentime uzu, kun devizo:
De nia lingvo for la trudkitelon!
Vi tute rajte faros ĉi ribelon,
Ĉar ĉio prave vivas kaj funkcias,
Kion la vivo kaj kutim' sankcias,
Spite al subtilkapaj ambicioj
Vivu la vivaj lingvaj tradicioj!
Ja, akceptinte ĉi harfendojn tute,
Paroli oni povus nur balbute,
Ne ĉiam sentus kvazaŭ pulo-pikon:
Ve, ĉu mi ne ofendis la logikon?
Kaj nia Esperanto estus vere
Plej malfacila lingvo tutatere,
Rilate al pezemo kaj rigido
Envie hontus antaŭ ĝi la Ido.
Ĉefpostulat': viveco kaj elasto.
Kaj vane volas kelkaj, por balasto,
Matematikon en la lingvon miksi,
La lingvo vivas, vivi volas. *Dixi!*

K. Kalocsay

KIOM LONGE ATENDI?

Vortlertajn versfaristojn ni ja havas,
kapablajn skulpti rimojn kaj poluri
silabojn per velura man'; nin ravas
rigardi plumojn facilkrure kuri
sur molpapera paĝo, legi pri la
mielaj amrevoj de sinjoroj
kuŝantaj lukse sur kanapo brila
el kleraj multuzitaj metaforoj.
En la plej frua tempo sonis kantoj
pri Hom-frateco, pri l' Ide' interna;
Nun zume ĉirkaŭsvarmas nin amantoj
kaj vagabondoj kun inspir' senkerna.
Almenaŭ ili lingve sin ekzercas,
lernas fruktuzi la mirindan riĉon
de nia lingvo, flirtas, trilas, skercas,
kaj gaje festas sian esperantistiĝon.
Almenaŭ ili distras sin senpeke,
kaj distras tiun, kiu ĉion legas
(se nur revu' mencias ĝin *substreke*,
se nur agrabla tolbindaĵ' ĝin tegas).
Kial forpuŝi la marionetojn?
Ili ludadu plu por nin amuzi,
plektadu per fe-manoj amsonetojn...
ĉu iu volus ilin forrifuzi?
Scipovas ili pepi, ridi, plori
(ja plori eĉ, sed nur momente, kvazaŭ
infanoj, kiuj vidis rozon flori,
kaj trovas ĝin velkinta en la vazo).
Scipovas ili dolĉe sopirĝemi,
kaj sveni eĉ – por baldaŭ restariĝi.
Scipovas ili pople folitremi,
fiŝe glitadi, kaj maragle kriĉi.
Ja ĉio, kion lernas versstudento
ĉe universitat' estas por ili
facila, kiel la facila vento,
facila, kiel por la turdo trili.
Nur unu afereton ne scipovas
ĉi versaĵistoj kun la flua lango:

krei poemon taŭgan por la nova
epoko, skribi per la propra sango
literojn vibrajn pro korruĝa varmo.
Ili ja majstras lingvon, stilon, formon...
jen la sekreto de ilia ĉarmo;
sed ili timas faktojn, strebon, ŝtormon,
timas rigardi en pupilon de la
moderna vivo, aktuala, kruda,
kun ĉi mirindaĵaro superbela:
maŝinegoj el brila ŝtalo nuda,
la radi-ondoj fee delikataj
(sed kun potenc' miloble herkulesa),
urbegoj grase riĉaj, sed malsataj –
ĉu ĉio ĉi estas seninteresa?
Ĉu burde muĝa svelta flugmaŝino
estas nenio? Ĉu fajrritmo ĵaza,
la budo bunta de pomvendistino,
amantoj en kinejo kun ekstaza
febra plezuro sur la pala vango
(kinejo, hal' heroa, pravolupta)...
ĉu estas en ĉi tempoj logomanko,
ke oni kuras kun fervor' post nub' da
vantaĵoj rozvualaj? Ĉu ni vivas
en tempo nenifara, vaka? Se mi
vidus la mondon per okul' naiva
de ili, kiuj daŭras nur poemi,
poemi kaj poemi pri nenio,
dum mondo krakas, ungoj de milito
ŝiras tra l' tervizaĝ' – mi pensus min
ja bluflugila papili'. Ĉu sprito,
kaj homa brav' kaj saĝo nur valoras
por teksi trikotaĵon belespriman?
La lingvo Esperanto kion poras?
Plenigi broŝuraron senaniman?
Ankoraŭ ni malhavas nian Dante,
ankoraŭ al ni mankas nia Milton,
por plori pro mondagoni' belkante,
por pentri per penik' potenca bildon
pri l' milfaceta Nuno. Kiom longe
ni devas plu atendi ĝis aperos
la Majstr' unua, kiu vokos gonge
popolon nian? Ĉu ankoraŭ kveros

la kolombidoj? Nin ĉirkaŭas agoj
pli heroecaj ol en Mezepoko;
preteras nian kapon lancoj, sagoj
de pigra stulto, de malico, moko;
kaj ni, etnombraj, puŝas la batalon
sengvidaj preskaŭ... Jarocent' dudeka
enhavas forton, belon, idealon –
nin venu epopeo viv-reeĥa!

B. Price-Heywood

ESPERANTO

Kiam vi marŝis per sepmejlaj botoj
Tra l' mondo, kaj vin ĉiam novaj rotoj
Sekvis en gaja rondo,
Kiam, post venko de l' interna krizo,
Vi triumffesti iris al Parizo,
– Ekbrulis tuta mondo...

Kiam vi poste el la morto ŝajna
Revivis, kaj per pli-ol-iam-ajna
Potenco ekprogresis,
Elasta, ŝvela, riĉa de kulturo,
Portadis viajn fruktojn de maturo,
– La Homo ekfrenezis...

Ho vere, sur vi pezas prema Fato:
Floradon novan sekvas nova bato
Kaj krizoj mortminacaj:
Kiam la gentoj luktas kiel lupoj,
Dividas sin je malamikaj grupoj
eĉ "batalantoj pacaj".

Por Dio scias kia cel' sencela,
Kun plena pov', persisto senŝancela
Tempestas la disputo
Sensenca, senelira kaj senŝanca:
Jen estas nia mondo disonanca
En eta akvoguto.

Anstataŭ frata helpo reciproka,
Kiel en brula domo spirsufoka,

Batalo ĝis la morto:
En tia stato la homaro stumblas,
Kaj, Esperanto, ankaŭ sur vi plumbas
La sama damna sorto!

Dum mondmalsano vi malsanas febre!
Vin savos nur, se resaniĝos eble
La mondgeneracio:
Ne povas vi prosperi dum tempestas
Mondbrulo, Homfrenezo, ĉar vi estas
Hompaco, Mondracio!

K. Kalocsay

ESPERANTO

En la ŝanĝiĝema scivolo
de miaj dekses jaroj
kaptis min unue la sankta fervoro
por viaj altaj idealoj,
en la akceptema koro de la junulo
kun entuziasma stimulo,
kun dolĉa logo de la printempa mistero
resonis la kanto pri l' espero.

Kaj kun febra avido
de la neofito
al gazetoj, korespondado mi min ĵetis
ĝis min tute enretis
la aparta, ĉarma idilio
de la verda familio.
Venis leteroj
el foraj urboj, ekzotikaj teroj,
poŝtkartoj
el kvin mondpartoj,
interŝanĝo de libroj, bildoj, revuoj,
promesoj
pri estontaj rendevuoj,
vojaĝoj, kongresoj,
kaj jen trasorbis min per sia milfaceta, bunta diverso
la universo.

Poste la unuaj literaturaj provoj,
recenzoj, studoj, tradukoj versaj kaj prozaj,
pri *darfi, durfi, lici* diskutoj furiozaj,
kaj miaj unuaj timemaj strofoj,
la unua libro,
trohasta, entuziasma kribro
pri bona kaj malbona,
kritiko kun severo drakona,
sed kun junule ŝancela ekvilibro;
atakoj, replikoj,
en komuna laboro, komuna batalo harditaj fidelaj amikoj,
ĝojoj, esperoj, planoj, preserar-ĉagrenoj,
vulkane eruptaj redakci-kunvenoj,
kverelanta, repaciĝa kara kamarada rondo:
Literatura Mondo!

Sub peza, sufoka milita atmosfero,
en mia minacata ermito-ĉelo,
en kreskanta, subprema izolo,
via petola ludo rima,
via nesuperebla klaro esprima,
via serafe pura, superba simbolo
estis mia sola konsolo.

Ho Esperanto! Kiam vi venkos glore,
via plenkreska pompo futura,
la dolĉa gusto de via sonoro matura,
la milkolore
nuancita abundo
en via bunto
gardos ankoraŭ memore
la vibron de ĝojoj kaj tristoj
de l' fruaj kantistoj.

Kaj inter ili eble
kuntremos feble
la postmorta vibro tarda
de mia koro arda.

L. Tárkony

E.PISTOLOJ AL LA NICEANO: LA UNUA

Jes, mi rezignis versi kaj, amiko!
ne malfacila estas la ekspliko,
kial min ne cedigis via spica
invit' al la festeno de La Nica.
Dum mi malnovajn librojn ordometis,
kiujn ĉe Sejnokajoj mi aĉetis,
foliumante versojn forgesitajn,
al nia juna lingv' tamen profitajn,
de nekonata mano mi ricevis
du versvolumojn de la juna firmo
"Stafeto" – kaj nu, mia kor' sen ŝirmo
ĉe la trezor' de ĝojo preskaŭ krevis!
Kaj min lasante logi, mi plu revis
pri tiu fora temp', kiam sin levis
unua trupo de poetoj novaj,
Schulhof, Karolczyk apud Braun, Kozlowski,
Privat, Devjatnin, Deŝkin, Kriss, Grabowski,
kies ekflugoj vete ĉielprovaj
vekas admiron kaj indas rediron:
"Ĉiuj jam dormis, kaj mi estis sola
multe plorinte, ve! sen vort' konsola...
Ĉu amo venos al kabano mia,
min pluen, pluen treni sklavo sia?"
Jes, tiu skolo, kiun oni citus
nun laŭde "pola", se nur ĝi evitus
la mortfalĉilon, preskaŭ jam forpelis
el nia poezio la du drakojn,
kiuj en ĝiaj beloj diskruelis,
la adasismojn kaj la amfibrakojn!
Kaj la unua ĝi al kor' instruis
batadi sian ĝojon, memriproĉon
aŭ veon laŭ kadencoj Esperantaj.
Kiel domaĝe, ke ilian voĉon
frakaso de l' milito superbruis,
ke ilin ni ne konis, ne povantaj
al ili diri nian dankon altan!
Sed post la kvietiĝo de l' tempesto,
kia mireg', kiam el Budapesto
ekaŭdis ni muzikon kor-ekzaltan
kiel de fluto apud violono!

Jam niaj estroj tuj de la ekkono –
Julio Baghy, la anim' el flamoj,
viva mortint' en Siberi-mallumo,
mondvagabondo kun spritanta plumo,
kor' elektrita de mil unu amoj,
satir' kaprica kaj mola kanzono,
dirriĉaj gestoj de elasta mimo,
ridet', rikano, fio kaj sublimo,
la tuta vivobunt' en unu homo!
Kaj Kolomano Kalocsay, la fonto
de tiel larĝa, sorĉa kantrivero,
majstro de l' bela stilo kaj vortrondo,
kiu sur la streĉita kord' modulis
la ampasion de la Ahasvero
kun sama febr' kaj sama artsevero,
kiel etern-avide li spegulis
ekstazojn de l' Ebria Ekvatoro
(li, kiu baldaŭ sur la Mont', amara
profet', depreĝos en izol-angoro
la minacegon de l' Ĥaos' homara)!
Reĝ' de l' sonetoj, de la rim' triobla,
de l' aleksandro kaj de l' heksametro,
al li soifaj je l' instruo nobla,
kiel studentoj ĉirkaŭ la katedro,
ni kolektiĝis, la dek du komence,
poste la naŭ, nomataj misintence
sed tamen prave "Budapesta Skolo":
ĉar ja de tiu lernis nia aro
la grandan amon al la homparolo,
la kulton de la formo kaj dediĉon
al verstraduk'; el lia malavaro
ni ĉiuj tiris nian propran riĉon!
Ha! tiuj jaroj belaj de admiro,
de ĉarma rivalemo, de aspiro
al senmorteco eĉ se iluzie,
kaj ĉefe de fier', ke sammisie
al tiaj grandaj homoj indas do ni
kunhelpi frate en l' orfela krozo,
eĉ se la ŝip' finfine devus droni!
Ĉar antaŭvidis ni pri l' furiozo
de la milit' envia, kvankam tiam
neniu el ni povis eĉ imagi

tiel demonan, tiel prabestian
kulminon da kruel'. – Nur simple agi
ŝajnis kunkulpi en la krimperforto!
Kvin jaroj, kvin neforgeseblaj jaroj
sub sangoŝlimaj botoj de l' barbaroj...
Kaj fine la silenta kis' de Paco!
Tuj, kvazaŭ leviĝinte el la morto,
"Literatura Mond'" sen tim' kaj laco
denove viglas kaj sur ĝiaj paĝoj
inter malnovaj kapoj jen aperas
junaj aŭ eĉ nekonataj vizaĝoj,
Reto Rossetti, Auld, Dinwoodie k.c.,
kiuj poemojn verkas jam po groco
kaj laŭrojn kuratake jam konkeras.
"Kvaropo" (ĉar kunvenis kvara Francis)
super la verda lando bril-intensis
kiel eksplod' da poezio. Skotoj
same mòrtintoj kiel ja naskotoj,
ĉi tiuj kvar unikas viakove!
Apenaŭ spiri provis ni denove,
kontralte jen ekkantis voĉ' elita
himnon de amo karna kaj spirita
tiel perfektan en pasia vibro,
ke de kunsento, de admir' kaj ĝuo
en nia kor' tremadis ĉiu fibro –
Marjorie, plej senbrida el la Britoj,
fajra pastrino de l' antikvaj ritoj!
Sed ne sufiĉis tiom animskuo:
jen jen el la najbara pamp' alkuri
vakergalope kun fluganta ponĉo
ni vidas Mattos, en la bela sonĝo
tragediegojn venke inaŭguri!
Jen el trans la montar' de la Gigantoj
Kořínek sur la kapon de l' legantoj
plenurnojn da liriko bola verŝas!
De kiuj gloron tiel arde serĉas,
kion do ne atendi? Kia manko
plu restas por plenigi? Kia kordo
por tuŝi, se el sud', easto, nordo
sur nin ruliĝas nun tia lavango
da purkristalaj, uraganaj tonoj?
Nur sidi, kun la pugno en la vango,

kaj legi, legi, muta kiel ŝtonoj...
Sorĉa hipnot', se mi ĝin diri povas,
el kiu venis via vok' min veki,
kaj nur grandpene al paper' mi ŝovas
la manon, por ĉi tiujn versojn streki,
kiuj vin diros, ke silento mia
ne estas signo, ke mi ekkabeis,
kaj ke, amiko! ankaŭ ĝin ne kreis
pruda singardo pre-akademia:
muĝas leonoj, *sat* la ŝafoj beis!

G. E. Maura

PRESERAROJ

Erari estas home, ĉu ne?
Mi ne dezirus bati pune
presistojn, pro nur unu, du, tri
eraroj; ili povas nutri
la koron iom per ridetoj.
"La herbon manĝis multaj *bretoj.*"
"Sed la krimulo tuj foriris,
inter *ĉefstrutoj* li *kuiris.*"
"La pastro *banis* la geedzojn."
"Ŝi havas multajn *korp-bulecojn.*"
Sed suspektigas pri komploto:
"Marjorie Boulton, nia *poto.*"

M. Boulton

NIA LINGVO

Nia lingvo ĉerpu belon el la amo,
Belon, oferitan de la ĝoja kor' –
Estu ĝiaj lumaj vortoj la balzamo,
Kiu viŝas sulkojn de la frunto for.

Nia lingvo ĉerpu forton el la kredo
Je la unueco de la homa gent',
Kiu ĝin akceptos danke por heredo
Kaj ekuzos iam en paciga sent'.

Nia lingvo estu ilo de la *ago*,
Kiun kreas *vole* bono aŭ malbon';
Viva energio – sed ne sarkofago,
Lerte elĉizita el rigida ŝton'.

Nia lingvo estu *lingvo*, sed ne ludo,
Nek maŝina uzo de la radikar'
En ŝablonaj dogmoj de la sekta prudo,
Kun ridindaj trajtoj de l' enua star'.

N. Hohlov

PLENDO

Ah – kial Esperanto ne havas la daktilajn,
Dorlotajn rusajn rimojn – simbolojn de la am',
Kolorajn rusajn vortojn, rubenajn kaj berilajn,
Karesajn en la kanto, kortuŝajn en deklam'!

Ho kial, kial, Majstro, vi belajn vortojn ligis
Racie kaj akcente, en senelira rond' –
Kaj miajn rusajn sentojn sterilis kaj poligis
En via mezurita, horloĝe-ritma mond'!

Mi serĉas la simbolojn, palpante kiel blinda,
Pri trafaj metaforoj meditas en mallum',
Kaj tion, kion trovas, ne konsideras inda
Por la altaro Muza, por la incensa fum'...

Mi kanti, kanti volus; per sorĉa kant' magia
Elvoki la viziojn el alimonda sfer',
Starante genuflekse, atendi, korpe-pia
La benon de Venuso, en streĉo kaj mister'.

Sed mankas al mi taŭgaj esprimoj kaj simboloj,
Mi devas ilin krei per tranĉo kaj kunglu',
Elĉizi novajn sonojn por novaj aŭreoloj
Kaj miksi la iridajn kolorojn kun la blu'.

Mi devas plugi funde la virgan human grundon,
Ŝvitadi en atendo de la rikolta tag',
La vestojn ĉifonigi, suferi ĉiun vundon,
Sarkante la densejon de dorno kaj kratag'.

Kaj aŭdi, ke mizera, incita sonoknaro,
Anstataŭ melodio, naskiĝas en la kant',
Ĉerpita el profunda, smaragde-verda* maro
Kun nomo tiel dolĉe alloga – Esperant'...

Ho kial, Majstro granda, vi ĝiajn ondojn ligis
Per monotona tajdo, en samakcenta rond' –
Kaj mian rusan koron katenis kaj poligis
en via mezurita, horloĝe-pulsa mond'!

N. Hohlov

KOKINO KAJ INKUBATORO

La ĉarma baptanino
   Kokino,
Starante ĉe la Kovmaŝino,
Ekbekis ĝin, ekflaris
Kaj kun aplomb' deklaris:
   "Ho, Dio! Kia ilo fia!
   El naskoaparato tia
   Aperos ja kokidoj
   Al ĉies pravaj ridoj!
Kaj kia fi-malkonsekvento
      Terura
Ĝin uzi por produkt' de koka gento
   Anstataŭ la natura
      Instrumento!..."
Sed, malgraŭ tiu ĉi rezono
   Jam post monato
      El aparato
Aperis idoj – vera krono
   De dia fruktedono.

* *smaragdo* = smeraldo

Kaj bravaj idoj de l' Maŝin'
Dikiĝis kaj prosperis
Kaj diris mem, ke la Kokin'
Malsaĝe konsideris.

* * *

Ho, Esperanto! Mond' koleris,
Kiam subite vi aperis.
Sed estis vi de klera kovo
Kaj venis vi el vera ovo
De lingvoj de Eŭropo;
Vi ne fiaskis dum la provoj,
Ĉar naskis vin produktopovo
Kaj forto de ciklopo.

B. Mirski

LA TUNELO DE S-TA GOTARDO

El Ajrolo en Svislando
strias longa voj-rubando,
torde, plekte, volvmalrekte
supreniras montdirekte:
tridek kilometrojn longa,
kiel vosto anakonda.

El Ajrolo, tra malhelo,
kuras la fervoj-tunelo:
rekte, sen hezit', sen dubo,
kiel revolvera tubo.
Supre fluas vojo plekta,
sube – la tunelo rekta.

Iam, por el unu valo
al la transa valo veni,
oni devis sur spiralo
de la longa vojo peni.
Nun la verva homspirito
tra la montobloko boris...

Mi rigardis en medito,
kaj la sceno parabolis:

Valo estas ja nacio,
monto estas tradicio.
Migras sur la montobaro
nacilingvo al najbaro.
Esperanto en atako
tranĉis tra la tradicio;
ĝi per la potenca brako
sin proponas al socio.

Dum ĝi kuŝas sub okuloj,
ĉu ne estas vera honto,
vidi tiom da blinduloj
ŝviti sur la granda monto?

R. Rossetti

DE L' LINGVAJ AROJ ESTIS HOM' KREINTO

De l' lingvaj aroj estis hom' kreinto
Kaj uzis ilin li jam fruepoke,
Nun ŝanĝ' okazis – lingvolabirinto
La novan homon premas tede, moke!

Por ĉiu hom' en ajna teroparto,
Ĉu solvivanta, ĉu en socirondo,
Parola povo estas sama arto:
Homar' ja unu sur la tuta mondo!

Por sama aĵo nur diversa vorto
Pro sama ĝojo – ĉie sama sento,
Al multlingveco venas jam la morto,
Racion serĉas nun la homa gento!

Kaj, karaj fratoj de la verda stelo
En marŝ' triumfa kaj kun venka kanto:
Babelon foren – nun estiĝu helo:
Al hom' sufiĉas sole Esperanto!

F. Homar

OMAĜE

(Verkita dum la Cseh-seminario, Majenco, 1958)

Ĉu li estas flava hundo? – Ne, li estas instruisto.
Li enpuŝas gramatikon per ekzemploj kaj persisto.
Ĉu estas li objekto? – Ne, li verve vivas tre-tre;
kaj liaj vortoj trafas nin imprese kaj penetre.

Ĉu la instruisto sidas? – Ne, la instruisto iras.
Li gestas, prenas, metas, montras; preskaŭ li kuiras.
Mirinde li klarigos pri la litero No.
Kaj ĉu li estas dika? – Nu, ni ne parolu tro...

Ĉu li estas bela? forta? bona? – Jes kaj jes kaj jes.
Li estas korifeo de la kurso kaj kongres'.
Ĉu li estas eble frukto? – Ne, kaj ankaŭ ne legomo,
sed tre inteligenta kaj interesa homo.

Ĉu li estas kato blua? – Ne, li estas homo kara,
kun nobla kor' humana, kun energio mara;
okuloj, buŝo, manoj, kaj liaj brosaj brovoj
mirigas per la vivoplenaj, fortaj esprimpovoj.

Ĉu li estas sur la tablo? – Ne, li ŝajne estas ĉie;
la instruisto kuras kaj mansvingas erupcie.
Kaj ĉu li havas kapon? – Jes, kaj multon ĝi enhavas.
Kaj ĉu li havas buŝon? – Jes, kaj lia voĉo ravas!

Ĉu li havas ankaŭ koron? – Jes, li havas ruĝan koron.
Sed nun, ho vidu, vidu! – ĝi ŝanĝas la koloron!
Jen verda kor' sur lia brust'! Diru al ni, amiko,
ĉu estas ĝi miraklo aŭ nur trompo de optiko?

Nigran objekton havas li; ĝi estas tre profunda.
Surprizoj el ĝi ŝprucas en elfluo plej abunda:
jen libroj, paperpecoj, krajonoj, floroj, kretoj...
mi ne mirus se elsaltus eĉ kolbasoj aŭ kotletoj.

Nun komprenas ni finfine signifon de l' ide'
profunda kaj komplika de tiu vorto ĈE;
jes, multe pli ol APUD la eta vort' senlimas,
la sola prepozicio, kiun ĉiuj altestimas.

Per gaja ĝoj' kaj rido li instruas sekan fakton;
li ĵonglas per la glasoj, li elverŝas verdan lakton;
li estas pli potenca ol atombomb-eksplodo,
sed nur por pacaj celoj taŭgas la Ĉe-metodo.

Bastono ne necesas tie ĉi, nek ajna pun';
li klarigas la nuancojn de *per* kaj *de* kaj *kun*;
kaj montras, kolorkretas, aktoras, diagramas –
kaj ni ŜATAS ĉokoladon, sed sinjoron Ĉe ni AMAS.

M. Boulton

el LA INFANA RASO: XVIII

Ne estas fido nur. Subtenas faktoj.
Lingvo estas socia fenomeno,
kreaĵo de sociaj intertraktoj,
kaj ĝin modifas la ŝanĝiĝa sceno.

L' epoko ne maturas. Sed bezonon
jam sentas kelkaj, kaj bezono trovas
sian rimedon, la precizan konon
alprenas. Kiu volas, tiu povas.

Kaj dum ekzistos la bezon', ekzistos
la esprimilo ("ne por la futuro" –
ne, tamen eble ankaŭ mi asistos).
Ĝi estas revo pela. Kaj aŭguro.

Li sciis, kompreneble: "post centjaroj" –
ars longa... ho, sed *vita* estas *brevis*;
ĝi daŭras tikon de la okulharoj,
kaj ĝi ekzistas nur se oni revis.

La revo estas ĉio. Kaj kuraĝo:
ĉar revas nur la kuraĝul' unika.
Perdiĝas mil kaj mil pro la ĉantaĝo
de l' ĉiutaga, mora, hermetika.

Li sciis. Kompreneble. Kaj li fidis,
kaj per la fido fakte movis monton.
Miraklo? Ne; faktoroj koincidis,
kaj frua nuno naskis la estonton.

"...post ĝi ne estis plu la sama", sorto
kompensa de l' pelatoj kaj stranguloj,
la sola, lasta spito kontraŭ morto
(la malproksima grako de klanguloj).

Nur tion li ne sciis, en mallumaj
tagoj de Varsovio dummilita;
sed tro malfrue estas, en krucumaj
horoj, bedaŭri pri la kub' ĵetita.

Faktoroj koincidis; nu, ekzemple,
la *Proverbaro*. La hazardo trafis
detale, certe, kaj, finfine, simple,
kaj dekses permesaĵojn paragrafis.

Kaj *rigor vitæ* ĉiam ĝin minacas? –
sed ne dum ĝin bezonas societo.
Kio konsenton al postul' donacas
ne estas ludo por la kabineto.

Kio naskiĝis en la familioj,
en milionaj tribaj komunumoj,
kaj kunfandiĝas trans periferioj
kreskantaj pro produktoj kaj konsumoj,

atingos unuecon. Malaperos
neniam nia orfa idiomo
(ĉu jes aŭ ne la mondon ĝi konkeros)
dum volas kompreniĝi hom' kun homo.

Preskaŭ timige... senutilaj konoj...
la homnaturo estas origine...
Alea iacta, pasis fanfaronoj,
nepras la vojon iri jam, obstine.

W. Auld

PRI LA ESTONTECO DE MIAJ POEMOJ

Vortoj fluas el poeta plumo,
kaj papilioj el la primavero.
Vintro kaj mallumo ilin prenos,
sed miaj vortoj ĉiam restos junaj,
fortaj kaj senlace kantoplenaj –
ĝis nia tuta mondo elmodiĝos,
kaj pretere. Se barbaroj iam
remetus torĉon al la civilizo,
ĉu ne restus ie, ovpacience,
tra mortmalhela vintro de jarcentoj,
miaj poemetoj, por koviĝi
sub iu nova renesanca suno
kaj en dorlotanta reva koro,
por resonigi miajn pasajn pensojn
en la arkaika Esperanto?

E. de Kock

LETERO OKAZE DE LA 90-JARA JUBILEO DE ESPERANTO

al Simo Milojević

Saluton, Simo! Volas mi esprimi,
  Okaze de l' nunjara jubileo,
Mian defion; volas mi, jes, primi
  Kun mia spado el la portepeo,
Prete partion pluan; volas rimi
  (Sen pliaj tropoj) iom pri l' Ideo
Por kiu ni laboras, kaj probablo,
Ke fine alceliĝos nia krablo.

Ne timu, tamen! Ne vin mi alfrontas
  Kiel Davido antaŭ la giganto!
Atakos mi la lokojn, kie fontas
  La fuŝkonceptoj kontraŭ Esperanto;
Ĉar sciu: pri la lingvo mi nek hontas,
  Nek kredas, ke ĝi estas forvelkanto;
Kaj tio min subtenas dum baraktoj,
Ke, dum debat', al ni ne mankas faktoj.

Kial do ĝuste vin mi alskribaĉas?
  – Diable, vi ja estas redaktoro!
Do se letero jena al vi plaĉas
  Vi eble eternigos min en gloro:
Pri publikigo la poet' ne kraĉas,
  Ĉar kiu emas kanti sub ignoro? –
Precipe se la kanto celas hardi,
Instigi, kuraĝigi, kaj standardi.

Jam naŭdek jarojn Esperanto kreskis:
  Sprosis, burĝonis, kaj ekfloris vive.
Ĉu l' ras' infana dume adoleskis?
  Ni devas, ve, respondi negative.
La registaroj pompe sin UNESKis
  Por paca kunlabor' – sed efektive
Montriĝas: ESK signifas nur "ŝajniga",
Kaj UNuecon baras stulto diga.

Stulto? Ĉu troa vort'? Sed ĉu ne stulte
  Ke fremdajn lingvojn oni ĉiulande
Instruas, tamen gajnas nur malmulte
  Laŭ proporcio inter ocean' de
L' elspezoj kaj la flako finrezulte?
  Plimulto kuŝas anhelanta strande!
Sincere ni agnosku: ĉi debito
Celadas nur kreadon de elito

Kapabla regi... lingvojn, kaj do homojn:
  Ne mankas mono ĝuste por tradukoj,
Interpretistoj pelas for fantomojn
  El tur' babela per l' altprezaj trukoj,
Kaj, se ni kredas niajn ekonomojn
– Ĉar tiaj ili estas (aŭ verukoj!) –
Solviĝas tiel, kvazaŭ sen problemoj,
La tuta ĝeno de la lingvopremoj.

Kaj tamen oni provas komputile
  Forviŝi spurojn de l' Babel' biblia:
Tradukos la maŝinoj perfektstile
  Laŭ manier' Ŝekspira, Vergilia;
Ho, jen la sciencistoj solvas brile
  Problemon de l' diskut' internacia:
La vojaĝonto pagos sian groŝon,
Kaj komputilon metos en la poŝon.

Nur unu tubereto en l' afero –
  Ĝis tiam oni devos tro atendi...
Ĝis nun ne granda estis la prospero
  De provoj la investon dividendi,
Kaj antaŭ plenumontoj de l' espero
  La voj' tre longe ŝajnas sin etendi.
Ĉu fakte oni venus al la cel' – aĥ! –
Vivante ĝis la aĝ' de Metuŝelah?

Sed vidu, jen miraklo! Ĉar animon
  Planlingvo ne posedas (oni diras),
Ne povas ĝi transpreni la sublimon
  De l' kulturbazoj, kiujn ni admiras
En nacilingvoj, kaj pro tio glimon
  De vivantec' neniam ĝi akiras:
Sed tion la maŝinoj povos fari! –
Alie, kial vane tempmalŝpari?

Nu, ĵetu for sarkasmon, for acerbon!
  Ĉi estontulojn mi ja ne envias.
Mi havas komputilon: mian cerbon,
  Kaj ne tro manke ĝi jam nun funkcias,
Ne nur ampleksas la natursuperbon
  Sed ankaŭ pensas kaj intuicias;
Per ĝi spertiĝas kulturprovianto
En nacilingvo – kaj en Esperanto.

Kiom necesas tradici' miljara
  Al meza homo en naciaj kadroj,
Kiu kontentas vivi ordinara?
  Lerninte sian lingvon de l' gepatroj,
Li ĝin adaptas laŭ la mod' najbara;
  Ne tre influas libroj aŭ teatroj...
Ĉu tiu lingvo tamen ne sufiĉas?
Ĉu sen kulturo li ne kompreniĝas?

Do kial Esperanto devas havi
  (Se ĝi ne havus!) kulturtradicion,
Por ke la homoj povu jam ne sklavi
  En ĉenoj de l' muteco? Kial tion
Premisas certaj disdegnuloj? Ta! vi
  Jam bone scias, ke privilegion
Pretendas homoj, kiujn malallogas
La homamas', kaj ili do mensogas –

Ĉar ĉu valorus havi luksan domon,
  Aŭtomobilon de l' plej kosta marko,
Amorantinon en peltar', diplomon,
  Maran krozadon en privata barko,
Aviadilon, eĉ aerodromon,
  – Privilegiojn de la oligarko –
Se tiuj samaj estus je dispono
De senescepte ĉiuj laŭ bezono?

Kaj kiom longe daŭras la potenco
  Tenata firme en la rondoj klikaj
Bone sciantaj pravon de l' sentenco:
  La lingvoj estas iloj politikaj,
Se foje disvastiĝus nia senco,
  Kaj falus altaj muroj lingvobrikaj?
Mi tro komprenas (ne pli bone ol vi):
Ĥaoson multaj eĉ ne volas solvi!

"Danĝera lingvo"! – ne nur al adeptoj,
  Sed ankaŭ al aliaj certagrade,
Ĉar ĝi atestas falson de konceptoj,
  Kiuj konsolas kelkajn tre persvade...
Sed ĉu ni vere estas la esceptoj
  Kaj malĝentile trudas nin parade?
Mi kredas, ne. La vero estas jena:
Ni havas ion, kiu estas bena.

Ne venas ni detrui. Ne. Kontraŭe.
  Konservon de bonaĵoj ni subtenas:
Veturas ni en jeto, ne landaŭe,
  Sed nur ĉar tio al l' epok' konvenas;
Lingvojn apoge ni, ne anstataŭe,
  Pritraktas, ĉar perfekte ni komprenas
La ĉagreniĝon de naci' malgranda
Sub peza prem' de lingvo alilanda –

Kiu pli bone? Ni mem tion spertas!
  Al ni rivalas angla lingvo dume;
Do estas tre bonŝance, mi asertas,
  Ke mi parolas l' anglan – proksimume! –
Denaske, ĉar pri lingvoj mi mallertas.
  Do se mi devus lerni, minimume,
La anglan kiel fremdan esprimilon,
Mi regus ĝin samkiel porko trilon!

Ne timu, homo. Sidu ne tro zorge.
  Permesu vorton ja ne tre ĝentilan:
La anglan lingvon regas same porke
  Kiu ĝin lernis, fremde malfacilan.
Kaj tamen ni konstatas (kun dolor') ke
  Ĝi havas karakteron tre utilan:
Ĝi signas dum konversaci' aŭ klaĉo
La indiĝenon disde l' fremdulaĉo.

Fi! kia diro! Sed konvenas foje
  Paroli iun rekte en la nazon...
Tro multaj subkonscias paranoje
  Kaj vartas superece ĉi emfazon;
Ĉe Esperanto, mi konstatis ĝoje,
  Ni malpli ofte havas la okazon –
Ĉar fakta la malnova kliŝo trajtas:
En Esperanto ĉiu egalrajtas.

La venkon de la angla mi ne kredas.
  Ĝi havas ĉion: monon kaj prestiĝon;
Potencon politikan ĝi posedas –
  Kaŭzas la nura pens' al mi vertiĝon!
Kaj tamen, tamen. Tamen mi ne cedas
  Rilate ĝian finan nesufiĉon!
Ĉar malgraŭ ĝia kresko hipertrofa,
Validas plu logiko zamenhofa;

Ne ripetendas jam la tuta gamo:
  Faligos l' anglan fine emocioj,
Ĉar ĉie sub ĝi brulas la malamo
  Ĉiam latenta inter la nacioj.
Pri Esperanto ne validas samo:
  Malgraŭ kvereloj kaj antipatioj
Personaj (kial honti en silento?),
La amo estas nia postamento!

Niaj martiroj ja ne mortis vane,
  La karavan' pluiras, laŭ l' proverbo.
(Proverb' alia trudas sin slogane:
  En niaj cerboj ja ne kreskas herbo!).
Tiom da homoj plu samideane
  Tra l' tuta mond' laboras ĝis elĉerpo
Por la afero! Ĉi sindono daŭros
Ĝis – iam – nin sukceso fine laŭros.

Kaj vidu, Simo, min ne tre koncernas
  La "fina venko", se paroli vere.
"Fermita rondo"? Ĉu ni fakte fermas
  En sorĉan rondon nin, socipretere?
Sed se ni kiel lumgardantoj kernas
  Ĝis venos nia ĝusta hor' konkere?
Nu, preferindas tio ol mallumo
Trovebla en L' Eŭropa Komunumo!

Mortigi Esperanton ja ne eblas –
  Provadis pluraj dum la historio,
Sed nian naŭdekjaron ni celebras
  En plena fida forto de l' funkcio,
Fanditaj en formujon, kiu nepras
  Al homoj de aparta simpatio,
Do ĉiu, kiu tra la mondo tuta
Ja hontus esti muta, aŭ balbuta!

De l' mod' ni ne dependas, sed la modo
  Iam al ni favoros, mi supozas:
Post stagno venos nia periodo...
  Sed intertempe mi ne tre neŭrozas
Pri l' ŝajna malsukceso de l' klopodo,
  Ĉar Esperanto lingve grandiozas
Kaj, per ĝi, al anim' anim' parolas,
Pruvante, ke kapablas kiu volas...

Do ĉimomente mi permesas al mi,
  Skribante ĉi leteron al amiko
En eksterland', se ne precize psalmi
  Almenaŭ rimi pri la aŭtentiko
De nia revo, nia ver', kaj varmi
  Pri renkontiĝ' kun vi en Rejkjaviko –
Kie denove ĝuos ni gargarojn,
Kaj parolados – spite lingvobarojn!

W. Auld

Interna Ideo

LA ESPERO

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.

L. L. Zamenhof

LA VOJO

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l' sorto, nek mokoj de l' homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino kaj la *pacienco* –
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, –
Ni semas kaj semas konstante.
"Ho, ĉesu!" mokante la homoj admonas, –
"Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas:
"Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
Se vi pacience eltenos".

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam nia bravega anaro,
Ĝin jam ne timigos la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel' unu fojon signita!

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.

L' espero, l' obstino kaj la pacienco –
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

L. L. Zamenhof

PREĜO SUB LA VERDA STANDARDO

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
Fortego, la mondon reganta,
Al Vi, granda fonto de l' amo kaj vero
Kaj fonto de vivo konstanta,
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
Sed ĉiu egale en koro Vin sentas,
Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,
Hodiaŭ ni preĝas.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,
Kun dogmoj de blinda fervoro:
Silentas nun ĉiu disput' religia
Kaj regas nun kredo de *koro*.
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,
Kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,
Ni staras nun, filoj de l' tuta homaro
Ĉe Via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,
Sed ĝi sin dividis batale;
Popolo popolon atakas kruele,
Frat' fraton atakas ŝakale.
Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,
Aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,
Redonu la pacon al la infanaro
De l' granda homaro!

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
Por reunuigi l' homaron.
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,
Sed lasu nin venki la baron;

Donacu Vi benon al nia laboro,
Donacu Vi forton al nia fervoro,
Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
Nin tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos;
Ĝi signas la bonon kaj belon.
La Forto mistera de l' mondo nin benos,
Kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn detruos,
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero.

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,
Antaŭen kun pacaj armiloj!
Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.
Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro,
Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro
Al frata la celo ni iru obstine
Antaŭen, senfine!

L. L. Zamenhof

LA TAGIĜO

Agordu la brustojn, ho nia fratar',
Por nova, pli vigla jam kanto!
Ĝi sonu potence de montoj al mar',
Anoncu al ĉiu dormanto:
Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
La ombroj de nokto forkuras el mond'!

Post longa migrado sur dorna la voj'
Minacis nin ondoj de l' maro;
Sed venkis ni ilin kaj velas kun ĝoj'
Al verda haven' de l' homaro.
Post longa batalo, maldolĉa turment',
La stela standardo jam flirtas en vent'.

Se venus ankoraŭ ventegoj, batal',
Ni estas jam bone harditaj;
Esperon ne venkos la fajro, nek ŝtal',
Nek ies perfidoj subitaj.
  Nenio en mondo elŝiros ĝin for,
  Ĝi havas radikojn profunde en kor'.

Ni velas antaŭen kun kredo, fervor',
Benante la Majstron por verko,
Kaj lian anaron, de plej frua hor'
Fidelan al li, ĝis la ĉerko.
  La mond' aliiĝos, la temp' pasos for,
  Sed vivos eterne pri ili memor'.

La lingvo benata montriĝis al ni
Mirinda donaco ĉiela:
Per amo al hejmo, patrujo, naci',
Ni flamas en koro fidela.
  Kaj same fidelaj al hejma altar',
  Ni sentas nin filoj de l' tuta homar'.

En ĉiu mondparto, en ĉiu ter-zon',
En koroj de centoj da miloj,
Jam vibras por nia saluto reson',
Do kantas de l' tero ni filoj:
  Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
  La ombroj de nokto forkuras el mond'!

A. Grabowski

LA BONA OĈJO BION

Ni kantu jam pri Bion, oĉjo bona,
ĝoje, ke lia speco ne elmortas.
Li, libraĉeta kaj gazetabona,
eĉ versojn legas kaj la stelon portas.
Li estas dupieda propagando,
ĉiu evento verda – por li frando,
kiun li ĝuas elpuŝante krion:
"Ho, se la kara Majstro vidus tion".

La lingvo ne malsanas anemie:
Vortaro Plena, Plena Gramatiko
aspektas jam pli ol akademie
kun la timeble respektinda diko.
Kaj ATA-ITA-skriboj, Terminaroj!
Se oni pesus, estus du kvintaloj.
Ekkrias nia bona oĉjo Bion:
"Ho, se la kara Majstro vidus tion".

Dankeble al la dezirata lakto
la vangoj de l' Movado dike glatas:
grasiĝo de UEA estas fakto,
ankaŭ la digna SAT jam ne malsatas.
Ĉar estas multaj SAT-geedzigitoj,
grandnombre kreskas jam la satanidoj.
Ekkrias nia bona oĉjo Bion:
"Ho, se la kara Majstro vidus tion".

Ne nur la plenaĝuloj ĉiujare,
sed ankaŭ la infanoj kongresetas,
pri io-ujo-stato scias klare
kaj tukon, vazon Esperante petas,
eĉ, kiujn multaj trovas neallogaj,
plezuras pri la vortoj neologaj.
Ekkrias nia bona oĉjo Bion:
"Ho, se la kara Majstro vidus tion".

Sed pli ol tiu ĉi florad' kaj kresko
ja gravas en la Esperanta vivo
tiu decida venko en Unesko,
kiun elluktis nia brava Ivo.
Dum Blinkenberg sin kaŝis en la kelon,
eĉ Oriento streĉis la orelon.
Ekkriis nia bona oĉjo Bion:
"Ho, se la kara Majstro vidus tion".

Ne vane la kantistoj jam esperas,
ke l' Muza kis' ne restos nur sekreta:
Régulo Pérez plej regule peras
verslibrojn al popol' plej aĉetpreta.
Ho, eble post ioma paso tempa
eldonos li poemojn eĉ de Emba.
Ekkrios tiam bona oĉjo Bion:
"Ho, se la kara Majstro vidus tion".

Ni ne forgesu pri legaĵo spica,
kiun prezentas ĉiam ĉe l' apero
la Norda Prismo, Suda Stelo, Nica,
kaj eĉ se mankas al ni ekzemplero,
ni *scias* pri l' ekzisto de l' revuoj,
kaj jam eĉ tio banas nin en ĝuoj,
ke krias nia bona oĉjo Bion:
"Ho, se la kara Majstro vidus tion".

Kelklande iam estis granda fasto,
kaj pluraj, laŭ la modo oblikvante,
prenante Esperanton por balasto,
formanĝis siajn librojn tutakvante.
Jen manĝo fasta, ne tre bonkvalita,
eĉ se kun margarino surŝmirita.
Horore kriis bona oĉjo Bion:
"Ho, se la kara Majstro vidus tion".

Jen estis la epoko de malfondo:
la forvelkiĝ' de l' arbo asocia,
la morto de Literatura Mondo,
"ne taŭgas lingvo krom nacinacia".
Sed malgraŭ kvako de la veter-ranoj,
eltenis spite kelkaj veteranoj
kaj inter ili bona oĉjo Bion.
"Ho, se la kara Majstro vidus tion".

Ĉi-tempe eĉ Balkányi ne laboris,
la artikoloj restis en burĝono,
kaj Kalocsay triste nur langvoris,
eĉ Floroj estis al li de Malbono.
Feliĉe Waringhien ĉiulunde
mal-malojn al li sendis plu abunde.
Ne diris, tamen, bona oĉjo Bion:
"Ho, se la kara Majstro vidus tion".

Kaj fastis Baghy en la nesto doma,
sin kutimigis al ĉi striktaj limoj,
kaj, dum cerbumoj pri la Homo Homa
li ŝajnis esti unu el Viktimoj,
sed diris tamen: "Emba, hej, vi vidos,
Konsilantaron foje mi prezidos.
Mi sub Pomarbo antaŭsonĝis tion".
Ho, kion dirus nun la bona Bion!

Mi fastis kun Maria (en la Grupo)
eĉ ludis patron-panjon En Ekzilo,
kaj dum boladis nia fabo-supo
ni revis jam pri nia nova filo.
Por doni al ni la necesan hardon,
Bartelmes sendis la Junecan Ardon.
Juneca ardo, ĉu ni havis tion
almenaŭ tiom, kiel oĉjo Bion?

La granda fasto pasis for postlonge
dank' al Unesko, Bokarev-klopodoj,
samideanoj ĉesis dormi ronke,
venis gazetoj, libroj (eĉ kun odoj).
Kaj are, kiel en rivero flosoj,
aperis ankaŭ ĉiam novaj glosoj.
Ekkriis nia bona oĉjo Bion:
"Ho, se mi povus lerni ĉion tion".

Li tamen lernas, pigre ne bradipas,
li estas ne maljuna, eĉ se olda,
instruas, organizas, varbas, skribas,
eterne esperporta, ĝojherolda,
en la farado sen memfanfarado,
model' de samidea kamarado.
Ni povas diri mem pri oĉjo Bion:
"Ho, se la kara Majstro vidus tion".

E. Baranyai

KANTO DE L' SKLAVO

Nun mi hele vidas, ke la sorto mia
estas alligita al vi per kateno,
ke mi nune ĉiam kun vi devos iri,
ke mi certe ne sukcesos jam akiri
liberecon, mia nova suvereno!

Multfoje mi forĵetis mian plumon,
eĉ emblemon vian, stelon kvinradian,
en la koro fajron mi estingi penis,
sed vi senkompate ĉiam min ekprenis
kaj min pluen, pluen trenis, sklavon vian.

Al vi apartenas nune vivo mia,
ĉio, kion jaroj lasis en la koro;
vin mi nune sekvas kiel somnambulo,
tute kontraŭvole, tute sen postulo
kaj mi jam ne revas eĉ pri laŭr' kaj gloro.

Kie vi nur prenis tiun sorĉan forton?
Vi tra landoj marŝas sen la sang' sur glavoj,
sen kanonoj, nur kun via verda stelo,
kaj vin malgraŭ tio sekvas sen ribelo
ĉiam novaj, blinde obeemaj sklavoj.

Pli kruelan, ol la famaj uzurpantoj
vi alportis al ni en la mondon moron;
ili piedbatis homajn liberecojn,
de la landoj ŝiris partojn, limojn, pecojn,
sed vi ŝiras el la brustoj nian koron.

S. Schulhof

EN AMARA HORO

Nenio estas vi, nenio,
Se, pri la senco sen konscio,
Vi hurlas pri la "nova sento"!
Mi volus scii vin fermento,
Potenca povo, fort' magia:
Dormema "rondo familia".

Ĉu la ĝiskreva himnokanto,
Kolekta, koresponda vanto,
Kaj ke pri gramatikreguloj
Disputas aro de stranguloj
Rajdante sur la Fundamento:
Jen estas do la Nova Sento?

Ke rifuĝante de la devoj,
Nur gapas vi kun strabaj revoj
Kaj alpreninte dignan pozon
Kelkfoje ĵetas vi almozon
Sur la altaron de l' Afero:
Ĉu tio estas do ofero?

Mi batas. Fraton batas frato.
Lin mem turmentas ĉiu bato.
Ho, gento, gento, verda gento!
Mi volus scii vin fermento,
Potenca povo, gvida torĉo,
En sorĉ' malbona – bona sorĉo!

Kaj, kvankam "stranga sekto eta",
Sed fidi, lukti, venki preta,
Por kiu, malgraŭ ĉia moko,
La mond-iranta Forta Voko
Ne sangmalriĉa iluzio,
Sed estas kredo, religio!

Oferoj nutras la aspirojn,
Postulas ĉiu venk' – martirojn!
Ne kovru palo vian vangon,
Neniu volas vian sangon,
Sed donon, faron kaj fervoron
Kaj koron, sed la tutan koron!

Ve, ĉio vana! Mi konscias,
Ke en dezerto mi forkrias.
Vi restos plue en kvieto
Amuziĝanta societo.
Ho, kie estas la konsolo
Por mi – poeto sen popolo!

Poeto sen popolo, ho animprema scio,
Ke surdas la oreloj por ĉiu mia voko...
Forsonas senresone la plora melodio,
Kiel ŝirita kordo en forlasita loko.

Ĉu plu projekti, fidi kaj revi malgrandknabe,
Kaj meti mozaikon el la lingveroj splitaj,
Aŭ ĵeti for el mano la plumon, kiel Kabe,
Kaj eksilenti – patro de versoj abortitaj?

Pli oportune estus kaj certe pli prudente:
La vanajn sapvezikojn plu ne flugigi blove,
Kaj ektirinte ŝultrojn feliĉindiferente,
La *Kanton de la Sklavo* ne kanti plu Schulhofe.

Sed kien iri? Kie troviĝas idealo,
Sur kiu mi ne vidus malican ekrikanon,
En kies altartukon, freneze, post batalo,
Neniu adoranto jam viŝis sangan manon?

Ho, jen vi, Esperanto! Ne glora kaj fiera,
Nur orfa, senpotenca, senforta, senmatura,
Svenema kaj senhelpa kaj – eble – senespera,
Sed nobla, blanka, klara kaj senmakule pura.

Mi konas vin. Enkore vi kantis najtingale
En nokto de la mondo. Vi kiel povis trili!
Vin oni ne aŭskultis, buĉadis sin "reale"...
Ĉu ŝtopu mi l' orelojn por ilin eksimili?

Ne! En la kor' plusonu la kanto dolĉetrila,
Ho, kantu birdo eta, senforta, kara, kara!
Vi estu mia bela mensogo sorĉebrila,
Vi estu la konsolo en nia mond' amara!

K. Kalocsay

ESTAS JAM TEMPO

Kial silenti mute senvorte,
nin cedante al sortofatalo;
kial sen ago stari malforte
ĉe l' altaro de Mondidealo;
kial ne rompi dise per Amo
la katenojn de l' sklava homaro
kaj eklumigi per sankta flamo
la deviojn de l' homa frataro,
se estas jam tempo!?

Kial ne agi, kiam en sango
baraktante veadas nacioj,
kiam la larmoj fluas sur vangoj,
furiozas militaj furioj,
kiam sen kredo, sen kondukanto,
sin perdante en vivlabirintoj,
vane atendas je la Savanto
la viktimoj de celon perdintoj,
se estas jam tempo?!

Fratoj! Ni havas forton, potencon
kun majesta ideo en koro!
Ne atendante la rekompencon
helpu *ni* en giganta laboro!
Fratoj! Morgaŭan tagon pripenti
antaŭ la sunleviĝo – ridinde!
Ami instruu homojn kaj *senti*
teni sin je nom' de l' Homo inde,
ĉar estas jam tempo!

Fratoj! Nin vokas nia ideo!
Do levante la kapojn ni iru!
Nin ne timigu eĉ la pereo
nur pri venko triumfa sopiru!
Fratoj! Sed, se ni ĉiuj pereus
por ideo en paca batalo,
kredu, se eĉ tutmondo ĝin neus,
venkos certe la Mondidealo,
ĉar estas jam tempo!

J. Baghy

POPOL' NI ESTAS

Popol' ni estas, ne movado nura,
kaj nia land' la tuta tuta ter'.
Standardo nia, de sangverŝoj pura,
portas koloron verdan de l' esper'.

Kaj havas ni heroojn, eĉ martirojn
luktintajn kun malico kaj malkler'.
Poetoj propraj sonorigas lirojn
pri amo, paco, justo kaj liber'.

Ĉar kreis nin laŭ sia psika bildo
l' unua homarano, Zamenhof,
ni luktas plu kun senmakula ŝildo
por nova mondo kaj por bona nov'.

Popol' ni estas, ne movado nura,
La religio al ni la kompren'!
La lingvo kara, viva kaj matura
por ĉiuj sin proponas kiel ben'.

Popol' ni estas ĉie en popoloj,
kulturon propran portas per torĉflam'.
Kojniĝis ni en ĉiuj homtavoloj.
Aŭ – tiel estu, se ne estas jam!

E. Baranyai

AMARA PENS'...

Amara pens' turmentas mian koron.
Forpasis jun' kaj vanas sin konsoli:
jam sentas en proksim' mi mornan Horon,
kiu malhelpos plue viv-adori.

Minacas Hor' kaj ĝin mi antaŭsente
malĝoji povas nur, ĉar min tro ŝpare
la viv' per Bel' regalis, tro avare
por povi diri: mortos mi senpente.

Ho, kiom foje mi en jun-deliroj
pri Voj' milmejla al amikoj planis!
Ho Hilda, Seppik, fratoj miaj, vanis
ĉi sonĝ' infana, vanis rev-flugiloj.

Malamo regas. L' atomenergio
tremigas korojn. Sed la Verda Kanto
plu sonu: nordajn fratojn per ve-krio
salutas mi sudan' en Esperanto!

J. Velebit

POR KONGRESA MALFERMO

Post himnoflugo la orgen' silentas,
sed koraj kordoj vibras plu solene...
Pri vojkomenco rememor' legendas,
espero pri l' estonto regas plene.
Post jara drivo por ripoz', rigardo
jen nia ŝip' atingis novan bordon.
Okuloj brilas, flirtas la standardo,
kun Nova Sent' ni petas novan forton:

Ho, Amo, vin ni vokas al la koro.
Nin superombru via bena graco
dum inspiritaj horoj de l' laboro,
dum la semad' de l' intergenta paco!
sub sunkareso la semaĵo ĝermas...
Vi, nia sun', karesu koran humon!
La varmon ni en ni dankplene fermas
por havi fruktojn: Belon, Bonon, Lumon.

Post halt' momenta kaj labor' finita
ekiru nia ŝip' al nova bordo!
Tra ondoj, super rifoj saĝo spita
direktu ĝin al certe bona sorto.
Okuloj brilu, flirtu la standardo,
favora vent' ŝveligu ĝian velon,
instigu nin konstante kora ardo:
gefratoj, ni atingos nian celon!

J. Baghy

AL ESPERANTISTOJ DE BRAZILO

Fabelo, fantazio, rev', legendo:
jen kio estis vi por mi, Brazil',
por juna filo de Ukrajna gento,
por liberama, ribelama fil'.
Ho, kiomfoje flugis mia velo,
ĉu en la sonĝo, ĉu en la imag',
al vi, Brazil', al via sunobelo
tra l' ocean', sub verdkolora flag'!
Nenio min timigis tiam, junan,
nek ŝtormo, nek nebul', nek malproksim' –
mi kredis flugatingi landon sunan,
eĉ ne pripensante pri l' baranta lim'.
Mi volis vidi vian Blankan Monton,
eĉ Atlantidon bluan mem... (Naiv'!)
kaj la plej belan urbon de la mondo
kun ties palmogolfo... Belsoif'!
Ve, vanaj estis ĉi mirindaj planoj:
mi restis ĉiam en la sama lok'.
Nun venis maljuneco kaj malsanoj,
forsonas vane plendoj kaj alvok'.

Sed mia kor', vibranta por la Belo,
por la Libero, Justo, Paco, Ver',
tuj rejuniĝis, kiam Verda Stelo
pli hele eklumiĝis sur la Ter'.
Kaj kvankam limo restas sama limo,
la mondlingvanoj fide turnas sin
letere de animo al animo
kun PACIENC', ESPERO kaj OBSTIN'.
Ne grave, ke Brazilon mi ne venas,
poemoj miaj sonas en Brazil'!
Mi korjubile Esperanton benas,
kaj benas min ĉi interkomprenil'!
Do, mia longe karesata revo
efektiviĝis ĉe la Blanka Mont'.
Saluton, Brazilanoj! Nia devo –
defendi pacon en la tuta mond'!

A. P. Logvin

EKLOGO PRI LA SANKTA AFERO

A. Laŭ mi, la lingvo estas flamo lampa
en hejmfenestro loge allumanta.
B. Laŭ mi, la lingvo estas flam' malsata,
kaj mi: tine' englute alsorĉata.
C. Laŭ mi, la lingvo estas hundo flegma,
kiun karesas mi per mano degna.
A. Ĝi estas patro, kiu ne riproĉas...
B. Ĝi estas drogo, kiu min diboĉas.
C. Ĝi estas tamen bona kromokupo,
ĉar tre plezure estas ĉe la grupo.
A. Mi fidas, amas kaj esperas pro ĝi:
nur tial daŭras mi la mondon loĝi,
ĉi mondon ombran, ade efemeran.
Se mi ne havus ĉi stimulon veran,
mi mortus tuj, aŭ vivus nur sencele.
Sed kredi kaj labori estas bele.
B. Ĝi min turmentas, tordas kaj torturas;
al fosto de l' afero ĝi min ŝnuras,
tradraŝas mian koron torkvemade
kaj miajn veojn aŭdas senkompate.

C. Alĵetas mi monerojn de atento
al la ĉifonfigur' de l' nova sento:
la lingvo estas nur komunikilo,
kiun mi foje uzas por babilo
(kiam neceso aŭ humor' postulas) –
sed per fervoro sankta mi ne brulas;
la lingvon mi parolas pragmatike
sed hontas ja agnoski ĝin publike.
A. Ĉu vi ne konas tiun senton sanktan,
kiu la disan rason esperantan
je unu firma familio fandas?
Kun miro kaj konsterno mi demandas:
ĉu vi ne kredas, ke l' esperantismo
povos la mondon savi de l' abismo?
Kiel kutime, nia Majstro pravis –
tial, ke li klarvidan fidon havis
pri la kuracefiko radikala
de lingvo tuthomara kaj neŭtrala
al la sanganta suspektema mondo.
Ni estas fakte familia rondo:
kaj se kverelas ni – frat' fraton batas –
nu, kiel ĉiuj fratoj ni rilatas,
kiuj kverelas kaj pardonas poste,
ĉar parencaro estas ni ĝisoste.
B. Li kompreneble tion ne konstatas:
en li la antaŭjuĝoj sin dilatas,
en li pufiĝas la estimo pri si
tiom, ke esperanto devas kisi
postaĵon lian, ol li ĝin rekonas.
Kaj dume mi avide min fordonas
al la afero, kvazaŭ kavaliro
luktanta por amkrono ĉe turniro,
aŭ kvazaŭ juna, voluptula ardo,
en kiu vekas virga malsingardo
esperon pri estonta maldiskreto.
Ja ne mirinde; estas mi poeto.
C. Poeto! Poezio! Tempmalŝparo,
kiun mi malpermesus per leĝaro!
Anstataŭ revi knabinetsimile,
kial vi ne okupas vin utile?
A. Li ja troigas iom, sed –

C. Kaj via
adoro estas pseŭdoreligia
naiva stulta sonĝo. La naturo
de la homaro baras al sekuro.
Batali kaj malami estas emoj,
kiuj peladas homojn al ekstremoj
kaj pelos ĝis la mondofin' drakone.
Praktikaj homoj scias tute bone,
ke l' revo pia estas rev' opia.
A. Via sinteno, ulo, estas fia.
B. Nu, lasu, Eble pravas li finfine.
A. Tion mi ne akceptas.
B. Ankaŭ mi ne.
Sed kiu scias en ĉi universo
ĉu pravas konstruado aŭ renverso?
Dialektiko de la flus-refluo
eternas en konstruo kaj detruo;
elektas sian vojon ĉiu homo
laŭ interpreto de la propra kono.
A. Tia herezo estas plej danĝera.
Nur homo senmorala, senespera,
povus proponi tian – blasfemadon!
Alstrebi tuthomaran pacan staton
estas deviga laŭ ordono dia.
Obstine iros mi laŭ vojo mia.
B. Kaj mi kuniros. Ne pro diordono,
sed pro persona, pela kredbezono.
Pri pacebleco kredi mi preferas,
jen ĉio. Kaj la lingvo rave belas...
Kaj vi, praktika homo – nu, praktiku.
Zorgu, ke via ventro ne maldiku.
Ni fosu nian propran sulkon kaj
la sort' decidu. Ĝis!
A. Ĝis la!
C. *Goodbye.*

W. Auld

el LA JUBILEA EPOSO

Plej karaj geamikoj! Vi aŭskultis
rakonton, kie svarmis kaj tumultis
la nomoj de personoj eminentaj,
kiuj per laboregoj diligentaj
la torĉon portis alte de l' Afero
en plej diversaj landoj de la tero.
Nun laste mi prezentas unu homon:
li havas ja nek nomon, nek renomon,
sed estas li plej grava el la tuto
kaj, pli ol ĉiuj, inda je saluto.
Li estas la ADEPTO ANONIMA,
kiu en ĉiu loko, kun senlima
obstino kaj dediĉo kaj modesto,
laboras sen rekono, sen atesto,
por nia kara lingvo. Li plenumas
volonte ĉiajn devojn, kaj konsumas
ofere sian tempon kaj rimedojn,
senplende elportante ĉiajn tedojn.
En li, ĉar li la lingvon kore amas,
la fajro de l' fervoro pure flamas
sen penso pri mencio kaj agnosko.
Sed certe nia Esperanta bosko
el li kaj liaj fratoj konsistiĝas,
kaj dankan penson ni al li dediĉas!

R. Rossetti

IDOLFALO

Defalis la idolo kaj lia gloro mortas...
Statuojn liajn ĉie disbatas martelfrapoj.
Oni jam lian laŭdon ne kantas kaj ne vortas,
forstrekas lian nomon el libroj kaj el mapoj.

Laboris la popolo kaj kreis grandan, novan,
mirindan kaj heroan. Li brilis kaj sentencis,
kaj ludis ĉioscian kaj ludis ĉiopovan
kaj la Homaran Lingvon ekstermi li intencis.

Juĝisto mi ne estas, nur esperanta homo,
sed – Mene Tekel – legu flamskribe la misteron:
La famo estingiĝos kaj forgesiĝos nomo
al tiu, kiu volas estingi nian stelon!

E. Baranyai

ABSURDAĴO

Ni ĉiuj parolas
la saman lingvon,
la nederlandan.
Mi konas la vortojn,
sed mi ne komprenas.

Por distro
mi lernis Esperanton.

Nun mi komprenas
kelkajn samlandanojn.

R. de Jong

JAPANA KONGRESO EN PLUVEGO

Pluvego daŭris
dum la kongreso, kvincent
ĉeestis, laŭdis
okdekjaran jubileon,
kortuŝe ĝis la lastmoment'.

Brue delektas
torenta pluv' ekstera,
trankvile spektas
ni filmon esperantan
en hal' bonatmosfera.

Pluveg' benite
ĉesis, laŭ Dia favor'
ni translokite
kunsidon veteranan
ĉeestis, ŝajne elite.

En memorplena
ĉambro por pioniroj
per voĉ' serena
ŝprucis la epizodoj
pri l' meritplenaj klopodoj.

En memorenda
kunvenejo, florbedo
de l' eminenta
ermitar' kun multaj floroj
historiaj kaj gloroj.

Ĉiu impetis
teretaĝon por lunĉo
blanke pluvetis,
regis silent' akceptejon,
mi per fotil' portretis.

En koridoro
sonas gaja parolo,
ĉu amatoro
japane, aŭ kun pudoro
lispas helpe de sufloro.

Kulis' obskuras,
ludontoj penas parkeri,
jen kaj murmuras
kaj ĝemas poste viktimoj!
ĉar neniam for timoj.

Aplaŭdo tondris
ĉe l' emfaz', ke Esperant'
sendube montris
sinteze dialektikan
lingvon por monda pacamant'.

En ferma salut'
pro ekscesa sentiment'
kun iom balbut'
mi stumblis ŝajne pro tro
tarda parolo en fragment'.

Himnoj alfluis
al fantomkandeloj sur
podi', plenĝuis
etoson de l' kongres' en hal'
ĉiuj ĝis post kurtenfal'.

Tramo ne venis,
ne ĉesis ŝutoj da pluveg',
paŝon ni prenis,
ŝajnis ke memorplena
kongresa ĝoj' nin trenis.

Post longa paŝad'
vizitis ni bierhalon,
el cerba kaskad'
ŝprucis, interbabilis,
ebria mens' subtilis.

Intime levas
glason da bier' toste,
paroloj revas
pri la dom' esperanta,
voĉoj ardis ĝisoste.

(en vespera trajn' en ŝtormo)

Bruo torentas
sur fenestroj pluvabund',
ĉiuj atentas
l' anoncon kondukistan:
rompis trafikon inund'.

Ekspreso kuras
tra profunda tenebro
pluveg' teruras
frapegi l' vitrojn fenestrajn,
lasante nin en korfeblo.

Olda virino
demandis time, kie
estas trajnfino,
ĉu mi atingos ĝis Kobe?
Laŭ tempesta destino!

M. Kuroda

LA PLENUMO

En ĉiu lando, ĉiu ŝtato, dediĉite kaj defie
Troviĝas la konantoj de l' komunikilo homa
Ni avangardas mondon, kie la homaro ĉie
Parolos senkatene en komuno idioma.

La majstra revo estis prava, disvolviĝis la realo
Ne vana estis fid' de l' pioniroj kaj martiroj
Ĉar ni hodiaŭ amikiĝas unulingve en egalo
Kaj spertas jubilante plenumiĝon de l' aspiroj.

Nacioj de la mond', atentu! Paca kunlaboro eblas
Sen ombroj de suspekto, nekompren' kaj vortobstaklo
En mateniĝo de la mondo, nia arda flam' ne feblas
Sed lumas jam konstante kiel signo de l' miraklo.

W. *Auld*

Aliflanke

GUTO

"Eĉ guto malgranda
konstante frapante..."
(progresas, ho Dio! –
tro lante!)

Ŝ. Urban

LA MISVOJO

Post densa mallumo ekzistas abismo,
Al kiu la lingvo rapidas;
Ni semas malfidon per simpla sofismo,
Kaj certan disfalon ni vidas.
Kaj nin ne konvinkos eĉ pruvoj po miloj,
Aŭ klaraj rezonoj, aŭ bonaj konsiloj,
Ĉar ĉiel malhelpi jam de la komenco
Ni celas kun firma intenco.

Nur fuŝa, malbela, sen ia sukceso,
Ni vidas nepropran laboron.
Eĉ guto acida, falante sen ĉeso,
Doloras plej gajan la koron.
La moko, la rido, la indiferento,
Jen estas la iloj, en ĉiu momento,
Per kiuj ni provas, verŝante sarkasmon,
Velkigi la entuziasmon.

Ni plendas kaj plendas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj pasintaj pensante;
Cent horoj perdiĝas, mil horoj perdiĝas,
Ni plendas kaj plendas konstante.
"Laboru kaj fidu!" la homoj nin petas,
"Neniam!" en ĥoro ni krie ripetas,
Obstine gruntante – neniu nin dankos,
Sed tamen la plendoj ne mankos.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
  Velkintajn foliojn disĵetas,
Ni helpos la venton, kaj, refortiĝintaj,
  Ni plenan disfalon profetas.
Eĉ kiam la krizo jam estas pasinta,
Kaj fido en koron denove veninta,
Obstine ni tedas per malpropagando
  La homojn tra tuta la lando.

F. Redondo Ituarte

ESTAS MI ESPERANTISTO

Verda stelo sur la brusto
iom palas pro la rusto.
Mi ne estas purigisto;
estas mi esperantisto.

Kuŝas ie sub tegmento
"Netuŝebla Fundamento".
Tuŝu ĝin nur la Mefisto;
estas mi esperantisto.

Polvkovrite sur bretaro
putras mia SAT-vortaro.
Tedas min la vorto-listo;
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas
kaj gazeton ne abonas...
Librojn legu la verkisto;
estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido:
"Bonan tagon! Ĝis revido!"
Ĝi sufiĉas por ekzisto;
estas mi esperantisto.

Pionirojn mi kritikas,
la gvidantojn dorne pikas
kaj konspiras kun persisto;
estas mi esperantisto.

Por la venko mi esperas,
sed nenion mi oferas.
Mi ne estas ja bankisto;
estas mi esperantisto.

Se baraktas en la krizo
la movado, organizo,
helpas mi nur per rezisto;
estas mi esperantisto.

Flugas per facila vento
el la buŝo Nova Sento.
Ĝi sufiĉas por sofisto;
estas mi esperantisto.

Post la mort' ĉe tombo mia
staros "rondo familia",
nekrologos ĵurnalisto:
estis li esperantisto.

J. Baghy

DESPERANTO

Dolĉe sonas via nova nomo,
ho Espero! nia bela vorto!
En la nokto plena je sopiro
vi, Espero, estas eliksiro,
sed nur eliksiro sen la forto.

Kontraŭ ĉio estas vi rimedo,
kiel kontraŭ superakvo muro,
sed vi estas sabla bariero,
ĉiam disfalanta en aero,
sed ni kredas je vi sen murmuro.

Tre agrabla vere estas sonĝo,
ankaŭ sonĝo pri la estonteco,
pri senĉesa homa harmonio,
unu amo, unu familio,
– sukeraĵo por la infaneco.

Ni atendas vane tempon belan,
kiam regos sole via nomo.
En eterna monda karuselo
vi Espero restos ĉiam stelo,
ĉiam malproksima por la homo.

Eĉ se iam jena tempo venos
post jarmiloj, kaj post miliardo,
tiam ree homon batos homo,
sed li batos lin en via nomo –
ankaŭ kun la stelo sur standardo.

S. Schulhof

NIA PLIMULTO

Faskoj da taskoj, polvero da solvo,
multaj projektoj, konjektoj.
Tiel ni paŝas, vizaĝojn ni kaŝas
en dika volvo de maskoj,
fie konspiras, sed pie jen miras,
ke LA MOVADO senmovas;
sensalas la salo, sed kia kialo,
neniel diveni ni povas.
Okulo kun trabo rigardas kun strabo
al ligneret' de l' najbaro.
Ho, ni vulpegoj kun multaj kulpegoj!
Abundas parol', mankas faro.

H. Adamson

PROPAGANDO

I

Esperanto estas lingvo –
  Nome lingv' internacia;
Taŭgoplene ĝi ebligas
  Trakton pri afero ĉia.

La uzantoj, la ĉieaj,
  Samsentante – kun fiero –
Aladaptis tri devizojn:
  "Koro, ĝojo kaj espero".

Alproprigi ili celas
  Al la homo la homecon;
Kvazaŭ eblus plibonigi
  La malvirtan homan specon.

II

Nun ĉar mi ne volas vane
  Senutilajn vortojn sterni, –
diru mi, pri Esperanto,
  Kiel oni povas lerni.

Se reklamas oni multe
  Pri mirakla lernfacilo, –
Tion prave malverigos
  Mem aŭtoro de... lernilo.

Kaj por pruvi la aserton,
  Mi dissekcos Esperanton;
Prie, kolerontoj, sciu: –
  Mi akceptos ĉies ganton!

III

Vere estis tre genia,
  De la lingvo la kreinto;
Plenperfekte li ĝin kreis
  De malsupre ĝis la pinto.

Gramatikon li elpensis,
  Kun reguloj sen esceptoj;
Ĵus eksciis – tuj aliĝis
  Mi al liaj jam adeptoj.

Paŝ' post paŝo, doz' post dozo,
  Ĝoje min instruis ili;
Post kelkfoja instruado,
  Mi sukcesis eĉ... babili!

IV

Sed babilo ĉiam sama,
  Kun demandoj pri la farto,
Min kredigis ke de l' lingvo –
  Tio – estas tuta parto.

Do, klarigojn mi postulis,
  Kun respektoplena peto;
Sed la demandit' respondis:
  Ne demandu – ĉar sekreto!

Kiom ajn dubadu, – ĉefas
  Ke la lingvo ĉiam floru;
Do, devizon lernu plian:
  Vi nur kredu – ne esploru!

V

La vortar' – malgranda peno,
  Ĉar sufiĉas unu jaro
Por kompreni la estecon
  De la teda afiksaro.

Por plenĝusta kaj turmenta
  Uzo de l' akuzativo –
Ho! – laŭŝajne – ne sufiĉas
  Eĉ la daŭr' de tuta vivo.

Nun ĉar mi ne volas plue,
  Prie, trompe onin tedi, –
Sciu: – mi la lingvon frue
  Povis tamen ekposedi.

M. Beraru

EN NIA LANDO

. . . En nia land' fiere kreskas
  Abioj, kverkoj, fagoj;
En nia land', fanfaronuloj
  Parolas nur pri . . . agoj.

... En nia land' abunde kreskas
  Karotoj kaj rafanoj;
En nia lando nur babilas
  La gesamideanoj.

... En nia land', plej belaj kreskas
  Kukurboj kaj kukumoj;
En nia land', malofte sekvas
  Promesojn la plenumoj.

... En nia lando floras rozoj,
  Violoj kaj diantoj;
En nia lando, nur titole
  Ekzistas grupgvidantoj.

... En nia land' abunde fluas
  Biero, vino, brando;
En nia land', nenion preskaŭ
  Efikas propagando.

M. Beraru

NOVA KOLONIO

Jen grava, feliĉa eltrov'
de samideano Ĥitrov,
plej sperta koloniisto
kaj brava esperantisto.
Ni havos baldaŭ kolonion, –
almenaŭ, ni esperu tion.
Kaj tie, sur la ĉefa bulvardo,
eterne flirtos verda standardo;
en mezo de la centra placo
la tombo estos de l' malpaco.
Sub ŝirmo de ŝtatoj protektaj,
vivados tie nur homoj perfektaj;
kaj tie virinoj ne emos al klaĉ',
poetoj ne rimos per "fi" nek per "aĉ".
Ekzistos tie nur bonaj salutoj;
neniam okazos... lingvaj disputoj!

El ĉiuj mondanguloj
veturos tien gekoloniuloj.
Mi ankaŭ veturos – por... esploroj,
sed vivos laŭ malnovaj moroj.
Kaj tial, sur tiu perfekta insulo,
mi estos la sola strangulo.

M. Beraru

VERDAJ PLENDOJ

La esperanta instruisto konstatas,
ke malbone la afero statas,
ke la diligento
forflugas kiel facila vento,
ke la dek ses reguloj
senlerne kuŝas en anguloj,
ke la scio de la kompanio
estas neta nenio
ĉe la fino de la kurso...
Kaj li murmuras kiel urso.

La esperanta propagandisto konstatas,
ke liajn prezentadojn oni ne ŝatas,
vanas la paroloj anemiaj,
freŝaj faktoj antaŭdiluviaj
kaj multvorta nenidira stilo...
Do li ploras kiel krokodilo.

La esperanta eldonisto konstatas,
ke lia monujo terure platas,
ke librojn li ne vendas,
ĉar la vera esperantisto,
kun admirinda persisto
neniam ion aĉetas aŭ mendas,
nek amdelirojn de poetoj,
nek revuojn aŭ gazetojn,
malgraŭ ties malavaraj aroj
da preseraroj.
Do admonojn pri libromendo, abonpago
li ripetas kiel papago.

La esperanta grupkasisto konstatas,
ke la grupa kaso fastadas,
ĉar la membroj observas la devizon
esperantistan,
ĉiorezistan:
Neniam pagi kotizon!
Tial do li, preskaŭ sen okupo,
hurlas kiel malsata lupo.

Sed ili plendu kaj plendu,
nin, "kavalirojn de alta ideo",
ilia plendo kaj veo
neniel por tio tentu,
ke ni per lingvolerno nin turmentu,
novajn propagandmetodojn inventu,
gazetojn – eĉ propralandan – mendu,
kotizon al la kasisto sendu,
sed admonojn ni malatentu,
nur krokodilu aŭ silentu,
indiferentu,
maldiligentu
kaj restu bonaj esperantistaj tipoj:
nin zorge gardu de labortroo,
en la esperantista zoo
ni estu la bradipoj.

H. Dresen

ESPERANTISTO, EKESTO KAJ MALAPERO

Gazetartikolo
Aŭ varba parolo.
Favora impreso,
Ekintereso.
Lernolibro,
Sankta vibro,
Propaganda miasmo:
Entuziasmo!

Samideano,
(Je via sano!)
Kamarado,
Varbado,
Instruo,
En butontruo
Verda flago,
Glora tago!

Plua ŝtupo
Nova grupo.
Nova sento,
Facila vento
Kaj poemo
Pri sama temo!
Post hezito
Delegito.
Laŭ bezono
Gazetabono,
Kotizoj
Kaj valizoj
Por kongreso.
Miraklimpreso!
Fraka vesto,
Bala festo,
Naci-kostumo,
Amindumo.
Hispanino,
Korinklino
Kaj esperoj,
Amleteroj.
Mielo,
Ĉielo!
....
....
Edzino:
FINO!

R. Schwartz

ESPERANTA ELIKSIRO

Ĉu vi jam konas l' eliksiron
De famkonata profesoro
Por faciligi la akiron
De nia lingvo – sen doloro?

Se ne, ĝin provu, ĉar efike
Ĝi helpas ĉiam, sen escepto,
Kaj se vi volas, mi amike
Al vi parolos pri l' recepto:

Vi ĉiutage unu glason
De tiu ĉi likvoro trinkos
Kaj vi ekscios tuj amason
Da faktoj kiuj vin konvinkos!

L' unuan tagon jam perfekte
Vi konos nian Fundamenton,
Vi propagandos eĉ infekte
Kaj kun fervor' la Novan Senton!

La duan tagon vi senmanke
Jam sendos multkolorajn kartojn
– Kun la poŝtmarko eĉ bildflanke –
En nekonatajn mondopartojn!

La trian tagon vi science
Diskutos jam pri "ujo-io"
Kaj apartenos konsekvence
Samtage al l' Akademio!

La kvaran tagon vi ver-vere
Tradukos je l' unua vido
Facilan tekston kaj fiere
Jam diros flue "Ĝis revido"!

La kvinan tagon gajmiene
Vi ekĝojiĝos pri l' konstato,
Ke vi komprenas jam senpene
Vortludojn de la Verda Kato!

La sesan tagon, ho amiko,
Vi venke staros ĉe la celo,
Kaj jen sur via umbiliko
Kvinpinte kreskos verda stelo!

. . . .

Sed nun, ne trinku plu glaseton!
Vi perdus mensan ekvilibron
Kaj vi eldonus... aŭ gazeton
Aŭ nelegotan novan libron!

R. Schwartz

BONAN MATENON, MAJSTRO

Bonan matenon, Majstro! Sidiĝu, mi petas.
Kiel vi fartas post kvindekjara malvivo?
Bonvolu fumi. Nu, vi certe enketas
pri la Movado, kaj l' nuna perspektivo?
Nu, ni laboras. Sed – vi scias – la homoj
estas inertaj, altaj estas la baroj,
malfavoras l' epoko; militoj, pogromoj
minacas; nin ignoras la registaroj.
Jes, jes, en via tempo, estis simile;
vi tamen ne povas kompreni, kio nin frontas –
atingi l' orelojn estas malfacile,
kaj kiam la homoj mokas nin, ni hontas.
Nu jes, vi multe oferis. Ni mem kelkfoje
donacis kelkan monon, sed ni malriĉas.
Ne pensu, ke ni nenionfaradas survoje!
Al ata-ita ni multe da tempo dediĉas!
Mi diris, ke per ignoro stulte obstina
la registaroj aŭskulti nin rifuzas?
Eĉ pli malbone – la registaro ĉina
por siaj propraj celoj la lingvon *uzas*!
Ni lernis la lingvon, kaj kiam ajn ni kunvenas
ni krokodilas... Kio? Ja nacilingve
babili... Ĉar komencanto ne komprenas,
kiam ni Esperanton parolas svinge.
Nu, Majstro, estis agrable... Ĝis la revido;
ĝojos pro via vizit' la samideanoj.
Vi povas reiri la tombon kun forta fido,
ke via afero troviĝas en bonaj manoj.

W. Auld

8
INTERNACIA LIRIKO

Pluraj dekmiloj da poemoj estas tradukitaj en Esperanton. Mi decidis registri la preskaŭ tutmondan uzadon de Esperanto, represante po unu poemon el kiel eble plej multaj lingvoj. Oni ne povas "reprezenti" iun lingvan kulturon per unu sola poemo, tial mi tion ne provis. Anstataŭe, mi elektis ĉiufoje poemon, kiu ial aŭ alial plaĉas al mi persone, esperante, ke ĝi plaĉos ankaŭ al multaj legantoj. La celo ne estas eksponi la naciajn literaturojn, sed montri la kapablecojn de Esperanto.

W. A.

Afrikansa

LA DANCO DE LA PLUVO

Ho la danco de nia Fratino!
Unue trans la montsupron ŝi gvatas,
    kaj l' okuloj hontemas;
        kaj ŝi ridas softe.
Kaj de fore ŝi gestas per unu mano;
la braceletoj brilas kaj fulmas la bidoj;
        softe ŝi vokas.
Ŝi rakontas al la ventoj pri l' danco
kaj invitas ilin, ĉar la korto larĝas
                kaj grandas la nupto.

La ĉasbestegoj impetas fro l' stepo,
    digiĝas sur la altaĵo,
larĝe streĉas la naztruojn
    kaj glutas la venton;
kaj kurbas sin, por sable vidi ŝiajn fajnajn spurojn.

La pita popol' profunde subtere aŭdas la trenon
                                de ŝiaj piedoj,
    kaj rampas pli proksimen kaj kantas softe:
        "Nia Fratino! Nia Fratino! Vi venis!
                                Vi venis!"

Kaj ŝia bidar' skuiĝas,
kaj l' kuproringoj brilas en la sunforiĝo.
    Ŝiafrunte fajras la plumo de l' montvulturo;
        ŝi sobtretas fro la altaĵo;
    ŝi sternas dise la falvan karoson ambaŭbrake;
        foriĝas la spiro de l' vento.
        Ho, la danco de nia Fratino!

Eugène Nielen Marais
trad. E. de Kock

fro = ekde, disde; *karoso* = felkovrilo uzita de la Boŝmanoj kaj iam ankaŭ iuj aliaj indiĝenoj en la sudafrika regiono; *pita* = malgranda; *sob* = malsupren (vidu PIV)

Albana

LA KANTO DE PAL GOLEMI

Je la dua hor' ĉi-nokte
Aŭdebliĝis forta ĝem';
Ĝemo ne, sed Pal Golemi,
Pal Golemi, la vundita,
La kunulojn petis li:
"Vi kunuloj kaj vi fratoj,
Mi insiste petas vin,
Faru tombon en la ter'
Same larĝan kiel longan,
Kaj kaploke de la tomb'
Faru vi por mi fenestron,
Kartoĉujon al mi lasu;
Piedloke de la tomb'
Lasu al mi la armilojn!
Tiam skribu vi kaj diru,
Diru vi al mia panjo,
Kudru ŝi por mi ĉemizon
El la propra blankharar';
Kaj ŝi brodu la ĉemizon
Per la sang' de sia vang';
Kaj ŝi lavu la ĉemizon
Per la larmoj de si mem;
Ŝi sekigu la ĉemizon
Per la flam' de sia kor';
Ŝi alsendu la ĉemizon
Kun la propra plorĝemad'.
Skribu al belino mia,
Brodu ŝi por mi poŝtukon
Per la sang' de sia vang'.
Kaj, se ŝi ne edziniĝis,
Diru, ke ŝi povas jam.
Iru ŝi en la preĝejon,
Ŝi sin turnu al la plac',
Por kunulojn miajn vidi;
Unu ĝemon ŝi eligu,
Unusolan ĝemon laŭtan,
Por ke eĥu la preĝej'!"

trad. Miloŝ Lukaŝ

Alemana

VINTRA NOKTO

Ne ekblovis eĉ plej milda vent',
Super neĝo blanka regis pac'.
Sen nubet' la stela firmament',
Per glaci' kovriĝis lag-surfac'.

El la fund' lag-arbo levis sin,
Ĝis malhelpis la glaci-tavol';
Grimpe venis ĝis la pint' niksin',
Supren ekrigardis kun scivol'.

Baris ŝin maldika vitro nur,
Sur ĉi vitro staris mi en mut',
Tuj sub mi tra la glaci-spegul'
Brilis ŝia bela blanka nud'.

Serĉis elir-eblon tra glaci'
Ŝi kun subpremita ĝema plor',
Ne forgesos ĉi vizaĝon mi,
Ĉiam, ĉiam gardos ĝin memor'!

Gottfried Keller
trad. H. Dresen

Angla

LA TIGRO

Tigro, tigro, brile brula
En arbaro nokt-obskura,
Forĝis kia man' eterna
Vin je simetri' konsterna?

En kia fundo aŭ ĉielo
Ardis via okulhelo?
Kia lin flugil' subtenis?
Kia man' la fajron prenis?

Per kiaj ŝultro kaj kompreno
Por vi tordiĝis kortendeno?
Kaj kiam pulsis batoj koraj,
Kiaj pied' kaj mano gloraj?

Kia martelo? Ĉeno kia?
Kia forn' por cerbo via?
Riskis kia fort' kolosa
Spiti al terur' ambosa?

Kiam steloj sin malarmis
Kaj sur la ĉielon larmis,
Ĉu la verko al li karis?
Ĉu vin Ŝafid-farinto faris?

Tigro, tigro, brile brula
En arbaro nokt-obskura,
Forĝus kia man' eterna
Vin je simetri' konsterna?

William Blake
trad. W. Auld

Araba

EPIGRAMO

Scion de la gramatiko, ĉielo
forrabis de Naftoveo*,
tial en tiu scienco nobela
ne estas li korifeo.
Lasu lin Dio forbruli en flamo
de lia nomokomenco!
Restu de li, je memor' malaklama
nomfin', la verko-kadenco...

Ibn-Durajd
trad. J. Kohen-Cedek

* Naftoveo (= Naftavaj) estas la nomo de konkuranto de la poeto. Kompreneble, *Nafto* + *ve*!

Armena

LA LITO DE L' PAŜTISTO

De l' paŝtisto tuta vivo
pasas sur la montdeklivo;
mantel' malnova tegas lin,
sur tero dormas li sen tim'.

Ŝtono kuŝas sub la kapo;
kaj li, malgraŭ pluvofrapo,
sonĝas dolĉe, sen agit'
sur sia tre malmola lit'.

Popolkanto
trad. Francisco Valdomiro Lorenz

Asanta

LA REGNO DE LA MORTINTOJ

Se postmorta regno ekzistas laŭ diro
Kie vivos l' animo post lasta spiro,
Mi mortu. Preferas mi tie resti
Kaj kun la gepatroj tie kunesti,
Ol turmentojn suferi sur tiu ĉi tero.
Amikoj, min detruu. Laŭ mia prefero
Forlasu mi pekon, avidon, malbonon.
Al la Regno min sendu. Mi dankos la donon.

Ko Nimo
trad. Albert Goodheir

Babilona

DIALOGO

– Sklav', obeu min!
– Jes, sinjoro, jes.
– Mi virinon volas ami.
– Amu, ho sinjoro, amu!
Amo estas zorgforges'.
– Sklav', mi ne volas ami tamen.
– Prave, ho sinjor', ne amu!
La virino estas kavo,
estas brulvundanta torĉo,
estas akra fera glavo,
kiu tranĉas tra l' virgorĝo.

– Sklav', obeu min!
– Jes, sinjoro, jes.
– Tuj alportu akvon kure,
mi, lavinte manojn, pure
volas oferi al diec'.
– Faru, ho sinjoro, faru!
Kiu al sia di' oferas,
tiu gajos en la koro,
pruntedonojn aglomeras,
repagotajn per favoro.
– Sklav', mi ne oferos tamen!
– Prave, ho sinjor', ne faru.
Ne bezonas vi imposti,
vi instruos vian dion,
ke li hunde kuru post vi,
se li volas de vi ion.

– Sklav', obeu min!
– Jes, sinjoro, jes.
– Mi bonfaros al la lando
en bezono de neces'.
– Prave, ho sinjoro, faru!
Kiu al la land' bonfaras,
ke li prosperon ĝian gardu,
ties far' eterne staras
en la urno de dio Marduk.

– Sklav', mi ne bonfaros tamen!
– Prave, ho sinjor', ne faru!
Se vi tretas murruinojn,
aŭ en la tombej' promenas,
vidu tie la kraniojn,
novan aŭ antikve-ŝiman,
kaj vi certe ne divenas,
kiu el ili apartenas
homon justan, homon kriman!

– Sklav', obeu min!
– Jes, sinjoro, jes.
– Kio do nun estus bona?
Fini tute la aferon,
mian kolon, vian kolon
rompi, droni en riveron,
sklavo, tio estus bona!
– Kiu longas ja sufiĉe
por atingi la ĉielon,
kiu larĝas ja sufiĉe
por plenigi tutan teron?
– Sklav', mi vian kapon fendos,
vin transmonden antaŭsendos.
– Do postvivu min ne pli,
ho sinjor', ol tagojn tri.

trad. K. Kalocsay

Belorusa

KVINMINUTA KUNVENO DE VESPER' ĜIS MATENO

Diras en ofickunveno
mia ĉefo Valenteno:
– Povas nur laboro ŝpara
helpi al la plan' kvinjara.
Do, memoru la koleg'
rublon naskas la kopek'!
Ni komprenu temp-valoron
ja minutoj kreas horon!

Por admon' pri ŝpar' minuta
langis li dum... horo tuta.

Miĥas Harnak
trad. Romano Grinŝpan

Bengala

KARINJO, ĈU DECAS TIEL

Karinjo, ĉu decas tiel
adiaŭakcepti?
Nu, tremrid' okulangule
eblas jen percepti!
Tiomfoje re kaj re
mi false adiaŭis, ke
vi pensas, "Ha, neniam
forirontas tiu viro –
li revenos nepre post la
ĉeporda rondiro."

Se vi min demandas, do mi
nepre ja honestos:
eĉ mi pensas, ke mi baldaŭ
re ĉi tie estos.
Mart', aprilo sin ripetas,
noktoj lunaj re ridetas,
floras nudbranĉe bakuloj*,
nek ili forsvenas,
post milfoja adiaŭo
ili ja revenas.

Kelkan iluzion tamen
tenu en la menso,
la mensogon ne nuligu
tuj sen pacienco.

bakulo = bonodora, blanka, stelforma floro de bakularbo, mezgranda ĉiamverda arbo kun densa krono

Por moment' – erare, eble,
estu larmo surpalpebre
kiam mi patose diros,
"Tempas por foriro".
Kiam mi revenos, tiam
ridu ja pri l' diro.

Robindronath Tagor
trad. Probal Daŝgupto

Bulgara

PUBLIKULINO

Eklulis vin en sia sino sort' mizera
jam en la vivaŭror';
ĉe falsa violon' de ekzistad' surtera
vi dancas kun aflikto en la kor'.

La nokto – vicpatrin' – turmentas vin per timo,
kruela kiel lup',
forrabas la narcison lastan de l' animo,
malsuprentiras vin laŭ nigra ŝtup'.

Kun via pek', sub bril' elektra, vi promenas
kaj festas kun avid',
ridante tiel, kvazaŭ vi mem ne komprenas
la doloregon de la propra rid'.

Kaj per velkintaj ciklamenoj ornamita,
vi mem velkinta flor',
ebria de la tromp' revenas frakasita,
por senti la Malsaton kun dolor'.

Jen pendas tie la infanportreto sama,
kroĉita al la mur' –
en la rigardo klara de l' virgec' iama
vi legas nunon vian kun terur'.

Kaj ĉiam tiel... Sed dum la aŭtun' malvirta
de via bel', la Mort'
neatendite haltos senindulga, hirta
ĉe via malŝlosita hejma pord'.

Sed, etendinte brakojn por animon preni,
Ĝi mirrigardas vin:
la ĉiopova Viv' sukcesis antaŭveni –
delonge jam vi estas sen anim'!...

Hr. Smirnenski
trad. Simeon M. Simeonov

Ĉeĥa

LA FRAŬLINO EL LA KVARA ETAĜO

Tuttagon bruis stebmaŝin',
mi ĉambre aŭdis la stebadon.
Sidadi super kudroplato
mi ĉe fenestroj vidis ŝin.
Ŝi al mi ridis jam el for'
kaj tranadligi la fadenojn
mi gvatis ŝin el koridor'.
Por mi kolektis ŝi bobenojn.

Fenestren ombro falis nur,
sun' sub tegmento daŭre foris.
Ĉar floro ĉe ŝi ne disfloris,
restis sen ĝi fenestra mur'.
Super maŝino ĉe l' kudrad'
ŝi ĉiam kantis, kaj ŝi emis
morti en tiu trista kant'.
Mi ĝin ankoraŭ ne komprenis.

Ĉemizojn kudris ŝi laŭ mend',
voĉ' ŝia al mi molis tiel.
Ŝi kudris eĉ porkonfekcie
bluzojn el tol' kun ornament'.
Ŝi estis bona. En milit'
por mi bombonojn ĉiam havis:
violajn kun la florimit',
abel' sur la mielaj flavis.

Tra l' domo iris kalumni',
mi, nebonvene, kelkon aŭdis,
dum najbarinoj ŝin mallaŭdis,
pro kio tre malĝojis mi.
– Li ŝin edziĝi? Kia pens'!
– Kaj tamen ŝi lin trovas kara!
Sed mi do amis por kompens'
tristan fraŭlinon el la kvara.

Iam al ni eĉ venis ŝi,
panjo ŝin ŝatis. Sen repliko
por spic' mi devis al butiko.
Nura preteksto estis ĝi.
La neaŭdotan tiam, jen,
mi tamen aŭdis – plorimpeton.
Post mia kura hastreven',
ŝi ploris super kaftaseto.

Bombonojn ŝi kun malavar'
donis al mi, la silkajn, grandajn.
– Knab', ĝuu tiujn ĉi, la frandajn.
Ŝi min karesis sur harar'.
Eliris mi al koridor',
Frunton al krad' premiĝi lasis;
subite min ekskuis plor'.
Ja kio nur kun mi okazis.

Foje de supre kun insist'
iu korŝire ekĝemegis.
Poste en dom' konfuzo regis
kaj haste venis kuracist'.
En trista ej' sen florornam'
kun bru' subite homoj aris.
Mi vidis nur, ke ŝia man'
de la brankard' senpove falis.

Forknaris ĉar', ekmutis dom',
lund' estis – ree koridoro
aromis de brasikodoro,
plu iris viv' en monoton'.
Antaŭ mi maskon ŝiris for
de nekonaĵoj kies mano?

Preteris min mister' de mort'
kaj eĉ la pli mistera amo.

Jaroslav Seifert
trad. Jiří Kořínek

Ĉina

LONGA DISIĜO

Pluraj printempoj pasis, sed ne venas li ankoraŭ.
Ĉe l' jadfenestro ĉerizuj' kvinfoje jam en floro.
Leteroj karesvortaj venis iam.
Ĉe l' malferm' nur ĝemis mia koro.
Tie sopir' turmenta,
Ĉi tie malespero.
La hararanĝon mi ne zorgas plu pro korsufero:
kirliĝas tristaj pensoj kiel neĝo sub ventpelo.
Lastjare al hejmenreven' mi penis lin instigi,
Ĉitiu-jare mi reskribis por lin rapidigi.
Blovu, ho blovu orienta vento,
La vagantan nuberon blovu al mi en la okcidento!
Vana atend'! Li ĉiam ne revenas,
Nur la falintaj floroj sur la musk' senbrue svenas.

Li Bai
trad. S. J. Zee

Dana

MORTTRAFITE

Balen' trafita de l' harpuna fero
kun buŝ' malferma fuĝas for de l' tero.

Al la profund' ĝi pro dolor' rapidas
kaj nur la supron pro spirad' revidas.

La akvon ŝaŭmvipadas ĝia vosto,
doloron sentas karno kiel osto.

Fukaron fendas ĝi kaj haringaron
kaj post si lasas sange ruĝan maron.

– Kaj kiel la baleno morttrafita
deziras morti sur la fund' kaŝita,

tiel mi vidis la profundvunditojn,
la ruzvenkitojn kaj la aĉtrompitojn

al dezertejoj kuri por stertori
kaj tie en sekreto sangoplori.

Jeppe Aakjaer
trad. Christian Heilskov

Estona

VI DIRAS: I

Ho ŝtrumpoj, vi finiĝi ne deziras!
Brulbuŝe serĉas mi sen pacienc',
ke venu jam finfine la komenc'
de l' tol- kaj puntoŝaŭmo... Vakse brilas

la blanka karno... Ĝue mi admiras
la haŭt-silkecon – kiel ŝtormatenc'
petalojn disŝutadas, kis-atenc'
per kisoj superŝuti vin aspiras.

Disĵetu ĉirkaŭ min la brakojn sorĉajn,
envolvu kvazaŭ per girlando flora,
min lasu suĉi viajn lipojn dolĉajn!

Ho, min akceptu, mia nesto mola!
En via okulpar' dum amkareso
pri pek' kuraĝa brilu la konfeso!

Marie Under
trad. Hilda Dresen

Feroa

ATLANTIS

Vindis ŝin la blanka ŝaŭm' facila de la maroj,
kaj ŝi lumis fosforeske en la pala lunradi',
bela kiel Brynhild Budladóttir, inter flamremparoj,
la princino svatrifuza, posedita de neni'.

Al mi ŝajnis ekmemori ŝin el malproksima ero,
– kiel en kantanta konko mueliĝas marmuĝad',
elegioj katenitaj en helika konkkarcero,
de Okeanos kantitaj kun Monsuno kaj kun Trad'.

Al mi ŝajnis vidi urbojn kun marmoraj belpalacoj,
kie paŝas elegante nobeluloj en la strat',
kaj popolamasoj svarmas en la parlamentaj placoj
antaŭ temploj konsekritaj al la dioj de la ŝtat'.

Kaj subite mi ŝin konis: la pastrino de Atlantis,
la legenda, altkultura, nun droninta land';
ŝi la homojn, bestojn, plantojn, vestale, dum ŝi kantis,
por printempa fest' konsekris, kun erantidgirland'.

* * *

Laŭ legendo Feroujo en la maro nordatlanta
kuŝas kie kuŝis iam la poetrevata land',
la pastrino de Atlantis, sian manon etendanta,
en nordvent' kaj fum' vestita, staras nokte ĉe la strand'.

Laŭ legendo tiu, kiu de ŝi havas nur ekvidon,
al la bluaj sonĝohaloj de l' profundo sekvas ŝin,
ŝi ridetas lin en dormon, sur lin ŝutas erantidon,
dum parencoj kaj amikoj ploras kaj funebras lin.

J. H. O. Djurhuus
trad. Povl Skårup

Finna

NOKTA STRATO

Por vekiĝi al tumulto taga
nokta strato dormas ŝtonprofunde,
luna lumo tra l' silenta spaco
ĉion kvazaŭ ĉerkon kovras punte.

Homoj ŝlosis sin trans muroj, pordoj,
viv' timema gardas sin interne.
Parkaj arboj staras neĝkovritaj
kvazaŭ volus dormi por eterne.

Tie ĉi mi, kun neniu, aŭdas,
kiel la silent' ensorĉe sonas;
eble temp' en nokto diafana
alte por la eternec' komponas.

Jen al vivo nin nenio ligas,
mort' egalas al amik' kaj frato,
tie ĉi nenion oni faras,
vivi, morti – sama cel' kaj stato!

Nokta strat' – fantom' de mort' en vintro,
plena de mistiko, ŝtonkalkana.
Vivo estas iluzi' freneza,
malsanuldelir', fabel' infana.

V. A. Koskenniemi
trad. Joh. Edv. Leppäkoski

Flandra

MAJTAGO

Ornamis sin la ĉerizuj'
per pompa vest':
maj' estas nun kaj iras li
al edziĝfest'.

Kiel longa pinglo, ĉiu branĉ'
per blanka vind',
kuŝadas nun en flora ing',
ja ĝis la pint'.

Li estis bela sub la prujn'
en vintra vent':
li belas nun milfoje pli
pro flora tent'.

Dum vintro estis lia bel'
de l' vivo bild',
kaj same kiel ombro, nur
vantec', malmild'.

Sed nun ne estas ombra ŝajn'
li, sed simbol'
de ĉarm', beleco, de vivem'
kaj de petol'.

Edziĝofest' kaj sunveter';
pro la promes',
somerknabin' atendas al
fianĉkares'.

Guido Gezelle
trad. Hector Vermuyten

Franca

EKZOTA PARFUMO

Se okulferme, en varma vespero de aŭtuno,
Enspiras mi parfumon de via brust' fervora,
Jen antaŭ mi sterniĝas feliĉa lando fora
Kiun blindigas fajroj de monotona suno.

Pigra insul' ĝi estas, dotita de l' Fortuno
Per strangaspektaj arboj kun frukto dolĉodora,
Per viroj kun fortika kaj svelta korp' kolora,
Virinoj kun mirinde sincera okulumo.

Via parfum' min gvidas al ravaj landoj varmaj:
Jen la haveno, plena de mastoj, veloj svarmaj,
Ankoraŭ tute lacaj de skuoj de l' mar-ondo.

Kaj la odoro verda de l' tamarisk', akanto,
Tra la aer' ŝvebante, ŝvelante en vasta rondo,
Miksiĝas en l' animo kun la marista kanto.

Charles Baudelaire
trad. G. Waringhien

Frisa

MARISTA KANTO

Ho, ne forgesu min, dum blovas milda vento
  Kaj buklaj ondoj ludas kun la ŝip',
Dum ĉe l' stiril' mi kantas en kontento;
  Ho, ne forgesu min!

Ho, ne forgesu min, kiam la stelomilo
  Super mi lumas kaj la paca lun',
Dum sonĝas vi sekure sub kovrilo;
  Ho, ne forgesu min!

Ho, ne forgesu min, kiam la ventoforto
  Min ĵetas ien ajn laŭ Dia vol',
Kaj staras antaŭ la okuloj morto;
  Ho, ne forgesu min!

Ho, ne forgesu min, dum ŝtormo furiozas
  Kaj vivo pendas de faden',
Dum fine ni al ŝnuro nin alkroĉas;
  Ho, ne forgesu min!

Ho, ne forgesu min, kiam la martorentoj
  Sin ŝutas sur senrega ŝip',
Kaj nin minacas ĉiuj elementoj;
  'Ho, ne forgesu min!

Ho, ne forgesu min, dum mergas nin la hulo
  Kaj sinkas ni al marprofund'.
Memoru min kun larmo en l' okulo;
  Ho, ne forgesu min!

E. Halbertsma
trad. Albert Goodheir

Gaela

VIRIN' GAELA

Ĉu vi ŝin vidis, granda Judo,
kiu nomiĝas Filo Dia?
Ĉu tian vidis vi labori
vitkampe dum vojaĝo via?

Sur ŝia dorso, grenofasko;
sur frunt' kaj vango, ŝvito sala;
kaj pot' argila, peza ŝarĝo
sur ŝia kapo kurba, pala.

Ĉarpentistfil', ne vidis ŝin
vi, "Glora Reĝ'" laŭ psalmaj vortoj,
ŝvitantan sub pezega korbo
sur la rokplenaj marobordoj.

Forpasis la printemp' nunjara,
kaj dudek same jam formortis,
de kiam ŝi, por bebojn nutri
kaj luon pagi, fukon portis.

Dudek-aŭtune ŝi maltrafis
kolorojn de l' someraj floroj,
kaj sur la blanko de l' vizaĝo
sulketojn fosis la laboroj.

Laŭ via ama eklezio
ŝia anim' perdite kuŝas;
kaj la laboro ŝian korpon
al la kvieta tombo puŝas.

La vivo pasis kvazaŭ fulgo
gutanta tra tegment' kabana;
dum tuta viv' ŝi nigre penis,
kaj grizas ŝia dorm' ĉiama.

Somhairle Mac Ghill-Eathain
trad. W. Auld

Germana

LORELEJ'

Ne scias mi, kion signifas
ĉi trist' en mia kor'.
Fabelo praa revivas,
ne pasas el mia memor'.

L'aer' freŝiĝis, vesperas,
kaj fluas Rejn' en trankvil',
la supro de mont' fajreras
de l' sunsubira bril'.

Virgino sidas plej bela
sur pint' en mistera glor'
kun brila ornam' juvela,
kaj kombas harojn el or'.

Ŝi kombas sin or-kombile
kaj kantas dum tio ĉi,
sonoras sorĉe, sopire
potenca melodi'.

Barkiston kaptas en barko
sovaĝdolora ekzalt',
li lasas ekster rimarko
la rifojn, rigardas al alt'.

Kun bark' la barkiston fine,
mi kredas, glutis rifej',
kaj tion faris fascine
per sia kant' Lorelej'.

Heinrich Heine
trad. K. Kalocsay

Greka

LETEO

Bonŝancaj la mortintoj, kiuj forgesas
l' amaron de la vivo. Kiam mergiĝas
la suno kaj krepusko alvenas,
ne ploru pri ili, malgraŭ via doloro.
Tiun horon soifas l' animoj kaj iras
al la kristala fontano de l' forgeso.
Sed l' akvo en nigra aliiĝos ŝlimo
se larmo gutos de persono amata.
Malpuran akvon se ili trinkos rememoras,
tra kampoj de asfodeloj pasante,
dolorojn dormantajn en ili.
Se ŝatas vi priplori en krepusko
ploru pri la vivantoj.
Forgesi ili deziras, sed ne povas.

Lorenzo Mavilis
trad. Despina Patrinu

Gvarania

AL LA PATRINO

Mia kara patrineto,
verson teksas mi por ci,
en ĉi tiu vorto-reto
kantu mia emoci'.

Multan zorgon, amon koran
havis mi de cia man',
kiam estis mi ankoraŭ
cia malgranda infan'.

Kiel povus mi repagi
kion faris ci por mi?!
Mi ne povas eĉ imagi
ke min iu amus pli.

José Asunción Acuna
trad. F. Valdomiro Lorenz

Hebrea

MADRIGALO AL EDZINO

Riproĉis Vi kun guto da envi':
– "Pri mi silentas via Muz', sen emo..."
Sed estas mia tuta viv' – poemo,
kaj la enhavo ĝia estas – Vi.

Okazos tag', de Di' sendata ĉar'
forpreni min Eternon luman venos.
Mi scias, Dio min karese benos,
flustronte veni, per aŭdebla klar'.
Ludigos tiam mi elkorajn klavojn,
de mia kant' ceterajn vers-oktavojn.

Abundos verk', – atest' jen sen devi',
pri mornaj paĝoj, turpaj, sen ornamoj,
sen stel' sur ĝia fon', nur fulm-ekflamoj;
sed ĉiu lumobrilo – estas Vi.

Kaj estos paĝ' glimanta per kristaloj,
kun printemp-flor', kun pepoj de livi',
kun bril' de ros' sur roz-petaloj;
kaj ĉiuj tiuj flagroj – estas Vi.

Vagad' de viv' – en tiu ĉi volumo,
kun lingvoj dek, patrujoj kaj fremdlandoj,
kun aventuroj dek, notitaj en albumo;
la bagna vest' kaj oficir-kostumo,
publik-aplaŭd' kun floraj plekt-girlandoj,
la tuta viv', nom' pseŭda: "Balancil'..."
Do, sciu, ĉu al hejm', aŭ al ekzil', –
balanc-direkto, ĉu al aluvi', –
la aks' de miaj movoj estas Vi.

Jes, multajn kordojn havis mia liro:
de himna psalm' ĝis vagabond-deliro,
de bru-sonad', ĝis triloj de silvi',
ĉu en palac', ĉu en bazar-foiro,
ĝi fontis ĉie dank' al Di-inspiro
de l' sama origin' – sopir' pri Vi.

Zeev Ĵabotinski
trad. J. Kohen-Cedek

Helena

AMKONFESO

Dio ŝajnas al mi la vir' feliĉa,
kiu povas longe vin amadmiri
kontraŭ vi sidante, vin aŭskultante
freŝe babili,

dolĉe ridi. Ve, kia bat' en koro,
kiam vin mi nur minutete vidas,
sufokiĝas en mi la voĉ', la lango
lame rigidas

eĉ balbuti, kaj delikataj fajroj
kuras vibre sub mia haŭt', mi brulas,
turnas min vertiĝ', la oreloj muĝas,
vido nebulas.

Ŝvito frida sur mia korpo fluas,
tremo kaptas min, la vizaĝ' pli palas
ol l' aŭtuna herb', oni kredas jam, ke
morte mi falas...

Sapfo
trad. K. Kalocsay

Hispana

LA MALFIDELA EDZINO

Nu, kredante ŝin fraŭlino
mi ŝin prenis al rivero,
sed ŝi estis jam edzino.
Estis en Jakoba nokto
kaj pro preskaŭ sindevigo.
La lanternoj sin estingis,
kaj ekardis ĉirpe griloj.
Ŝiajn dormajn mamojn palpe
tuŝis mi ĉe stratofino,
kaj tuj sentis ilin flori
kiel hiacinta spiko.

La subjupo amelita
faris en orelo siblon,
same kiel silka peco
kiun ŝirus dek tranĉiloj.
Sen arĝentolumaj kronoj
arboj kreskis en la nigro.
Hundo-horizonto bojis
en la transrivera disto.

*

Preter la rubusaj veproj,
junkaj kaj kratagaj pikoj,
faris mi sub ŝiaj haroj
kavon en la seka ŝlimo.
Mi demetis la kravaton.
Ŝi demetis la ĉemizon.
Mi la zonon kun pistolo.
Ŝi la kvaron da gainoj.
Haŭton tiel fajnan havas
nek konketoj, nek lilioj.
La kristaloj kun lunlumo
havas ne similan brilon.
Sub mi la femuroj ŝiaj
glitis kiel trema fiŝo,
plenaj la duon' de fajro,
plenaj la duon' de frido.
Tiunokte mi vojaĝis
sur perleca ĉevalino
la plej ravan el la vojoj
sen la selo kaj la bridoj.
Mi, ĉar viro, ne rivelos
kiaj estis ŝiaj diroj.
Lumoj de la diskretemo
al mi diktas prudentiĝon.
Ni ekiris de l' rivero,
kaj ŝin kovris sablo, kisoj.
Kun la vento bataladis
glavosvinge la iridoj.

Laŭ la moro mi kondutis,
kiel inda ciganido:
al ŝi donis kudrilujon
grandan, el flaveta silko,

kaj ne volis enamiĝi,
ĉar, estante jam edzino,
sur la voj' al la rivero
ŝi deklaris sin fraŭlino.

Federico García Lorca
trad. Fernando de Diego

Hungara

SONETO

Ĉu vi ne ŝatas al piano veni
En ĉambr' obskura dum vespersilent',
Sensence, reve, stulte, sen atent'
Per unu fingro klavojn trapromeni?

Domaĝe, muziknotojn mi ne konas
Nur palpas mi sur nigro kaj sur blank',
Mi tiam tamen estas muzikant',
Senfinajn muzikpecojn mi komponas.

El kordoj venas jen, feinrespondo,
Kaj min alspiras rev' de sonĝa mondo
Plezur' krepuska, tristo fora ploras,

Vortruboj de l' volupto senkonscia,
Sonĝata ve' de l' nokto agonia,
Ĉio. La koro. Diri mi ne povas.

Ernő Szép
trad. K. Kalocsay

Irlanda

SINDEFENDO DE JUNULINO
(el "La noktmeza kortumo")

Al la ĉarmulino bluokula
ne mankis taŭgeco amorluda,

ŝi ĝuis surdorse la konkurson
kaj duone fermis la okulojn.
Neniam ŝi malbonhumore
la ludon fuŝis kolere, plore,
sed streĉiĝinte provis ĝu-tenton,
gvidis al celo lian penson.
Ŝi ĉirkaŭtenis lin korp' al korpo,
lin tiris al si, kuŝante sur dorso.
Buŝo sur buŝo ŝi lin karesis,
ĉirkaŭ lin siajn krurojn premis,
de l' zon' ĝis genuo lin brose frotis,
sed la malviglulo ne petolis.
Mane ŝi kaptis lian sceptron,
frotis kun ĝi sian ingvenon,
sed kion ajn ŝi molmane faris,
la senfajrulo neniam reagis.

Ofte por li ŝi preparis kukon,
frandaĵon kun ovoj en abundo,
varmigis lakton kun butero,
bone lin nutris por lia kontento.
Ĝi ne pli efikis ol ĝin forĵeti
aŭ antaŭ la ŝafhundon ĝin meti.
Nenio ŝanĝiĝis en oldulaĉo
sen viglo, rido, ĝojo aŭ flamo.
Longe ŝi vivis en tia mizero
kun sentaŭgulo en kuna karcero,
escepte se unufoje, per ŝanco,
dum semajno iu venus en kaŝo.
Ŝi frotis kaj premis sen rezulto,
puŝis, tuŝis per fingro, kubuto.
Mi pensas pri ŝiaj noktoj kun honto,
kun maljunulo sen iu respondo.

* * *

Respondu al mi, vi olda fripono,
diru la veron kun rezono.
Ĉu perdo, se ĉe tablo vi festis,
kie antaŭ vi aliaj ĉeestis?
Ĉu malpligrandiĝas iu kampo
se tie promenas homamaso?

Ĉu vi timas, babilaĉanta pesto,
ke ne sufiĉos por vi la resto?
Ĉu, vakkapulo, ekzistas danĝero
ke iam sekiĝos granda rivero,
ke al maro post tajdo mankos akvo
aŭ ke oni ĝin elĉerpos per taso?
Metu baron al via frenezo,
bandaĝu vian kapon sen cerbo.
Ĉu vi perdu vian malmulton da senco
ĉar virino agas kun donacemo?
Eĉ se ŝi regalus la tutan tagon,
vi povus akiri vian saton.

Brian Merriman
trad. Albert Goodheir

Islanda

VILAĜO EN LA SABENAJ MONTOJ

Staras ĉemure sur la placo, rigardas
la deklivojn tie malsupre
arĝentogrizajn de olivujoj
l' antikvaj arboj ĉiamfekundaj
al foraj montetoj kaj pintoj
murokronitaj, sunnebulozaj

trans la placon, al la virinoj ĉe la puto
gracifiguraj elastaj
en paŝado kiel l' antaŭaj
patrinoj de la generacioj
forrabitaj en la antikveco

je unu flanko fortikaĵo kaj turo
je la alia preĝejaj ŝtupoj
larĝaj kaj altaj
kaj infaneto
silenta kaj sola sur la vakaj ŝtupoj

Sidas en laŭbo en Olevano
pezaj grapoloj de vinberoj super mi
la krepusko filtriĝas tra la vitoj
sur la stratojn krutajn kaj malvastajn
la ĉielo ruĝiĝas mallumiĝas
kaj densas ĉiam pli la krepusko super la tabloj
kaj la ruĝa vino
kiam mi sidas silenta en la murmurado

Impetas tra la tepida mallumo
en direkto al Romo
de paseo ĝis paseo
tra vojo kaj tempo de vivantoj
pensas pri la infano en la vilaĝo
la infano

kaj sidas tie sur la ŝtupoj, ne
infano ne malgranda knabo
kiu vidas la ĉielon malfermiĝi
kaj anĝelojn elpaŝi suben sur la teron
ne, laca homo
alveninta tra longa vojo
la pordo malantaŭ mi fermita
kaj la lumo de la mistero
brulas sur monteto malproksima
trans vidatingo, mi ne scias kie.

Snorri Hjartarson
trad. Baldur Ragnarsson

Itala

LA APERO DE BEATRICE
(Purgatorio XXX, 22-69)

Mi vidis ofte rozkolore brili
ĉe la tagiĝ' la orientdirekton,
kaj la ceteron en seren' trankvili,

kaj en nebul' aperi sunaspekton;
tiel ke pro l' mildigo de l' vaporoj,
post longa gap' ne havis mi difekton.

Simile nune inter nub' de floroj,
falantaj for kaj enen, el la manoj
sin eklevantaj de l' anĝelaj ĥoroj,

sub blank-vualo, kun oliv-ornamoj,
virin' aperis en mantelo verda,
vestata per kolor' de vivaj flamoj;

mia spirit', ne plu estante sperta
de longa tempo sperti la apudon,
je kiu ĝi fariĝis fort-inerta,

sen havi per okul' ian aludon,
pro virt' okulta, kiu de ŝi spiris,
de am' antikva sentis fortan trudon.

Tuj kiam mian vidon al si tiris
la alta virto, kiu min katenis,
antaŭ ol mi for de knabeco iris,

mi turnis min maldekstren kaj mienis,
kiel infan' kuranta al la amo
patrina, se lin tim' aŭ zorg' ĉagrenis,

por diri al Virgilo: "Eĉ ne gramo
da sango ne tremanta restis nune:
mi konas signojn de l' antikva flamo!"

Sed jam Virgilo ne plu estis kune,
Virgilo, mia dolĉa patro kara,
Virgil' gvidinta min al sav' imune;

kaj l' bon', perdita de l' patrin' prajara,
ne estis al rospura vang' utilo,
por ke ĝi ne reiĝu plor-amara.

"Dante, ke malaperis jam Virgilo,
ne ploru nun, ne ploru ankoraŭe:
vi ploros pro alia ja tranĉilo!"

Kiel kontrolas admiral' ĉirkaŭe,
sur pru' kaj poŭpo, kiel en ŝiparo
subuloj agas, kaj admonas laŭe,

tiel sur rand' maldekstra de la ĉaro,
turnante min je l' nomo, pro la vero
ĉi tie registrita de l' deklaro,

mi vidis l' inon, kiun je l' apero
la festo de l' anĝeloj ekvualis,
ekturni sin al mi trans la rivero,

kvankam la drap', kiu de l' kapo falis,
kronita per la verdo de Minervo,
nenion de l' vizaĝ' al mi detalis.

Dante Alighieri
trad. E. Dondi

Japana

LA LUNO SUPER LA RUINO DE KASTELO

Ĉe printempa florfesten' en kastela hal'
sin spegulis luno jen glore en pokal'.
Tra centjara konifer' brilis luma lun'.
Tamen kien kun fier' pasis for la lum'?

Ĉe tendaro de aŭtun' blankis frosta ter',
kaj anseroj sub la lun' flugis kun krier'.
Glavajn klingojn sur la ter' gloris luma lun'.
Tamen kien kun fier' pasis for la lum'?

La ruinon de l' kastel' lumas en noktmez'
nu pro kio, luna bel', ho, en eternec'!
Sur la heĝoj nur heder' restas en silent'.
Kaj ve, ĉe la konifer' fajfas nur la vent'.

Ĉio samas en ĉiel', kaj eternas lum',
ĉe ni falo kaj prosper' do alternas nun.
Por speguli mondon ĉu vi prilumas ĝin?
Ho, la luno brilas plu super la ruin'.

Tutii Bansui
trad. Miyamoto Masao

Jida

KVIN POEMOJ

Jambo

En ĉiu lingvo kanti vi scipovas,
Kaj ĉion vi el fremdaj manoj prenis.
Sed kie oni *viajn* kantojn trovas?
Do estu hom', vekiĝu, tempo venis!

Trokeo

Vian ploron ne aŭskultos Dio,
Al sufero via restas blinda.
Semi devas vi kun larmostrio,
Se la ĝojo estas rikoltinda.

Daktilo

Cion, alsupren l' okuloj plorŝvelaj:
Jen viaj filoj – en kia mizer'!
Senenergiaj, humilaj, anhelaj,
Ili baraktas por sia paner'.

Amfibrako

Veturas la ŝipoj, la homoj jubilas,
En ĝoj' tra ŝaŭmondoj navigi, –
Jen iras la judoj, kaj jam elekzilas,
Por propran kamenon starigi.

Anapesto

Nun forgesu la zorgojn, en alta spirit'
Vi kuracu la vundojn per kantoj kaj vin',
Kaj rakontu kun ĝojo al ĉiu la id',
Kiel estas amara la orfodestin'.

L. L. Zamenhof
trad. N. Z. Maimon kaj W. Auld

Kartvela

KARMENSITO

Atakis vi min rababirde
Kaj puŝis min de l' vojo for.
Ĉu in' vi estas aŭ fajrido?
Ĉe via vid' doloras kor'.

Ne vidas mi de vi defendon,
Eniĝis min via ponard'
Sed, Karmensit' anĝelosenta,
Mi volus esti via part'.

Mi ardas longajn noktojn, tagojn,
Forbrulas per tortura fajr',
Rapidan trovu murdan agon,
Mortigu sen vekiĝa klar'.

Alarmo, tute nevenkebla!
Al iso* fortranĉita voj'.
Neniaj iloj estas eblaj
Vivigi ĝin por rea foj'.

Animo kantas kaj trumpetas,
En kantoj ploras la dolor'.
Interne iu almoz-petas
Ĉe la de li plantita flor'.

Kaj ĉar suferon nekaŝitan
Primokos ĉiu en kverel',
Trapiku koron, Karmensito,
Nur min kunprenu al ĉiel'.

Tician Tabidze
trad. N. Danovskij

---

* *iso* = pasinteco (la verba finaĵo *-is* uzita substantive)

Kataluna

VIA RIDO KANTA

Via rido kanta
kiel ŝprucigil'
kun arĝenta bril'
fluas radianta.

Akvofal' sonanta
kiel sonoril',
fluas en trankvil'
via rido kanta.

Ho, se rido via
estus font' magia
por mia soif'!

Unu guto sola
estus ĝoj' konsola
por la tuta viv'.

Josep Maria López-Picó
trad. Jaume Grau Casas

Keĉua

BALADO EL LA DRAMO "OLLANTAJ"

De l' princin' la plantejon,
kolombet', ne eniru;
vi ŝian maizejon
viziti ne deziru.

Estas bona regalo
la grajno hele flava,
mola la vegetalo,
la frukto mielhava.

Sed por kapti vin, preta
estas jam la kaptilo;
"fuĝu vi, birdo eta"
estas mia konsilo.

Tiun birdon rigardu,
kiu estas kaptita!
Vi pensu kaj vin gardu,
for de morto subita! –

La kolombo ne obeis,
flugis, jen, al la spiko;
malfeliĉa! pereis
jam post unu enpiko!

trad. Francisco Valdomiro Lorenz

Kimra

LA VULPO

Surmonte, dum kapelaj sonoriloj
al suba valo vokis nin invite,
kaj sun' julia per zenitaj briloj
allogis al la supro – jen, subite,
kun flua trot', silente, preterire
la rava formo vojis sen konscio.
Ni fulme ekrigidis, kaj senspire
staris en fikso, kvazaŭ ŝtonotrio
sorĉita. Meze en la pas' serena
ĝi haltis, mirtrafita. Flamoj du
okulis nin super piedo ŝveba.
Poste, sen timo, kun facila flu',
trans supron glitis ĝia rufa felo.
Okazis, ĉesis, kiel fal' de stelo.

R. Williams-Parry
trad. Reto Rossetti

Korea

LA VOLO DE BLUA ĈIELO

De kiam la pacaj prapatroj
ekvivis sur tiu ĉi tero,
prapatroj per siaj du manoj
karesis la bluan ĉielon.

Kaj ĉiam prapatroj tre ŝatis
paroli kun di' kaj anĝeloj.

Post tio la homoj jam perdis
la bluan ĉielon por ĉiam.
De kulpo, ĵaluzo, malbono
blindiĝis l' okuloj de l' homoj,
ĉar gravis al homoj nur ŝviti,
sen kapojn eklevi plu scii.

Kaj dume la homoj ekperdis
de l' blua ĉielo la slangon,
kaj vortojn plurulas nur kelkajn
la homoj per l' pinto de l' lango.
Dum ili ĉielen rigardas,
alfalas ne vorto sed larmo.

Eĉ se sur la tero alternas
somero kaj vintro eterne,
eĉ se jen prosperas patrio
kaj gloro de l' hom' efemera,
la volo de l' blua ĉielo
por ĉiam ŝanĝiĝas neniom.

Ĉi-tage mi supren pensvagas,
al bluo ĉiela fervore,
kaj nun mi denove intencas
kun blua ĉielo paroli,
ĉar volas mi fari ĉi teron
perfekto el blua ĉielo.

Li Unsang (Nosan)
trad. Gim Taekeng

Kroata

PREAŬTUNA TAGO

Jam sen iama ard' la tago,
Sed sunas kaj ridetas ĝi.
Sen krio pasis kaj sen ago.
Lasta vendist' de dolĉglaci'.

Zigzagas tra la urb' senĝoje
La blanka homo de l' somer'.
Folio flava sinkas foje
Ĉe lia puŝoĉar' al ter'.

L' aŭtun' ja sojlas, kun nebuloj
Baldaŭaj kaj kun pluv' kaj morn'.
Kaj maronistoj – angululoj –
La polvon viŝas de la forn'.

Dobriŝa Cesariĉ
trad. Boĵidar Vanĉik

Ksosa

DIO AFRIKON BENU

Dio Afrikon benu
Levu ĝian kornon
De forto kaj prospero
Ho aŭskultu
Tiujn niajn preĝojn
Dio benu
Dio benu
Ho spirito venu
Ho spirito venu
Ho spirito venu
Sankta spirito
Dio benu
Nin la familion
De Afriko.

trad. Phyllis Goodheir

Latina

AL LEŬKONOE
(Odo I, ii)

Ne demandu, scii nocas, kian finon di-decido
Al ni ambaŭ antaŭdonis, Leŭkonoe, nek konsultu

Astrologojn, sed pli kore bonvenigu la destinon,
Ĉu aliaj vintroj sekvos, aŭ ĉi tiu estos lasta
Kiu nun senlace batas onde la Tirenajn rokojn.
Saĝa estu, verŝu vinon, longajn espertigojn tranĉu.
Eĉ dum vi kaj mi parolas, fuĝas la envia tempo.
Ne tro fidu la venontan, sed la nunan tagon pluku.

Horacio
trad. Albert Goodheir

Latva

ROMPITAJ PINARBOJ

Vent' rompis pinarbojn sur la strand'
elstare kreskantajn ĉe duna rand' –
rigardis al for' ili en obstin',
ne povis fleksiĝi por kaŝi sin.

"Vi rompis nin, malamika fatal',
sed venos revenĝo en la batal'.
Per lastaj suspiroj ni flugas for,
la branĉoj pri lukt' flustras kun fervor'!"

Rompitaj pinarboj post venta vip'
elmergis el ondoj kiel ŝip'.
Alfrontas venton fiere la brust',
pernove muĝas batal' pro just':

"Agitu la ondojn vi, kontraŭstar',
ni trovos feliĉon malgraŭ bar'.
Frakasu kaj splitu nin en fervor',
atingos ni foron de l' aŭror'!"

Jānis Rainis
trad. Milda Jakubcova

Litova

NOKTPAŜTADO

Lasta ĉaro forklakis sur ŝoseo.
Nokt' stelhava, kvazaŭ oficiro.
Luna krusto
petas je l' atento, kvazaŭ la ordeno
sur pompa brusto.
Vi, brun- kaj blank-brutaro,
se vi paroli povus,
mi al vi deklarus
pri la traktoro,
pri plugado
kaj pri la sort' amara.

Nun iru, manĝu vi
trifolion ĉu herbon krudan,
kaj mi, karuloj, paŝtos nune
viajn stelojn, la lunon
kaj ĉiujn ĉielajn brutojn.

Antanas Rimydis
trad. P. Lapienė

Livona

LA PATRINO

Ho kial iradas patrino al mar',
ho kial allogas patrinon ondar'?
Ĉu iun atendas sopire patrin'
verŝante nun larmojn amarajn sen fin'?

Sur maron veturis ja fil' ŝia for...
"Al vi ne revenos plu via trezor',
(revenis aliaj kaj diris al ŝi)
La filon, patrin', ne atendu plu vi."

La filon de ŝi jam forrabis la mort'...
Kaj ŝi, ke la ondoj lin rulu al bord',
atendas, por tombon pretigi al fil':
ripozon li trovus sur fund' en trankvil'.

Plej bele ŝi farus ĝin por la filet'
kaj tie ŝi sidus en plena kviet',
ŝi pensus ke estas la fil' en ĉiel'...
Revidi lin tie, – jen jam ŝia cel'.

Kārli (Kōrli) Stalte
trad. Hilda Dresen

Makedona

PAVINO

Sub la flugilo ĝi portas la tagon
sur la beko la guton de kanto
en la okuloj rompitan sonĝon...

Kvar pavoj kun ekkrio interdistranĉadis
kaj el ili ŝprucis la amo kaj sango.

Kvar –
kaj kiam la ulmo super ili kliniĝis
ili vidis la ruĝan riveron
la mortintajn flugilojn
kaj l' okulojn malsataj je amo.

Nun sub la flugilo ĝi portas la mallumon
sur la beko malsaton kaj doloron
en la okuloj neeldireblan indulgon.

Birdo, ĉu la amo doloras –
l' amo kaj la mortinta flugilo?

Slavko Janevski
trad. Zora Heide

Malta

el LA PRALAMPO EN LA MUZEO

Ekkiam en forno
Vi estis bakata,
Per meĉ' kaj oleo
Vi estis jam sata.

Ho, kiom da via
Frataro mortdormis:
Pri l' moroj antikvaj
Al ni ne informis.

Ĉe doma angulo
Kaj kaŭrlumetante
Ho lampo, konfesu,
Dum vivis vi lante,

En frostomalvarmo,
En pluvoj misteraj
Sub klaraj ĉieloj
De l' noktoj someraj,

Ĉu iam aŭdiĝis
Apude voĉ' pia
De Ĉef' kompatema
En rond' familia

Rakonti, kun hela
Rigardo al siaj
Gefiloj baptitaj,
Por scioj iliaj,

Raportojn aŭditajn
De li per vundado
Per ŝtonoj, pri mort' de
Bonuloj per spado,

Ŝiritaj, ŝmiritaj
Per peĉ' kaj oleo,
Flamantaj en reĝa
Ĝarden' de malkreo?

Dun Karm
trad. Carmel Mallia

Nederlanda

LA SINJORINO SUR MIA KAMENBRETO

Vin mi salutas, damo, kaj la ĉapelon pluman.
La bukloj bele ondas, vi ridas sekse rava –
al mi, ĉu? Aŭ al kiu? Ĉu al sinjoro sklava,
kiu, en viaj revoj, vin servas aminduman?

Nu, certe vi bezonas revadon maksimuman
en vivo rompiĝema kiel la plumo pava;
tamen, la biskvitmamoj aspektas dupinthava
rokmaso, surhavanta la ŝaŭmon puntkostuman.

Vi ŝajnas glata, varma, sed por ekzakta scio
buŝtuŝe mi esploru, el kia materio
vi estas, estis, estos ĝis morto pecdisfala.

Vi plej serene regas sur mia kamenbreto
kaj rigardadas rekte, sen ia ektimeto
ke via korpo velkos antaŭ la morto knala.

Edgar du Perron
trad. Jan Holtzer

Norvega

LA DRIADO

El arboverda nesto
driado en junaĝ', –
kaj ŝia juni-vesto
subtila foliaĵ'!
Kaj jen somerkostumo:
konvalo kaj violo
en kapa amindumo
desegne sur la tolo!

Mi mem, el la amikoj,
sopiris kun skrupuloj
al brakoj sub manikoj
kaj ĉastaj mamkupoloj!

Sed roborandan tuŝon
kuraĝis mi neniam,
malfermis tamen buŝon
kaj al ŝi diris iam:

"La bluokula juno
per kiu vi alridas,
parencas al la luno –
ĝin oni ne avidas!
Por vira man' malpia
vi troe ja serenas.
Jen ag' sakrilegia,
se revon mi katenas!"

Ekridis la driado,
respondis mildatone:
"Vi pensas belan penson –
ja tute ne malbone!
Al tiu, kiu honte
per lumbabil' molestas,
mi restos rev' volonte,
rev', kiu mi ne *estas*!"

Olaf Bull
trad. Johan Hammond Rosbach

Okcitana

LAMENTO

Pri Blacatz ni lamentu per simpla vers-sonor',
tristkore, ĉar motivon mi havas por la plor':
perdiĝis al mi bona patrono kaj amiko
kaj kun li tiel multe da noblo kaj valor'.
En tia morta plago neniam espereblas
kompens' alie, ol ke de tiu ĉi sinjor'
la bravan koron prenu kaj manĝu la baronoj,
kaj ĉi senkoraj havu sufiĉe do da kor'.

L' unua ĝin bezonas manĝi, laŭ mia kred',
l' Imperiestro Roma, por fari al si pred'
Milanon, kies burĝoj rigardas lin venkita,
restinta, malgraŭ siaj germanoj, sen hered'.
Kaj la francreĝo manĝu, por gajni Kastilion,
ĉar pro malsaĝ' perdiĝis al li ties posed'.
Sed se al lia panjo ne plaĉas, li ne manĝu,
nenion ja li faras krom kun patrin-konced'.

Ke l' angla reĝo manĝu, estus je mia plaĉ',
tiam li, malkuraĝa, ne estos sen kuraĝ'
rehavi landon, kiun, por lia malhonoro
francreĝo prenis, kiu lin scias pigrulaĉ'.
Kaj el ĝi por du manĝu la reĝ' de Kastilio,
dulanda, sed ne brava por unu landhavaĵ',
sed li sekrete manĝu, ke la patrin' ne sciu,
lin male de ŝi trafos bastona dorsodraŝ'.

Poste, mi opinias, ke estas kor-manĝont'
la reĝo Aragona, por savi sin de hont'
Marsejla kaj Milava; alie la honoron
retrovi li kapablos ja el nenia font'.
Kaj al la reĝ' Navara la kor' doniĝu manĝi,
kiu pli grafo estas ol reĝ' laŭ la rakont';
domaĝe, ke grand-digna altigas Dio homon
kun malaltiga manko de koro sur la kont'.

Kaj multe el ĝi devas manĝi Tuluza Graf',
pensante pri iama kaj nuna sia hav',
ĉar se per kor' alia li ne regajnos perdojn,
tiuj ja ne revenos per proprakora brav'.
Kaj devas manĝi Grafo Provenca, memorante,
ke senheredigito estas sen ia grav',
kaj se li sin multpene defendas kaj subtenas,
li manĝu pro l' ŝarĝegoj de l' lukt' por sia prav'.

Ĉar mi parolas veron, baronoj min malbenas.
Kiom min ili zorgas, tiom min ili ĝenas.

Bela Konsola, estu nur vi al mi kompata.
Kiu min ne amikas, de mi 'stas disdegnata.

Sordello
trad. K. Kalocsay

Persa

ROBAIOJ

Sopiro al hurioj en mia kor' jam estu!
En mia man', jarlonge, la vit-likvor' jam estu!
Ili min diras: "Donu Alah' al vi pentemon!"
Nek donis Li, nek volas mi ĝin: ĝi for jam estu!

Kajam, se vin l' ebrio de vino vestas – ĝoju!
Se tulipvanga juno ĉe vi siestas – ĝoju!
Ne afliktiĝu, ke vi nenio estos morgaŭ:
supozu vin senesta kaj, ĉar vi estas, – ĝoju!

Jes, estos nigrokulaj hurioj en Ĉielo
kaj vino rozkolora kaj lakto kaj mielo:
jam nun ni do rezignu nek vinon nek amoron,
se eĉ en la altaĵoj atendas nin tielo!

El kiuj jam foriris je l' longa vojostreko,
kiu revenis, diri al ni pri la Sekreto?
En ĉi krucej' de l' vojoj de Manko kaj Deziro
nenion lasu: ĝin plu ne premos via treto.

Se tion diri simple, senmetafore, ni
estas ŝakpecoj, kiujn priludas Mond-geni';
kaj ni, post eta rolo sur la tabul' de l' vivo,
revenas unuope en keston de l' Neni'.

Antaŭ ol nokt-atako sur vian kapon krevu,
zorgu, ke vinon roze koloran vi ricevu:
vi estas ne trezoro, ho ventanima stulto,
ke vin, enterigitan, oni el ter' relevu!

Cent korojn kaj cent kredojn pokal' da vin' valoras;
vingluto la reĝlandojn de Ĉu kaj Cin valoras;
krom la rubena vino, ne estas sur la tero
amar', kiu dolĉaĵojn kvin mil kaj kvin valoras!

Ĉar en ĉi monda klostro maldaŭras homfalemo,
Viv' sen amat' kaj vino estas erara lemo.
– Kreita aŭ eterna, la mondo, ho ulemo?
Al mi, jam foriranta, ne gravas la problemo.

"Inferen la drinkuloj!" jen ilia devizo –
por ĉiu sana menso mensoga kateĥizo:
ĉar se la fajr' ekstermu amantojn kaj drinkulojn,
tutnuda kiel mano estos la Paradizo!

Ne sekvu Tradicion kaj al Ordonoj fremdu.
De l' malsatanto vian panpecon ne defendu.
Ne kalumniu, nek eĉ afliktu ies koron –
kaj mi al vi promesas Edenon! Vinon mendu...

Omar Kajam
trad. G. Waringhien

Pola

LA SEPA ANĜELO

la sepa anĝel'
estas tute alia
eĉ nomiĝas alie
Ŝemkel

ne kiel Gabriel
orita
tron-apoganto
kaj baldaken'

nek kiel Rafael
ĥor-konstruant'

ankaŭ ne
Azrael
stiristo de l' planedoj
geometro de senfin'
eminentulo pri teoria fiziko

Ŝemkel
estas nigra kaj nervoza
multfoje punita
kontrabandinto de pekuloj

inter abismo
kaj ĉielo
li stamfas senĉese

li taksas sin sentaŭgulo
oni lasas lin en la trupo
nur pro ŝato de l' nombro sep

sed li ne estas kiel la aliaj
ne kiel hetmano de legiaroj
Mikel'
en skvamoj kaj plumtufoj

nek kiel Azrafael
kiu dekoracias la mondon
gardas abundan vegetadon
kun flugiloj kiel du kverkoj flustrantaj

eĉ ne kiel
Dedrael
apologetik- kaj kabalisto

Ŝemkel Ŝemkel
– l' anĝeloj grumblas
kial vi ne estas perfekta

bizancaj pentristoj
pentrante la sepopon
bildigas Ŝemkelon
simila al la supraj

opiniante
ke ili herezus
pentrante lin tia
kia li estas
nigra nervoza
en jam senpluma aŭreolo

Zbigniev Herbert
trad. Kris Long

Portugala

JOZEFO

Kaj nune, Jozef'?
La festo finiĝis,
la lum' estingiĝis,
popol' malaperis,
vespero frostiĝis,
kaj nune, Jozef'?
kaj nun, Joakim'?
kaj nune, Rajmundo?
kaj nune, vi mem?
Vi mem, sennomulo,
vi mem, mokemulo,
vi, versofaranto,
amanto, plendanto?
kaj nune, Jozef'?

Jen vi, sen edzino,
jen vi, sen dorloto
kaj sen parolado,
jam ne povas plu drinki,
jam ne povas plu fumi,
eĉ sputi ne povas,
jam frostas la nokt',
la tago ne venis,
la tramo ne venis,
ne venis la rido
nek la utopio,
sed venis la fin',
kaj ĉio forfuĝis,
kaj ĉio ŝimiĝis,
kaj nune, Jozef'?

Kaj nune, Jozef'?
Via milda parolo,
viaj febraj momentoj,
manĝegemo kaj fasto,
via biblioteko,

via ora verkemo,
via vitra vestaĵo,
via malkohereco
kaj malamo – kaj nun?

Vi ŝlosilon kunportas
por malfermi la pordon,
sed ne plu estas pordo;
en la mar' volas morti,
sed sekiĝis la mar';
volas iri al Minas,
sed ne plu estas Minas!
Jozefo, kaj nun?

Se vi povus krii,
se vi povus ĝemi,
se vi povus ludi
la vienan valson.
Se vi povus dormi,
se vi povus laci,
se vi povus morti...
Tamen vi ne mortas,
vi rezistas, Jozef'!

Sola en mallumo,
kiel best' sovaĝa,
sen teogonio,
kaj sen muro nuda
por apogi vin,
sen ĉevalo nigra
por fuĝad' galopa,
vi sekvas, Jozef'!
Sed, Jozefo, kien?

Carlos Drummond de Andrade
trad. Sylla Chaves

Praegipta

ADMONO DE SKRIBISTO AL SIA FILO

Filo, se prezentas
vivon metiistoj,
ili nur lamentas
per la longaj listoj
de mizeroj, tristoj.
Bone, se vi atentas.

– Mi forĝisto, vivas
antaŭ forna faŭko.
Pro la martelsvingoj
kalas pli la fingroj
ol krokodilhaŭto,
ol krokodilhaŭto.

– Mi, tanisto, stinkajn
felojn prilaboras,
pro la tremp' kaj viŝo
fingroj pli fetoras
ol putranta fiŝo,
ol putranta fiŝo.

– Mi, sandalfaristo,
penas sen ripozo,
vivas el almozo
vivon, kiu aĉas,
la paseo – ranca,
la futur' – senŝanca.
Mi mizere maĉas
ledojn por la ŝtopo
de l' malsata kropo,
de l' malsata kropo.

– Metalist' mi estas,
oj, ne pli ripoza
ol kampul' terfosa.
Eĉ se l' nokto nigras,
kaj vi kredus, vere
spiras mi libere,

mi ĉe torĉo viglas.
mi ĉe torĉo viglas.

–Ŝtonĉizist' mi estas.
Lacas mia brako,
ĝis vesper' mi kaŭras,
ĝis vespero daŭras
inter ŝtonoj duraj
ĉizo, fajlo, hako.
La tendenoj kruraj
de trostreĉo feblas,
venas lamo frua,
spina kaj genua,
kaj ripoz' ne eblas,
kaj ripoz' ne eblas.

– Estas mi barbiro,
ne finiĝas, oj, la
dom-al-doma iro,
vago sojl-al-sojla.
Kiel flor-al-flore
flugas la abelo,
kuras mi fervore,
sed ne por mielo,
nur por magra pano,
iras vagabondi,
kun vezik' sur mano,
tondi, ĉiam tondi,
sen horeto paca.
Nur kiam mi, laca,
manĝon subnazigas,
tiam por minuto,
mi sur la kubuto
kapon ripozigas,
kapon ripozigas.

–Mi teksisto estas,
por mi la destino
estas, oj, pli vipa
ol eĉ por virino.
Penas mi en ĝiba,
kaŭra korp-situo:

tie mia koro,
kie la genuo.
Iom da sun-oro
vidas mi nur tiam,
se mi subaĉetas
inspektoron mian.
Se l' teksaĵ' ne pretas
ĝis vesper' laŭ plano,
min anstataŭ pano
trafas puno ŝarĝe,
kuŝas krur' kaj mano
inter nodoj, kiel
la lotuso marĉe,
la lotuso marĉe.

– Mi, ŝipul', ĝis Natho
velas for en barko,
tie per pafarko
ĉasas je flamingo,
ĉasas je ansero.
Sed post reatingo
de la hejma tero
mi ne trovas pacon:
antaŭ ol elspiri
la vojaĝan lacon,
devas mi reiri,
devas mi reiri.

– Mi, armilfaristo,
penas sen mezuro,
al fremdland-veturo
min metio gvidas.
Kaj post la reveno,
hejme, en ĝardeno,
mi apenaŭ sidas,
la ripoz' jam ĉesas.
Iri plu necesas,
iri plu necesas.

– Kurier' mi estas.
Oj, se mi trans limo
voji min preparas,

tiam mi pro timo
de l' Aziaj gentoj,
sovaĝbestaj dentoj,
testamenton faras.
Voje ĉio fremdas.
Kio min atendas
en la land' Egipta?
Hejmi en la domo
mi apenaŭ revas,
venas tuj ordono,
oj, kun kor' aflikta
mi reiri devas,
mi reiri devas.

– Masonist' mi estas.
La labor' min urĝas,
akraj vent-atakoj
ŝiras min kaj skurĝas.
Lacas miaj brakoj,
la okul' brulumas,
min mem mi konsumas:
mia propra mano
estas mia pano.
Unufoje tage
mi min lavas-viŝas,
post la sunsubiro
honte humiliĝas
por favor-akiro.
Sub la suno flama
rampe mi ascendas,
sur lotus-ornama
kolonkapo pendas,
monat-post-monate,
kiel ĉaspelate,
pasas mi senhalte
skafald-al-skafalde.
Kaj se per la peno
panon gajnas manoj,
iras mi vespere
hejmen kaj kolere
batas la infanojn,
batas la infanojn.

Fil', vi nun rekonas,
kian sorton donas
la labor' metia.
Tio vin admonas:
estu skriboscia,
estu skriboscia.

trad. K. Kalocsay

Provenca

DURAN-DAL

Vi certe aŭdis jam pri tiu Duran-Dal:
Pri l' spado de Roland' multbatale svingita,
Kaj en Rok' Amadur' ankoraŭ pendigita.
Ĝi falĉis, laŭ la fam', sep mejlojn ĉirkaŭ l' stal'.

Roland', vidante sin en lasta mortbatal',
Plenpugne premis ĝin, sciante ĝin vendita
Al maŭro-saracen', kaj per la kling' hardita,
Por rompi ĝin, al rok' frapegis. La metal',

L' ekfulmo de l' metal' disĵetis tiajn brilojn,
Ke la rabbirdoj tuj, streĉinte la flugilojn,
Ekflugis kun timeg' rondŝvebi en la blu'...

Entuziasmo, vi de kiu mia sango
Ardadas, povu do, se rigidiĝos lango,
Same al rabbirdar' radii, plu kaj plu...

Frédéric Mistral
trad. R. Laval

Romanĉa

LA VILAĜO EN LA SILENTO

Trankvilas la vilaĝo.
Aŭskultu en silent'
Malnovajn la fabelojn
Dirotajn de l' torent'.

De temp' al temp' aŭdiĝas
La noktgardista kant'.
Silentas eĉ la paŝoj
De la preterirant'.

La kampanil' la horojn
Ŝvebigas en l' aer';
Tuj vento ilin portas
For de ĉi tiu ter'.

Eterne brilas alte
La steloj en fervor'.
– Ho kial do ci batas
Tiele, mia kor'?

Peider Lansel
trad. Marcel Jaccard

(el ***Svisa antologio.*** **Redaktis Arthur Baur. Literatura Mondo, Budapeŝto 1939, p. 534)**

Rumana

SED TAMEN...

La pluvo malsana ploretas kaj nigrajn stratetojn regalas,
Frapante malvarmajn fenestrojn, per flustro de seka foli'.
Kaj tiam, neniel sciate, al polvo putreska mi falas.
... Tristetas vespere la ĉambro, por ĉiam lasita de mi!

La flor' ekvivanta rigardas tra vitroj kaj min jam atendas;
Roman' kun folio faldita aspiras je l' tuta traleg';
La bronza Apolo, sur soklo, al pordo rigardon alsendas
kaj via letero – sur tablo – atendas min veni por leg'.

Seĝego meditas ĉe l' fajro, piano pripensas poemon,
La lum' de l' kameno ludadas sur florornamita tapet',
Virinon ŝajnigas kurteno, breteto ekrolas triremon;
La raŭka resono horloĝa ekritmas nun kvazaŭ sonet'.

Mi vidas sur vando bildetojn, memoron servantajn eterne,
La sofon sur kiu min ofte inspiris anĝela reveg'.
Nur min jam ne vidas mi ie, sed tamen min sentas interne,
... kaj via letero – sur tablo – atendas min veni por leg'.

Eugeniu Sperantia
trad. Constantin Dominte

Rusa

LULKANTAS VINTRO BONA

Lulkantas vintro bona
Per kanto monotona
De arba krak-sonor'.

Kaj nuboj senkuraĝas,
Sopire preternaĝas
En landon iun for.

Neĝblovo vent-impetas,
Tapiŝon silkan metas,
Sed tre malvarmas ĝi.

Paseroj amuzemaj
Sin premas orfaj, tremaj
Ĉe vitro kun glaci'.

Frostiĝas birdoj ĉarmaj,
Malsataj kaj malvarmaj,
Kaj lacaj, sen ripoz'.

Kaj neĝa ŝtormo bruas,
Frapante ĉion skuas
Kun forta furioz'.

Birdetoj mildaj dormas,
Dum neĝo kirle ŝtormas,
Rabias kun obstin'.

En sonĝ' al ili venas
kaj kun ridet' serenas
Printempo-belulin'.

Sergei Jesenin
trad. S. Rublov

Sania

PERFORTA EDZINIGO
(el *Aŝma)*

Jen naŭdek naŭ korbparoj da viando,
Kaj potoj plenaj naŭdek naŭ da brando,
Cent-dudek-vira novedz-akompano,
Cent-dudek-ŝarĝobesta karavano.

La granda hordo polvopela
Antaŭen kuras – nub' malhela.
Ĝi estas band' de Rabubala
Por Aŝman rabi, band' fatala.

La domanar' de Rabubala
Senmastraj gastoj sin prezentas;
Sennovedzina nuptofara
Festeno ilin komplimentas.

Ole' sur lipoj, brandfetoro;
De Haĵo sonas naŭzparolo:
"Solenon signas la gastaro,
Drinkado estas nupt-deklaro,
Por edzinig' ja via volo
Ne gravas kiel por mondfaro!"

Se domen uragan' ululas,
Bambubaril' ne povas bari;
Se rok' malsupren sin alrulas,
Kaban' ne povas kontraŭstari.
Amindan Aŝman el la pordo
Eltrenas ili jen per forto!

"Ho, bona filnjo mia kara!
Ho, filnjo Aŝma senkompara!
Je tag' post tago la lunkorno
Kreskadas ĝis plenronda formo.
Post la velkiĝ' la lun' rerondos,
Sed kiam mi vin rerenkontos?!"

Kaj panjon Aŝma ekkonsolas
Dum larmoj en ŝi kaŝe bolas:
"Se neĝtavolo kovras pinon,
La frosto tamen havos finon,
Ĉar super ĝi la sun' manovras;
Se neĝtavol' cipreson kovras,
La arda sun' ĝin ne toleros,
La neĝo certe malaperos.

"Potencas kvankam Rabubala,
Ne restos ĉiam superstara.
Ho, paĉjo, panjo, miaj karaj,
Venigu Ahejn fraĉjon mian,
Ke tuj li savu franjon sian.
Se fraĉjo mia al mi iros,
Revenon certe mi akiros."

trad. Li Shijun

Sanskrita

HIMNO
(el *Rig-Veda*)

Jen leviĝas la Aŭroro kun radioj helaj,
blanke brila kiel ondoj de la akvo klara!
Ĉion bone trairebla, bone atingebla
faras la diino bona, bena, malavara.

Feliĉporte vi aperas, malproksimen brilas,
per radioj lumegantaj tra l' ĉielo flamas,
en majesta pompo, rave, ho diin' Aŭroro,
vian bruston vi apertas, lukse vin ornamas.

Sur brilante ruĝaj taŭroj venas la diino
malproksimen penetranta kaj serene rida,
kaj forpelas la tenebrojn kiel arkpafanto,
kiel malamikon ĉara batalant' rapida.

Ĉiuj vojoj en la montoj per vi estas bone traireblaj,
vi de l' propra lumo lumas kaj tra l' akvoj pasas en senvento,
ho diino, kiu iras larĝajn vojojn, Noktfilin' majesta,
portu al ni donojn riĉajn, por ke nutron havu la homgento!

trad. K. Kalocsay

Serba

VESPERO ĈE L' INSULETO

Marbluo svenas,
Venas
Krepusk' vespera jam.
Ĉe l' roko falas,
Palas
La lasta suna flam'.

Tra l' ŝtonoj tremas,
Ĝemas
La sonoril-arpeĝ'.
Susur' murmuras,
Ĵuras
La plebo en la preĝ'.

En klin' sieĝas,
Preĝas
Skeletoj antaŭ Krist'.
Sed Li rezigne,
Digne
Nur mutas al insist'!

La sonĝ' sin trenas,
Venas

Krepusk' vespera jam.
Ĉe l' roko falas,
Palas
La lasta suna flam'.

Aleksa Šantić
trad. Ivo Rotkvić

Siria

el LA KANTO PRI LA PERLO

Kiam mi estis nur infaneto,
loĝanta en mia regno, la gepatra domo,
Kiam per la riĉo kaj lukso
de miaj prizorgantoj mi kontentis,
El nia hejmlando orienta
ekipis miaj gepatroj kaj forsendis min.
Per riĉaĵoj el nia trezorejo
ili jam preparis por mi ŝarĝon:
Granda ĝi estis, sed nepeza,
kian mi povus porti sola,
Oro ĝi estis el Bet-'Ellaje,
kaj arĝento el Granda Gazak,
Kun hindaj kalcedonioj,
kaj juveloj el Bet-Qaŝan.
Kaj ili donis al mi diamanton,
kapablan penetri feron.
Sed ili forprenis mian gloron,
kiun ili amplene faris,
Kaj mian togon el purpuro,
tonditan kaj kudritan laŭ mia mezuro.
Ili faris por mi ordonon,
skribitan enkore, ke mi ne forgesu:
"Se vi subiros en Egiptujon
kaj reportos la perlon,
Kiu estas en la mezo de la maro
Ĉirkaŭata de siblanta serpento,
Vi repovos porti vian gloron
kaj vian togon kuŝantan sur ĝi.
Kun nia subreganto, via frato,
heredanto de nia regno vi estos".

Mi forlasis la Orienton kaj subiris
akompanate de du gvidantoj,
Ĉar la vojo estis timiga kaj malfacila,
kaj mi tre juna por vojaĝo.

trad. Donald Broadribb

Skota

LA IAMO LONGE FOR

La pra-konatojn ĉu ni lasu
velki el memor'?
Ĉu ni ne pensu kare pri
la iamo longe for?

Iamo longe for, karul',
iamo longe for:
Ni trinku simpatie pro
la iamo longe for!

La kruĉojn do ni levu kaj
salutu el la kor',
kaj trinku simpatie pro
la iamo longe for!

Montete iam kuris ni
kaj ĉerpis el la flor',
sed penan vojon spuris ni
post iamo longe for.

Geknabe ni en fluo vadis
ĝis vespera hor',
sed maroj muĝis inter ni
post iamo longe for.

Do jen la mano kamarad',
ni premu kun fervor'
kaj trinku ni profunde pro
la iamo longe for!

Robert Burns
trad. Reto Rossetti

Slovaka

LA VIVO

Animon mian pacan spite
vin, Viv', defias mi invite
de l' Aŭror' ĝis vesperbrilo
pro bel-trezor' de l' mont-lulilo

Ho, Vivo, ek! Vin preta igu
al ĉeval', glavon senrustigu
ol vesperiĝos en la valo
atendos mi en ŝirma ŝtalo

Nebul' ĝis tie malaperos
min, Vivo, neniu superos
kaj antaŭ plenvespera paso
kuŝos vi tie en kiraso

Pri unu el ni decidite...
Vin, Viv', defias mi invite
de l' Aŭror' ĝis vesperbrilo
pro bel-trezor' de l' mont-lulilo.

Ivan Krasko
trad. Oldřich Knichal

Slovena

CIPRESO

Jen neĝo tombojn kovris ŝute
kaj ĝi fajreras nun sen ĉes',
jam velkis rozbukedoj mute
kaj plue verdas nur cipres'.

Ĝi verdas: monument' en solo
sur lasta domo de la hom'.
De kiam kaj pro kies volo,
nenie skrib', nenie nom'.

La vento blovas kaj senigâs
la arb' je l' fajna, perla prujn'.
Kiu li estas, ĉu feliĉas
hom' sube, arbo, diru nun.

Kaj cipreso ne obstinas,
al vento kapon fleksas re,
daŭre for kaj al sin' klinas,
dirante jes, dirante ne.

Anton Medved
trad. J. Velebit

Sumera

el LA INFERIRO DE IŜTAR

La pordist' la buŝon apertis ekparolante
kaj li kriis al la reĝino Iŝtar:
"Haltu, haltu, grandsinjorino,
lasu min iri kaj raporti al la reĝin' Ereŝkigala."
Kaj li eniris kaj raportis:
"Sankta, sombra Ereŝkigala,
jen, fratino via, Iŝtar, venis al la suba mondo,
Iŝtar staras antaŭporde kaj minacas trapenetri."

Tion ekaŭdis Ereŝkigala
kaj ŝi fariĝis kiel kan' falĉita,
kiel ekpikita de skorpio,
poste buŝaperte parolis:

"Ho, gardisto de l' akvoj sombraj,
kio do portis al mi ŝian koron?
Iru, apertu al ŝi la pordojn:
ŝi enpaŝu, sed nudigite,
kaj ŝin fermu, kiel aliajn.
Leĝo validas, Leĝo firmas."

Iris Namtar, iris al Iŝtar
kaj la pordon al ŝi apertis
kaj ŝin genuflekse salutis:
"Venu, grandsinjorino Iŝtar,
ĝojas al vi la mondo de l' akvoj sombraj!"

Kaj li pasigis ŝin tra l' unua pordo,
forprenante la diademon
disde l' abundaj metallumaj bukloj.
"Pordgardisto, kial preni la diademon?"
"Psit, enpaŝu, jen ordon' de Ereŝkigala.
Leĝo validas, Leĝo firmas."

Kaj li pasigis ŝin tra la dua pordo,
forprenante la kolieron
disde la alabastre blanka
bellinia kolo diina.
"Pordgardisto, kial preni la kolieron?"
"Psit, enpaŝu, jen ordon' de Ereŝkigala.
Leĝo validas, Leĝo firmas."

Kaj li pasigis ŝin tra la tria pordo,
forprenante la orajn ringojn,
lasis senorname la manojn
kun patrine karesa polmo,
kun pantere akraj ungoj.
"Pordgardisto, kial preni la orajn ringojn?"
"Psit, enpaŝu, jen ordon' de Ereŝkigala.
Leĝo validas, Leĝo firmas."

Kaj li pasigis ŝin tra la kvara pordo,
forprenante la braceletojn,
lasis senorname la brakojn,
tiujn brulajn kaj beatigajn,
lasis senorname la krurojn,
tiujn kurajn, flirti facilajn.
"Pordgardisto, kial preni la braceletojn?"
"Psit, enpaŝu, jen ordon' de Ereŝkigala.
Leĝo validas, Leĝo firmas."

Kaj li pasigis ŝin tra la kvina pordo,
forprenante la mamŝildetojn.
Dolĉaj diskoj, par' de lunetoj

disradiis nun defiante
al la nigro de noktoj eternaj.
Namtar mem, klinante la kapon
per admir' al ili omaĝis.

"Pordgardisto, kial preni la mamŝildetojn?"
"Psit, enpaŝu, jen ordon' de Ereŝkigala.
Leĝo validas, Leĝo firmas."

Kaj li pasigis ŝin tra la sesa pordo,
forprenante la sorĉan zonon,
viron veni vokantan zonon
disde balance deloga kokso,
disde dolĉe lulata lumbo,
disde loko de mola musko
pli tenebra ol ombro de nokto,
pli altira ol la vortic' Eŭfrata.
"Pordgardisto, kial preni la sorĉan zonon?"
"Psit, enpaŝu, jen ordon' de Ereŝkigala.
Leĝo validas, Leĝo firmas."

Kaj li pasigis ŝin tra la sepa pordo,
forprenante la tulan tukon,
lastan kovron leĝeretan
de la nobla nudo diina.

Infre inter akvoj sombraj Iŝtar staras naskiĝnuda,
tie lumas kiel lampo ŝia nudo tra l' tenebroj,
tie lumas Lunidino kiel lun' en nokt' eterna.

trad. K. Kalocsay

Sveda

ANTAŬSPEGULA KANTO DE LIBIDELA
(el *Aniaro*)

Alvenu vidi, palpi kiel
komikas mia vivsitu'.
Se petos vi kaj donos ĉiel,
vi vivuternjon venos plu.

Memoron pri l' galop' tra-Lira
kunprenus vi al rendevu'.
Vivloĝas ĝi en silk' drapira,
uter' de via vivoflu'.

Vi tra l' dezertoj Liraj rajdas:
frapu ĉe mia pordotru'.
Ĉi viv' per via semo tajdas,
uter' de via vivoflu'.

Ekstere fiksrigarde fridas.
Venu al mi por varminflu'.
Se l' fridon kune ni dissplitas,
ho, varma pens' en ĉielblu'.

Libidel estus respektata,
ne plu sub ŝmir' de porka hord'.
Jen mia korp'; ho delektata
ĝi estas jam en bild' kaj vort'.

Harry Martinson
trad. Bertil Nilsson kaj W. Auld

Tiĉina

LA DORNOFRUKTO

Aŭgustan tagon, kiam al la mano
jam falis la unua frukto pruna,
dornfrukton vidis mi en brilo suna,
acerban, sur la arbo de kaŝtano.

Novembre mi revenis, kaj ne vane,
ĉar ankaŭ ĝi, kun la folio bruna
falis, kaj en lulilo oportuna
proponis sian kernon, brile, sane.

Ho frat', similu kernon ĉi singardan.
Vin ofte kovru per armvest' sekura,
preferu vivi en la alt' ermita.

Por stulta hom-amas' estu dornita,
sed nutru en vi, kun dolĉec' obskura,
trezoron vian intiman kaj tardan.

Giuseppe Zoppi
trad. K. Kalocsay

Tupia

AMKANTO DE AMAZONAJ INDIANINOJ

Rudá, Rudá,
loĝanto de l' ĉiel',
de l' pluvo vi amik',
mi nun petegas vin:
faru ke l' amat'
sentu amon nur al mi,
kaj ne al alia ajn virin',
kaj ĉi-nokte li vizitu min.

trad. Francisco Valdomiro Lorenz

Turka

LA VENTOJ DE LADOS

Tremaj kaj vibrantaj,
kiel sango ŝprucanta el vejnofundo,
la ventoj de Lados ekkomencis blovi.
Mi aŭskultas ĉi aeron,
la pulso malplirapidiĝis,
neĝas nepre sur la montopintoj de Ulada.
Kaj la ursoj, certe, tie alte, dormas,
mirindaj kaj fieraj,
sur la kaŝtanfolioj ruĝaj.

La poploj nudiĝas en la ebenaĵo,
la silkoraŭpoj estas enfermiĝintaj.
De momento al momento
la tero rehejmiĝos
en la obskurajn domojn de l' kreitaĵo.
Kaj mi alian vintron pasos,
min varmigante ĉe l' fojno de mia kolero
kaj de mia sankta espero.

Nazim Hikmet
trad. Aldo de'Giorgi

Ukraina

PRELUDOJ DE STELOJ

Ĉe rebriloj de firmament' –
mar' odoris je freŝa fojno...
Brakumadis la ondojn Vent'
kaj portadis al borda sojlo.

Ni direktis boaton tra l' nokt'
man' en mano kaj kor' en koro.
Ĵuris ni, ke l' anima nod'
ne disiĝos eĉ malgraŭ foro.

Nigro haŭta, diklipa amik'.
Brilis vi kiel klingo en forto.
Malproksimen de nia korto
vi rigardis al via Afrik'.

En rebriloj de firmament'
mar' en herbaj odoroj tremis.
Brakumadis la ondojn Vent'
kaj stelarojn al bordo semis.

Mikola Vingranovskij
trad. D. Kolker

Uzbeka

ĈE LA BORDO DE BALTA MARO

Vasteco mara, bela estas vi!
Kun mara ondo min unuigante,
Mi volus naĝi, venton superante,
Kun vi miksante revojn de l' pasi'!

Patrinsimile, jen, boaton mian
Karesas vi kaj lulas amkviete;
Inspiron donacante al poeto
Per ludo de ondaro via!

Dum hor' tempesta estas vi feliĉa!
Potenca vent' ondegojn supren levas,
leviĝas ili, ili tondre krevas
Kaj valas, perlojn disŝutante riĉe.
Kareso mara, milda estas vi!

Ĥamid Alimĝan
trad. Petro Poliŝĉuk

Velŝa

VESPERO EN VILAĜO

Ekdormas la vilaĝo en sia verda nesto;
El la tegmentoj flugas malpeza, blua fum'.
Ripozas la naturo en trankvila majesto,
Arbaroj kaj kamparo kvietas en mallum'.

Flamanta nubo ruĝa promenas fantazie,
Lumigas la ĉielon per sia fajra brul',
Kaj iom post iome miksiĝas harmonie
Al la subtila grizo de l' krepuska nebul'.

Maljunaj kamparanoj, ĉe sia pord' sidantaj,
Diskutas pri la kampoj, pri l' probabla veter':
Vinberoj estas belaj, kaj la rikoltoj grandaj;
Ja monon oni havos per tiu ĉi prosper'.

Beletaj junulinoj promenas sub salikoj.
Marŝante ĉiuj kunaj kun mano en la man',
Sed dume junaj knaboj, sendube la amikoj,
Ilian vojon baras en petola ĉikan'.

Kaj ĉiu volus kapti la manon de la kara,
Okazas ŝerc-atakoj sen fino kaj sen brid':
Sonoraj voĉoj puraj, ridado juna, klara;
La luno en ĉielo indulgas al ĉi rid'.

Kuŝantaj en la stalo, la bovoj pac-serenaj
Remaĉas en kvieto, sen movo kaj sen ard',
Dum la okuloj rondaj kaj milde revo-plenaj
Briletas en la ombro kaj vagas sen rigard'.

Alice de Chambrier
trad. "Mad Mevo"

Vjetnama

BARKAROLO DE PARFUMA RIVERO

Sur Parfuma Rivero
Per remiloj mi ritmas.
Supras ĉiela bluo,
Subas spegula fluo.
Per remiloj mi ritmas
Sur Parfuma Rivero.

Leviĝas, stariĝas kaj velkas jen la lun'.
Solece vagade mi fluas kune kun
Ĉifona sampano destina.
Sed mi nun ankoraŭ fraŭlina.
La teda sampano senĉese min portas,
Ho kial diboĉo min ĉiam perfortas?
Ĉu scias mi, kiam do, mia plenbelo
Ne sentus plu honton, ne plu, ho ĉielo!
Ve amo, trompema perfida ŝatato.
Ĉu iam refarus min virga la fato?

– Kial ne, ho povra publika fraŭlino,
Vi morgaŭ retrovos en koro kaj sino
Parfumon plej decan de rozoj, diantoj,
Purecon plej klaran de montaj fontkantoj?
Ĉar morgaŭ nov-vento miriga de la temp'
En ravon vin portos, ĝardenon de printemp'.
Kaj morgaŭ vi staros fiera, serena,
Vi ne plu vivdaŭros en koto malbena.
Ja morgaŭ, ja morgaŭ vivaĉaj inkuboj
Ekkrevos tuj kvazaŭ ĉi nigraj nokt-nuboj.
En daŭre sinsekvaj tagnoktoj, ho fraŭlin',
Brakumu radian morgaŭon en la sin'.
Sur Parfuma Rivero...

To Huu
trad. Dao Anh Kha

Jam aperis en la

Jubilea Kolekto
Jarcento de Esperanto:

- **Esperanta antologio. Poemoj 1887-1981.**
Red. William Auld. Rotterdam: UEA, 1984 (2-a eld.). 12+888p. 22cm. Ilus. Bind. Jubilea Kolekto n-ro 1. Pli ol 850 originale verkitaj poemoj de 163 poetoj donas superrigardon pri la tuta poezia kulturo de Esperanto. 60,00 gld.

- **Plena analiza gramatiko de Esperanto.**
K. Kalocsay, G. Waringhien. Rotterdam: UEA, 1985 (5-a eld.). 599p. 22cm. Bind. Jubilea Kolekto n-ro 2. La plej detala kaj fidinda priskribo kaj preskribo de ĝusta Esperanto. 48,00 gld.

- **Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj.**
Gaston Waringhien. Rotterdam: UEA, 1989 (2-a reviziita eldono kun apendico). 452p. 21cm. Bind. Jubilea Kolekto n-ro 3. Klasika studaro pri la fontoj kaj strukturo de Esperanto. 48,00 gld.

- **Trezoro. La Esperanta novelarto.**
Div. aŭtoroj. Red. R. Rossetti kaj H. Vatré. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1989. 948p. 21cm. Duvoluma. Jubilea Kolekto n-ro 4. Riĉa kolekto de noveloj, romanfragmentoj kaj aliaj prozaĵoj ĉerpitaj el unu jarcento da originala verkado. 69,00 gld.